

ALLAN KARDEC

TRADUKIS AFFONSO SOARES KAJ PAULO SÉRGIO VIANA



POSTMORTAJ VERKOJ



LORENZ

POSTMORTAJ VERKOJ

POSTMORTAJ VERKOJ

“Necesas diskonigi la moralon kaj la veron” —
MUMS

de

Allan Kardec



(Organizita de P. G. Leymarie)
El la franca lingvo tradukis
Affonso Soares kaj Paulo Sérgio Viana



LORENZ

Copyright © 2020 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA – FEB (BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO – BSF)

Kuneldono de Brazila Spiritisma Federacio kaj Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, nº 57, Engenheiro Leal, Rio de Janeiro
CEP 21370-171 Rio de Janeiro (RJ) – Brasil

1ª eldono – 1ª preskvanto – 1 milo da ekzempleroj – 8/2020

ISBN 978-65-5570-084-8

Titolo de la franclingva originalo:

Œuvres posthumes

(Paris, 1890)

Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Neniu parto de ĉi tiu eldonaĵo povas esti reproduktita, storita aŭ transsendita, tute aŭ parte, per ajnaj metodoj aŭ procedoj, sen rajtigo de la posedanto de la *copyright*.

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA – FEB
SGAN 603 – Conjunto F – Avenida L2 Norte
70830-106 – Brasília (DF) – Brasil
www.febeditora.com.br
editorial@febnet.org.br
+55 61 2101 6198

Mendoj de Libroj al la Komerca Fako de FEB
Tel.: (61) 2101 6155/6177 – comercial@febnet.org.br

Mendoj de libroj al la Eldonejo Lorenz
Tel.: (21) 98485 4539 – editora_lorenz@uol.com.br

Dados Internacionais de Catalogação na Publicação (CIP)
(Federação Espírita Brasileira – Biblioteca de Obras Raras)

K18p Kardec, Allan, 1804–1869

Postmortaj verkoj / por Allan Kardec; organizado por P. G. Leymarie; [tradução de Affonso Borges Gallego Soares e Paulo Sérgio Viana da 1ª edição francesa de 1890]. – 1. ed. – 1. imp. – Brasília: FEB; Rio de Janeiro: Lorenz, 2020.

303 p.; 23 cm

Tradução de: *Oeuvres posthumes*

Conteúdo parcial: Biografia de Allan Kardec – Discurso pronunciado junto ao túmulo de Allan Kardec por Camille Flammarion

Inclui apêndice

ISBN 978-65-5570-084-8

1. Espiritismo. I. I. Federação Espírita Brasileira. III. Título.

CDD 133.9
CDU 133.7
CDE 85.01.00

Enhavo

Klariga Noto.....	9
Biografio de Allan Kardec.....	13
Parolado eldirita de Camille Flammarion ĉe la Tombo de Allan Kardec	21
Al la abonantoj de la Spiritisma Revuo	29

UNUA PARTO

Spiritisma kredkonfeso rezonata	33
I. Dio.....	33
II. La animo	34
III. Kreado	36
Manifestiĝoj de la Spiritoj	41
Karaktero kaj religiaj sekvoj de la manifestiĝoj de la Spiritoj	41
I - La perispirito kiel principo de la manifestiĝoj.....	43
II - Vidmanifestiĝoj	45
III - Transfiguriĝo. Nevidebleco	47
IV - Liberiĝo de la animo	48
V - Aperoj de vivantaj personoj. Dukorpeco	52
VI - Pri la mediumoj	52
VII - Pri obsedo kaj posedo	60
Pri la Duoblaj Homoj. Pri la Aperoj de Vivantoj	65
Diskutado pri la Ideo de Ekzisto de Interaj Estuloj Inter la Homo kaj Dio.....	73
Kaŭzo kaj Naturo de la Somnambula Klarvideco.....	79
Klarigo de la fenomeno de klarvideco	79
La Duobla Vidado.....	83
Konado de la estonteco. – Antaŭvidoj	83

Enkonduko en la Studadon de la Fotografio kaj Telegrafio de la Penso.....	89
Fotografio kaj Telegrafio de la Penso.....	93
Studo pri la Naturo de la Kristo	99
I. Fontoj de la pruvoj pri la naturo de la Kristo	99
II - Ĉu la mirakloj pruvas la diecon de la Kristo?	101
III - Ĉu la paroloj de Jesuo pruvas lian diecon?.....	103
IV - Paroloj de Jesuo post sia morto	110
V - Duobla naturo de Jesuo.....	112
VI - Opinio de la Apostoloj.....	113
VII - Antaŭdiroj de la profetoj koncernantaj Jesuon	116
VIII - La Vorto fariĝis karno	118
IX - Filo de Dio kaj filo de homo.....	119
Pereiga Inflado de la Materiismaj Ideoj	123
Pri la artoj ĝenerale kaj ilia regenerado per Spiritismo	123
Teorio de la Beleco.....	127
La Ĉiela Muziko	135
La Spiritisma Muziko	139
La Vojo de la Vivo	147
Kvin Alternativoj por la Homaro.....	153
I – Materiisma doktrino	153
II – Panteisma doktrino.....	155
III – Diisma doktrino.....	155
VI – Dogmiska doktrino.....	156
V – Spiritisma doktrino.....	157
La Spiritita Morto.....	159
La Estonta Vivo	163
Demandoj kaj Problemoj	169
Kolektivaj kulpelpagoj.....	169
Egoismo kaj Fiero	177
Iliaj kaŭzoj, iliaj rezultoj kaj la rimedoj por ilin detruiri.....	177
Libereco, Egaleco, Frateco	183
La Aristokratioj.....	187
La Dizertintoj.....	193

DUA PARTO

Ekstraktoj, <i>in extenso</i> , el la libro de <i>Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon</i>	207
Mia unua iniciĝo en spiritismon	207
Mia protektanta Spirito.....	211
Mia spirita gvidanto	213
Unua revelacio pri mia Misio.....	215
Mia Misio.....	216
Eventoj	217
La Libro de la Spiritoj.....	218
Mia misio.....	219
La Libro de la Spiritoj.....	221
La Libro de la Spiritoj.....	222
La spirita tiaro	223
Unua sciigo pri nova enkarniĝo.....	225
La Spiritisma Revuo	226
Fondo de la Pariza Spiritisma Societo.....	228
Daŭro de miaj laboroj	229
Okazaĵoj. Papeco.....	229
Mia Misio.....	230
Estonteco de Spiritismo	231
Mia Reveno.....	231
Aŭtodafeo de Barcelono. Konfisko de libroj	232
Aŭtodafeo de Barcelono	233
Mia sukcedulo.....	234
Imitado de l'Evangelio	236
La Eklezio	238
« Vivo de Jesuo », de Renan.....	239
Anoncantoj de la tempesto.....	240
La nova generacio.....	241
Instrukcio por la sano de S-ro Allan Kardec.....	244
Regeneriĝo de la homaro.....	246
Laŭgrada antaŭenirado de Spiritismo. Skismoj kaj baroj.....	251
Spiritismaj publikaĵoj	252
Eventoj	252
Mia nova verko pri la Genezo.....	253
La Genezo.....	254
Okazaĵoj	255
Miaj personaj laboroj. Diversaj konsiloj.....	255

Ekster Karitato, nenia savo	257
Projekto – 1868	259
Centra sidejo	260
Spiritisma Instruado.....	261
Propagando	261
Vojaĝoj	261
Konstitucio de Spiritismo - Elmonro de Motivoj	263
I - Enkondukaj konsideroj.....	263
II - Pri skismoj	265
III - La estro de Spiritismo	267
IV - Centra Komitato	270
V - Institucioj akcesoraj kaj komplementaj de la centra komitato.....	273
VI - Agadkampo de la centra komitato	274
VII - Konstituaj statutoj.....	276
VIII - Pri la programo de la kredoj	278
IX - Vojoj kaj rimedoj	281
X - Allan Kardec kaj la nova konstitucio de Spiritismo.....	283
Spiritisma Kredo	289
Antaŭparolo	289
Fundamentaj principoj de la spiritisma doktrino rekonataj kiel sendubaj veraĵoj.....	293
Eksplika Noto	295
Apendico	301
Kazo de duobla vidado.....	301
Nepublikigita paĝo de Allan Kardec	301
Imitado de L' Evangelio.....	302
Fenomeno de klarvideco.....	302

KLARIGA NOTO¹

La zorgo de Allan Kardec pri la publikigo de siaj tekstoj

Ĝeneraleco kaj akordo en la instruado, jen la esenca karaktero de la doktrino, la kondiĉo mem de ĝia ekzisto, el kio rezultas, ke ĉiu principo, kiu ne ricevis la konsenton de la plimulto, ne povas esti rigardata kiel konsista parto de tiu doktrino, sed ja kiel nura unuopa opinio, pri kiu Spiritismo ne povas respondi. (KARDEC, Allan. La Genezo, “Enkonduko”).

En sia parolado ĉe la tombo de la Kodiginto, Camille Flammarion tradukis per simplaj vortoj la plej elstarajn trajtojn de la personeco de Allan Kardec, kvalitoj, kiuj montriĝos esencaj en la organizado de la Spiritisma Doktrino:

Allan Kardec estis tio, kion mi simple nomos “enkarniĝinta saĝo”. Racio rekta kaj prudenta, li senĉese aplikadis al sia seninterrompa verko la intimajn indikojn de la komuna saĝo. Ĉi tio estis ne malpli granda kvalito en tiu ordo de aferoj, kiuj nin okupas, sed estis, oni povas ĝin aserti, la unua kaj la plej altvalora el ĉiuj. Sen ĝi la verko ne povus fariĝi populara nek etendi siajn longegajn radikojn en la mondon. (Spiritisma Revuo, jaro XII, Majo 1869.)

Persono serioza, saĝa, konscia pri la grandeco de la misio al li konfidita, la Kodiginto sin fordonis al la grandega laboro kun prudento, metodo, organizemo, disciplino, humileco, sciante, ke la revelacio fontas el la rondo de la superaj Spiritoj, malgraŭ la moralaj kaj intelektaj kvalitoj, kiuj aŭreolis al li la frunton.

¹ Teksto aldonita de la eldonejo de la Brazila Spiritisma Federacio al la portugallingva traduko de Evandro Noleto Bezerra.

Oni povas esti tre sagaca, eĉ tre instruita, kaj ne havi komunan saĝon; nu, la unua signo de neperfekta juĝado ĉe iu persono estas opinii neeraremasian propran juĝon. (La Libro de la Spiritoj, “Enkonduko”, n-ro XVII.)

Por la formulado de la principoj, kiuj konsistigas la fundamenton de la Spiritisma Doktrino, Allan Kardec adoptis la kriteriojn de *universaleco* kaj *interkonformeco* por taksado de la instruoj de la Spiritoj, agante kiel juĝisto senpartia, sobra, kiu ne ŝparas al si penojn por senigi la fundamentojn de Spiritismo je la homaj neperfektaĵoj.

Tia estas la bazo, sur kiu mi apogas min, kiam mi formulas iun principon de la doktrino; ne tial, ke io estas konforma al miaj ideoj, mi ĝin rigardas kiel veran; mi ne arogas al mi esti la superega arbitracianto de la vero, kaj al neniu mi diras: “Kredu je tiu afero, ĉar mi tion asertas al vi.” Mia opinio estas en miaj propraj okuloj ne pli ol persona opinio, kiu povas esti ĝusta aŭ falsa, ĉar mi ne estas malpli erarema ol iu ajn alia. Ne ankaŭ tial, ke iu principo estas al mi instruita, ĝi estas por mi vero, sed tial, ke ĝi ricevis la sankcion de la konsento ĝenerala.

En mia pozicio, ricevante la komunikaĵojn de preskaŭ mil seriozaj spiritistaj grupoj, dissemitaj sur la plej diversaj punktoj de la globo, mi kapablas vidi la principojn, sur kiuj tiu akordo sidas; tiu observado min gvidis ĝis la hodiaŭa tago, kaj ankaŭ ĝi min gvidos en la novaj kampoj, kiujn Spiritismo estas vokita esplori. Efektive, jam de kelka tempo mi rimarkas, en la komunikaĵoj venantaj el diversaj flankoj, tiel el Francujo kiel el aliaj landoj, ke Spiritismo estas irona novan vojoj per malkaŝoj de tute speciala naturo kaj ke sonis la horo, ke ĝi faru paŝon antaŭen. Tiuj malkaŝoj, ofte faritaj per duonvortoj, forpasis nerimarkitaj de multaj el tiuj, kiuj ilin ricevis; multaj aliaj kredis sin ties solaj posedantoj. Se mi prenis ilin izolitaj, ili estus por mi senvaloraj, sed ilia koincido donas al ili altan gravecon, kiun oni povos juĝi poste, kiam estos veninta la momento doni ilin en la grandan lumon de la publikiĝo, ĉar tiam ĉiu memoros, ke li ricevis instruojn en la sama senco. Ĝuste tiu ĝenerala movado, kiun mi observas kaj kiun mi studas kun la helpo de miaj spiritaj gvidantoj, helpas min juĝi la oportunecon fari ion aŭ deteni min. (La Evangelio laŭ Spiritismo, “Enkonduko”, n-ro II.)

Estante do konvinkita pri la progresiva karaktero de la Spiritisma Doktrino kaj pri la nekontraŭebleco de la “Leĝo de Progreso” (*La Libro de la Spiritoj*, Tria Parto, Ĉapitro VIII), la Kodiginto provis doti Spiritismon per efikaj rimedoj por ĝia perfektigi, kiuj ebligus klarigon kaj profundigon de demandoj nur sinteze traktitaj en la fundamentaj verkoj. Tiucele li eldonis la *Spiritisman Revuon*, publikigitan sub lia rekta respondeco ĝis lia elkarniĝo en 1869, kiam ĝi komencis esti administrata de liaj sekvantoj.

Rigarde al tiu celo, Allan Kardec transformis ĝin en iaspecan liberan tribunon, per kiu li sondis la reagon de homoj kaj la impreson ĉe la Spiritoj pri certaj temoj ankoraŭ hipotezaj aŭ miskomprenataj. Funkciante kiel provtereno, la *Spiritisma Revuo* permesis al li pridiskuti kelkajn principojn, el kiuj multaj troviĝis sub la formo de skizoj pli aŭ malpli elvolvitaj, antaŭ ol li ilin akceptis kiel konsistan parton de la Doktrino. Pruve estas, ke multenombraj ĉapitroj de la fundamentaj verkoj de la Kodigo, tute aŭ kun malgrandaj modifoj, publikiĝis pere de la *Spiritisma Revuo*.

La Kodiginto mem eksplikas tiun metodologion:

Sed ĉar nia celo estas trafi la veron, ni akceptos ĉiujn al ni adresitajn rimarkigojn kaj ni provos, tiom, kiom al ni permesos la stato de la akiritaj scioj, solvi dubojn kaj klarigi punktojn ankoraŭ obskurajn. Nia Revuo estos do ia libera tribuno, en kiu diskutado neniam malproksimiĝos de la normoj de la plej strikta deco. Unuvorte: ni diskutos sed ne disputos. (Spiritisma Revuo, Jaro I, Januaro 1858.)

Kiam, en la Spiritisma Revuo de januaro 1862, ni publikigis artikolon pri la interpretado de la doktrino pri la defalintaj anĝeloj, ni prezentis ĉi teorion kiel nuran hipotezon, havantan ne alian aŭtoritaton krom tiu de kontestebla, persona opinio, ĉar tiam mankis al ni elementoj sufiĉe kompletaj por kategoria aserto. Ni ĝin proponis kiel provon, celante instigi al ĝia ekzameno, sed preta, se necese, ĝin forlasi aŭ modifi. Hodiaŭ, trapasinte la provon de la universala kontrolo [...].(La Genezo, ĉap. XI, piednoto al la n-ro 43.)

Cetere, la fidelaj legantoj de la Spiritisma Revuo povis tie rimarki, en formo de skizoj, la plimulton de la ideoj elvolvitaj en ĉi tiu verko, same kiel ni ĝin faris rilate al la antaŭaj. La Spiritisman Revuon ni multfoje uzas kiel provterenon, destinitan al sondado de la opinio de homoj kaj Spiritoj pri certaj principoj, antaŭ ol ni ilin akceptas kiel konsistigajn partojn de la Doktrino. (La Genezo, "Enkonduko", lasta alineo.)

Sed absolute konvinkita pri tio, ke novaj temoj ne devas esti senpripense kaj ventanime enkondukitaj en la doktrinan strukturon, la Kodiginto evitadis la publikigon de tekstoj, kiujn li rigardis neoportunaj aŭ antaŭtempaj, atendante la konvenan tempon por ilin konigi al la ĝenerala publiko. Eĉ la instruojn donitajn de la Spiritoj pri ankoraŭ ne klarigitaj punktoj li ne enkondukis en la doktrinan strukturon, antaŭ ol ilin pasigi tra la kribrilo de la *universaleco* kaj *interkonformeco*:

[...] la instruoj donataj de la Spiritoj pri punktoj ankoraŭ ne klarigitaj de la Doktrino, ne povas esti leĝo, dum ili restas izolitaj; sekve, ke tiuj instruoj devas esti akceptataj kun ĉiuj rezervoj kaj nur kiel informoj.

Tial estas necese uzi la plej grandan singardon en la publikigo de tiuj instruoj; kaj se oni opinias konsilinde ilin publikigi, oni devas prezenti ilin nur kiel individuajn opiniojn, pli aŭ malpli akcepteblajn, sed iel ajn bezonantajn konfirmon. Tiun konfirmon estas necese atendi, antaŭ ol prezenti iun principon kiel absolutan veraĵon, se oni ne volas esti akuzata pri facilanimeco aŭ pri senpripensa kredemo. (La Evangelio laŭ Spiritismo, "Enkonduko", n-ro II.)

La libro *Postmortaj Verkoj* estis organizita de P. G. Leymarie surbaze de manuskriptoj, kiujn Allan Kardec konservis en sia loĝejo. Inter tiuj skriboj troviĝis fragmentaj tekstoj, eseoj, veraj skizoj, eble atendantaj ampleksan reviziadon kaj kiuj ne estis publikigitaj de la Kodiginto. Iuj artikoloj de tiu kolekto, ekzemple tiu pri la "Teorio de la Beleco", skizita de Kardec, certe apartenis al tiu privata rezervita materialo, ankoraŭ sub analizo kaj ekzamenado, kies publikigon la Kodiginto opiniis nekonvena, certe, interalie, pro tio, ke li ne estis konvinkita pri ilia vereco.

Sed post lia elkarniĝo tiu kolekto estis transdonita al liaj sekvantoj, kiuj decidis ĝin parte publikigi, ekde Majo 1869, en la Spiritisma Revuo, antaŭ ol ĝin tutan publikigi, en aparta volumo, kun la titolo *Postmortaj Verkoj*, en 1890.

Post ĉi tiuj konsideroj, oni povas konkludi, ke, krom temi pri simplaj eseoj, pri ia skizo, tiu materialo ne estis submetita al la kriterio de *universaleco* kaj *interkonformeco* (La Evangelio laŭ Spiritismo, "Enkonduko", n-ro II: "Aŭtoritateco de la Spiritisma Doktrino" – "Universaleco de l' Instruado de la Spiritoj"), kaj multaj el ili eĉ ne estis kondukitaj al la "libera tribuno" (*Spiritisma Revuo*) por submetiĝi al vasta diskutado, kiel cetere ĉiam procedis la Kodiginto. Estas do saĝe, akcepti, ke Allan Kardec preferis ne publikigi ilin, atendante la nepre necesan maturiĝon de la temo kaj eventualan plibonigon kaj korektadon de la teksto.

Estas tamen verŝajne, ke liaj sekvantoj, serĉe de tekstoj por provizi la sinsekvajn eldonojn de la *Spiritisma Revuo*, ne atentis la profundecon de la kriterioj uzitaj de Allan Kardec por publikigo de siaj laboroj, malgraŭ la nobleco de la celado, kiu ilin gvidis, nome doni kontinuecon al la laboro komencita de la Kodiginto.

Fine, la nelivero de tiu materialo por publikigo dum lia enkarna vivo ankoraŭfoje evidentigas la saĝecon, logikecon, zorgon, prudenton kaj humilecon de Allan Kardec. Koncernas nin do ekzameni kritike, mature kaj serene certajn tekstojn enhavatajn en ĉi tiu libro.

BIOGRAFIO DE ALLAN KARDEC²

Estas sub la bato de la profunda doloro, kiun al ni trudis la frua forpaso de la fondinto de la Spiritisma Doktrino, ke ni kuraĝas alpaŝi taskon, ja simplan kaj facilan por liaj saĝo kaj sperto, sed kies pezo kaj graveco nin frakasus, se ni ne kalkulus je la efika helpo de la bonaj Spiritoj kaj de la indulgo de niaj legantoj.

Kiu el ni povus, ne riskante esti rigardata kiel tromemfida, arogi al si posedi tiun metodon kaj organizan spiriton, kiu lumigis ĉiujn verkojn de la majstro? Nur lia potenca inteligento povus koncentri tiom da diversaj objektoj, ilin diserigi, transformi kaj poste disŝuti, kiel bonfaran roson, sur la animojn dezirantajn scii kaj ami.

Akramensa, konciza, profundpensa, li sciis plaĉi kaj sin komprenigi per parolo samtempe simpla kaj nobla, tiel malproksima de la familiara stilo kiel ankaŭ de la malklaraĵoj de la metafiziko.

Sin fervore fordonante al senĉesa, intensa agado, li ĝis nun povis ĉion memsufiĉe plenumi. Sed la ĉiutaga vastiĝado de liaj rilatoj kaj la senĉesa disvolviĝo de Spiritismo sentigis al li la bezonon kolekti ĉirkaŭ si kelke da inteligentaj helpantoj, kaj li samtempe preparadis la novan organizon de la Doktrino kaj ties koncernajn laborojn, kiam li nin forlasis por, en pli bona mondo, ricevi sankcion al la misio de li plenumita kaj rikolti elementojn por nova, sindona, sinofera laboro.

Li estis sola!... Ni alnomos nin *legio* kaj, kiel ajn malfortaj kaj senspertaj ni estas, ni havas intiman konvinkon, ke ni inde respondos al la situacio, se, deirante de la jam starigitaj kaj nekontesteblaj evidentaj principoj, ni nin dediĉos, kiom nur eble kaj laŭ la nunaj bezonoj, al la plenumo de la projektoj, kiujn li intencis iam efektiviĝi.

² Oni supozas, ke Armand Théodore Desliens, privata sekretario de Allan Kardec kaj medio de la Pariza Spiritisma Societo, estas la vera aŭtoro de ĉi tiu minibiografio de la Kodiginto. – *Noto de la Brazilia Spiritisma Federacio en la 1^a portugallingva eldono, tradukita de Evandro Noletto Bezerra. (Rio de Janeiro, Aŭgusto 2009)*

Se ni lin sekvos kaj se ĉiuj homoj de bona volo unuiĝos, per komuna klopodado, por la progreso kaj la morala kaj intelekta regeneriĝo de la homaro, la Spirito de la granda filozofo restos kun ni kaj nin helpos per sia potenca influo. Li povu plenigi nian nesufiĉecon kaj ni fariĝu indaj je lia helpo, nin dediĉante al la laboro same abnegacie kaj sincere kiel li, kvankam ne tiel science kaj inteligente.

Sur sian standardon li skribis ĉi tiujn vortojn: *Laboro, solidareco, toleremo*. Kiel li, ni estu nelacigeblaj; konforme al liaj deziroj, ni estu toleremaj kaj solidaraj kaj ne timu sekvi lian ekzemplon, rekonsiderante, tiomfoje kiom necese, la ankoraŭ diskutatajn principojn. Ni alvoku ĉies helpon, ĉiujn lumojn. Ni provu antaŭeniri, prefere en sekureco kaj certeco ol en rapideco, kaj ne senfruktaj estos niaj penoj se, kiel ni ĝin kredas kaj ĝin la unuaj ekzemplos, ĉiu klopodos plenumi sian devon, flankenmetante ĉiujn personajn demandojn, por kunhelpi por la ĝenerala bono.

Ni ne povus eniri sub pli favoraj aŭspicioj en la novan etapon malfermiĝantan por Spiritismo, ol sciigante niajn legantojn, per mallonga resumo, pri tio, kia estis, dum sia tuta vivo, tiu honesta kaj honorinda homo, tiu inteligenta kaj fekunda saĝulo, kies memoro etendiĝos en la venontajn jarcentojn kun la aŭreolo de la bonfarintoj de la homaro.

Allan Kardec (*Hippolyte Léon Denizard Rivail*³) naskiĝis en Liono, la 3-an de Oktobro 1804, en malnova familio, kiu distingiĝis en la juĝista kaj advokata karieroj, sed li ne sekvis tiujn karierojn. De la plej frua infaneco li sentis sin altirita al la studado de sciencoj kaj filozofio.

Edukite en la lernejo de Pestalozzi, en Yverdon (Svisio), li fariĝis unu el la plej eminentaj disĉiploj de tiu fama profesoro kaj unu el la plej fervoraj propagandistoj de lia eduksistemo, kiu tiel forte influis la reformon de la instruado en Francio kaj Germanio.

Dotita per rimarkinda inteligenteco kaj altirita al instruado pro sia karaktero kaj specialaj kapablecoj, li, aĝante dek kvar jarojn, jam lernigis, kion li sciis, al tiuj samklasanoj, kiuj malpli lernis ol li. En tiu lernejo disvolviĝis la ideoj, kiuj estis lin metontaj en la klason de progresemaj kaj liberpensaj homoj.

³ Kvankam Allan Kardec subskribis per la nomo HLD Rivail, kiel konstateble en la testamento, kiun li propramane redaktis en 1846, tamen la oficiale registrita nomo de Rivail, laŭ lia naskiĝatesto konatigita de freŝdata esplorado, estas *Denizard Hypolite Léon Rivail*. (Vidu la artikolon "Klariga aldono – novaj historiaj detaloj", p. 411-417, en la verko *Allan Kardec: la Edukisto kaj Kodiginto*, volumo I, organizita de Zêus Wantuil (FEB, 2^a speciala eldono, 2004). – *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio en la 1^a portugalingva eldono, tradukita de Evandro Noletto Bezerra. (Rio de Janeiro, Aŭgusto 2009)*

Li naskiĝis sub la katolika religio sed estis edukita en protestanta lando. Pro tio, la agoj de netoleremo rilataj al tiu cirkonstanco, kiujn li devis elteni, igis lin frue koncepti la ideon pri ia religia reformo, super kiu li silente laboris dum longaj jaroj, celante atingi la unuiĝon de la kredoj. Sed mankis al li la elemento nepre necesa al la solvo de tiu problemo.

Spiritismo siatempe venis por ĝin liveri al li kaj doni apartan direkton al liaj laboroj.

Fininte siajn studojn, li revenis Francion. Funde sciante la germanan, li tradukadis por Germanio diversajn verkojn pri edukado kaj moralo, kaj, kio estas tre karakteriza, la verkojn de Fenélon, kiuj lin aparte allogis.

Li estis membro de pluraj sciencaj societoj, interalie de la Reĝa Akademio de Arras, kiu, en sia konkurso de 1831, premiis lian eminentan memuaron pri jena demando: “*Kiu studsistemo estas la plej konforma al la nuntempaj bezonoj?*”

De 1835 ĝis 1840, li fondis en sia domo, ĉe strato de Sèvres, senpagajn kursojn de Kemio, Fiziko, kompara Anatomio, Astronomio, ktp, entrepreno laŭdinda en ĉiuj tempoj sed precipe en epoko, kiam nur tre malgranda nombro da intelektuloj kuraĝis eniri tian vojon.

Ĉiam okupata de la zorgo fari la eduksistemojn allogaj kaj interesaj, li samtempe elpensis inĝenian metodon por lernigi la kalkuladon krom ankaŭ mnemonikan bildon pri la Historio de Francio, kies celo estis fiksi en la memoro la datojn de la plej gravaj eventoj kaj la eltrovojn, kiuj lumigis ĉiun reĝadon.

El inter liaj multnombraj verkoj pri edukado, ni mencias jenajn: *Proponita Plano por Plibonigo de la Publika Instruado* (1828); *Praktika kaj Teoria Kurso de Aritmetiko*, laŭ la metodo de Pestalozzi, por uzado de instruistoj kaj patrinoj (1824)⁴; *Franca Klasika Gramatiko* (1831); *Gvidlibro de la Ekzamenoj por la Atestoj pri Kapableco*; *Rezonitaj solvoj de la demandoj kaj problemoj de Aritmetiko kaj Geometrio* (1846); *Gramatika Katekismo de la Franca Lingvo* (1848); *Programo de la ordinara kurso de Kemio, Fiziko, Astronomio, Fiziologio*, kiujn li gvidis en la Polimatika Liceo; *Normaj diktaĵoj el la ekzamenoj ĉe la Magistratejo kaj ĉe Sorbono*, akompanataj de la *Specialaj diktaĵoj pri la ortografiaj malfacilaĵoj* (1849), verko tre ŝatata ĉe sia apero kaj de kiu ankoraŭ antaŭ ne longe estis presataj novaj eldonoj.

⁴ Ĝi ja aperis em 1824, ne en 1829 laŭ erara informo en la 1^a eldono de la franclingva originalo. Tion rimarkigis Evandro Noletto Bezerra en sia portugallingva traduko eldonita de la Brazila Spiritisma Federacio en 2009.

Antaŭ ol Spiritismo popularigis lian pseŭdonomon Allan Kardec, li, kiel oni vidas, jam antaŭe famiĝis pere de laboroj el tute malsama naturo, sed kiuj celis klerigi la amasojn kaj ĉi tiujn pli forte alligi al iliaj familioj kaj landoj.

Ĉirkaŭ la jaro 1854⁵, de kiam leviĝis la demando pri la manifestiĝo de la Spiritoj, Allan Kardec sin fordonis al persistaj observoj pri tiu fenomeno kun la precipa celo dedukti ties filozofiajn sekvojn. Tuj de la komenco li tie duonvidis la principon de novaj naturaj leĝoj: tiuj regantaj la rilatojn inter la videbla kaj la nevidebla mondoj. Li rekonis, en la agado de ĉi tiu lasta, unu el la fortoj de la Naturo, kies konado devos ĵeti lumon sur amason da problemoj rigardataj kiel nesolveblaj, kaj li komprenis ĝian amplekson el la religia vidpunkto.

Liaj ĉefaj verkoj pri ĉi tiu objekto estis jenaj: *La Libro de la Spiritoj*, pri la filozofia parto, kies unua eldono aperis la 18^{an} de Aprilo 1857; *La Libro de la Mediumoj*, pri la eksperimenta, scienca parto (Januaro 1861); *La Evangelio laŭ Spiritismo*, pri la morala parto (Aprilo 1864); *La Ĉielo kaj la Infero*, aŭ *La Justeco de Dio laŭ Spiritismo* (Aŭgusto 1865); *La Genezo, la Mirakloj kaj la Antaŭdiroj* (Januaro 1868); la *Spiritisma Revuo*, monata gazeto pri psikologiaj studoj, aperinta en la 1^a de Januaro 1858. La 1^{an} de Aprilo 1858, li fondis la unuan regule starigitan spiritisman societeton sub la nomo *Pariza Societo por Spiritismaj Studoj*, kies ekskluziva celo estis la studado de ĉio ajn, kio povus kontribui al la progreso de tiu nova scienco. Allan Kardec tutprave sin defendis, asertante, ke li nenion skribis sub la influo de antaŭjuĝaj aŭ sistemaj ideoj. Malvarmkarakteraj kaj serena, li observis la faktojn kaj el siaj observoj li deduktis la ilin regantajn leĝojn. Li la unua formulis la teorion pri ili kaj el ili formis metodon kaj regulan doktrinon korpon.

Demonstrante, ke tiuj faktoj, erare kvalifikitaj kiel supernaturaj, estas regataj de leĝoj, li ilin enirigis en la ordon de la naturaj fenomenoj kaj tiel detruis la lastan rifuĝejon de tio mirakleca kaj unu el la elementoj de superstiĉo.

Dum la unuaj jaroj, en kiuj oni pritraktis spiritismajn fenomenojn, tiuj manifestiĝoj fariĝis prefere objekto de scivolo ol temo por seriozaj konsideroj. *La Libro de la Spiritoj* faris, ke la afero estis tute alie rigardata.

⁵ Laŭ noto de Evandro Noleto Bezerra en sia portugallingva traduko, eldonita en 2009 de la Brazilia Spiritisma Federacio, Allan Kardec komencis siajn studojn pri Spiritismo en 1854, ne en 1855, kiel dirite en la 1^a eldono de la franclingva originalo. Vidu en la Dua Parto de ĉi tiu libro la ĉapitron "Mia Iniciĝo en Spiritismo".

Oni forlasis la turniĝantajn tablojn, kiuj ĉirilate estis nenio alia ol ia preludo, kaj oni komencis sin turni al ia doktrino, kiu ampleksas ĉiujn demandojn interesantajn la homaron.

Datiĝas de la apero de *La Libro de la Spiritoj* la vera fondo de Spiritismo, kiu, ĝis tiam, nur konsistis el disaj, ne kunordigitaj elementoj, kaj kies amplekson ne ĉiuj povis kompreni. De tiu momento, la doktrino kaptis la atenton de seriozaj homoj kaj rapide disvolviĝis. Post malmulte da jaroj, tiuj ideoj akiris multnombrajn anojn en ĉiuj sociaj tavoloj, en ĉiuj landoj. Tiu senprecedenta sukceso sendube rezultis el la simpatio, kiun tiuj ideoj renkontis, sed ĝi ankaŭ estas grandparte ŝuldata al la klareco de ilia elvolvo, kio estas unu el la karakterizaĵoj de la skriboj de Allan Kardec.

Evitante la abstraktajn formulojn de la Metafiziko, li sciis fari, ke ĉiuj lin legus sen laciĝo, esenca kondiĉo por la vulgarigo de ia ideo. Pri ĉiuj dubaj punktoj lia streĉe logika argumentado allasas malmultan eblon al refutado kaj inklinigas al konvinkiĝo. La materiaj pruvoj, kiujn Spiritismo liveras pri la ekzisto de la animo kaj de la estonta vivo, celas detrui la ideojn materiismajn kaj panteismajn. Unu el la plej fekundaj principoj de tiu doktrino, kaj kiu rezultas el ĉi tiu lasta, estas la principo pri la *plureco de la ekzistadoj*, jam duonvidita de multegaj filozofoj, antikvaj kaj modernaj, kaj lastatempe de *Johano Reynaud*, *Karlo Fourier*, *Eŭgeno Sue* k.a. Sed ĝi restadis kiel hipotezo kaj sistemo, dum Spiritismo elmontras ĝian realecon kaj pruvas, ke ĝi estas unu el la esencaj atributoj de la homaro. El ĝi fontas la klarigo pri ĉiuj ŝajnaj anomalioj de la homa vivo, pri ĉiuj intelektaj, moralaj kaj sociaj malegalecoj, pro kio la homo scias, de kie li venas, kien li iras, por kiu celo li troviĝas sur la Tero kaj kial li ĉi tie suferas.

La denaskaj ideoj klariĝas per la scioj akiritaj en antaŭaj ekzistadoj; la irado de la popoloj kaj de la homaro, per la agado de la homoj de l' pasintaj tempoj, kiuj, progresinte, denove vivas; la simpatioj kaj antipatioj, per la naturo de la antaŭaj rilatoj. Tiuj rilatoj, kiuj religas la grandan homan familion en ĉiuj epokoj, liveras kiel bazon al la grandaj principoj de frateco, egaleco, libereco kaj universala solidareco ne unu plian teorion sed ja la leĝojn mem de la Naturo.

Anstataŭ la principon: *Ekster la Eklezio, nenia savo*, kiu subtenas la apartiĝon kaj la malamon inter la diversaj religiaj sektoj kaj kiu verŝigis tiom da sango, Spiritismo havas kiel devizon: *Ekster Karitato nenia savo*, tio estas, la egaleco de l' homoj antaŭ Dio, la toleremo, la libereco de konscienco kaj la reciproka bonvolemo.

Anstataŭ la *blindan fidon*, kiu nuligas la liberecon de pensado, ĝi asertas: “*Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro. La fido bezonas ian bazon, kaj tiu bazo estas la perfekta kompreno de tio, kion oni devas kredi. Por kredi ne sufiĉas vidi, precipe estas necese kompreni. La blinda fido jam ne akordas kun tiu ĉi jarcento. Nu, estas ja la dogmo de la blinda fido, kiu naskas hodiaŭ la plej grandan nombron da nekredantoj, ĉar ĝi volas trudi sin kaj postulas la rezignon je unu el la plej valoraj rajtoj de la homo: rezonado kaj libera volo.*” (La Evangelio laŭ Spiritismo).

Nelacigebla laboristo, kiu ĉiam komencis kiel unua la laboron kaj ĝin lasis la lasta, Allan Kardec mortis la 31-an de Marto 1869, dum preparoj por transloĝiĝo trudita de la granda amplekso de liaj multoblaj okupoj. Multnombraj verkoj, kiujn li estis preskaŭ finonta, aŭ kiuj atendis oportunan okazon por aperi, iam ankoraŭ pli klare elmontros la amplekson kaj la potencon de liaj konceptoj.

Li mortis kiel li vivis: laborante. De longaj jaroj li suferis je kormal-sano, kiun povus kontraŭstari nur intelekta ripozo kaj ne multa materiala aktiveco. Sed, tute fordonita al sia verko, li rifuzis ĉion, kio povus forpreni eĉ unu solan eron de lia tempo koste de liaj preferataj okupoj. Ĉe li, kiel ĉe ĉiuj forte harditaj animoj, la klingo eluzis la *glavingon*.

Lia korpo malvigligiĝis kaj rifuzis servi al li, sed lia Spirito, pli vigla, pli energia, pli fekunda, ĉiam ankoraŭ plivastigis lian kampon de agado.

Ĉe tiu neegala lukto, la materio ne povus eterne rezisti. Unu tagon ĝi estis venkita: rompiĝis la aneŭrismo kaj Allan Kardec falis kvazaŭ fulmobatita. Homo mankis sur la Tero; sed granda nomo prenis lokon inter tiuj, kiuj glorigis ĉi tiun jarcenton; granda Spirito iris refreŝiĝi en la Senfino, kie ĉiuj, kiujn li konsolis kaj instruis, senpacience atendis lian venon!

“La morto, li diris antaŭ ne longe, refaras siajn batojn ĉe la kleraj rondoj!... Kiun ĝi nun liberigos?”

Li iris, kiel tiom da aliaj, revigliĝi en la Spaco, serĉi novajn elementojn por refreŝigi sian organismo eluzitan de vivo plena je senĉesaj laboroj. Li foriris kun tiuj, kiuj estos la lumturoj de la nova generacio, kaj kun ili li baldaŭ revenos por daŭrigi kaj elplenumi la verkon lasitan en sindonaj manoj.

Ne plu ekzistas la homo, sed la animo restos ĉe ni. Li estos fidinda protektanto, unu plia lumo, nelacigebla laboristo, kiun al si akiris la legioj de la Spaco. Kiel sur la Tero, neniun ajn vundante, li scios al ĉiu komprenigi

liajn konsilojn; li moderigos la fruan ardon de la pasiemuloj, subtenos tiujn sincerajn kaj neprofitamajn kaj stimulos la senfervorulojn. Li hodiaŭ vidas kaj scias ĉion, kion ankoraŭ antaŭ ne longe li antaŭdiris! Li nun estas trafebla nek por necertecoj, nek por malvigliĝoj, kaj ja partoprenigos nin en sia konvinkiteco, igante nin tuŝi la celon, al ni montrante la vojon per tiu klara, preciza esprimmaniero, kiu lin aŭreolis en la literaturaj analoj.

Jam ne ekzistas la homo, ni ripetas. Sed Allan Kardec estas senmorta, kaj lia memoro, liaj laboroj, lia Spirito ĉiam restos kun tiuj, kiuj firme kaj alte tenis la standardon, kiun li ĉiam sciis respektindigi.

Supera persono estigis la verkon; de ĉiuj li estis gvidanto kaj lumo. Sur la Tero, la verko anstataŭos la verkinton. Oni ne kolektiĝos ĉirkaŭ Allan Kardec sed ja ĉirkaŭ Spiritismo tia, kia li ĝin strukturis, kaj per liaj konsiloj, sub lia influo, ni per firmaj paŝoj antaŭeniros direkte al la feliĉaj etapoj promesitaj al la regeneriĝinta homaro.

(*Spiritisma Revuo*, Majo 1869.)

PAROLADO ELDIRITA DE CAMILLE
FLAMMARION ĈE LA TOMBO
DE ALLAN KARDEC

Sinjoroj,

Akceptante kun respekto la simpatian inviton de la amikoj de tiu laborema pensulo, kies surtera korpo kuŝas nun ĉe niaj piedoj, mi memoras iun mornan tagon en Decembro 1865, kiam mi eldiris lastajn adiaŭajn vortojn ĉe la tombo de la fondinto de la Akademia Librejo, nome la honorinda Didier, kiu, kiel eldonisto, estis konvinkoplena kunlaboranto de Allan Kardec por la publikigo de la fundamentaj verkoj pri doktrino al li tiel kara. Ankaŭ li subite mortis, kvazaŭ la ĉielo volus ŝpari al tiuj du tute honestaj Spiritoj la filozofian ĝenon eliri el la vivo per vojo malsama al tiu ordinare irata. — Sama penso aplikiĝas al la morto de nia iama kolego Jobard, el Bruselo.

Mia hodiaŭa tasko estas ankoraŭ pli granda, ĉar mi volus prezenti al la penso de miaj aŭskultantoj kaj al la penso de milionoj da personoj, kiuj, en la Nova Mondo, sin okupas pri la ankoraŭ mistera problemo de la fenomenoj alnomataj spiritismaj; — mi volus nome povi al ili prezenti la sciencajn interesojn kaj la filozofiajn estontecon de la studado de tiuj fenomenoj, al kiu sin dediĉas, kiel de ĉiu sciante, eminentaj homoj inter niaj samtempuloj. Mi ŝatus igi ilin duonvidi tiujn nekonatajn horizontojn, kiuj malfermiĝos antaŭ la homaro laŭgrade kiel ĝi ampleksigos sian pozitivan konadon de la naturaj fortoj agantaj ĉirkaŭ ni; montri al ili, ke tiaj konstatoj estas la plej efika antidoto kontraŭ tiu lepro, la ateismo, kiu ŝajnas aparte ataki nian transiran epokon; kaj fine doni ĉi tie publikan ateston pri la eminenta servo, kiun al la Filozofio faris la aŭtoro de *La Libro de la Spiritoj*, alvokante por atento kaj diskutado pri faktoj, kiuj ĝis nun apartenis al la malsaneca kaj pereiga kampo de la religiaj superstiĉoj.

Estus efektive grava faro, firmigi ĉi tie, antaŭ tiu elokventa tombo, ke la metoda ekzameno de tiuj fenomenoj, erare alnomataj supernaturaj, tute ne revivigas la superstiĉemon nek malfortigas la energion de la racio, kontraŭe ĝi forpelas la erarojn kaj iluziojn de la malklereco kaj servas al la progreso pli bone ol la senbaza neado de tiuj, kiuj ne volas klopodi por vidi.

Sed tie ĉi ne estas loko por malfermi arenon al nerespekta disputado. Ni nur lasu verŝiĝi el niaj mensoj, sur la senespriman vizaĝon de tiu homo kuŝanta antaŭ ni, atestojn de amo kaj sentojn de bedaŭro, kiuj restu ĉirkaŭ li, en lia tombo, kvazaŭ enbalzamigo de la koro! Kaj ĉar ni scias, ke lia eterna animo postvivas ĉi tiujn restaĵojn same kiel ĝi ilin antaŭvivis; ĉar ni scias, ke nedetrueblaj ligiloj kunligas nian videblan mondon al la mondo nevidebla; ĉar tiu ĉi animo ekzistas hodiaŭ tiel bone kiel antaŭ tri tagoj kaj ke ne estas neeble, ke ĝi nun troviĝas ĉi tie antaŭ mi, ni diru al li, ke ni ne volis vidi lian korpan bildon vanui, enfermitan en la tombo, sen tio, ke ni unuanime honoru liajn laborojn kaj lian memoron, ke ni pagu tributon al lia surtera enkarniĝo, tiel utila, tiel digne plenumita.

Komence, mi rapidaskize strekos la ĉefajn liniojn de lia literatura kariero.

Mortinta en la aĝo de 65 jaroj, Allan Kardec dediĉis la unuan parton de sia vivo al skribado de klasikaj, elementaj verkoj, destinitaj al uzado de edukantoj de la junularo. Kiam, ĉirkaŭ la jaro 1854⁶, la manifestiĝoj, novaj laŭ la ŝajno, de la turniĝantaj tabloj, de frapoj sen videbla kaŭzo, de eksterkutimaj movoj de objektoj kaj mebloj, komencis altiri la publikan atenton kaj eĉ estigis, ĉe personoj kun fantaziema imago, iaspecan febron pro la noveco de tiuj spertoj, Allan Kardec, samtempe esplorante la magnetismon kaj ties strangajn efikojn, sekvis kun granda pacienco kaj saĝa klarvideco la tre nombrajn eksperimentojn kaj provojn tiam faratajn en Parizo. Li kolektis kaj ordigis la rezultojn de tiu longa esplorado kaj el ili komponis doktrinon publikigitan en 1857 en la unua eldono de *La Libro de la Spiritoj*. Vi ĉiuj scias, kian sukceson tiu verko renkontis en Francio kaj eksterlande.

Atinginte hodiaŭ sian 15^{an} eldonon⁷, ĝi dissemas en ĉiuj klasoj tiun elementan doktrinon, kiu, laŭ sia esenco, tute ne estas nova, ĉar la pitagora skolo en Grekio kaj la skolo druida en nia Gaŭlio mem⁸ instruis

⁶ Kvankam en la franclingva originalo estas la jaro 1855, la ĝusta informo estas 1854. Vidu piednoton n^o 5.

⁷ Kiam Kardec elkarniĝis, en 1869, la 16^a eldono de *La Libro de la Spiritoj* jam estis en la presejo. – Noto de Evandro Noleto Bezerra, tradukinto de la portugallingva eldono de la *Brazila Spiritisma Federacio*.

⁸ Anstataŭ "malfeliĉa Gaŭlio", kiel dirite en la franclingva originalo, la korekta esprimo estas "Gaŭlio mem" kiel ni ĉi-supre tradukis. Vidu la eldonon de 1869 de la *Spiritisma Revuo*, kie ĉi parolado estis

ties principojn, doktrino kiu nun alprenas efektivan formon de aktualeco pro sia kongrueco kun la fenomenoj.

Post tiu unua verko sinsekve aperis *La Libro de la Mediumoj aŭ Eksperimenta Spiritismo; Kio estas Spiritismo?* aŭ resumo en la formo de demandoj kaj respondoj; *La Evangelio laŭ Spiritismo; La Ĉielo kaj la Infero; La Genezo*. La morto lin surprizis, kiam li, en sia senlaca aktiveco, laboradis super alia verko pri la rilatoj inter Magnetismo kaj Spiritismo.⁹

Per la *Revue Spirite* kaj la *Pariza Societo*, kies prezidanto li estis, li el fariĝis la centro, kien ĉio finvenis, la ilo por kunligo de ĉiuj eksperimentistoj. De kelke da monatoj sentante, ke lia fino proksimiĝas, li preparis la kondiĉojn por vivdaŭreco de tiuj studoj post sia morto kaj establis la Centran Komitaton, kiu lin postvenas.

Li estigis rivalecojn; faris skolon en iom persona formo; ankoraŭ ekzistas ia divido inter “spiritualistoj” kaj “spiritistoj”. De nun, sinjoroj — tiaj almenaŭ estas la bondeziroj de la amikoj de la vero — , ni ĉiuj devas unuiĝi por kunfrata solidareco, per sameco de klopodoj por klarigo de la problemo, per ĝenerala kaj nepersona deziro pri vereco kaj bono.

Oni objektis, sinjoroj, pri nia digna amiko, al kiu ni hodiaŭ faras la lastajn omaĝojn, ke li tute ne estis tio, kion oni nomas *scienculo*, ke li unue ne estis fizikisto, naturalisto aŭ astrônomo, ke li preferis konstitui moralan doktrinon antaŭ ol submeti al la scienca diskutado la realecon kaj la naturon de la fenomenoj.

Eble preferindas, sinjoroj, ke la afero tiel komenciĝis. Oni devas ne ĉiam negi valoron al la sento. Kiom da koroj konsoliĝis per tiu religia kredo! Kiom da larmoj ĝi sekigis! Kiom da konsciencoj ĝi malfermis al la radioj de la spirita beleco! Ne ĉiu homo estas feliĉa en tiu ĉi mondo! Multe da korinklinoj estas disŝiritaj! Multe da animoj endormiĝis en skeptikeco! Ĉu do neniom signifas, ke ĝi kondukis al spiritualismo tiom multe da personoj, kiuj, ŝanceliĝante en duboj, jam ne plu amis la vivon fizikan nek la intelektan?

Se Allan Kardec estus sciencisto, li certe ne povus plenumi tiun unuan servon kaj tiel ĝin disvastigi malproksimen kiel inviton al ĉiuj koroj. Sed li estis tio, kion mi simple nomos “enkarniĝinta saĝo”. Racio rekta

unufoje publikigita. – *Noto de Evandro Noleto Bezerra, tradukinto de la portugallingva eldono de la Brazila Spiritisma Federacio.*

⁹ Inter la paperoj de Allan Kardec, kolektitaj post lia morto, troviĝas nenia konkreta informo pri la eltrovo de ajna verko pritraktanta la temon prezentitan de la mondfama franca astronomo. Se tiel estis, oni ne faris laŭdevan diskonigon. – *Noto de Evandro Noleto Bezerra, tradukinto de la portugallingva eldono de la Brazila Spiritisma Federacio.*

kaj prudenta, li senĉese aplikadis al sia seninterrompa verko la intimajn indikojn de la komuna saĝo. Ĉi tio ne estis malpli granda kvalito en tiu ordo de aferoj, kiuj nin okupas, sed estis, oni povas ĝin aserti, la unua kaj la plej altvalora el ĉiuj. Sen ĝi la verko ne povus fariĝi populara nek etendi siajn longegajn radikojn en la mondon. La plimulto el tiuj, kiuj sin fordonis al tiuj studoj, memoras, ke en sia juneco, aŭ en certaj specialaj kondiĉoj, ili mem atestis neklarigeblajn manifestaĵojn; malmultaj estas la familioj, kiuj en sia historio ne havis tiaspecajn okazaĵojn. La unua paŝo estus al ĉi tiuj apliki la firman racion de la simpla saĝo kaj ilin ekzameni laŭ la principo de la pozitiva metodo.

Tiu lanta, malfacila kaj kompleksa studo, kiel antaŭvidite de ties organizinto mem, devas nun eniri sian sciencan etapon. La fizikaj fenomenoj, pri kiuj oni komence ne emfazis, nepre fariĝos objekto de la eksperimenta kritiko, al kiu ni ŝuldas la gloron de la moderna progreso kaj la mirindaĵojn de la elektro kaj de la vaporo. Tiu metodo devas preni la fenomenojn de ankoraŭ mistera naturo, kiujn ni spektis, kaj ilin dissekci, mezuri kaj difini.

Ĉar, sinjoroj, Spiritismo ne estas religio, ĝi estas scienco, pri kiu ni apenaŭ konas la *abocan*. Pasis jam la tempo de l' dogmoj. La naturo ampleksas la universon, kaj Dio mem, iam farita laŭ la bildo de homo, povas esti rigardata de la Metafiziko nur kiel *unu spirito en la naturo*. Ne ekzistas tio supernatura. La manifestaĵoj obtenitaj pere de medioj, same kiel tiuj magnetismaj kaj somnambulismaj, *apartenas al la naturo* kaj devas esti rigore submetataj al kontrolo eksperimenta. Ne ekzistas mirakloj. Ni ĉeestas la aŭroron de nekonata scienco. Kiu povos antaŭvidi al kiuj sekvoj kondukos, en la mondo de la penso, la pozitiva studo de tiu nova psikologio?

De nun la Scienco regas la mondon kaj, sinjoroj, ne estos senrilata al tiu ĉi funebra parolado atentigi pri ĝia aktuala verko kaj pri la novaj induktoj, kiujn ĝi malkovras al ni, ĝuste je la vidpunkto de niaj esploroj.

En neniu epoko de la Historio, la Scienco malfermis, antaŭ la mirplena rigardo de la homo, tiel grandiozajn horizontojn. Ni nun scias, ke la *Tero estas astro* kaj kaj ke *nia aktuala vivo kompletiĝas en la ĉielo*. Per la analizo de la lumo, ni konas la elementojn ardegantajn en la Suno kaj en la steloj distaj je milionoj kaj duilionoj da leĝoj de nia surtera observatorio. Per kalkulado ni posedas la historion de la ĉielo kaj de la Tero, tiel en la lontana pasinteco kiel ankaŭ en la estonteco, kiuj tute ne ekzistas por la senŝanĝaj leĝoj. Per observado, ni pesis la ĉielajn terojn

gravitantajn en la vastega spaco. La globo, kie ni loĝas, iĝis stela atomo fluganta en la spaco ene de la senfinaj profundegoj, kaj nia ekzistado mem sur tiu ĉi globo fariĝis infinitezima ono de nia eterna vivo. Sed kio prave povas nin ankoraŭ pli forte tuŝi, estas tiu mirinda rezulto el fizikaj laboroj efektivigitaj en la lastaj jaroj, nome, ke *ni vivas meze en nevidebla mondo* senĉese aganta ĉirkaŭ ni.

Jes, sinjoroj, por ni tio ĉi estas senmezura revelacio. Kontemplu ekzemple la lumon, kiu en la nuna horo estas disradiata de la brilanta Suno en la atmosfero; kontemplu ĉi lazuron tiel mildan de la ĉiela volbo; rimarku la odorojn de ĉi tepida aero karesanta al ni la vizaĝojn; rigardu ĉi tiujn monumentojn kaj tiun ĉi teron. Nu bone! Malgraŭ niaj malferme- gitaj okuloj, ni ne vidas tion, kio okazas ĉi tie! El cent radioj emanantaj el la Suno nur triono estas al ni videbla, ĉu senpere, ĉu reflektite de ĉiuj ĉi korpoj; la du ceteraj trionoj ekzistas kaj efikas ĉirkaŭ ni, sed en nevidebla, kvankam reala, maniero. Ili estas varmaj, ne estante lumaj al ni, kaj tamen ili multe pli efikas ol tiuj, kiuj nin frapas, ĉar estas ili, kiuj altiras la florojn al la sunlumo, kiuj estigas ĉiujn kemiajn reagojn¹⁰ kaj ankaŭ kiuj levas, same nevideble, la akvovaporon en la atmosferon, por formado de nuboj, tiel senĉese estigante ĉirkaŭ ni, kaŝe kaj silente, kolosan forton mekanike kompareblan kun la laboro de multaj miliardoj da ĉevalpovoj!

Se la varmigaj kaj la kemiaj radioj, konstante efikantaj en la Naturo, estas nevideblaj por ni, tiel estas ĉar la unuaj ne sufiĉe rapide trafas al ni la retinon kaj la duaj tro rapide ĝin trafas. Niaj okuloj vidas la ekzistaĵojn nur inter du limoj, cise kaj transe de kiuj ili nenion vidas. Nia surtera organismo povas esti komparata al harpo kun du kordoj, nome la opta kaj la aŭda nervoj. Certa speco de movoj vibrigas la unuan kaj alia speco de movoj vibrigas la duan: en tio kuŝas la tuta homa sensado, ĉirilate pli restriktita ol tiu de certaj vivantaĵoj, ekzemple de certaj insektoj, ĉe kiuj estas pli delikataj tiuj optaj kaj aŭdaj kordoj. Nu, efektive ekzistas en la Naturo ne du, sed dek, cent, mil specoj de movo. La fizika scienco do instruas al ni, ke ni vivas ene de mondo nevidebla por ni kaj ke ne estas neeble, ke estuloj same nevideblaj por ni ankaŭ vivas sur la Tero, kun sensado tute malsama ol la nia, sen al ni la eblo rimarki ilian ĉeeston, krom se ili manifestiĝus per faktoj trafeblaj por niaj sensoj.

¹⁰ **Noto en la franclingva originalo:** Nia retino estas nesensiva por tiuj radioj; sed aliaj substancoj ilin *vidas*, ekzemple jodo kaj arĝentaj saloj. Oni fotografis la kemian sunan spektron, kiun niaj okuloj ne vidas. La fotografa plako cetere, ĵus eltirita el la senluma kamero, neniam montras ajnan videblan bildon, kvankam ĝi ja registris tian bildon, kiun ia kemia procedo povas aperigi.

Antaŭ tiaj veraĵoj, kiuj apenaŭ burĝonas, kiel absurda kaj senvalora montriĝas apriora neado! Kiam oni komparas la malmulton, kiun ni scias, kaj la mallarĝecon de nia percepto-kampo kun la kvanto de ĉio ekzistanta, oni ne povas reteni sin de la konkludo, ke ni nenion scias, ke ĉio ankoraŭ restas al ni sciota. Kun kia rajto do ni eldirus la vorton “neebla” antaŭ faktoj, kiujn ni konstatas kaj kies ununuran kaŭzon ni ne povas malkovri?

La Scienco malfermas al ni perspektivojn, tiel fidindajn kiel ĉi antaŭajn, pri la fenomenoj de la vivo kaj la morto kaj pri la forto, kiu nin animas. Sufiĉas al ni observi la cirkuladon de la ekzistadoj.

Ĉio estas nenio alia ol metamorfozo. Trenataj en sia eterna kuro, la atomoj konsistigantaj la materion senĉese pasas de unu korpo al alia, de la besto al la planto, de la planto al la atmosfero, de la atmosfero al la homo, kaj nia korpo mem dum la tuta daŭro de nia vivo senĉese ŝanĝas sian konsistigan substancon, same kiel la flamo brilas ne alie ol per la senĉese renoviĝantaj elementoj. Kaj kiam la animo ekflugas, tiu sama korpo, tiomfoje transformata dum la vivo, definitive redonas al la Naturo ĉiujn molekulojn kaj ne plu ilin reprenas. Al la neakceptebla dogmo de la resurekto substituiĝas la alta doktrino pri la transmigrado de la animoj.

Jen la aprila Suno, kiu radias en la ĉielo kaj inundas nin per sia unua varmiga roso. Jam vekiĝas la kamparoj, burĝonas la unuaj ŝosoj, ekfloras la printempo, ridetas la ĉiela lazuro, kaj ekestas la reviviĝo. Tamen tiu ĉi nova vivo estas formita de la morto kaj kovras nur ruinojn! De kie venas la suko de tiuj arboj, kiuj reverdiĝas sur tiu ĉi kampo de mortintaĵoj? De kie venas tiu malsekeco, kiu nutras iliajn radikojn? De kie venas ĉiuj elementoj, kiuj aperigos sub la karesoj de Majo la silentajn floretojn kaj la birdojn kantemajn? — De la morto!... sinjoroj..., de tiuj kadavroj enterigitaj en la terura nokto de l' tomboj!... Superega leĝo de la Naturo, la materia korpo estas nenio alia ol provizora kunmetaĵo el partikloj, kiuj tute ne apartenas al ĝi kaj kiujn la animo grupigis laŭ sia propra tipo por krei al si organojn, kiuj interrilatigu ĉi tiun kun nia fizika mondo. Kaj dum nia korpo tiele renoviĝas, peco post peco, per senĉesa ŝanĝado de la materioj; dum, unu tagon, ĝi falas, inerta maso, por ne plu releviĝi, nia Spirito, persona estaĵo, konstante konservis sian nedetruoblan *identecon*, suverene regis super la materio per kiu li vestiĝis, tiel estigante, pere de tiu konstanta kaj universala fakto, sian sendependan personecon, sian spiritan esencon ne submetitan al la superregado de spaco kaj tempo, sian individuan grandecon, sian *senmortecon*.

En kio konsistas la mistero de la vivo? Per kiaj ligiloj la animo estas ligita al la organismo? Per kia elnodiĝo ĝi malligiĝas? Sub kia formo kaj en kiaj kondiĉoj ĝi ekzistas post la morto? Kiajn memorarojn, kiajn korinklinojn ĝi konservas? — Jen, sinjoroj, problemoj, kies solvo restas ankoraŭ tre malproksima kaj kiuj entute konsistigos la estontan psikologian sciencon. Certaj homoj povas negi la ekziston de la propra animo kiel ankaŭ tiun de Dio; aserti, ke ne ekzistas la morala vero, ke tute ne ekzistas inteligentaj leĝoj en la Naturo kaj ke ni, spiritualistoj, estas trompitaĵoj de senmezura iluzio. Aliaj, kontraŭe, povas deklari, ke ili konas, pro speciala privilegio, la esencon de la homa animo, la formon de la superega Estaĵo, la staton de la estonta vivo kaj trakti nin kiel ateistojn pro tio, ke nia racio malkonsentas ilian kredon. Nek unuj, nek aliaj, sinjoroj, malhelpos, ke ni ĉi tie staru antaŭ tiuj plej grandaj problemoj, ke ni interesiĝu pri ĉi aferoj, kiuj tute ne estas al ni fremdaj, kaj ke ni havu la rajton apliki la eksperimentan metodon de la nuntempa scienco al la esplorado de la vero.

Per la pozitiva studo de la efikoj oni revenas al la taksado de la kaŭzoj. En la klaso de tiuj studoj grupigitaj sub la ĝenerala nomo “Spiritismo”, la faktoj ekzistas. Sed neniu scias kiel ili okazas. Ili ekzistas tute same kiel la fenomenoj estigataj de elektro, lumo kaj varmo; sed, sinjoroj, ni konas nek la Biologion, nek la Fiziologion. Kio estas la homa korpo? Kio estas la cerbo? Kia estas la absoluta agado de la animo? Ni ne scias. Ni ankaŭ ne konas la esencon de la elektro, la esencon de la lumo. Estas do prudente, ke ni senpartie observu ĉiujn ĉi faktojn kaj provu determini iliajn kaŭzojn, kiuj eble estas diversspecaj kaj pli nombraj ol ni ĝis nun supozis.

Ja ne gravas, ke tiuj, kies vido estas limigita de fiero aŭ de antaŭjuĝo, tute ne komprenas la fortan strebadon de niaj mensoj, avidaj pri sciado, kaj priĵetas tiun specon de studoj per sarkasmo aŭ anatemo. Ni pli alten levas niajn kontempladojn!... Ci estis la unua, ho majstro kaj amiko! Ci estis la unua, kiu, ekde kiam komenciĝis mia astronomia kariero, atestis vivan simpation por miaj deduktoj pri la ekzisto de la ĉielaj homaroj, ĉar, prenante la libron pri la *Plureco de la loĝataj mondoj*, ci tuj metis ĝin en la bazon de la doktrina konstruaĵo, pri kiu ci revadis. Ni plurfoje interparoladis pri tiu ĉiela vivo, tiel mistera; kaj nun, ho animo! Ci scias, per senpera vidado, en kio konsistas tiu spirita vivo, al kiu ni ĉiuj revenos kaj kiun ni forĝis dum ĉi surtera ekzistado.

Ci revenis al tiu mondo, de kiu ni iam venis, kaj ci rikoltas la frukton de ciaj surteraj studoj. Cia envolaĵo dormas ĉe niaj piedoj, cia cerbo estingiĝis, ciaj okuloj fermiĝis por ne plu malfermiĝi, cia parolo

ne plu aŭdiĝos... Ni scias, ke ni ĉiuj survojas al tiu sama lasta dormo, al tiu sama inerteco, al tiu sama polvo. Sed ne sur tiun envolvajon ni metas nian gloron kaj nian esperon. La korpo falas, la animo restas kaj revenas al la Spaco. Ni renkontiĝos en pli bona mondo, kaj en la senlima Ĉielo, kie ni uzos niajn plej potencajn fakultojn, ni daŭrigos la studojn, por kies disvolvo la Tero estas nenio alia ol tro malvasta scenejo.

Ni preferas scii tiun ĉi veraĵon ol kredi, ke ci kuŝas tuta en tiu ĉi kadavro kaj ke cia animo eldetruigiĝis pro la ĉeso de funkciado de iu organo. Senmorteco estas la lumo de la vivo same kiel ĉi tiu brilega Suno estas la lumo de la Naturo.

Ĝis revido, mia kara Allan Kardec, ĝis revido!

AL LA ABONANTOJ DE LA SPIRITISMA REVUO

Ĝis hodiaŭ la Spiritisma Revuo esence estis verko kaj kreaĵo de Allan Kardec, kiel cetera ĉiuj doktrinaj verkoj, kiujn li publikigis.

Kiam la morto lin surprizis, la multeco de liaj okupoj kaj la nova fazo, en kiun Spiritismo eniris, igis lin deziri la asistadon de kelke da konvinkitaj kunlaborantoj, por ke ili plenumu, sub lia gvidado, laborojn, pri kiuj li sola ne plu povus sin okupi.

Ni provos ne dekliniĝi de la vojo, kiun li difinis al ni; sed al ni ŝajnis nia devo dediĉi al la laboroj de la majstro, sub la titolo *Postmortaj Verkoj*, kelkajn paĝojn, kiujn li rezervis al si se li korpe restintus inter ni. La abundo de la dokumentoj amasiĝintaj en lia laborkabineto ebligas al ni, dum multe da jaroj, publikigi en ĉiu numero, krom la instruoj, kiujn li, kiel Spirito, volontus doni al ni, unu el tiuj interesaj artikoloj, kiujn li tiel bone sciis komprenebligi al ĉiuj.

Ni estas do konvinkitaj, ke ni tiel kontentigas la dezirojn de ĉiuj, kiujn la spiritisma filozofio kolektis en niaj vicoj kaj kiuj sciis estimi la aŭtoron de *La Libro de la Spiritoj* kiel honestan homon, senlaca kaj sindonan laboranton, konvinkoplenan spiritiston, kiu sin dediĉis en la privata vivo al la praktikado de la principoj, kiujn li instruadis en siaj verkoj.

Spiritisma Revuo, 12^a jaro – Junio 1869.

Unua parto





Spiritisma kredkonfeso rezonata

I. Dio

1. *Estas unu Dio, superega intelekto, primara kaŭzo de ĉiuj ekzistaĵoj.*

La pruvo pri la ekzisto de Dio troviĝas en ĉi tiu aksiomo: *Ne estas efiko sen ia kaŭzo.* Ni konstante vidas sennombran amason da efikoj, kies kaŭzo ne sidas en la homaro tial, ke la homaro estas senpova por ilin okazigi kaj eĉ ekspliki; tiu kaŭzo estas do super la homaro, kaj ĝin oni ja nomas *Dio, Jehovo, Alaho, Brahmao, Fo-hi, Granda Spirito*, ktp, laŭ la lingvoj, tempoj kaj lokoj.

Tiu efikoj ne fariĝas hazarde, okaze kaj senorde. Ekde la konstruo de la plej malgranda insekto, de la plej eta grajno, ĝis la leĝo, kiu regas la mondojn cirkulantajn en la spaco, ĉio atestas ian penson, ian kombinon, ian antaŭzorgon, ian prizorgadon, kiuj superas ĉiajn homajn konceptojn. Temas do pri kaŭzo superege inteligenta.

2. *Dio estas eterna, senŝanĝa, nemateria, unika, ĉiopova, superege justa kaj bona.*

Dio estas *eterna*: se li estus havinta komenciĝon, io estus ekzistinta antaŭ li; li estus elirinta el la nenio, aŭ lin estus kreinta iu antaŭekzistanta estaĵo. Tiel, ni iom post iom paŝas al la senfino en la eterneco.

Li estas *senŝanĝa*: se li estus trafebila por ŝanĝoj, la leĝoj regantaj la universon havus neniom da stabileco.

Unua parto

Li estas *nemateria*: tio estas, lia naturo diferencas de ĉio, kion ni nomas materio, ĉar alie li spertus la variojn kaj transformiĝojn de la materio kaj do ne estus *senŝanĝa*.

Li estas *unika*: se estus pluraj dioj, estus do pluraj voloĵoj, kaj tiam estus nek unueco de planado, nek unueco de potenco en la aranĝo de la universo.

Li estas *ĉiopova*, ĉar li estas *unika*. Se li ne havus la superegan potencon, ekzistus io pli potenca ol li; li ne estus farinta ĉiujn aĵojn, kaj tiuj, kiujn li ne estus farinta, estus verko de alia dio.

Li estas *superege justa kaj bona*. La providenca saĝeco de la diaj leĝoj elmontriĝas ĉe la plej malgrandaj aferoj, kiel ĉe la plej grandaj, kaj tiu saĝeco ne lasas, ke ni dubu pri lia justeco, nek pri lia boneco.

3. *Dio estas senfina en ĉiuj siaj perfektaĵoj.*

Se ni supozus neperfekta unu solan el la atributoj de Dio, se ni deprenus de li plej etan eron da *eterneco*, da *senŝanĝeco*, da *nematerieco*, da *unikeco*, da *ĉiopoveco*, da *justeco* kaj da *boneco*, ni povus supozii ian estaĵon, kiu posedus tion, kio al li mankus, kaj tiu estaĵo, pli perfekta ol li, ja estus Dio.

II. La animo

4. *Estas en la homo ia intelekta principo, kiun oni nomas ANIMO aŭ SPIRITO, sendependa de la materio, kaj kiu al li donas la moralan senton kaj la pensokapablon.*

Se la penso estus ia propreco de la materio, oni vidus pensanta la krudan materion. Nu, ĉar oni neniam vidis la inertan materion dotita per intelektaj kapabloj, kaj ĉar la korpo, mortinte, ne plu pensas, tial nepre estas la konkludo, ke la animo ne dependas de la materio kaj ke la organoj estas nenio alia ol instrumentoj, per kiuj la homo esprimas sian penson.

5. *La materialismaj doktrinoj estas neakordigeblaj kun la moralo kaj renversas la socian ordon.*

Se, laŭ la materialistoj, la penso estus ia sekreciaĵo de la cerbo, same kiel galo estas sekreciata de la hepato, el tio rezultus, ke, pro la morto de la korpo, la homa intelekto kaj ĉiuj liaj moralaj kvalitoj enfalus en la nenion; ke parencoj, amikoj kaj ĉiuj liaj amatoj estus senrevenue perditaj; ke al genia homo mankus ĉia merito pro tio, ke siajn transcendajn fakultojn li ŝuldus nur al sia hazarda konstruo; ke inter imbecilo kaj saĝulo la diferenco estus nur pro plia aŭ malplia kvanto da cerba substanco.

La sekvoj de tiu doktrino estus, ke, nenion atendante trans ĉi tiu vivo, la homo havus nenian intereson fari bonon; ke al li estus tute nature peni havigi al si kiel eble pli da ĝuoj, eĉ se koste de aliaj homoj; ke egoismo estus la plej racia sento; ke tiu konstante suferanta sur la Tero nenion pli bonan farus ol sin mortigi, ĉar, devante enfali en la nenion, al li estus nek pli, nek malpli bone, kaj li tiel malplilongigus siajn suferojn.

La materialisma doktrino estas do la sankcio de egoismo, fonto de ĉiuj malvirtoj; la neado de karitato, fonto de ĉiuj virtoj kaj bazo de la socia ordo; kaj la pravigo de sinmortigo.

6. *La ekzisto de la animo estas pruvita de Spiritismo.*

La ekziston de la animo pravas la inteligentaj agoj de la homo, kiuj nepre devas havi ian inteligentan, tute ne inertan kaŭzon. Ĝian sendependecon de la materio klare evidentigas tiel la spiritaj fenomenoj, kiuj ĝin montras aganta per si mem, kiel precipe ĝia apartiĝo *dum la vivo*, kio al ĝi ebligas manifestiĝi, pensi kaj agi sen la korpo.

Oni povas diri, ke, se la kemio apartigis la elementojn de la akvo; se per tio ĝi malkovris la proprecojn de tiuj elementoj, kaj se ĝi povas laŭvole malfari kaj refari ian kombinitan korpon, tiel same Spiritismo povas izoli la du konsistigajn elementojn de la homo: *la spiriton kaj la materion, la animon kaj la korpon*, ilin laŭvole apartigi kaj kunigi, kio allasas nenian dubon pri ilia sendependeco.

7. *La animo de la homo supervivas la korpon kaj konservas postmortean individuecon.*

Se la animo ne supervivus la korpon, la homo nur havus kiel perspektivon la nenion, kaj tiel same estus se la pensokapablo estus produkto de la materio. Se ĝi ne konservus sian individuecon, tio estas, se ĝi dissolviĝus en tiun komunan rezervujon nomatan *granda tuto*, kiel akvogutoj en la oceano, tio por la homo egalus la neniigon de la penso, kaj la sekvo estus tute sama kiel se li ne havus animon.

La postmortan supervivon de la animo nerefuteble, kaj iel palpeble, elmontras la spiritismaj komunikiĝoj. Ĝian individuecon elpravas la karaktero kaj la kvalitoj propraj al ĉiu persono, kaj tiuj kvalitoj, kiuj distingas la animojn, unuj disde aliaj, ja konsistigas ties personecon. Se la animoj konfuziĝus en unu komuna tuto, unuformaj ja estus tiuj kvalitoj.

Krom tiuj inteligentaj pruvoj, estas ankaŭ la materiala pruvo liverata de la videblaj manifestiĝoj, aŭ aperoj, tiel oftaj kaj aŭtentaj, ke oni ne rajtas ilin pridubi.

Unua parto

8. *La homa animo estas feliĉa aŭ malfeliĉa postmorte laŭ tio, ĉu ĝi dumvive faris bonon aŭ malbonon.*

Se oni konfesas ian Dion superege justan, oni ne povas akcepti, ke la animoj havas komunan sorton. Se sama devus esti la estonta pozicio de krimulo kaj virtulo, neniel do utilis peni praktiki bonon. Nu, supozu, ke Dio ne faras distingon inter tiu, faranta bonon, kaj tiu, faranta malbonon, estus nei lian justecon. Ĉar ne ĉiam, dum la surtera vivo, malbono ricevas sian punon, kaj bono sian rekompencan, necesas do el tio konkludi, ke la justeco plenumiĝos poste, sen kio Dio ne estus justa.

Cetere, la estontaj punoj kaj rekompencoj ricevas konkretan pruvon per la komunikiĝoj, kiujn la homoj povas starigi kun la animoj de tiuj, kiuj ĉi tie vivis kaj kiuj venas priskribi sian feliĉan aŭ malfeliĉan staton, la naturon de siaj ĝojoj aŭ de siaj suferoj, krom ankaŭ malkaŝi ties kaŭzojn.

9. *Dio, animo, supervivo kaj individueco de la animo post la morto, estontaj punoj kaj rekompencoj, estas fundamentaj principoj de ĉiuj religioj.*

Al la moralaj pruvoj de tiuj principoj Spiritismo aldonas la pruvojn materialajn liveratajn de l' faktoj kaj eksperimentado, tiel nuligante la sofismojn de materialismo. En la ĉeesto de l' faktoj, nekredemo ne plu havas ekzistopravon, kaj tiamaniere Spiritismo rehavigas fidon al tiuj, kiuj ĝin perdis, kaj forigas la dubojn de l' nekredantoj.

III. Kreado

10. *Dio estas la kreinto de ĉiuj ekzistaĵoj.*

Ĉi tiu propozicio estas sekvo de la pruvo pri la ekzistado de Dio.

11. *La principo de la ekzistaĵoj sidas en la sekretoj de Dio.*

Ĉio diras, ke Dio estas la aŭtoro de ĉiuj ekzistaĵoj, sed kiam kaj kiel li kreis ilin? Ĉu la materio ekzistas, kiel li, de la tuta eterna tempo? Tion ni ne scias. Pri ĉio, kion li trovis ne revelaciinda al ni, oni povas nur starigi pli aŭ malpli probablajn sistemojn. De la efikoj, kiujn ni vidas, ni povas alpaŝi al iuj kaŭzoj. Estas tamen ia limo al ni ne transpasebla. Voli iri transen estus samtempe tempoperdo kaj sin elmetado al eraro.

12. *La homo havas, kiel gvidilon en la esplorado de l' nekonataĵo, la atributojn de Dio.*

Por la esplorado de la misteroj, kiujn al ni eblas sondi per rezonado, estas ia certa kriterio, ia neerariva gvidilo, nome la atributoj de Dio.

Se oni akceptas, ke Dio estas *eterna, senŝanĝa, nemateria, unika, ĉiopova, superege justa kaj bona*, ke li estas senfina en siaj perfektaĵoj, ĉia doktrino aŭ teorio, scienca aŭ religia, celanta depreni de li unu solan el liaj atributoj, nepre estas falsa, ĉar ĝi celus la neadon de la Diaĵo mem.

13. *La materiaj mondoj havis komencon kaj havos finon.*

Ĉu la materio ekzistas, kiel Dio, de la tuta eterna tempo, ĉu ĝi estis kreita iam ajn, ja evidentas, laŭ ĉio ĉiutage okazanta antaŭ niaj okuloj, ke la transformiĝoj de la materio estas nedaŭraj kaj ke el tiuj transformiĝoj rezultas la diversaj korpoj, kiuj senĉese naskiĝas kaj sin reciproke detruas.

Estante produktoj de la aglomeriĝo kaj transformiĝo de la materio, la diversaj mondoj, kiel ĉiuj materiaj korpoj, nepre havis komencon kaj havos finon, laŭ leĝoj al ni ne konataj. La Scienco povas, ĝis certa limo, formuli la leĝojn, kiuj regis ilian formiĝon, kaj alpaŝi al ilia primitiva stato. Ĉia filozofia teorio, kontraŭdiranta faktojn elpruvitajn de la Scienco, nepre estas falsa, krom se ĝi pravas, ke la Scienco eraras.

14. Krom krei la materiajn mondojn, Dio ankaŭ kreis inteligentajn estulojn, kiujn ni nomas Spiritoj.

15. Estas al ni nekonataj la origino de la Spiritoj kaj la maniero kiel ili estas kreitaj; ni nur scias, ke ili estas kreitaj simplaj kaj senciaj, tio estas, sen ia scio kaj sen konado de bono kaj malbono, tamen perfekteblaj kaj kun egala kapablo por, kun la tempo, ĉion akiri kaj ĉion scii. Komence ili troviĝas en iaspeca infaneco, sen propra volo kaj sen plena konscio pri sia ekzisto.

16. Laŭgrade kiel la Spirito malproksimiĝas de sia deirpunkto, liaj ideoj, kiel ĉe infano, disvolviĝas kaj, kun la ideoj, ankaŭ la libera volo, tio estas, la libereco fari aŭ ne fari, sekvi tiun aŭ tiun alian vojon por sia progreso, kio estas unu el la esencaj atributoj de la Spirito.

17. La fina celo de ĉiuj Spiritoj estas atingi la perfektecon eblan al kreito. La rezultato de tiu perfekteco konsistas en la ĝuo de la superega feliĉo, kiu el ĝi sekvas kaj kiun ili pli aŭ malpli rapide atingas laŭ tio, kiel ili uzis sian liberan volon.

18. La Spiritoj estas la perantoj de la dia potenco; ili konstituas la inteligentan forton de la Naturo kaj kunhelpas por la plenumiĝo de la projektoj de la Kreinto, cele al subteno de la ĝenerala harmonio de la Universo kaj de la neŝanĝeblaj leĝoj regantaj la kreaĵaron.

Unua parto

19. Por kunhelpi, kiel perantoj de la dia potenco, ĉe la verko de la materiaj mondoj, la Spiritoj kelkatempe surmetas materian korpon.

La enkarniĝintaj Spiritoj konsistigas la homaron. La homa animo estas enkarniĝinta Spirito.

20. La spirita vivo estas la normala vivo de la Spirito: ĝi estas eterna; la enkorpa vivo estas nedaŭra kaj pasema: nenio alia ol momento en la eterneco.

21. La enkarniĝo de la Spiritoj troviĝas en la leĝoj de la Naturo; ĝi estas necesa al ilia progreso kaj al la plenumiĝo de la verkoj de Dio. Per la laboro, kiun al ili necesigas la enkorpa vivo, ili perfektigas sian inteligenton kaj akiras, observante la leĝon de Dio, la meritojn, kiuj ilin kondukos al la eterna feliĉo.

El tio rezultas, ke, kunhelpante por la ĝenerala verko de la kreado, la Spiritoj laboras por sia propra progreso.

La perfektigiĝado de la Spirito estas frukto de lia propra laboro; li progresas laŭ sia pli aŭ malpli granda diligento, aŭ sia bonvolo por akiri la kvalitojn, kiuj mankas al li.

Ne povante havigi al si, en unu sola enkorpa ekzistado, ĉiujn moralajn kaj intelektajn kvalitojn, kiuj lin kondukos al la celo, la Spirito ĝin atingas tra sinsekvo da ekzistadoj, en kiuj li faras po kelke da paŝoj antaŭen sur la vojo de la progreso kaj puriĝas je kelkaj el siaj neperfektaĵoj.

Ĉe ĉiu nova ekzistado, la Spirito kunportas, kion li akiris laŭ inteligenteco kaj laŭ moraleco en siaj antaŭaj ekzistadoj, krom ankaŭ la ĝermoj de tiuj neperfektaĵoj, de kiuj li ankoraŭ ne seniĝis.

Kiam Spirito malbone uzis iun ekzistadon, tio estas, se li faris nenian progreson sur la vojo de bono, tiu ekzistado estas al li senprofita, kaj li devas ĝin rekomenci en pli aŭ malpli penigaj kondiĉoj pro siaj malzorgemo kaj malbonvolo.

Ĉar la Spirito, en ĉiu enkorpa ekzistado, nepre akiras ion rilate al bono kaj seniĝas je io rilate al malbono, el tio sekvas, ke, post certa nombro da enkarniĝoj, li troviĝas purigita kaj atingas la staton de pura Spirito.

Nedefinita estas la nombro de la enkorpaj ekzistadoj: dependas de la volo de la Spirito ĝin malgrandigi per diligenta laborado por sia morala perfektigiĝo.

En la intertempo de la enkorpaj ekzistadoj, la Spirito estas *vaganta* kaj vivas la spiritan vivon. La vaganteco ne havas difinitan daŭron.

Kiam la Spiritoj akiris sur iu mondo la ĉiomon da progreso, kiun al ili ebligas la stato de tiu mondo, ili ĝin forlasas por enkarniĝi en alia pli

Spiritisma kredkonfeso rezonata

progresinta, kie ili akiras novajn sciojn, kaj tiel plu sinsekve ĝis ili, ne plu bezonante enkarniĝon en materia korpo, ekskluzive vivas la spirititan vivon, en kiu ili ankoraŭ progresas en alia senco kaj per aliaj rimedoj. Atinginte la kulminon de la progreso, ili ĝuas la superegan feliĉon. Akceptite en la konsilioj de la Ĉiopova, ili identiĝas kun lia penso kaj fariĝas liaj kurieroj, liaj senperaj ministroj por la regado de l' mondoj, havante sub sia estreco Spiritojn en malsamaj gradoj de progreso.



Manifestiĝoj de la Spiritoj

Karaktero kaj religiaj sekvoj de la manifestiĝoj de la Spiritoj

1. La animoj aŭ Spiritoj de tiuj, kiuj ĉi tie vivis, konsistigas la nevideblan mondon, kiu plenigas la spacon kaj en kiu ni vivas. El tio rezultas, ke, se estas homoj, estas Spiritoj, kaj ke, se ĉi tiuj havas la povon manifestiĝi, ili ĝin havis en ĉiuj epokoj. Ĉi tion atestas la historio kaj la religioj de ĉiuj popoloj. Sed en la lastaj tempoj la manifestiĝoj de la Spiritoj pli vaste disvolviĝis kaj prenis fortan karakteron de aŭtenteco, ĉar estis en la planoj de la Providenco meti finon al tiaj plagoj, kiel nekredemo kaj materialismo, pere de evidentaj pruvoj, permesante al tiuj, forlasintaj la Teron, veni por atesti sian ekzistadon kaj al ni malkaŝi sian situacion, feliĉan aŭ malfeliĉan.

2. Ĉar la mondo videbla troviĝas ene de la nevidebla, kun kiu ĝi havas konstantan kontakton, el tio sekvas, ke ili senĉese reagis, unu sur la alian. Tiu reago konstituas la fonton de amaso da fenomenoj, kiujn oni rigardis supernaturaj pro nekonado de iliaj kaŭzoj.

La agado de la nevidebla mondo sur la videblan, kaj reciproke, estas unu el la leĝoj, unu el la fortoj de la Naturo, tiel necesa al la universa harmonio kiel la leĝo de altiĝo. Se ĝi ĉesus, tiu harmonio difektiĝus, same kiel ĉe ia mekanismo, de kiu oni deprenus ian pecon. Ĉar tiu agado sidas sur unu leĝo de la Naturo, tial neniel supernaturaj estas la fenomenoj, kiujn ĝi estigas. Tiaj ili ŝajnis, ĉar oni ne konis ties kaŭzon. Tiel same okazis kun certaj efikoj de la elektro, de la lumo, ktp.

3. Ĉiuj religioj havas kiel bazon la ekziston de Dio kaj kiel celon la estontecon de la homo post la morto. Tiu estonteco, kiu por la homo

havas plej gravan intereson, estas nepre ligita al la ekzisto de la nevidebla mondo, kies konado ankaŭ fariĝis, de ĉiuj tempoj, objekto de liaj esploroj kaj zorgoj. Lia atento estis nature turnita sur la fenomenojn celantajn pruvi la ekziston de tiu mondo, kaj neniuj montriĝis pli konkludigaj ol la manifestiĝoj de la Spiritoj, per kiuj la loĝantoj mem de tiu mondo malkaŝis sian ekziston. Ja tial tiuj fenomenoj konsistigis bazon al la plejparto de ĉiuj religiaj dogmoj.

4. Pro instinkta intuicio pri ia supera potenco, la homo ĉiam estis instigata atribui al la *rekta* agado de tiu potenco la fenomenojn, kies kaŭzon li ne konis kaj kiujn li prenis por mirindaĵoj kaj supernaturaj efikoj. Tiun inklinon la nekredemuloj rigardas kiel sekvon de la amo de l' homo al tio mirakleca; sed ili ne serĉas la originon de tiu amo al tio mirakleca, kiu tamen ja troviĝas en svaga intuicio pri ia eksterkorpa ordo de aferoj. Kun la progreso de la Scienco kaj la konado de la leĝoj de la Naturo, tiuj fenomenoj iom post iom transiris el la kampo de tio mirakleca en tiun de la naturaj efikoj, en tia maniero, ke, kio iam ŝajnis supernatura, tia ĝi ne plu estas hodiaŭ, kaj kio tia ankoraŭ restas hodiaŭ, ne plu estos morgaŭ.

Rezultante el la manifestiĝoj de la Spiritoj, la fenomenoj, pro sia naturo mem, liveris grandan kontingenton al la faktoj rigardataj kiel miraklecaj. Sed devis veni tempo, kiam, pro la konado de la leĝo ilin reganta, ili eniris, kiel la aliaj, en la ordon de la naturaj faktoj. Tiu tempo estas veninta, kaj Spiritismo, konigante tiun leĝon, liveras la ŝlosilon de la plejparto el la nekomprenataj lokoj el la sanktaj Skriboj tion aludantaj, krom ankaŭ de tiuj faktoj rigardataj kiel miraklecaj.

5. La mirakleca fakto karakteriziĝas per tio, ke ĝi estas eksterkutima kaj escepta; ja ia nuligo de la naturaj leĝoj. Se do iu fenomeno refariĝas en la samaj kondiĉoj, tio signifas, ke ĝi estas submetita al iu leĝo kaj ne estas mirakleca. Tiu leĝo povas esti nekonata, sed el tio ne sekvas, ke ĝi ne ekzistas. La tempo zorgos pri ĝia diskonigo.

La movo de la Suno, aŭ pli ĝuste de la Tero, haltigita de Josuo, estus vera miraklo, ĉar ĝi prezentus efektivan nuligon de la leĝo reganta la movadon de la astroj. Sed se la fakto povus refariĝi en difinitaj kondiĉoj, tiel okazus, ĉar ĝi estus submetita al iu leĝo kaj sekve ĉesus esti mirakleca.

6. La Eklezio senprave maltrankviliĝas, vidante malvastiĝi la rondon de la miraklecaj faktoj, ĉar Dio pli bone pravas sian grandecon kaj sian povon per la admirinda tutaĵo de siaj leĝoj, ol per iuj malobeoj al tiuj samaj leĝoj, des pli ĉar la Eklezio atribuas al la demono la povon estigi

miregindaĵojn, kio implicus, ke, povante interrompi la agadon de la diaj leĝoj, la demono estus tiel pova kiel Dio. Kuraĝi aserti, ke la Spirito de malbono povas haltigi la agadon de la leĝoj de Dio, estas blafemo kaj sakrilegio.

Anstataŭ ke ĝi perdis sian aŭtoritaton pro tio, ke faktoj rigardataj kiel miraklaj eniris la ordon de la naturaj faktoj, la religio nur povas el tio profiti; unue tial, ke, se iun fakton oni malĝuste rigardas mirakla, en tio ja estas eraro, kaj la religio povas nur malgajni sin apogante sur eraro, precipe se ĝi obstinas rigardi mirakla tion, kio tia ne estas; due ĉar multaj personoj, ne konsentante la eblecon de mirakloj, neas tiujn faktojn, kiujn oni opinias miraklaj, kaj sekve la religion sin apogantan sur tiuj faktoj. Se, kontraŭe, la ebleco de tiuj faktoj estas pruvita kiel sekvo de naturaj leĝoj, tiam ne plu estus pravo por ilin repuŝi, nek repuŝi la religion, kiu ilin proklamas.

7. La faktojn kategorie pruvitajn de la Scienco povas malkonfirmi neniun kontraŭstaranta kredo religia. La religio povas nur akiri aŭtoritaton, sekvante la progreson de la sciencaj konoj, kaj ĝin ja perdi, restante malantaŭe aŭ protestante kontraŭ tiuj konoj en la nomo de dogmoj, ĉar neniun dogmo povas superstari aŭ nuligi la leĝojn de la Naturo; dogmo bazita sur neo de natura leĝo ne povas esprimi la veron.

Spiritismo, fondita sur la konado de leĝoj ĝis nun ne komprenataj, tute ne venas detruiri la religiajn faktojn, sed ja ilin sankcii, prezentante ties racian klarigon. Ĝi venas detruiri nur tiujn falsajn sekvojn, kiujn oni el ĝi deduktis pro nekonado de tiuj leĝoj aŭ pro ilia erara interpreto.

8. La nekonado de la naturaj leĝoj, kondukante la homon al serĉado de fantaziaj kaŭzoj por fenomenoj, kiujn ili ne komprenas, estas fonto de superstiĉaj ideoj, el kiuj kelkaj naskiĝas de miskomprenataj spiritismaj fenomenoj. La konado de la leĝoj, kiuj regas tiajn fenomenojn, detruas tiujn superstiĉajn ideojn, metante la aferojn en la realon kaj elmontrante, rilate al tiuj ideoj, la limon de eblo kaj neblo.

I - La perispirito kiel principo de la manifestiĝoj

9. La Spiritoj, kiel dirite, havas fluidecan korpon, nomatan *perispirito*, kies substancon ili ĉerpas en la universa aŭ kosma fluido, kiu fluido ĝin formas kaj nutras same kiel la aero formas kaj nutras la materian korpon de la homo. La perispirito estas pli aŭ malpli etereca, laŭ la mondoj aŭ

laŭ la purecogrado de la Spirito. En la malsuperaj mondoj, kiel ankaŭ ĉe la malsuperaj Spiritoj, ĝia naturo estas malpli delikata kaj tre proksima al la kruda materio.

10. Dum la enkarna stato, la Spirito konservas sian perispiriton, kaj la korpo estas por li nur ia dua envolvajo, pli kruda, pli rezista, alĝustigita al la funkcioj, kiujn li devas plenumi, kaj je tiu envolvajo li seniĝas okaze de la morto.

La perispirito rolas kiel peranto inter la Spirito kaj la korpo, estante transsendilo de ĉiuj sensacoj. Koncerne tiujn venantajn de ekstere, oni povas diri, ke la korpo kaptas la impreson, la perispirito ĝin transsendas, kaj la Spirito, sentiva kaj inteligenta estaĵo, ĝin ricevas. Kiam la Spirito startigas la agon, oni povas diri, ke la Spirito volas, la perispirito transsendas kaj la korpo plenumas.

11. La perispirito ne restas enfermita en la limoj de la korpo kvazaŭ en ia kesto. Pro sia fluideca naturo, ĝi estas ekspansia, radias eksteren kaj formas, ĉirkaŭ la korpo, iaspecan atmosferon, kiun la penso kaj la volforto povas pli aŭ malpli etendi. El tio sekvas, ke du personoj, kvankam sen korpa kontakto, povas tamen kontakti per la perispirito kaj malgraŭvole interŝanĝi ne nur impresojn sed ankaŭ, kelkfoje, eĉ pensojn per la intuicio.

12. Estante unu el la konsistigaj elementoj de la homo, la perispirito ludas gravan rolon en ĉiuj psikologiaj fenomenoj kaj, ĝis certa grado, en fenomenoj fiziologiaj kaj patologiaj. Kiam la medicinaj sciencoj konsideros la influon de la spirita elemento en la ekonomio, ili estos farintaj larĝan paŝon, kaj novaj horizontoj malfermiĝos antaŭ ili. Tiam estos klarigitaj la kaŭzoj de multaj malsanoj kaj eltrovitaj potencaj rimedoj por ilin kontraŭbatali.

13. Estas ĝuste per la perispirito, ke la Spiritoj agas sur la inertan materion kaj estigas la diversajn manifestiĝojn. Ilia etereca naturo ne povus konstitui obstaklon, ĉar oni ja scias, ke la plej potencaj motoroj troviĝas inter la plej maldensaj kaj plej subtilaj fluidoj. Estas do nenia motivo por mirego, kiam oni vidas la Spiritojn produkti, helpe de tia levilo, certajn fizikajn efikojn, kiaj frapoj kaj ĉiaspecaj bruoj, transporto kaj ĵeto de objektoj. Oni tute ne bezonas, por ilin klarigi, sin helpi per tio mirakleca aŭ per tio supernatura.

14. Agante sur la materion, la Spiritoj povas manifestiĝi per multaj diversaj manieroj: per fizikaj efikoj, kiel bruoj kaj movado de objektoj; per

Manifestiĝoj de la Spiritoj

transsendo de la penso, vidado, aŭdado, parolo, tuŝado, skribo, desegno, muziko, ktp. Unuvorte, per ĉiuj rimedoj taŭgaj por meti ilin en rilatoj kun la homoj.

15. La manifestiĝoj de la Spiritoj povas esti spontanaj aŭ okazigataj. La unuaj ekestas subite kaj neatendite kaj ofte fariĝas ĉe personoj tute fremdaj al la spiritismaj ideoj. En iuj okazoj kaj sub certaj cirkonstancoj, la manifestiĝoj povas esti okazigataj de la volo, pro la influo de personoj por tio dotitaj per specialaj kapabloj.

La spontanaj manifestiĝoj okazis en ĉiuj epokoj kaj en ĉiuj landoj. La rimedo por ilin okazigi sendube ankaŭ estis konata en la antikveco sed restis privilegio de certaj kastoj, kiuj ĝin ne malsekretigis krom al iuj maloftaj inicitoj, sub rigoraj kondiĉoj, kaŝante ĝin antaŭ la vulgularo por ĉi tiun superregi per la prestiĝo de ia okulta potenco. Ĝi tamen daŭradis tra la aĝoj, ĉe kelkaj homoj, ĝis la nuntempo, sed preskaŭ ĉiam falsite de la superstiĉo aŭ miksite kun ridinda magiado, kio kontribuis por ĝia senkreditiĝo. Tio estis, ĝis tiam, nenio pli ol ĝermoj ĉi tie kaj tie ĵetitaj. La Providenco rezervis al nia epoko la kompletan konadon kaj la vulgarigon de tiuj fenomenoj, celante ilin purigi el la malbonaj almiĝaĵoj kaj ilin servigi al la plibonigo de la homaro, jam nuntempe matura por ilin kompreni kaj el ili eltiri la sekvojn.

II - Vidmanifestiĝoj

16. Pro sia naturo kaj en sia normala stato, la perispirito estas nevidebla, kaj per tiu eco ĝi havas ion komunan al multego da fluidoj, pri kiuj ni scias, ke ili ekzistas sed kiujn ni neniam vidis. Sed ĝi ankaŭ povas, same kiel certaj fluido, akcepti modifojn, kiuj faras ĝin perceptebla por la vido, ĉu pro iaspeca densiĝo, ĉu pro ia ŝanĝo en la molekula aranĝo. Ĝi eĉ povas akiri la proprecojn de solida, palpebla korpo kaj tuj repreni sian staton de etereco kaj nevidebleco. Oni povas prezenti al si tiun efikon laŭ tio, kio okazas kun la vaporo, kiu povas pasi de nevidebleco en nebulecan staton, poste en likvan, fine en staton de solideco, kaj inverse.

Tiuj malsamaj statoj de la perispirito rezultas el la volo de la Spirito, ne el ia ekstera, fizika kaŭzo, kiel ĉe la gasoj. Kiam Spirito aperas, tiel estas ĉar li metas sian perispiriton en staton taŭgan por ĝin videbli. Sed ne ĉiam sufiĉas la volo: por ke tiu modifo ĉe la perispirito povu efektiviĝi, necesas la kunhelpo de cirkonstancoj ne dependaj de la Spirito. Necesas

krome, ke al la Spirito estu permesate videbliĝi al tia persono, kio ne ĉiam estas al li konsentita, aŭ nur en certaj cirkonstancoj pro motivoj, kiujn ni ne povas prijuĝi. (Vidu: La Libro de la Mediumoj, n-ro 105.)

Alia propreco de la perispirito, devenanta de ĝia etereca naturo, estas la penetripovo. Nenia materio prezentas baron al ĝi, kiu ilin ĉiujn trapasas, kiel lumo trairas la korpojn travideblajn. Pro tio estas nenia ĉirkaŭfermejo, kiu povus kontraŭstari la eniron de la Spiritoj. Ili vizitas malliberulon en ties karcerio tiel facile, kiel homon en la kamparo.

17. La plej ordinaraj vidmanifestiĝoj okazas dum la dormo, ĉe la sonĝoj: tio estas la *vizioj*. La ĝustediraj *aperoj* okazas en maldorma stato, kiam oni ĝuas la plenecon de siaj fakultoj kaj la tutan liberecon por ilin uzi. La aperoj ĝenerale montriĝas sub formo vaporeca kaj diafana, kelkfoje svaga kaj malpreciza. Ili ofte prezentiĝas, je la unua vido, kiel dubblanka helo, kies konturoj iom post iom desegniĝas. Aliajn fojojn, la formoj nete konturiĝas, kaj oni distingas la plej etajn trajtojn de la vizaĝo, en tia maniero, ke oni povas ĝin tre precize priskribi. La sintenado, la aspekto similas tiujn, kiujn la Spirito havis dumvive.

18. Povante preni sur sin ĉiujn eksterajojn, la Spirito sin prezentas sub tiu, kiu lin pli bone rekonebligas, se tio estas lia deziro. Kvankam li, kiel Spirito, havas nenan korpan malsanon, li tamen sin montros kripla, lama, vundita, kun cikatroj, se nur tio estas necesa por konstato de lia identeco. Same okazas koncerne la veston: ĉe la Spiritoj, kiuj konservis nenan restaĵon de la surteraj malfortaĵoj, ĝi konsistas el longaj, flirtantaj drapoj, kun gracie ondiĝanta hararo.

La Spiritoj ofte sin prezentas kun tiuj atributoj karakterizantaj ilian superecon, kiel aŭreolo, flugiloj ĉe tiuj, kiujn oni rigardas kiel anĝelojn, brilege luma aspekto, dum aliaj portas tiujn atributojn memorigantajn pri iliaj surteraj okupoj. Tiel, batalanto povas aperi kun sia armaĵo, saĝulo kun libroj, murdinto kun ponardo, ktp. La superaj Spiritoj havas belan, noblan kaj serenajn figuron; ĉe tiuj plej malsuperaj estas io sovaĝa kaj bestia, kaj ili iafoje ankoraŭ portas restaĵojn de siaj krimoj aŭ de travivitaj turmentoj. Por ili tiaj eksterajoj estas realaj, tio estas, ili kredas sin tiaj, kiaj ili ŝajnas, kaj tion ili sentas kiel punon.

19. La Spirito, kiu volas aŭ povas aperi, kelkfoje prenas sur sin ankoraŭ pli precizan formon, tute similan al solida korpo, en tia maniero, ke ili kaŭzas kompletan iluzion kaj kredigas, ke oni havas antaŭ si iun korpan estaĵon.

Manifestiĝoj de la Spiritoj

En kelkaj okazoj kaj sub certaj cirkonstancoj, la palpebleco povas fariĝi reala, tio estas, oni povas tuŝi, palpi, senti la saman reziston, la saman varmon kiel ĉe viva korpo, kio ne malpermesas, ke li disfumiĝu kun la rapideco de fulmo. Oni povas do troviĝi en la ĉeesto de Spirito, kun li interŝanĝi parolojn kaj ordinarajn gestojn, kredante, ke oni estas en rilatoj kun simpla mortemulo kaj neniel suspektante, ke tio estas Spirito.

20. Kia ajn estas la eksterajo, sub kiu Spirito sin prezentas, eĉ sub palpebla formo, li povas, en tiu sama momento, fariĝi videbla nur por kelkaj personoj. Li povas do, en iu kunveno, montriĝi nur al unu aŭ al kelkaj el la ĉeestantoj. El du personoj, starantaj unu apud la dua, unu povas lin vidi kaj tuŝi, dum la alia nenion vidas nek sentas.

La apero al unu sola persono inter pluraj kunvenintaj havas kiel kaŭzon la neceso, por ĝia ekesto, de ia kombiniĝo inter la perispirita fluido de la Spirito kaj tiu de la persono. Kaj por ke tiel estu, necesas, ke inter tiuj fluidoj ekzistu iaspeca afineco ebliganta la kombiniĝon. Se la Spirito ne trovas la necesan organan kapablecon, la apero ne povas fariĝi; se la kapableco ekzistas, la Spirito estas libera ĝin utiligi aŭ ne. De tio venas, ke, se kune troviĝas du personoj egale dotitaj en tiu rilato, la Spirito povas estigi la fluidkombiniĝon nur kun tiu, al kiu li volas montriĝi. Ne estigante kombiniĝon kun la alia, li de ĉi tiu ne estos vidata. Simile okazus ĉe du homoj, kiu havus vualon sur la okuloj: se unu tria persono volus sin montri ekskluzive al unu, nur de ĉi tiu li levus la vualon. Sed al iu, kiu estus blinda, oni vane levus la vualon: ne pro tio li ricevus la vidpovon.

21. Tre raraj estas la palpeblaj aperoj, sed pli oftas tiuj vaporecaj, precipe en la momento de la morto. La liberiĝinta Spirito ŝajne volas urĝe revidi siajn parencojn kaj amikojn, kvazaŭ por ĉi tiujn sciigi, ke li ĵus forlasis la Teron, kaj por al ili diri, ke li ĉiam ankoraŭ vivas. Ĉiu nur elvoku siajn memorojn kaj certe konstatos, kiom da tiuspecaj, aŭtentaj faktoj, pri kiuj li ne atentis, ja okazis, ne nur dumnokte sed en plena tago kaj en perfekta stato de maldormo.

III - Transfiguriĝo. Nevidebleco

22. La perispirito de la vivantoj havas tiujn samajn proprecojn, kiel tiu de la Spiritoj. Kiel jam dirite, ĝi ne restas enfermita en la korpo sed radias kaj formas ĉirkaŭ ĉi tiu iaspecan fluidecan atmosferon. Nu, povas ja fariĝi, ke en certaj okazoj kaj sub samaj cirkonstancoj, ĝi spertus aliĝon

analogan al tiu jam priskribita: la reala kaj materia formo de la korpo povas forviŝiĝi sub tiu fluideca tavolo, se oni povas tiel sin esprimi, kaj momente preni tute malsaman eksteraĵon, eĉ tiun de alia persono aŭ de la Spirito kombinanta sian fluidon kun tiu de la koncerna persono, aŭ ankoraŭ doni al malbela figuro radiantan, belan aspekton. En tio konsistas la tre ofta fenomeno nomata transfiguriĝo, kiu okazas ĉefe tiam, kiam pro la cirkonstancoj ekestas pli abunda elversiĝo de fluido.

La transfiguriĝo povas fariĝi en tre malsamaj intensoj laŭ la gradoj de elpuriĝo de la perispirito, kiu grado ĉiam respondas al la grado de morala progreso de la Spirito. Ĝi kelkfoje limiĝas al simpla aliigo de la mieno sed ĝi ankaŭ povas doni al la perispirito luman, splendan aspekton.

La materia formo povas do malaperi sub la perispirita fluido, sed tio ne necesigas, ke la fluido prenu alian aspekton; ĝi povas simple vuali inertan aŭ vivan korpon kaj ĉi tiun fari nevidebla por unu aŭ pluraj personoj, kiel farus vaportavolo.

Ni prenas konatajn aferojn nur kiel elementon por komparo, neniel celante starigi ian absolutan analogecon, kiu ja ne ekzistas.

23. Tiuj fenomenoj povas ŝajni strangaj nur tial, ke oni ne konas la proprecojn de la perispirita fluido. Ĉi tiu estas por ni ia nova korpo, nepre havanta novajn proprecojn, kiuj, kvankam oni ne povas ilin studi per la ordinaraĵoj de la Scienco, tamen ĉiam ankoraŭ restas naturaj proprecoj, kies miraklecan karakteron nur donas ilia noveco.

IV - Liberiĝo de la animo

24. Dum la dormo nur la korpo ripozas, sed la Spirito ne dormas, profitante la korpan ripozon kaj la tempon, kiam lia ĉeesto ne estas necesa, por memstare agi kaj iri kien li volas; tiam li ĝuas sian liberecon kaj la plenecon de siaj fakultoj. Dum la vivo la Spirito neniam komplete apartiĝas de la korpo; kiel ajn malproksimen li transportiĝas, li ĉiam restas al ĝi ligita per ia fluideca ligilo, kiu servas por lin voki, en la okazo kiam lia ĉeesto estas necesa. Nur la morto rompas tiun ligilon.

“La dormo parte liberigas la animon el la korpo: kiam oni dormas, oni troviĝas, dum kelkaj momentoj, en stato, en kiu oni daŭre restadas post la morto. La Spiritoj, kiuj, ĉe la morto, tuj liberiĝas de la materio, havis, dum la vivo, saĝajn sonĝojn; dum dormado, ili iras renkonte al estuloj superaj ol ili, kaj kun tiuj ili vojaĝas, interparolas kaj sin instruas; ili eĉ kunhelpas

Manifestiĝoj de la Spiritoj

por verkoj, kiujn ili postmorte trovas jam finitaj. Ankaŭ tio devas instrui vin ne timi la morton, ĉar vi mortas ĉiutage, kiel asertis sankta viro.

“Tio validas rilate la altrangajn Spiritojn; la granda plimulto de la Spiritoj enkarniĝintaj sur la Tero, tiuj, kiuj, ĉe la momento de l’ morto, restas longajn horojn konsternitaj kaj senkonsilaj —, tiuj, dum dormo, iras al mondoj pli malaltaj ol la Tero, al kiuj malnovaj amikoj ilin vokas, aŭ al plezuroj pli malnoblaj ol tiuj, kiujn ili ĉi tie trovas; ili iras sorbi doktrinojn pli trivialajn, pli abomenajn, pli malutilajn, ol tiuj praktikataj de ili ĉe vi. La origino de simpatio inter la terloĝantoj kuŝas ĝuste sur tiu fakto, ke, vekigante, oni sin sentas alligita per la koro al tiuj, kun kiuj oni ĵus pasigis ok aŭ naŭ horojn de feliĉo aŭ plezuro. Kio ankaŭ klarigas neforigeblajn antipatiojn inter la homoj estas tio, ke ni intime scias, ke la antipatiataj personoj havas konsciencan alian ol la nia, ĉar ni konas tiujn personojn, eĉ se neniam antaŭe ni ilin vidis per niaj okuloj mem. Tio ankoraŭ klarigas nian indiferentecon, ĉar al iu ne interesas novaj amikoj, kiam ili scias, ke aliaj homoj lin amas kaj al li sin donas. Resume, dormo havas sur la vivon influon pli grandan, ol vi supozas.

“Per dormo la enkarniĝintaj Spiritoj ĉiam kontaktas kun la spirita mondo; ĝuste pro tio la Superaj Spiritoj konsentas, sen tro granda malvolonto, enkarniĝi sur la Tero. Dio volis, ke, dum sia kontakto kun la malvirto, ili povu iri refreŝiĝi ĉe la fonto de bono, por ke ili, kiuj ĉi tien venas por instrui siajn fratojn, ankaŭ ne forfalu. Dormo estas la pordo, kiun Dio malfermis al iliaj ĉielaj amikoj; ĝi estas la senlaciga amuzo post laboro, dum ili atendas la grandan finan elliberiĝon, kiu ilin rekondukos al ĉies vera patrujo.

“Songô estas la memoro pri tio, kion via Spirito vidis dum dormo; sed, rimarku, ke vi ne ĉiam songas, ĉar vi ne ĉiam memoras, kion vi vidis, aŭ ĉion, kion vi vidis. Tiu memoro ne troviĝas en via animo tute plene; ĝi estas ofte nur memoro pri la konfuziĝo de la animo ĉe sia forflugo aŭ reveno, transiĝo, al kiu aliĝas la memoro pri tio, kion vi faris aŭ kio vian Spiriton okupas en maldormeco; se ne estus tiel, kiel vi klarigus la absurdajn songojn, kiujn ĉiu havas, tiel la plej kleraj, kiel la plej simplaj homoj? La malbonaj Spiritoj profitas ankaŭ la songojn, por turmenti la malfortajn kaj malkuraĝajn animojn.

“La mallogikeco de la songoj estas klarigata ankaŭ per la mankantaj punktoj, estigitaj de nekompleta memorado pri tio, kion ni vidis dum dormo. Io sama okazus al rakonto, el kiu oni senelekte fortranĉus frazojn aŭ partojn de frazoj; se kunigitaj, la restintaj fragmentoj havus nenian logikan signifon.

“Cetere, vi baldaŭ vidos elvolviĝi alian ankoraŭ nekonatan specon de songoj; ĝi estas tiel malnova kiel tiu de vi jam konata. La songo de Johana

Unua parto

de Arko, tiu de Jakobo, tiuj de la judaj profetoj kaj de kelkaj hindaj dive-
nistoj estas memoro de la animo tute libera de la korpo, memoro pri tiu
dua vivo, pri kiu mi antaŭ nelonge parolis al vi." (*La Libro de la Spiritoj*,
Dua Parto, ĉap. VIII, n-ro 400 kaj sekvantaj.)

25. La sendependeco kaj libereco de la animo evidente manifestiĝas
ĉefe en la fenomeno de la natura, magneta somnambulismo, en la kata-
lepsio kaj en la letargio. La somnambula klarvideco estas nenio alia, ol la
kapableco de la animo vidi kaj senti sen la helpo de la materiaj organoj.
Tiu kapableco estas unu el la animaj atributoj, kuŝanta en ĝia memo,
dum la korpaj organoj estas malvastaj kanaloj, tra kiuj venas al ĝi certaj
perceptoj. La transvidado, kiun kelkaj somnambuloj posedas, rezultas
el translokiĝo de la animo, kiu vidas tion, kio okazas en la lokoj, kien
ĝi transportiĝis. Dum siaj migradoj la animo ĉiam estas vestita per sia
perispirito, peranto de ĝiaj sensacoj, kiu, kiel ni jam diris, neniam plene
malligiĝas de la korpo. La apartiĝo de la animo kaŭzas la inertecon de la
korpo, kiu iafoje ŝajnas senviva.

26. Tiu apartiĝo ankaŭ povas ekesti, en diversaj gradoj, dum la
maldorma stato, sed en tiuj okazoj la korpo neniam plene ĝuas sian
normalan aktivecon; ĉiam estas ia absorbiteco, ia pli aŭ malpli kompleta
forliberiĝo de la surteraj aferoj; la korpo ne dormas, ĝi paŝas, agas, sed
la okuloj rigardas ne vidante, per kio oni komprenas, ke la animo estas
aliloke. Kiel ĉe somnambulismo, la animo vidas forestantajn aferojn,
havas perceptojn kaj sensacojn al ni ne konatajn, kaj iafoje antaŭscias
certajn estontaĵojn, kies ligitcon kun la nunajoj ĝi perceptas. Penetrante
la nevideblan mondon, ĝi vidas la Spiritojn, kun kiuj ĝi povas interparoli
kaj kies pensojn ĝi al ni povas transsendi.

La forgeso pri la okazintaĵo ordinare sekvas la revenon en la nor-
malan staton, sed la animo kelkfoje konservas pri ĝi pli aŭ malpli svagan
memoron, kiel post iu sonĝo.

27. Iafoje la liberiĝo de la animo malfortigas la fizikajn sensacojn
en tia maniero, ke ĝi estigas veran nesentivecon, kiu, en la momentoj de
ekzaltiteco, povas igi la animon indiferece elporti la plej vivajn dolorojn.
Tiu nesentiveco devenas de la liberiĝo de la perispirito, transigilo de la
korpaj sensacoj: la forestanta Spirito ne sentas la vundojn faritajn al la korpo.

28. La kapableco de la animo por liberiĝo, en ties plej simpla ma-
nifestiĝo, estigas la tiel nomatan maldorman sonĝon; al certaj personoj

Manifestiĝoj de la Spiritoj

tiu kapableco ankaŭ havigas la antaŭscion, el kiu fontas la antaŭsentoj; ĉe pli alta grado de elvolviĝo ĝi estigas la fenomenon nomatan dua vidado, duobla vidado aŭ maldorma somnambulismo.

29. La *ekstazo* prezentas la plej altan gradon de liberiĝo de la animo. Dum sonĝo kaj dum somnambulismo, la animo travagas la terajn mondojn; dum ekstazo, ĝi penetras nekonatan mondon, tiun de la eterecaj Spiritoj, kun kiuj ĝi komuniĝas, tamen ne transpasante difinitajn limojn, ĉar, alie, ĝi rompus la ligilojn, kiuj ĝin tenas ĉe la korpo. Ia blindiga stranga brilego ĝin ĉirkaŭas; harmonioj, ne konataj sur la Tero, ĝin ravas; nedireble agrabla stato ĝin penetras: ĝi anticipas la ĉielan feliĉon, *kaj oni povas diri, ke ĝi metas piedon sur la sojlon de la eterneco*. En la ekstazostato la neniigo de la korpo estas preskaŭ kompleta; restas al ĝi, por tiel diri, nur la organa vivo, kaj oni sentas, ke la animo estas al ĝi alligita per nenio krom simpla fadeno, kiun la plej malgranda peno rompus senrevene.” (*La Libro de la Spiritoj*, n-ro 455.)

30. La ekstazo, ne malpli ol la aliaj gradoj de liberiĝo de la animo, ne estas imuna de eraroj, pro kio la ekstazulaj revelacioj tute ne esprimas ĉiam la absolutan veron. La kaŭzo de tio kuŝas en la neperfekteco de la homa Spirito, kiu, nur post sia alveno al la pinto de la skalo, povas klare juĝi la aferojn. Ĝis tiam al li ne estas donite ĉion vidi kaj ĉion kompreni. Se, post la morto, kiam kompleta estas la disiĝo, li ne ĉiam ĝuste vidas; se estas tiuj ankoraŭ influataj de la surteraj antaŭjuĝoj kaj ne komprenantaj la aferojn de la nevidebla mondo, en kiu ili troviĝas, do tiel same devas okazi, kaj pro des pli forta motivo, al Spirito ankoraŭ ligita al la karno.

Ĉe la ekstazuloj estas kelkfoje pli da ekzaltiteco ol vera klarvideco, aŭ, pli ĝuste, la ekzaltiteco malhelpas lian klarvidecon, pro kio liaj revelacioj ofte prezentas ian miksaĵon el veraĵoj kaj eraroj, el sublimaj kaj eĉ ridindaj aferoj. Malsuperaj Spiritoj ankaŭ profitas tiun ekzaltitecon - kiu ĉiam estas kaŭzo de malforteco kiam oni ne scias ĝin regi - por mastri la ekstazulon. Tiucele ili prenas antaŭ liaj okuloj eksterajojn, kiuj lin tenas ĉe liaj ideoj aŭ antaŭjuĝoj en tia maniero, ke liaj revelacioj ofte estas nenio alia ol reflektoj de liaj kredoj. Tio estas rifo, kiun nur altrangaj Spiritoj povas al si evitigi kaj kontraŭ kiu esploranto devas sin gardi.

31. Estas personoj, kies perispirito identiĝas kun la korpo en tia maniero, ke la disiĝo de la animo ne fariĝas alie ol kun pleja malfacilo, eĉ en la momento de la morto; ili estas ĝenerale tiuj, kiuj vivis prefere por la materio; ankaŭ tiuj, kies morto fariĝas pli suferiga, pli angora, kaj kies

agonio estas pli longa kaj dolora. Sed estas male aliaj, kies animoj teniĝas al la korpo per tiel malfortikaj ligiloj, ke la disiĝo efektiviĝas sen skuoj, kun pli granda facilo kaj ofte antaŭ ol la korpo mortis. Proksimiĝante al la vivofino, tiaj animoj jam duonvidas la mondon, en kiun ili eniros kaj al kiu ili aspiras en la momento de la kompleta liberiĝo.

V - Apero de vivantaj personoj. Dukorpeco

32. La kapableco de la animo liberiĝi kaj apartiĝi de la korpo dum la vivo povas estigi fenomenojn analogajn al tiuj, kiujn produktas la elkarniĝintaj Spiritoj. Dum la korpo dormas, la Spirito, transportiĝante al diversaj lokoj, povas videbliĝi kaj aperi sub vaporeca formo, ĉu en sonĝo, ĉu en maldorma stato. Li ankaŭ povas sin prezenti sub palpebla formo, aŭ almenaŭ sub eksteraĵo tiel identa kun la realo, ke multaj personoj diras la veron, asertante, ke ili vidis lin samtempe en du malsamaj lokoj; li efektive troviĝis en ambaŭ, sed en unu sola estis la vera korpo, dum en la dua troviĝis nur la Spirito. Ĝuste el tiu fenomeno, cetero tre malofta, originis la kredo je la duoblaj homoj, kion oni nomis *dukorpeco*.

Kiel ajn eksterordinara ĝi estas, ĝi ne malpli apartenas, kiel ĉiuj ceteraj, al la ordo de la naturaj fenomenoj, ĉar ĝi sidas sur la proprecoj de la perispirito kaj sur unu natura leĝo.

VI - Pri la mediumoj

33. Mediumoj estas personoj kapablaj por senti la influon de la Spiritoj kaj transsendi ties pensojn.

Ĉiu persono, kiu, en ia ajn grado, sentas la influon de la Spiritoj, estas, pro tio mem, mediumo. Tiu kapablo estas esence propra al la homo, pro kio ĝi neniel konstituas ian ekskluzivan privilegion; el tio sekvas, ke malmultaj estas la homoj, kiuj ne posedas ian rudimenton de tia kapablo. Oni povas do diri, ke ĉiu homo, pli aŭ malpli, estas mediumo. Sed, laŭ la uzo, tiu kvalitigo aplikiĝas nur al tiuj, kies mediuma kapablo manifestiĝas per malkaŝaj kaj iom intensaj efikoj.

34. La perispirita fluido estas la aganto de ĉiuj spiritismaj fenomenoj; ĉi tiuj povas fariĝi nur dank'al reciproka agado de la fluido elsendataj de la mediumo kaj de la Spirito. La disvolviĝo de la mediuma

kapablo dependas de la pli aŭ malpli ekspansia naturo de la perispirito de la mediumo, krom ankaŭ de ties pli aŭ malpli facila asimiliĝo kun tiu de la Spiritoj; ĝi sekve dependas de la organa strukturo kaj povas esti disvolvata kiam ekzistas la principo; ĝi tamen ne povas esti akirita, kiam mankas tiu principo. La mediuma dispozicio ne dependas de sekso, aĝo aŭ temperamento; troveblas mediumoj en ĉiuj klasoj de individuoj, ekde plej frua ĝis plej granda aĝo.

35. La rilatoj inter Spirito kaj mediumo ekestas per iliaj perispiritoj, kaj la facileco de tiuj rilatoj dependas de la grado de afineco inter ambaŭ fluidoj. Unuj facile interasimiliĝas, dum aliaj sin reciproke repuŝas, el kio sekvas, ke ne sufiĉas esti mediumo por egale komunikiĝi kun ĉiuj Spiritoj. Estas mediumoj, kiuj povas komunikiĝi nur kun certaj Spiritoj aŭ kun certaj klasoj de Spiritoj, dum aliaj ĝin povas nur per ia transsendo de penso, sen ia ekstera manifestiĝo.

36. Per interasimiliĝo de la perispiritaj fluidoj, la Spirito identiĝas, por tiel diri, kun la persono, kiun li volas influ; li ne nur transsendas al ĉi tiu sian penson, sed li ankaŭ povas efiki sur lin per ia fizika influo, igi lin malgraŭvole agi aŭ paroli, diri kion li, la Spirito, volas; unuvorte, uzi la mediumajn organojn kvazaŭ siajn proprajn. Li povas fine nuligi la agpovon de la Spirito de la mediumo kaj paralizi ties liberan volon. La bonaj Spiritoj uzas tiun influadon cele al bono, dum la malicaj cele al malbono.

37. La Spiritoj povas manifestiĝi per sennombraj diversaj manieroj, sed nur kondiĉe, ke ili trovu personon kapablan ricevi kaj transsendi impresojn de tia aŭ tia alia speco, laŭ ties kapableco. Nu, ĉar estas neniu, kiu posedus ĉiujn kapablojn en sama grado, el tio sekvas, ke unuj estigas efikojn, kiujn al aliaj ne eblas produkti. Tiu diverseco de kapabloj estigas malsamspecajn mediumojn.

38. Ne ĉiam estas necesa la volo de la mediumo; Spirito, volonta manifestiĝi, serĉas personon kapablan por ricevi lian impreson, kaj tiun li ofte uzas sen ties scio. Aliaj personoj, male, konsciaj pri siaj kapabloj, povas okazigi certajn manifestiĝojn, el kio rezultas du klasoj de mediumoj: *preterkonsciaj mediumoj* kaj *memagantaj mediumoj*.

39. *Memagantaj mediumoj* troveblas nur inter personoj, kiuj, havante pli aŭ malpli kompletan scion pri la rimedoj por komunikiĝo kun la Spiritoj, povas memvole uzi sian kapablon; *preterkonsciaj mediumoj*,

kontraŭe, troveblas ĉe tiuj farantaj al si nenian ideon pri Spiritismo kaj Spiritoj, eĉ ĉe tiuj plej nekredemaj, kiuj senscie kaj malgraŭvole servas kiel instrumentoj. Pro ilia influo povas fariĝi ĉiaspecaj spiritismaj fenomenoj, kiuj ja ekzistis en ĉiuj epokoj kaj ĉe ĉiuj popoloj. Nesciado kaj kredemo atribudis al ili supernaturan povon, kaj, laŭ la tempoj kaj lokoj, oni el ili faris sanktulojn, sorĉistojn, frenezulojn aŭ viziulojn; Spiritismo montras ĉe ili nenion alian, ol simplan, spontanon manifestiĝon de natura kapablo.

40. Inter la diversaj specoj de medioj, jenaj ĉefe distingiĝas: *medioj por fizikaj efikoj; medioj sensivaj aŭ impreseblaj; medioj aŭdivaj, parolvaj, vidivaj, inspirataj, somnambulaj, sanigivaj, skribivaj aŭ psikografaj*, ktp.; ni ĉi tie pritraktos nur la esencajn specojn.¹¹

41. *Medioj por fizikaj efikoj* — Ili estas pli speciale kapablaj por okazigi materiajn fenomenojn, kiel la movadoj de inertaj korpoj, bruoj, delokado, levo kaj transporto de objektoj, ktp. Tiuj fenomenoj povas esti spontanaj aŭ okazigataj; en ĉiuj okazoj, ili postulas la kunhelpon, memvolan aŭ preterkonscian, de medio dotita per specialaj kapabloj, kaj ordinare ili rezultas el la agado de malaltklasaj Spiritoj, ĉar altrangaj Spiritoj okupiĝas nur pri inteligentaj, instruaj komunikadoj.

42. *Medioj sensivaj aŭ impreseblaj* — Tiel estas nomataj tiuj personoj kapablaj eksenti la ĉeeston de la Spiritoj per ia svaga impreso, per ia froteto sur ĉiuj membroj, kion ili ne povas klarigi al si. Tiu kapablo povas akiri tiel subtilecon, ke ĝia posedanto, laŭ la ricevita impreso, ekkonas ne nur la naturon, bonan aŭ malbonan, de la apudstanta Spirito, sed eĉ ties individuecon, kiel blindulo instinkte konstata la alproksimiĝon de tiu aŭ tiu alia persono. Bona Spirito ĉiam faras dolĉan, agrablan impreson; la impreso de malbona Spirito, kontraŭe, estas aflikta, angora kaj malagraba; el ĝi kvazaŭ spiras ia odoro de malpuraĵo.

43. *Medioj aŭdivaj* — Ĉi tiuj aŭdas la voĉon de la Spiritoj; tio estas kelkfoje ia interna voĉo, kiu aŭdiĝas el la profundo de la animo; aliffoje estas voĉo ekstera, klara kaj precize distingebla, kiel de vivanto. La aŭdivaj medioj povas do teni konversacion kun la Spiritoj. Kiam ili kutimas komunikiĝi kun certaj Spiritoj, ili tiujn tuj rekonas per la sono de ties voĉo. Kiam oni mem ne estas aŭdiva medio, oni povas komunikiĝi kun Spirito pere de unu tia medio, kiu transdiras ties parolojn.

¹¹ Por kompletaj klarigoj konsultu la verkon *La Libro de la Medioj*.

44. *Mediumoj parolivaj* — La aŭdivaj mediumoj, kiuj faras nenion alian ol transdiri, kion ili aŭdas, ne estas ĝustadire *parolivaj mediumoj*. Ĉi tiuj lastaj tre ofte aŭdas nenion; ĉe ili la Spirito agas sur la parolorganojn same, kiel li agas sur la manon de la skribivaj mediumoj. Dezirante komunikiĝi, la Spirito uzas tiun organon, kiun li trovas plej fleksebla: de unu li prenas la manon; de alia, la parolorganojn; de tria, la orelon. La paroliva mediumo parolas ordinarne ne konsciante, kion li diras, kaj ofte li diras aferojn starantajn tute ekstere de liaj kutimaj ideoj, de liaj scioj kaj eĉ de la limoj de lia inteligenteco. Oni iafaje vidas personojn malkle-rajn, kun ordinara inteligenteco, sin esprimi, en tiuj momentoj, kun vera elokventeco, kaj pritrakti, kun nekontestebla supereco, demandojn, pri kiuj ili estus nekapablaj formuli ian opinion en ordinara stato.

Kvankam la paroliva mediumo troviĝas en plena vekiteco, li tre malofte konservas la memoron pri tio, kion li diris. Sed ne ĉiam lia pasiveco estas kompleta. Estas iuj, kiuj havas la intuicion pri tio, kion ili diras en la momento mem kiam ili parolas la vortojn.

La parolo estas, ĉe la paroliva mediumo, ia instrumento uzata de la Spirito, kun kiu unu tria persono povas komunikiĝi same, kiel ĉi tiu povas ĝin fari kun la helpo de aŭdiva mediumo. Inter aŭdiva mediumo kaj mediumo paroliva estas ĉi tiu diferenco, ke la unua propravole parolas por ripeti, kion li aŭdas, dum la dua parolas malgraŭ sia volo.

45. *Mediumoj vidivaj* — Tiel estas nomataj tiuj personoj, kiuj en sia normala stato kaj en plena vekiteco ĝuas la kapablon vidi la Spiritojn. La ebleco ĉi tiujn vidi en sonĝo sendube rezultas el ia mediumeco, sed ĝi propre ne karakterizas la vidivan mediumecon. La teorion klarigon pri tiu fenomeno mi elvolvis en la ĉapitro *Vizioj kaj Aferoj*, de *La Libro de la Mediumoj*.¹²

Estas tre oftaj la eventualaj aferoj de personoj, kiujn oni amis aŭ konis; kaj, kvankam tiuj, al kiuj la aferoj fariĝis, povas esti rigardataj kiel vidivaj mediumoj, tamen ĉi tiun kvalitigon oni ĝenerale donas al tiuj, kiuj, en maniero pli aŭ malpli konstanta, ĝuas la kapablon vidi preskaŭ ĉiujn Spiritojn. Inter ili estas tiuj, kiuj vidas nur la elvokitajn Spiritojn, kies priskribon ili povas fari kun detala ekzakteco, plendetale pentrante ties gestojn, mienesprimojn, trajtojn de l' vizaĝo, vestojn kaj eĉ la sentojn, kiujn ili laŭŝajne portas. Ĉe aliaj tiu kapableco estas ankoraŭ pli ampleksa: ili vidas la tutan ĉirkaŭan aron da Spiritoj, irantaj, venantaj kaj, oni povus

¹² Pli ĝuste: Ĉapitro VI, Pri la vidmanifestiĝoj. (*Noto de la Tradukintoj*).

diri, okupitaj pri siaj aferoj. Tiuj medioj neniam restas solaj: ilin ĉiam akompanas ia societo, kiun ili povas elekti laŭ sia prefero, laŭ sia gusto, ĉar ili povas, laŭ sia volo, forpeli tiujn Spiritojn, kies kompano al ili ne konvenas, aŭ altiri tiujn, kiuj kun ili simpatias.

46. *Medioj somnambulaj* — La somnambulismo povas esti rigardata kiel ia variaĵo de la mediumeco, aŭ pli bone dirite, ili estas du specoj de fenomenoj, kiuj ofte troviĝas kunigitaj. La somnambulo agas sub la influo de sia propra Spirito; ĝi estas lia animo, kiu, en la momentoj de sia libereco, vidas, aŭdas kaj perceptas ekster la limoj de liaj sentumoj; kion li esprimas, tion ili ĉerpas el si mem; liaj ideoj ordinare estas pli ĝustaj, ol en lia normala stato, liaj scioj estas pli ampleksaj, ĉar lia animo troviĝas libera; unuvorte, li anticipe vivas la vivon de la Spiritoj. La mediumo, kontraŭe, estas ilo de fremda inteligento; li estas pasiva, kaj kion li diras, tio ne de li venas. Resume, la somnambulo esprimas sian propran penson, kaj la mediumo esprimas penson aliulan. Sed Spirito, kiu komuniĝas per ordinara mediumo, tute same povas tion fari per somnambulo; eĉ ofte la libereco de la animo, dum la somnambulismo, plifaciligas tiun komuniĝon. Multe da somnambuloj vidas la Spiritojn perfekte kaj ilin priskribas tiel precize, kiel la vidivaj medioj; ili povas konversacii kun tiuj estuloj kaj transdiri al ni ties penson; kion ili diras ekster la kadro de siaj personaj scioj, tio ofte estas al ili inspirata de aliaj Spiritoj.

47. *Medioj inspirataj* — Ĉe tiuj medioj malplej montriĝas la eksteraj signoj de la mediumeco; ĉi tie la agado de la Spiritoj estas tute intelekta kaj morala kaj montriĝas tiel en la malplej gravaj cirkonstancoj de la vivo, kiel ĉe la plej grandaj konceptoj. Ĉefe en ĉi tiu rilato oni povas diri, ke ĉiu homo estas mediumo, ĉar estas neniu, kiu ne havus siajn protektantajn kaj familiarajn Spiritojn, kiuj ĉiel klopodas por al siaj protektatoj inspiri edifajn pensojn. Ĉe la inspirato estas ofte malfacile distingi la propran penson disde tiu sugestita; kio ĉi tiun lastan karakterizas, tio estas precipe la spontaneco.

La inspiro pli evidentas en la grandaj verkoj de la inteligento. La ĉiaspekaj geniuloj: artistoj, scienculoj, literatoroj, oratoroj, estas sendube progresintaj Spiritoj kapablaj mem kompreni kaj koncepti grandajn aferojn; nu, ĝuste tial, ke ili estas juĝataj kapablaj, la Spiritoj, kiuj volas la plenumon de certaj laboroj, inspiras al ili la necesajn ideojn; kaj tiel ili plej ofte estas *nekonsciaj medioj*. Ili tamen havas ian svagan intuicion pri ia fremda helpo, ĉar ja, kiu vokas inspiron, tiu faras nenion alian, ol

elvokon; se li ne esperus, ke li estos aŭskultata, kial do li tiel ofte ekkrias: “Mia bona genio, venu helpe al mi!”?

48. *Mediumoj antaŭsentemaj* — Personoj, kiuj, en certaj cirkonstancoj, havas svagan intuicion pri ordinaraj estontaĵoj. Tiu intuicio povas fondi el ia duobla vidado, kiu ebligas duonvidi la sekvojn de la nuntempaj aferoj kaj la interrilaton de la okazaĵoj; sed ĝi ofte rezultas el kaŝitaj komunikaĵoj, kiuj el tiuj personoj faras ian variaĵon de la *inspirataj mediumoj*.

49. *Mediumoj-profetoj* — Ĝi ankaŭ estas ia variaĵo de la mediumoj inspirataj; ili ricevas, kun la permeso de Dio kaj pli precize ol la antaŭsentemaj mediumoj, la revelacion de ĝeneralinteresaj aferoj, kiujn ili estas komisiitaj diskonigi al la homoj cele al ties instruado. La antaŭsento iel estas donita al la plejparto de la homoj por ties persona uzo; la kapablo profeti, kontraŭe, estas escepta kaj implicas la ideon de ia surtera misio.

Ekzistas ja profetoj veraj, sed multe pli da malveraj, kiuj prenas la revojn de sia imagemo kiel revelaciojn, se nur ili ne estas trompisto, kiuj volas esti rigardataj kiel tiaj el ambicio.

La vera profeto estas *virtulo inspirata de Dio*; oni povas ekkoni lin per liaj paroloj kaj agoj. Dio ne uzas buŝon de mensogulo por instrui veron. (*La Libro de la Spiritoj*, n-ro 624)

50. *Mediumoj skribivaj* aŭ *psikografaj* — Tiel estas nomataj tiuj personoj, kiuj skribas sub la influo de la Spiritoj. Kiel Spirito povas agi sur la parolorganojn de paroliva mediumo, por igi lin eldiri vortojn, tiel same li povas uzi lian manon por igi lin skribi. La psikografa mediumeco prezentas tri tre distingigajn variaĵojn: mediumojn *mekanikajn*, *intuiciajn* kaj *duonmekanikajn*.

Ĉe la *mekanika mediumo*, la Spirito rekte agas sur la manon, al kiu li donas impulson. Kio karakterizas tiun specon de mediumeco, tio estas la absoluta senkonscio de la mediumo pri tio, kion li skribas; nedependa de la volo estas la movo de lia mano, kiu moviĝas seninterrompe tiel longe, dum la Spirito havas ion por diri, kaj haltas kiam la Spirito finis.

Ĉe la *intuicia mediumo*, la transsendo de la penso fariĝas per la Spirito de la mediumo. La fremda Spirito, en ĉi tiu okazo, ne agas sur la manon por ĝin direkti; li agas sur la animon, kun kiu li identiĝas kaj al kiu li komunikas sian volon kaj siajn ideojn. La animo ricevas la penson de la fremda Spirito kaj ĝin transskribas. En ĉi tiu situacio la mediumo memvole skribas kaj konscias tion, kion li skribas, kvankam tio ne estas lia propra penso. Estas ofte tre malfacile distingi la propran penson de la

mediumo disde tiu al li sugestita, kio igas *multajn ĉi-specajn mediumojn pridubi sian kapablecon*. Oni povas rekoni la inspiritan penson per tio, ke ĝi neniam estas antaŭkonceptita sed ja naskiĝas sammomente kiel la skribado kaj ofte estas kontraŭa al la antaŭa ideo, kiun oni faris al si; ĝi eĉ povas troviĝi ekster la scioj kaj la kapabloj de la mediumo

Estas granda analogio inter la intuicia mediumeco kaj la inspiro; la diferenco konsistas en tio, ke la unua pli ofte limiĝas al nuntempaj aferoj kaj povas aplikiĝi al tio, kio troviĝas ekster la intelektaj kapabloj de la mediumo; unu mediumo povas intuicie pritrakti aferon tute fremdan por li. La inspiro etendiĝas sur kampo pli vasta kaj ordinare venas helpe al la kapabloj kaj zorgoj de la enkarniĝinta Spirito. La signoj de la mediumeco estas ordinare malpli evidentaj.

La mediumo *duonmekanika* aŭ *duonintuicia* partoprenas la karakterojn de ambaŭ. Ĉe la pure mekanika mediumo, la movo de la mano estas nedependa de la volo; ĉe la intuicia mediumo la movo estas laŭvola kaj nedeviga. La duonmekanika mediumo sentas, ke ia impulsado estas donata, malgraŭ lia volo, al lia mano, sed li samtempe konscias, kion li skribas laŭgrade kiel la vortoj formiĝas. Ĉe la unua, la penso sekvas la skribadon; ĉe la dua, ĝi ĉi tiun antaŭas; ĉe la tria, ĝi ĉi tiun akompanas.

51. Ĉar mediumo estas nura instrumento, kiu ricevas kaj transigas la penson de fremda Spirito kaj kiu obeas la mekanikan impulson al li donata, nenio do por li nefareblas ekster liaj scioj, se nur li estas dotita per la necesaj fleksebleco kaj media kapableco. Tio klarigas la ekziston de mediumoj *desegnistoj*, *pentristoj*, *muzikistoj*, *versistoj*, kvankam fremdaj al la artoj desegna, pentra, muzika kaj poezia; de mediumoj analfabetaj, kiuj skribas nesciante legi nek skribi; de mediumoj *diversskribaj*, kiuj reproduktas diversspecajn skribkarakterojn kaj, kelkfoje kun perfekta ekzaktecio, tiun, kiun la Spirito havis dum sia vivo; de *mediumoj-poliglotoj*, kiuj parolas aŭ skribas en lingvoj al ili ne konataj.

52. *Mediumoj sanigivaj* — Ĉi tiu speco de mediumeco konsistas en la kapableco de certaj personoj resanigi per nura ektuŝo, per surmeto de manoj, per la rigardo, eĉ per gesto, sen la helpo de ia medikamento. Tiu kapableco nekontesteble havas sian principon en la magnetika forto, de kiu ĝi tamen diferencas per la energio kaj la subtileco de la agado, dum la magnetaj resanigoj postulas metodon, pli aŭ malpli longan kuracadon. Ĉiuj magnetizistoj estas pli aŭ malpli kapablaj resanigi, se nur ili scias laŭcele procedi; ili disponas sciencon, kiun ili akiris. Ĉe la sanigivaj

mediumoj, la kapableco estas spontana, kaj kelkaj ĝin posedas, neniam antaŭe aŭdinte pri magnetismo.

La kapableco resanigi per surmeto de manoj evidente havas sian principon en ia escepta emanforto, sed diversaj kaŭzoj ĝin kreskigas, inter kiuj unuavice nepre troviĝas: pureco de sentoj, neprofitamo, bonvolemo, arda deziro malplisuferigi, fervora preĝo kaj fido al Dio; resume, ĉiuj moralaj kvalitoj. La magneta forto estas pure organa kaj povas, kiel la muskola forto, esti donitaĵo komuna al ĉiuj homoj, eĉ al tiu malica. Sed nur la virta homo ĝin uzas ekskluzive por la bono, sen kaŝita penso pri persona intereso nek pri kontentigo de fiero aŭ vaneco; lia pli pura fluido posedas bonfarajn kaj riparajn proprecojn, kiujn ne povas havi la fluido de malvirta aŭ profitama homo.

Kiel dirite, ĉiu mediuma efiko rezultas el kombinado de fluidoj eligitaj de mediumo kaj de Spirito. Pro sia kombiniĝo, tiuj fluidoj akiras novajn proprecojn, kiujn ili ne havus unuope, aŭ almenaŭ ne en sama grado. La preĝo, kiu estas vera elvoko, altiras la bonajn Spiritojn, kiuj volonte pretas por helpi la klopodojn de bonintenca homo; ilia bonfara fluido facile kombiniĝas kun tiu de la bonintenca homo, dum la fluido de malvirtulo kuniĝas kun tiu de la malbonaj Spiritoj, kiuj lin ĉirkaŭas.

La virta homo, kiu ne posedus magnetan forton, nur malmulton povus fari per si mem; nenio al li restus krom voki al si la helpon de la bonaj Spiritoj, sed preskaŭ nula estus lia persona agado; granda fluideca forto, aligita al kiel eble plej granda nombro da moralaj kvalitoj, povas estigi vere miregindajn resanigojn.

53. Cetere, la fluidecan agadon potence helpas la fido de la malsanulo, kaj Dio ofte ĝin rekompencas, konsentante la sukceson.

54. Nur superstiĉo povas alligi ian efikecon al certaj paroloj, kaj nur malkleraj kaj mensogemaj Spiritoj povas nutri tiajn ideojn, preskribante formulojn. Tamen povas okazi, ke, ĉe homoj ne instruitaj kaj nekapablaj kompreni la pure spiritajn aferojn, la uzo de iu preĝo-formulo aŭ de difinita procedo kunhelpas por havigi al ili konfidon; en ĉi tiu okazo, ne la formulo estas efika, sed la fido, kiun pligrandigas la ideo ligita kun la uzo de la formulo.

55. Oni ne intermiksi la *sanigivajn mediumojn* kun la *mediumoj-receptistoj*; ĉi tiuj estas nuraj skribivaj mediumoj, kies specialaĵo estas pli facile servi kiel interpretantoj al la Spiritoj por medicinaj preskriboj; ili sole nur transigas la penson de la Spirito, neniom influante en tio.

VII - Pri obsedo kaj posedo

56. Obsedo estas la potenco, kiun malicaj Spiritoj akiras super iuj personoj, celante ĉi tiujn sklavigi kaj submeti al sia volo, pro la plezuro, kiun ili ĝuas, farante malbonon.

Kiam Spirito, bona aŭ malbona, volas influi sur iun homon, li ĉi tiun envolvas, por tiel diri, en sian perispiriton kvazaŭ en mantelon. Pro la interpenetrado de la fluidoj, la pensoj kaj volo de ambaŭ interkonfuziĝas, kaj la Spirito, povante uzi lian korpon kvazaŭ sian propran, igas lin, laŭ sia volo, agi, paroli, skribi, desegni, kiel faras mediumoj. Se la Spirito estas bona, lia agado estas milda, bonfara, kaj instigas la personon nur al bonaj agoj; se malbona, li puŝas al agoj malbonaj; se perversa kaj malica, la Spirito lin stringas kvazaŭ en ia reto, paralizas al li la volon kaj eĉ la juĝon, kiujn li sufokas per sia fluido, kiel oni sufokas fajron sub tavolo da akvo; igas la personon pensi, paroli, agi anstataŭ li; lin puŝas, kontraŭ lia volo, al ekstravagancaj aŭ ridindaj agoj; resume lin magnetizas, ĵetas en moralan katalepsion, kaj la persono fariĝas blinda instrumento de lia volo. Tia estas la kaŭzo de la obsedo, de la fascino kaj de la subjugigo, kiuj montriĝas en diversaj gradoj de intenseco. La paroksismon de la subjugigo oni vulgare nomas *posedo*. Indas rimarki, ke en tiu stato la persono ofte konscias la ridindecon de sia ago sed estas devigita ĝin fari, kiel se homo pli forta ol li devigus lin kontraŭvole movi siajn brakojn, krurojn kaj langon.

57. Ĉar la Spiritoj ĉiam ekzistis, ankaŭ en ĉiuj tempoj ili ludis saman rolon. Tiu rolo troviĝas en la Naturo, kion pravas la granda nombro da personoj obseditaj aŭ, se oni preferas, poseditaj, antaŭ ol oni parolis pri Spiritoj aŭ, en la nuno, antaŭ ol oni aŭdis paroli pri Spiritismo kaj pri mediumoj. Estas do spontana la agado de la Spiritoj, bonaj aŭ malbonaj; la agado de ĉi-lastaj kaŭzas en la morala, eĉ en la fizika, ekonomio multegon da perturboj, kiujn oni atribuis al eraraj kaŭzoj. La malbonaj Spiritoj estas nevideblaj malamikoj, des pli danĝeraj ju malpli oni suspektas ilian agadon. Spiritismo, ilin malkaŝante, montras novan kaŭzon de certaj malbonaĵoj trafantaj la homaron. Post ekkono de la kaŭzo, oni ne plu kontraŭbatalos la malbonon per rimedoj, kiujn oni jam rekonas senutilaj; oni serĉos aliajn pli efikajn. Nu, kio kondukis al la malkovro de tiu kaŭzo? La mediumeco. Ja dank'al mediumeco tiuj nevideblaj malamikoj elperfidis sian ĉeeston; ĝi faris kun ili tiel same, kiel mikroskopo faris kun la senlime malgrandaj estaĵoj: ĝi tutan mondon malkaŝis. Spiritismo ne

altiris la malbonajn Spiritojn; krom ĉi tiujn senvualigi, ĝi ankaŭ liveris la rimedojn por nuligi al ili la agadon kaj, sekve, ilin forigi. Ne ĝi do alportis la malbonon, ĉar ĉi tiu ekzistas de ĉiuj tempoj: ĝi male alportas forigilon kontraŭ la malbono, elmontrante ties kaŭzon. Kiam oni fine agnoskos la agadon de la nevidebla mondo, tiam oni havos la ŝlosilon de sennombra amaso da nekomprenataj fenomenoj, kaj la Scienco, riĉigita per tiu nova leĝo, vidos novajn horizontojn malfermiĝi antaŭ ĝi. *Kiam la Scienco tien alvenos? Tiam, kiam ĝi ne plu konfesos la materialismon*, ĉar ĉi tiu ja bremsas ĝian flugon, kontraŭmetante al ĝi netranspaseblan baron.

58. Ĉar estas malbonaj Spiritoj, kiuj obsedas, kaj bonaj Spiritoj, kiuj protektas, oni al si demandas, ĉu la malbonaj estas pli povaj ol la bonaj.

Ne la bona Spirito estas pli malforta, sed ja la mediumo ne sufiĉe fortas por deskui de si la mantelon ĵetitan sur lin, por liberiĝi el la brakoj, kiuj lin ĉirkaŭpremas kaj en kiuj, ni devas diri, li kelkfoje plezuris. Estas kompreneble, ke, en ĉi tiu okazo, la bona Spirito ne povus superi, ĉar al li oni preferas la alian. Sed ni nun supozu ĉe la mediumo la deziron malmplikiĝi de tiu fluideca envolaĵo, de kie lia propra estas sorbigita tiel same, kiel vesto penetrita per humideco: ĉi-okaze ne sufiĉos nura deziro; eĉ la volo mem ne ĉiam sufiĉas.

Temas pri lukto kun kontraŭulo; nu, kiam du homoj korpe interbatalas, estas tiu kun pli fortaj muskoloj, kiu renversas la alian. Kun Spirito, ne korpa sed ja spirita devas esti la lukto, kaj ĉiam ankoraŭ venkas tiu pli forta. Ĉi tie la forto sidas en la *aŭtoritato*, kiun oni povas havi super la Spirito, kaj tiu aŭtoritato fontas el la morala supereco. Ĉi tiu similas la sunon, kiu disigas la nebulon per la potenco de siaj radioj. Penadi por boniĝi, por pliboniĝi se oni jam estas bona, por puriĝi je siaj neperfektaĵoj, unuvorte por morale kiel eble pli altiĝi, tia estas la rimedo por ekhavi ordonpovon super la malsuperaj Spiritoj, por ilin forpeli. Alie ili primokos ĉian ordonon. (*La Libro de la Mediumoj*, n-roj 252 kaj 279)

Sed, oni demandas, kial la protektantaj Spiritoj ne devigas ilin foriĝi? Ili sendube povas kaj kelkfoje ja ĝin faras. Sed permesante la lukton ili ankaŭ certigas meriton al la venko. Se ili lasas barakti personojn meritajn en certaj rilatoj, tio estas por elprovi ties persistemon kaj al ili akirigi *pli da forto* sur la kampo de bono; estas por ĉi tiuj iaspeca *morala gimnastiko*.

Certaj personoj sendube preferus alian, pli facilan recepton por forpeli malbonajn Spiritojn: ekzemple kelke da vortoj aŭ signoj, kio al ili pli facilus ol korekti siajn malvirtojn. Ni bedaŭras, sed ni konas nenion

alian rimedon efikan *por venki malamikon, ol fariĝi pli forta ol li*. Kiam oni malsanas, oni devas rezignacie preni medikamenton, kiel ajn amara ĝi estus; sed ankaŭ, kiam oni havis la kuraĝon ĝin trinki, kiel bone kaj kiel forta oni sentas sin! Oni devas do konvinkiĝi, ke, por atingi tiun celon, ekzistas nek ritaj paroloj, nek formuloj, nek talismanoj, nek iaj ajn materialaj signoj. La malbonaj Spiritoj ĉiujn priridas kaj ofte plezuras, ilin rekomendante kaj ĉiam zorgante ilin prezenti kiel nepre efikajn, por tiel pli facile kapti la konfidon de tiuj, kiujn ili volas trompi kaj kiuj, fidante la efikecon de la procedo, sentime lasas sin kapti.

Antaŭ ol esperi la bridadon de malbona Spirito, necesas, ke oni bridu sin mem. El ĉiuj rimedoj akiri forton por tion atingi, la plej efika estas la volo helpata de la preĝo, sed oni bone komprenu, preĝo el la koro, ne preĝo el paroloj, en kiuj pli partoprenas la buŝo ol la penso. Necesas preĝi al sia gardanĝelo kaj al la bonaj Spiritoj, ke ili nin protektu en la lukto; sed ne sufiĉas peti ilin pri forpelo de la malbonaj Spiritoj; estas necese memori ĉi tiun maksimumon: *helpu vin mem, kaj la ĉielo vin helpos*, krom ankaŭ petegi ilin pri la forto, kiu al ni mankas, por venki niajn malbonajn inklinojn, al ni pli malutilajn ol la malbonaj Spiritoj, ĉar ja estas tiaj inklinoj, kiuj ilin altiras tiel same, kiel putraĵo altiras rabobirdojn. Preĝi ankaŭ por la obsedanta Spirito estas al li reciproki malbonon per bono, kaj montriĝi pli bona ol li jam atestas superecon. Per persistado, oni atingas, ke li revenu al pli bonaj sentoj, kaj el persekutanto oni faras dankan estulon.

Resume, la fervora preĝo kaj la seriozaj klopodoj por pliboniĝi estas la solaj rimedoj por forigi la malbonajn Spiritojn, kiuj rigardas mastroj tiujn, kiuj faras la bonon, dum ilin ridigas la formuloj kaj ilin ekscitas kolero kaj malpacienco. Necesas ja ilin lacigi, montrante sin pli pacienca ol ili.

Sed kelkfoje okazas, ke la subjugo kreskas ĝis tia grado, ke ĝi paralizas la volon de la obsedato, kaj oni ne povas de li atendi ian seriozan kunhelpon. Precipe tiam la interhelpo de triuloj fariĝas necesa, ĉu per preĝo, ĉu per magnetita agado. Sed la forto de tiu interhelpo ankaŭ dependas de la morala aŭtoritato, kiun tiuj personoj povus havi super la Spiritoj, ĉar, se ili ne pli valoras ol la Spiritoj, ilia agado restas senutila. La magnetita agado, en ĉi tiu okazo, havas kiel efikon penetrigi la fluidon de la obsedato per iu pli bona fluido kaj elimini la fluidon de la malbona Spirito. Per sia agado, la magnetizisto devas havi la duoblan celon, oponi unu moralan forton al alia morala forto kaj estigi ĉe la obsedato, por uzi materialan komparon, iaspecan kemian reakcion, forigante unu fluidon

helpo de alia fluido. Tiamaniere li ne nur estigas bonefikan liberiĝon sed ankaŭ liveras forton al organoj febliĝintaj pro longa kaj ofte potenca ĉirkaŭpremo. Oni cetere komprenas, ke la povo de la fluideca agado estas rekte proporcia ne nur al la energio de la volo sed precipe al la kvalito de la penetrigita fluido, kaj ke, laŭ tio, kion ni diris, tiu kvalito dependas de la instruiteco kaj de la moralaj ecoj de la magnetizisto. El tio sekvas, ke ordinara magnetizisto, kiu maŝine agas por nur kaj simple magnetizi, malmulte aŭ efektive neniom produktus. Nepre necesas unu *spiritista* magnetizisto, kiu plenkonscie agu kun la intenco estigi ne somnambulan staton aŭ ian organan resaniĝon sed ja la rezultatojn, kiujn ni ĉi-supre priskribis. Evidentas, krom tio, ke tiucela magneta agado ne povas ne esti utila en la okazoj de ordinara obsedo, ĉar tiam, se la magnetizisto estas helpata de la volo de la obsedato, la Spiriton do kontraŭbatalas ne unu, sed du adversuloj.

Necesas ankaŭ diri, ke oni ofte kulpigas la Spiritojn pri malicaĵoj, kiujn ili tute ne respondecas. Certaj malsanaj statoj kaj aberacioj, kiujn oni atribuas al ia nevidebla kaŭzo, kelkfoje simple devenas de la Spirito de la persono mem. La ĉagrenoj, kiujn oni ordinare koncentras sur sin mem, ĉefe la amaj elreviĝoj, donas kaŭzon al multe da ekscentraj agoj malprave atribuataj al obsedo. La homo ofte estas sia propra obsedanto.

Ni fine aldonu, ke certaj obstinaj obsedoj, precipe ĉe iuj meritaj personoj, kelkfoje estas parto de la elprovoj, al kiuj ili estas elmetitaj. “Eĉ okazas, iaforte, ke la obsedo estas ia tasko trudita al la obsedato, nome ke li devas labori por la revirtiĝo de la obsedanto, kiel patro por la korektado de malvirta filo.”

(Pliaj detaloj troveblaj en *La Libro de la Mediumoj*.)

La preĝo ĝenerale estas potenca helprimedo por liberigo de la obsedatoj, sed en tia okazo povas efiki ne preĝo nur buŝe parolata, eldirata kun indiferento, kvazaŭ ia banala formulo; necesas ardanta preĝo, kiu samtempe estu iaspeca mensa magnetizado. Per la penso, oni povas direkti sur la pacienton ian sanigan, fluidecan fluon, kies forto estas proporcia al la intenco. La preĝo do havas kiel efikon ne nur alvoki fremdan helpon, sed ankaŭ estigi fluidecan agadon. Kion ne povas fari unu sola persono, tion ofte povas pluraj personoj kun komuna intenco per kolektiva kaj konstanta preĝado, ĉar la nombro kreskigas la potencon de la agado.

59. La senefikeco de ekzorco, en la okazoj de obsedo, konstatablas per la sperto, kaj estas pruvite, ke, anstataŭ malpliigi, ĝi preskaŭ ĉiam

pligrandigas la malbonon. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la tuta influado venas de la morala aŭtoritato super la malbonaj Spiritoj, ne de ia ekstera ago, de la efiko de paroloj kaj signoj. Ekzorco konsistas en ceremonioj kaj formuloj ja priridataj de la malbonaj Spiritoj, kiuj tamen cedas al la morala supereco, kiu al ili sin trudas. Ili vidas tiujn, kiuj per senpovaj rimedoj volas ilin potenci, kiuj kredas ilin timigi per vana pompo, kaj ĉi-okaze ili penas montriĝi kiel la plej fortaj, tiucele pliintensigante siajn klopodojn. Ili similas al ektimema ĉevalo, kiu terenĵetas mallertan rajdanton sed kiu obeas sian mastron. Nu, ĉi tie la vera mastro estas la homo kun pli pura koro, ĉar ja ĉi tiun la bonaj Spiritoj elaŭdas.

60. Kion Spirito povas fari kun unu homo, tion povas fari pluraj Spiritoj samtempe kun pluraj homoj kaj doni al la obsedo epidemian karakteron. Nubo da malbonaj Spiritoj povas invadi iun lokon kaj tie diversmaniere manifestiĝi. Estis ja unu tiaspeca epidemio, kiu disvastiĝis tra Judujo en la tempo de la Kristo. Nu, la Kristo, pro sia nemezurebla morala supereco, havis tielan aŭtoritaton super la demonoj aŭ malbonaj Spiritoj, ke sufiĉis al li ordoni, ke ili foriru, por ke ili tiel agu, kaj li por tiu celo uzis nek signojn, nek formulojn.

61. Spiritismo baziĝas sur la observado de faktoj rezultantaj el la rilatoj inter la mondoj videbla kaj nevidebla. Estante en la Naturo, tiuj faktoj fariĝis en ĉiuj epokoj kaj abundas precipe en la sanktaj libroj de ĉiuj religioj, ĉar ili servis kiel bazo por la pliparto de la kredoj. Estas ĝuste pro ilia miskompreno, ke la Biblio kaj la Evangelioj prezentas tiom da obskuraj lokoj, kiujn oni interpretis en malsamaj sencoj. Spiritismo portas la ŝlosilon, kiu faciligos ilian komprenon.



Pri la Duoblaj Homoj. Pri la Aperoĵoj de Vivantoj

Estas nuntempe konstatite kaj perfekte pruvite, ke la Spirito, disiĝinte de viva korpo, povas per sia fluideca perispirita envolaĵo aperi en alia loko, ol kie troviĝas la materia korpo. Sed ĝis nun la teorio, akorde kun la sperto, ŝajnas demonstri, ke tiu disiĝo povas fariĝi nur dum la dormo, aŭ almenaŭ dum la neaktiveco de la korpaj sensoj. La sekvantaj faktoj, se nur veraj, pruvas, ke ĝi ankaŭ povas fariĝi dum la maldormo. Mi ilin ekstraktis el la germana verko: *La Mistikaj Fenomenoj de la Homa Vivo*, de Maksimiliano Perty, profesoro en la Berna Universitato, publikigita en 1861. (Lepcigo kaj Heidelberg.)

1. - “Bienmastro estis vidita de sia koĉero en la stalo, kun rigardo turnita sur siaj brutoj, en la momento kiam li komuniĝis en la preĝejo. Tion li poste rakontis al sia pastro, kiu lin demandis, pri kio li pensis dum la komunio. – Se diri la veron, li respondis, mi pensis pri miaj brutoj. – Jen klarigas via apero, rediris la ekleziulo.”

Pravis la pastro, ĉar, pro tio ke la penso estas atributo de la Spirito, ĉi tiu nepre sin trovas tie, kien la penso portiĝas. La demando estas, ĉu en maldorma stato la liberiĝo de la perispirito povas esti sufiĉe granda por estigi ian aperon, kio implicus iaspecan duiĝon de la Spirito, kies unu parto animus la fluidecan korpon kaj la dua la korpon materian. Neebla ĝi tute ne estus, se oni konsideras, ke, kiam la penso koncentriĝas sur iu malproksima punkto, la korpo nur maŝine agas, pro ia speco de mekanika impulsado, kio okazas ĉefe al distriĝemaj homoj; tiam la korpon animas nur la materia vivo, dum la vivo spirita akompanas la Spiriton. Estas do probable, ke la koncernato tiam spertis pli fortan distriĝon kaj ke liaj bestoj lin pli zorgigis ol la komunio.

La sekvanta fakto apartenas al tiu kategorio, sed prezentas pli rimarkindan apartaĵon.

2. - “La kantonjuĝisto, J..., en Fr., unu tagon sendis sian komizon al najbara vilaĝo. Post ioma tempo li vidis lin reeniri, preni libron en la ŝranko kaj ĝin foliumi. La juĝisto lin abrupte demandas, kial li ankoraŭ ne foriris. Ĉe tiuj vortoj la komizo malaperis; la libro falas sur la plankon kaj la juĝisto ĝin metas sur iun tablon, malfermita kiel ĝi falis. Vespere, ĉe la reveno de la komizo, la juĝisto lin demandis, ĉu io al li okazis dumvoje, ĉu li estis reveninta en la ĉambron, en kiu li nun troviĝas. – Ne, respondis la komizo; mi vojaĝis kun unu amiko; trairate la arbaron, ni ekdiskutis pri iu trovita planto, kaj mi diris, ke, se mi estus dome, al mi estus facile montri al li la paĝon de *Lineo*, kiu min pravigus.

Ĝuste tiu libro restis malfermita ĉe la menciita paĝo.

Kiel ajn eksterordinara montriĝas la fakto, oni ne povas ĝin rigardi materie neebla, ĉar ni ankoraŭ restas malproksime de tio, ke ni konus ĉiujn fenomenojn de la spirita vivo; necesas tamen ĝia konfirmo. Ĉe unu tia okazo, necesus konstati en pozitiva maniero la staton de la korpo en la momento de la apero. Ĝis oni pruvos la malon, mi dubas, ĉu la fakto eblas dum la korpo restas intelekto aktiva.

La sekvantaj faktoj estas ankoraŭ pli eksterordinaraj, kaj mi malkaŝe konfesas, ke ili al mi inspiras ion pli ol nurajn dubojn. Oni facile komprenas, ke la apero de vivanto estas vidata de alia persono, sed ne ke li povas vidi sian propran aperon, precipe en la malsupre rakontitaj cirkonstancoj.

3. - “La gubernia sekretario, Triptis, en Weimar, irante al la kancelario serĉe de paketo da tre bezonataj dokumentoj, vidis sin mem jam sidanta sur lia kutima seĝo kaj havanta antaŭ li la dokumentojn. Li ektimas, revenas hejmen kaj sendas sian servistinon preni la dokumentojn, kiujn ŝi trovos en la kutima loko. Ŝi iras kaj ankaŭ vidas sian mastron sidanta sur lia seĝo.”

4. - “Becker, instruisto pri matematiko en Rostok, estis ĉetable kun amikoj en sia domo, kaj inter ili ekestas teologia diskutado. Becker iras al sia biblioteko serĉe de unu verko, kiu decidus la demandon, kaj vidas sin mem sidanta sur kutima loko. Rigardante super la ŝultro de sia alia memo, li rimarkas, ke ĉi tiu montras al li jenan lokon de malfermita Biblio: “Ordigu vian domon, ĉar vi nepre mortos.” Li revenas apud siajn amikojn, kiuj vane klopodas konvinki lin, kiel freneze estus alligi eĉ plej malgrandan gravecon al tiu vizio. – *Li mortis en la morgaŭa tago.*”

5. - “Hoppack, aŭtoro de la verko: *Materialoj por Studado de la Psikologio*, diras, ke Pastro Steinmetz, kun vizitantoj ĉe si kaj estante en sia ĉambro, vidis sin mem en la ĝardeno ĉe sia preferata loko. Montrante unue al si mem per la fingro kaj poste al sia similulo, li diras: “Ĉi tie troviĝas Steinmetz, la mortema; tie staras la senmorta.”

6. - “F..., el la urbo Z..., kiu poste fariĝis juĝisto, trovante sin dum la junaĝo en la kamparo, estis petita de junulino el la domo serĉi sunombrelon, kiun ŝi forgesis en sia ĉambro. Li iris kaj vidis la fraŭlinon sidanta ĉe la labortablo, sed pli pala ol kiam li ŝin forlasis; ĉi-momente ŝi rigardis antaŭen. Malgraŭ sia timo, F... prenis la sunombrelon, kiu troviĝis apud ŝi, kaj ĝin portis. Vidante lian konsternitan vizaĝon, ŝi diras al li: — Konfesu, ke vi ion vidis; ke vi min vidis tie. Sed ne maltrankviliĝu, mi ne estas mortonta. Mi estas duoblulo (germane: *Doppelgaenger*, kio laŭlitere signifas: iu irante duoble); per la penso mi troviĝis apud mia laboro kaj jam multfoje vidis mian refiguraĵon apud mi. Ni nenion faras, unu al la dua.”

7. - “Grafo D... kaj la gardostarantoj asertis, ke unu nokton ili vidis la imperiestrinon Elizabeto el Rusio sidanta sur la trono en la tronsalono kaj portanta pompan kostumon, dum ŝi dormis kuŝanta en sia lito. La deĵoranta honordamo, konvinkita pri tio, iris por veki ŝin. La imperiestrino ankaŭ aliris la tronsalonon kaj tie vidis sian bildon. Al unu gardostaranto ŝi ordonis pafi; ĉi-momente la bildo malaperis. La imperiestrino mortis post tri monatoj.”

8. - “Iu lernanto, nomata Elger, fariĝis tre melankolia, post kiam li multfoje sin vidis en la ruĝa kostumo, kiun li ordinare portadis. Li neniam vidis sian vizaĝon sed nur la konturojn de ia vaporeca, al li simila, figuro, ĉiam ĉe la vesperkrepusko aŭ ĉe la lunlumo. La bildon li vidis ĉe la loko, en kiu li estis longtempe studanta.”

9. - “Iu franca, unuagrada instruistino, Émilie Sagée, deknaŭfoje perdis sian oficon, ĉar ŝi ĉie aperadis *duoble*. La junulinoj de iu internulejo en Neuwelkw, Livonio, kelkfoje ŝin vidis en la ĉambro aŭ en la ĝardeno, dum ŝi efektive troviĝis aliloke. Aliajn fojojn, dum la leciono, ili vidis antaŭ la nigra tabulo du fraŭlinojn Sagée, unu apud la alia, ekzakte egalaj kaj farantaj la samajn movojn, kun la sola diferenco, ke nur la vera Sagée tenis en la mano pecon da kreto, per kiu ŝi skribis sur la tabulo.”

La verko de M. Perty enhavas grandan nombron da tiaspecaj faktoj. Rimarkindas, ke en ĉiuj cititaj okazoj la inteligenta principo egale

aktivas ĉe la du individuoj, eĉ ankoraŭ pli ĉe la materia estaĵo, dum ja la malo devus okazi. Sed kio al ni ŝajnas tute neebbla, tio estas la ekzisto inter ambaŭ de ia antagonismo, ia malsameco de ideoj, pensoj kaj sentoj.

Tiu malsameco ĉefe evidentas en la okazo n-ro 4, en kiu unu avertas la alian pri ties morto, kaj en la n-ro 7, en kiu la imperiestrino ordonas pafi kontraŭ sian alian memon.

Se oni akceptas la dividiĝon de la perispirito kaj ian fluidecan forton sufiĉan por teni la normalan aktivecon de la korpo; se oni supozas ankaŭ la dividiĝon de la inteligenta principo, aŭ ian radiadon kapablan por animi la du estaĵojn kaj al tiu havigi iaspecan ĉieestecon, do tiu principo, kiu estas unueca, devas konserviĝi identa; ne povus do troviĝi unuflanke iu volo, kiu ne ekzistus aliflanke, krom se oni akceptus la ekziston de ĝemelaj Spiritoj tiel same, kiel ekzistas ĝemelaj korpoj, tio estas, ke du Spiritoj identas kaj tiel enkarniĝas en unu sama korpo, kio apenaŭ supozeblas.

Se en tiuj fantastaj historioj estas io konservinda, estas tamen multo forĵetinda, krom ankaŭ la parto apartenanta al la legendo. Spiritismo, kiu tute ne kondukas nin al ilia blinda akcepto, ja male helpas nin apartigi la veran de la falsa, la eblan de la neebbla, per la leĝoj, kiujn ĝi rivelas, koncernantaj la konsiston kaj la rolon de la spirita elemento. Sed ni ne hastu apriorie forĵeti ĉion, kion ni ne komprenas, ĉar tre malproksime ni estas de la konado de tiuj leĝoj, krom ankaŭ ĉar la Naturo ankoraŭ ne malkaŝis al ni ĉiujn siajn sekretojn. La nevidebla mondo restas ankoraŭ nova kampo por observado, kaj estus vante pretendi, ke oni sondis ĉiujn ties profundaĵojn, dum novaj mirindaĵoj senĉese malkaŝiĝas antaŭ niaj okuloj. Sed estas faktoj, kies materian neeblecon la logiko kaj la konataj leĝoj demonstras. Tia estas, ekzemple, kion raportas la Revuo Spirita de februaro 1859, sur paĝo 41, sub la titolo: "Mia amiko Hermann". Tio estis juna, grandmonda germano, afabla, bonvolema, kun plej nobla karaktero, kiu ĉiuvespere, ĉe la sunsubiro, falis en staton de ŝajna morto; dum tiu tempo lia Spirito vekiĝis en la antipodo, Aŭstralio, en la korpo de iu bandito, kiu tiuokaze ĉiam mortis pendumita.

La nura komuna saĝo montras, ke, eĉ se eblus tiu korpa duobleco, la sama Spirito ne povus alterne esti honesta homo en unu korpo dumtage, kaj bandito en alia korpo dumnokte. Aserti, ke Spiritismo kredas tiajn historiojn, estas pruvo, ke oni ne konas ĝin, ĉar ĝi ja liveras la rimedojn por evidentigi ilian absurdecon. Sed samtempe kiel ĝi elmontras, ke iu kredo eraras, ĝi pravas, ke ĉi tiu ofte sidas sur vera principo, mis prezentita aŭ troigita de superstiĉo. Necesas eltiri la frukton el la ŝelo ĝin ĉirkaŭkovranta.

Kiom da ridindaj rakontoj oni ja verkis pri la fulmo, antaŭ ol oni konis la leĝon pri la elektro! Same okazis ĉe tio koncernanta la rilatojn kun la nevidebla mondo; koniginte la leĝon regantan tiujn rilatojn, Spiritismo ilin reduktas al realaĵo. Sed ties realeco ankoraŭ troas por tiuj, kiuj kredas nek animojn, nek ian nevideblan mondon. En iliaj okuloj, ĉio ekster la limoj de la mondo videbla kaj palpebla apartenas al superstiĉo. Jen la motivo, kial ili diskreditigas Spiritismon.

NOTO. – La tre interesan demandon pri la *duoblaj homoj*, krom ankaŭ tiu pri la *ageneruloj*, kiu estas forte ligita al la unua, la spiritisma scienco ĝis nun restigis sur dua plano, manke de dokumentoj sufiĉaj por ilia kompleta klarigo. Tiuj manifestiĝoj, kiel ajn strangaj kaj unuavide nekredeblaj, kiujn sankciis la rakontoj de plej seriozaj historiistoj de la antikveco kaj de la Mezepoko, kaj kiujn konfirmis freŝdataj eventoj antaŭaj al aŭ samtempaj kiel la apero de Spiritismo, tute ne povas esti pridubataj. *La Libro de la Mediumoj*, en la ĉapitro titolita: *Spiritaj vizitoj inter vivantoj*, kaj la *Spirita Revuo*, en multnombraj lokoj, konfirmas, en maniero plej nekontestebla, la realecon de tiuj manifestiĝoj. El komparo kaj funda ekzameno de ĉiuj tiaj faktoj eble rezultus solvo, almenaŭ parta, de la demando, krom ankaŭ la elimino de kelkaj el la malfacilaĵoj, kiuj ŝajne envolvus tiun solvon.

Ni estus tre dankaj al tiuj, el niaj korespondantoj, kiuj el tiu demando volontus fari objekton de speciala studo, ĉu persone, ĉu helpe de la Spiritoj, kaj kiuj al ni komunikus la rezultaton de siaj esploroj, en la intereso, memkompreneble, de la disvastigo de la vero.

El rapida trarigardo al la antaŭaj jarkolektoj de la *Revuo*, kaj el konsiderado de la prezentitaj faktoj kaj proponitaj teorioj por ties klarigo, ni venas al la konkludo, ke eble konvenus dividi la fenomenojn en du tre distingigajn kategoriojn, kio permesus doni pri ili diferencajn klarigojn kaj pruvi, ke la neeblecoj, leviĝantaj kontraŭ ilia pura kaj simpla akcepto estas pli ŝajnaj ol realaj. (Ĉi-koncerne vidu la artikolojn en la *Spiritisma Revuo* de januaro 1859, *La Folulo el Bayonne*; februaro 1859, *La ageneruloj* kaj *Mia amiko Hermann*; majo 1859, *La ligilo inter la Spirito kaj la korpo*; novembro 1859, *La vaganta animo*; januaro 1860, *La Spirito en unu flanko, la korpo en la alia*; marto 1860, *Studo pri la Spirito de la vivantoj*; Doktoro V... kaj F-ino S...; aprilo 1860, *La fabrikanto el Sankta Petersburgo*; *Palpeblaj aperaĵoj*; novembro 1860, *Historio de Maria d'Agréda*; julio 1861, *Providenca apero*, ktp, ktp.)

La ekspansiivon de la perispiritaj fluoj hodiaŭ pli ol sufiĉe pruvis plej doloraj operacioj faritaj al malsanuloj, kiujn oni dormigis ĉu per kloroformo kaj etero, ĉu per la animala magnetismo. Efektive, oni ne malofte

Unua parto

vidas ĉi tiujn konversacii kun la asistantoj pri gajaj, agrablaj aferoj, aŭ malproksimen transportiĝi en Spirito, dum la korpo tordiĝas kun ĉiuj ŝajnoj de teruraj turmentoj. La homa maŝino, tute aŭ parte senmovigita, disŝiriĝas sub la brutala skalpelo de la kirurgo, la muskoloj agitiĝas, la nervoj krispiĝas kaj transigas la sensacon al la *cerbospina* aparato; sed la animo, kiu, en sia normala stato, sola perceptas la doloron kaj ĉi tiun ekstere manifestas, la animo, momente apartigita disde la korpo suferanta la operacion, okupita de aliaj pensoj kaj agoj, nur obtuze estas avertata pri tio, kio okazas al ĝia mortema envolvaĵo, ĉar ĝi restas plene nesentiva. Kiomfoje oni jam vidis, ke soldatoj grave vunditaj, tute absorbitaj de la batala ardo, plene perdantaj sangon kaj fortojn, ankoraŭ longe luktadas, ne konsciante siajn vundojn? Homo, intense absorbita, ricevas fortegan baton ĝin tute ne sentante, kaj nur post kiam ĉesas la distriĝo de lia menso, li rekonas, ke lin trafis la doloran sensacon, kiu lin suferigas. Al kiu ne jam okazis, dum forta spirita streĉiteco, trapasi tumultantan, ululantan homamason, nenion vidante nek aŭdante, malgraŭ ke la oftalma nervo kaj la aŭda aparato perceptis la sensacojn kaj ilin fidele transigas al la animo?

Laŭ la ĵus prezentitaj okazoj kaj amaso da faktoj, pri kiuj estus tro longe ĉi tie raporti sed kiujn ĉiu povas mem koni kaj taksi, la korpo sen ia dubo povas plenumi, de unu flanko, siajn organajn funkciojn, dum la Spiriton malproksimen portas alispecaj zorgoj. Estante senlime ekspansiiva kaj tenante ĉe la korpo la elastecon kaj aktivecon necesajn al ties vivo, la perispirito konstante akompanas la Spiriton dum ties longdaŭra vojaĝo en la ideala mondo.

Se ni krome memoras ĝian tre bone konatan proprecon densiĝi, kiu al ĝi permesas videbliĝi, sub la korpa eksteraĵo, al la vidivaj medioj kaj, pli malofte, al kiu ajn ĉeestanta en la loko kien la Spirito transportiĝis, ni ne povos plu pridubi la eblecon de la fenomenoj de ĉieestado.

Estas al ni do pruvite, ke vivanta persono povas simultane aperi en du lokoj inter si malproksimaj; en unu kun sia reala korpo; en la alia kun sia perispirito momente densiĝinta sub la aspekto de liaj materiaj formoj. Sed en tio konsentante, kiel ĉiam, kun Allan Kardec, ni povos akcepti la ĉieestadon en tiu okazo, kiam ni rekonos perfektan similecon ĉe la agmanieroj de la ŝajna estulo. Tiaj estas, ekzemple, la okazoj antaŭe cititaj sub n-roj 1 kaj 2. Koncerne al la sekvantaj, por ni neklarigeblaj se oni aplikas al ili la teorion de la ĉieesteco, tiuj al ni ŝajnas, se ne nekontesteblaj, almenaŭ akcepteblaj, se nur oni ilin pritaksas el alia vidpunkto.

Neniu el niaj legantoj ne scias pri la kapableco de la elkarniĝintaj Spiritoj aperi, sub materia aspekto, en certaj cirkonstancoj kaj aparte al la vidivaj

Pri la Duoblaj Homoj. Pri la Aperoj de Vivantoj

medioj. Sed ĉe kelka nombro da okazoj, kiaj la aperoj videblaj kaj palpeblaj por multenombraj aŭ por kelkaj personoj, evidentas, ke la percepton de la apero kaŭzas ne la mediana kapablo de la ĉeestantoj sed la realeco de la korpa aspekto de la Spirito, kaj, tiel en tiu cirkonstanco kiel ankaŭ en la okazoj de ĉeestado, tiu korpa aspekto estas ŝuldata al la denseco de la perispirita aparato. Nu, se la Spiritoj plej ofte, celante rekonebliĝi, prezentiĝas tiaj, kiel ili aspektis dumvive, kun siaj plej kutimaj vestoj, ne maleble estos al ili prezentiĝi, ĉu malsame vestitaj, ĉu sub ajna aspekto, kiel ekzemple la *Folulo el Bayonne*, kiu aperis jen sub sia persona aspekto, jen sub la aspekto de unu el siaj fratoj, mortinta kiel li, jen sub la aspekto de vivantaj, eĉ ĉeestantaj, personoj. La Spirito havis la bezonon rekonebliĝi, malgraŭ la diversaj formoj sub kiuj li prezentiĝis. Sed nenion li povintus fari, se ne evidentus, ke la ĉeestantoj al la manifestiĝo estis konvinkitaj, ke ili vidas fenomenon de ĉeestado.

Se, rigardante precedenco tiun fakton, kiu tute ne estas unika, ni provas sammaniere klarigi la okazojn sub n-roj 3, 4, 5, 6, 8 kaj 9, tiam povos esti al ni eble akcepti ilian realecon, dum, se oni akceptas la ĉeestadon, tiam la nekonformeco de la pensoj, la antagonismo de sentoj kaj la aktiveco de la organismo de ambaŭ partoj ne permesas al ni rigardi ilin kiel eblajn.

Ĉe la okazo n-ro 4, se, anstataŭ supozi profesoron Becker en la ĉeesto de lia sozio, ni akceptos, ke li ekrilatis kun Spirito, kiu aperis sub lia aspekto, tiam malaperas ĉia antagonismo kaj la fenomeno eniras la kampon de ebleco. Same okazas ĉe la okazo n-ro 7. Nekompreneblas, ke Elizabeto el Rusujo ordonis pafi kontraŭ sian propran bildon, sed plene akcepteblas, ke ŝi ordonis pafi kontraŭ Spiriton prenintan ŝian aspekton por ŝin mistifiki. Kelkaj Spiritoj iafaje prenas malpropran nomon kaj sin ornamas per la stilo kaj esprimmanieroj de aliulo por akiri la konfidon de la medioj kaj la alireblon al la grupoj. Kiel tio neeblas, ke al orgojla Spirito plaĉis preni la aspekton de la imperiestrino Elizabeto kaj sidi sur ŝian tronon por vana kontentigo de siaj ambiciaj revoj? Tiel same direblas pri la aliaj okazoj.

Ĉi tiun klarigon ni donas nur pro ties valoro, kaj en niaj okuloj ĝi estas nenio pli ol sufiĉe akceptebla supozo, ne reala solvo de la problemo. Sed kiel tia, ĝi al ni ŝajnis taŭga por klarigi la demandon, sur ĉi tiun altirante la lumojn de la diskutado kaj refutado. Kiel tian ni ĝin submetas al niaj legantoj. Povu la pripensoj kaj meditoj, kiujn ĝi elvokos, kunhelpi por la solvo de problemo, kiun ni nur elmovis, lasante, ke aliaj pli indaj fordisigu la mallumon, kiu ankoraŭ ĝin envolvas.

(*Noto de la Redakcio*¹³)

¹³ Redakcio de la franca eldonejo. (*Noto de la Brazilia Spiritisma Federacio en sia 13-a portugallingva eldono*)



Diskutado pri la Ideo de Ekzisto de Interaj Estuloj Inter la Homo kaj Dio

N., la 4^{an} de Februaro 1867.

Kara Majstro,

De kelka tempo mi donas pri mi nenian signon de vivo. Estante ĉiam tre okupita dum mia restado en Liono, mi ne povis sciigi, tiel perfekte kiel mi volis, pri la nuna stato de la doktrino en tiu granda centro. Nur unu spiritisman seancon mi ĉeestis, sed mi povis konstati, ke en tiuj medioj la unuatempa fido ĉiam ankoraŭ restas tia, kia ĝi devas esti en la vere sinceraj koroj.

En diversaj aliaj centroj de la Sudo, mi aŭdis diskutadon pri tiu opinio, eldirata de iuj magnetizistoj, nome ke multaj fenomenoj, *nomataj spiritismaj*, estas simplaj efikoj de somnambulismo, kaj ke Spiritismo nur substituis sin al magnetismo, aŭ, prefere, ridinde anstataŭis ties nomon. Temas, kiel vi vidas, pri nova atako kontraŭ la mediumeco. Tiel, laŭ tiuj personoj, ĉio, kion skribas la medioj, rezultas el la kapabloj de la enkarniginta animo; estas ja ĝi, kiu, momente liberiginte, povas legi la penson de la ĉeestantoj; kiu vidas de malproksime kaj antaŭvidas la okazaĵojn; kiu, pere de ia magneta-spirita fluido, skuas, levas, renversas tablojn, perceptas sonojn, ktp. Resume, ĉio sidus sur la anima esenco, sen la interveno de pure spiritaj estuloj.

Unua parto

Kion vi al ni sciigas — vi diros — tio prezentas nenion novan. Mi mem, efektive, de kelke da jaroj aŭdis iujn magnetizistojn subteni tian tezon. Sed nun oni provas enplanti tiujn ideojn, kiuj miaopinie kontraŭdiras la veron. Estas ĉiam erare fali en ekstremojn, kaj tiom troige estas ĉion rilatigi al somnambulismo, kiom, flanke de la spiritistoj, nei la leĝojn de l' magnetismo. De la materio oni ne povus forpreni la magnetajn leĝojn tiel same, kiel oni ne povus forpreni de la Spirito la pure spiritajn leĝojn. Kie ĉesas la potenco de la animo super la korpoj? Kiun rolon ludas tiu inteligenta forto en la magnetismaj fenomenoj? Kiun la organismo? Jen pleninteresaj demandoj, gravaj tiel por la Filozofio kiel ankaŭ por la Medicino.

Atendante la solvon de tiuj problemoj, mi citos al vi kelkajn tekstojn de Charpignon, tiu doktoro el Orleano, partiano de la transiĝo de la penso. Vi vidos, ke li sin mem rigardas senpova por demonstri, ke, *ĉe la propre dirita vidado*, la kaŭzo kuŝas en la amplekso de la *organa simpatio*, kiel ĝin asertas multaj aŭtoroj.

Li diras, sur paĝo 289:

“Akademianoj, duobligu la laboron de viaj kandidatoj; moralistoj, promulgu leĝojn por la socio, por la mondo, por tiu mondo, kiu ĉion priridas, kiu volas ĝuadi spite al la leĝoj de Dio kaj al la rajtoj de l' homo, kiu vanigas viajn penojn, ĉar ĝi disponas forton, pri kiu vi ne suspektis kaj kiun vi lasis kreski en tia maniero, ke vi jam ne povas ĝin deteni.”

Sur paĝo 323:

“Ĝis tie ĉi ni tre bone komprenis la manieron, kiel la penso transiĝas, sed ni ne kapablas kompreni, per tiuj leĝoj de harmonia simpatio, la sistemon, per kiu la homo formas en si mem tian aŭ tian penson, tian aŭ tian imagon, kaj la eksciton el la eksteraj objektoj. Tio estas ekster la proprecoj de la organismo, kaj la psikologio, trovante en tiu kapablo rememoriga, aŭ *kreiva*, laŭ la deziro de l' homo, ion antagonisman al la proprecoj de la organismo, ĝin dependigas de ia substanca estaĵo diferenca de la materio. Ni do komencas trovi, en la fenomeno de la pensado, kelkajn mankojn inter la efiko de la fiziologiaj leĝoj de la organismo kaj la ricevita rezultato. La rudimento de la fenomeno, se oni tiel povas sin esprimi, ja estas fiziologia, sed tia ne estas ĝia vere mireginda amplekso; kaj ĉi tie necesas rekoni, ke la homo disponas ian kapablecon, kiu apartenas al neniu el la du elementoj, kiujn, ĝis nun, ni vidas en lia konsisto. La bonafida observanto rekonos do, ekde nun, ian *trian parton* kiel konsistigan elementon de la

Diskutado pri la Ideo de Ekzisto de Interaj Estuloj Inter la Homo kaj Dio

homo, kiu parto komencas riveliĝi al li, el la vidpunkto de la magnetisma psikologio, pere de novaj karakteroj rilatantaj al tiuj, kiujn la filozofo atribuas al la animo.

Sed la ekziston de la animo pli forte demonstros la studado de iuj aliaj kapabloj de la magneta somnambulismo. Tiel, la transvidado, kiam ĝi estas kompleta kaj evidente ne ligita al la transiĝo de la penso, niaopinie ne povas esti klarigita per la amplekso de la organa simpato.”

Poste, sur paĝo 330:

“Kiel oni vidas, ni havis fortajn motivojn por aserti, ke la *studo* de la magnetaj fenomenoj havis grandajn rilatojn kun la Filozofio kaj la Psikologio. Ni rimarkis farotan *laboron*, kaj por ĝin plenumi ni invitis specialajn homojn.

Sur la sekvantaj paĝoj, temas pri la nemateriaj estuloj kaj ties eblaj rilatoj kun nia memo.

Paĝo 349:

“Estas al ni eksterdube, ĝuste pro la leĝoj, kiujn ni ĵus skizis en ĉi tiu laboro, ke *la homa animo povas esti* rekte *instruita*, ĉu de Dio, *ĉu de iu alia inteligento*. Ni kredas, ke tiu supernatura komunikado povas fariĝi tiel dum stato normala kiel dum ekstaza, ĉu spontana, ĉu nenatura.”

Paĝo 351:

“Sed ni refoje diras, ke ĉe la homo la natura antaŭvido estas limigita kaj ne povus esti tiel preciza kaj tiel larĝe elvolvita kiel la antaŭvidoj de la sanktaj profetoj aŭ de homoj, kiuj estis inspirataj de inteligento supera al la homa animo.”

Paĝo 391:

“La Scienco kaj la kredo je supernatura mondo estas du antagonismaj esprimoj; sed, ni rapidas diri, tiaj ili estas kaŭze de troigoj aperintaj en ambaŭ flankoj. Niaopinie, al Scienco kaj fido eblas starigi interligon, kaj tiam la homa spirito altiĝos al la nivelo de sia surtera perfektigebleco.”

Paĝo 396:

“Tiel la Malnova, kiel la Nova Testamento, krom ankaŭ la analoj de ĉiuj popoloj, plenas per faktoj klarigeblaj nur per la agado de *estuloj superaj* al la homo. Cetere, la studoj antropologiaj, metafizikaj kaj ontologiaj pravas

Unua parto

la realecon de la ekzisto de *nemateriaj estuloj* inter la homo kaj Dio kaj la eblecon de ilia influado sur la homan specion.”

Nun, la opinio de unu el la ĉefaj aŭtoritatuloj en Magnetismo pri la ekzisto de estuloj ekster la homaro. Ĝi estas eltirita el la korespondado inter Deleuze kaj d-ro Billot:

“La sola fenomeno, kiu ŝajne pruvas la komunikiĝon kun la nemateriaj estuloj, estas la aperoj, da kiuj estas multaj okazoj. Ĉar mi estas konvinkita pri la senmorteco de la animo, mi trovas nenian kialon por nei la eblecon de apero de personoj, kiuj, forlasinte ĉi tiun vivon, *okupas sin pri siaj karuloj* kaj al ĉi tiuj prezentiĝas por doni al ili bonajn konsilojn.”

D-ro Ordinaire, el Mâcon, alia aŭtoritatulo pri ĉi tiu objekto, sin esprimas jene:

“La sankta fajro, la sekreta influado (laŭ Boileau), la inspiro, ne devenas de tia aŭ tia strukturo, kiel asertas la frenologoj, sed ja de poezia animo *en rilato kun ankoraŭ pli poezia Genio*. Tiel same pri muziko, pentro, ktp. Ĉu tiuj superaj inteligentoj ne estus animoj liberiĝintaj de la materio kaj grade altiĝantaj, laŭmezure kiel ili elpuriĝas, ĝis la granda, la universa inteligento, kiu ĉiujn ceterajn envolvas, nome ĝis Dio? Ĉu niaj animoj, *post multaj migradoj*, ne okupas lokon inter tiuj nemateriaj estuloj?

“El tio supre prezentita, diras la sama aŭtoro, ni konkludas: ke la studo pri la animo ankoraŭ restas en la komenco; ke, ĉar de la polipo ĝis la homo ekzistas ia serio da inteligentoj, kaj ke nenio bruske interrompiĝas en la Naturo, tial laŭracie devas ekzisti, de la homo ĝis Dio, ia alia serio da inteligentoj. La homo konstituas ĉeneron, kiu interligas la malsuperajn inteligentojn, alkroĉitajn al la materio, kun la superaj, nemateriaj inteligentoj. De la homo ĝis Dio viciĝas serio simila al tiu etendiĝanta de la polipo ĝis la homo, tio estas, ia serio da estuloj eterecaj, pli aŭ malpli perfektaj, ĝuantaj diversajn kapablecojn, por malsamaj uzoj kaj funkcioj.

“Ke tiuj superaj inteligentoj palpeble manifestiĝas dum la nenatura somnambulismo;

“Ke tiuj inteligentoj starigas intimajn rilatojn kun niaj animoj;

“Ke ĝuste al tiuj inteligentoj *ŝuldiĝas niaj rimorsoj*, kiam ni faras malbonon, kaj nia kontenteco, kiam ni faras bonan agon;

“Ke al tiuj inteligentoj la superaj homoj ŝuldas siajn bonajn inspirojn;

“Ke al tiuj inteligentoj la ekstazuloj ŝuldas la kapablecon antaŭvidi la estontecon kaj anonci estontaĵojn;

“Fine, ke, por agi sur tiujn inteligentojn kaj akiri ilian favoron, potence efikas *la virto kaj la preĝo*.”

NOTO. — La opinio de tiaj homoj, kiuj cetere ne estas la solaj, certe havas ian valoron, kian neniu povas kontesti; sed ĝi ĉiam restus nura opinio, pli aŭ malpli racia, se ĝin ne konfirmus la observado. Spiritismo estas tuta enhavata en la supre cititaj ideoj; ĝi nur ilin kompletigas, per specialaj rimarkoj, kaj kunordigas, al ili donante la sankcion de la eksperimento.

Kiuj obstine neadas la ekziston de la spirita mondo, tamen ne povante nei la faktojn, tiuj pene serĉas ties kaŭzon ekskluzive en la korpa mondo. Sed iu teorio, por esti vera, devas ekspliki ĉiujn koncernajn faktojn; unu sola kontraŭdira fakto ĝin nuligas, ĉar ne estas esceptoj en la leĝoj de la Naturo. Tiel okazis al la pliparto el tiuj, kiujn oni komence elpensis por ekspliki la spiritismajn fenomenojn. Preskaŭ ĉiuj falis, unu post alia, antaŭ faktoj por ili neklarigeblaj. Post senrezulta elĉerpado de ĉiuj sistemoj, oni nepre devis sin turni al la spiritismaj teorioj, kiel la plej konkludigaj, ĉar, ne estante formulitaj antaŭtempe nek surbaze de hastaj observoj, ili ampleksas ĉiujn variaĵojn, ĉiujn nuancojn de la fenomenoj. Kio ilin rapide akceptigis al la plimultaj personoj, tio estis la fakto, ke ĉiu en ili trovis la kompletan kaj kontentigan solvon, kiun ili vane serĉadis aliloke.

Sed multaj ankoraŭ ilin repuŝas, kio estas komuna al ĉiuj novaj ideoj, kiuj aperas por ŝanĝi kutimojn kaj kredojn: ĉiuj longtempe renkontis obstinajn kontraŭulojn, eĉ inter la plej kleraj homoj. Sed iam venas tago, kiam vero venkas malveron, kaj ĉiuj miregas, ke al ĝi oni kontraŭstaris, dum ĝi montriĝas kiel io tiel natura. Tiel same okazos kun Spiritismo, kaj rimarkindas, ke el ĉiuj grandaj ideoj, kiuj revoluciigis la mondon, neniu konkeris, en tiel mallonga tempo, tiom multe da anoj en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj rangoj de la societo. Jen kial la spiritistoj, kies fido neniel estas blinda, kiel kredigas ĝiaj kontraŭuloj, sed estas male fondita sur la observado, tute ne faras al si zorgojn pro siaj kontraŭdirantoj nek pro tiuj ne konsentantaj iliajn ideojn. Ili konscias, ke la Doktrino, elstarante el la leĝoj mem de la Naturo kaj neniel sin apogante sur ties nuligo, ne povas ne superstari, kiam tiajn leĝojn oni rekonos.

Kiel ĉiuj scias, la ideo pri la ekzisto de interaj estuloj inter la homo kaj Dio ne estas nova. Sed oni ĝenerale prezentis al si, ke tiaj estuloj konstituus apartan kreaĵon. La religioj ilin nomis anĝeloj kaj demonoj, la paganoj ilin rigardis dioj. Pruvante, ke tiaj estuloj estas ne aliaj, ol la homaj animoj atingintaj malsamajn gradojn de la spirita hierarkio, Spiritismo remetas la kreaĵaron en la grandiozan unuecon, kiu ja estas la esenco de la diaj leĝoj. Anstataŭ multego da senprogresaj kreaĵaroj, kiuj elmontrus kapricon

Unua parto

aŭ partiecon ĉe la Diaĵo, estas ja nur unusola, esence evoluipova, sen ia privilegio por ia ajn kreito, kaj ĉiu individuo leviĝus el la stato de embrio al tiu de kompleta disvolviĝo, kiel, el grajno, plantido venas al la stato de arbo. Spiritismo do al ni montras la unuecon, la harmonion, la justecon en la Kreado. Laŭ ĝi, la demonoj estas malprogresintaj animoj, kiujn ankoraŭ makulas la malvirtoj de la homaro, dum la anĝeloj estas tiuj samaj animoj elpuriĝintaj kaj senmateriigintaj; kaj inter tiuj du ekstremaj punktoj la amaso da animoj venintaj al malsamaj gradoj de la progresiva skalo. Spiritismo tiel starigas la solidarecon inter la mondo spirita kaj la korpa mondo.

Koncerne la proponitan demandon: — “Kie estas la limo, en la spiritismaj aŭ somnambulismaj fenomenoj, ĉe kiu ĉesas la agado de la homa animo kaj komenciĝas tiu de la Spiritoj?” — ni diros, ke tiu limo ne ekzistas, aŭ, pli ĝuste, ke ĝi estas neniel absoluta. Se montriĝas, ke ne estas distingigaj specioj, ke la animo estas nenio alia, ol enkarniĝinta Spirito, ke la Spirito estas animo liberiĝinta de la materiaj ligiloj; ke tio estas unu sama estulo en malsamaj medioj, do sama devas esti ties fakultoj kaj kapabloj. Somnambulismo estas transira stato inter enkarniĝo kaj elkarniĝo, ia parta liberiĝo, ia anticipa paŝo en la spiritan mondon. La enkarniĝinta animo, aŭ, se oni preferas, la Spirito mem de la somnambulo aŭ de la mediumo, povas do pli aŭ malpli fari, kion faros la elkarniĝinta animo, eĉ pli multe, se ĝi estas pli progresinta, kun la sola diferenco, ke, estante pli libera pro sia kompleta disiĝo, la animo ĝuas specialajn perceptojn esence proprajn al sia stato.

Estas kelkfoje tre malfacila, ĉe iuj efikoj, la distingo inter tio, rekte venanta de la animo de l' mediumo, kaj tio, kio fontas el fremda kaŭzo, ĉar tre ofte ambaŭ interkonfuziĝas kaj sin reciproke konfirmas. Tiel, en la okazoj de resanigo per surmeto de manoj, la Spirito de la mediumo povas agi sola aŭ kun la helpo de alia Spirito, kaj la poezia aŭ artisma inspirado povas havi duoblan originon. Sed el tio, ke distingo estas malfacila, ne sekvas, ke ĝi estas neebla. La duobleco ofte evidentas, kaj, en ĉiuj okazoj, ĝi preskaŭ ĉiam elfluas el atenta observado.



Kaŭzo kaj Naturo de la Somnambula Klarvideco

Klarigo de la fenomeno de klarvideco

Estante de alia naturo ol la perceptoj dum la stato de maldormo, ne povas la perceptoj dum la somnambula stato esti transigataj de la samaj organoj. Estas vere, ke ĉi-okaze la vidado ne fariĝas per la okuloj, kiuj cetere restas ordinare fermitaj kaj kiujn oni eĉ povas ŝirmi de la lumaj radioj cele al forigo de ĉia suspekto. La transvidado kaj la vidado tra opakaj korpoj krome ekskludas la eblecon de uzado de la ordinaraj vidorganoj. Estas do necese akcepti, ĉe la somnambula stato, la disvolviĝon de ia nova senso kiel sidejo de novaj, al ni ne konataj kapabloj kaj perceptoj, pri kiuj ni ne povas fari al ni ideon krom per analogio kaj rezonado. Estas en tio, oni komprenas, nenio neebla; sed kie sidas tiu senso? Ja ne facilas ĝin ekzakte determini. Eĉ ne la somnambuloj prie liveras precizan indikon. Estas unuj, kiuj, por pli bone vidi, kontaktigas la objektojn kun la epigastro, aliaj kun la frunto, aliaj kun la okciptosto. Tiu senso do ne ŝajnas limigita en iu difinita loko, sed estas certe, ke ĝi pli forte aktivis en la nervaj centroj. Pozitiva estas tio, ke la somnambulo vidas. Per kio kaj kiel? Eĉ li ne povas ĝin difini.

Ni tamen rimarku, ke en la somnambula stato la fenomenoj de vidado kaj la sensacoj, kiuj ĝin akompanas, estas esence diferencaj de tio, kio okazas en la ordinara stato; pro tio ni uzos la vorton *vidi* nur por komparo kaj pro la neekzisto de ia termino, kiu al ni kompreneble mankas por esprimi nekonatan aferon. Popolo el denaskaj blinduloj disponus nenian vorton por esprimi *la lumon* kaj rilatigus la sensacojn, kiujn ĝi estigas, al unu el tiuj de ili konataj, ĉar por ĉi tiuj ili estas sentivaj.

Oni provis klarigi al blindulo la vivan kaj brilan impreson de la lumo sur la okulojn. *Mi komprenas*, li diris, *tio estas kiel la sono de trumpeto*. Alia, sendube iom pli proza, al kiu oni volis komprenigi la elsendiĝon de la radioj en faskoj aŭ lumaj konusoj, respondis: *Ha, jes, ĝi estas kvazaŭ sukerpano*. Ni same statas koncerne la somnambulan klarvidecon: ni estas veraj blinduloj, kaj, same kiel ĉi tiuj, ni ĝin komparas kun tio, kio, por ni, havas pli da analogion kun nia vidkapablo. Sed se ni volas starigi absolutan analogion inter tiuj du kapabloj kaj taksi unun laŭ la alia, ni nepre trompiĝos tiel same kiel ambaŭ ĵus menciitaj blinduloj. En tio konsistas la eraro de preskaŭ ĉiuj, kiuj pretende serĉas konvinkiĝi per eksperimentado: tiaj volas submeti la klarvidecon al la samaj provoj kiel ĉe la ordinara vidado, ne konsiderante, ke inter ili estas nenia rilato krom la nomo, kiun ni donas al ili. Kaj ĉar la rezultatoj ne ĉiam respondas al ilia atendo, ili trovas pli simpla neadi.

Se ni procedas laŭ analogio, ni diras, ke la magneta fluido, dissemita en la tuta Naturo kaj kies ĉefaj fokusoĵ ŝajne estas la animitaj korpoj, konstituas la vehiklon de la somnambula klarvideco, same kiel la luma fluido estas la vehiklo de la imagoj perceptitaj de nia vidkapablo. Nu, kiel la luma fluido travidebligas la korpojn, kiujn ĝi libere trapasas, tiel same, pro la fakto ke la magneta fluido senescepte penetras ĉiujn korpojn, neniaj korpoj opakaj ekzistas por la somnambuloj. Tia estas, el nia vidpunkto, la plej simpla kaj plej materia klarigo de la klarvideco. Ni ĝin rigardas ĝusta, ĉar la magneta fluido nekontesteble ludas gravan rolon en tiu fenomeno; ĝi tamen ne povus klarigi ĉiujn faktojn. Alia ekzistas, kiu ja ĉiujn ampleksas, sed por kies kompreno nepre necesas kelke da enkondukaj klarigoj.

Ĉe la transvidado, la somnambulo ne distingas malproksiman objekton tiel same, kiel ni povus fari helpe de ia lorno. Ne la objekto proksimiĝas al li per ia optika iluzio, sed ja LI PROKSIMIĜAS AL LA OBJEKTO. La somnambulo vidas la objekton ĝuste tiel, kvazaŭ ĉi tiu troviĝus apud li; li sin mem vidas en la loko, kiun li observas; unuvorte, li tien translokiĝas. Lia korpo, en tiu momento, ŝajnas neniiginta, lia parolo iĝas pli surda, la sono de lia voĉo havas ion strangan; la animala vivo ŝajnas estingiĝi ĉe li; la spirita vivo troviĝas tuta en la loko, kien lin transportas lia penso; nur la materio restas en la sama loko. Estas do ia parto de nia memo, kiu apartiĝas de nia korpo por subite translokiĝi tra la spaco, kondukite de la penso kaj la volo. Tiu parto evidente estas nemateria; alie ĝi estigus kelkajn el tiuj efikoj produktataj de la materio: ĝuste tiun parton de nia memo ni nomas *animo*.

Estas ja la animo, kiu havigas al somnambulo tiujn mirindajn kapablecojn al li proprajn; kiu, en difinitaj cirkonstancoj, manifestiĝas, parte kaj momente disiĝinte de sia korpa envolaĵo. Por ĉiu ajn, kiu atente observis la somnambulismajn fenomenojn en ties tuta pureco, la ekzisto de la animo estas fakto pruvita, kaj la ideo, ke ĉio en ni finiĝas kun la animala vivo, al li montriĝas kiel evidenta sensencaĵo. Oni povas do iel prave aserti, ke magnetismo kaj materialismo estas neakordigeblaj inter si. Se iuj magnetizistoj ŝajnas deflankiĝi de tiu regulo, konfesante la materialismajn doktrinojn, tiel estas ĉar ili sendube tre supraĵe studis la fizikajn fenomenojn de Magnetismo kaj ne serioze serĉis solvon al la problemo de la transvidado. Kiel ajn tio estas, ni neniam vidis unu solan *somnambulon* ne penetritan de profunda religia sento, *kiaj ajn estis liaj opinioj en maldorma stato*.

Ni revenu al la teorio de la klarvideco. Ĉar la animo estas la principo de la somnambulaj kapablecoj, en ĝi do sidas la klarvideco, ne en tia aŭ tia limita parto de nia korpo. Ja tial la somnambulo ne povas difini la organon de tiu kapableco, kiel li montrus la okulojn kiel organojn de la ekstera vidado: li vidas per sia tuta morala esteco, tio estas, per sia tuta animo, ĉar la klarvideco estas unu el la atributoj de ĉiuj partoj de la animo, kiel la lumo estas unu el la atributoj de ĉiuj partoj de fosforo. Ĉie ajn do, kien la animo povas penetri, estas klarvideco, kaj en tio kuŝas la kaŭzo de la somnambula klarvideco tra ĉiuj korpoj, sub la plej dikaj envolaĵoj kaj je ĉiuj distancoj.

Unu objekto kompreneble leviĝas kontraŭ tiu sistemo, kaj al ĝi ni rapidas respondi. Se la somnambulaj kapablecoj estas samaj kiel tiuj de la animo liberiĝinta de la materio, kial ili ne estas konstantaj? Kial kelkaj somnambuloj estas pli klarvidaj ol aliaj? Kial klarvideco varias ĉe unu sama individuo? Kompreneblas la fizika malperfektaĵo de iu organo, sed ne de la animo.

La animo teniĝas al la korpo per misteraj ligiloj, kies konado al ni estis konsentita nur post kiam Spiritismo pruvis la ekziston kaj la rolon de la perispiritito. Ĉar ni speciale pritraktis tiun demandon en la *Spiritisma Revuo* kaj en la fundamentaj verkoj de la doktrino, ni ne plu parolos ĝin ĉi tie; ni limigos nin diri, ke la animo manifestiĝas ekstere per niaj materiaj organoj. En nia normala stato, tiujn manifestiĝojn kondiĉas la neperfekteco de la instrumento, same kiel plej bona laboristo ne povas fari perfektan laboraĵon per malbona laborilo. Kiel ajn mirinda estas do la strukturo de nia korpo, kiel ajn antaŭzorgema estas la Naturo pri nia organismo por

Unua parto

la plenumo de la vitalaj funkcioj, super tiuj organoj, submetitaj al ĉiuj perturboj de la materio, staras la subtileco de nia animo. Dum la animo restas ligita al la korpo, ĝi suferas ties malhelpojn kaj sortoŝanĝojn..

La magneta fluido estas ne la animo mem, sed ia ligilo, ia perilo inter la animo kaj la korpo; pro sia pli aŭ malpli intensa agado sur la materion ĝi faras la animon pli aŭ malpli libera, kaj de tio venas la diverseco de la somnambulaj kapabloj. La somnambulo estas kvazaŭ homo seniĝinta je nur parto de siaj vestoj kaj kies movoj estas ankoraŭ ĝenataj de tiuj, kiuj restis.

La animo ĝuos sian plenecon kaj la tutan liberecon de siaj kapabloj nur tiam, kiam ĝi forskuos de si la lastajn surterajn vidojn, kiel papilio forlasinta sian krizalidon. Se ekzistus magnetizisto tiel potenca, ke li havigus al la animo absolutan liberecon, la surtera ligilo rompiĝus, kies tuja sekvo estus la morto. Somnambulismo igas nin do meti unu piedon en la estontan vivon; ĝi levas angulon de la vualo, sub kiu kaŝiĝas la veraĵoj, kiujn Spiritismo hodiaŭ duonvidigas al ni. Sed ni konos ĝin, laŭ ĝia esenco, nur tiam, kiam ni tute liberiĝos de la materia vualo, kiu ĉi-malsupre ĝin nebuligas.



La Duobla Vidado

Konado de la estonteco. – Antaŭvidoj

Se, en la somnambula stato, la manifestiĝoj de la animo iel fariĝas malkaŝaj, estus absurde pensi, ke, en la normala stato, ĝi restus absolute enfermita en sia envolaĵo, kiel heliko en sia konko. Ne la magneta influo ĝin disvolvas; tiu influo nur evidentigas ĝian agadon sur niajn organojn. Nu, ne ĉiam somnambula stato estas nepre necesa kondiĉo por tia manifestiĝo; la kapabloj, kiujn ni vidis aperi en tiu stato, kelkfoje spontane disvolviĝas, ĉe certaj homoj, en la normala stato. El tio rezultas, ke ili ĝuas la kapablon vidi trans la limoj de niaj sensoj; ili perceptas forestantajn aĵojn ie ajn, kien la animo etendas sian agpovon; ili vidas, se ni povas uzi tian esprimon, per la ordinara vidpovo, kaj la bildoj, kiujn ili priskribas, la faktoj, kiujn ili rakontas, montriĝas al ili kvazaŭ efikoj de ia miraĝo. Tiun fenomenon oni nomas *duobla vidado*. Ĉe somnambulismo, la klarvideco fontas el sama kaŭzo; la diferenco kuŝas en tio, ke, en tiu stato, ĝi estas aparta, nedependa de la korpa vidado, dum ĉe tiuj, kiuj ĝuas tiun kapablon en maldorma stato, ĝi estas simultana.

La duobla vidado preskaŭ neniam estas konstanta. Ordinare, tiu fenomeno spontane fariĝas, en difinitaj momentoj, ne pro efiko de la volo, kaj ĝi estigas iaspecan krizon, kiu kelkfoje senteble ŝanĝas la fizikan staton: la okuloj havas ion svagan, ŝajnas rigardi ne vidante, kaj lia tuta mieno reflektas ian ekzaltitecon.

Rimarkindas, ke la homoj, ĝuantaj tiun kapablon, ĝin ne konscias; al ili ĝi ŝajnas natura, kiel la kapablo vidi per la okuloj. Por ili ĝi estas atributo de ilia propra memo kaj neniel montriĝas al ili kiel ia escepto.

Al tio aldoniĝas, ke la forgeso plej ofte sekvas tiun paseman klarvidecon, kies memoro, ĉiam pli nepreciza, fine malaperas kiel tiu pri sonĝo.

Estas senfinaj gradoj en la potenco de la duobla vidado, ekde konfuza sensaco ĝis percepto tiel klara kaj preciza kiel ĉe somnambulismo. Mankas al ni ia termino por nomi tiun specialan staton kaj precipe tiujn homojn povantajn ĝin sperti: oni uzas la vorton *vidanto*, kaj, kvankam ĝi ne esprimas ekzakte la penson, ni ĝin dume adoptos, manke de iu pli bona.

Se ni nun komparas la fenomenojn de somnambula transvidado kun tiuj de duobla vidado, ni komprenas, ke la vidanto povas percepti forestantajn aferojn, kaj, kiel la somnambulo, li vidas malproksime, sekvas la fluon de la okazaĵoj, taksas ilian tendencon kaj povas, en iuj okazoj, antaŭvidi ilian finon.

Estas tiu kapablo de duobla vidado, kiu, en rudimenta stato, havigas al iuj personoj takton, sagacecon, ian certecon pri siaj agoj, kiun oni povus nomi la ĝusteco de la la morala ekrigardo; pli elvolviĝinta, ĝi montras la estintajn aŭ la estontajn okazaĵojn; fine, ĉe sia apogeo, ĝi estas la maldorma ekstazo.

La fenomeno de duobla vidado, kiel ni diris, preskaŭ ĉiam estas natura kaj spontana; sed ĝi ŝajne pli ofte okazas sub certaj cirkonstancoj. La tempoj de krizo, de malfeliĉegoj, de grandaj afekcioj, resume ĉiaj kaŭzoj de morala superekscitado provokas ĝian disvolviĝon. Ŝajnas, ke la Providenco, ĉe tuj minacaj danĝeroj, multobligas inter ni la kapablecon ilin antaŭforigi.

Ekzistis vidantoj en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj landoj, kaj ŝajnas, ke certaj popoloj estas pli nature inklinaj al tia kapablo. Laŭdire la duobla vidado estas tre ordinara en Skotlando, kaj ĝi estas ofte trovata ĉe kamparanoj kaj montanoj.

La vidantojn oni diverse rigardis laŭ la tempoj, la moroj kaj la grado de civiliziteco. Por skeptikuloj ili estas nenio alia ol sencerbuloj, halucinuloj; la religiaj sektoj ilin faris profetoj, sibiloj, orakoloj; dum la jarcentoj de superstiĉo kaj nescieco oni ilin rigardis sorĉistoj kaj ŝtiparumis. Por saĝulo, kredanta la senfinan potencon de la naturo kaj la neelĉerpeblan bonecon de la Kreinto, la duobla vidado estas kapablo esence propra al la homa specio, per kiu Dio al ni malkaŝas la ekziston de nia spirita esenco.¹⁴ Kiu ne rekonus tian doton en Johana Dark kaj en amaso da aliaj personoj, kiujn la historio kvalifikas kiel inspiritojn?

¹⁴ En la franclingva originalo: *materia* esenco. Ni korektis kiel ĉi-supre skribita. – *Noto de Evandro Noleto Bezerra, em sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

Oni ofte parolis pri kartaŭguristoj, kiuj diradis surprizajn veraĵojn. Ni tute ne apologias pri la eldirantoj de la bona sorto, kiuj ekspluatas la kredemon de malfortaj spiritoj kaj kies ambigua parolo konformas al ĉiuj kombinaĵoj de afekciita menso; sed estas nenio neebla en tio, ke certaj personoj, sin donantaj al tiu ofico, posedas, eĉ senscie, la kapablon de la duobla vidado. Ĉi-okaze, la kartoj en iliaj manoj estas nenio alia krom ia rimedo, ia preteksto, ia apogo por la konversacio. Ili parolas laŭ tio, kion ili vidas, ne laŭ tio, kion montras la kartoj, kiujn ili apenaŭ rigardas.

Same okazas ĉe aliaj divenrimedoj, kiel la manlinioj, la kafofeĉo, la ovoblanko kaj ceteraj mistikaj signoj. La linioj de la mano eble pli valoras ol ĉiuj aliaj signoj, ne per si mem sed ĉar, prenante kaj palpante la manojn de la konsultanto, la supozata aŭguristo, se li estas dotita per la duobla vidado, starigas pli rektan rilaton kun tiu lasta, kiel fariĝas dum la somnambulaj konsultoj.

Oni povas loki la vidivajn mediojn en la klason de tiuj posedantaj la duoblan vidadon. Kiel ĉi tiuj, la vidivaj medioj efektive kredas, ke ili vidas per la okuloj, sed kiu fakte vidas estas la animo, kaj en tio kuŝas la kaŭzo, ke ili vidas kun fermitaj okuloj tiel bone, kiel kun okuloj malfermitaj. El tio nepre sekvas, ke blindulo povus esti vidiva medio tiel same, kiel homo kun perfekta vidkapablo. Estus ja interesa studo, esplori, ĉu tiu kapablo pli oftas ĉe blinduloj. Ni ja inklinas kredi ĝin, ĉar, kiel oni povas konvinkiĝi per la sperto, la seniĝo je komunikrimedoj kun la ekstera medio, pro manko de certaj sensoj, ordinaro havigas al la animo pli potencon kapablon de abstraktado kaj, sekve, pli intensan disvolvon al tiu intima senso, per kiu la animo ekrilatas kun la spirita mondo.

La vidivaj medioj povas do esti klasigitaj inter tiuj personoj ĝuantaj la spiritan vidadon; sed oni eble troigus, rigardante ĉi-lastajn kiel mediojn, ĉar, se mediumeco konsistas sole nur en la interveno de la Spiritoj, oni do ne povas rigardi kiel agon meduman tion, kion oni faras per si mem. Kiu posedas la spiritan vidadon, tiu vidas per sia propra Spirito, kio neniel implicas, por la manifestiĝo de lia kapableco, la neceso de kunhelpo de fremda Spirito.

Ĉe tio, ni ekzameni, ĝis kia grado la kapableco de duobla vidado ebligas al ni malkovri kaŝitaĵojn kaj penetri la estontecon.

De ĉiuj tempoj la homoj volis koni la estontecon, kaj oni verkus tutajn volumojn pri la rimedoj, kiujn superstiĉo elpensis por levi la vualon kovrantan al ni la destinon. Tre saĝa estis la naturo, ke ĉi tiun ĝi kaŝis al ni. Ĉiu el ni havas sian providencan mision en la granda homa esameno

kaj kunagas por la komuna verko en sia sfero de agado. Se ni anticipu konus la finon de ĉiu afero, la ĝenerala harmonio sen ia dubo de tio suferus. Feliĉa, sekurigita estonteco ŝparus al la homo ĉian aktivecon, ĉar li bezonus fari nenian penon por atingi la deziratan celon: sian bonstaton. Ĉiuj liaj fizikaj kaj moralaj fortoj restus paralizitaj, kaj haltus la progresiva irado de la homaro. Samajn sekvojn estigus la certeco pri malfeliĉo pro la efiko de senkuraĝeco; ĉiu rezignus lukti kontraŭ ia definitiva verdikto de la destino. La absoluta konado de la estonteco montriĝus do kiel pereiga donaco, kiu nin kondukus al la dogmo de fatalo, el ĉiuj la plej danĝera kaj la plej antipatia al la evoluado de la ideoj. Ja la necerteco pri la momento de nia fino en ĉi tiu mondo igas nin labori ĝis la lasta bato de nia koro. Vojaĝanto, portata de iu veturilo, sin allasas al la movo, kiu lin kondukos al la celo, ne pensante devojigi ĝin, ĉar li konscias sian senpovecon; tiel same estus ĉe homo, kiu konus sian nenuligeblan destinon. Se la vidivaj medioj povus malobei tiun leĝon de la Providenco, ili egalus Dion. Jen do kial tia ne estas ilia misio.

En la fenomeno de duobla vidado, kiam la animo estas parte disĝinta de la materia envolaĵo, kiu al ĝi limigas la kapablojn, por ĝi ne plu estas daŭro nek distanco; spacon kaj tempon ĝi ĉirkaŭprenas, kaj ĉio al ĝi kunfandiĝas en la nuno. Libera de siaj ligiloj, ĝi juĝas efikojn kaj kaŭzojn pli bone ol kiel ni povus fari; ĝi vidas la sekvojn de la nunaj aferoj kaj povas ilin al ni antaŭsentigi; ĝuste en ĉi tiu senco oni devas kompreni la kapablon de antaŭscio atribuitan al la vidivaj medioj. Liaj antaŭvidoj estas nenio alia, ol la rezulto el pli klara konscio pri tio ekzistanta, kaj ne de ia antaŭdiro pri hazardaj aferoj sen ia ligo kun la nuno; temas ja pri logika dedukto el tio konata por atingi tion nekonatan, kiu tre ofte dependas de nia maniero de agado. Ĉe minaco de danĝero, se ni estas avertitaj, ni kapabliĝas por fari tion, kio necesas por ĝin eviti, tamen restante liberaj por fari aŭ ne fari.

En tia okazo, la vidiva medio troviĝas antaŭ danĝero kaŝita al ni; li ĝin rimarkas, montras la rimedon por ĝin forigi, ĉar alie la evento iras sian vojon.

Ni supozu, ke veturilo eniris ŝoseon kondukantan al profundaĵo ne distingebla por la kondukisto; estas ja evidente, ke se nenio ĝin deturnos ĝi tien nepre enfalos. Ni ankaŭ supozu, ke homo lokiĝis en tia maniero, ke li, vidante la neeviteblan pereon de la vojaĝanto, povus ĉi tiun antaŭsciigi, ke li ĝustatempe deturniĝu: la danĝero ja estos forigita. De sia loko, ĉirkaŭprenante la spacon, li vidas tion, kion la vojaĝanto, kies

vidadon limigas la malebenajoj de la tereno, ne povas distingi. Li povas vidi, ĉu ia hazarda kaŭzo al la vojaĝanto evitigos fali; li do antaŭscias tion, kio rezultos el la evento kaj povas ĝin antaŭdiri.

Tiu sama homo, staranta sur alta monto, distingas en la malproksimo, ke malamika trupo direktiĝas al iu vilaĝo kun la celo bruligi ĝin. Al li estos facile, kalkulante spacon kaj rapidecon, antaŭvidi, kiam la trupo alvenos. Se li, malsuprenirante al la vilaĝo, simple diros: *Je tia horo la vilaĝo estis bruligita*, kaj ja tiel plenumiĝos, tiam de la senscia amaso li estos rigardata kiel divenisto, sorĉisto, kvankam li nur kaj simple vidis, kion la aliaj ne povis vidi kaj kies sekvojn li deduktis. Nu, la vidiva medio, kiel ĉi tiu homo, ĉirkaŭprenas kaj sekvas la iradon de la okazaĵoj: li ĝin vidas! Li do povas diri al vi, ĉu vi iras bonan vojon, montri al vi la vojon pli bonan kaj al vi antaŭsciigi, kion vi trovos en la fino de la vojo. Tio estas por vi kvazaŭ la Ariadna fadeno, montranta labirintan elirejon.

Kiel oni vidas, tio estas malproksima de la ĝustasenca antaŭvido, kiel ni ĉi tiun komprenas laŭ la vulgara signifo de la vorto. Nenio estas prenita for de la homo, kiu ĉiam konservas sian liberecon agi aŭ ne agi; kiu, laŭ sia volo aŭ inerteco, plenumas aŭ lasas plenumiĝi la okazaĵojn; al li oni montras la rimedon atingi la celon, kaj lin nur koncernas ĝin utiligi. Supozi lin submetita al nefleksebla fatalo, rilate al la plej malgrandaj okazaĵoj de la vivo, estas senigi lin je lia plej bela atributo: la inteligenteco; estas similigi lin al la bruto. La vidiva medio ne estas do ia divenisto, sed ja iu, kiu povas vidi, kion ni ne vidas; li estas por ni kvazaŭ blindula hundo. En tio do estas nenio kontraŭanta la decidojn de la Providenco koncerne al nia destino; estas ja la Providenco mem, kiu al ni donas ian gvidanton.

Ja de ĉi tiu vidpunkto oni devas konsideri la konadon de la estonteco ĉe tiuj homoj dotitaj per la duobla vidado. Se la estonteco estus okaza, se ĝi dependus de tio nomata hazardo kaj havus nenian ligon kun la nunaj cirkonstancoj, do nenia klarvidado povus ĝin penetri kaj ĉia antaŭvido pri ĝi havigus nenian certecon. La vidiva medio – kaj kiel tian ni komprenas la veran vidivan medion – la serioza vidiva medio, ne la ĉarlatano, kiu sin tia ŝajnigas, la vera vidiva medio ne diras tion, kion la vulgarularo nomas sortaŭguro; li antaŭvidas la konsekvencon rezulton el la nuno, nenion pli, kaj ĉi tio jam estas multo.

Kiom da eraroj, da misaj paŝoj, da vanaj provoj ni evitus, se ni ĉiam disponus fidindan gvidanton, kiu nin instruus! Kiom da homoj restas malĝustaloke en la vivo pro tio, ke ili ne prenis la vojon, kiun la Naturo

Unua parto

strekis al iliaj kapabloj! Kiom da ili fiaskas, ke ili sekvis la konsilojn de senpripensa obstino! Iu povintus diri al ili: “Ne entreprenu tion, ĉar ne-sufiĉaj estas viaj intelektaj kapabloj, ĉar tio konvenas nek al via karaktero, nek al via konstitucio, aŭ ankoraŭ ĉar vi ne estos helpataj laŭnecese; aŭ ĉar vi trompiĝas pri ties graveco kaj renkontos tian neantaŭviditan baron.” En aliaj cirkonstancoj, al ili estus dirite: “Vi sukcesos en tia afero, se vi agos en tiu aŭ tiu alia maniero; se vi detenos vin de tia paŝo, povanta kompromiti vin.” Sondante la dispoziciojn kaj karakterojn, tiu persono dirintus: “Gardu vin kontraŭ tia kaptilo, en kiun oni volas teni vin”; poste li aldonus: “Jen vi estas avertitaj, kaj plenumita estas mia rolo; mi montris al vi la danĝeron; se vi pereos, kulpigu nek la sorton, nek la fatalon, nek la Providencon, sed ja vin mem. Kion povas fari kuracisto, kiam malsanulo neniel atentis liajn konsilojn?”



Enkonduko en la Studadon de la Fotografio kaj Telegrafio de la Penso

La fiziologia agado de unu persono sur alian, kun aŭ sen kontakto, estas nekontestebla fakto. Tiu agado memkompreneble povas efektiviĝi nur dank'al pera efikanto, kies rezervujo estas nia korpo kaj kies ĉefaj organoj de elsendado kaj direktado estas niaj okuloj kaj fingroj. Tiu nevidebla efikanto nepre estas ia fluido. Kia estas ĝia naturo, ĝia esenco? Kiuj estas ĝiaj esencaj proprecoj? Ĉu temas pri ia speciala fluido, aŭ pri ia modifo de la elektro aŭ de iu alia konata fluido? Aŭ pri tio, kion oni antaŭ ne longe nomis nerva fluido? Ĉu ĝi ne estas prefere tio, kion ni hodiaŭ nomas kosma fluido, kiam ĝi troviĝas dissemita en la atmosfero, aŭ perispirita fluido, kiam ĝi individuigiĝis?

Cetere, ĉi tiu demando estas duaranga.

La perispirita fluido estas nepesebla kiel la lumo, la elektro kaj la varmo. En sia normala stato ĝi estas al ni nevidebla kaj riveligiĝas nur per siaj efikoj. Ĝi tamen videbliĝas por tiuj en stato de klarvida somnambulismo, kaj eĉ en stato de maldormo por tiuj dotitaj per la duobla vidado. Ĉe elsendado, ĝi montriĝas sub la formo de lumaj faskoj tre similaj al la elektra lumo difuziĝinta en la vakuo. Al tio cetere limiĝas ĝia analogio kun ĉi tiu lasta fluido, ĉar ĝi, almenaŭ malkaŝe, estigas neniun el la konataj fizikaj fenomenoj. En la ordinara stato, ĝi prezentas diversajn kolornuancojn, laŭ la personoj, el kiuj ĝi emanis: jen malforte ruĝa, jen blueta aŭ grizeta kiel maldensa brumo; ĝi iafoje disverŝas sur la ĉirkaŭajn korpojn ian, pli aŭ malpli fortan, flavecan nuancon.

Pri tiu objekto egalas la raportoj de somnambuloj kaj vidivaj medioj. Ni cetere havos la okazon reveni al la temo, kiam ni priparolos la kvalitojn, kiujn al la fluido komunikas la kaŭzo, kiu ĝin agigas, kaj la progreso de la individuo, kiu ĝin elsendas.

Neniu korpo estas baro kontraŭ ĝi, kiu ilin ĉiujn penetras kaj trapasas. Ĝis nun estas konata neniu, kiu povus ĝin izoli. Nur la volo povas vastigi aŭ malvastigi ĝian efikon. La volo efektive estas ĝia plej potenca principo. Per la volo oni direktas ĝiajn efluvojn tra la spaco, oni per ĝi saturas iujn objektojn, aŭ oni ĝin forigas de la lokoj kie ĝi superabundas. Ni preterpase diru, ke ja sur tiu principo sidas la magnetiza forto. Ŝajnas, fine, ke ĝi estas la transigilo de la psika vidado, same kiel la luma fluido estas la transigilo de la ordinara vidado.

Kvankam ĝi emanis el universa fonto, la kosma fluido individuigas, por tiel diri, en ĉiu estaĵo kaj akiras karakterizajn proprecojn, kiuj ebligas ĝin distingi inter ĉiuj aliaj. Eĉ ne la morto forviŝas tiujn individuigajn karakterojn, kiuj restas longajn jarojn post la vivofino, pri kio ni jam povis konvinkiĝi. Ĉiu el ni do havas sian propran fluidon, kiu lin envolvas kaj akompanas en ĉiuj liaj movoj, same kiel la atmosfero akompanas ĉiun planedon. Tre varias la amplekso de la radiado de tiuj individuaj atmosferoj. Kiam la Spirito troviĝas en la stato de absoluta ripozo, tiu radiado povas limiĝi je kelkpaŝa distanco; sed sub la efiko de la volo ĝi povas atingi senfinajn distancojn. La volo ŝajnas dilati la fluidon tiel same, kiel la varmo dilatas la gasojn. La malsamaj individuaj atmosferoj renkontiĝas, interkruciĝas, intermiksiĝas, sed neniam interkonfuziĝas, tute same kiel la sonondo, kiuj restas distingiĝaj malgraŭ la amaso da sonoj samtempe skuantaj la aeron. Oni povas do aserti, ke ĉiu persono estas centro de ia fludeca ondo, kies amplekso estas en proporcia rilato kun la volforto tiel same, kiel ĉiu vibranta punkto estas centro de ia sonondo, kies amplekso estas en proporcia rilato kun la vibroforto; la volo estas la propulsanto de la fluido tiel same, kiel frapo estas la kaŭzo vibriganta la aeron kaj propulsanta la sonondojn.

El la apartaj ecoj de ĉiu fluido rezultas inter ili iaspeca harmonio aŭ malakordo, ia emo kuniĝi aŭ sin reciproke eviti, ia altiro aŭ ia repuŝo, unuvorte la simpatioj kaj malsimpatioj, kiujn oni ofte spertas, ne konante ties efikan kaŭzon. Se oni troviĝas en la sfero de agado de iu persono, lia ĉeesto kelkfoje al ni manifestiĝas per la agrabla aŭ malagrabla impresoj, kiun al ni sentigas lia fluido. Se ni estas inter personoj, en kies sentoj ni ne partoprenas, kies fluido ne harmonias kun la nia, tiam ia aflikta reago

nin korpremas kaj ni tie sentas nin kvazaŭ disonanca noto en koncerto! Se male pluraj kolektiĝas en komuneco de celoj kaj intencoj, tiam ĉies sentoj ekzaltiĝas en egala proporcio kun la maso da regantaj fortoj. Kiu ne konas la trenforton potencantan la amasojn, ĉe kiuj pensoj kaj volo homogenas? Oni ne povus prezenti al si, al kiom da influoj ni en tia maniero estas malgraŭvole submetitaj.

Ĉu tiaj kaŝaj influoj ne povas mem esti la efika kaŭzo de certaj ideoj, nome de tiuj, kiuj samtempe komunas al ni kaj al aliaj personoj, de tiuj svagaj antaŭsentoj, kiujn ni jene vortigas: en la aero ŝvebas io aŭguranta tian aŭ alian okazon? Ĉu fine certaj nedifineblaj sentoj de komforto aŭ malkomforto morala, de ĝojo aŭ malĝojo, ne rezultas el la influo de la fluideca medio, en kiu ni troviĝas, de la simpatiaj aŭ malsimpatiaj emanaĵoj, kiujn ni ricevas kaj kiuj nin envolvas tiel same kiel la emanaĵoj de odoranta korpo? Ni ne povus, en absoluta maniero, eldiri jesigajn asertojn pri tiuj demandoj, sed nepras almenaŭ konsenti, ke la teorio pri la kosma fluido, individuiginta en ĉiu estaĵo sub la nomo perispirita fluido, malfermas tute novan kampon al la solvo de amaso da ĝis nun neklarigeblaj problemoj.

En sia moviĝado, ĉiu do kunportas sian fluidecan atmosferon tiel same, kiel heliko kunportas sian konkon; sed tiu fluido postlasas signojn de sia pasado, ian luman strion ne trafeflan por niaj sensoj en maldorma stato, sed servantan al somnambuloj, vidivaj medioj kaj elkarniĝintaj Spiritoj por rearanĝo de okazintaĵoj kaj esplorado de ties kaŭzoj.

Ĉiu ago, fizika aŭ morala, kaŝa aŭ malkaŝa, de unu estaĵo sur sin mem aŭ sur alian, supozigas unuflanke ian agantan forton, kaj aliflanke ian pasivan sensivecon. En ĉiuj aferoj, du egalaj kontraŭaj fortoj sin neŭtrigas, kaj malforto cedas al forto. Nu, ĉar ne ĉiuj homoj estas dotitaj per sama fluideca energio, aŭ, alivorte, ĉar la perispirita fluido ne havas, ĉe ĉiuj homoj, saman agpotencon, tial estas al ni klarigite, kial ĉe unuj tiu potenco estas preskaŭ nerezistebla, dum ĉe aliaj ĝi estas nula; kial certaj personoj tre trafeflas por ĝia agado, dum aliaj estas al ĝi rezistaj.

Tiuj relativaj supereco kaj malsupereco evidente dependas de la organisma strukturo; sed oni erarus, kredante, ke ili estas rekte proporciaj al fortenco aŭ malfortenco fizikaj. La sperto pruvas, ke plej fortikaj homoj kelkfoje suferas fluidecajn influojn pli facile ol aliaj kun pli delikata kompleksio, dum ofte troveblas ĉe ĉi tiuj ia forto, kies ekziston ne supozigus ilia malfortika eksteraĵo. Plurmaniere klarigeblas tiu diverseco de agado.

La fluideca potenco aplikata al la agado de la homoj, unuj sur aliajn, tio estas, al la magnetismo, povas dependi: 1^e – de la kvanto da fluido,

Unua parto

kiun ĉiu posedas; 2^e – de la propra naturo de ĉies fluido, senkonsidere al la kvanto; 3^e – de la grado de energio de la impulsa forto; eĉ, eble, de la kuniĝo de tiuj tri kaŭzoj. En la unua okazo, tiu havanta pli da fluido ĝin liverus al tiu malpli havanta, kaj de ĉi tiu li ricevus en malpli granda kvanto; ĉi tie estus perfekta analogio kun la interŝanĝo de varmo inter du korpoj estiĝantaj en temperatura ekvilibro. Kia ajn estas la kaŭzo de tiu diferenco, ni povas kompreni ties efikon, supozante tri personojn, kies potencon ni figurus per la nombroj 10, 5 kaj 1. 10 efikus sur 5 kaj 1, sed pli forte sur 1 ol sur 5; 5 efikus sur 1 sed estus senefika sur 10; fine 1 efikus sur neniun el ambaŭ. Tia estus la kaŭzo, kial iuj subjektoj estas sensivaj al unu magnetizisto kaj nesensivaj al alia.

Oni ankaŭ povas, ĝis certa grado, klarigi tiun fenomenon surbaze de la supraj konsideroj. Ni efektive asertis, ke la individuaj fluidoj estas inter si simpatiaj aŭ malsimpatiaj. Nu, ĉu ne povus okazi, ke la reciproka agado inter du personoj estus en rilato al la simpatio inter la fluidoj, tio estas, al ties emo interkonfuziĝi pro iaspeca harmonio, simile al la sonondoj produktataj de la vibrantaj korpoj? Sendube tiu harmonio, aŭ simpatio, estas kondiĉo, se ne nepre necesa, tamen almenaŭ precipa, kaj, kiam estas malakordo aŭ malsimpatio, la agado ne povas ne montriĝi malfortefika aŭ eĉ nula. Tiu sistemo bone klarigas la antaŭajn kondiĉojn de agado; sed ĝi ne montras, sur kiu flanko troviĝas la forto, kaj ĝin akceptante ni estas devigitaj helpi nin per nia unua supozo.

Cetere, ĉu la fenomeno fariĝas pro unu aŭ alia el tiuj kaŭzoj, tio tiras nenian konsekvencon; la fakto ekzistas, jen kio gravas. Tiuj de la lumo same klariĝas per la teorio de la ondmovado; tiuj de la elektro per la fluidoj pozitiva kaj negativa, vitreca kaj rezineca.

En sekvanta studo, surbaze de la supraj konsideroj, ni provos difini, kion ni komprenas per fotografio kaj telegrafio de la penso.



Fotografio kaj Telegrafio de la Penso

La fotografio kaj telegrafio de la penso estas ĝis nun apenaŭ traktitaj demandoj. Kiel ĉiuj demandoj ne havantaj ligan kun tiuj leĝoj, kiuj pro sia esenco devas esti universale konataj, ili tiel same estas metitaj sur duan planon, kvankam ilia graveco estas granda kaj la studobjektoj, kiujn ili enhavas, kunhelpas por la klarigo de multaj ĝis nun ne solvitaj problemoj.

Kiam talenta artisto komponas bildon, majstroverkon al kiu li dediĉis sian tutan, laŭgrade akiritan genion, li unue formas la grandajn masojn, ke oni ekkomprenu, ekde la skizo, la tutan efekton, kiun li esperas eltiri. Nur post kiam li skrupule ellaboris sian ĝeneralan planon, li ekplenumas la detalojn, kaj kvankam ĉi tiun lastan parton li devas plenumi eble pli zorge ol la skizon, ĝi tamen al li estus neebla, se li ne antaŭe estus farinta la skizon. Same okazas rilate al Spiritismo. La fundamentaj leĝoj, la ĝeneralaj principoj, kies radikoj ekzistas en ĉiu kreitaĵo, ja ellaboriĝis ekde la origino. Ĉiuj ceteraj demandoj, kiaj ajn ili estas, dependas de la unuaj, kaj ja tiakaŭze oni, dum certa tempo, flankklasis ilian rektan studadon.

Efektive, oni ne povus logike paroli pri fotografio kaj telegrafio de la penso, ne antaŭe pruvinte la ekziston de la animo, kiu agigas la fluidecajn elementojn, kaj la ekziston de la fluido, kiuj ebligas la starigon de rilatoj inter du malsamaj animoj. Ankoraŭ hodiaŭ ni eble apenaŭ sufiĉe kleriĝis por definitiva ellaborado de tiel vastaj problemoj! Tamen, ĉi tie certe ne estas mislokita kelkaj konsideroj taŭgaj por prepari pli kompletan studon.

Enfermita en la limoj de siaj pensoj kaj aspiroj, la homo nepre bezonas konkretigi kaj etikedi ĉiujn aferojn por konservi pri ili takseblan

memoron kaj bazi sur la akiritaj donitaĵoj siajn estontajn studojn. Liaj unuaj scieroj venis al li per la vidosenso. Estis ja la bildo de iu objekto, kio al li instruis, ke tiu objekto ekzistas. Konante plurajn objektojn, eltirante deduktojn el la malsamaj impresoj, kiujn ili faris en la interno de lia memo, li fiksas ilian kvintesencon en sia intelekto per la fenomeno de la memoro. Nu, kio alia estas la memoro krom iaspeca albumo, pli aŭ malpli dika, kiun oni foliumas por retrovi viŝitajn ideojn kaj rearanĝi malaperintajn okazaĵojn? Tiu albumo havas markojn ĉe gravaj punktoj. Certajn faktojn oni tuj rememoras, sed longan foliumadon tamen postulas la rememoro pri aliaj.

La memoro estas kvazaŭ libro! Tiu, en kiu oni legas certajn lokojn, facile prezentas ilin al niaj okuloj; la virgajn aŭ malofte legitajn foliojn oni devas turni, unu post alia, por rebildigi fakton, kiun oni malmulte atentis.

Kiam enkarneĝinta Spirito memoras, lia memoro iel prezentas al li la fotografajon de la serĉata fakto. La enkarneĝintoj, kiuj lin ĉirkaŭas, ordinare vidas nenion; la albumo troviĝas en loko neatingebla por ilia vido; sed la Spiritoj ĝin vidas kaj foliumas kun ni. Ĉe certaj cirkonstancoj ili eĉ povas intence kunhelpi aŭ malhelpi nian serĉadon.

Kio fariĝas de enkarneĝinto al Spirito, tio same okazas de elkarneĝinto al vidiva mediumo. Kiam oni elvokas la memoron pri iuj faktoj de la ekzistado de iu Spirito, al li prezentiĝas la fotografajo de tiuj faktoj, kaj la vidiva mediumo, kies spirita stato estas analoga al tiu de libera Spirito, vidas kiel ĉi tiu, kaj ĉe kelkaj cirkonstancoj li eĉ vidas tion, kion la Spirito mem ne vidas, tiel same kiel elkarniĝinto povas foliumi la memoron de enkarneĝinto sen ties konscio kaj lin memori pri faktoj delonge forgesitaj. La abstraktaj pensoj, pro tio mem ke ili ekzistas, korpigiĝas por impresi la cerbon; ili devas nature agi sur ĉi tiun kaj en ĝi iel gravuriĝi. Ankoraŭ ĉi-okaze, same kiel en la unua, la simileco inter faktoj surteraj kaj transmondaj ŝajnas perfekta.

Ĉar la fenomenoj de fotografio de la penso jam estis objekto de iaj konsideroj en la *Revue*, ni ĉi tie, por plia klarigo, reproduktos kelkajn lokojn de la artikolo, kie la temo estis pritraktita, kaj kiun ni kompletigos per novaj konsideroj.

Ĉar la fluidoj estas la transigilo de la penso, ĉi tiu efikas sur la fluidojn tiel same kiel la sono sur la aeron; ili portas la penson kiel la aero al ni portas la sonon. Oni povas do laŭvere aserti, ke en la fluidoj estas ondoj kaj radioj de penso, kiuj senkonfuziĝe kruciĝas, same kiel estas sonaj ondoj kaj radioj en la aero.

Ankoraŭ pli: kreante *fluidecajn imagojn*, la penso rebildiĝas en la perispirita envolaĵo kvazaŭ en spegulo, aŭ ankoraŭ kvazaŭ tiuj bildoj de surteraj objektoj, kiuj reflektiĝas en la aervaporoj; tie la penso prenas korpon kaj iel *fotografiĝas*. Se ekzemple iu homo havas la ideon murdi alian, lia fluideca korpo, kiel ajn indiferenta restas lia materia korpo, estas agigata de tiu ideo, kies ĉiujn nuancojn ĝi reproduktas. Ĝi fluidece efektivigas la geston, la agon, kiun li intencas plenumi. Lia penso kreas la imagon de la viktimo, kaj la tuta sceno, kvazaŭ ĉe pentraĵo, bildiĝas tia, kia ĝi troviĝas en lia menso.

Estas ja tiel, ke la plej sekretaj movoj de la animo eĥiĝas en la fluideca envolaĵo; ke unu animo povas legi en alia animo kvazaŭ en libro kaj vidi tion, kio ne percepteblas por la korpaj okuloj. La okuloj de la korpo vidas la internajn impresojn, kiuj reflektiĝas en la fizionomiaj trajtoj: la koleron, la ĝojon, la malĝojon; sed la animo vidas sur la trajtoj de la animo tiujn pensojn, kiuj ne eksteriĝas.

Sed se la animo, vidante la intencon, povas antaŭsenti la efektivigon de la ago, kies sekvo ĝi estos, ĝi tamen ne povas determini la momenton de efektivigo nek precizigi ties detalojn, eĉ ne aserti, ke ĝi okazos, ĉar postaj cirkonstancoj povas modifi la aranĝitajn planojn kaj ŝanĝi la dispoziciojn. Ĝi ne povas vidi tion, kio ankoraŭ ne troviĝas en la penso; kion ĝi vidas, tio estas la zorgo, momenta aŭ kutima, de la persono, ties bonaj aŭ malbonaj intencoj. El tio fontas la eraroj en la antaŭvidoj de iuj vidivaj medioj. Kiam iu okazo estas subordigita al la libera volo de iu homo, ili povas nur antaŭsenti ĝian probablecon, laŭ la penso de ili vidata, sed ili ne povas aserti, ke ĝi okazos en tia maniero kaj en tia momento. La pli aŭ malpli granda ekzakteco en la antaŭvidoj cetere dependas de la amplekso kaj klareco de la psika vido. Ĉe iuj estuloj, elkarniĝintaj aŭ enkarniĝintaj, ĝi estas limita al iu punkto, aŭ disa, dum ĉe aliaj ĝi estas klara kaj ĉirkaŭprenas la tutajn de pensoj kaj volo, kiuj devas kunagi por la efektivigo de iu fakto. Sed super ĉio staras la supera volo, povanta en sia saĝeco konsenti aŭ malpermesi ian malkaŝon. En ĉi tiu lasta okazo, nepenetrebla vualo estas ĵetita sur la plej akran psikan vidadon. (Vidu, en *La Genezo*, la ĉapitron pri la *Antaŭscio*.)

La teorio pri la fluidecaj kreaĵoj kaj, sekve, pri la fotografio de la penso, estas konkero de la moderna Spiritismo kaj povas de nun esti konsiderata kiel principe fiksita, krom la detalaj aplikoj, kiuj devos rezulti el la observado. Tiu fenomeno nekontesteble estas la fonto de la fantaziaj vizioj kaj devas ludi grandan rolon en certaj sonĝoj.

Kiu sur la Tero scias la manieron, kiel ekestis la unuaj rimedoj por komunikado de la penso? Kiel ili estis inventitaj, aŭ pli ĝuste, eltrovitaj? Ĉar oni ja nenion inventas tial, ke ĉio ekzistas latente, kaj la homojn koncernas agigi la fortojn al ili disponigitajn de la Naturo. Kiu scias, kiom da tempo estis necesa al la homoj, ke ili uzu la parolon en tute komprenebla maniero?

Kiu la unua eligis neartikulacian krion, tiu ja havis ian konscion pri tio, kion li volis esprimi, sed la celitoj komence nenion komprenis; nur post paso de longa tempo ekestis konvenciaj vortoj, kiujn poste sekvis mallongaj frazoj kaj poste tutaj paroladoj. Kiom da jarmiloj ja necesis por ke la homaro atingu la punkton kie ĝi nun troviĝas! Ĉiu progreso en la komunikrimedoj, en la interrilatoj de la homoj, estis ĉiam signita per ia pliboniĝo en ilia socia stato. Laŭmezure kiel la individuaj rilatoj fariĝas pli streĉaj, pli regulaj, oni sentas la bezonon de ia lingvoformo nova, pli rapida, pli kapabla tuj kaj universale interkomunikigi la homojn, unuj kun aliaj. Kial tio okazanta en la fizika mondo, per la elektra telegrafio, ankaŭ ne fariĝus en la mondo morala, inter enkarniĝintoj, per la homa telegrafio? Kial la kaŝitaj rilatoj, kiuj pli aŭ malpli konscie interkomunikigas, per la spirita telegrafio, la pensojn de homoj kaj Spiritoj, ankaŭ ne ĝeneraligis inter la homoj en konscia maniero?

La homa telegrafio! Jen kio certe elvokas rideton ĉe tiuj, kiuj rifuzas akcepti ĉion, kio ne falas en la materiajn sensojn. Sed kion valoras la moko de la tromemfidaj? Iliaj neadoj ne estos baro al la agado de la naturaj leĝoj, nek al tio, ke oni eltrovu novajn aplikojn de tiuj leĝoj laŭmezure kiel la homa inteligento povos sperti iliajn efikojn.

La homo rekte agas tiel sur la aferojn kiel ankaŭ sur la personojn lin ĉirkaŭantajn. Ofte persono, kiun oni rigardas senvalora, havas decidan influon sur aliajn ĝuantajn pli altan ŝatatecon. Ĉi tion kaŭzas la fakto, ke sur la Tero oni pli valorigas maskojn ol vizaĝojn, kaj ke ĉi tie la okulojn nebuligas vantamo, persona intereso kaj ĉiuj malbonaj pasioj. La sperto pruvas, ke oni povas agi sur la spiriton de la homoj preter ilia konscio. Supera penso, *forte pensita*, se mi povas min tiel esprimi, povas do, laŭ sia forto kaj nobleco, funde aŭ supraĵe frapi la homojn, neniel konsciantajn la manieron kiel ĝi ilin atingas, kaj same ofte tiu, kiu ĝin elsendas, ne konscias la efikon estigitan de tiu elsendo. Temas pri ia konstanta ludado de la homaj estuloj kaj de ilia reciproka agado, unuj sur la aliajn. Al tio aldonu la agadon de la elkarniĝintoj kaj kalkulu, se vi povas, la nektaseblan potencon de tiu forto konsistanta el tiom da kunigitaj fortoj.

Fotografio kaj Telegrafio de la Penso

Se oni povus suspekti la senmezuran mekanismon funkciigatan de la penso, la efikojn, kiujn ĝi produktas de unu individuo al alia, de unu al alia grupo da estuloj, kaj fine la universalan agadon de ĉies pensoj, unuj sur la aliajn — tiam la homo ja miregus! Li sentus sin neniigita antaŭ tia senfina nombro da detaloj, antaŭ tiaj sennombraj retoj, interligitaj de potenca volo kaj harmonie agantaj por atingi unu solan celon: la universalan progreson.

Per la telegrafio de la penso, li taksos laŭ ĝia tuta valoro, la leĝon de solidareco kaj konsideros, ke ne estas unu sola penso, ĉu krima, ĉu virta, ĉu de ia alia speco, kiu ne efektive efikas tiel sur la tuton de la homaj pensoj kiel ankaŭ sur ĉiun el ili aparte. Kaj se egoismo igis lin ignori la sekvojn, ĉe alia persono, de unu sia propra malica penso, li de ĉi egoismo mem estos kondukata al bonaj pensoj por altigo de la ĝenerala morala nivelo, atentante la efikojn sur lin mem de aliula malbona penso.

Kio alia ja estas, krom efiko de la telegrafio de la penso, tiuj misteraj ŝokoj, nin avertantaj pri la ĝojo aŭ sufero de iu malproksima karulo? Ĉu ni ne ŝuldas al samnatura fenomeno la sentojn de simpatio aŭ de abomeno, kiuj al unuj Spiritoj nin altiras kaj de aliaj nin forpuŝas?

Tio certe prezentas vastegan kampon por studado kaj observado, de kiu ni tamen nur povas distingi la masojn; la studo de detaloj rezultos el pli kompleta konado de la leĝoj regantaj la agadon de la fluido, unuj sur la aliajn.



Studo pri la Naturo de la Kristo

I. Fontoj de la pruvoj pri la naturo de la Kristo

La demandon pri la naturo de la Kristo oni diskutadis ekde la unuaj jarcentoj de Kristanismo, kaj oni povas diri, ke ĝi ankoraŭ ne estas solvita, ĉar ĝia diskutado daŭras ĝis nun. La malkonsento de opinioj pri tiu temo naskis la pliparton de la sektoj, kiuj dividis la Eklezion antaŭ dek ok jarcentoj, kaj rimarkindas la fakto, ke ĉiuj estroj de tiuj sektoj estis episkopoj aŭ diverstitolaj membroj de la pastraro. Temis do pri kleraj homoj, pli parte verkistoj, instruitaj pri la teologia scienco, kiuj ne rigardis konkludigaj la argumentojn prezentitajn kiel apogon al la dieco de la Kristo. Tamen la opinioj, tiel hieraŭ kiel ankaŭ nun, formiĝis pli sur abstraktaĵoj ol sur faktoj; oni precipe provis scii, kiel akceptebla aŭ neracia estas la dogmo, kaj, tiel de unu flanko kiel de alia, oni ĝenerale neglektis la faktojn, kiuj povus verŝi definitivan lumon sur la demandon.

Sed kie trovi tiujn faktojn, krom en la agoj kaj paroloj mem de Jesuo?

Ĉar nenian skribon li postlasis, la solaj historiistoj pri Jesuo estas la apostoloj, kiuj mem ankaŭ nenion skribis dum lia vivo. Neniu profana historiisto, samtempa kiel li, parolis pri li, kaj pri lia vivo kaj doktrino ekzistas neniu alia dokumento krom la Evangelioj; nur tie do oni devas serĉi la ŝlosilon de la problemo. Ĉiuj postaj skriboj, ne esceptante tiujn de Sankta Paŭlo, estas nuraj, kaj tiaj ne povas ne esti, komentoj aŭ prijuĝoj, ia speguliĝo de personaj, ofte memkontraŭdiraj opinioj, kiuj neniokaze povus havi la aŭtoritaton de la rakonto de tiuj, kiuj la instruojn rekte ricevis de la Majstro mem.

Pri tiu demando, kiel cetere pri tiuj rilataj al la dogmoj entute, la akordo inter la Patroj de la Eklezio kaj aliaj religiaj verkistoj ne povus esti

elvokita kiel decidiga argumento nek kiel nerefutebla pruvo praviganta iliajn opiniojn, ĉar neniu el ili povis citi, ekster la Evangelio, unu solan fakton pri Jesuo, neniu el ili malkovris novajn dokumentojn, kiujn ne konus iliaj antaŭvenintoj.

La religiaj aŭtoroj povis nur turniĝi en unu sama rondo, eldiri personan prijuĝon, tiri sekvojn laŭ sia vidpunkto, komenti sub novaj formoj kaj en pli ampleksa maniero la inter si kontraŭdirajn opiniojn. Ĉiuj el unu sama partio devis skribi samsence, aŭ eĉ samforme, ĉar alie ili riskus esti deklaritaj herezuloj, kiel okazis al Origeno kaj multaj aliaj. La Eklezio kompreneble alkalkulis al la nombro de siaj Patroj nur tiujn verkistojn ortodoksajn laŭ sia vidpunkto; ĝi gloris, sanktigis kaj kolektis nur tiujn, kiuj ĝin defendis, dum la aliajn ĝi forpuŝis kaj kiel eble detruis ties skribojn. Neniel konkludiga estas do la akordo inter la Patroj de la Eklezio, kiu prezentas zorge aranĝitan unuanimecon, rezultintan el forigo de kontraŭaj elementoj. Se oni komparas ĉion, kion oni por kaj kontraŭ skribis, oni ja ne scius al kiu flanko klinus la pesilo.

Tio deprenas nenion de la persona merito de l' subtenantoj de la ortodokseco, nek de ilia valoro kiel verkistoj kaj konsciencaj homoj; ili estas advokatoj de unu sama afero, kiun ili defendis kun nekontestebla talento kaj kiuj do nepre devis fari samajn konkludojn. Tute ne celante ilin iel ajn nigrigi, ni nur volis refuti la valoron de la konsekvencoj, kiujn oni intencas tiri el ilia akordo.

En la ekzameno, kiun ni faros, de la demando pri la dieco de la Kristo, flankmetante la subtilaĵojn de la skolastiko, kiu al nenio servis krom ĝin konfuzmiksi anstataŭ klarigi, ni nin apogos ekskluzive al la faktoj, kiuj elstaras el la teksto de la Evangelio kaj kiuj, malvarme, skrupule kaj senpartie ekzamenataj, superabunde liveras ĉiujn konvinkrimedojn, kiun oni povas deziri.

Nu, el tiuj faktoj neniu estas pli decidiga kaj konkludiga ol la paroloj mem de la Kristo, kiujn parolojn neniu povus refuti, ne malkonfirmante la veremon de la apostoloj. Oni povas diversmaniere interpreti iun parabolon, iun alegorion; sed precizaj, ne ambiguaj, centfoje ripetitaj asertoj ne povus havi duoblan sencon. Neniu ajn povas pretendi scii, pli bone ol Jesuo, kion li volis diri, same kiel neniu povas pretendi esti pli bone informita ol li pri lia propra naturo. Se li komentas siajn parolojn kaj ilin eksplikas por eviti ĉian miskomprenon, oni ja al li devas do sin turni, krom se oni neus la superecon al li atribuitan kaj sin substituus al lia propra inteligenteco. Se li, pro la uzo de figursenca parolo, estis malklara pri

certaj punktoj, tamen pri tio koncernanta lian personon troveblas nenia eraro. Antaŭ ol ekzameni liajn parolojn, ni vidu liajn agojn.

II - Ĉu la mirakloj pruvas la diecon de la Kristo?

Laŭ la Eklezio, la dieco de la Kristo baziĝas sur la mirakloj, atestantaj pri supernatura povo. Ĉi tiu argumento povis havi ian pezon en epoko, kiam supernaturecon oni akceptis senekzamene; sed nun, kiam la Scienco etendis siajn esplorojn al la leĝoj de la Naturo, ja pli da nekredantoj ol da kredantoj renkontas la mirakloj, al kies diskreditigo ne malmulte kontribuas la trouzo de trompaj imitadoj kaj ties ekspluatado. La fido al mirakloj detruigis de ties uzado mem, el kio rezultis, ke multaj homoj nun rigardas tiujn de la Evangelio kiel nurajn legendojn.

Cetere, la Eklezio mem forprenis de la mirakloj ties tutan gravecon kiel pruvon de la dieco de la Kristo, deklarante, ke la demono tiajn povas fari tiel miregindajn kiel li: ĉar, se la demono havas tielan povon, evidentiĝas, ke tiaspecaj faktoj tute ne havas ekskluzive dian karakteron. Se li povas estigi miregindaĵojn, kiuj eĉ forlogus la elektitojn, kiel do simplaj mortemuloj povus distingi la bonajn miraklojn disde tiuj malbonaj? Kaj ĉu ne timindas, ke, vidante similajn faktojn, oni konfuzus Dion kaj Satanon?

Kontraŭmeti al Jesuo tiel kapablan konkuranton ja estus granda mallertaĵo; sed, koncerne kontraŭdirojn kaj senkonsekvencojn, oni tion ne tre atentis en epoko, kiam la fideluloj al si farus skrupulon pensi per si mem kaj pridiskuti la plej malgravan artikolon truditan al sia kredo. Oni tiam ne kalkulis kun la progreso nek konsideris, ke la regno de la blinda kaj naiva fido – ja komforta kiel tiu de arbitro – povos havi finon. La tiel superreganta povo, kiun la Eklezio obstine atribuis al la demono, kulturenis ruinigajn sekvojn por la fido, laŭgrade kiel la homoj sentis sin kapablaj vidi per siaj propraj okuloj. La demono, kiun oni dumtempe ekspluatis, fariĝis hakilego albatanta la malnovan kredokonstruaĵon krom ankaŭ unu el la kaŭzoj de nekredemo. Oni povas diri, ke la Eklezio, farinte el li nemalhaveblan helpanton, nutris en sia sino tiun, kiu ribelos kontraŭ ĝi kaj subfosos ĝiajn fundamentojn.

Estas alia ne malpli grava konsidero, nome ke la miraklaj okazaĵoj ne konstituas ekskluzivan privilegion de la kristana religio. Efektive ne ekzistas idola aŭ pagana religio, kiu ne havus siajn miraklojn, tiel mirindajn kaj tiel aŭtentajn por siaj adeptoj kiel tiuj de Kristanismo. La Eklezio seniĝis je la rajto ilin kontesti, atribuinte al la inferaj potencoj la povon ilin estigi.

Unua parto

En teologia senco, la esenca karaktero de miraklo konsistas en tio, ke ĝi estas escepto en la leĝoj de la Naturo kaj sekve neklarigeblas per tiuj leĝoj mem. Iu fakto ĉesas esti miraklo, se ĝi povas esti eksplikata kaj estas ligita al konata kaŭzo. Ja en tia maniero la eltrovoj de la Scienco enkondukis en la kampon de tio natura kelkajn efikojn, kiujn oni rigardis mirindaĵoj dum iliaj kaŭzoj restis nekonataj. Pli malfrue, la konado de la spirita principo, de la agado de la fluido sur la ekonomion, de la nevidebla mondo en kies sino ni vivas, de la kapabloj de la animo, de la ekzisto kaj proprecoj de la *perispirito*, liveris la ŝlosilon de la psikaj fenomenoj kaj pruvis, ke ĉi tiuj ne estas, pli ol aliaj, nuligoj de la leĝoj de la Naturo, sed ja ofte ties manifestiĝoj. Ĉiuj efikoj de magnetismo, somnambulismo, ekstazo, duobla vidado, hipnotismo, katalepsio, anestezio, transsendo de penso, antaŭscio, subitaj resaniĝoj, posedoj, obsedoj, aperaĵoj, transfiguriĝoj ktp, kiuj preskaŭ tute konsistigas la miraklojn de la Evangelio, apartenas al tiu kategorio de fenomenoj.

Oni nuntempe scias, ke tiuj fenomenoj rezultas el specialaj kapablecoj kaj psikologiaj dispozicioj; ke ili fariĝis en ĉiuj tempoj kaj ĉe ĉiuj popoloj, kaj estis rigardataj kiel supernaturaj sammotive kiel ĉiuj aliaj, kies kaŭzon oni ne sciis. Ĉi tio klarigis, kial ĉiuj religioj havis siajn miraklojn, kiuj estas nenio alia ol naturaj faktoj, preskaŭ ĉiam pligrandigitaj ĝisabsurde de kredemeco, senscienco kaj superstiĉo, sed kiujn la nunaj scioj reduktis al ties ĝusta valoro, ebligante ke de ili oni apartigu la legendan aspekton.

La eblecon de la plimultaj faktoj, kiujn la Evangelio prezentas okazigitaj de Jesuo, Magnetismo kaj Spiritismo nuntempe plene pruvas kiel naturajn fenomenojn. Ĉar ili fariĝas sub niaj okuloj, ĉu spontane, ĉu nenature, estas do nenio nenormala en tio, ke Jesuo havis samajn kapablojn kiel niaj magnetizistoj, resanigistoj, somnambuloj, klarvidantoj, mediumoj ktp. Se tiuj samaj kapablecoj troviĝas, en malsamaj gradoj, ĉe amaso da personoj neniel dinaturaj, eĉ ĉe herezuloj kaj idoloj, ili do tute ne implicas ian superhoman naturon.

Se Jesuo mem kvalitigis siajn farojn kiel *miraklojn*, tiel estis ĉar en tio, kiel en multaj aliaj aferoj, li devis alkonformigi sian parolon al la scioj de siaj samtempuloj. Kiel ĉi tiuj povus kapti nuancon de vorto, kiu ankoraŭ hodiaŭ ne estas de ĉiuj komprenata? Por la vulgarularo, estis mirakloj liaj eksterordinaraj faroj, kiuj en tiu tempo kaj eĉ pli malfrue ŝajnis supernaturaj; ne alian nomon li povus doni al ili. Estas rimarkinde, ke tian nomon li uzis, laŭ siaj esprimoj mem, por atesti pri la misio,

kiun li ricevis de Dio, sed li neniam ĝin elprofitis por al si mem atribui dian povon.¹⁵

Oni devas do forstreki la miraklojn el la pruvoj, sur kiuj oni volas fondi la diecon de la persono de la Kristo. Ni nun vidu, ĉu ili troveblas en liaj paroloj.

III - Ĉu la paroloj de Jesuo pruvas lian diecon?

Sin turnante al siaj disĉiploj, kiuj diskutadis inter si por scii, kiu el ili estas la plej granda, li prenis infanon, starigis lin apud si kaj diris al ili:

“Kiu min akceptos, tiu *akceptas Tiun, kiu min sendis*; ĉar kiu estas plej malgranda inter vi ĉiuj, tiu estas granda.” (Sankta Luko, 9:48.)

“Kiu akceptos unu el tiaj infanoj en mia nomo, tiu akceptas min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min sed *Tiun, kiu sendis min*.” (Sankta Marko, 9:37.)

“Jesuo diris al ili: Se Dio estus via Patro, vi min amus; ĉar de Dio mi elvenis, *kaj estas veninta; ĉar mi ne venis de mi mem, sed Li min sendis*.” (Sankta Johano, 8:42.)

“Jesuo do diris al ili: Ankoraŭ iom da tempo mi estas kun vi, kaj mi foriras al *Tiu, kiu min sendis*.” (Sankta Johano, 7:33.)

“Kiu vin aŭskultas, tiu min aŭskultas; kiu vin malŝatas, tiu min malŝatas; kaj *kiu min malŝatas, tiu malŝatas Tiun, kiu min sendis*.” (Sankta Luko, 10:16.)

La dogmo de la dieco de Jesuo estas fondita sur la absoluta egaleco inter lia persono kaj Dio, ĉar li mem estas Dio: ĉi tio estas kredartikolo. Nu, tiuj vortoj, tiel ofte ripetataj de Jesuo, *Tiu, kiu min sendis*, ne nur atestas pri dueco de personoj sed ankaŭ, kiel ni jam diris, forigas ian absolutan identecon inter ambaŭ, ĉar sendito nepre estas subordigita al sendinto. Obeante, li faras agon de *submetiĝo*. Ambasadoro, parolante pri sia suvereno, diros: *Mia sinjoro, tiu, kiu min sendas*; sed se la suvereno mem venas, li parolos en sia propra nomo kaj ne diros: *Tiu, kiu min sendis*, ĉar oni ne povas sin mem sendi. Jesuo tion kategorie asertas per jenaj vortoj: *mi ne venis de mi mem, sed Li min sendis*.

Ĉi tiuj vortoj: *Kiu min malŝatas, tiu malŝatas Tiun, kiu min sendis*, tute ne implicas egalecon kaj ankoraŭ des malpli identecon. En ĉiuj

¹⁵ Por kompleta disvolvo de la demando pri la mirakloj, vidu la verkon *La Genezo laŭ Spiritismo*, en la ĉap. XIII kaj sekvantaj, en kiuj estas eksplikitaj, per la naturaj leĝoj, ĉiuj mirakloj de la Evangelio.

Unua parto

tempoj, insulto kontraŭ ambasadoro estis konsiderata kiel farita kontraŭ la suvereno mem. La apostoloj havis la parolon de Jesuo tiel same, kiel Jesuo havis tiun de Dio. Kiam al ili li diras: *Kiu vin aŭskultas, tiu min aŭskultas*, li ne volis diri, ke liaj apostoloj kaj li kune konsistigas ununuran kaj saman personon, egalan en ĉio.

La dueco de personoj, kiel ankaŭ la stato de duarangeco kaj subordigiteco de Jesuo rilate al Dio, krome kaj nedubeble elstaras el la sekvantaj lokoj:

“Sed vi estas tiuj, kiuj restadis apud mi en miaj tentoj. — Kaj mi difinas por vi regnon, *kiel mia Patro difinis por mi*, por ke vi manĝu kaj trinku ĉe mia tablo en mia regno, kaj sidu sur tronoj, juĝante la dek du tribojn de Izrael.” (Sankta Luko, 22: 28 ĝis 30.)

“Mi parolos tion, kion mi vidis ĉe *mia Patro*; kaj vi ankaŭ faras tion, kion vi vidis ĉe via patro.” (Sankta Johano, 8:38.)

“Kaj nubo superombris ilin; kaj elvenis voĉo el la nubo: *Ĉi tiu estas Mia filo, la amata; aŭskultu lin.*” (Transfigurigo: Sankta Marko, 9:7.)

“Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; — kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; — kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn maldekstre. — Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: *Venu, vi benataj de mia Patro*, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo.” (Sankta Mateo, 25:31 ĝis 34.)

“Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ homoj, mi ankaŭ konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo; — sed kiu malkonfesos min antaŭ homoj, *tiun mi ankaŭ malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo.*” (Sankta Mateo, 10:32 kaj 33.)

“Kaj mi diras al vi: Ĉiun, kiu konfesos min antaŭ la homoj, *la Filo de homo ankaŭ konfesos antaŭ la anĝeloj de Dio*; — sed kiu malkonfesos min antaŭ la homoj, *tiu estos malkonfesita antaŭ la anĝeloj de Dio.*” (Sankta Luko, 12:8 kaj 9.)

“Car kiu hontos pri mi kaj pri miaj paroloj, pri tiu hontos la Filo de homo, kiam li venos en sia gloro, *kaj la gloro de la Patro kaj de la sanktaj anĝeloj.*” (Sankta Luko, 9:26.)

En ĉi tiuj du lastaj lokoj, eĉ ŝajnas, ke Jesuo starigas super si mem la sanktajn anĝelojn, kiuj konsistigas la ĉielan tribunalon, ĉe kiu li estus la defendanto de la bonaj kaj akuzanto de l' malbonaj.

Studo pri la Naturo de la Kristo

“Sed sidi dekstre de mi kaj maldekstre, *tion doni ne apartenas al mi*, sed ĝi estas *por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita de mia Patro*.” (Sankta Mateo, 20:23.)

“Kaj kiam la Fariseoj jam kunvenis, Jesuo ilin demandis, dirante: Kion vi pensas pri la Kristo? kies filo li estas? Ili diris al li: De David. — Li diris al ili: Kial do David, en la Spirito, lin nomas Sinjoro: Sidu dekstre de Mi, ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj? — *Se do David nomas lin Sinjoro, kiel li estas lia filo?*” (Sankta Mateo, 22:41 ĝis 45.)

“Kaj responde Jesuo diris, instruante en la Templo: Kiel diras la skribistoj, ke la Kristo estas filo de David? David mem diris per la Sankta Spirito: Sidu dekstre de Mi, ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj? — *David mem nomas lin Sinjoro: kaj kiel do li estas lia filo?*” (Sankta Marko, 12:35 ĝis 37; Sankta Luko, 20:41 ĝis 44.)

Per tiuj vortoj Jesuo sankcias la principon de la hierarkia diferenco ekzistanta inter la Patro kaj la Filo. Li povis esti filo de David laŭ korpa deveno, kiel ido de sia gento, pro kio li zorgis aldoni: “Kial li, *en la Spirito*, lin nomas Sinjoro?” Se ekzistas ia hierarkia diferenco inter la patro kaj la filo, Jesuo do, kiel filo de Dio, ne povas esti egala al Dio.

Li konfirmas tiun interpreton kaj rekonas sian malsuperecon rilate al Dio per vortoj allasantaj nenian dubon.

“Vi aŭdis, ke mi diris al vi: Mi foriras, kaj mi revenas al vi. Se vi min amus, vi ĝojus pro tio, ke mi iras al la Patro, ĉar la Patro **ESTAS PLI GRANDA OL MI**.” (Sankta Johano, 14:28.)

“Kaj jen unu viro, veninte al li, diris: Bona Majstro, kion mi faru, por ke mi heredu eternan vivon? Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? *neniu estas bona krom Unu, nome Dio*. Sed se vi deziras eniri en la vivon, observu la ordonojn.” (Sankta Mateo, 19:16 kaj 17; Sankta Marko, 10:17 kaj 18; Sankta Luko, 18:18 kaj 19.)

Jesuo ne nur ne prezentis sin, en ia ajn cirkonstanco, kiel egalan al Dio, sed ja, kiel en ĉi tiu okazo, pozitive asertas la malon, nome li sin rigardas malsupera al Dio laŭ boneco. Nu, deklari, ke Dio superas lin per sia povo kaj siaj moralaj kvalitoj, estas aserti, ke li mem ne estas Dio. La sekvantaj lokoj apogas ĉi tiujn lastajn kaj ankaŭ mem estas sufiĉe eksplicitaj.

“*Ĉar mi ne parolis de mi mem; sed la Patro, kiu sendis min, mem ordonis al mi, kion mi parolu, kaj kion mi diru*. — Kaj mi scias, ke Lia ordono estas eterna vivo; kion do mi parolas, *ĝuste kiel la Patro diris al mi*, tiel mi parolas.” (Sankta Johano, 12:49 kaj 50.)

Unua parto

“Jesuo respondis al ili kaj diris: *Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis.* — Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado, ĉu ĝi estas de Dio, aŭ ĉu mi parolas nur el mi mem. — Kiu parolas el si mem, tiu celas sian propran gloron; sed kiu celas la gloron de Tiu, kiu lin sendis, tiu estas verema, kaj maljusteco ne estas en li.” (Sankta Johano, 7:16 ĝis 18.)

“Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; *kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis.*” (Sankta Johano, 14:24.)

“Ĉu vi ne kredas, ke mi estas en la Patro kaj la Patro en mi? la vortojn, kiujn mi parolas al vi, mi parolas ne de mi mem; sed la Patro, restanta en mi, faras Siajn farojn.” (Sankta Johano, 14:10.)

“La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos. Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, *nek la Filo, sed nur la Patro.*” (Sankta Marko, 13:31 kaj 32; Sankta Mateo, 24:35 kaj 36.)

“Jesuo do diris: Kiam vi levos la Filon de homo, tiam vi scios, ke mi estas, kaj ke *mi ne faras ion per mi mem; sed kiel la Patro instruis min, tion mi parolas.* Kaj Tiu, kiu min sendis, estas kun mi; Li ne lasis min sola; ĉar *mi ĉiam faras tion, kio plaĉas al Li.*” (Sankta Johano, 8:28 kaj 29.)

“Ĉar mi malsupreniris de la ĉielo, por plenumi ne mian volon, *sed la volon de Tiu, kiu min sendis.*” (Sankta Johano, 6:38.)

“*Mi ne povas per mi mem fari ion; kiel mi aŭdas, tiel mi juĝas; kaj mia juĝo estas justa, ĉar mi celas ne mian propran volon, sed la volon de Tiu, kiu min sendis.*” (Sankta Johano, 5:30.)

“Sed la atesto, kiun mi havas, estas pli granda ol la atesto de Johano; ĉar la laboroj, kiujn *la Patro donis al mi por fini,* tiuj samaj laboroj, kiujn mi faras, atestas pri mi, ke la Patro min sendis.” (Sankta Johano, 5:36.)

“Sed nun vi celas mortigi min, homon, kiu parolis al vi la veron, *kiun mi aŭdis de Dio; tion Abraham ne faris.*” (Sankta Johano, 8:40.)

Se li diras *nenion de si mem;* se la doktrino, kiun li instruas, estas *ne lia* sed al li donita de Dio, kial li ordonis ĝin diskonigi; se li faras nur tion, kion por fari Dio donis al li povon; se la veron, kiun li instruas, li lernis de Dio, al kies volo li estas submetita, li do ne estas Dio sed nur lia sendito, lia mesio kaj lia subulo.

Neeblus al li, en pli pozitiva maniero, rifuzi ĉian asimiliĝon al la persono de Dio kaj difini, per pli precizaj vortoj, sian ĉefan rolon. En ili ne estas pensoj kaŝitaj sub la vualo de alegorio, eltroveblaj ne alimaniere ol per helpo de interpretoj: temas ja pri proprasencaj, neambiguaj esprimoj.

Se oni objektas, ke Dio, ne volante sin konigi en la persono de Jesuo, iluziigis pri sia individueco, oni povus demandi sur kio estas fondita tia opinio kaj kiu havas aŭtoritaton por sondi la fundon de lia penso kaj doni al liaj paroloj sencon kontraŭan al tio, kion ili esprimas. Ĉar, dum la vivo de Jesuo, neniu lin konsideris Dio, sed kontraŭe oni rigardis lin kiel mesion, al li do sufiĉus nenion diri, se li ne volus, ke oni konu lin tia, kia li ja estis. Oni devas do konkludi, el liaj spontanaj asertoj, aŭ ke li ne estis Dio, aŭ se li tia vere estus, ke li vole kaj senutile diris malveron.

Rimarkindas, ke Sankta Johano, tiu el la Evangeliistoj sur kies aŭtoritato oni pleje apogis por starigi la dogmon de la dieco de la Kristo, estas ĝuste tiu, kiu enkolektas la plej multajn kaj pozitivajn kontraŭargumentojn. Pri tio oni povas konvinkiĝi, legante la sekvantajn lokojn, kiuj, kvankam ili nenion aldonas al la jam menciitaj pruvoj, tamen ja ĉi tiujn apogas, ĉar el tiuj lokoj evidente elstaras *la dueco kaj la neegaleco de la personoj*:

“Kaj la Judoj persekutis Jesuon pro tio, ke li tion faris en sabato. — Sed Jesuo respondis al ili: *Mia Patro ĝis nun laboras, kaj mi laboras.*” (Johano, 5:16 kaj 17.)

“Ĉar la Patro juĝas neniun, sed Li donis ĉian juĝon al la Filo, — por ke ĉiuj honoru la Filon tiel same, kiel ili honoras la Patron. Kiu ne honoras la Filon, tiu ne honoras la Patron, *kiu lin sendis.*”

“Vere, vere, mi diras al vi: Kiu aŭskultas mian vorton kaj kredas al Tiu, *kiu min sendis*, tiu havas eternan vivon kaj ne venas en juĝon, sed jam pasis de morto en vivon.”

“Vere, vere, mi diras al vi: Venas horo kaj jam estas, kiam la mortintoj aŭdos la voĉon de la Filo de Dio; kaj la aŭdintoj vivos. Ĉar kiel la Patro havas en Si mem vivon, tiel Li donis al la Filo ankaŭ, ke ĉi tiu havu en si mem vivon; — kaj Li donis al li *la rajton fari juĝon*, ĉar li estas la Filo de homo.” (Johano, 5:22 ĝis 27.)

“Kaj la Patro, kiu min sendis, atestis pri mi. *Vi nek aŭdis iam Lian voĉon*, nek vidis Lian formon. — Kaj vi ne havas Lian vorton restantan en vi, ĉar vi ne kredas *al tiu, kiun Li sendis.*” (Johano, 5:37 kaj 38.)

“Tamen, eĉ se mi juĝas, mia juĝo estas vera; ĉar *mi ne estas sola*, sed mi kaj la Patro, kiu min sendis.” (Johano, 8:16.)

“Tion Jesuo parolis; kaj levinte la okulojn al la ĉielo, li diris: Patro la horo venis; gloru Vian Filon, por ke la Filo Vin gloru; — *kiel Vi donis al li aŭtoritaton* super ĉiu karno, por ke li donu eternan vivon al ĉiuj tiuj, kiujn

Unua parto

Vi donis al li. — Kaj jen estas la eterna vivo, ke ili konu *Vin*, LA SOLE VERAN DION, *kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuon Kriston.*

Mi gloris Vin sur la tero, *plenuminte* la faron, kiun Vi donis al mi por fari. Kaj nun, ho Patro, gloru min kun Vi, per la gloro, kiun mi havis kun Vi, antaŭ ol la mondo ekzistis.”

“Mi jam ne estas en la mondo, kaj ĉi tiuj estas en la mondo, *kaj mi venas al Vi.* Patro Sankta, gardu en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni.”

“Mi donis al ili *Vian vorton*; kaj la mondo malamis ilin, ĉar ili ne estas el la mondo, kiel mi ne estas el la mondo.”

“Konsekru ilin en la vero; Via vorto estas vero. — Kiel Vi *min sendis* en la mondon tiel ankaŭ mi ilin sendis en la mondon. — Kaj por ili mi konsekras min, por ke ili mem ankaŭ estu konsekritaj en la vero.”

“Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; — por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; *por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis.*”

“Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas, ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili vidu mian gloron, kiun *Vi donis al mi*; ĉar *Vi amis min antaŭ la fondo de la mondo.*”

“Ho Patro justa, la mondo Vin ne konis, tamen mi Vin konis; kaj ĉi tiuj scias, ke *Vi min sendis*; — kaj al ili Vian nomon mi konigis kaj ankoraŭ konigos, *por ke la amo, per kiu Vi amis min*, estu en ili, kaj mi en ili.” (Johano, 17:1 ĝis 5, 11, 14, 17 a 21, 24 a 26: *Preĝo de Jesuo.*)

“Pro tio la Patro min amas, ke mi demetas mian vivon, por ke mi ĝin reprenu. — Neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole. Mi havas la rajton ĝin demeti, kaj mi havas la rajton ĝin repreni. *Ĉi tiun ordonon mi ricevis de mia Patro.*” (Johano, 10:17 kaj 18.)

“Oni do forprenis la ŝtonon. Kaj Jesuo levis siajn okulojn, kaj diris: *Patro, mi dankas Vin, ke Vi min aŭskultis.* — Kaj mi sciis, ke Vi ĉiam aŭskultas min; sed pro la ĉirkaŭstaranta homamaso mi tion diris, por ke ili kredu, ke *Vi min sendis.*” (Sankta Johano, 11:41 kaj 42: *Morto de Lazaro.*)

“De nun mi jam ne multe parolos kun vi; ĉar la estro de la mondo venas; *kaj li havas nenion en mi*; sed por ke la mondo sciu, ke mi amas la Patron, kaj kiel *la Patro ordonis al mi, tiel mi faras.*” (Johano, 14:30 kaj 31.)

“Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia amo tiel same, *kiel mi observis la ordonojn de mia Patro* kaj restadas en Lia amo.” (Johano, 15:10.)

Studo pri la Naturo de la Kristo

“Kaj kriinte per laŭta voĉo, Jesuo diris: Patro, *en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton*; kaj tion dirinte, li ellasis for la spiriton.” (Sankta Luko, 23:46.)

Ĉar Jesuo, mortante, transdonas sian animon en la manojn de Dio, li do havis animon diferencon de Dio, submetitan al Dio. *Li do ne estis Dio.*

La sekvantaj vortoj atestas ian homan malfortecon, ian antaŭtimon rilate al la morto kaj la suferoj, kiujn Jesuo estis spertonta, kio kontrastas kun la esence dia naturo, kiun oni al li atribuas. Sed ili same atestas ian submetiĝon de subulo al superulo.

“Tiam venis Jesuo kun ili al loko nomata Getsemane, kaj diris al siaj disĉiploj: Sidiĝu ĉi tie, dum mi iros tien, por preĝi. — Kaj li prenis kun si Petron kaj la du filojn de Zebedeo, *kaj komencis malĝoji kaj maltrankviliĝi.* — Tiam li diris al ili: *Tre malĝoja estas mia animo, eĉ ĝis morto*; restu ĉi tie, kaj viglu kun mi. — Kaj irinte iom antaŭen, li falis sur sian vizaĝon, preĝante, kaj dirante: *Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko pasu for de mi*; tamen ne kiel mi volas, sed *kiel Vi volas.* — Kaj li venis al la disĉiploj kaj trovis ilin dormantaj, kaj diris al Petro: Ĉu vi do ne havis forton vigli kun mi eĉ unu horon? — Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton; la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta. — Denove la duan fojon foririnte, li preĝis, dirante: *Ho mia Patro, se ĉi tio ne povos forpasi, krom se mi trinkos ĝin, Via volo plenumiĝu.*” (Sankta Mateo, 26:36 ĝis 42: Jesuo en la Olivarba Ĝardeno.)

“Kaj li diris al ili: *Tre malĝoja estas mia animo, eĉ ĝis morto*; restu ĉi tie, kaj viglu. — Kaj irinte iom antaŭen, li falis sur la teron, kaj preĝis, ke, se povas esti, *la horo pasu for de li.* — Kaj li diris: *Aba, Patro, ĉio estas ebla ĉe Vi: forportu de mi ĉi tiun kalikon*; tamen estu ne tio, kion mi volas, sed kion Vi volas.” (Sankta Marko, 14:34 ĝis 36.)

“Kaj veninte al la loko, li diris al ili: Preĝu, ke vi ne eniru en tenton. — Kaj li iris for de ili proksimume ŝtonĵeton, kaj li genuis, kaj preĝis, dirante: *Patro, se Vi volas, formetu de mi ĉi tiun kalikon*; tamen plenumiĝu *ne mia volo, sed Via.* Kaj aperis antaŭ li anĝelo el la ĉielo, fortigante lin. Kaj estante en agonio, li preĝis pli fervore, kaj lia ŝvito fariĝis kiel gutoj da sango, defalantaj sur la teron.” (Sankta Luko, 22:40 ĝis 44.)

“Kaj ĉirkaŭ la naŭa horo Jesuo ekkriis per laŭta voĉo, dirante: *Eli, Eli, lama sabaĥtani? tio estas: Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?*” (Sankta Mateo, 27:46.)

“Kaj je la naŭa horo Jesuo kriis per laŭta voĉo: *Eloi, Eloi, lama sabaĥtani; tio estas: Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?*” (Sankta Marko, 15:34.)

Unua parto

La sekvantaj lokoj povus allasi ian necertecon kaj kredigi pri ia identeco de Dio kun la persono de Jesuo; sed krom tio, ke ili ne povus superstari la precizecon de la ĵus antaŭaj, ili ankaŭ portas en si mem sian propran ĝustigon.

“Ili do diris al ili: Kiu vi estas? Jesuo diris al ili: *Laŭ tio, kion mi diradis al vi de la komenco. Mi havas multon por diri kaj juĝi pri vi; sed Tiu, kiu min sendis, estas vera; kaj tion, kion mi aŭdis de Li, mi parolas al la mondo.*” (Sankta Johano, 8:25 kaj 26.)

“Mia Patro, kiu donis ilin al mi, superas ĉion; kaj neniu povas ion forkapti el la mano de mia Patro. *Mi kaj la Patro estas unu.*” (Sankta Johano, 10:29 kaj 30.)

Tio signifas, ke lia Patro kaj li *estas unu ne alie, ol per la penso*, ĉar li esprimas la *person* de Dio, li havas la *parolon* de Dio.

“Tiam la Judoj denove prenis ŝtonojn, por ŝtonmortigi lin. Jesuo respondis al ili: Multajn bonajn farojn mi montris al vi de mia Patro; pro kiu el ili vi volas ŝtonmortigi min? La Judoj respondis: Ne pro bona faro ni volas ŝtonmortigi vin, sed pro blasfemo, kaj ĉar vi, estante homo, pretendas esti Dio. Jesuo respondis: Ĉu ne estas skribite en via leĝo: Mi diris: Vi estas dioj? Se li nomis dioj tiujn, al kiuj venis la vorto de Dio (kaj la Skribo ne povas esti nuligita), ĉu vi diras pri tiu, kiun la Patro konsekris kaj sendis en la mondon: Vi blasfemas; ĉar mi diris: Mi estas Filo de Dio? Se mi ne faras la farojn de mia Patro, ne kredu al mi. Sed se mi faras ilin, kvankam vi ne kredas al mi, kredu la farojn, por ke vi sciu kaj komprenu, ke la Patro estas en mi, kaj mi en la Patro.” (Sankta Johano, 10:31 ĝis 38.)

En alia ĉapitro, parolante al siaj disĉiploj, li diras:

“En tiu tago vi scios, ke *mi estas en mia Patro, kaj vi en mi, kaj mi en vi.*” (Sankta Johano, 14:20.)

El tiuj vortoj oni nepre ne konkludu, ke Dio kaj Jesuo estas *unu*, ĉar alie oni devus ankaŭ konkludi, el tiuj samaj vortoj, ke la apostoloj kaj Dio ankaŭ estas *unu*.

IV - Paroloj de Jesuo post sia morto

“Jesuo diris al ŝi: Ne tuŝu min; ĉar mi ankoraŭ ne supreniris al la Patro; sed iru al *miaj fratoj, kaj diru al ili: Mi supreniras al mia Patro kaj via Patro, kaj al MIA DIO kaj via Dio.*” (Sankta Johano, 20:17: *Apero al Maria Magdalena.*)

“Kaj Jesuo venis al ili kaj diris al ili: *Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero.*” (Sankta Mateo, 28:18: *Apero al la Apostoloj.*)

Studo pri la Naturo de la Kristo

“Vi estas atestantoj pri tio. — Kaj jen mi elsendos sur vin *“la promeson de mia Patro.”* (Sankta Luko, 24:48 kaj 49: *Apero al la Apostoloj.*)

Ĉio do vidigas, en la paroloj de Jesuo, ĉu dum lia vivo, ĉu post lia morto, ian duecon de personoj perfekte distingigaj, krom ankaŭ la profunda sento de lia malsupereco kaj subeco rilate al la superega Estulo. Pro sia insistado tion spontane aserti, sen al tio esti de iu ajn devigita aŭ instigita, li ŝajne volis jam antaŭe protesti kontraŭ la rolo, pri kiu li antaŭvidis, ke oni ĝin atribuos al li. Se li prisilentus la karakteron de sia personeco, li lasus tiun kampon malfermita al ĉiuj supozoj kaj al ĉiuj sistemoj. Sed la precizeco de lia parolo forigas ĉian necertecon.

Kiu pli granda aŭtoritato povas ekzisti, ol la paroloj mem de Jesuo? Kiam li kategorie asertas: mi estas, aŭ mi ne estas tio, kiu kuraĝus arogi al si la rajton dementi lin, eĉ se por loki lin pli alte, ol li mem sin lokas? Kiu povas pravigeble pretendi pli klare kompreni sian propran naturon, ol li mem? Kiaj interpretoj povas superstari asertojn tiel formalajn kaj multobligitajn kiel ĉi tiuj:

“Ĉar mi ne venis de mi mem, sed Tiu, kiu min sendis, estas vera. — Ĉar de Dio mi estas veninta. — Mi parolas tion, kion mi vidis ĉe mia Patro. — Tion doni ne apartenas al mi, sed ĝi estas por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita de mia Patro. — Mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas pli granda ol mi. — Kial vi nomas min bona? neniuj estas bona krom Unu, nome Dio. — Ĉar mi ne parolis de mi mem; sed la Patro, kiu sendis min, mem ordonis al mi, kion mi parolu, kaj kion mi diru. — Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis. — Kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis. — Mi ne faras ion per mi mem; sed kiel la Patro instruis min, tiel mi parolas. — Mi ne povas per mi mem fari ion. — Mi plenumas ne mian volon, sed la volon de Tiu, kiu min sendis. — Mi parolis al vi la veron, kiun mi aŭdis de Dio. — Mia nutraĵo estas plenumi la volon de Tiu, kiu min sendis. — Vi, kiu estas la sole vera Dio, kaj tiu, kiun vi sendis, Jesuo Kristo. — Patro, en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton. — Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko pasu for de mi. — Mi supreniras al mia Patro kaj via Patro, kaj al mia Dio kaj via Dio.”

Kiam oni legas tiajn vortojn, oni demandas al si, kiel nur povis veni al ies penso, doni al ili sencon rekte kontraŭan al tiu, kiun ili tiel klare esprimas, koncepti ian kompletan identiĝon, de *naturu* kaj de *potenco*, inter la mastro kaj tiu, kiu sin deklaras lia servisto. En tiu granda proceso, daŭranta jam dek kvin jarcentojn, kiuj estas la pruvopecoj? La Evangelioj — neniuj aliaj ekzistas — kiuj, ĉe la diskutata objekto, allasas

nenian dubon. Al aŭtentaj dokumentoj, kiujn oni ne povas kontesti sen prinei la verecon de la Evangelioj kaj de Jesuo mem, dokumentoj bazitaj sur vidatestaĵoj, kion oni kontraŭmetas? Ian teorion doktrinon, pure spekulativan, naskitan, post tri jarcentoj, de ia polemiko pri la abstrakta naturo de la Vorto, doktrinon, kiun oni vigle kontraŭbatalis dum pluraj jarcentoj kaj kiu superstaris nur pro la premo de ia absoluta civila povo.

V - Duobla naturo de Jesuo

Oni povus objeti, ke pro la duobla naturo de Jesuo liaj paroloj esprimis liajn sentojn kiel homo, ne kiel Dio. Ne ekzamenante nun, per kia interĉeno de cirkonstancoj oni estis kondukitaĵ, multe pli malfrue, al la hipotezo pri tiu duobla naturo, ni momente ĝin konsentu kaj vidu, ĉu ĝi, anstataŭ klarigi la demandon, ĉi tiun ne komplikas ĝis nesolvebleco.

Kio devis esti homa en Jesuo, tio estis la korpo, la parto materia, kaj el tiu vidpunkto oni komprenas, ke li povis, eĉ devis, suferi kiel homo. Kio en li devis esti dia, tio estis la animo, la Spirito, la penso, unuvorte la spirita parto de la Estaĵo. Se li sentis kaj suferis kiel homo, li devis pensi kaj paroli kiel Dio. Ĉu li parolis kiel homo aŭ kiel Dio? En tio kuŝas grava demando pro la escepta aŭtoritateco de lia instruado. Se li parolis kiel homo, liaj paroloj estas diskutablaj; se kiel Dio, ili estas nediskutablaj, oni devas akcepti ilin kaj al ili alkonformiĝi, ĉar alie oni kulpus defalon kaj herezon. La plej ortodoksa estos tiu, kiu al ili pli alproksimiĝos.

Ĉu oni diros, ke sub sia korpa envolvaĵo Jesuo ne konscis sian dian naturon? Se tiel estus, li ne estus mem *pensinta kiel Dio*, lia dia naturo estintus en latentata stato; nur la homa naturo direktintus lian mision, liajn moralajn agojn, same kiel liajn agojn materiajn. Estas do neeble abstrakti lian dian naturon dum lia vivo, ne malfortigante lian aŭtoritaton.

Sed se li *parolis kiel Dio*, kial tiu senĉesa protestado kontraŭ sia dia naturo, kiun, en tia okazo, li ne povus ignori? Li do trompiĝis, kio maltre dia estus; aŭ li konscie trompis, kio ankoraŭ malpli dia estus. Al ni ŝajnas neeble eliri el tiu dilemo.

Se oni akceptas, ke li parolis, jen kiel homo, jen kiel Dio, la demando komplikiĝas pro la neebleco distingi tion, kio venis de la homo, de tio, kio venis de Dio.

Se li havintus motivojn por kaŝi sian veran naturon dum sia misio, la plej simpla rimedo estus ne paroli pri ĝi aŭ sin esprimi, kiel li faris en aliaj cirkonstancoj, sub formo svaga kaj parabola pri tiuj punktoj, kies

konado estis rezervita por la estonteco. Nu, tia ne estas ĉi tie la okazo, ĉar la ĉi-koncernaj paroloj prezentas nenian ambiguecon.

Fine, se, malgraŭ ĉiuj ĉi tiuj konsideroj, oni ankoraŭ povus supozi, ke li dumvive ne sciis sian veran naturon, tia opinio ne plu akcepteblus post lia releviĝo, ĉar, kiam li aperas al siaj disĉiploj, tiam jam ne estas la homo, kiu parolas, sed la Spirito liberiĝinta el la materio kaj ja reakirinta la plenecon de siaj spiritaĵoj kaj la konscion pri sia normala stato, pri sia identeco kun Dio. Sed ĝuste tiam li diris: *Mi supreniras al mia kaj via Patro, al mia kaj via Dio!*

La subordigitecon de Jesuo ankaŭ montras lia karaktero mem de peranto, kio implicas la ekziston de ia malsama persono. Estas li, kiu propetas Dion; kiu sin ofertas por elaĉeto de pekuloj. Nu, se li estas mem Dio, aŭ se li *en ĉio estas egala* al Dio, li ne bezonus propeti, ĉar neniu propetas sin mem.

VI - Opinio de la Apostoloj

Ĝis ĉi tie ni nin ekskluzive apogis sur la paroloj mem de la Kristo, kiel nediskutebla elemento de konvinko, ĉar ekster tio povas ekzisti nenio krom personaj opinioj.

El ĉiuj tiuj opinioj, la plej valoraj nekontesteble estas tiuj de la apostoloj, konsiderante, ke ili helpis lin en lia misio kaj ke, se li donis al ili sekretajn instruojn koncernantajn al lia naturo, oni ja trovus ties postsignojn en iliaj skriboj. Vivante en intimeco kun li, ili devis lin koni pli bone ol iu ajn. Ni do vidu, kiel ili rigardis lin.

“Izraelidoj, aŭskultu la jenajn vortojn: *Jesuo, la Nazaretanon, viron de Dio, elmontritan al vi per potencaĵoj kaj mirakloj kaj signoj, kiujn Dio faris per li meze de vi, kiel vi mem scias, — lin, laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio* transdonitan, vi per la manoj de senleĝuloj krucumis kaj mortigis; — *lin Dio levis*, malliginte la suferojn de morto, ĉar estis neeble, ke li estu tenata de ĝi. — Ĉar David diris pri li: Ĉiam mi vidis la Eternulon antaŭ mi, ĉar Li estas ĉe mia dekstra mano, por ke mi ne falu; — tial ĝojis mia koro, raviĝis mia lango, eĉ mia karno ripozas en espero; — ĉar Vi ne lasos mian animon al Ŝeol, Vi ne permesos, ke Via sanktulo forputru. — Vi konigis al mi la vojojn de la vivo, Vi plenigos min per ĝojo antaŭ Vi.” (*La Agoj de la Apostoloj*, 2: 22 ĝis 28. Prediko de Sankta Petro.)

“Levite do ĝis dekstre de Dio, kaj *ricevinte de la Patro la promeson de la Sankta Spirito*, li elverŝis tion, kion vi vidas kaj aŭdas. — Ĉar David ne supreniris en la ĉielojn; — sed li mem diris: *La Eternulo diris al mia Sinjoro*: sidu dekstre de Mi, — ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por

Unua parto

viaj piedoj. — Kun certeco do sciu la tuta domo de Izrael, *ke tiun Jesuon, kiun vi krucumis, Dio faris Sinjoro kaj Kristo.*” (*La Agoj de la Apostoloj*, 2:33 ĝis 36. Prediko de Sankta Petro.)

“Ĉar Moseo diris: *Profeton el viaj fratoj, similan al mi, starigos por vi la Eternulo, via Dio*; lin aŭskultu pri ĉio ajn, kion li al vi parolos. — Kaj ĉiu animo, kiu ne aŭskultos tiun profeton, ekstermiĝos el la popolo.

Al vi unue Dio, *relevinte Sian Servanton*, sendis lin, por vin beni, deturante ĉiun el vi for de liaj pekoj.” (*La Agoj de la Apostoloj*, 3:22, 23 kaj 26. Prediko de Sankta Petro.)

“Estu sciate al vi ĉiuj kaj al la tuta popolo Izraela, ke en la nomo de *Jesuo Kristo, la Nazaretano*, kiun vi krucumis, *kiun Dio levis el la mortintoj*, ĉi tiu staras sana antaŭ vi.” (*La Agoj de la Apostoloj*, 4:10. Prediko de Sankta Petro.)

“Leviĝis la reĝoj de la tero, kaj la regantoj kolektiĝis kune, kontraŭ la *Eternulo* kaj kontraŭ *Lia Sanktoleito*; — ĉar vere en ĉi tiu urbo kolektiĝis kontraŭ *Via Sankta Servanto Jesuo*, kiun vi sanktoleis, kune Herodo kaj Pontio Pilato kun la gentoj kaj la popoloj de Izrael, por fari ĉion, kion *Via mano* kaj *Via intenco* antaŭdifinis.” (*La Agoj de la Apostoloj*, 4:26 ĝis 28. Preĝo de la Apostoloj.)

“Tiam Petro kaj la apostoloj responde diris: Oni devas obei Dion prefere ol homojn. — La Dio de niaj patroj *levis Jesuon, kiun vi pereigis, pendigante lin sur lignaĵo.* — *Lin altigis Dio per Sia dekstra mano*, por esti Estro kaj Savanto, por doni al Izrael penton kaj pardonadon de pekoj.” (*La Agoj de la Apostoloj*, 5:29 ĝis 31. Respondo de la Apostoloj al la ĉefpastro.)

“Ĝi estis tiu Moseo, kiu diris al la Izraelidoj: *Profeton el viaj fratoj, similan al mi*, starigos por vi la Eternulo, via Dio. Tamen la Plejaltulo ne loĝas en manfaritaj temploj, kiel diris la profeto: — La ĉielo estas Mia trono, kaj la tero estas mia benketeto; Kian domon vi konstruos por Mi? diras la Eternulo; Kaj kia estas la loko por Mia ripozo?” (*La Agoj de la Apostoloj*, 7:37, 48 kaj 49. Parolado de Stefano.)

“Sed li, plena de la Sankta Spirito, rigardis fikse al la ĉielo, kaj vidis la gloron de Dio, kaj *Jesuon starantan dekstre de Dio*, kaj diris: Jen mi vidas la ĉielon malfermitan kaj la *Filon de homo starantan dekstre de Dio*.

Sed ili ekkriis per laŭta voĉo, kaj fermis siajn orelojn, kaj kuregis sur lin unuanime, kaj elpelis lin el la urbo, kaj ĵetis sur lin ŝtonojn; kaj la atestantoj demetis siajn vestojn apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo (poste Paŭlo). — Kaj ili ŝtonmortigis Stefanon, vokantan kaj dirantan: *Jesuo, Sinjoro, akceptu mian spiriton.*” (*La Agoj de la Apostoloj*, 7:55 ĝis 59. Martirigo de Stefano.)

Ĉi tiuj tekstoj klare atestas la karakteron, kiun la apostoloj atribuis al Jesuo. La ekskluziva ideo, el ili elfluanta, estas tiu pri lia subordigiteco al Dio, pri la konstanta superregado de Dio, tiel ke nenio tie montras ian penson pri ajna asimiliĝo, laŭ naturo kaj potenco. Por ili Jesuo estis *homo profeto*, elektita kaj benita de Dio. Ne do inter la apostoloj naskiĝis la kredo al la dieco de Jesuo. Sankta Paŭlo, kiu ne konis Jesuon sed kiu el arda persekutanto fariĝis la plej fervora kaj la plej elokventa disĉiplo de la nova kredo, kaj kies skriboj preparis la unuajn formularojn de la kristana religio, ne estas ĉi-rilate malpli eksplicita. Regas ĉe li tiu sama sento pri du distingigaj estuloj kaj pri la superregado de la Patro super la filo.

“Paŭlo, servisto de Jesuo Kristo, apostolo vokita, apartigita al la evangelio de Dio, — kiun Li promesis antaŭe per Siaj profetoj en la sanktaj skriboj, — pri Sia Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno, — la difinita Filo de Dio en potenco laŭ la Spirito de sankteco per la releviĝo de la mortintoj — Jesuo Kristo, nia Sinjoro, — per kiu ni ricevis gracon kaj apostolecon por obeemo de fido ĉe ĉiuj nacioj pro lia nomo, — inter kiuj estas ankaŭ vi, vokitaj de Jesuo Kristo; — al ĉiuj, kiuj estas en Romo, amataj de Dio, vokitaj sanktuloj: *Graco al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj la Sinjoro Jesuo Kristo.*” (*Romanoj*, 1:1 ĝis 7.)

“Tial ni, pravigite per fido, havu pacon *kun Dio per nia Sinjoro Jesuo Kristo.*

“Ĉar kiam ni ankoraŭ estis senfortaj, tiam Kristo *ĝustatempe* mortis pro malpiuloj.

“Des pli multe do ni, jam pravigite per lia sango, estos *per li savitaj el la kolero.*

“Kaj krom tio ni fieras ankaŭ *en Dio pro nia Sinjoro Jesuo Kristo*, per kiu ni jam ricevis la repacigon.

“Sed ne kia la eraro, tia estas la donaco. Ĉar se per la eraro de unu mortis la multaj, des pli multe abundis al la multaj la graco de Dio kaj la donaco per la graco *de la unu homo Jesuo Kristo.*

“Ĉar se, per la eraro de la unu, morto reĝis per unu, des pli multe reĝos en vivo *per la unu Jesuo Kristo* tiuj, kiuj ricevis abundon de la graco kaj de la donaco de justeco.” (*Romanoj*, 5:1, 6, 9, 11, 15 kaj 17.)

“Kaj se idoj, tial heredantoj, HEREDANTOJ de Dio, KUNHEREDANTOJ kun Kristo, se vere ni suferas kun li, por ke ni estu glorataj kun li.” (*Romanoj*, 8:17.)

“Ĉar se vi per via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro, kaj kredas en via koro, ke *Dio lin levis el la mortintoj*, vi saviĝos.” (*Romanoj*, 10:9.)

Unua parto

“Poste venos la fino, *kiam li transdonos la reĝecon al Dio, al la Patro*; kiam li estos neniiginta ĉian regadon kaj ĉian aŭtoritaton kaj potencon. — Ĉar li devas reĝadi, ĝis li metos ĉiujn malamikojn sub siajn piedojn. — La lasta neniigota malamiko estas la morto. Ĉar: Ĉion Li metis sub liajn piedojn. Sed kiam estas dirate: Ĉio estas submetita, estas evidente, *ke esceptita estas Tiu, kiu submetis ĉion al li*. — Kaj kiam ĉio estos submetita al li, *tiam la Filo ankaŭ mem estos submetita al Tiu, kiu submetis ĉion al li*, por ke Dio estu ĉio en ĉio.” (*I.Korintanoj*, 15:24 ĝis 28.)

“Sed la malmulte sub la anĝeloj malaltigitan Jesuon ni vidas, pro la sufero de morto, kronita per honoro kaj beleco, por ke per la favoro de Dio li gustumu morton por ĉiu. — Ĉar konvenis al Li, por kiu ĉio estas, kaj de kiu ĉio estas, alkondukanta multajn filojn al gloro, *perfektiĝi per suferado la estron de ilia savo*.

Ĉar la sanktiganto kaj la sanktigatoj estas ĉiuj el unu; pro tiu kaŭzo li ne hontas nomi ilin *fratoj*, — dirante: Mi predikos Vian nomon al miaj fratoj, en la mezo *de popola kunveno* mi Vin gloros. — Kaj ankaŭ: Mi fidos Lin. Kaj ankaŭ: Jen mi kaj *la infanoj, kiujn Dio donis al mi*.

“Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj, por ke li fariĝu kompatema kaj fidela ĉefpastro *en la aferoj de Dio*, por fari repacigon por la pekoj de la popolo. — Ĉar per tio, ke li mem, tentate, suferis, li povas helpi la tentatojn.” (*Hebreoj*, 2:9 ĝis 13, 17 kaj 18.)

“Tial, fratoj sanktaj, partoprenantaj en ĉiela voko, pripensu *la Apostolon kaj Ĉefpastron* de nia konfeso, Jesuon, — kiu estis fidela *al Tiu, kiu nomis lin* kiel ankaŭ Moseo en Lia domo. — Ĉar ĉi tiu *estas rigardita* kiel inda je tiom pli granda gloro ol Moseo, kiom pli grandan honoron, ol la domo, havas ĝia stariginto. Ĉar ĉiu domo estas starigita de iu; *sed la stariginto de ĉio estas Dio*.” (*Hebreoj*, 3:1 ĝis 4.)

VII - Antaŭdiroj de la profetoj koncernantaj Jesuon

Krom la asertoj de Jesuo kaj la opinio de la apostoloj, estas atesto, kies valoron la plej ortodoksaj kredantoj ne povus kontesti, ĉar ili ĝin prezentas kiel kredartikolon: nome tiu de Dio mem, tio estas, tiu de la profetoj parolantaj sub inspiro kaj anoncantaj la venon de la Mesio. Nu, jen la lokoj de la Biblio konsiderataj kiel antaŭdiro pri tiu granda evento.

“Mi vidas lin, sed ne nun; mi rigardas lin, sed ne proksime. Eliros stelo el Jakob, kaj leviĝos sceptro el Izrael, detruos la randojn de Moab kaj frakosas ĉiujn filojn de malordo.” (*Nombroj*, 24:17.)

“Profeton mi starigos por ili *el la mezo de iliaj fratoj*, similan al vi; kaj Mi metos Miajn vortojn en lian buŝon, *kaj li parolos al ili ĉion, kion Mi ordonos al li*. Kaj se iu homo ne aŭskultos Miajn vortojn, *kiujn li parolos en Mia nomo*, tiun Mi punos.” (*Readmono*, 18:18 kaj 19.)

“Kiam finiĝos viaj tagoj kaj vi iros al viaj patroj, Mi starigos post vi vian idon, kiu estos *el viaj filoj*; kaj Mi fortikigos lian regnon. Li konstruos por mi domon; kaj Mi fortikigos lian tronon por ĉiam. *Mi estos al li patro, kaj li estos al Mi filo*; kaj Mian favorkorecon Mi ne deturnos de li tiel, kiel Mi deturnis de tiu, kiu estis antaŭ vi. Kaj Mi starigos lin en Mia domo kaj en Mia regno por ĉiam; kaj lia trono estos fortikigita por eterne.” (*I Kronikoj*, 17:11 ĝis 14.)

“Tial la Sinjoro mem donos al vi signon: jen virgulino gravediĝis, kaj ŝi naskos filon, kaj ŝi donos al li la nomon Emanuel.” (Jesaja, 7:14.)

“Ĉar infano naskiĝis al ni, filo estas donita al ni, kaj la regado estos sur lia ŝultro, kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco, Princo de Paco.” (Jesaja, 9:6.)

“Jen estas *Mia servanto*, kiun Mi apogas, *Mia elektito, kiun favoras Mia animo. Mi metis Mian spiriton sur lin*; li disportos justecon al la nacioj. Li ne krios nek bruos, kaj ne aŭdiĝos sur la stratoj sian voĉon. Kanon rompetitan li ne rompos, kaj meĉon senfajriĝantan li ne estingos. Laŭ la vero li faros juĝon. Li ne laciĝos nek fleksiĝos, ĝis li starigos sur la tero justecon; kaj lian instruon atendas la insuloj.” (Jesaja, 42:1 ĝis 4.)

“La laborfrukton de sia animo li vidos, kaj satiĝos. Per konigo de li *Mia virtulo-servanto* virtigos multajn; kaj iliajn pekojn li portos sur si.” (Jesaja, 53:11.)

“Ĝoju forte, ho filino de Cion, triumfu, ho filino de Jerusalem: jen via reĝo iras al vi; justa kaj helpema li estas, humila kaj rajdanta sur azeno, sur ido de azenino. Ĉar Mi ekstermos ĉarojn ĉe Efraim kaj ĉevalojn en Jerusalem, kaj ekstermita estos milita pafarko; li proklamos pacon al la nacioj, kaj lia regado estos de maro ĝis maro, de la Rivero ĝis la finoj de la tero.” (Zeharja, 9:9 kaj 10.)

“Li (la Kristo) stariĝos kaj paŝtos kun la forto de la Eternulo, kun la majesto de la nomo de la *Eternulo, lia Dio*, kaj tiuj konvertiĝos; ĉar tiam li fariĝos granda ĝis la randoj de la tero.” (Miĥa, 5:4.)

La distingo inter Dio kaj lia estonta sendito estas la plej formale karakterizita. Dio lin nomas *sia servanto*, sekve sia subulo. Troveblas nenio en liaj paroloj, kio implicus la ideon de potencegaleco, nek de konsubstancieco inter ambaŭ personoj. Ĉu Dio trompiĝis, kaj ĉu la homoj, venintaj *tri jarcentojn* post Jesuo, vidis pli ĝuste ol li? Tia ŝajnas esti ilia pretendo.

VIII - La Vorto fariĝis karno

“En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. — Tiu estis en la komenco kun Dio. — Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. — En li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. — Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis.

De Dio estis sendita viro, kies nomo estis Johano. — Tiu venis kiel atestanto, por atesti pri la lumo, por ke ĉiuj per li kredu. — Li ne estis la lumo, sed li venis, por atesti pri la lumo.

Tio estis la vera lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon. Tiu estis en la mondo, kaj la mondo per li estiĝis, kaj la mondo lin ne konis. — Li venis al siaj proprajoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis. — Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio.

Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.” (Johano, 1:1 ĝis 14.)

Tiu loko el la Evangelioj estas la sola, kiu unuavide ŝajnas implicite enhavi ian ideon pri identeco inter Dio kaj la persono de Jesuo; ĝi ankaŭ estas tiu, sur kiu pli malfrue baziĝis la diskutado pri tiu objekto. La demando pri la Dieco de Jesuo nur grade estiĝis; ĝi naskiĝis el diskutoj leviĝintaj pri interpretoj, kiujn iuj donis pri la vortoj *Vorto* kaj *Filo*. Nur en la kvara jarcento ĝin principe adoptas unu parto de la Eklezio. Tiu dogmo do rezultis ne el dia revelacio sed el homa decido.

Antaŭ ĉio rimarkindas, ke la suprecititajn parolojn diris Johano, ne Jesuo, kaj eĉ se oni akceptas, ke ili ne suferis ŝanĝojn, ili tamen efektive esprimas nenion alian ol personan opinion, ian indukton, en kiu retroveblas la kutima mistikeco de liaj paroloj, kiuj do ne povus superstari la multfoje ripetatajn asertojn de Jesuo mem.

Sed ilin akceptante tiaj, kiaj ili estas, oni per ili neniel solvas la demandon koncerne la diecon, ĉar ili same aplikiĝas al Jesuo kiel kreito de Dio.

Efektive, la *Vorto* estas Dio, ĉar ĝi estas la vorto de Dio. Rekte ricevinte de Dio tiun vorton kaj la mision ĝin revelacii al la homoj, Jesuo ĝin asimilis; la vorto de Dio, de kiu li estis penetrita, enkarniĝis en li; li kunportis ĝin de la naskiĝo, kaj tial Johano povis prave aserti: *La Vorto*

fariĝis karno kaj loĝis inter ni. Jesuo povis do esti komisiita transsciigi la vorton de Dio, ne estante mem Dio, same kiel ambasadoro transsciigas la vorton de sia suvereno, ne estante mem suvereno. Laŭ la dogmo de la dieco, estas Dio, kiu parolas; laŭ alia hipotezo, li parolas per la buŝo de sia sendito, kio nenion forprenas el la aŭtoritateco de liaj paroloj.

Sed kiu rajtigas tiun supozon, prefere ol tiun alian? La sola kompetenta aŭtoritato por solvi la demandon estas la vortoj mem de Jesuo, kiam li diras: “*Ĉar mi ne parolis de mi mem; sed la Patro, kiu sendis min, mem ordonis al mi, kion mi diru; — mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis; la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis.*” Ne eblas esprimiĝi pli klare kaj precize.

La kvalitigo *Mesio* aŭ *sendito* al li donita en la tuta elvolviĝo de la Evangelioj implicas pozicion de subulo rilate al tiu, kiu ordonas; kiu obeas, ne povas esti egalulo de tiu, kiu estras. Johano karakterizas tiun duarangan pozicion kaj sekve starigas la duecon de personoj, dirante: “*Kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro*”; ĉar kiu ricevas, ne povas egali tiun, kiu donas, kaj kiu donas la gloron, ne povas esti egala al tiu, kiu ĝin ricevas. Se Jesuo estas Dio, li posedas la gloron per si mem kaj atendas ĝin de neniu; se Dio kaj Jesuo estas unu sola estulo sub du malsamaj nomoj, inter ambaŭ povus ekzisti nek superregado nek subordigiteco; se ne estas absoluta egaleco de pozicio, ili do estas du malsamaj estuloj.

La kvalitigo *dia Mesio* ne implicas egalecon pli grandan inter komisiito kaj komisiinto, ol implicas tiu de *reĝa sendito* inter reĝo kaj ties reprezentanto.

Jesuo estis dia mesio pro la duobla motivo, ke de Dio li ricevis sian mision kaj ke liaj perfektaĵoj lin metis en rekta rilato kun Dio.

IX - Filo de Dio kaj filo de homo

La titolo *Filo de Dio*, anstataŭ ke ĝi implicus egalecon, pli ĝuste indikas submetiĝon; nu, oni estas submetita al iu, ne al si mem.

Por ke Jesuo estu absolute egala al Dio, necesus, ke li estu ekzistanta, kiel Dio, de la tuta eterneco, nome ke li estu *nekreita*; nu, la dogmo tekstas, ke Dio lin *naskis* de la tuta eterneco, sed kiu diras *naskis*, diras *kreis*; ĉu tio estus, aŭ ne, de la tuta eterneco, li ne povus ne esti ia kreito kaj, kiel tia, submetita al sia Kreinto. Ja tia ideo estas implicite enhavata en la vorto *Filo*.

Ĉu Jesuo estis naskita en la tempo? Alivorte: ĉu estis tempo, en la pasinta eterneco, kiam li ne ekzistis? aŭ male li estis kuneterna kun la Patro? Tiaj estas la subtilaĵoj, pri kiuj oni diskutadis tra la jarcentoj. Sur kia aŭtoritato sin apogas la doktrino de la kuneterneco, pasinta al la stato de dogmo? Sur la opinio de homoj, kiuj ĝin starigis. Sed sur kia aŭtoritato tiuj homoj bazis sian opinionon? Ja ne sur tiu de Jesuo, ĉar li deklaris sin submetita; ankaŭ ne sur tiu de la profetoj, kiuj lin anoncis kiel senditon kaj servanton de Dio. En kiuj nekonataj dokumentoj, pli aŭtentaj ol la Evangelioj, ili trovis tiun doktrinon? Verŝajne en sia konscienco kaj en la supereco de siaj propraj lumoj.

Ni lasu do tiujn vanajn diskutojn, kiuj al nenio kondukus kaj kies solvo mem, se ĝi estus ebla, ne farus pli bonaj la homojn. Ni diru, ke Jesuo estas *Filo de Dio* kiel ĉiuj kreitoj; li nomas lin sia Patro, kiel li al ni instruis nomi Dion *nia Patro*. Li estas la *plejamata Filo de Dio*, ĉar, atinginte la perfektecon, kiu proksimigas al Dio, li ĝuas lian tutan konfidon kaj lian tutan amon; li sin deklaras *unusola Filo* ne tial, ke li estus la sola atinginta tiun gradon, sed ĉar li estis la sola antaŭdestinita plenumi tiun mision sur la Tero.

Se la kvalitigo *Filo de Dio* ŝajnis apogi la doktrinon de la dieco, ne same okazis kun tiu de *Filo de homo*, kiun Jesuo al si donis dum sia misio kaj kiu fariĝis objekto de multaj komentarioj.

Por kompreni ĝian veran sencon, necesas reiri al la Biblio, kie ĝi estas donita de Dio mem al la profeto Jeĥezkel.

“Kaj Li diris al mi: Ho *filo de homo*, starigu sur viaj piedoj, kaj Mi parolos al vi. — Kaj kiam Li parolis al mi, venis en min spirito kaj starigis min sur miaj piedoj; kaj mi aŭskultis Tiun, kiu parolis al mi. Kaj Li diris al mi: Ho *filo de homo*, Mi sendas vin al la Izraelidoj, al la defalintaj gentoj, kiuj defalis de Mi; ili kaj iliaj patroj perfidis min ĝis la nuna tago.” (Jeĥezkel, 2:1 ĝis 3.)

“Kaj vidu, ho *filo de homo*, oni metos sur vin ŝnurojn kaj ligos vin per ili, kaj vi ne povos eliri inter ilin.” (*Same*, 3:25.)

“Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: — Ho *filo de homo*, tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, pri la tero de Izrael: Fino venis, la fino por ĉiuj kvar randoj de la lando.” (*Same*, 7:1 kaj 2.)

“Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo en la naŭa jaro, en la deka monato, en la deka tago de la monato, dirante: — Ho *filo de homo*! enskribu al vi la nomon de ĉi tiu tago, ĝuste de ĉi tiu tago; la reĝo de Babel atingis Jerusalemon ĝuste en ĉi tiu tago.” (*Same*, 24:1 kaj 2.)

“Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: — Ho filo de homo! jen per plago Mi forprenos de vi tion, kio estas plej kara por viaj okuloj; sed vi ne plendu, kaj ne ploru, kaj ne elfluigu larmojn. — Ĝemu mallaŭte; funebran ceremonion ne faru, sed vian kapornamon metu sur vin, kaj viajn ŝuojn metu sur viajn piedojn, ne kovru vian buŝon, kaj ne manĝu panon de funebrantoj. — Mi parolis al la popolo matene, kaj vespere mortis mia edzino; kaj en la sekvanta tago mi agis tiel, kiel estis ordonite al mi.” (*Same*, 24:15 ĝis 18.)

“Kar aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: — Ho filo de homo, profetu pri la paŝtistoj de Izrael, profetu, kaj diru al ili, al la paŝtistoj: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la paŝtistoj de Izrael, kiuj paŝtas sin mem! ĉu ne la ŝafojn devas paŝti la paŝtistoj?” (*Same*, 34:1 kaj 2.)

“Kaj mi aŭdis, ke Iu parolas al mi el la domo, kaj viro staris apud mi. Kaj estis dirite al mi: — Ho filo de homo! jen estas la loko de Mia trono, kaj la loko de la plandoj de Miaj piedoj, kie Mi loĝos eterne inter la Izraelidoj; kaj la domo de Izrael ne plu malpurigos Mian sanktan nomon, nek ili nek iliaj reĝoj, per sia malĉastado kaj per la kadavraĵoj de siaj reĝoj sur iliaj altaĵoj.” (*Same*, 43:6 kaj 7.)

“Ĉar Dio ne minacas kiel homo kaj ne furiozas kiel la *Filo de homo*.” (Judit, 8:15.)

Estas evidente, ke la kvalitigo *Filo de homo* ĉi tie signifas: *kiu naskiĝas de homo*, kontraste al tio, kio estas ekster la homaro. La lasta citaĵo, prenita el la libro de Judit, allasas nenian dubon pri la signifo de tiu esprimo, uzita en tre laŭlitera senco. Nur per tia esprimo Dio nomas Jeĥezkelon, certe por lin atentigi, ke, malgraŭ la kapablo de profetado al li donita, li ĉiam ankoraŭ restas apartenanta al la homaro, kaj ankaŭ por ke li ne rigardu sin homo de escepta naturo.

Jesuo donas al si mem tian kvalitigon kun rimarkinda persisto, ĉar nur en tre maloftaj cirkonstancoj li sin nomas *Filo de Dio*. En lia buŝo, ĝi povas havi ne alian signifon, ol memorigi, ke ankaŭ li apartenas al la homaro; li tiel similigas sin al la profetoj, kiuj lin antaŭvenis kaj kun kiuj li sin komparis, kiam, aludante sian morton, li diras: JERUSALEM, KIU MORTIGAS LA PROFETOJN! Lia insistado sin nomi filo de homo ŝajnas anticipa protesto kontraŭ tiu kvalitigo, pri kiu li antaŭvidis, ke oni pli malfrue donos ĝin al li, por ke tiel restu klare pruvite, ke ĝi ne eliris el lia buŝo.

Rimarkindas, ke dum tiu senfina polemiko, kiu pasiigis la homojn dum longa sinsekvo da jarcentoj kaj ankoraŭ plu daŭras, kiu bruligis

ŝtiparojn kaj fluigis riverojn da sango, oni disputadis pri ia abstraktaĵo, nome la naturo de Jesuo, el kiu oni faris angulŝtonon de la konstruaĵo, kvankam li nenion parolis pri tio; kaj ke unu aferon oni forgesis, nome tiun, pri kiu la Kristo asertis, ke ĝi estas *la tuta leĝo kaj la profetoj*: la amo al Dio kaj al la proksimulo, kaj la karitato, kiun li starigis kiel nepran kondiĉon de savo. Oni tro insistadis pri tiu demando, nome la afineco de Jesuo al Dio, kaj oni tute silentis pri la virtoj, kiujn li rekomendis kaj pri kiuj li donis ekzemplojn.

Dio mem forviŝiĝis ĉe la trea glorado de la persono de la Kristo. En la simbolo de Niceo estas simple dirite: Ni kredas je unu sola Dio, ktp; sed kia estas tiu Dio? Nenia mencio estas tie farita pri liaj esencaj atributoj: la superega boneco kaj la superega justeco. Tiaj vortoj ja estintus la kondamno de tiuj dogmoj agnoskantaj lian partiecon rilate al certaj personoj, lian neelpeteblecon, lian ĵaluzon, lian koleron, lian venĝeman spiriton, al kiuj dogmoj oni sin apogas por pravigi la kruelaĵojn faritajn en lia nomo.

Se la simbolo de Niceo, kiu fariĝis la fundamento de la katolika kredo, estis laŭ la spirito de la Kristo, kial ĝi finiĝas per anatemo? Ĉu tio ne estas pruvo, ke ĝi fontas el homa pasio? Al kio cetere atribui ĝian adopton? Al la premo de la imperiestro Konstanteno, kiu el ĝi faris demandon pli politikan ol religian. Sen lia ordono, ne okazintus la Nicea Konsilio; sen lia timigado, Arianismo tre probable venkus. Dependis do de la superega aŭtoritato de homo, kiu ne apartenis al la Eklezio, kiu pli malfrue rekonis sian publike faritan eraron kaj kiu vane provis ĝin ripari per repacigo de la partioj, ke ni estas ne arianoj, sed katolikoj, ke Arianismo ne prezentas la ortodoksecon, kaj ke katolikismo ne estas herezo.

Post dek ok jarcentoj da luktoj kaj vanaj disputoj, dum kiuj oni tute flankmetis la plej esencajn el la instruoj de la Kristo, la solajn, kiuj povus certigi pacon al la homaro, oni estas laca de tiaj sterilaj diskutoj, kiuj nur alportis perturbojn, naskis nekredemon kaj kies objekto ne plu kontentigas la racion.



Pereiga Influado de la Materiismaj Ideoj

Pri la artoj ĝenerale kaj ilia regenerado per Spiritismo

Legiĝas ĉe *Kuriero el Parizo de la Ilustrita Mondo*, de la 19^a de Decembro 1868:

“Carmouche skribis pli ol ducent komediojn kaj vodevilojn, kaj en nia tempo oni apenaŭ scias lian nomon. Tiel estas, ĉar terure efemeris la dramista gloro, kiu tiom ekscitas la avidon. Krom se oni aŭtoris eminentajn ĉefverkojn, oni estas kondamnita vidi sian nomon fali en forgeson, tuj post kiam oni ĉesas aktivi. Eĉ dum aktivado mem, oni restas nekonata de la plimulto. Rigardante afiŝon, la publiko efektive nur atentis la titolon de la teatraĵo; malmulte gravas la nomo de ĝia verkinto. Provu prezenti al vi la nomon de tiu, kiu skribis tian aŭ tian ĉarman verkon, kies memoron vi konservis; al vi estos preskaŭ ĉiam neeble respondi. Kaj ju pli pluen ni iros, des pli tiel estos, ĉar la materialaj zorgoj ĉiam pli kaj pli substituiĝas al la artismaj interesoj.

“Ĝuste pri tiu temo Carmouche rakontis tipan anekdoton. Mi konversaciis, li diris, kun mia librobokantisto pri lia malgranda komerco, kaj li tiel sin esprimis: “Ĝi ne malbone statas, sinjoro, sed ĝi ŝanĝiĝas; ne plu vendiĝas la samaj artikloj. Iam, kiam dekokjarulo venis al mi, tio estis naŭfoje en dek por peti min pri rimvortaro; hodiaŭ li venas serĉe de gvidlibro por borsaj operacioj.”

La materialaj zorgoj ja substituiĝas al la artismaj interesoj, sed ĉu alie povus esti, kiam oni penas koncentri ĉiujn pensojn de l' homo sur

la karnan vivon kaj detrui en li ĉian esperon, ĉian aspiron trans la nuna ekzistado? Tia estas logika, neevitebla sekvo por tiu, kiu nenion vidas ekster la malvasta rondo de la nuna vivo. Kiam oni vidas nenion malantaŭ, antaŭ aŭ super si, sur kion ja povas koncentriĝi la penso krom nur sur la punkton, en kiu oni troviĝas? La sublimateco de la arto sidas en la poezieco de la idealo, kiu nin eksteren transportas el la malvasta sfero de niaj aktivecoj; sed la idealo troviĝas ĝuste en tiu ekstermateria regiono, en kiun oni ne penetras krom per la penso, kiun la imago konceptas, sed kiun la korpaj okuloj ne perceptas; nu, kian inspiron povas ĉerpi la spirito el la ideo de la nenio?

Ĉu la pentristo, kiu nur vidintus la bruman ĉielon, la aridajn kaj monotonajn stepojn de Siberio kaj kiu kredus, ke tie troviĝas la tuta universo, ĉu li povus koncepti kaj priskribi la brilon kaj la tonriĉecon de la tropika naturo? Kiel vi volas, ke viaj artistoj kaj viaj poetoj transportu vin en regionojn, kiujn ili ne vidas per la okuloj de la animo, kiujn ili ne komprenas kaj kiujn ili eĉ ne kredas?

La spirito povas identiĝi nur kun tio, pri kio li scias, aŭ kredas, ke ĝi estas veraĵo, kaj tiu veraĵo, eĉ se morala, fariĝas por li realaĵo, kiun li des pli bone esprimas ju pli bone li ĝin sentas; nu, se al la kompreno de la afero li aligas la flekseblecon de la talento, tiam li transigas siajn proprajn impresojn en aliulajn animojn; sed kiajn impresojn povas estigi tiu, kiu da ili havas neniom?

Por materialisto la realaĵo estas la Tero: lia korpo por li estas ĉio, tial ke ekstere nenio ekzistas, ĉar lia penso mem estingiĝas kun la diseriĝo de la materio, same kiel fajro kaj brulaĵo. Li povas esprimi per la lingvo de arto nur tion, kion li vidas kaj sentas; nu, se li vidas kaj sentas nur la palpeblan materion, li do nenion alispecan povas transigi. Kie li nur vidas la malplenon, tie li ja nenion povas ĉerpi. Se li sin ĵetas en tiun al li nekonsatan mondon, li tien eniras kiel blindulo, kaj, malgraŭ siaj penoj por altiĝi agorde al idealismo, li tamen ĉiam restas ĉe prozeco, kiel birdo senflugila.

La dekadenco de la artoj, en ĉi tiu jarcento, estas la neevitebla rezulto el la koncentriĝo de la pensoj sur la materialajn aferojn, kaj tiu koncentriĝo siavice rezultis el la manko de ĉia kredo al la spirita naturo de la estulo. La jarcento rikoltas nur tion, kion ĝi semis. *Kiu semas ŝtonojn, ne povas fruktojn rikolti.* La artoj eliros el sia torporo nur per ia reago en direkto al la spiritualismaj ideoj.

Kaj kiel povus pentristo, poeto, literatoro, muzikisto ligi siajn nomojn al daŭraj verkoj, se ili mem plejparte ne kredas la estontecon

de siaj verkoj; se ili tute ne konscias, ke la leĝo de progreso, tiu nevenkebla potenco, trenanta post si la universojn sur la vojo de la senfino, petas al ili ion pli ol palajn kopiojn de la majstroverkoj de la pasintaj tempaj artistoj! Oni memoras la Fidiojn, la Apelojn, la Rafaelojn, la Mikelanĝelojn, brilajn lumturojn elstarantajn el la obskuro de la forfluintaj jarcentoj kvazaŭ brilegaj steloj meze en profunda tenebro; sed kiu pensos rimarki la brileton de iu lampo luktanta kontraŭ la helega suno en iu bela somera tago?

Ekde la historiaj tempoj, la mondo marŝis per paŝoj de giganto; la filozofioj de la primitivaj popoloj grade transformiĝis. La artoj sin apogantaj al la filozofioj, kiuj estas ties idealigita agnosko, ankaŭ devis modifiĝi kaj transformiĝi. Estas matematike ĝusta la aserto, ke sen la kredo la artoj estas neniel vivipovaj kaj ke ĉia filozofia transformiĝo nepre kuntrenas ian paralelan artan transformiĝon.

En ĉiuj epokoj de transformiĝo, la artoj malprosperas, ĉar la kredo, al kiu ili sin apogas, ne plu sufiĉas por la altiĝintaj aspiroj de la homaro, kaj ankaŭ tial ke, pro la ankoraŭ ne definitiva adopto de la novaj principoj far la granda plimulto de la homoj, la artistoj nur heziteme kuraĝas esplori la nekonatan minon, kiu malfermiĝas antaŭ ili.

Dum la primitivaj epokoj, kiam la homoj nur konis la materian vivon, kiam la filozofio diigis la Naturon, la arto antaŭ ĉio serĉis la perfektecon de la formo. La korpa beleco tiam estis la ĉefa kvalito; la arto plej ŝatis ĝin reprodukti, ĝin idealigi. Pli malfrue, la Filozofio eniris novan vojon; progresante, la homoj agnoskis, ke super la materio ekzistas ia kreiva kaj organiza potenco, kiu rekompencas la bonulojn kaj punas la malbonulojn, kaj el la karitato faris leĝon; ia nova mondo, ia morala mondo ekstaris sur la ruinoj de la mondo antikva. El tiu transformiĝo naskiĝis ia nova arto, kiu pulsigras la animon sub la formo kaj kiu al la plastika perfekteco alligis la esprimon de sentoj nekonataj al la antikvuloj.

La penso vivis sub la materio; sed alprenis la severajn formojn de la filozofio, el kiu la arto inspiriĝis. La tragediojn de *Esĥilo*, la marmorajn skulptaĵojn el *Meloso*, postvenis la priskriboj kaj pentraĵoj de la fizikaj kaj moralaj turmentoj de la damnitoj. La arto leviĝis; alprenis karakteron subliman, grandiozan, sed ankoraŭ ombran. Ĝi efektive troviĝas tuta en la pentrado de la mezepokaj infero kaj ĉielo, de la eternaj suferoj, aŭ de ia beateco tiel malproksima de ni, tiel alte lokita, ke ĝi ŝajnas al ni preskaŭ ne atingebla; estas eble pro tio, ke ĝi tre malforte tuŝas nin, kiam ni vidas ĝin reproduktita sur tolo aŭ per marmoro.

Unua parto

Ankoraŭ hodiaŭ, kaj neniu povas ĝin kontesti, la mondo trapasas transiran periodon, taŭzata inter kadukiĝintaj kutimoj, nesufiĉaj kredoj de la pasinteco kaj novaj, laŭgrade senvualigataj veraĵoj.

Ĉar la kristana arto postvenis, ĝin transformante, la paganan arton, la spiritisma arto estos la kompletigaĵo kaj la transformiĝo de la arto kristana. Spiritismo efektive al ni montras la estontecon sub nova lumo kaj por ni pli atingebla. Laŭ ĝi, la feliĉo estas pli proksima al ni, ja estas apud ni, en la Spiritoj, kiuj nin ĉirkaŭas kaj kiuj neniam ĉesis esti en rilatoj kun ni; ne plu izolaj estas la loĝejo de la elektitoj kaj tiu de la damnitaj; senĉesa solidareco ekzistas inter la ĉielo kaj la Tero, inter ĉiuj mondoj de ĉiuj universoj; la feliĉo konsistas kaj en la reciproka amo de ĉiuj kreitoj atingintaj la perfektecon kaj en ia konstanta aktiveco, kies celo estas instruadi kaj konduki ĝis tiu perfekteco mem ĉiujn ankoraŭ malfruiĝintajn. La infero sidas en la koro mem de la kulpulo, kiu sian punon trovas en la propraj rimorsoj, sed tiu puno ne estas eterna, kaj la malbonulo, prenante la vojon de pento, retrovas la esperon, tiun subliman konsolon de la malfeliĉuloj.

Kiaj neelĉerpeblaj inspirfontoj por la arto! Kiajn ĉefverkojn el ĉiuj genroj povos naski la novaj ideoj per prezentado de tiel multaj kaj diversaj scenoj de la spirita vivo! Anstataŭ bildon de fridaj, senvivaj restaĵoj, oni vidos patrinon kun la kara apudstanta filino en ties radianta, etereca formo; viktimon pardonanta sian turmentiston; krimulon vane forkuranta de la senĉese renoviĝanta spektaklo de siaj kulpaj faroj! la izolon de egoisto kaj malhumilulo meze de la homamaso; la konfuzitecon de Spirito revenanta en la spiritan vivon, ktp, ktp. Kaj se la artisto volas leviĝi super la surtera sfero en la superajn mondojn, tiujn verajn Edenojn kie la progresintaj Spiritoj ĝuas la konkeritan feliĉon, aŭ volas reprodukti kelkajn scenojn de la malsuperaj mondoj, ja veraj inferoj kie la pasioj absolute regas, tiam kiajn emociigajn scenojn, kiajn interesovekajn bildojn li disponos por reprodukti!

Ja certe Spiritismo malfermas por la arto ian novan, senmezuran kaj ankoraŭ ne esploritan kampon; kaj kiam la artisto plenkonvinke reproduktos la spiritan mondon, tiam li ĉerpos en tiu fonto plej sublimajn inspirojn, kaj lia nomo postvivos en la estontaj jarcentoj, ĉar *al la materialaj kaj efemeraj zorgoj de la nuna vivo li substituos la studon de la estonta kaj eterna vivo de la animo.*



Teorio de la Beleco¹⁶

Ĉu la beleco estas ia konvenciaĵo, kaj rilata al ĉiu tipo? Ĉu tio, konsistiganta la belecon ĉe iuj popoloj, ne estas por aliaj abomenega mal-beleco? La negroj rigardas sin pli belaj ol la blankuloj, kaj inverse. Ĉu ĉe tiu konflikto de gustoj ekzistas ia absoluta beleco, kaj en kio ĝi konsistas? Ĉu ni efektive estas pli belaj ol hotentotoj kaj kafroj? Kial?

Tiu demando, kiu unuavide ŝajnas fremda al la objekto de niaj studoj, al ili tamen estas senpere ligita kaj tuŝas la estontecon mem de la homaro. Ĝi estis al ni sugestita, same kiel ĝia solvo, de jena loko el tre interesa kaj instrua libro, titolita: *La Neeviteblaj Transformiĝoj en la Globo kaj en la Homaro*, de Charles Richard.

La aŭtoro penas kontraŭbatali la ideon de la fizika degeneriĝo de la homo ekde la primitivaj tempoj; li sukcese refutas la kredon je la ekzisto de ia primitiva raso el gigantoj kaj penas pruvi, ke, el la vidpunkto de la fizika forto, kaj de la staturo, la nuntempaj homoj egalvaloras la antikvajn, se eĉ ili ĉi tiujn ne superas.

Pritraktante la belecon de la formoj, li tiel esprimiĝas, paĝoj 41 kaj sekvantaj:

“Koncerne la belecon de la vizaĝo, la ĉarmon de la mieno, tiun tutaĵon konstituantan la korpan estetikon, ankoraŭ pli facile konstatablas la pliboniĝo.

“Por tio sufiĉas ĵeti rigardon sur la tipojn, kiujn la antikvaj medaloj kaj statuoj al ni transdonis sendifektaj tra la jarcentoj.

“La ikonografio de Visconti kaj la muzeo de la Grafo de Clarol estas, inter multaj aliaj, du fontoj, kie oni facile ĉerpas diversajn elementojn por tiu interesa studo.

¹⁶ Vidu la *Klarigan Noton* kaj la *Eksplikan Noton*, ambaŭ de la Eldonejo de la Brazila Spiritisma Federacio, en la komenco kaj en la fino de ĉi tiu volumo.

Unua parto

“Kio antaŭ ĉio frapas en tiu kolekto da figuroj, tio estas la krudeco de la trajtoj, *la besteco de la mieno, la krudeco de la rigardo*. Oni sentas, kun nevola frostotremo, ke oni tie havas aferon kun homoj, kiuj lin senkomplete distranĉus en pecojn por manĝigi siajn murenojn, kiel faris Poliono, riĉa frandemulo el Romo, intima amiko de Aŭgusto.

“La unua Bruto (Lucio-Junio), kiu fortranĉigis la kapon al siaj du filoj kaj malvarmsange spektis ilian turmentegon, similas rabobeston. Lia sinistra profilo prenas de aglo kaj orelstrigo tion, kion plej ferocan havas tiuj du aeraj karnovoruloj. Vidante lin, oni ne povas dubi, ke li meritis la hontigan honoron, kiun al li faris la Historio; se li buĉis siajn du filojn, li certe pro la sama kaŭzo strangolis sian patrinon.

“La dua Bruto (Mario), kiu ponardis Cezaron, sian adoptopatron, ĝuste kiam ĉi tiu plej kalkulis je lia danko kaj amo, elvokas per siaj trajtoj ian fanatikan naivegulon; li ne havas eĉ tiun sinistran belecon, kiun artisto ofte malkovras en tiu ekscesa energio, kiu puŝas al krimo.

“Cicerono, la brila oratoro, profunda kaj spirita verkisto, kiu postlasis tiel grandan memoron pri sia migrado en ĉi tiu mondo, havis platan, vulgaran vizaĝon, kiu devis fari lin multe malpli agrabla por la okuloj ol por la oreloj.

“Julio Cezaro, la granda, nekomporebla venkinto, la heroo de la masakroj, kiu eniris la regnon de ombroj kune kun akompanantaro el du milionoj da animoj, kiujn li dumvive tien ekspedis, estas tiel malbela kiel lia antaŭinto, sed de alia speco... Lia magra, osteca vizaĝo, sidanta sur longa kolo kaj mise ornamita per elstaranta vangosto, lin pli similigas al ia granda bazara Gilles¹⁷, ol al granda militisto.

“Galbo, Vespaziano, Nervo, Karakalo, Aleksandro Sèvres, Balbin, estas ne nur malbelaj sed ja hidaj. Apenaŭ eblas por la okuloj, en tiu muzeo de antikvaj tipoj de nia specio, trovi tie kaj tie ĉi iujn figurojn salutindajn per simpatia rigardo. Al tiu malgranda nombro apartenas tiuj de Scipiono Afrikano, Pompeo, Komodo, Heliogabalo kaj Antinoo, la favorato de Hadriano. Kvankam ne belaj laŭ la moderna senco de la vorto, tamen tiuj figuroj estas regulaj kaj plaĉaspektaj.

“La virinoj estas ne pli bone traktataj ol la viroj kaj elvokas samajn rimarkojn. Livia, filino de Aŭgusto, havas la akran profilon de foino; Agripino estigas timon, kaj Mesalino, kvazaŭ por konfuzi Cabanis kaj Lavater, similas al grasa servistino, pli amanta bonan supon ol ion alian.

¹⁷ Speco de stulta, poltrona *piroto*, bildigita de Watteau en fama pentraĵo (Luvro) — Ĉe “Petit Larousse Illustré”. – *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio en sia 13^a portugallingva eldono, 1973.*

“La grekoj, necesas diri, malpli misas ol la romanoj. La figuroj de Temistoklo kaj Miltiado, inter aliaj, povas esti komparataj kun la plej belaj modernaj tipoj. Sed Alcibiado, tiu tre malproksima avo de niaj Richelieu kaj Lauzun, kaj kies galantaj bravegaĵoj per si mem plenigas la kronikon de Ateno, havis aspekton tre malmulte konforman al siaj aktivajoj. Vidante liajn solenajn trajtojn kaj pripenseman frunton, oni lin prefere prenas por jurkonsilisto alkroĉita al leĝoteksto ol por tiu aŭdaca galantulo, kiu sin ekzilis en Sparto nur por trompi la kompatindan reĝon Agis kaj poste fanfaroni, ke li estis amoranto de iu reĝino.

“Malgraŭ la malgranda avantaĝo, kiun oni ĉirilate povas konsenti al la grekoj super la romanoj, kiu ajn donos al si la penon kompari tiujn malnovajn tipojn kun tiuj de nia tempo, facile rekonos, ke en tiu kampo, same kiel en ĉiuj aliaj, fariĝis la progreso. Dezirindas nur ne forgesi, ĉe tiu komparo, ke ĉi tie temas pri privilegiitaj klasoj, ĉiam pli belaj ol la ceteraj, pro kio la modernaj tipoj, kontraŭmetotaj al la malnovaj, devas esti elektataj en salonoj, ne en drinkejaĉoj. Tiel estas, ĉar la mizero, ho ve!, en ĉiuj tempoj kaj sub ĉiuj aspektoj, neniam estis bela, kaj ĝi tia ne estas ĝuste por nin hontigi kaj devigi, ke ni iam liberiĝu de ĝi.

“Mi ne volas do diri, multe mankas ĝis tio, ke malbeleco tute malaperis de sur niaj frontoj kaj ke la dia stampo fine retroviĝas sub ĉiuj maskoj, kiuj animon vualas; for de mi estas unu tia aserto, kiun ĉiuj povus tre facile kontesti. Mia pretendo limiĝas sole nur al la konstato, ke en dumiljara periodo, *io tre malmulta por homaro, kiu tiom devas vivi*, la fizionomio de la spacio pliboniĝis en ja sentebla maniero.

“Mi cetere kredas, ke la plej belaj figuroj de la antikveco estas malsuperaj al tiuj, kiujn ni povas ĉiutage admiri en niaj publikaj kunvenoj, en niaj festoj kaj eĉ en la strata cirkulado. Se mi ne timus vundi certajn modes-tecojn, krom ankaŭ eksciti certajn ĵaluzojn, centoj da ekzemploj, de ĉiuj konataj en la nuntempa mondo, konfirmus la evidentecon de tiu fakto.

“La adorantoj de la pasinteco tenas al si la buŝon konstante ŝtopita per la fama Mediĉa Venuso, kiu ŝajnas al ili la idealo de la virina beleco, ne atentante, ke tiu sama Venuso ĉiudimanĉe promenas en la Arleza bulvarado, po pli ol kvindek ekzempleroj, kaj ke estas malmultaj el niaj urboj, aparte tiuj en la Sudo, kiuj kelke da ili ne posedas...

“.. En ĉio, kion ni ĵus diris, ni nur komparis nian aktualan tipon al tiu de la popoloj, kiuj nin antaŭis je apenaŭ kelke da jarmiloj. Sed se, returne irante pli malproksimen tra la aĝoj, ni penetras tiujn surterajn tavolojn kie dormas la restaĵoj de la rasoj, kiuj la unuaj loĝis en nia globo, tiam la avantaĝo favora al ni fariĝos sentebla en tia grado, ke ĉia neado en ĉi tiu rilato disnieniĝos per si mem.

Unua parto

“Sub tiu teologia influo, kiu haltigis Kopernikon kaj Tycho-Brae, kiu persekutis Galilejon, kaj kiu en la lastaj tempoj momente mallumigis la genion mem de Cuvier, la Scienco hezitadis sondi la misterojn de la antaŭdiluva epokoj. La biblia rakonto, laŭlitere kaj plej malvastasence akceptita, ŝajnis esti dirinta la lastan vorton pri nia origino kaj pri la jarcentoj, kiuj nin apartigas de ĝi. Sed la vero, senkompata en siaj ampleksigoj, fine rompis la feran kitelon, en kiun oni volis ĝin por ĉiam enkarcerigi, kaj senvaligis formojn ĝis tiam kaŝitajn.

“La homo, kiu antaŭ la diluvo vivis en kompanio de mastodontoj, de la kaverna urso kaj de aliaj mamuloj nuntempe malaperintaj, unuvorte la fosilia homo, tiel longe neata, fine estas trovita, kaj eksterduba montriĝis lia ekzisto. La freŝaj laboroj de la geologoj, aparte tiuj de Boucher de Perthes,¹⁸ de Filippi kaj de Lyell, permesas al ni taksi la fizikajn trajtojn de tiu respektinda praavo de la homa genro. Nu, malgraŭ la fabeloj imagitaj de la poetoj pri lia origina beleco, malgraŭ la respekto al li ŝuldata kiel antikva ĉefo de nia raso, la scienco estas devigita konstati lian konsternan malbelecon.

“Lia facia angulo ne superis 70 gradojn; liaj makzeloj, de granda amplekso, estis armitaj per longaj kaj elstaraj dentoj; li havis deklivan frunton, platajn temporalojn kaj nazon, larĝajn naztruojn; unuvorte, tiu respektinda prapatro devis pli simili orangutangon ol sian nuntempan idaron; kaj en tia grado, ke, se oni ne trovintus ĉe li silikajn hakilojn, kiujn li fabrikis, kaj, en iuj okazoj, bestojn ankoraŭ portantajn signojn de la vundoj faritaj per tiaj senformaj armiloj, oni ja povintus pridubi la gravan rolon, kiun li ludis en nia surtera devena ĉeno. Li sciis fabriki ne nur silikajn hakilojn, sed ankaŭ klablojn kaj pintojn de ĵetlancoj el sama materio. La antaŭdiluva galanterio eĉ produktis braceletojn kaj kolierojn el rondaj ŝtonetoj, kiuj en tiuj malproksimaj tempoj ornamis la brakojn kaj la kolon de la ĉarma sekso, kiu poste fariĝis multe pli postulema, pri kio ĉiu povas mem konvinkiĝi.

Mi ne scias, kion pri tio pensos niatempaj elegantulinoj, kies ŝultroj brilegas per diamantoj; kio min koncernas, mi konfesas, mi ne povas deteni min de profunda emocio, kiam mi pensas pri tiu unua peno, kiun faris la homo apenaŭ liberiĝinta de la bruteco, por plaĉi al sia vivkunulino, mizera kaj nuda kiel li, en la sino de sovaĝa naturo, super kiu lia raso iam devos regi. Ho, malproksimaj praavoj! se vi jam amis, kun viaj rudimentaj vizaĝoj, kiel mi povus pridubi vian patrecon ĉe tiu dia signo de nia specio?

“Evidentas do, ke tiuj homaj formokruduloj estas niaj patroj, ĉar al ni ili heredigis trajtojn de sia inteligento kaj de sia amo, esencaj atributoj, kiuj

¹⁸ Vidu la du doktajn verkojn de Boucher de Perthes: *La antaŭdiluva homo kaj Ŝtonaj utilaĵoj*. – Parizo, Spiritisma Librejo.

nin apartigas de la bestoj. Ni povas do, ilin atente ekzamenante senigitajn je la aluvioj, kiuj ilin kovras, mezuri kvazaŭ per cirkelo la fizikan progreson faritan de nia specio depost ties apero sur la Tero. Nu, tiu progreso, kiu antaŭ ne longe povis esti kontestata de la spirito de sistemo kaj de la antaŭjuĝoj pri eduko, ĉi tie gajnas tielan evidentecon, ke nenio restas por fari, krom ĝin agnoski kaj proklami.

“Kelke da jarmiloj povis allasi dubojn, kelke da jarcentoj ilin definitive forneniigas...

“... Kiom junaj kaj freŝspertaj ni statas rilate al ĉiuj aferoj? Ankoraŭ nesciaj pri nia loko kaj nia vojo en la senlima Universo, ni kuraĝas nei progresojn, kiuj, pro manko de tempo, ne povis esti sufiĉe konstatitaj. Estante ankoraŭ infanoj, ni havu iom da pacienco, kaj la jarcentoj, nin alproksimigante al la celo, malkaŝos al ni splendaĵojn, kiuj, pro sia foreco, nevideblas por niaj apenaŭ duonmalfermitaj okuloj.

“Sed ekde nun ni laŭte proklamu, ĉar al ni ĝin jam permesas la scienco, tiun gravegan kaj konsolan fakton, nome la progreson, malrapidan sed nepran, de nia fizika tipo direkte al tiu idealo, kiun la grandaj artistoj duonvidas pere de la inspiroj al ili sendataj de la ĉielo por malkaŝi al ni siajn sekretojn. La idealo ne estas ia trompa produkto de la imago, ia revo preterkura destinita doni al ni, de tempo al tempo, ian kompencon al niaj mizeroj. Ĝi ja estas celo, kiun Dio difinis al niaj perfektigoj; celo ja senfina, ĉar nur la senfino, en ĉiuj okazoj, povas kontentigi nian spiriton kaj al ĝi oferi karieron indan je ĝi.”

El tiuj saĝaj konsideroj rezultas, ke la formo de la korpoj modifiĝis, *en difinita senco* kaj laŭ ia leĝo, laŭgrade kiel la morala estaĵo disvolviĝis; ke la ekstera formo estas en konstanta rilato kun la instinkto kaj la apetito de la morala estaĵo; ke ju pli liaj instinktoj proksimas al la besta naturo, des pli la formo ankaŭ proksimas al ĝi; fine, ke, laŭmezure kiel la materialaj instinktoj elpuriĝas kaj cedas lokon al la moralaj sentoj, la ekstera envolaĵo, kiu jam ne plu destiniĝas al la kontentigo de krudaj bezonoj, alprenas formojn ĉiam malpli pezajn, pli delikatajn, en harmonio kun la delikateco de la pensoj. La perfekteco de la formo estas do sekvo de la spirita perfekteco, kaj el tio oni povas konkludi, ke la ideala formo devas esti tiu, kiun la Spiritoj prenas en la stato de pureco kaj pri kiu revis la poetoj kaj la veraj artistoj, ĉar ili penetras, per la penso, en la superajn mondojn.

De antaŭ longe oni diras, ke la vizaĝo estas spegulo de la animo. Tiu vero, kiu fariĝis aksiomo, klarigas tiun ordinaran fakton, ke certaj malbelaĵoj malaperas sub la reflektado de la moralaj kvalitoj de la Spirito,

kaj ankaŭ tion, ke tre ofte oni preferas malbelan personon, dotitan per eminentaj kvalitoj, al persono nur havanta belecon plastikan. Tiel estas, ĉar tia malbeleco konsistas nur en neregulaĵoj de formo sen tamen ekskluzivi tiun rafinecon de trajtoj necesan al la esprimo de delikataj sentoj.

El tio supre dirita, oni povas konkludi, ke la reala beleco konsistas en la formo plej malproksima de la besteco kaj plej respegulanta la moralan kaj intelektan superecon de la Spirito, kiu estas la ĉefa estaĵo. El tio, ke la morala esteco influas tiun fizikan, kion li alkonformigas al siaj bezonoj moralaj kaj fizikaj, sekvas: 1^e ke la tipo de la beleco konsistas en la formo pli taŭga al la esprimo de plej altaj kvalitoj moralaj kaj intelektaj; 2^e ke, laŭmezure kiel la homo morale altiĝos, lia envolvado proksimiĝos al la ideala beleco, nome la beleco anĝela.

Nigrulo povas esti bela por nigrulo, kiel kato estas bela por kato; sed li ne estas bela en senco absoluta, ĉar liaj krudaj trajtoj, liaj dikaj lipoj vidigas materialecon de instinktoj; ili povas esprimi sovaĝajn pasiojn, sed ne taŭgus por la delikataj nuancoj de la sento aŭ la moduladoj de subtila spirito.

Ja tial ni povas, sen pretendemo, mi kredas, aserti, ke ni estas pli belaj ol la negroj kaj la hotentotoj; sed tre povas esti, ke por la estontaj, pli progresintaj generacioj, ni estos tiaj, kiaj estas la hotentotoj rilate al ni; kaj kiu scias, ĉu, trovinte niajn fosiliojn, ili ĉi tiujn ne prenos por tiuj de ia besta specio?

Legite en la Pariza Societo, ĉi tiu artikolo estis objekto de tre granda nombro da komunikaĵoj, kiuj prezentis samajn konkludojn. Ni ĉi tie represos, kiel la plej disvolvitajn, la du sekvantajn:

Parizo, la 4^{an} de Februaro 1869.

(Mediumo: S-rino Malet.)

Vi prave konsideris: la primara fonto de ĉia boneco kaj de ĉia inteligenteco ankaŭ estas la fonto de ĉia beleco. — La amo generas la perfektecon de ĉia ekzistaĵo kaj estas mem la perfekteco. — La Spirito estas vokita akiri tiun perfektecon, kaj tiu esenco estas lia destino. Per sia laboro li devas alproksimiĝi al tiu superega intelekto, al tiu senfina boneco; li devas do ankaŭ sin vesti per la ĉiam pli kaj pli perfekta formo, kiu karakterizas la perfektajn estaĵojn.

Se en viaj malfeliĉaj societoj, en viaj ankoraŭ misekvilibritaj globoj, la homa specio restas tiel malproksime de tiu fizika beleco, tiel estas ĉar la morala beleco ankoraŭ apenaŭ disvolviĝis. La konekseco inter tiaj du

Teorio de la Beleco

belecoj ja estas fakto certa, logika, pri kiu jam en ĉi-malsupra mondo la animo intuicias. Efektive, vi ĉiuj scias, kiom ĉagrenas la aspekto de vizaĝo, kies ĉarmon la karaktero dementas. Aŭdante pri vere merita persono, vi tuj lin vestas per la plej simpatiaj trajtoj, kaj vi dolore impresiĝas ĉe eksteraĵo malkonfirmanta vian antaŭvidon.

Kian konkludon tiri el tio, krom ke, kiel ĉiuj aferoj, kiujn la estonteco tenas en rezervo, la animo havas antaŭscion pri la beleco laŭmezure kiel la homaro progresas kaj proksimiĝas al sia dia tipo. Vi neniel tiru, el la ŝajna dekadenco, en kiu troviĝas la plej progresinta raso en tiu globo, argumentojn kontraŭajn al tiu aserto. Jes, estas vere, ke la specio ŝajnas degeneri, bastardiĝi; la malsanoj falas sur vin antaŭ la maljunaĝo; eĉ la infanaro suferas malsanojn, ordinaraj proprajn nur al alia aĝo de la vivo; sed temas pri nura transiro. Malbona estas via epoko; ĝi finas kaj naskas; ĝi finas doloran periodon kaj naskas epokon de fizika regenerado, de morala antaŭeniĝo, de intelekta progreso. La nova raso, pri kiu ni jam parolis, havos pli da kapablecoj, pli da rimedoj por la servoj de la spirito; ĝi estos pli granda, pli forta, pli bela. Tuj de la komenco ĝi sin metos en harmonio kun la riĉaĵoj de la Kreaĵaro, kiujn via raso, indifera kaj laca, disdegnas aŭ ignoras; al ĝi vi estos farintaj grandajn aferojn, kiujn ĝi profitos, marŝante sur la vojo de la malkovroj kaj perfektigoj kun arda fervoro, kies potencon vi ne konas.

Pli progresintaj ankaŭ pri boneco, viaj posteuloj faros, kion vi ne sciis fari el tiu malfeliĉa tero: ian mondon feliĉan, kie malriĉulo estos nek forpuŝata, nek malŝatata, sed ja helpata de vastaj kaj liberalaj institucioj. Jam eklumas la aŭroro de tiuj ideoj, por momentoj nin atingas ilia helo.

Amikoj, jen fine la tago, en kiu la lumo brilos sur la Tero obskura kaj mizera, en kiu la raso estos bona kaj bela laŭ la grado da progreso, kiun ĝi estos konkerinta, en kiu la signo metita sur la fronto de la homo ne plu estos tiu de malaprobo, sed ja de ĝojo kaj espero. Tiam la progresintaj Spiritoj amase venos preni lokon inter la kolonianoj sur tiu mondo; ili estos la plimulto kaj ĉio cedos antaŭ ili. Ekestos renoviĝo, kaj la vizaĝo de la Tero aliiĝos, ĉar granda kaj potenca estos tiu raso, kaj la horo de ĝia alveno signos la komenciĝon de feliĉaj tempoj.

Pamfilo

Parizo, la 4^{an} de Februaro 1869.

La beleco, el pure homa vidpunkto, estas demando tre diskutinda kaj diskutata. Por ĝin bone juĝi, necesas studi ĝin kiel senpartia amato, kaj kiu estas sub la potenco de ĉarmo, ne povas aŭtoritate pritrakti la temon. La gusto de ĉiu ankaŭ kunkalkuliĝas en la farataj aprezoj.

Unua parto

Bela, efektive bela, estas nur, kio tia estas ĉiam kaj por ĉiuj; kaj tiu beleco eterna, senfina, estas la dia manifestiĝo laŭ ties senĉese variaj aspektoj; estas Dio en ties verkoj, en ties leĝoj! Jen la sole absoluta beleco. — Ĝi estas la harmonio de la harmonioj kaj havas rajton al la nomo absoluta, ĉar nenion plej belan oni povas koncepti.

Koncerne tion, kion oni konvencie nomis bela kaj kio vere indas tiun nomon, oni ĝin rigardu ne alie ol kiel ion esence relativan, ĉar oni ĉiam povas koncepti alion pli belan, pli perfektan. Ekzistas nur unu sola beleco, unu sola perfekteco, nome Dio. Ekster li, ĉio, kion ni ornamas per tiuj atributoj, estas nenio alia ol palaj reflektaj de la unika belo, ol harmonia aspekto de la mil kaj unu harmonioj de la Kreitaĵaro.

Estas tiom da harmonioj, kiom da kreaĵoj, sekve tiom da tipaj belecoj difinantaj la kulminan punkton de perfekteco atingeblan por ĉiu el la dividajoj de la animita elemento. — Ŝtono estas bela, diversmaniere bela. Ĉiu minerala speco havas siajn harmoniojn, kaj la elemento, kiu en ni kunigas ĉiujn harmoniojn de la speco, posedas la plej grandan sumon da beleco atingebla por la speco.

Floro havas siajn harmoniojn; ankaŭ ĝi povas posedi ilin ĉiujn kune, aŭ unu solan aparte, sed ĝi estos bela nur tiam, kiam la harmonioj, kunagantaj por ĝia kreado, troviĝos en harmonia fandiĝo. Du tipoj de beleco, per sia kunfandiĝo, povas produkti estaĵon hibridan, senforman, kun naŭza aspekto. — Ekestas do kakofonio! Ĉiuj vibroj estis izole harmoniaj, sed la malsameco de tonalo inter ili estigis ian malakordon ĉe la renkontiĝo de la vibrantaj ondoj; *de tio, la monstro!*

Malsuprenirante la kreitan skalon, ĉiu tipo de besto estigas samajn observojn, kaj feroceco, ruzo, eĉ envio povos naski specialajn belecojn, se senmiksa estos la principo difinanta la formon. Harmonio, eĉ ĉe malbono, naskas belon. Ekzistas belo satana kaj belo anĝela, energia beleco kaj beleco rezignacia. — Ĉiu sento, ĉiu fasko da sentoj, se nur la fasko estas harmonia, naskas apartan tipon de beleco, kies ĉiuj homaj aspektoj estas ne degeneraĵoj sed ja skizoj. Oni do certas diri ne tion, ke oni estas pli bela, sed ke oni ĉiam pli proksimiĝas al la reala beleco laŭgrade kiel oni altiĝas al la perfekteco.

Ĉiuj tipoj harmonie unuiĝas en la perfekteco. Jen kial ĝi estas la absoluta belo. — Ni, kiuj progresas, nur posedas relativan belecon, malfortigitan kaj atakatan de la malharmoniaj elementoj de nia naturo.

Lavater



La Ĉiela Muziko

Unu tagon, dum familia kunveno, la patro legis lokon el *La Libro de la Spiritoj* pri la ĉiela muziko. Unu el liaj filinoj, bona muzikistino, diris al si en la pensoj: Sed ne estas muziko en la nevidebla mondo! Al ŝi tio ŝajnis neebla, sed ŝi ne konigis sian penson. Nokte ŝi mem spontane skribis la sekvantan komunikaĵon:

“Ĉi-matene, mia infano, via patro legis al vi lokon el *La Libro de la Spiritoj*. Temis pri muziko, kaj vi lernis, ke la ĉiela estas multe pli bela ol la surtera, ke la Spiritoj tiun trovas tre supera al la via. Ĉio ĉi estas vera; sed en la penso vi diradis al vi mem: Kiel povus veni Bellini por doni al mi konsilojn kaj aŭskulti mian muzikon? Tio verŝajne estas malserioza, fripona Spirito. (Aludo al la konsiloj, kiujn la Spirito Bellini iafoje donis al ŝi pri muziko.) Vi eraras, mia infano. Kiam la Spiritoj prenas enkarnulon sub sian protekton, ili celas lin progresigi.

“Efektive, Bellini ne plu rigardas bela sian muzikon, ĉar li ne povas ĝin kompari kun tiu de la Spaco, sed li vidas vian sindediĉon kaj amon al tiu arto, kaj se li al vi donas konsilojn, tiel estas pro sincera ĝojo. Li deziras, ke via instruisto estu rekompencita pro sia tuta penado. Konsiderante sian komponadon tre infaneca antaŭ la sublimaj harmonioj de la nevidebla mondo, li aprezas sian talenton, kiun oni povas rigardi granda en tiu mondo. Kredu, mia infano, la sonoj de viaj instrumentoj, viaj plej belaj voĉoj ne povas doni al vi plej palan ideon pri la ĉiela muziko kaj ties dolĉa harmonio.

Post momento, la junulino diris: “Paĉjo, paĉjo, mi estas dormonta, falonta.” Ŝi tuj ĵetiĝas sur fotelon, kriante: “Ho, paĉjo, paĉjo, kia ĉarma muziko!... Veku min, ĉar mi estas forironta.”

Terurite, la ĉeestantoj ne scias, kiel ŝin veki, kaj ŝi diras: “Akvo, akvo.” Efektive, kelke da gutoj, ĵetitaj al ŝi sur la vizaĝon, donas tujan efikon; komence konfuzita, ŝi malrapide revekiĝas, sen ia konscio pri la okazaĵo.

En tiu sama nokto, estante sola, la patro ricevas jenan klarigon de la Spirito Sankta Ludoviko:

“Kiam vi legis al via filino la lokon el *La Libro de la Spiritoj*, pritraktantan la ĉielan muzikon, ŝi ankoraŭ dubis; ŝi ne komprenis, ke povus ekzisti muziko en la spirita mondo. Jen kial ĉi-vespere mi diris al ŝi la veron; sed ĉar mi per tio ne povis persvadi ŝin, Dio permesis, por ŝin konvinki, ke ŝi falu en somnambulan dormon. Tiam ŝia Spirito, liberiginte de la endormigita korpo, sin ĵetis en la Spacon kaj estis enlasita en la eterajn regionojn, en ekstazo pro la impreso de la ĉiela muziko; ja tial ŝi ekkris: “Kia muziko! kia muziko!” Sed, sentante sin transportata en pli altajn regionojn de la spirita mondo, ŝi petis, ke oni ŝin veku, por tio indikante al vi la rimedon, nome per akvo.

“Ĉio fariĝas laŭ la volo de Dio. La Spirito de via filino ne plu dubos; kaj kvankam ŝi, post vekigo, ne konservis klaran memoron pri la okazaĵo, tamen ŝia Spirito scias, kie ĉerpi certecon.

“Danku Dion pro la favoroj, per kiuj li superŝutas tiun infanon; danku lin, ke li ĉiam pli kaj pli konigas al vi sian povon kaj sian bonecon. Liaj benoj verŝiĝu sur vin kaj sur tiun mediumon, feliĉan inter miloj!”

Rimarko. — Oni eble demandos, kia konvinko, por tiu junulino, povas rezulti el tio, kion ŝi aŭdis sed kion ŝi ne memoras. Se, dum maldorma stato, la detaloj forviŝiĝis el ŝia memoro, ŝia Spirito memoras; al ŝi restis ia intuicio, kiu modifas siajn ideojn; anstataŭ ilin kontraŭstari, ŝi senpene akceptos la klarigojn, kiuj al ŝi estos donitaj, ĉar ŝi ilin komprenos kaj intuicie trovos en akordo kun sia intima sento.

Kio ĉi tie fariĝis kiel izola fakto, en la daŭro de kelkaj minutoj, dum la mallonga ekskurso, kiun la Spirito de la junulino faris en la spirita mondo, tio estas analoga al tio, kio okazas en la intertempo de unu ekzistado al alia, kiam la enkarniĝinta Spirito posedas lumojn pri ia ajn objekto. Li ŝajne alproprigas al si la ideojn rilatajn al tiu objekto, kvankam li, kiel homo, ne memoras la manieron, kiel li akiris ilin. Kontraŭe, tiuj ideoj, por kies kompreno li ne estas matura, malfacile eniras en lian cerbon.

Tiel kompreniĝas la facileco, kun kiu certaj personoj asimilas la spiritismajn ideojn, kiuj nur revekas, en ili, la ideojn, kiujn ili jam posedis: ili estas denaskaj spiritistoj, kiel aliaj personoj estas poetoj, muzikistoj aŭ matematikistoj. Ili komprenas tuj de la unuaj vortoj kaj ne bezonas

materialajn faktojn por konvinkiĝi. Tio nekontesteble estas signo de morala progreso kaj spirita disvolviĝo.

En la ĉi-supra komunikaĵo, estas dirite: “Danku Dion pro la favoroj, per kiuj li superŝutas tiun infanon; liaj benoj verŝiĝu sur tiun mediumon, feliĉan inter miloj.” Tiaj vortoj ŝajne montras ian favoron, ian preferon, ian privilegion, dum Spiritismo instruas, ke, ĉar Dio estas superege justa, neniu el liaj kreitoj estas privilegiita kaj li ne faciligas la iradon pli al unuj ol al aliaj. Sen ia dubo, la sama vojo estas malfermita al ĉiuj, sed ne ĉiuj ĝin trapasas kun sama rapideco kaj sama utilo; ne ĉiuj egale profitos de la ricevataj instruoj. La Spirito de tiu infano, kvankam juna en la karno, sendube jam multe vivis kaj certe progresis.

Trovante ŝin obeema al ilia gvidado, la bonaj Spiritoj plezuras instruadi ŝin tiel same, kiel agas instruisto kun lernanto, en kiu li trovas bonajn dispoziciojn. Ĝuste en tiu senco, mediumo estas feliĉa inter multaj aliaj, kiuj, por sia morala progreso, nenium frukton rikoltas el sia mediuma kapablo. Estas do en ĉi tiu kazo nek favoro, nek privilegio, sed ja rekompenco. Se la Spirito ne plu indus ĝin, lin baldaŭ forlasus liaj bonaj gvidantoj, kaj li vidus sin ĉirkaŭita de amaso da malbonaj Spiritoj.



La Spiritisma Muziko

Antaŭ ne longe, en la sidejo de la Pariza Spiritisma Societo, la Prezidanto faris al mi la honoron peti mian opinion pri la nuna stato de la muziko kaj pri la modifoj, kiujn al ĝi povus ricevigi la influo de la spiritismaj kredoj. Se mi ne tuj povis respondi al tiu bonvola kaj simpatia alvoko, tiel estis — kredo, sinjoroj, — nur tial, ĉar supera afero motivis mian sindetenon.

La muzikistoj, ho ve! estas homoj kiel la aliaj, eble pli, kaj pro tio ili estas eraremaj kaj pekemaj. Mi ne estis libera de malvirtoj, kaj se Dio faris mian vivon longa, ke mi havu tempon por penti, la ebrieco de la sukceso, la indulgo de la amikoj, la komplimentoj de la flatemuloj ofte de mi forprenis tiucelajn rimedojn. Dirigento ja estas potenco en ĉi tiu mondo, kie plezuro ludas tiel grandan rolon. Tiu, kies arto konsistas en plezurigo de oreloj kaj moligo de koroj, klare vidas estiĝi kaptilojn sub siaj piedoj kaj li, malfeliĉa, tien falas! Li ebriiĝas de aliula ebrieco; la aplaŭdoj ŝtopas al li la orelojn, kaj li iras rekte al la abismo, ne serĉante ian apogpunkton por kontraŭstari la forlogiĝon.

Sed malgraŭ miaj eraroj, mi havis fidon al Dio; mi kredis je la animo, kiu en mi vibradis kaj kiu, liberiĝinte de sia sonora kaĝo, tuj rekoniiĝis meze en la harmonioj de la kreaĵaro kaj aligis sian preĝon al tiuj leviĝantaj de la Naturo al la senfino, de la kreaĵaro al la nekreaita Estulo!...

Mi estas feliĉa pro la sento estigita de mia veno inter la spiritistojn, ĉar ĝin naskis simpatio, kaj se komence min altiris scivoleco, estas tamen al dankemo, ke vi ŝuldas la pritrakton de la temo al mi proponita.

Tie mi troviĝis, preta por paroli, supozante ĉion scii, kiam la malaltigo de mia fiero malkaŝis mian nesciecon. Mi restis muta kaj aŭskultadis: mi reiris, instruiĝis, kaj kiam al la paroloj de vero, eldiritaj de viaj mentoroj, aliĝis pripensado kaj medito, mi diris al mi: La granda dirigento Rossini, la kreinto de tiom da ĉefverkoj laŭ la homoj, faris nenion alian, ho ve! ol elspikigi kelkajn el la malpli perfektaj juveloj el la muzika juvelujo kreita

Unua parto

de la Majstro de la dirigentoj. Rossini kunmetis notojn, komponis melodiojn, trinkis el la pokalo enhavanta ĉiujn harmoniojn, ŝtelis kelkajn fajrerojn el la sankta fajro, sed tiun sanktan fajron kreis nek li, nek ajnaj aliaj! — Nenion ni elpensas: ni kopias el la granda libro de la Naturo, kaj la amaso aplaŭdas, kiam ni ne tro kripligas la partituron.

Ia disertaĵo pri la ĉiela muziko! Kiu povus sin ŝarĝi pri tio? Kiu superhoma Spirito povus vibrigi la materion unusone kun tiu ĉarma arto? Kiu homa cerbo, kiu enkarniĝinta Spirito povus kapti ĝiajn senfine variajn nuancojn?... Kiu posedas en tia grado la senton pri harmonio?... Ne, la homo ne estas farita por tielaj kondiĉoj!... Pli malfrue?... multe pli malfrue!...

Dume mi eble baldaŭ venos kontentigi vian deziron kaj al vi prezenti mian takson pri la nuna stato de la muziko kaj priparoli la transformojn, la progresojn, kiujn Spiritismo povos en ĝin enkonduki. — Hodiaŭ estas ankoraŭ tro frue. La temo estas ampleksa, mi ĝin jam studis, sed ĝi ankoraŭ min superstaras; kiam mi mastros ĝin, se tamen tio estos ebla, aŭ pli bone, kiam mi duonvidos tiom, kiom al mi permesos la stato de mia spirito, mi vin kontentigos; sed ankoraŭ iom da tempo. Se nur muzikisto povas paroli pri la muziko de la estonteco, li devas ĝin fari kiel majstro, kaj Rossini tute ne volas priparoli kiel lernanto.

Rossini (Mediumo: Desliens)

Estas klarigita la silento, kiun mi gardis pri la temo al mi proponita de la Majstro de la Spiritisma Doktrino. Al mi konvenis, antaŭ ol ekstrakti tiun malfacilan temon, retiriĝi, rememori kaj kondensi la disponeblajn elementojn. Mi tute ne devis studi la muzikon sed nur klasi metode la argumentojn, por prezenti resumon, kiu donus ideon pri mia koncepto pri harmonio. Tiu laboro, kiun mi ne facile plenumis, estas finita kaj mi pretas submeti ĝin al la aprezo de la spiritistoj.

Harmonio estas io ne facile difinebla; oni ofte konfuzas ĝin kun la muziko, kun la rezulto el ia aranĝo de notoj kaj de la vibroj de la instrumentoj re-produktantaj tiun aranĝon. Sed tio tute ne estas harmonio, same kiel flamo ne estas lumo. Flamo rezultas el kombiniĝo de du gasoj: ĝi estas tuŝebla; la lumo, kiun ĝi projekcias, estas ia efiko de tiu kombiniĝo, ne la flamo mem: ĝi ne estas tuŝebla. Ĉi tie la efiko superas sian kaŭzon. Tiel same estas ĉe la harmonio; ĝi rezultas el muzika aranĝo, estas efiko ankaŭ supera al sia kaŭzo. La kaŭzo estas kruda kaj tuŝebla; la efiko estas subtila kaj netuŝebla.

Oni povas koncepti lumon sen flamo kaj oni ja komprenas harmonion sen muziko. La animo kapablas percepti la harmonion sen helpo de ia ajn

La Spiritisma Muziko

instrumento, same kiel vidi la lumon sen helpo de materiaj kombiniĝoj. La lumo estas intima sento, kiun la animo posedas: ju pli disvolviĝinta ĝi estas, des pli bone la animo perceptas la lumon. La harmonio ankaŭ estas intima sento de la animo: ĝia percepto estas en rilato kun la disvolviĝo de tiu sento. Ekster la palpeblaj kaŭzoj, la lumo kaj la harmonio estas el dia esenco; oni ilin posedas en rilato kun la penoj faritaj por ilin akiri. Se mi komparas la lumon kaj la harmonion, tiel estas por min komprenigi kaj ankaŭ ĉar tiuj du ĝuoj de la animo, estante filoj de Dio, estas sekve fratoj.

La harmonio de la spaco estas tiel kompleksa, havas tiom da al mi konataj gradoj krom ankaŭ multe da aliaj al mi kaŝitaj en la senfina etero, ke tiu, staranta ĉe certa nivelo de perceptivo, kvazaŭ trafigas de konsterno el la rigardado de tiuj diversaj harmonioj, kiuj konsistigus, se kunmetitaj, la plej neelporteblan kakofonion; dum kontraŭe, aparte perceptitaj, ili konstituas la harmonion propran al ĉiu grado. Tiuj harmonioj estas elementaj kaj krudaj ĉe la malsupraj gradoj kaj ekstazigas ĉe la supraj. Tia harmonio, kiu vundas subtilperceptan Spiriton, ravas Spiriton krudperceptan; kaj kiam al malsupera Spirito estas donite delektiĝi per la delicoj de la superaj harmonioj, tiam ekstazo lin ekkaptas kaj lin penetras la preĝo; raviĝo lin forportas en la altajn sferojn de la morala mondo; li ekĝuas vivon superan al la sia kaj dezirus plu tiel vivi por ĉiam. Sed kiam la harmonio ĉesas penetri lin, li vekigas, aŭ, se oni preferas, li endormigas; en ĉiu okazo, li revenas al sia reala situacio, kaj ĉe la postsopiroj, kiujn li ellasas pro sia descendo, eliĝas preĝo al la Eternulo petanta lin pri fortoj por denova supreniro. Tio estas al la Spirito granda motivo de stimulado.

Mi ne provos klarigi la muzikajn efikojn, kiujn la Spirito estigas, agante sur la eteron; kio ja certas estas tio, ke la Spirito produktas tiajn sonojn, kiajn li volas, kaj ke li ne povas voli, kion li ne scias. Nu do, tiu, kiu multe komprenas, kiu havas en si la harmonion, kiu estas de ĝi saturita, kiu mem havas la ĝuon de ĝia intima sento, de tiu nepalpebla neniaĵo, de tiu abstraktaĵo, kiu estas la koncepto pri harmonio, — laŭvole agas sur la universan fluidon, kiu, kiel fidela instrumento, reproduktas kion la Spirito volas kaj konceptas. La etero vibras sub la agado de la volo de la Spirito; la harmonio, kiun ĉi tiu portas en si, konkretiĝas por tiel diri; ĝi eliĝas, dolĉa kaj milda, kiel viola parfumo, aŭ muĝas kiel tempesto, aŭ eksplodas kiel tondro, aŭ plendas kiel brizo; ĝi rapidas kiel fulmo, aŭ lantas kiel nebulo; ĝi estas ŝirita kiel singulto, aŭ glata kiel gazono; senbrida kiel akvofalo, aŭ kvieta kiel lago; ĝi murmuras kiel rojo, aŭ muĝas kiel torento. Ĝi prezentas jen la sovaĝan krudecon de la montaroj, jen la freŝecon de oazo; ĝi alterne montriĝas trista kaj melankolia kiel la nokto, ĝoja kaj gaja kiel la tago; kapricema kiel infano, konsolema kiel patrino, kaj protektema kiel patro;

Unua parto

malordema kiel la pasio, klara kiel la amo kaj grandioza kiel la Naturo. Veninte al tia lasta ŝtupo, ĝi konfuziĝas kun la preĝo, gloras Dion kaj portas en ravitecon tiun mem, kiu ĝin estigas aŭ konceptas.

Ho komparo! Komparo! Kial oni nepre devas utiligi cin? Kial oni nepre submetiĝu al la malnobliga neceso prunti el la konkreta naturo maldelikatajn bildojn por komprenebligi la subliman harmonion, en kiu la Spirito delectiĝas! Kaj eĉ tiel, malgraŭ la komparoj, oni ne povas komprenigi tian abstraktaĵon, kiu estas sento kiam ĝi rolas kiel kaŭzo, kiu estas sensaco kiam ĝi fariĝas efiko.

La Spirito, kiu havas la senton pri la harmonio, statas same kiel la Spirito posedanta la intelektan akiron: unu kaj alia konstante ĝuas la proprietaĵon, kiun ili havigis al si. La inteligenta Spirito, kiu instruas sian sciencon al nesciantoj, spertas la ĝojon de la instruado, ĉar li feliĉigas tiujn, al kiuj li instruas; la Spirito, kiu sonorigas la eteron per la agordoj de la harmonio, kiun li portas en si, spertas la ĝojon vidi kontentaj tiujn, kiuj lin aŭskultas.

La harmonio, la scienco, la virto estas la tri grandaj konceptoj de la Spirito: la unua lin ravas, la dua lin instruas, la tria lin nobligas. Posedataj en tuta pleneco, ili interkonfuziĝas kaj konstituas la purecon. Ho puraj Spiritoj, kiuj ilin posedas! descendu en nian mallumon kaj prilumu al ni la iradon; montru al ni la vojon, kiun vi suriris, ke ni sekvu viajn spurojn!

Kaj kiam mi pensas, ke tiuj Spiritoj, kies ekzistadon mi povas kompreni, estas limitaj estuloj, iaj atomoj antaŭ la universa, eterna Sinjoro, mia prudento konfuziĝas, konsiderante la grandecon de Dio kaj la senfinan feliĉon, kiun li ĝuas en si mem pro la sola fakto, ke lia pureco estas senfina, ĉar ĉio, kion la kreito akiras, estas nenio alia ol ero de tio emananta el la Kreinto. Nu, se la ero sukcesas fascini per la volo, allogi kaj ravi per la dolĉeco, splendi per la virto, kion do devas produkti la eterna kaj senfina fonto, de kiu ĝi devenas? Se la Spirito, kreita estulo, sukcesas ĉerpi en sia pureco tiom da feliĉo, kian ideon oni faru pri tiu, kiun la Kreinto ĉerpas en sia absoluta pureco? Eterna problemoj!

La komponisto, kiu elpensas la harmonion, ĝin esprimas per tiu maldelikata lingvo nomata muziko; li konkretigas sian ideon kaj ĝin skribas. La artisto studas la formon kaj elektas la instrumenton, kiu al li ebligu esprimi la ideon. Sub la efiko de la instrumento, la aero portas ĝin en la orelon, kiu ĝin transsendas al la animo de la aŭskultanto. Sed la komponisto estis senpova por plene esprimi la de li konceptitan harmonion, manke de taŭga lingvo. La ludanto siavice ne komprenis la tutan skribitan ideon, kaj la malobeema, ludata instrumento ne permesas al li esprimi ĉion, kion li komprenis. La orelo estas frapata de la aero maldelikata, kiu

La Spiritisma Muziko

ĝin ĉirkaŭas, kaj la animo fine ricevas, pere de ribelema organo, la malbelgan version de la ideo elkoviĝinta en la animo de la muzikmajstro. La ideo de la muzikisto estis lia intima sento; kvankam misfigurita de la iloj de ludado kaj perceptado, ĝi tamen estigas sensacojn ĉe tiuj, kiuj aŭdas ĝian version; tiuj sensacoj estas la harmonio. La muziko ilin produktis; ili estas ties efiko. La muziko metis sin en la servon de la sento por estigi la sensacon. La sento, ĉe la komponisto, estas harmonio; la sensaco, ĉe la aŭskultanto, ankaŭ estas harmonio, kun tia diferenco, ke unu ĝin konceptas kaj la dua ĝin ricevas. La muziko estas la *mediumo* de la harmonio; ĝi ricevas kaj donas la harmonion, same kiel la reflektoro estas *mediumo* de la lumo, kaj kiel vi estas *mediumo* de la Spiritoj. Ĝi transigas la harmonion pli aŭ malpli misfiguritan, laŭ tio, ĉu ĝi estas pli aŭ malpli bone ludata, same kiel la reflektoro pli aŭ malpli bone reflektas la lumon laŭ tio, ĉu ĝi estas pli aŭ malpli brila kaj polurita, kiel la *mediumo* pli aŭ malpli bone esprimas la pensojn de la Spirito laŭ tio, ĉu li estas pli aŭ malpli fleksebla.

Kaj nun, kiam la harmonio estas bone komprenata laŭ sia signifo, kiam oni scias, ke ĝi estas konceptata de la animo kaj transigata al la animo, oni komprenos la diferencon ekzistantan inter la harmonio de la Tero kaj la harmonio de la Spaco.

Ĉe vi, ĉio estas maldelikata: kiel la ilo de esprimo, tiel ankaŭ la ilo de percepto; ĉe ni, ĉio estas subtila: vi havas la aeron, ni havas la eteron; vi havas organon, kiu obstrukcas kaj vualas; ĉe ni, la percepto estas senpera, nenio ĝin vualas. Ĉe vi, la aŭtoro estas interpretata; ĉe ni, li sin komunikas senpere kaj per lingvo, kiu esprimas ĉiujn liajn konceptojn. Tamen tiuj harmonioj originas el sama fonto; kiel la lunlumo havas saman fonton kiel la lumo de la suno, la harmonio de la Tero estas nenio alia ol reflektado de la harmonio de la Spaco.

La harmonio estas tiel same nedifinebla, kiel la feliĉo, la timo, la kolero. Oni nur tiam ĝin komprenas, kiam oni posedas ĝin, kaj oni posedas ĝin nur tiam, kiam oni ĝin akiris. Ĝoja homo ne povas klarigi sian ĝojon; timemulo ne povas klarigi sian timemon; ili povas preparoli la faktojn, kiuj estigas tiujn sentojn, ilin difini, priskribi, sed la sentoj mem restas neklarigeblaj. Fakto kaŭzanta ĝojon ĉe unu, estigos nenion ĉe alia; objekto estiganta timon ĉe unu, naskos kuraĝon ĉe alia. Samaj kaŭzoj sekvigas malajn efikojn; en fiziko tio ne ekzistas, sed ĝi ekzistas en metafiziko. Tiel okazas, ĉar la sento estas propreco de la animo kaj ĉar la animoj inter si malsamas laŭ sentemeco, impresebleco kaj libereco. La muziko, kiu estas la dua kaŭzo de la perceptita harmonio, unu homon penetras kaj ravas, dum alian lasas malvarma kaj indiferenta. Tiel estas, ĉar la unua emas ricevi la impreson estigatan de la harmonio, dum la dua troviĝas

Unua parto

en mala stato, aŭskultas la aeron vibrantan sed ne komprenas la ideon, kiun ĝi portas al li. Ĉi tiu enuas kaj endormiĝas, dum tiu alia entuziasmiĝas kaj ploras. Certe, homo, kiu ĝuas la delicojn de la harmonio, estas pli progresinta, pli elpuriĝinta, ol tiu, kiun ĝi ne povas penetri; lia animo estas pli sentema, pli facile liberiĝas, kaj la harmonio, kiu faciligas al ĝi la liberiĝon, ĝin ravas kaj al ĝi ebligas pli bone vidi la moralan mondon. El tio oni devas konkludi, ke la muziko estas esence moraliga tial, ke ĝi portas la harmonion en la animojn kaj ke la harmonio ilin altigas kaj nobligas.

La influo de la muziko sur la animon, sur ĝian moralan progreson, estas de ĉiuj agnoskata, sed la kaŭzo de tiu influo estas ĝenerale nekonata. Ĝia ekspliko troviĝas tuta en tiu fakto, ke la harmonio metas la animon sub la potenco de ia sento, kiu ĝin senmateriigas. Tiu sento ekzistas en ia grado, sed ĝi disvolviĝas sub la agado de alia simila, pli nobla sento. Kiu malhavas tiun senton, al ties posedo estas laŭgrade kondukata kaj fine lasas sin de ĝi penetri kaj treniĝi en tiun idealan mondon, kie li momente forgesas tiujn maldelikatajn plezurojn, kiujn li preferas al la dia harmonio.

Nun, se oni konsideras, ke la harmonio elvenas el la koncerto de la Spirito, oni el tio deduktos, ke, se la muziko faras bonan efikon sur la animon, ĉi tiu lasta, kiu ĝin konceptas, ankaŭ influas la muzikon. La virta animo, kiu havas la pasion de la bono, de la belo, de la grandiozo kaj kiu akiris la harmonion, produktos ĉefverkojn povantajn penetri la plej kirasitajn animojn kaj ĉi tiujn kortuŝi. Se la komponisto estas senideala, kiel li povos esprimi la virton, kiun li disdegnas, la belon, kiun li ignoras kaj la grandiozon, kiun li ne komprenas? Liaj komponaĵoj, kiuj reflektos liajn sensamajn gustojn, lian malseriozecon, lian senzorgecon, estos jen malĉastaj, jen obscenaj, jen komikaj, jen burleskaj; tiuj sentoj, kiujn ili esprimos, estos komunikataj al la aŭskultantoj, kiujn ili perversigos anstataŭ plibonigi.

Moraligante la homojn, Spiritismo do forte influos la muzikon. Ĝi estigos pli da virtaj komponistoj, kiuj komunikos siajn virtojn per aŭdigo de siaj komponaĵoj.

Oni malpli ridos, oni pli ploros; gajo cedos lokon al emocio, malbelo al belo, komiko al grandiozo.

De alia flanko, tiuj aŭskultantoj, kiujn Spiritismo emigos al pli facila akiro de la harmonio, ĝuos, ĉe la aŭdado de la serioza muziko, veran ravon; ili malŝatos la frivolan kaj malĉastan muzikon, kiu mastras la amasojn. Kiam grotesko kaj obsceno estos forigitaj de belo kaj bono, la komponistoj de tia speco malaperos, ĉar, sen aŭskultantoj, ili neniom gajnos, kaj ja ĝuste kontraŭ gajno ili malpuriĝas.

La Spiritisma Muziko

Ho jes! Spiritismo havos influon sur la muzikon! Kiel alie povus esti? Ĝia alveno transformos la arton, ĝin elpurigante. Ĝia fonto estas dia, ĝia forto portos ĝin ĉien, kie estos homoj por ami, por altiĝi kaj por kompreni. Ĝi fariĝos idealo kaj celo de la artistoj. Pentristoj, skulptistoj, komponistoj, poetoj ĝin petos pri inspiroj, kiujn ĝi liveros, ĉar ĝi estas riĉa, neelĉerpebla.

La Spirito de la dirigento Rossini revenos, en nova ekzistado, por daŭre praktiki la arton, kiun li rigardas la plej altan el ĉiuj. Spiritismon li prenos kiel simbolon kaj inspiron de liaj komponaĵoj.

Rossini (Mediumo: S-ro Nivart)



La Vojo de la Vivo

La demando pri la plureco de vivoj de longa tempo pensigas filozofojn, kaj pluraj el ili konsideris la antaŭekziston de la animo kiel la solan eblan solvon por tiaj plej gravaj problemoj de psikologio ; sen tiu principo ili sin sentis haltigataj je ĉiu paŝo kaj barataj antaŭ senelira situacio, kiun ili ne povas solvi sen helpo de la plureco de vivoj.

Plej granda kontesto, kiun oni povus fari kontraŭ tiu teorio estas la manko de rememoro pri antaŭaj vivoj.

Efektive, sinsekvo da vivoj sen konscio unuj pri la aliaj ; forlasi korpon por repreni poste alian sen memoro pri la pasinteco, egalus al nenio, ĉar tio estus neniigo de la penso ; tio estus serio da novaj deirpunktoj sen ligo kun la antaŭaj; tio estus senĉesa rompo de ĉiuj korsentoj, kiuj konsistigas la ĉarmon de la nuna vivo kaj la esperon plej dolĉan kaj plej konsolan pri la estonteco ; fine, tio estus neado de ĉia morala respondeco. Tia doktrino estus entute neakceptebla kaj entute nekongrua kun la justeco de Dio, ne pli ol tiu pri unu sola vivo kun la perspektivo de absoluta eterneco de punoj La demando pri la plureco de vivoj de longa tempo pensigas filozofojn kaj pluraj el ili konsideris la antaŭekziston de la animo kiel la solan eblan solvon por tiaj plej gravaj problemoj de psikologio ; sen tiu principo ili sin sentis haltigataj je ĉiu paŝo kaj barataj antaŭ senelira situacio, kiun ili ne povas solvi sen helpo de la plureco de vivoj. Plej granda kontesto, kiun oni povus fari kontraŭ tiu teorio estas la manko de rememoro pri antaŭaj vivoj.

Efektive, sinsekvo da vivoj sen konscio unuj pri la aliaj ; forlasi korpon por repreni poste alian sen memoro pri la pasinteco, egalus al nenio, ĉar tio estus neniigo de la penso ; tio estus serio da novaj deirpunktoj

sen ligo kun la antaŭaj; tio estus senĉesa rompo de ĉiuj korsentoj, kiuj konsistigas la ĉarmon de la nuna vivo kaj la esperon plej dolĉan kaj plej konsolan pri la estonteco ; fine, tio estus neado de ĉia morala respondeco. Tia doktrino estus entute neakceptebla kaj entute nekongrua kun la justeco de Dio, ne pli ol tiu pri unu sola vivo kun la perspektivo de absoluta eterneco de punoj pro kelkaj momentaj misfaroj. Oni do komprenas, ke tiuj, kiuj havas ideon kontraŭan al reenkarniĝo ĝin rifuzas, sed ne tiel Spiritismo ĝin prezentas al ni.

La spirita vivo, ĝi diras al ni, estas la normala vivo, kun senlima rememorado pri la pasinteco ; la enkorpaĵaj vivoj estas nuraj intertempoj, iaj mallongaj periodoj dum la spirita ekzistado, kaj la tuto de ĉiuj tiuj periodoj estas ne pli ol minimuma parto de la normala ekzistado, tute same kiel se, dum plurjara vojaĝo oni haltus de tempo al tempo dum kelkaj horoj. Se, dum la enkorpaĵaj vivoj, ŝajne estas interrompoj pro manko de memoro, la ĉeno fariĝas dum la spirita vivo, kiu ne havas interrompojn ; la paŭzo fakte ekzistas nur koncerne la korpan, eksteran kaj interrilatan vivon ; kaj jen ĉi tie la manko de rememoro pruvas la saĝecon de la Providenco, kiu ne permesis, ke la homo estu tro devojigata de la reala vivo, en kiu li havas plenumendajn devojn ; krome, dum ripozo de la korpo, dum dormado, la animo parte reprenas sian konscion kaj tiam refariĝas la ĉeno interrompita nur dum la maldormo.

Kontraŭ tio oni povus ankoraŭ kontraŭstari kaj demandi, kian profiton oni povus tiri el tiuj antaŭaj vivoj por sia pliboniĝo, se oni ne memoras la mispaŝojn faritajn. Spiritismo respondas, ke forgeso de malfeliĉaj ekzistadoj, kune kun la mizeroj de la nuna vivo, farus ĉi tiun lastan eĉ pli pena ; tio estas do troa ŝarĝo da suferoj, kiun Dio volis al ni eviti ; sen tio, kia estus nia humiliĝo ĉe la konscio pri tio, kio ni estis ! Koncerne nian pliboniĝon, rememorado estas senutila. Dum ĉiu vivo ni faras kelkajn paŝojn antaŭen ; ni akiras kelkajn bonajn kvalitojn kaj demetas kelkajn malperfektaĵojn ; ĉiu el ili estas do nova deirpunkto, ĉe kiu ni estas tio, kion ni faris, ĉe kiu oni konsideras nin laŭ tio, kio ni estas, sen la bezono, ke ni zorgu pri tio, kio ni estis. Se dum antaŭa vivo ni estis iaj antropofagoj, kiom gravas, se ni jam ne estas tio ? Se ni havis ian ajn difekton, pri kiu jam ne restas spuro, tio do estas jam kvitigita ŝuldo, pri kiu ni jam ne devas nin okupi. Ni supozu, male, ke estas difekto, pri kiu ni nur duone nin alĝustigis, tiam la restaĵo troviĝos dum la sekva vivo kaj oni devas strebi por sin korekti. Ni prenu ekzemplon : unu homo estis murdinto kaj ŝtelisto ; li estis punita, ĉu en la enkorpa vivo,

ĉu en la spirita ; li pentas kaj sin korektas koncerne la unuan fiaĵon, sed ne koncerne la duan ; dum sekva vivo, li estos nur ŝtelisto ; eble granda ŝtelisto, sed jam ne murdemulo ; ankoraŭ unu paŝo antaŭen, kaj li estos nur etŝtelisto ; unu paŝon poste, li ne plu ŝtelos, sed eble li emos ŝteli, sed lia konscienco lin detenas ; unu plia klopodo, kaj ĉia spuro de la morala malsano malaperos, kaj li estos modelo de honesteco. Kiom gravas nun tio, kio li estis ? Ĉu la rememoro pri morto sur eŝafodo ne estus nura torturo, nura eterna humiligo ? Apliku tiun rezonon al ĉiuj malvirtoj, al ĉiuj eraroj, kaj vi povos vidi, ke la animo pliboniĝas laŭ iom-post-ioma pasado tra la hardiloj de enkarniĝo. Ĉu Dio ne estas plej justa, ke Li faris la homon la juĝanto de sia propra sorto, per la klopodoj, kiujn li povas fari por sin plibonigi, anstataŭ krei lian animon samtempe kiel lian korpon, kaj anstataŭ kondamni lin al eternaj turmentoj pro pasemaj eraroj, ne donante al li rimedojn por sin purigi de siaj malperfektecoj ?

Per plureco de vivoj, lia estonteco sidas en liaj manoj ; se li bezonas longan tempon por pliboniĝo, tiam li akceptas la konsekvencojn ; ĝi estas plej supera justeco, sed espero neniam fermiĝas al li.

La sekvanta komparo eble helpas kompreni la peripetiojn de la vivo de animo.

Oni prezentu al si ian longan vojon, laŭlonge de kiu troviĝas, de tempo al tempo, sed je neregulaj intervaloj, arbaroj, kiujn oni devas trairi ; ĉe la enirejo de ĉiu arbaro la larĝa, bela vojo interrompiĝas kaj reformiĝas nur ĉe la elirejo. Unu vojaĝanto iras laŭ tiu vojo kaj envenas en la unuan arbaron ; sed jen li sentas sin sendirekta; ia senelira labirinto, meze de kiu li perdiĝas ; la suna helo malaperis de sub la densa foliaro de la arboj ; li vagas, ne sciante, kien li iras ; fine, post nekredebla laciĝo, li atingas la ekstremon de la arbaro, sed elĉerpita, ŝirita de dornoj, vundita de ŝtonoj . Tie li retrovas la vojon kaj lumon, kaj li sekvas sian vojon, klopodante sin resanigi de la vundoj.

Iom poste, li trovas duan arbaron, kie lin atendas la samaj malfacilaĵoj ; sed nun li jam havas iom da sperto kaj li eliras malpli vundita. Ie li renkontas arbohakiston, kiu indikas al li la direkton sekvotan kaj evitigas al li misvojiĝon. Post ĉiu nova trairado lia lerteco kreskas, tiel ke la baroj estas pli kaj pli facile transpasataj ; kun la certeco, ke li retrovos la belan vojon ĉe la elirejo, tia fido lin subtenas ; tiam li scipovas jam orientiĝi por trovi la elirejon pli facile. La vojo finiĝas sur la supro de tre alta montaro, de kie li supervidas la tutan iradon, de la elirpunkto ; tiel li vidas la malsamajn arbarojn, kiujn li trairis kaj li rememoras la suferojn, kiujn

li superis, sed tiu rememorado neniel estas peniga, ĉar li jam atingis la finon ; li estas kiel la maljuna soldato, kiu, en la trankvilo de la hejma etoso, rememoras la batalojn, kiujn li partoprenis. Tiaj arbaroj dise metitaj sur la vojo estas por li kiel nigraj punktoj sur blanka rubando ; li diras al si : « Kiam mi estis en tiuj arbaroj, precipe en la unuaj, kiel longaj por trairado ili aspektis al mi ! Ŝajnis al mi, ke mi neniam alvenos al la fino ; ĉio ŝajnis al mi grandega kaj nekomprenbla ĉirkaŭ mi. Kaj kiam mi memoras, ke sen tiu brava arbohakisto, kiu min remetis sur la ĝustan vojon, eble mi ankoraŭ starus tie ! Nun, kiam mi konsideras tiujn samajn arbarojn de la punkto kie mi estas, kiel etaj ili aspektas al mi ! Ŝajnas al mi, ke per unu sola paŝo mi povus ilin trairi ; krome, mia vidkapablo ilin penetras, kaj mi tie distingas plej etajn detalojn ; nun mi vidas klare, ne kiel antaŭe. »

Tiam, maljunulo diras al li : « Mia filo, vi staras ĉe la fino de la vojaĝo, sed ia senfina ripozado lacigus vin per mortiga enuado kaj vi okupiĝus pri rememorado de la suferoj, kiujn vi trapasis kaj kiuj aktivigis viajn korpopartojn kaj vian spiriton. Vi vidas de ĉi tie grandan kvanton da vojaĝantoj sur la vojo, kiun vi trairis, kaj, kiel vi, riskas devojiĝi ; vi estas sperta, vi jam timas nenion ; iru al ili kaj strebu ilin gvidi per viaj konsiloj, por ke ankaŭ ili alvenu pli frue.

- Mi volonte iros, respondas nia homo ; sed, li aldonas, kial ne ekzistas rekta vojo de la elirpunkto ĝis ĉi tie ? Tio evitigus al la vojaĝantoj trairadon tra tiuj abomenindaj arbaroj.

- Mia filo, respondas la maljunulo, rigardu bone kaj vi vidos, ke certa kvanto da homoj tion evitas ; ili estas tiuj, kiuj akiris pli frue la necesan sperton, scipovas preni ian pli rektan, pli mallongan vojon por alveno ; sed tia sperto estas frukto de laboro, kiun ili devis plenumi ĉe la unuaj trairadoj, tiel ke ili alvenas ĉi tie nur pro sia merito. Kio estus al vi mem, se vi ne estus pasinta ? La agado, kiun vi devis plenumi, la imagrimedoj, kiujn vi devis elvolvi por malfermi vojon pligrandigis viajn konojn kaj elvolvis vian inteligentecon ; sen tio, vi estus ankoraŭ sama novulo kiel je eliro. Kaj krome, klopodante vin mem senembarasiĝi, vi mem kontribuis por la plibonigo de la arbaroj, kiujn vi trairis ; kion vi faris estis malmulto neperceptebla ; sed pensu pri la miloj da vojaĝantoj, kiuj siavice iradis, kaj kiuj, laborante por si mem, laboris senscie por komuna bono. Ĉu ne estas juste, ke ili ricevas la salajron pro sia penado per ripozo, kiel ili ĝuas ĉi tie ?

Kiun rajton ili havus pri ripozo, se ili farus nenion ?

- Mia patro, respondas la vojaĝanto, en unu el tiuj arbaroj, mi renkontis homon, kiu diris al mi : « Jen proksime estas grandega abismo, kiun

oni devas transpasi per salto ; sed, inter mil, apenaŭ unu sukcesas ; ĉiuj aliaj falas en la fundon en brulantan fajrejon kaj senrevene perdiĝas. » Tian abismon mi tamen ne vidis.

- Mia infano, ĝi ja ne ekzistas, male tio estus abomeninda falilo al ĉiuj vojaĝantoj, kiuj venas al mi. Mi bone scias, ke estas multaj venkendaj malfacilaĵoj, sed mi scias ankaŭ, ke pli aŭ malpli frue ili transpasos ilin ; se mi kreus neeblaĵojn por unu sola homo, kiu devus pereji, tio estus kruelaĵo, des pli, se mi tion farus por la plimulto. Tia abismo estas ia alegorio, kaj vi vidos la klarigon. Rigardu la vojon, ĉe la intervalo de la arbaroj ; inter la vojaĝantoj, vi vidas iujn, kiuj iras malrapide, kun gaja mieno ; vidu tiujn amikojn, kiuj devojiĝis en la labirintoj de la arbaro, kiel ili estas feliĉaj, ke ili retroviĝas ĉe la elirejo ; sed flanke de tiuj, estas aliaj, kiuj sin trenas pene ; ili estas elĉerpitaj kaj petegas kompaton al pasantoj, ĉar ili kruele suferas vundojn, kiuj pro siaj mankoj ili ricevis tra la dornejoj ; sed ili resaniĝos, kaj tio estos por ili ia leciono, kiun ili profitos en alia arbaro, kiun ili devos trairi, kaj el kiu ili eliros malpli vunditaj. La abismo estas figuro pri la malbono, kiun ili suferas, kaj dirinte, ke el milo nur unu sukcesas, tiu homo pravus, ĉar malprudentuloj multe pli abundas ; sed li malpravus, kiam li diris, ke falinto neniam plu eliros ; ĉiam ekzistas rimedo por alveni al mi. Iru, mia filo, iru montri tiun rimedon al tiuj, kiuj sidas sur la fundo de la abismo ; iru subteni la vunditojn survoje kaj montri la vojon al tiuj, kiuj trairas la arbarojn. La vojo estas la figuro de la spirita vivo, sur kies trairado oni estas pli aŭ malpli feliĉa ; la arbaroj estas la enkorpaj vivoj, kiam oni laboras por sia antaŭenirado, kaj samtempe por la ĝenerala agado ; la vojaĝanto, kiu alvenas al la fino kaj revenas por helpi tiujn, kiuj estas malantaŭe estas la gardanĝeloj, la misiistoj de Dio, kiuj trovas sian feliĉon sur tiu vojo, sed ankaŭ ĉe agado, kiun ili plenumas por fari bonon kaj obei la superegatan Sinjoron.



Kvin Alternativoj por la Homaro

Tre malmulte da homoj vivadas senzorge pri la estonteco. Se oni malkvietiĝas pri tio, kio okazos post dudek-kvar-hora tago, des pli prave oni nature okupiĝas pri tio, kio okazos al ni post la granda vojo de la vivo, ĉar ne temas pri kelkaj momentoj, sed pri la eterneco. Ĉu ni plu vivos aŭ ne ? Ne eblas meza vojo ; ĝi estas afero de vivo aŭ morto ; ĝi estas la ekstrema alternativo !...

Se oni demandas pri la intima sento de preskaŭ ĉiuj homoj, ĉiuj respondos : « Ni vivos. » Tia espero estas por ili ia konsolo. Tamen, precipe de kelka tempo, eta malplimulto strebas pruvi al ili, ke ili ne plu vivos. Tiu skolo faris sekvantojn, necesas konsenti, kaj ĉefe inter tiuj, kiuj timas la respondecon pri la estonteco kaj opinias pli komforte ĝui la estantecon sen ĝeno, sen konsidero pri la perspektivo de la konsekvencoj. Sed tiu estas la opinio de la pli eta nombro.

Se ni plu vivos, kiel ni vivos ? En kiaj kondiĉoj ni estos ? Ĉi tie la sistemoj varias laŭ religiaj kaj filozofiaj kredoj. Tamen, ĉiuj opinioj pri la estonteco de la homo povas limiĝi al kvin ĉefaj alternativoj, kiujn ni simplige resumos, por ke la komparo estu pli facila kaj ĉiu povu elekti konsciencie tiun, kiu ŝajnas al li la plej racia kaj kiu plej bone respondas al la personaj aspiroj kaj al la bezonoj de la socio. Tiuj kvin alternativoj estas tiuj, kiuj rezultas de la doktrinoj pri *materiismo*, *panteismo*, *diismo*, *dogmismo* kaj *Spiritismo*.

I – Materiisma doktrino

Homa inteligento estas propraĵo de la materio ; ĝi naskiĝas kaj mortas kun la organismo. Homo estas *nenio antaŭe*, *nenio post* la korpa vivo.

Unua parto

Konsekvencoj. Ĉar homo estas nur materio, ekzistas nenio reala kaj enviinda krom materiaj ĝuoj ; la moralaj sentoj ne havas estontecon; la moralaj ligoj senrevne rompiĝas post la morto ; la mizeroj de la vivo estas senkompensaj; memmortigo fariĝas racia kaj logika fino de la ekzistado, kiam suferoj estas senesperaj koncerne mildiĝon; estas senutile penadi por kontraŭstari siajn malbonajn inklinojn ; oni vivu por si mem kiel eble plej bone, dum oni estas ĉi tie ; stulte senlace sin ĝeni kaj oferi sian komforton por alia homo, nome por estuloj, kiuj siavice estingiĝos kaj kiujn oni ne plu revidos ; sociaj devoj senbazaj, bono kaj malbono estas afero de konvencio ; socia bremsilo reduktiĝas al materia potenco de la civila leĝo.

Noto. – Ne estos senutilaj ĉi tie al niaj legantoj kelkaj pecoj de artikolo, kiun ni publikigis pri materiismo, en la numero aŭgusta 1868 de la *Revuo*.

« Materiismo, ni diris, firmiĝis kiel neniam antaŭe, stariĝis kiel plej supera regulanto de moralaj destinoj de la homaro, kaj kaŭzis timegon al homamasoj pro la neeviteblaj sekvoj de ĝiaj doktrinoj ĉe la socia ordo ; precize pro tio ĝi estigis favore al spiritualismaj ideoj ian fortan reagon, kiu devus al ĝi pruvi, ke ĝi sidas malproksime de la simpatio ĝenerala, kiel ĝi supozas, kaj ke ĝi tute iluziiĝas, se ĝi esperas iam trudi siajn leĝojn al la mondo.

« Senkonsteste, la spiritualismaj kredoj de pasinta tempo estas nesufiĉaj por ĉi tiu jarcento : ili ne staras je la intelekta nivelo de nia generacio ; ĉe multaj punktoj, ili estas kontraŭataj de la pozitivaj atingoj de scienco ; ili liveras al la spirito ideojn nekongruajn kun la bezono pri pozitiveco, kiu regas en la moderna socio ; krome, ili faras la grandegan misaĵon sin trudi per blinda fido kaj malpermesi la liberan ekzamenadon ; de tio, sen ia dubo, venas la elvolviĝo de nekredemo ĉe plej multaj homoj ; estas tre evidente, ke se la homoj estus nutrataj, de la infana aĝo, per ideoj, kiuj poste estus konfirmataj de racio, tiam ne ekzistus nekredantoj. Kiom da homoj, kondukita al kredo per Spiritismo, diris al ni : «Se oni ĉiam estus prezentintaj Dion, la animon kaj la estontan vivon per racia maniero, ni neniam estus dubintaj ! »

« Ĉar komence oni ricevis ian malbonan aŭ malveran instruon, ĉu tial oni devas ĝin rifuzi ? Tiel estas ĉe spiritualismaj aferoj, same kiel ĉe leĝdonado kaj ĉiuj sociaj institucioj : necesas alproprigi novaĵojn, pro la risko estingiĝi. Sed anstataŭ prezenti ion pli bonan ol la malnovan spiritualismon, materiismo preferas forviŝi ĉion, tiel ke ĝi liberiĝas de serĉado, kaj tio ŝajnis pli komforta ol ĝeni sin per la ideo pri Dio kaj pri estonteco. Kion oni pensus pri kuracisto kiu, trovinte la nutradon de resaniĝanto ne sufiĉe ekvilibra por lia temperamento, preskribus, ke li entute manĝu nenion ?

« Kion plej mirigan oni trovas ĉe la plimulto el la materiistoj de la moderna skolo estas spirito de netoleremo en plej ekstrema grado, ĝuste ĉe ili, kiuj postulas senĉese la rajton libere pensi !... »

« ... Ekzistas nuntempe, flanke de certa partio, ia opozicia movado kontraŭ la spiritualismaj ideoj ĝenerale, en kiuj Spiritismo nature inkluziviĝas. Ĝi serĉas ne ian pli bonan kaj pli justan Dion, sed materiecan Dion, malpli ĝenan, ĉar al tiu oni ne devus submetiĝi. Neniu kontestu al tiu partio la rajton havi sian opinion, pridiskuti kontraŭajn opiniojn ; sed oni ne povas koncedi al ĝi la pretendon, almenaŭ strangan, ĉe homoj, kiuj pozas kiel apostoloj de libereco, malpermesi al aliaj kredi laŭ sia maniero kaj diskuti la doktrinojn, pri kiuj ili ne konsentas. Netoleremo kontraŭ netoleremo, unu ne superas la alian... »

II – Panteisma doktrino

La inteligenta principo aŭ animo, sendependa de la materio, dise troviĝas, de la naskiĝo, en la universa tutaĵo ; ĝi individuigiĝas en ĉiu estulo dum la vivo, kaj revenas post la morto al la komuna amaso, kiel gutoj de pluvo en la Oceanon.

Konsekvencoj. – Sen individueco kaj sen konscio pri si mem, la estulo estas, kiel se ĝi ne estus ; la moralaj sekvoj de tia doktrino estas precize la samaj, kiel ĉe la materiisma doktrino.

Noto. – Certa kvanto da panteistoj konsentas, ke la animo, ĉerpita ĉe la naskiĝo en la universa tutaĵo, tamen konservas sian individuecon dum nedifinita tempo, kaj ke ĝi revenas al la amaso nur post kiam ĝi atingis la lastajn gradojn de perfekteco. La sekvoj de tiu variaĵo de kredo estas absolute la samaj kiel tiuj de la panteisma doktrino mem, ĉar estas tute senutile sin doni al la penado akiri iujn konojn, se oni devas perdi la konscion per nuliĝo post relative mallonga tempo ; se la animo ĝenerale rifuzas tian koncepton, kiom pli da ĉagreno ĝi sentus, prezentante al si, ke la momento kiam ĝi atingos la plej superan konon kaj perfektecon estos tiu sama momento, kiam ĝi kondamniĝos al perdo de la frukto de ĉiuj siaj laboroj, pro la perdo de sia individueco.

III – Diisma doktrino

Diismo entenas du tre malsamajn kategoriojn de kredantoj : la *sendependaj diistoj* kaj la *providencaj diistoj*.

La *sendependaj diistoj* kredas pri Dio ; ili akceptas ĉiujn liajn atributojn kiel de kreanto. Dio, ili diras, starigis la ĝeneralajn leĝojn, kiuj regas

la universon, sed tiuj leĝoj, unu fojon kreitaj, funkcias per si mem, kaj ilia aŭtoro ne plu okupas sin pri ili. La kreitoj faras tion, kion ili volas aŭ tion, kion ili povas, kaj li ne malkvietiĝas pro tio. Ne ekzistas ia Providenco ; Dio ne okupas sin pri ni, estas vane danki aŭ preĝi al li.

Kiuj neas ĉian intervenon de la providenco en la vivon de la homo estas kiel infanoj, kiuj taksus sin sufiĉe prudentaj por liberiĝi de la zorgado, konsiloj kaj protektado de siaj gepatroj, aŭ pensus ke iliaj gepatroj devus ne plu okupi sin pri ili, ekde la momento, kiam ili venis en la mondon.

Sub la preteksto glori Dion, kiu laŭ ili estas tro granda por malleviĝi ĝis la kreitoj, ili faras lin ia granda egoisto, kaj lin malsuprenigas je la nivelon de bestoj, kiuj forlasas sian idaron al la elementoj.

Tia kredo estas rezulto de fiero; ĝi estas ankoraŭ la penso esti submetita al supera potenco, kiu ofendas la memestimon kaj de kiu oni provas liberiĝi. Dum unuj absolute rifuzas tiun potencon, aliaj akceptas ties ekziston, sed nuligas ĝin.

Ekzistas esenca diferenco inter la *sendependa diisto*, pri kiu ni ĵus parolis kaj la *providenca diisto* ; efektive, tiu lasta kredas ne nur pri la ekzisto kaj krea potenco de Dio, koncerne la devenon de ĉio ; li krome kredas pri lia senĉesa interveno en la kreaĵaron kaj preĝas al li, sed li ne konsentas pri la ekstera kulto kaj pri la dogmemo nuntempa.

IV – Dogmiska doktrino

La animo, sendependa de materio, estas kreita ĉe la naskiĝo de ĉiu estulo : ĝi postvivas kaj konservas sian individuecon post la morto ; ĝia sorto, ekde tiu momento, estas neŝanĝebla fiksita ; ĝiaj postaj progresoj estas neniam : sekve, ĝi estas eterne tia, kia ĝi estis dum la vivo, intelekto kaj morale. La malbonuloj kondamniĝas al punoj porĉiamaj kaj senrevenaj en la infero, kaj rezultas por ili komplete senutila ia ajn pento. Tiel ŝajnas, ke Dio rifuzas al ili la eblecon ripari la faritan malbonon. La bonuloj estas rekompencataj per la vidado de Dio kaj la eterna kontemplado en la ĉielo. La okazoj, kiuj povas eterne meriti ĉielon aŭ inferon estas lasataj al decido kaj juĝo de erarpovaj homoj, al kiuj estas donata la ebleco absolvi aŭ kondamni.

Noto. – Se oni kontraŭdiras kontraŭ ĉi tiu lasta aserto, ke Dio mem lasinstance juĝas, tiam oni povus demandi, kian valoron havas la decido farata de homoj, se ĝi eble estas nuligota.

Definitiva kaj absoluta disigo de kondamnitaj disde elektitoj. Senutileco de moralaj helpoj kaj konsoloj por kondamnitaj. Kreado de

anĝeloj aŭ privilegiaj animoj, liberaj de ĉia strebado por atingi perfektecon, k.t.p., k.t.p..

Konsekvencoj. – Ĉi tiu doktrino lasas sen solvo la jenajn gravajn problemojn :

1^a De kie venas la denaskaj intelektaj kaj moralaj dispozicioj, kiuj faras, ke homoj naskiĝas bonaj aŭ malbonaj, inteligentaj aŭ idiotaj ?

2^a Kiu estas la sorto de la infanoj, kiuj mortas en frua aĝo ?

Kial ili atingos la vivon de eterna feliĉo sen la strebado, al kiu aliaj devas submetiĝi dum longaj jaroj ? Kial ili estas rekompencataj, ne povinte fari bonon, aŭ senigataj de perfekta feliĉo, ne farinte malbonon ?

3^a Kia estas la sorto de kretenoj kaj idiotoj, kiuj ne konscias pri siaj agoj ?

4^a Kie estas la justeco de denaskaj mizeroj kaj malsanoj, se ili ne rezultas de ia ajn ago en la nuna vivo ?

5^a Kia estas la sorto de sovaĝuloj kaj de ĉiuj, kiuj neeviteble mortas en stato de morala malsupereco en kiu ili troviĝas pro la naturo mem, se al ili ne estas donita la ebleco poste progresi ?

6^a Kial Dio kreas animojn pli favoratajn, kompare kun aliaj ?

7^a Kial li revokas antaŭtempe tiujn, kiuj povus plibonigi sin, se ili vivus pli longe, se de tiu momento ne estas donita al ili la ebleco progresi post la morto ?

8^a Kial Dio kreis anĝelojn, kiuj atingis la perfektecon sen laborado, dum aliaj kreitoj submetiĝas al plej krudaj elprovaĵoj, ĉe kiuj ili havas pli da ŝancoj fiaski ol venki ? k.t.p., k.t.p.

V – Spiritisma doktrino

La inteligenta principo estas sendependa de la materio. La individua animo antaŭekzistas kaj postvivas la korpon. Sama starta punkto por ĉiuj animoj, senescepte ; ĉiuj kreiĝas simplaj kaj senciaj kaj submetiĝas al senlima progreso. Neniaj privilegiaj kaj pli favorataj kreitoj, kompare unuj kun aliaj ; anĝeloj estas iaj estuloj, kiuj atingis perfektecon, post kiam ili trapasis, kiel ĉiuj aliaj kreitoj, ĉiujn ŝtupojn de malsupereco. La animoj aŭ Spiritoj progresadas pli aŭ malpli rapide, pro sia libera elekto, per sia strebado kaj bonvolemo.

La spirita vivo estas la normala vivo ; la enkorpa vivo estas momenta fazo de la vivo de la Spirito, dum kiu ĝi pormomente sin vestas per materia kovraĵo, kiun ĝi demetas post la morto.

Unua parto

La Spirito progresadas en la korpa kaj spirita statoj. La korpa stato estas necesa al la Spirito ĝis ĝi atingos certan gradon de perfekteco : ĝi elvolviĝas per la laboro, al kiu ĝi submetiĝas, por siaj propraj bezonoj, kaj ĝi akiras specialajn praktikajn konojn. Ĉar unu sola enkorpa ekzisto estas nesufiĉa por fari, ke ĝi akiru ĉiajn trajtojn de perfekteco, tial ĝi reprenas korpon tiomfoje, kiom estas necese, kaj ĉiufoje ĝi alvenas kun la progreso, kiun ĝi plenumis dum siaj antaŭaj ekzistoj kaj dum la spirita vivo. Akirinte en la mondo ĉion, kion ĝi povis tie akiri, ĝi forlasas ĝin por iri al aliaj mondoj pli progresintaj, intelekte kaj morale, ĉiam malpli materiaj, kaj tiel sinsekve ĝis la perfekteco ebla al kreito. La stato feliĉa aŭ malfeliĉa de la Spiritoj dependas de ilia morala progreso ; ilia puno estas konsekvenco de ilia persisto en malbono, tiel ke se ili persistas en malbono, ili mem sin punas ; sed la pordo de pento neniam al ili fermiĝas, kaj ili povas, kiam ajn ili tion volas, reveni al la vojo de bono kaj atingi siatempe la tutan progreson.

Infanoj mortintaj en frua aĝo povas esti pli aŭ malpli progresintaj, ĉar ili vivis dum antaŭaj ekzistadoj, kiam ili povis fari bonon aŭ agi malbone. La morto ne liberigas ilin de la elprovaĵoj, kiujn ili devos alfronti, kaj en konvena tempo ili rekomencas novan ekziston sur la tero aŭ en superaj mondoj, laŭ ilia grado de altiĝo.

La animo de kretenoj kaj idiotoj havas la saman naturon kiel tiu de ĉiu alia enkarniĝinto ; ilia inteligenteco estas ofte supera, kaj ili suferas pro nesufiĉeco de rimedoj por rilati kun siaj kunuloj en la vivo, kiel mutuloj suferas por parolmanko. Ili misuzis sian inteligentecon en antaŭaj ekzistadoj, kaj ili memvole akceptis tiun nekapablon por elpagi la malbonon de ili faritan, ktp.



La Spirita Morto

La demando pri *spirita morto* estas unu el la novaj principoj, kiuj elstarigas la progresadon de la spiritisma scienco. La maniero, kiel oni ĝin prezentis en iu individua teorio faris ĝin tuj rifuzita, ĉar ĝi ŝajne implicis samtempe la perdon de la individua *mio* kaj transformojn de la animo kiel tiujn de la materio, en kiu la elementoj diseriĝas por formi novajn korpojn. La feliĉaj, perfektigintaj estuloj estus fakte novaj estuloj, kio estas neakceptebla. La egaleco de estontaj suferoj kaj ĝuoj estas evidenta nur pro la daŭro de tiuj samaj estuloj, kiuj ascendas laŭ la deklivo de progreso kaj puriĝas per sia laboro kaj la strebado de sia volo.

Tiaj estus la konsekvencoj, kiujn oni povus tiri *a priori* el tia teorio. Tamen, ni devas konsenti, ke oni ne prezentis ĝin kun la aroganteco de fierulo, kiu venas altrudi sian sistemon ; la aŭtoro modeste diris, ke li venis ĵeti ideon sur la kampon de diskutado, kaj ke el tia ideo povus eliri nova veraĵo. Laŭ la averto de niaj eminentaj spiritgvidantoj, ĝi eraris malpli je la esenco ol je la formo, kiu favoris falsan interpreton ; pro tio ili nin stimulis serioze studi la demandon ; tion ni klopodas fari surbaze de observado de la faktoj, kiuj rezultas de la situacio de la Spirito ĉe la du plej gravaj momentoj, nome la reveno al enkorpora vivo kaj la eniro en la spiritan vivon.

Je la momento de la korpa morto, la Spirito eniras en konfuziĝon kaj perdas la konscion pri si mem, tiel ke ĝi neniam ĉeestas la lastan spiron de sia korpo. Iom post iom la konfuzo forvaporiĝas kaj la spirito sin rekonas, kiel homo kiu eliĝas el profunda dormo ; ĝia unua sento estas tiu de liberiĝo for de ĝia karna ŝarĝo ; poste venas la sento pri fremdeco, pro la vido de la nova medio, kie ĝi troviĝas . Ĝi estas en la situacio de homo, kiun oni kloroformis por submeti lin al amputo kaj kiun oni transportas, dum dormado, aliloken. Kiam li revenas, li sentas sin malembarasita de

la membro, kiu lin suferigis ; poste, li serĉas tiun membron, kiun li kun surprizo jam ne sentas ; unuamomente, la Spirito same serĉas sian korpon ; ĝi vidas ĝin ĉe sia flanko ; ĝi scias, ke tiu estas la ĝia kaj miras, ke ĝi estas disigita de ĝi ; nur iom post iom ĝi konscias pri sia nova situacio.

Je tiu fenomeno, okazis nur ŝanĝo ĉe la materia situacio ; sed, koncerne moralon, la Spirito estas precize la sama, kia ĝi estis kelkajn horojn antaŭe ; ĝi ne ricevis iun ajn senteblan modifon ; ĝiaj fakultoj, ĝiaj ideoj, ĝiaj gustoj, ĝiaj tendencoj, ĝia karaktero estas la samaj ; la ŝanĝoj, kiuj povus al ili okazi, venas nur laŭgrade, pro la influo de la ĉirkaŭaĵo. Resume, ĝi mortis nur je la korpo ; je la Spirito, ĝi nur dormis.

Ĉe reenkarriĝo, la afero okazas tute malsame.

Ĉe la momento, kiam koncipiĝas la korpo destinita al la Spirito, ĉi tiu estas kaptata de fluideca forto, kiu, simile al ligilo, ĝin tiras kaj alproksimigas al ĝia nova loĝejo. De tiam, ĝi apartenas al la korpo, kiel la korpo al ĝi apartenas ĝis la morto de ĉi tiu lasta ; tamen, kompleta unuiĝo, reala posedo, okazas sole nur ĉe la naskiĝo.

De la momento de la koncipo, perturbiĝo ekestas en la Spirito ; ĝiaj ideoj fariĝas konfuzaj, ĝiaj fakultoj perdiĝadas, la perturbiĝo kreskas laŭgrade kiel la ligilo streĉiĝas ; ĝi fariĝas kompleta dum la lasta tempo de la gravedeco ; tiel ke la Spirito neniam konscias pri la momento mem de la naskiĝo de sia korpo, eĉ pli ol ĉe sia morto ; ĝi havas pri tio nenian konscion.

De la momento, kiam la infano ekspiras, la perturbiĝo iom post iom malaperas, la ideoj laŭgrade revenas, sed en aliaj kondiĉoj ol okaze de la morto de la korpo.

Okaze de reenkarriĝo, la fakultoj de la Spirito ne estas simple torporataj de iaspeca momenta dormo, kiel ĉe la reveno al la vivo spirita ; ili ĉiuj, senescepte, venas al *latenta* stato. La enkorpa vivo havas kiel celon elvolvi ilin per ekzerciĝado, sed ne ĉiuj samtempe, ĉar la praktikado de unu povus nuligi la elvolvadon de alia, tiel ke, per sinsekva elvolviĝo, unuj apogiĝas sur la aliaj. Estas do oportune, ke iuj restu en ripozo, dum aliaj kreskas ; jen kial, en nova vivo, la Spirito eble prezentiĝas sub aspekto tute malsama, precipe se ĝi estas pli evoluinta ol dum la antaŭa vivo.

En unu, la muziktalento, ekzemple, povos esti tre aktiva ; ĝi konceptos, perceptos kaj sekve plenumos ĉion, kio estas necesa por la elvolviĝo de tiu fakulto ; en alia ekzisto, estos la vico de pentrarto, de ekzaktaj sciencoj, de poezio, k.t.p. ; dum tiuj novaj fakultoj ekzerciĝas, tiu pri muziko restos latentaj, entute konservante la jam faritan progreson ; rezultas, ke tiu, kiu

estis artisto dum unu vivo povos esti sciencisto, ŝtatisto, silentema homo dum alia, tiel ke li estos nula en la arta kampo, kaj reciproke.

La latentaj fakultoj dum la reenkarneigo klarigas la forgeson pri antaŭaj vivoj, tiel ke ĉe la morto de la korpo, ĉar la fakultoj restis nur en stato de supraĵa dormo, la rememoroj pri la vivo ĵus finita estas komplete reprenataj. La fakultoj, kiuj esprimiĝas nature rilatas al la pozicio, kiun la Spirito devas okupi en la mondo, kaj al la elprovaĵoj, kiujn ĝi elektis ; tamen, foje okazas, ke la sociaj antaŭjuĝoj ĝin delokas, kio kaŭzas, ke iuj homoj staras intelekte kaj morale super aŭ sub la pozicio, kiun ili okupas. Tiu misklasigo, pro ties sekvaj malfacilaĵoj, estas parto de la elprovaĵoj ; ĝi devas ĉesi laŭ la progresado. En evoluanta socia ordo, ĉio reguliĝas laŭ la logiko de naturaj leĝoj, kaj tiu, kiu kapablas esti nur ŝuisto ne estas advokata, pro rajto de naskiĝo, regi popolojn.

Ni revenu al la infano. Ĝis la naskiĝo, ĉar ĉiuj fakultoj estas latentaj, la Spirito havas nenian konscion pri si mem. Ĉe la momento de naskiĝo, tiuj, kiuj devas aktiviĝi ne prenas subite sian impulson ; ĝia elvolviĝo sekvas tiun de la organoj, kiuj devas taŭgi por ties manifestiĝo ; per sia intima aktiveco, ili stimulas la elvolviĝon de la responda organo, kiel naskiĝanta tigo puŝas la ŝelon de arbo. Rezultas de tio, ke dum la komenca infanaĝo la Spirito ne plene ĝuas iun ajn el siaj fakultoj, ne nur kiel enkarniĝinto, sed eĉ kiel Spirito ; ĝi estas efektive infana, kiel la korpo, al kiu ĝi estas ligita. Ĝi ne troviĝas pene kunpremita en tiu malperfekta korpo, male Dio estus farinta la enkarniĝon ia torturo al ĉiaj Spiritoj, bonaj aŭ malbonaj.

Alie okazas ĉe idioto kaj kreteno ; ĉar la organoj ne elvolviĝis paralele kun la fakultoj, tial la Spirito fine troviĝas en situacio de ia homo katenita per ligiloj, kiuj al li malhelpas liberecon de movoj. Tia estas la kaŭzo, ke oni povas elvoki la spiriton de idioto kaj havigi al si prudentajn respondojn, dum tiu de fruaĝa infano aŭ de tiu, kiu ankoraŭ ne vidis lumon ne kapablas respondi.

Ĉiuj fakultoj, ĉiuj kapablecoj, estas latentaj en la Spirito ekde ties kreio ; ili estas tie en rudimenta stato, kiel ĉiuj organoj en la unua ĝermo de senforma feto, kiel ĉiuj partoj de arbo en semo. Sovaĝulo, kiu poste fariĝos civilizita homo jam posedas en si la ĝermojn, kiuj iam faros lin saĝulo, granda artisto aŭ granda filozofo.

Laŭgrade kiel tiuj ĝermoj atingas maturecon, la Providenco al li donas, *por la surtera vivo*, ian korpon oportunan por liaj novaj kapablecoj ; tiel la cerbo de Eŭropano estas pli komplete organizita, havanta pli grandan kvanton da rimedoj ol tiu de sovaĝulo. *Por la spirita vivo*, ĝi

donas al li ian fluidan korpon, aŭ perispiriton, pli subtilan, percepteman pri novaj sentoj. Laŭgrade kiel la Spirito evoluas, la naturo havigas al ĝi rimedojn al ĝi necesajn.

En la senco de malorganizigo, de dispartiĝo, de diseriĝo de elementoj, ne ekzistas morto krom por la materia envolvajo kaj la fluida envolvajo, sed la animo aŭ Spirito ne povas morti por progresi ; alie ĝi perdus sian individuecon, kio egalus al neniigo. En la senco de transformigo, regenerigo, oni povas diri, ke la Spirito mortas post ĉiu enkarniĝo por renaskiĝi kun novaj ecoj, ne ĉesante esti ĝi mem. Tiel okazas al kamparano, ekzemple, kiu riĉiĝas kaj fariĝas grandsinjoro ; li transiras de kabano al palaco, de kruda vesto al brodita vesto ; ĉio ŝanĝiĝas ĉe liaj kutimoj, ĉe liaj gustoj, ĉe lia parolmaniero, eĉ ĉe lia karaktero ; unuvorte, mortis la kamparano, li entombigis maldelikatan veston kaj renaskiĝis kiel monduma homo, kaj tamen li estas ĉiam la sama individuo, sed transformita.

Ĉiu enkorpita ekzistado estas do por la Spirito unu okazo por progreso, pli aŭ malpli sentebla. Reveninte al la mondo de Spiritoj, li kunportas novajn ideojn ; ĝia morala horizonto larĝiĝis ; ĝiaj perceptoj estas pli rafinitaj, pli delikataj, ĝi vidas kaj komprenas tion, kion ĝi ne vidis kaj ne komprenis antaŭe ; ĝia vidkapablo, kiu komence ne atingis pli ol la antaŭan vivon, iom post iom ampleksas pasintajn vivojn, kiel ĉe homo, kiu plialtiĝas kaj, pro la maldensiĝo de nebulo, ampleksas iom post iom pli vastan horizonton. Post ĉiu nova restado en la senkorpa vivo, montriĝas al ĝiaj okuloj novaj mirindaĵoj de la nevidebla mondo, ĉar post ĉiu el ili unu vualo malaperas. Samtempe, ĝia fluida envolvajo puriĝas ; ĝi fariĝas pli malpeza, pli brila ; poste, ĝi estas lumeganta. Ĝi estas preskaŭ ia nova spirito ; ĝi estas la kamparano polurita kaj transformita ; la antaŭa Spirito mortis, kaj tamen ĝi estas ankoraŭ la sama Spirito.

Ni pensas, ke tiel oni devas kompreni la spiritan morton.



La Estonta Vivo

La estonta vivo jam ne estas problemo : ĝi estas fakto je atingo de la racio kaj de demonstro por preskaŭ ĉiuj homoj, ĉar la neantoj konsistigas apenaŭ etan malplimulton, malgraŭ la bruoj, kiun ili klopodas fari. Do ne ĝian realaĵon ni proponas demonstri ĉi tie ; tio estus nura ripetado, sen aldono de io ajn al ĝenerala konvinkiteco. Ĉar la principo estas akceptita, kiel premiso, kion ni proponas estas la ekzamenado de ĝia influo sur la socian ordon kaj la moraligon, laŭ la maniero kiel oni rigardas ĝin.

La konsekvencoj de la kontraŭa principo, nome la neado, estas same tre konataj kaj tre bone komprenataj, tiel ke ne necesas pritrakti ilin denove.

Ni diros nur, ke se oni demonstrus la neekziston de estonta vivo, tiam la nuna vivo estus sen alia celo, krom prizorgado de korpo, kiu, morgaŭ, post momento, povus ne plu ekzisti, kaj tiuokaze ĉio finiĝus senrevene. La logika konsekvenco de tia situacio ĉe la homaro estus la koncentriĝo de ĉiuj pensoj je la maniero ĝui materiajn plezurojn, sen konsidero pri malprofito al aliuloj, ĉar kial rezigni, kial devigi al si oferojn ? kial la neceso sin deteni por plibonigi sin, por korekti siajn malvirtojn ? Ankaŭ tute senutilaj estus rimorso, pentoj, ĉar oni havus nenion por atendi ; ĝi estus fine la sankcio de egoismo kaj de la maksimumo : *La mondo apartenas al la plej fortaj kaj al la plej ruzaj*. Sen la estonta vivo, moralo estas nur ia altrudo, ia konvencia kodo arbitre devigita, sed ĝi havas nenian radikon en la koro. Ia socio bazita sur tia kredo ne havus alian ligan ol la forton, kaj tuj disfalus.

Vane oni kontraŭdirus, ke inter la neantoj pri estonta vivo ekzistas honestaj homoj, malemaj fari malbonon al iu ajn, kaj kapablaj je plej grandaj sindediĉoj ! Ni tuj diru, ke ĉe multaj nekredantoj la neado pri la estonteco estas prefere fanfaronado, tromemfido, fiero ŝajnigi spiritforton, ol rezulto

de absoluta konvinkiĝo. En la intima fundo de ilia konscienco, ekzistas iu dubo, kiu ilin ĝenas, pro kio ili provas surdiĝi ; sed ne sen ia sekreta reteniĝo ili eldiras la teruran *nenion* , kiu ilin senigas je la frukto de ĉiuj verkoj de inteligento, rompas por ĉiam plej karajn estimojn. Multaj el tiuj, kiuj plej forte kriadis, estas la unuaj, kiuj ekstremaĵe la ideo pri la nekonataĵo ; krome, kiam alproksimiĝas la fatala momento eniri tiun nekonataĵon, tre malmultaj ekdormas la lastan dormon kun la firma konvinkiĝo, ke ili ne plu revekiĝos ie, ĉar la naturo neniam forperdas siajn rajtojn.

Ni diru do, ke ĉe la plej multaj, nekredemo estas nur relativa ; tiel ke, ĉar ilia raciemo kontentiĝas nek per dogmoj, nek per religiaj kredoj, kaj ĉar ili trovis nenie ion, kio povus pleniĝi la vakuon, kiu estiĝis en ili, tiam ili konkludis, ke ekzistas nenio, kaj ili konstruis sistemojn por pravigi la neadon ; ili estas do nekredantoj pro manko de io pli bona. Absolutaj nekredantoj estas efektive maloftaj, se entute ili ekzistas.

Latenta kaj senkonscia intuicio pri la estonteco povas do reteni kelkajn homojn sur la deklivo al malbono, kaj oni povus mencii amason da agoj, eĉ ĉe plej hardiĝintaj homoj, kiuj atestas pri tiu sekreta sento ilin reganta, malgraŭ ilia inklinado.

Necesas diri ankaŭ, ke sendepende de la grado de nekredemo, homoj de certa socia kondiĉo estas retenataj de la homa respekto ; ilia pozicio devigas ilin teni konduton de rezerviĝemo ; kion ili plej timas, tio estas malhonoro kaj malestimo, kiu perdigas al ili la konsideron flanke de la mondo, pro la forperdo de ilia rango, kaj malhavigas al ili la ĝuojn, kiujn ili amas ; se ili ne havas entute la bazon de virto, tamen ili havas almenaŭ la vernison. Sed al tiuj, kiuj havas nenian motivon por zorgi pri aliula opinio, kiuj mokas tion, kion aliaj diros, kaj kiuj nekontesteble formas la plimulton, kian bremson oni povus kontraŭmeti kontraŭ la eksceso de sovaĝaj pasioj kaj krudaj apetitoj ? Sur kiun bazon apogi la teorion pri bono kaj malbono, la neceson reformi iliajn malbonajn inklinojn, la devon respekti tion, kion aliaj posedas, se ili mem posedas nenion ? Kiu povas esti la stimulo al honorpunkto por homoj, kiujn oni konvinkas, ke ili estas nur bestoj ? La leĝo, oni diras, jen staras por ilin reteni ; sed la leĝo ne estas ia morala kodo, kiu tuŝas la koron ; ĝi estas ia forto, antaŭ kiu ili submetiĝas, kaj kiun ilin trompas, se ili povas ; se ili falas sub ĝia frapo, tio estis laŭ ili pro malbonŝanco aŭ pro mallerto, kiun ili zorgas ripari ĉe la unua okazo.

Kiuj pretendas, ke estas pli da merito ĉe nekredantoj, ke ili praktikas bonon sen espero pri ia rekompenco en estonta vivo, pri kiu ili ne kredas,

tiuj sin apogas sur sofismo tute senfundamenta. Ankaŭ kredantoj diras, ke bono farita kun intenco akiri avantaĝojn estas malpli merita ; ili eĉ pli severas, ĉar ili konvinkigis, ke laŭ la motivo de la ago, la merito povas esti tute nuligita. La perspektivo de estonta vivo ne flankenlasas la sinforgeson okaze de bonaj agoj, ĉar la feliĉo tiam ĝuata estas antaŭ ĉio submetita al la grado de morala progreso ; nu, la fieruloj kaj ambiciuloj staras tie inter la malplej bone premiitaj. Sed ĉu nekredantoj, kiuj praktikas bonon, estas ankaŭ tiel sinforgesaj kiel ili pretendas ? Se ili nenion atendas ĉe la alia mondo, ĉu ili ne atendas ion ĉe ĉi tiu ? Ĉu memestimo neniam trovas ĉi tie sian parton ? Ĉu ili estas sensentaj pri rekono de homoj ? Tiu ja estus rara grado de perfekteco, kaj ni ne kredas, ke troviĝas multaj, kiuj estas al tio kondukataj nur per la kulto de la materio.

Pli serioza kontraŭstaro estas ĉi tiu : Se la kredo pri estonta vivo estas ia moraliga elemento, kial homoj, al kiuj oni ĝin predikas ekde kiam ili estas sur la tero, estas same malbonaj ?

Unue, kiu dirus, ke ili ne estus eĉ pli malbonaj sen tio ? Tion oni ne pridubus, se oni konsideras la neeviteblajn rezultojn de la disvastigita neniofaremo. Male, ĉu oni ne vidas, observante la malsamajn gradojn en la homaro, de sovaĝeco al civilizacio, ke antaŭ la intelekta kaj morala progreso iras la mildigo de moroj kaj la pli racia ideo pri estonta vivo ? Sed tiu ideo, ankoraŭ tre malperfekta, ne povis influi en tia grado, kiel ĝi nepre iam faros, laŭgrade kiel ĝi estos pli bone komprenata, kaj laŭgrade kiel oni akiros pli ĝustajn nociojn pri la estonteco al ni rezervita.

Kiel ajn firma estas la kredo pri senmorteco, la homo ne zorgas pri sia animo krom laŭ mistika vidpunkto. La estonta vivo, tro malklare difinita, impresas lin nur tre malprecize ; ĝi estas nur fora punkto, kiu perdiĝas malproksime, kaj ne vojo, ĉar la sorto estas tie senrimede fiksita kaj nenie oni prezentis ĝin al li kiel progresan ; de tio oni konkludas, ke oni estos eterne tio, kio oni estas, kiam oni foriras el ĉi tie. Cetere, la bildo al li farita, la kondiĉoj determinantaj feliĉon aŭ malfeliĉon, kiel oni de li postulas, estas tute nekontentigaj, precipe en jarcento de racia ekzamenado, kiel nia, por komplete kongrui kun racio. Ĉar ĝi ne ligiĝas rekte al la surtera vivo ; inter ambaŭ, ne ekzistas ia solidareco, sed abismo, tiel ke homo, kiu okupiĝas ĉefe pri unu el ili, preskaŭ ĉiam jam ne vidas la alian.

Sub la regado de blinda fido, tia abstrakta kredo sufiĉis por la homaj aspiroj ; tiam ili lasis sin konduki ; nuntempe, sub la regado de libera ekzamenado, ili emas mem konduki sin, vidi per siaj propraj okuloj kaj kompreni ; la malprecizaj ideoj pri la estonta vivo jam ne kongruas kun la

novaj ideoj kaj jam ne respondas al bezonoj kreitaj de la progreso. Kun la evolviĝo de ideoj, ĉio devas progresi ĉirkaŭ la homo, ĉar ĉio interligiĝas, ĉio estas solidara en la naturo : sciencoj, kredoj, kultoj, leĝoj, agmanieroj ; la movado antaŭen estas nerezistebla, ĉar tia estas la leĝo de la ekzistado de la estuloj ; kio restas malantaŭe, sub la socia nivelo, estas flanken metata, kiel vestoj jam ne uzataj, kaj fine estas puŝata de ondo kreskanta.

Same okazas al la infanecaj ideoj pri la estonta vivo, kiuj kontentigas niajn prapatrojn ; obstine insisti nuntempe pri ili estus konduki al nekredemo. Por akceptiĝi flanke de la publika opinio kaj por plenumi sian moraligan influon, la estonta vivo devas prezentiĝi kiel io pozitiva, iel tuŝebla, kapabla elteni ekzamenadon ; kontentigi racion, kaj nenion lasi en ombro. En ĉi tiu momento, kiam nesufiĉaj ideoj pri la estonteco malfermas pardonon al dubo kaj al nekredemo, novaj esplorrimedoj estas donataj al la homo por penetri tiun misteron kaj fari lin kompreni la estontan vivon en ties realaĵo, en ties pozitiveco, en ties intimaj rilatoj kun la enkorpa vivo.

Kial oni ĝenerale okupiĝas tiel malmulte pri la estonta vivo ? Ĝi tamen estas realaĵo, ĉar ĉiutage oni vidas, ke miloj da homoj foriras al tiu nekonata celo. Ĉar ni ĉiuj nepre devas foriri niavice, kaj ĉar la momento de la foriro povas okazi ajnamomente, tial ŝajnas nature, ke oni malkvietiĝas pri tio, kio okazos. Kial do oni ne okupiĝas pri tio ? Precize pro tio, ke la celo estas nekonata, kaj oni ne havis ĝis nun manieron koni ĝin. La nekontraŭstarebla scienco venis por deloki ĝin de la lokoj, kie oni ĝin konservis. Ĉu ĝi estas proksima ? Ĉu ĝi estas malproksima ? Ĉu ĝi perdiĝis en senfino ? La filozofioj de pasinta tempo ne respondas, ĉar ili mem nenion scias pri tio ; tiam, oni diras : « ĝi estos, kio ĝi estos ». Simple indiferenteco.

Oni instruas, ke homo estos feliĉa aŭ malfeliĉa laŭ la bono aŭ malbono farita ; sed tio estas tiel malpreciza ! En kio konsistas tiu feliĉo kaj malfeliĉo ? La bildo, kiun oni montris al ni estas tiel malkongrua kun la ideo, kiun ni konceptas pri la justeco de Dio, enhavas tiom da kontraŭdiroj, da miskonsekvencoj, da radikalaj maleblaĵoj, ke nevole oni estas kaptata de dubo, se ne de absoluta senkredo, tiel ke oni diras, ke tiuj, kiuj eraris pri la lokoj destinitaj al estonta ekzisto povus same erari pri la kondiĉoj signitaj por feliĉo kaj por sufero. Cetere, kiaj ni estos en tiu mondo ? ĉu ni tie estos konkretaj aŭ abstraktaj ? ĉu ni tie havos ian formon, ian eksteran aspekton ? Se oni ne havos ion materian, kiel oni povos sperti materian suferon ? Se la feliĉuloj ne havas kion fari, eterna nenifarado

anstataŭ rekompenco fariĝus turmento, krom se oni akceptas Nirvanon de Budhismo, kiu ne estas pli dezirinda.

La homo ne okupiĝos pri la estonta vivo, se li ne vidos ĝin kiel celon netan kaj klare difinitan, ian logikan situacion, kiu respondas al ĉiuj liaj aspiroj, solvas ĉiujn malfacilaĵojn de la nuntempo, kaj en kiu li trovas nenion, kion racio ne povus akcepti. Se li okupiĝas pri la morgaŭo, tio okazas, ĉar la vivo morgaŭa ligiĝas intime al la vivo hodiaŭa ; ili estas inter si solidaraj : li scias, ke de tio, kion li faras hodiaŭ dependas la morgaŭa pozicio, kaj de tio, kion li faros morgaŭ dependos la pozicio postmorgaŭa, kaj tiel plu.

Tia devas esti por li la estonta vivo, kiam ĝi jam ne estos perdita en la nebuloj de abstrakto, sed palpebla realaĵo, necesa kompletigo de la nuna vivo, *unu el la fazoj* de la ĝenerala vivo, same kiel la tagoj estas fazoj de enkorpora vivo ; kiam li vidos, ke la estantecon reagos sur la estontecon, per la forto de la vivo mem, kaj ĉefe kiam li komprenos *la reagon de la estonteco sur la estantecon* : kiam, unuvorte, li vidos, ke pasinteco, estantecon kaj estonteco formas nepre necesan ĉenon, kiel hieraŭo, hodiaŭo kaj morgaŭo en la nuna vivo, ho ! tiam liaj ideoj komplete ŝanĝiĝos, ĉar li vidos en la estonta vivo ne nur celon, sed vojon ; ne ian foran efikon, sed nunan ; tiel ankaŭ do tia kredo nepre havos, per tute natura maniero, ian superan influon sur la socia stato kaj sur la moraligo.

Tia estas la vidpunkto, laŭ kiu Spiritismo faras, ke ni komprenu la estontan vivon.



Demandoj kaj Problemoj¹⁹

Kolektivaj kulpelpagoj.

Demando. – *Spiritismo perfekte klarigas al ni la kaŭzojn de individuaj suferoj, ke ili estas tujaj sekvoj de malbonaj agoj faritaj en la nuna ekzistado, aŭ elpago de pasintaj agoj ; sed, se ĉiu homo devas respondeci nur pri siaj propraj malbonfaroj, kiel oni klarigas la kolektivajn malfeliĉojn, kiuj frapas aron da individuoj, kiel okazas foje al tuta familio, al tuta urbo, al tuta nacio aŭ al tuta gento, kaj kiu atingas bonulojn, same kiel malbonulojn, senkulpulojn, same kiel kulpulojn ?*

Respondo. – Ĉiujn leĝojn, kiuj regas la universon, ĉu fizikajn, ĉu moralajn, ĉu materiajn aŭ intelektajn, oni malkovris, studis, komprenis komence per studado de individueco kaj de la familio, ĝis la tuta grupo, laŭ grada ĝeneraligo, kaj per konstato de la universaleco de rezultoj.

La samo okazas nuntempe koncerne la leĝojn, kiujn la studado pri Spiritismo al vi konigas ; sen timo erari, vi povas apliki la leĝojn, kiuj regas individuojn, familiojn, nacion, gentojn, la tuton de la enloĝantoj en mondoj, nome kolektivajn individuojn. Ekzistas malbonfaroj de individuo, de familio, de nacio, kaj ĉiun el tiuj, kiu ajn estas ĝia karaktero, oni elpagas sekve de la sama leĝo. Suferiganto elpagas, koncerne sian viktimon, ĉu en lia ĉeesto en la spirita vivo, ĉu vivante en kontaktado kun li dum unu aŭ pluraj sinsekvaj ekzistadoj, ĝis la riparo de la tuta malbono farita. La samo okazas, se temas pri grupaj krimoj, faritaj de certa kvanto da homoj ; la kulpelpagoj estas solidaraj, kio ne malhelpas, ke ĉiu elpagu samtempe siajn individuajn malbonfarojn.

¹⁹ Vidu la *Eksplikon Noton* en la fino de ĉi tiu volumo.

Unua parto

En ĉiu homo ekzistas tri karakteroj : tiu de la individuo, de la estulo mem ; tiu de membro de familio, kaj fine tiu de civitano ; je ĉiu el tiuj tri flankoj, li povas esti krimulo aŭ virtulo, nome li povas esti virta familiestro, samtempe kiel krima civitano, kaj reciproke ; de tio rezultas specialaj situacioj, kiuj okazas al li dum sinsekvaj ekzistadoj.

Krom en esceptaj okazoj, oni povas akcepti kiel ĝeneralan regulon, ke ĉiuj, kiuj kunvenas en unu vivo por komuna tasko jam kuniĝis antaŭe por ellabori la saman rezulton, kaj troviĝos denove kunigitaj en estonteco, ĝis ili atingis la celon, nome elpagi la pasintecon aŭ plenumi la akceptitan mision.

Danke al Spiritismo, vi komprenas nun la justecon de provoj, kiuj ne rezultas el faroj en la nuna vivo, se oni konsideras ilin kiel ŝuldojn de pasinta tempo ; kial ne estus same, rilate kolektivajn provojn ? Vi diras, ke ĝeneralaj malfeliĉoj frapas senkulpulojn, same kiel kulpulojn ; sed ĉu vi ne scias, ke la hodiaŭa senkulpulo eble estas kulpulo hieraŭa ? Kiu estas frapita, individue aŭ kolektive, tiu ĝin meritas. Do, kiel ni jam diris, ekzistas malbonfaroj de individuo kaj de civitano ; la elpago de unuj ne nuligas la elpagon de la aliaj, ĉar necesas ĉion pagi ĝis la lasta groŝo. La virtoj de privata vivo ne estas tiuj de la publika vivo ; kiu estas bonega civitano, tiu povas esti tre malbona familiestro, kaj kiu estas bona familiestro, fidinda kaj honesta en siaj aferoj, tiu povas esti malbona civitano, ĉar li blovis fajron de malkonkordo, subpremis malfortulojn, implikis sin en krimojn damaĝajn por la socio. Tiuj kolektivaj malbonfaroj estas kolektive elpagataj fare de individuoj, kiuj kunagis por ili, kiam ili kune submetiĝas al la leĝo de egala repago, kiam ili havos la okazon ripari la faritan malbonon, per subtenado kaj helpado al tiuj, kiujn ili mistraktis. Kio estas nekomprenebla, nekongrua kun la justeco de Dio sen antaŭekzisto de la animo, tio fariĝas klara kaj logika per la kono de tiu leĝo.

Solidareco, kiu estas la vera socia ligilo, ne validas nur por la nuna vivo ; ĝi etendiĝas al pasinteco kaj estonteco, ĉar la samaj individuoj renkontiĝis, renkontiĝas kaj renkontiĝos por kune trairi la vojon de progresado, per reciproka interhelpado. Jen tion komprenigas Spiritismo per la justa leĝo de reenkarniĝo kaj de kontinueco de interrilatoj inter la samaj estuloj.

Clélie Duplantier.

Noto. – Kvankam tiu komuniko kongruas kun la konataj principoj de respondeco pri la pasinteco kaj de la kontinueco de rilatoj inter la Spiritoj, tamen ĝi enhavas ideon iel novan kaj tre gravan. La distingo, kiun ĝi

Demandoj kaj Problemoj

starigas inter la respondeco de individuaj kaj kolektivaj malbonfaroj, tiuj de la privata vivo kaj de la publika vivo, liveras la kaŭzon de iuj faktoj ankoraŭ malbone komprenataj, kaj montras per pli preciza maniero la solidarecon, kiu ligas estulojn, unujn al aliaj, kaj generaciojn inter si.

Tiel, sekvas, ke oni renaskiĝas en unu sama familio, aŭ membroj de unu sama familio renaskiĝas kune por konsistigi novan, en alia socia pozicio, por refortigi amligilojn aŭ ripari siajn reciprokajn erarojn. Por pli ĝeneralaj konsideroj, oni renaskiĝas en sama medio, en sama nacio, en sama gento, ĉu pro simpatio, ĉu por daŭrigi per la elementoj jam ellaboritaj la jam faritajn studojn, por perfektigi, por plu sekvi en komencitaj laboroj, kiujn la mallongeco de la vivo aŭ la cirkonstancoj ne permesis fini. Tia reenkarriĝo en sama medio estas la kaŭzo de la malsama karaktero de popoloj kaj de gentoj ; kvankam ili pliboniĝas, individuoj tamen konservas la originan nuancon tiel longe, ĝis la progreso ilin komplete transformos.

La hodiaŭaj Francoj estas do tiuj de la lasta jarcento, tiuj de la mezepoko, tiuj de la druidaj tempoj ; ankaŭ tiuj perfortintoj kaj viktimoj de feŭdismo ; tiuj, kiuj servutigis popolojn kaj tiuj, kiuj laboris por ilia emancipiĝo kaj kiuj troviĝas en transformiĝinta Francujo, kie unuj elpagas en malsuperaj pozicioj sian gentan fieron, kaj kie aliaj ĝuas la frukton de siaj laboroj. Kiam oni pensas pri ĉiuj krimoj de tiu tempo, kiam la vivo de homoj kaj la honoro de familioj valoris nenion, kiam fanatikismo buĉadis honore al dioj, pri ĉiaj misuzoj de potenco, pri ĉiaj maljustaĵoj faritaj malŝate al la plej sanktaj rajtoj, kiu povas esti certa, ke li, pli aŭ malpli, ne partoprenis en ĉio ĉi kaj miri pri grandaj kaj teruraj kolektivaj kulpelpagoj ?

Sed el tiuj sociaj konvulsioj ĉiam rezultas ia plibonigo ; spiritoj akiras sciojn per spertado ; malfeliĉo estas la stimulilo, kiu igas ilin serĉadi kuracilon kontraŭ la malsano ; ili pripensas dum la spirita vivo, prenas novajn decidojn, kaj kiam ili revenas, ili agas pli bone. Ja tiel, de generacio al generacio, la progreso plenumiĝas.

Oni ne povas dubi, ke ekzistas familioj, urboj, nacioj, gentoj kulpaj, ĉar kaptitaj de instinktoj de fiero, egoismo, ambicio, avido, ili iras malbonan vojon kaj kolektive faras tion, kion individuo faras sola ; unu familio riĉiĝas per ekspluatado de alia familio ; unu popolo submetas alian popolon kaj alportas senesperon kaj ruinon ; unu gento volas neniigi alian genton. Jen kial ekzistas familioj, popoloj kaj gentoj, sur kiuj pezas la leĝo de egala repago.

« Kiu mortigis per glavo, tiu per glavo estos mortigita » diris la Kristo ; tiujn vortojn oni povas klarigi ĉi tiel : Kiu kaŭzos sangadon, tiu suferos sangadon ; kiu kondukis la torĉon por incendio ĉe aliulo, tiu vidos la

Unua parto

torĉon de incendio ĉe si ; kiu ŝtelis, tiu estos priŝtelita ; kiu submetas kaj mistraktas malfortulon, tiu estos malforta, submetata kaj mistraktata sia-vice, ĉu temas pri individuo, nacio aŭ gento, ĉar la membroj de kolektivo estas solidaraj ĉe bono same kiel ĉe malbono komune faritaj.

Dum Spiritismo vastigas la kampon de solidareco, materiismo ĝin reduktas al la etaj proporcioj de la mallonga homa ekzistado ; ĝi faras ĝin ia socia devo sen radikoj, sen alia motivo krom la bonvolemo kaj persona intereso de la momento ; ĝi estas ia teorio, ia filozofia maksimumo, pri kio nenio estas deviga ; laŭ Spiritismo, solidareco estas ia fakto, kiu staras sur universala leĝo de la naturo, kiu kunligas ĉiujn estulojn de pasinta, nuna kaj estonta tempoj, kaj el kies konsekvencoj neniu homo povas forkuri. Jen estas tio, kion ĉiu homo povas kompreni, kiel ajn malklera li estas.

Kiam ĉiuj homoj komprenos Spiritismon, tiam ili komprenos la veran solidarecon kaj, sekve, la veran fratecon. Solidareco kaj frateco jam ne estos cirkonstancaj devoj, kiujn oni sekvas prefere je sia propra intereso ol je tiu de aliulo. La regno de solidareco kaj de frateco estos nepre tiu de justeco por ĉiuj, kaj la regno de justeco estos tiu de paco kaj harmonio inter la homoj, la familioj, la popoloj kaj la gentoj. Ĉu ĝi ja venos ? Dubi pri tio estus nei la progreson. Se oni komparas la nunan socion, ĉe civilizitaj nacioj, kun tiu, kiu estis dum Mezepoko, la diferenco estas granda ; se do la homoj venis ĝis ĉi tie, kial ili ekhaltus ? Rigardante la vojon, kiun ili iris de antaŭ unu jarcento ĝis hodiaŭ, oni povas taksu tion, kion ili faros de nun post paso de unu plia jarcento.

Sociaj konvulsioj estas ribeloj de enkarniĝintaj Spiritoj kontraŭ malbonaĵoj, kiuj ilin batas, indiko de iliaj aspiroj al tiu sama regno de justeco, pri kiu ili soifas, tamen sen plena konscio pri tio, kion ili volas kaj pri la maniero ĝin atingi ; pro tio ili moviĝas, malkvietiĝas, renversas iele-trapele, kreas sistemojn, proponas pli aŭ malpli utopiajn rimedojn, praktikas eĉ mil maljustaĵojn, se tiel diri pro spirito de justeco, kun la espero, ke el tia movado eble io rezultos. Poste ili pli bone difinas la aspirojn kaj la vojo klariĝos.

Kiu ajn enprofundiĝas en la principojn de la filozofio de Spiritismo, konsideras la horizontojn, kiujn li trovas, la ideojn, kiujn ĝi naskas kaj la sentojn, kiujn ĝi disvolvas, ne povus dubi pri la signifa parto, kiun ĝi nepre prenos en regeneriĝo, ĉar ĝi kondukas precize, kaj pro la forto mem de la cirkonstancoj, al la celo dezirata de la homaro : la regno de justeco per la forigo de misagoj, kiuj haltigas progreson, kaj per moraligo de homamasoj. Se tiuj homoj, kiuj revas pri la tenado de pasinteco, ne konsiderus ĝin tia, ili ne tiom persekutus ĝin ; ili lasus, ke ĝi mortu per si mem, kiel okazis al multaj utopiaĵoj. Tio nur pensigas, ke iuj mokantoj certe vidas

Demandoj kaj Problemoj

en ĝi ion pli seriozan, pri kio ili neniam pensis. Sed ekzistas homoj, kiuj ridas pri ĉio, kiuj ridus pri Dio, se ili vidus Lin sur la tero. Estas eĉ tiuj, kiuj ektimus, se ili vidus antaŭ si la animon, kiun ili obstine neas.

Pri ia influo, kiun Spiritismo iam certe havos sur la estontecon de la socioj, oni ne supozu, ke ĝi anstataŭigos unu aŭtokration per alia aŭtokratio, aŭ eĉ trudos leĝojn ; ĉar proklamante la absolutan rajton je libereco de konscienco kaj de libera ekzamenado rilate fidon, ĝin oni devos akcepti kiel kredon libere, pro konvinkigo kaj ne pro altrudo ; pro sia naturo mem, ĝi nek povas, nek devas altrudi ion ajn ; forigante blindan fidon , ĝi volas esti komprenata ; laŭ ĝi, ne ekzistas misteroj, sed racia fido, apogita sur faktoj, kaj deziranta lumon ; ĝi rifuzas neniun malkovron de scienco, ĉar scienco estas kolekto de naturaj leĝoj ; ĉar tiuj leĝoj estas Diaj, tial rifuzi sciencon estus rifuzi la Dian kreaĵon.

Due, ĉar la efiko de Spiritismo estas moraliga, ĝi povas pretendi nenian aŭtokration, ĉar tiuokaze ĝi farus tion, kion ĝi malakceptas. Ĝia influo estos grava pro la ŝanĝoj, kiujn ĝi venigos en la ideojn, en la opiniojn, en la karakteron, en la kutimojn de homoj kaj de sociaj rilatoj ; tiu influo estos tiel granda, ke ĝi ne devos esti altrudata. Spiritismo, potenca kiel filozofio, nur malgajnus, en jarcento de racio, se ĝi transformiĝus en portempan potencon. Ne koncernas ĝin fari sociajn instituciojn en regeneriginta mondo ; tion faros la homoj, sub la regado de ideoj pri justeco, karitato, frateco kaj solidareco, pli bone komprenataj pere de Spiritismo.

Spiritismo, esence pozitiva en siaj kredoj, rifuzas ĉian mistikon, krom se oni komprenas tiun vorton, kiel faras tiuj, kiuj kredas nenion, kiel ĉian spiritualisman ideon, la kredon je Dio, je animo kaj je estonta vivo. Ĝi certe kondukas homojn al serioza okupiĝo pri la spirita vivo, ĉar ĝi estas la normala vivo, kaj en ĝi oni devos plenumi sian destinon, ĉar la surtera vivo estas nur pormomenta kaj pasema ; per la pruvoj, kiujn ĝi prezentas pri la spirita vivo, ĝi instigas homojn atribui al aferoj de ĉi tiu mondo gravecon nur relativan, kaj tiel ĝi donas al ili forton kaj kuraĝon por pacience elteni la suferojn de la surtera vivo ; ĝi instruas, ke post la morto homoj ne forlasas ĉi tiun mondon senrevene ; ke ili povas ĉi tien reveni por perfektigi sian intelektan kaj moralan edukiĝon, krom se ili estas sufiĉe progresintaj por meriti aliron al iu pli bona mondo ; ke la laborado kaj la progresoj, kiujn ili ĉi tie plenumas, aŭ iam plenumos, tiuj estos profitaj al ili mem, per plibonigo de ilia estonta vivo, tiel ke montriĝas ilia intereso mem ne neglekti tion ; se ilin naŭzas reveni ĉi tien, ĉar ili havas liberan elektokapablon, dependas nur de ili fari tion, kio necesas por aliri aliloken ; sed ili ne iluziĝu pri la kondiĉoj, kiuj rajtigos ilin ŝanĝi la loĝejon ! Ne per helpo de iaj vortaj aŭ agaj formuloj, ili ĝin havigos al

Unua parto

si, sed per serioza kaj radikala reformo de siaj malperfektecoj ; nur per sinŝanĝoj, per forigo de malbonaj pasioj, per ĉiutaga akirado de novaj kvalitoj ; per instruado al ĉiuj, ekzemple, pri la konduto, kiu solidare kunligos ĉiujn homojn en feliĉo, per frateco, toleremo kaj amo.

La homaro konsistas el personoj, kiuj konstituas individuajn ekzistadojn, kaj de generacioj, kiuj konstituas kolektivajn ekzistadojn. Unuj kaj aliaj grade progresas laŭ variaj fazoj de provoj, kiuj estas same individuaj por la personoj kaj kolektivaj por la generacioj. Same kiel ĉiu enkarnejo estas unu paŝo antaŭen, ĉiu generacio markas unu etapon en la progresado de la grupo : tia grupa progresado estas nerezistebla, kaj trenas la homamasojn, samtempe kiel ĝi modifas kaj transformas en regeneran ilon la erarojn kaj antaŭjuĝojn de pasinteco destinita al malapero. Aŭ, ĉar la generacioj konsistas el individuoj, kiuj jam vivis en antaŭaj generacioj, la progresado de generacioj estas do rezulto de la progresado de individuoj.

Sed kiu montros al mi, eble oni diros, la solidarecon, kiu ekzistas inter la nuna generacio kaj la antaŭaj aŭ venontaj ? Kiel oni pruvos al mi, ke mi vivis en la mezepoko, ekzemple, kaj ke mi partoprenos eventojn, kiuj plenumiĝos poste ?

La principon de plureco de ekzistadoj oni sufiĉe demonstris en la *revuo* kaj en la fundamentaj verkoj de la doktrino, tial ni ne haltos sur ĉi tiu punkto ; la spertado kaj la observado de faktoj de la ĉiutaga vivo svarmas je fizikaj pruvoj por demonstrado preskaŭ matematika. Ni nur invitas pensulojn konsideri moralajn pruvojn, kiuj rezultas de rezonado kaj indukto.

Ĉu estas absolute necese vidi ion por kredi ĝin ? Vidinte la rezultojn, ĉu oni ne povas havi materian certecon pri la kaŭzo ?

Ekter eksperimentado, la sola ĝusta vojo malfermita al tiu esploro konsistas el revenado de la rezulto al la kaŭzo. Justeco liveras al ni tre rimarkindan ekzemplon pri tiu principo, ĉar ĝi aplikiĝas al malkovrado de *indikoj* pri la manieroj, per kiuj oni faris krimon, *la intencoj*, kiuj aldonas kulpecon al fiaginto. Oni ne havas kompletan bildon pri la fakto, kaj tamen oni kondamnas lin pro la indikoj.

Scienco, kiu pretendas antaŭeniri nur per eksperimentado, akceptas ĉiutage principojn, kiuj estas nur induktaĵoj de kaŭzoj, ĉar ĝi vidis nur ties rezultojn.

En Geologio oni determinas la aĝon de montaraj ; ĉu la geologoj ĉeestis ilian stariĝon, ĉu ili vidis la formiĝon de la tavoloj de sedimento, kiuj determinas tiun aĝon ?

Demandoj kaj Problemoj

Astronomiaj, fizikaj kaj ĥemiaj konoj permesas taksu la pezon de planedoj, ties densecon, ties volumon, la vivon, kiu ilin animas, la naturon de la elementoj, kiuj ilin konsistigas ; tamen, la sciencistoj ne povis fari rektajn eksperimentojn, kaj per analogio kaj indukto oni atingis tiom da belaj kaj riĉaj eltrovoj.

La unuaj homoj, surbaze de siaj sentumoj, asertis, ke la suno rondiras ĉirkaŭ la tero. Tamen, la sentumoj ilin trompis kaj la rezonado superregis.

Same okazos koncerne la principojn starigitajn de Spiritismo, kiam oni ilin emos studi sen antaŭjuĝoj, kaj tiam la homaro eniros vere kaj rapide en eraon de progreso kaj regeneriĝo, ĉar la individuoj ne sentos sin izolitaj inter du abismoj, nome la nekonata pasinteco kaj necerta estonteco, kaj arde eklaboros por perfektigi kaj multobligi la elementojn de feliĉo, kiuj estas ilia agado ; ĉar tiam ili rekonos, ke ne hazarde ili okupas sian pozicion en la mondo, kaj ke ili ĝuos per si mem, en la estonteco kaj en pli bonaj kondiĉoj, la fruktojn de sia strebado kaj de sia zorgado. Tiel do fine Spiritismo instruos al ili, ke se la malbonfaroj komune plenumitaj estas solidare elpagataj, tiam la komune plenumata progreso estas egale solidara, kaj ke pro tia principo malaperos la disiĝoj inter gentoj, familioj kaj individuoj, kaj ke la homaro, sen la infanaj vindotukoj, rapide kaj mature paŝos al konkerado de sia vera destino.



Egoismo kaj Fiero

Iliaj kaŭzoj, iliaj rezultoj kaj la rimedoj por ilin detru

Oni sufiĉe rekonas, ke la plejmulto el la mizeroj de la vivo havas sian devenon en la homa egoismo. Ĉar ĉiu homo pensas pri si antaŭ ol pensi pri la aliaj, kaj volas sian propran kontentiĝon antaŭ ĉio, tial ĉiu homo emas nature serĉi tiun kontentiĝon je ia ajn kosto, kaj senskrupule oferas la interesojn de la aliulo, kiel ĉe la etaj, tiel same ĉe la grandaj aferoj, morale aŭ materie ; de tio venas ĉiaj sociaj antagonismoj, ĉiaj bataloj, ĉiaj konfliktoj kaj ĉiaj mizeroj, ĉar ĉiu homo emas senposedigi sian najbaron.

Egoismo devenas de fiero. Ekzaltiĝo de la personeco kondukas la homon al konsidero ke li estas supera al la aliaj, al penso, ke li havas superajn rajtojn, kaj tiam li ĉagreniĝas pro ĉio, kio laŭ lia vidpunkto atencas kontraŭ liaj rajtoj. La graveco kiun, pro fiero, li atribuas al sia persono faras lin nature egoista.

Egoismo kaj fiero devenas de natura sento : instinkto de memkonservado. Ĉiaj instinktoj havas sian ekzistokialon kaj sian utilecon, ĉar Dio nenion senutilan farus. Dio ne kreis la malbonon ; ja la homo ĝin produktis per misuzado de la donitaĵoj de Dio, sekve de sia libera elektokapablo. Tiu emo, se oni tenas ĝin en ĝustaj limoj, estas per si mem bona ; ĝia troigo faras ĝin malbona kaj damaĝa ; same okazas ĉe ĉiaj pasioj, de kies providencaj celoj la homoj delogiĝas. Dio ne kreis la homon egoista kaj fiera ; Li kreis lin simpla kaj sencia ; ja la homo sin faris egoista kaj fiera, per troigo de la instinkto, kiun Dio al li donis por lia konserviĝo.

Homoj ne povas esti feliĉaj, se ili ne vivas pace, tio estas, se ilin ne animas ia sento de bonvolemo, de indulgemo kaj de toleremo reciprokaj, unuvorte, kiam ili klopodos ne plu premege unuj la aliajn.

Karitato kaj frateco resumas ĉiajn kondiĉojn kaj ĉiajn sociajn devojn ; sed ilia antaŭkondiĉo estas abnegacio ; nu, abnegacio estas nekongrua kun egoismo kaj fiero ; do, kun tiaj malvirtoj, ne eblas vera frateco, nek egaleco, nek libereco, ĉar egoisto kaj fierulo ĉion deziras por si. Tiuj estos la veraj subfosantoj de progresigaj institucioj ; dum ili regos, la plej bonfaraj sociaj sistemoj, la plej saĝe elfaritaj, ruiniĝos sub iliaj frapoj. Estas sendube bele proklami la regnon de frateco, sed kial ĝin starigi, se ekzistas detrua kaŭzo ? Tio estus konstrui sur malfirma tereno. En unu tia lando, se oni volas, ke homoj bone fartu, ne sufiĉas tien sendi kuracistojn, ĉar ĉi tiuj mortos, kiel ĉiuj aliaj ; necesas detrui la kaŭzojn de nesalubreco. Se oni volas, ke ili vivu kiel fratoj surtere, ne sufiĉas liveri al ili moralleciojn, necesas detrui la kaŭzojn de antagonismo ; necesas ataki la devenon de malbono : fiero kaj egoismo. Ĉi tie kuŝas la vundo ; ĉi tie oni koncentru la tutan atenton de tiuj, kiuj volas serioze la bonon de la homaro. Dum tiu baro persistos, ili vidos siajn klopo-
dojn haltigitaj, ne nur pro rezisto de inerto, sed pro ia aktiva forto, kiu senĉese penados por detrui ilian laboron, ĉar ĉia granda, grandanima, evoluiga ideo ruinigas personajn pretendojn.

Oni diros, ke detrui egoismon kaj fieron estas neeble, ĉar malvirtoj estas esencaj trajtoj de la homa specio. Se tiel estus, oni devus elreviĝi el ĉia morala progreso ; tamen, kiam oni konsideras la homon ĉe la sinsekvaj aĝoj, tiam oni ne rajtas nei evidentan progreson : do, se li jam progresis, li ankoraŭ povas progresi plu. Aliflanke, ĉu troveblas homo sen fiero kaj sen egoismo ? Male, ĉu ne ekzistas tiaj grandanimuloj, en kiuj amsento pri la proksimulo, humileco, sindediĉo al aliuloj kaj abnegacio ŝajnas denaskaj ? Certe ilia nombro estas malpli granda ol tiu de la egoistoj, male ne ĉi tiuj lastaj farus la leĝojn ; sed ili estas pli multenombraj ol oni pensas, kaj se ili ŝajne ne aspektas tiel multenombraj, tion kaŭzas la fakto, ke fiero evidentiĝas en tia maniero, ke virto de modesteco restas sub ties ombro. Se do egoismo kaj fiero estus inter la necesaj kondiĉoj por la homaro, same kiel nutrado por la vivo, tiam ne ekzistus esceptoj ; la esenca punkto estas do atingi la transigon de escepto al regulo ; por tio, necesas agi antaŭ ĉio por detrui la kaŭzojn, kiuj produktas kaj tenadas la malbonon.

La ĉefa el tiuj kaŭzoj evidente ligiĝas al la falsa ideo, kiun la homo faras pri sia naturo, pri sia pasinteco kaj pri sia estonteco. Ne sciante de kie li venas, li kredas sin pli grava ol li estas ; ne sciante, kien li iras, li koncentras sian tutan penson sur la surteran vivon ; li ĝin volas laŭeble plej agrabla ; li volas ĉiajn kontentigojn, ĉiajn ĝuojn : pro tio li senskrupule

surtretas sian najbaron, se ĉi tiu baras lin ; sed por tio necesas lin superregi ; egaleco donus al aliuloj la rajtojn, kiujn li volas nur por si mem ; frateco devigus lin plenumi oferojn, kiuj ĝenus lian bonfarthon ; liberecon li volas por si, kaj koncedas ĝin al aliuloj nur se ĝi ne ĝenas liajn prerogativojn. Se ĉiuj havas la samajn pretendojn, tio rezultigas ĉiamajn konfliktojn, kiuj multekostigas tiujn ĝuojn, kiujn oni akiris.

Se la homo komprenas la estontan vivon, tiam lia vidpunkto komplete ŝanĝiĝas, kiel tiu de individuo, kiu bezonas resti apenaŭ kelkajn horojn en malbona loĝejo kaj scias, ke post eliro li havos ian bonegan loĝejon por siaj ceteraj tagoj.

La graveco de la nuna vivo, tiel malĝoja, tiel mallonga, tiel efemera, malintensiĝas antaŭ la brilego de la senfina estonteco, kiu malfermiĝas antaŭ li. La natura, logika sekvo de tia certeco estas oferi ian forfuĝeman nunon kontraŭ daŭra estonteco, dum antaŭe li oferadis ĉion por la nuno. Se la estonta vivo fariĝas lia celo, malmulte gravas resti iom pli aŭ iom malpli longe en ĉi nuna vivo; la mondumaj interesoj estas akcesoraj, anstataŭ precipaj ; li laboras nun por garantii sian pozicion en estonteco, kaj krome li ekscias la kondiĉojn por feliĉo.

Koncerne al mondumaj interesoj, la homoj povus starigi barojn kontraŭ li ; necesas ilin kontraŭstari, kaj li fariĝas egoisto pro la cirkonstancoj ; se li levas pli alten sian rigardon, direkte al ia feliĉo, kiun neniu homo povus embarasi, tiam li havos nenian intereson forpuŝi iun ajn, kaj egoismo jam ne havas objekton ; sed en li restas ankoraŭ la stimulo al fiero.

La kaŭzo de fiero sidas en la kredo de homo pri sia individua superereco ; kaj ankoraŭ ĉi tie sentiĝas la influo de la koncentriĝo de la penso sur la surteran vivon. Ĉe homo, kiu vidas nenion antaŭ si, nenion post si, nenion super si, la sento de la personeco lin superregas, kaj fiero ne renkontas kontraŭstarojn.

Nekredemo ne nur malhavas ĉian rimedon por kontraŭbatali fieron, sed stimulas ĝin kaj donas al ĝi pravigon, per neado pri ekzisto de ia potenco super la homaro. Nekredanto kredas nur pri si mem ; estas do nature, ke li fieras ; dum li vidas nur hazardon okaze de frapoj ricevataj, kaj pro tio li ekribelas, tiu, kiu havas fidon vidas la manon de Dio kaj sin klinas. Kredi Dion kaj la estontan vivon estas do la unua kondiĉo por mildigi fieron, sed tio ne sufiĉas ; kune kun la estonteco, necesas vidi la pasintecon por fari ĝustan ideon pri la estanteco.

Por ke fierulo ĉesu kredi pri sia supereco, necesas pruvi al li, ke li ne valoras pli ol aliaj, kaj ke aliaj valoras same kiel li ; ke egaleco estas fakto

kaj ne simple bela filozofia teorio ; tiaj veraĵoj devenas de antaŭekzisto de la animo kaj de reenkarniĝo.

Sen antaŭekzisto de la animo, la homo estas kondukata al la kredo, ke Dio, se li kredas al Dio, donis al li esceptan avantaĝon; kiam li ne kredas, tiam li dankas la hazardon kaj sian propran meriton. Inicante lin pri la antaŭa vivo de la animo, la antaŭekzisto instruas lin distingi la senfinan spiritan vivon disde la portempa enkorpora vivo ; per tio li ekscias, ke animoj eliras egalaj el la manoj de la Kreanto ; ke ili havas unu saman deirpunkton kaj unu saman celon, sed ke ĉiuj devas atendi pli aŭ malpli grandan tempon laŭ siaj klopodoj ; ke li mem alvenis al tio, kio li nun estas nur post longa kaj peniga vegetado, kiel ĉiuj aliaj, sur la malsuperaj ŝtupoj de la evoluo; ke ekzistas inter la postrestintoj kaj la pli avancintaj nur afero de tempo ; ke la avantaĝoj de la naskiĝo estas nur korpaj kaj sendependaj de la Spirito ; ke simpla proleto povas, en alia ekzistado, naskiĝi sur trono, kaj potenculo renaskiĝi kiel proleto. Se li konsideras nur la enkorporan vivon, tiam li vidas la sociajn, momentajn neegalajojn ; ĉi tiuj lin frapas ; sed se li tamen turnas sian rigardon sur la tuton de la vivo de la Spirito, sur pasintecon kaj sur estontecon, de la deirpunkto ĝis la nun atingita punkto, tiaj neegalajoj disfumiĝas, kaj li rekonas, ke Dio donis nenian avantaĝon al iu ajn el siaj infanoj, malprofite al aliaj ; ke Li liveras al ĉiu egalan parton kaj ne glatigis la vojon al unu, pli ol al aliaj ; ke tiu, kiu malpli avancis ol li sur la tero povas alveni antaŭ li, se li pli trafegados por sia perfektigo ; li fine rekonas, ke ĉiu homo nur sukcesas per siaj personaj klopodoj, tiel ke la principo de *egaleco* montriĝas kiel principo de justeco kaj leĝo de la naturo, fronte al kiuj falas fiero de privilegio.

Reenkarniĝo pravas, ke Spiritoj povas renaskiĝi en malsamaj sociaj kondiĉoj, ĉu kiel kulpelpago, ĉu kiel provo, kaj ĝi instruas, ke en tiu homo, kiun oni traktas malŝate, eble troviĝas Spirito, kiu estis nia superulo aŭ nia egalulo en alia vivo, amiko aŭ parenco. Se la homo tion sciis, li traktus lin atenteme, sed tiuokaze li havus nenian meriton ; kaj male, se li sciis, ke lia nuna amiko estis iam lia malamiko, lia servisto aŭ lia *sklavo*, li forpuŝus lin ; nu, Dio ne volis, ke tio daŭru, jen kial li ĵetis vualon sur la pasintecon ; tiel kondukiĝas la homo por vidi ĉiujn kiel siajn fratojn kaj egalulojn ; de tio venas natura bazo por *frateco* ; kun la scio, ke lin mem oni povos trakti kiel li traktis aliulojn, *karitato* fariĝas devo kaj neceso surbaze de la naturo mem.

Jesuo starigis la principon de karitato, de egaleco kaj de frateco; el ĝi li faris nepran kondiĉon por saviĝo ; sed apartenis al la tria manifestiĝo

de la volo de Dio, nome al Spiritismo, per la kono, kiun ĝi liveras pri la spirita vivo, per la novaj horizontoj, kiujn ĝi malkovras kaj per la leĝoj, kiujn ĝi rivelacias, sankcii tian principon, pruvante, ke ĝi ne estas nur ia morala doktrino, sed leĝo de la naturo, kaj ke interesas la homon praktiki ĝin. Nu, li ĝin praktikados, kiam li jam ne vidos la nunon kiel komencon kaj finon, sed komprenos la solidarecon, kiu ekzistas inter la nuntempo, la pasinteco kaj la estonteco. En la grandega kampo de senfino, kiun Spiritismo al li montras, lia graveco mem nuliĝas ; li ekkomprenas ke, sola, li estas nenio kaj povas nenion ; ke ĉiu bezonas unuj la aliajn kaj unuj ne valoras pli ol aliaj : duobla frapo kontraŭ lia fiero kaj lia egoismo.

Sed por tio necesas, ke li havu fidon, sen kiu li nepre restos en la limoj de la nunto ; ne la blindan fidon, kiu forkuras de lumo, katenas ideojn, kaj pro tio retenas egoismon, sed inteligentan, racian fidon, kiu volas lumon kaj ne obskuron, kiu aŭdace forŝiras la vualon de misteroj kaj larĝigas la horizonton ; tian fidon, unua elemento de ĉia progreso, Spiritismo al li alportas, fortikan fidon, ĉar ĝi baziĝas sur spertado kaj sur faktoj, ĉar ĝi donas al li palpeblajn pruvojn pri la senmorteco de lia animo, sciigas lin pri lia deveno, pri lia celo, kaj kial li staras sur la tero ; fine, ĉar ĝi fiksas liajn necertajn ideojn sur lian pasintecon kaj sur lian estontecon.

Unu fojon plene irante sur tia vojo, kiam egoismo kaj fiero jam ne disponas la samajn kaŭzojn por stimuliĝado, kaj forvelkos iom post iom pro manko de celo kaj de nutriĝo, ĉiaj sociaj rilatoj ŝanĝiĝos, sub regado de karitato kaj de frateco bone komprenataj.

Ĉu eblas, ke tio okazu per subita ŝanĝo ? Ne, tio estas neebla : nenio estas tro subita en la naturo ; sano neniam revenas subite post malsano ; inter malsano kaj sano, kuŝas ĉiam konvalesko. Homo ne povas do tuj ŝanĝi sian vidpunkton kaj direkti sian rigardon de la tero al la ĉielo ; senfino lin konfuzas kaj konsternas ; li bezonas tempon por asimili novajn ideojn. Spiritismo estas, sen kontraŭdiro, plej potenca moraliga elemento, ĉar ĝi subfosas egoismon kaj fieron je la bazo, donante apogpunkton al moralito : ĝi estigis miraklajn konvertiĝojn ; efektive, tio tamen estas nur individuaj, sekve partaj reĝustigoj ; sed tio, kion ĝi kaŭzis al individuoj estas garantio pri tio, kion ĝi kaŭzos iam al homamasoj. Ĝi ne povas forŝiri per unu frapo la herbaĉojn ; ĝi donas fidon ; fido estas la bona semo, sed tia semo bezonas tempon por ĝermado kaj fruktado ; jen kial ĉiuj spiritistoj ankoraŭ ne estas perfektaj. Ĝi kaptis la homon meze de la vojo, en la fajro de pasioj, en la forto de antaŭjuĝoj kaj se en tiaj cirkonstancoj ĝi okazigis mirindaĵojn, kio do okazos, kiam ĝi prenos lin ĉe

Unua parto

la naskiĝo, virga de ĉiaj malsanaj impresoj ; kiam li suĉos karitaton kun la lakto kaj estos lulata de frateco ; kiam fine tuta generacio leviĝos kaj nutriĝos de ideoj, kiujn racio plifortigos, anstataŭ disigi ? Sub la regado de tiaj ideoj, kiuj fariĝos ĉies fido, kiam la progreso jam ne trovos baron ĉe egoismo kaj fiero, la institucioj reformiĝos per si mem kaj la homaro rapide antaŭeniros direkte al la destino al ĝi promesita sur la tero, dum ĝi atendas tiujn de ĉielo.



Libereco, Egaleco, Frateco

Libereco, egaleco, frateco, ĉi tiuj tri vortoj estas en si mem la programo de la tuta socia ordo, kiu estigus la plej absolutan progreson de la homaro, se la principoj, kiujn ili reprezentas povus ricevi sian kompletan plenumiĝon. Ni vidu la barojn, kiuj, en la nuna stato de la socio, povus kontraŭstari tion, kaj kontraŭ la malsano ni serĉu la kuracilon.

Frateco, en la rigora senco de la vorto, resumus ĉiajn devojn de la homoj, unuj al aliaj ; ĝi signifas : sindediĉo, abnegacio, toleremo, bonvolemo, indulgemo ; tio estas la evangelia karitato en sia pura senco, kaj la aplikado de la maksimumo : « Agi kontraŭ aliaj same kiel ni dezirus, ke aliaj agu kontraŭ ni. » La malo de *Egoismo*. Frateco diras : « Ĉiu por ĉiuj, kaj ĉiuj por ĉiu. » Egoismo diras : « Ĉiu por si. » Ĉar tiuj du kvalitoj estas la neo unu de la alia, estas ankaŭ neeble, ke egoisto agu fratece kontraŭ siaj similuloj, ke avarulo estu grandanima, ke malalta homo atingu la altecon de granda homo. Nu, ĉar egoismo estas ĝenerala plago en la socio, dum ĝia plena regado la regno de vera frateco estos neebla ; ĉiu dezirus fratecon je sia profito, sed emos fari nenion profite al aliaj ; aŭ, se li tion faros, ĝi estos nur post certeco, ke li perdos nenion.

Se oni konsideras fratecon laŭ la vidpunkto de ĝia graveco por la plenumiĝo de socia feliĉo, ĝi estas sur la unua vico: ĝi estas la bazo ; sen ĝi ne povus ekzisti egaleco nek serioza libereco ; egaleco devenas de frateco, kaj libereco estas konsekvenco de ambaŭ.

Efektive, ni supozu ian socion de homoj tre malpostulemaj, bonaj kaj bonvolemaj por vivi inter si fratecan vivon, tiel ke estos inter ili nek privilegioj, nek esceptaj rajtoj, sen kio ne eblus frateco. Trakti ĉiun kiel fraton estas trakti lin egalece ; estas deziri por li tion, kion oni dezirus por si mem ; ĉe popolo de fratoj, egaleco estos konsekvenco de ties sentoj,

de ties maniero agi kaj establiĝos per la forto mem de la faktoj. Sed kio estas la malamiko de egaleco ? Ĝi estas fiero. Fiero, kiu ĉie emas esti la unua kaj la reganto, kiu vivas per privilegioj kaj esceptoj, povas elteni socian egalecon, sed neniam ĝin apogos, kaj eĉ ĝin rompos je la unua oportuna okazo. Nu, ĉar fiero estas ja unu el la plagoj de la socio, ĝis ĝi estos detruita, ĝi metos baron antaŭ veran egalecon.

Libereco, ni tion jam diris, estas ido de frateco kaj de egaleco ; ni parolas pri laŭleĝa libereco kaj ne pri natura libereco, kiu estas, laŭrajte, nerifuzebla al ĉiu homa kreito, de sovaĝulo ĝis civilizulo. Vivante kiel gefratoj, kun egalaj rajtoj, animite de reciproka sento de bonvolemo, ili praktikos inter si justecon, ne emos ĝeni unu la alian kaj sekve ne havos ion por plendi, reciproke. Libereco estos sendanĝera, ĉar neniu konjektos malrespekti aŭ malhelpi sian similulon. Sed kiel egoismo, kiu volas ĉion por si, kaj fiero, kiu emas senĉese regadi, donos la manon al libereco, kiu ilin detronigos ? La malamikoj de libereco estas do siavice egoismo kaj fiero, same kiel ili estas de egaleco kaj de frateco.

Libereco antaŭsupozas reciprokan fidon ; nu, ne eblus fido inter homoj movataj de la ekskluziva sento de personeco ; ĉar ili ne povas kontentiĝi krom depende de aliaj, ili estas senĉese sindefendaj, unuj kontraŭ la aliaj. Ĉar ili konstante pensas, ke ili perdos tion, kion ili nomas siaj rajtoj, superregado estas esenca kondiĉo por ilia ekzistado ; jen kial ili ĉiam almetos embarasojn al libereco, kaj ĝin sufokos, tiom longe kiom ili povos.

Tiuj tri principoj estas do, kiel ni diris, solidaraj inter si kaj reciproke apogiĝas ; sen ilia kuniĝo, la socia konstruaĵo ne povus esti kompleta. Frateco praktikata en sia pureco ne povus esti sola, ĉar sen egaleco kaj sen libereco ne ekzistas vera frateco. Libereco sen frateco estus forigo de brido de sur la kolo de ĉiuj fiaj pasioj, kiuj jam ne havus bremsan ; kun frateco, la homo faras nenian misuzon de sia libereco : jen estas ordo ; sen frateco, li ĝin uzas por liberigi ĉiujn siajn fiaĵojn : jen estas anarkio, trolibereco. Jen kial plej liberaj nacioj devas estigi iajn limojn al libereco. Egaleco sen frateco kondukas al samaj rezultoj, ĉar egaleco deziras liberecon ; sub preteksto de egaleco, etulo mallevas grandulon por lin anstataŭi, kaj fariĝas mem tirano ; tio estas nur delokiĝo de despoteco.

Ĉu sekvas de tio, ke dum la homoj ne akiros la senton de vera frateco, necesas teni ilin en servuteco ? Ke ili estas nekapablaj por institucioj bazitaj sur principoj de egaleco kaj de libereco ? Tia opinio estus

pli ol eraro ; ĝi estus absurdaĵo. Oni ne atendas, ke infano plene kresku, por helpi ĝin ekpaŝi. Kiu cetere plej ofte gvidas ilin ? Ĉu tiuj estas homoj de grandaj, altspiritaj ideoj, gvidataj de amo al la progreso ? Ĉu homoj, kiuj profitas la submetiĝon de iliaj malsuperuloj por evoluigi en ili la moralan sencon, kaj plialtigi ilin iom post iom al la kondiĉo de liberaj homoj ? Ne ; ĉi tiuj estas, plej ofte, homoj ĵaluzemaj pri sia potenco, kiuj celas ambicion kaj gloramon, al kiuj aliaj homoj servas kiel iloj pli inteligentaj ol bestoj, kaj kiuj, sekve, anstataŭ ilin emancipi, tenas ilin kiel eble plej longe sub la jugo de nescio. Sed tia stato ŝanĝiĝas per si mem pro la nerezistebla forto de progreso. La reago estas foje perforta kaj do tiel terura, ke la sento pri frateco, malprudente sufokita, ne sukcesas intermeti sian moderigan povon ; la batalo estiĝas inter tiuj, kiuj emas impeti kaj tiuj, kiuj emas konservi ; el tio rezultas konflikto, kiu etendiĝas eble dum jarcentoj. Fine, ŝajna ekvilibro fariĝas ; la afero pliboniĝas ; sed oni sentas, ke la sociaj bazoj ne estas solidaj ; la grundo ektermas ĉiumomente sub la paŝoj, ĉar ankoraŭ ne stariĝis la regno de libereco kaj de egaleco, sub la ŝildo de frateco, ĉar fiero kaj egoismo ankoraŭ ĉeestas, malgraŭ la klopodoj de bonaj homoj.

Vi ĉiuj, kiuj revas pri tia ora aĝo por la homaro, laboru antaŭ ĉio je la bazo de la konstruaĵo, antaŭ ol deziri la kronadon de la faro ; donu al ĝi, kiel fundamenton, fratecon en ĝia plej pura signifo ; sed por tio ne sufiĉas ĝin dekreti kaj surskribi sur standardon ; necesas, ke ĝi sidu en la koro, kaj oni ne ŝanĝas la koron de homoj per ordonoj. Kiel, por fruktigi kampon, necesas forpreni ŝtonojn kaj herbaĉojn, tiel same klopodadu senripoze forigi la viruson de fiero kaj de egoismo, ĉar tie staras la fonto de ĉia malbono, la reala baro kontraŭ regno de bono ; detruu ĝin en leĝoj, en institucioj, en religioj, en edukado, ĝis lastaj signoj de tempo de barbareco kaj privilegioj, kaj ĉiajn kaŭzojn, kiuj retenadas kaj evoluigas tiajn ĉiamajn barojn al vera progreso, kiujn, se tiel diri, oni ensuĉas kun la lakto kaj kun la aero spirata tra la tuta korpo en la socia medio ; nur tiam la homoj komprenos la devojn kaj la bonfarojn de frateco ; tiam same stariĝos, sen skuoj kaj danĝero, la komplementaj principoj de egaleco kaj de libereco.

Ĉu estas eble detruo egoismon kaj fieron ? Ni diras, laŭte kaj emfaze, JES, male necesus almeti finan punkton al la homara progreso. La homo kreskas laŭ inteligenteco, jen nekontestebla fakto ; ĉu li alvenis al kulmina punkto, kiun li ne povas transpasi ? Kiu aŭdacus subteni tian absurdan tezon ? Ĉu li progresas morale ? Por respondi tiun demandon,

Unua parto

sufiĉas kompari la epokojn en unu sama lando. Kial do li atingus la limon de morala progreso antaŭ tiu de intelekta progreso ? Lia deziro direkte al ia pli bona situacio indikas la eblecon tien alveni. Al progresemaĵoj homoj koncernas aktivigi tian movadon per studado kaj utiligo de plej efikaj rimedoj.



La Aristokratioj

Aristokratio devenas de la helena *aristos*, la plej bona, kaj *Kratos*, povo : aristokratio laŭlitere signifas do : *Povo de la plej bonaj*. Oni konsentu, ke tiu primitiva senco kelkfoje strange devojiĝis ; sed ni vidu, kiun influon Spiritismo povas havi sur ĝian aplikadon. Por tio, ni prenu la aferon ekde la deirpunkto kaj sekvu ĝin tra la aĝoj por dedukti tion, kio venos poste.

En neniu tempo, kaj en neniu popolo, la homoj en socio povis malhavi estrojn ; oni ne trovis tion eĉ ĉe la plej sovaĝaj. Tio okazas, ĉar pro la diverseco de kapabloj kaj de karakteroj propraj al la homa specio, ekzistas ĉiam homoj nekapablaj vivi sen orientado, malfortuloj kiuj bezonas protektadon, pasioj kiuj postulas subpremadon ; de tio venas la bezono de ia aŭtoritato. Oni scias, ke ĉe primitivaj socioj tian aŭtoritatecon oni atribuis al famiĉestroj, al maljunuloj, al respektinduloj, unuvorte, al patriarkoj ; tia estis la unua el ĉiuj aristokratioj.

Kiam la socioj fariĝis pli multenombraj, la patriarka aŭtoritateco fariĝis senpova en certaj cirkonstancoj. Kvereloj inter najbaraj loĝantaroj estigis batalojn ; necesis por ilin estri ne maljunuloj, sed fortaj, viglaj kaj inteligentaj viroj ; de tio la militistaj estroj. Al venkintaj estroj oni atribuis aŭtoritatecon, kun la espero trovi en ilia braveco garantion kontraŭ malamikaj atakoj ; multaj el tiuj, misuzante sian pozicion, mem akaparis la situacion ; poste, venkintoj superregis venkitojn aŭ submetis ilin al servuteco ; sekvis la kruda forto, kiu estis la dua aristokratio.

Fortuloj, kun siaj havaĵoj, transdonas tute nature sian aŭtoritatecon al siaj gefiloj, kaj malfortuloj, premitaj, nenion aŭdacas diri kaj iom post iom al kutimiĝas konsideri ilin kiel heredantojn de rajtoj akiritaj de la gepatroj kaj konsideri ilin kiel superulojn ; de tio rezultas dividiĝo de la socio en

du klasojn : la superuloj kaj la malsuperuloj, la ordonantoj kaj la obeantoj ; sekvas la aristokratio de naskiĝo, kiu fariĝis tiel potenca kaj tiel superreganta, kiel tiu de forto, ĉar se ĝi ne havis la forton mem, kiel en la unuaj tempoj, kiam oni devis pagi per la propra persono, tamen ĝi disponis pri salajrata forto. Havante ĉian povon, ĝi donadis al si mem privilegiojn, nature.

Por la konservado de tiaj privilegioj, necesis doni al ĉi tiuj la prestiĝon de leĝo, kaj ĝi faris la leĝojn siaprofite, laŭ tio, kio estis faciliga por ĝi, ĉar ĝi mem sola ilin faris. Tio ne estis tamen sufiĉa ; ĝi aldonis la prestiĝon de dieca rajto, por fari ilin respektindaj kaj nekontraŭeblaj. Por certigi tiun respekton flanke de la submetita klaso, kiu fariĝis pli kaj pli multenombra kaj pli malfacila por retenado, eĉ per forto, estis nur unu maniero, tio estas, malhelpi, ke ĝi klare vidu, nome retenadi ĝin en nescio.

Se la supera klaso povus tenadi la malsuperan klason en nenifardado, tiam ĝi havus ĝin submetata ankoraŭ longe ; sed ĉar ĝi estas devigata labori por vivi, kaj labori tiom pli, kiom pli premata, rezultis, ke la neceso senĉese eltrovi novajn fontojn, batali kontraŭ invadanta konkurado, serĉi novajn merkatojn por siaj produktoj, elvolvis ĝian inteligenton, kaj ke ĝi kleriĝadis pro la samaj kaŭzoj, kiujn oni uzis por submeti ĝin. Ĉu oni ne vidas tie tuŝon de Providenco ?

La submetita klaso do klare vidis ; ĝi ekvidis, kiom malgranda estas la prestiĝo, kiun oni neis al ĝi, kaj, sentante, ke ĝi estas forta laŭnombre, ĝi forpuŝis la privilegiojn kaj proklamis egalecon antaŭ la leĝo. Ĉi tiu principo markis en iuj popoloj la finon de la regno de aristokratio de naskiĝo, kiu fariĝis ne pli ol laŭnoma kaj honoriga, ĉar ĝi jam ne liveras laŭleĝajn rajtojn.

Tiam stariĝis ia nova potenco, tiu de mono, ĉar per mono oni disponas pri homoj kaj aĵoj. Ĝi estis ia suno leviĝanta, antaŭ kiu ĉiuj kliniĝis, kiel iam oni kliniĝis antaŭ blazono, kaj eĉ pli malsupren. Kion oni jam ne koncedis al titoloj, tion oni koncedis al monhavo, kaj monhavo ricevis siajn laŭleĝajn privilegiojn. Sed kiam oni ekkomprenis, ke se por akiri monon necesas iom da inteligento, tio ne estis necesa pro heredo, kaj ke idoj estas pli lertaj je manĝado ol je gajnado, ke la rimedoj mem por riĉiĝo ne ĉiam estas senriproĉaj ; el tio rezultas , ke mono iom post iom perdas sian moralan prestiĝon kaj ke tiun potencon emas anstataŭi alia potenco, iu alia, pli justa aristokratio : tiu de inteligento, antaŭ kiu ĉiu homo povas sin klini sen humiliĝo, ĉar ĝi apartenas egale al malriĉulo kaj al riĉulo.

Ĉu tiu estos la lasta ? Ĉu ĝi estas la plej alta esprimo de la civilizita homaro ? Ne.

Inteligento ne estas ĉiam garantio de moraleco, kaj plej inteligenta homo povas fari tre malbonan uzon de siaj kapabloj. Aliflanke, la sola moraleco ofte povas esti nesufiĉa. La kuniĝo de tiuj du kapabloj, *inteligento* kaj *moraleco*, estas do necesa por krei ian rajtohanan superecon, al kiu la homamaso blinde submetiĝos, ĉar ĝi inspiros al ĝi kompletan fidon per siaj lumoj kaj per sia justeco. Tia estos la lasta aristokratio, konsekvenco aŭ eĉ signo de alveno de regno de bono sur la tero. Ĝi alvenos tute nature per la forto mem de la faktoj ; tuj kiam homoj de tia kategorio estos sufiĉe multenombraj por formi imponan plimulton, al ili la homamaso konfidos siajn interesojn.

Kiel ni vidis, ĉiuj aristokratioj havis sian pravon de ekzisto ; ili naskiĝis de la stato de la homaro ; tiel same okazos al tio, kio fariĝos necesa; ĉiuj havis aŭ havos sian tempon laŭ la landoj, ĉar neniu el ili havis kiel precipan bazon la moralan principon ; ĉi tiu sola principo povas konsistigi daŭran superregadon, ĉar ĝin animos sentoj de justeco kaj karitato ; superregadon, kiun ni nomos : *intelekta-morala aristokratio*.

Ĉu tia stato eblas kun egoismo, fiero, ambicio, kiuj superregas sur la tero ? Al tio ni senhezite respondas: jes, ne nur eblas, sed ĝi alvenos, ĉar ĝi estas neevitebla.

Hodiaŭ inteligento regas ; ĝi estas suverena, neniu tion kontestas ; kaj tio estas tiel vera, ke oni vidas popolanon atingi altrangajn postenojn . Ĉu tia aristokratio ne estas pli justa, pli logika, pli racia ol tiu de kruda forto, de naskiĝo aŭ de mono ? Kial do estus neeble aldoni al ĝi moralecon ? Ĉar, diras pesimistoj, malbono regas sur la tero. – Ĉu estas dirite, ke bono ne venkos ĝin iam ? Ĉu moroj, kaj sekve sociaj institucioj, ne valoras hodiaŭ centoble pli ol dum mezepoko ? Ĉu ĉiu jarcento ne markiĝis per iu progreso ? Kial do la homaro ekhaltus, kiam estas ankoraŭ multo farenda ? La homoj, pro natura instinkto, serĉadas sian bonfarton ; se ili ne trovas ĝin komplete en la regno de inteligento, ili serĉos ĝin aliloke ; kaj kie ili povos ĝin trovi, krom en la regno de moraleco ? Por tio, necesas, ke moraleco nombre kresku. Estas multo farenda, senkonteste, sed, ankoraŭ unufoje, estus stulta pretendo diri, ke la homaro atingis sian kulminon, kiam oni vidas, ke ĝi senĉese iras la vojon de progreso.

Unue ni diru, ke bonuloj sur la tero ne estas nepre tiel maloftaj, kiel oni pensas ; malbonuloj estas multenombraj, tio estas bedaŭrinde vera : sed kio ŝajnigas ilin ankoraŭ pli multenombraj, tio estas, ke ili havas pli da aŭdaco kaj ke ili sentas, ke tia aŭdaco mem estas al ili necesa por

sukcesi ; kaj krome, ili komprenas tiel akurate la superecon de bono, ke nepovante ĝin praktiki, ili prenas ties maskon.

Male, bonuloj ne paradas pri siaj bonaj kvalitoj ; ili ne sin evidentigas, kaj jen kial ili ŝajnas malplinombraj ; sed esploru la intimajn agojn plenumatajn sen elmontrado, kaj en ĉiuj tavoloj de la socio vi trovos ankoraŭ sufiĉe da bonaj kaj fidelaj naturoj por via kora resereniĝo kaj por forigi elreviĝon pri la homaro. Cetere, necesas ĉi tion diri ankaŭ, inter malbonuloj ekzistas multaj, kiuj estas tiaj nur pro influo, kaj kiuj fariĝus bonaj, se ili submetiĝus al ia bona influo. Ni fakte starigas, ke el 100 individuoj, estas 25 bonaj kaj 75 malbonaj ; el ĉi tiuj lastaj, ekzistas 50, kiuj estas tiaj pro malforteco, kaj estus bonaj, se ili havus bonajn ekzemplojn antaŭ siaj okuloj, kaj precipe se ili ricevus bonan kondukadon ekde infanaĝo ; kaj el la 25 efektive malbonaj, ne ĉiuj estas neplibonigeblaj.

En la nuna situacio, malbonuloj estas plimulto kaj ili faris la leĝon super bonuloj ; ni supozu, ke ia cirkonstanco kondukas al konvertiĝo de la 50 mezuloj, tiam bonuloj estos plimulto kaj faros siavice la leĝon ; el la aliaj 25 efektive malbonaj, pluraj cedos al la influo, kaj restos nur kelkaj neplibonigeblaj sen granda influo.

Ni prenu ekzemplon por komparo : ekzistas popoloj, ĉe kiuj homomortigado kaj ŝtelado estas normalaj : bono estas tie escepto. Ĉe la eŭropaj popoloj plej progresintaj kaj plej bone regataj, krimo estas escepto ; sub premo de la leĝoj, ĝi ne influas la socion. Kio ankoraŭ regadas tie estas la malvirtoj je karaktero : fiero, egoismo, ambicio kaj ilia sekvantaro.

Kial do, se tiuj popoloj progresas, la malvirtoj ne fariĝus tie escepto, kiel estas hodiaŭ la krimoj, se oni konsideras, ke la malsuperaj popoloj atingus vian nivelon ? Nei la eblecon de tia suprenirado estus nei progreson.

Kompreneble, tia situacio ne povas esti faro unutaga, sed se ekzistas kaŭzo, kiu povas plirapidigi la atingon, tiu sendube estas Spiritismo. Esence agante por la homa solidareco, montrante la provojn de la nuna vivo kiel logikan, racian sekvon de agoj plenumitaj en antaŭaj ekzistadoj, farante ĉiun homon konstruanto de sia propra feliĉo, ĝi nepre rezultigos per sia disvastiĝo senteban plialtigon de la nuna morala nivelo.

La ĝeneralaj principoj de nia filozofio ja estas ellaboritaj kaj kunordigitaj, kaj jam kunigis en imponan komunan pensularon, milionojn da aliĝintoj dise sur la tuta tero. La progreso plenumita sub ties influo, la individuaj kaj lokaj transformiĝoj, kiujn ili kaŭzis dum malpli ol dek kvin jaroj, permesas, ke ni kalkulu la grandegajn, fundamentajn ŝanĝojn, al kiuj ili estos alvokataj starigi en la estonteco.

Sed se danke al la elvolviĝo kaj ĝenerala akceptiĝo de la instruoj de la Spiritoj, la morala nivelo de la homaro konstante tendencas al plialtiĝo, tamen nepre eraro estus supozi, ke moraleco superos inteligentecon. Spiritismo efektive ne petas, ke oni akceptu ĝin blinde. Ĝi postulas diskutadon kaj lumon.

« Anstataŭ blinda fido, kiu frakasas liberpensadon, ĝi diras : *ne ekzistas nerompebla fido, krom tiu, kiu povas alfronti racion, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, en ĉiuj epokoj de la homaro. Al fido mankas bazo, kaj tiu bazo estas perfekta kompreno pri tio, kion oni kredas ; por kredi, ne sufiĉas vidi, necesas super ĉio kompreni.* » (*La Evangelio laŭ Spiritismo.*) Laŭ bona rajto ni do povas konsideri Spiritismon kiel unu el la plej potencaj antaŭuloj de aristokratio de la estonteco, nome de la *intelekta-morala aristokratio*.



La Dizertintoj

Se ĉiuj grandaj ideoj havis siajn fervorajn, sindediĉajn apostolojn, tamen eĉ la plej bonaj havis ankaŭ siajn dizertintojn. Spiritismo ne povus eviti la sekvojn de homa malforteco ; ĝi havis la siajn, kaj pri tiu temo kelkaj rimarkigoj ne estos senutilaj.

Komence, multaj trompiĝis pri la naturo kaj la celo de Spiritismo, kaj ne komprenis ĝian gravecon. Ĝi antaŭ ĉio ekscitis scivolemon ; multaj vidis en la manifestiĝoj nenion alian ol objekton de distriĝo ; ili amuziĝis kun la Spiritoj, dum ĉi tiuj volis ilin amuzi ; ĝi estis ia tempopasigo ofte aldona al vesperkunvenoj.

Tia maniero prezenti la aferon komence estis ia lerta taktiko flanke de la Spiritoj ; sub formo de amuzaĵo, la ideo penetris ĉien kaj semis la ĝermojn, ne timigante timemajn konsciencojn ; oni ludis kun la infano, sed la infano devis kreski.

Kiam, post ŝercemaj Spiritoj, venis la seriozaj, moraligemaj Spiritoj ; kiam Spiritismo fariĝis scienco, filozofio, tiam supraĵemaj homoj jam ne trovis ĝin amuza ; al tiuj, kiuj amas antaŭ ĉio la materian vivon, ĝi estis ia neoportuna, ĝena cenzuristo, kaj multaj flankklasis ĝin. Ne indas domaĝi tiujn dizertintojn, ĉar frivoluloj estas ĉie malbonaj helpantoj. Tamen, tiu komenca fazo ne estis perdita tempo, tute male. Pro tiu ŝajnigo, la ideo estis centoble pli disvastigata, ol se ĝi estus dekomence vestita per severa formo ; sed el tiuj supraĵaj, neglektemaj medioj elvenis seriozaj pensuloj.

Tiuj fenomenoj, enmodigitaj per allogo de scivolemo, fariĝis entuziasmaĵo kaj tentis la ambicion de homoj atendantaj ion novan, kun la espero en ĝi trovi malfermitan pordon. Tiaj manifestiĝoj ŝajnis io mirinde ekspluatebla, kaj multaj revis fari ĝin helpaĵo al sia industrio ; aliaj vidis en ĝi variaĵon de la arto diveni, rimedon eble superan al kartdivenado,

kafmakulo, k.t.p., k.t.p., por ekkoni la estontecon kaj eltrovi kaŝitaĵojn, ĉar laŭ la tiama opinio, Spiritoj certe ĉion scias.

Kiam tiaj homoj vidis, ke la negocado glitas el iliaj manoj kaj fariĝas mistifikado, ke la Spiritoj ne venas por helpi ilin gajni riĉaĵon, doni al ili bonajn numerojn de loterio, diri al ili la bonŝancon, malkovri al ili trezorojn aŭ venigi heredaĵojn, doni al ili iun fruktodonan, patenteblan inventaĵon, provizi ilin kontraŭ nescio kaj evitigi al ili intelektan kaj korpnan laboron, tiam la Spiritoj jam taŭgis por nenio, kaj iliaj manifestiĝoj estis nur iluzioj. Same kiel ili apogis Spiritismon, kiam ili esperis preni el ĝi iun profiton, tiel ili ĝin priklaĉis, kiam venis la elreviĝo. Kritikistoj, kiuj ĝin mokis, kondukus ĝin ĝis la nuboj, se ĝi trovus por ili iun riĉan onklon en Ameriko, aŭ gajnon ĉe Borso. Tiu estas la plej multenombra kategorio de dizertintoj, sed oni konsentu, ke oni ne rajtas plenkonscie klasi ilin kiel spiritistojn.

Ankaŭ tiu fazo havis sian utilecon ; montrante, ke oni devus ne atendi helpon de la Spiritoj, ĝi sciigis la seriozan celon de Spiritismo, ĝi purigis la doktrinon. La Spiritoj scias, ke instruoj de sperto estas la plej profitaj ; se de la komenco ili dirus : Ne demandu pri tio aŭ tio alia, ĉar vi ĝin ne ricevos, eble oni ne kredus ilin ; jen kial ili lasis, ke oni faru tion, por ke la vero eliru el la observado. Tiaj elreviĝoj senkuraĝigis ekspluatantojn kaj kontribuis por malgrandigi ties kvanton ; ili estas parazitaj, kiujn ili, la elreviĝoj, forigis de Spiritismo, kaj ne sinceraj adeptoj.

Iuj homoj, pli sagacaj ol aliaj, duonvidis plenkreskulon en la infano, kiu ĵus naskiĝis, kaj timis ĝin, kiel Herodo timis la Infanon Jesuon. Ne aŭdacante fronte ataki Spiritismon, tiuj homoj incitis agantojn por ĝin ĉirkaŭpreni kaj sufoki ; kiuj surmetis maskon por enŝoviĝi ĉien, enblovi perfide malakordon en la centrojn, disverŝi subfose venenon de kalumnio, ĵeti flamojn de malkonsento, puŝi al kompromitaj agoj, klopodi devojigi la doktrinon por fari ĝin ridinda aŭ malaminda, kaj poste ŝajnigi elaniĝojn. Aliaj estas eĉ pli lertaj ; predikante unuiĝon, ili semas disiĝon ; ili perfide proponis incitajn, ofendajn demandojn ; ili incitis ĵaluzon pri supereco inter la diversaj centroj ; ili estus feliĉaj vidi ilin reciproke ĵeti ŝtonojn kaj levi standardon kontraŭ standardo, koncerne kelkajn malsamajn opiniojn pri iuj demandoj, laŭ formo aŭ laŭ signifo, plej ofte provokitaj. Ĉiuj doktrinoj havis siajn Judasojn ; Spiritismo ne povus ne havi la siajn, kaj al ĝi ili ne mankis.

Tiuj estas malsinceraj spiritistoj, kiuj tamen ankaŭ havis sian utilecon ; ili instruis la veran spiritiston esti prudenta, serioza, kaj ne fidi ŝajnojn.

Principe, necesas suspekti pri tro ardantaj fervoruloj, kiuj preskaŭ ĉiam estas pajla fajro, aŭ ŝajnigoj, cirkonstancaj entuziasmoj, kiuj suplementas agojn per abundo da paroloj. La vera konvikiteco estas trankvila, pripensema, motivita ; ĝi montriĝas, kiel la vera kuraĝo, per faroj, nome per firmeco, per obstino kaj super ĉio per abnegacio. Morala kaj materia senambicio estas la vera tuŝostono de sincereco.

Sincereco havas ian stampon *sui generis* ; ĝi reflektiĝas per nuancoj ofte pli facile kompreneblaj ol difineblaj ; oni ĝin sentas per tiu transdonado de la penso, kies leĝon Spiritismo al ni klarigis, kaj kiun falso neniam komplete imitas, ĉar ĝi ne povas ŝanĝi la naturon de la fluidaj emanaĵoj, kiujn ĝi elsendas. Ĝi trompiĝas, pensante, ke eblas interŝanĝi tion per flatado fia kaj falsa, kiu povas allogi nur fierajn animojn, sed per ĉi tiu flatado mem ĝi senmaskiĝas antaŭ superaj animoj.

Glacio neniam povas imiti varmon.

Se ni transiras al la kategorio de la proprediritaj spiritistoj, ankoraŭ tie ni renkontos certaj homajn malfortecojn, kiujn la doktrino ne ĉiam tuj venkas. Plej malfacile venkeblaj estas egoismo kaj fiero, ĉi tiuj du pasioj esence homaj. Inter konvinkitaj adeptoj, ne okazas dizertoj laŭ la plej pura senco de la vorto, ĉar tiu, kiu dizertus pro persona intereso aŭ pro iu ajn alia kaŭzo, neniam estintus sincera spiritisto ; sed povas okazi senfervorigoj. Kuraĝo kaj persistemo povas fleksiĝi antaŭ elreviĝo, neplenumiĝinta ambicio, ne atingita supereco, vundita memamo, malfacila provo. Oni retroiras antaŭ forofero de persona komforto, timo kompromiti materiajn interesojn, timo pri tio, kion oni diros pri la afero ; oni konfuziĝas pro mistifiko ; oni ne forlasas, sed oni senfervoriĝas ; oni vivas por si kaj ne por la aliaj ; oni volas ricevi bonaĵojn de la kredo, sed kondiĉe, ke ĝi neniom kostu. Certe, tiuj, kiuj tiel agas eble povas esti kredantoj, sed ili plej certe estas egoistaj kredantoj, en kiujn la fido ne flamigis la sanktan fajron de sindediĉo kaj de abnegacio ; al ilia animo estas pene dekroĉiĝi de la materio. Ili nominale multnombros, sed oni ne povas kalkuli pri ili.

Ĉiuj aliaj estas spiritistoj, kiuj vere meritas tiun nomon : ili akceptas por si mem ĉiujn konsekvencojn de la doktrino, kaj oni rekonas ilin per la klopodoj, kiujn ili faras por sin plibonigi. Se oni ne malŝatas, en la limoj de akceptebleco, la materiajn interesojn, ĉi tiuj estas por ili tio akcesora, ne tio ĉefa ; surtera vivo estas nenio alia ol nura trairado, pli aŭ malpli peniga ; de ĝia plenumado utila aŭ malutila dependas la estonteco ; iliaj ĝojoj estas modestaj, kompare kun la majesta celo, kiun ili duonvidas transe ; ili ne rifuzas la barojn, kiujn ili trovas survoje, la suferoj, la elreviĝoj estas

provoj, antaŭ kiuj ili ne senkuraĝiĝas, ĉar ripozo estas premio de laboro ; jen kial oni ne vidas inter ili dizertojn, nek senfervoriĝojn.

Krome, bonaj Spiritoj videble protektas tiujn, kiuj batalas kuraĝe kaj obstine, kiam la sindediĉo estas sincera kaj senrezerva ; ili helpas ilin triumfi super la baroj kaj mildigas la provojn, kiujn ili ne povas eviti, same kiel ili forlasas ne malpli videble tiujn, kiuj forlasas ilin kaj oferas la aferon de la vero al sia persona ambicio.

Ĉu ni devas vicigi inter la dizertintojn de Spiritismo tiujn, kiuj retiriĝas, ĉar nia vidmaniero ne kontentigas ilin ; tiujn, kiuj trovas nian metodon tro malrapida aŭ tro rapida, kaj pretendas atingi pli frue kaj en pli bonaj kondiĉoj la celon, kiun ni proponas al ni ? Ne, certe, se la sincereco kaj la deziro disvastigi la veron estas iliaj solaj gvidiloj. – Jes, se iliaj klopodoj tendencas nur al sinelmonstro kaj al atingado de publika atento por kontentigi ilian memamon kaj ilian personan intereson !

Vi havas manieron vidi, kiu ne estas la nia ; vi ne simpatias kun la principoj, kiujn ni akceptas ! Nenio pruvas, ke vi staras pli proksime al la vero ol ni. Oni povas malsame opinii koncerne sciencon ; esploru viaflanke, kiel ni esploras niaflanke ; la estonteco vidigos, kiu el ni pravas aŭ malpravas. Ni ne pretendas esti la solaj, kiuj plenumas kondiĉojn, sen kiuj oni ne povas fari seriozajn, utilajn studojn ; kion ni faris, aliaj certe povas fari. Kio gravas, ke inteligentaj homoj kunsidus kun ni aŭ malproksime de ni !... Ke studocentroj multobliĝas, des pli bone, ĉar tio estos signo de senkontesta progreso, kiun ni aplaudos per nia tuta forto.

Koncerne rivalecojn, klopodojn nin superi, ni havas sekuran rimedon por ilin ne timi. Ni laboru por kompreni, por pligrandigi nian inteligenton kaj nian koron ; ni batalu kun la aliaj, sed ni batalu kun karitato kaj abnegacio. Amo al la proksimulo, skribita sur nia standardo, estu nia devizo ; serĉado de vero, de kie ajn ĝi venu, nia sola celo ! Kun tiaj sentoj ni alfrontos la mokadon de niaj kontraŭuloj kaj la atakojn de niaj konkurantoj. Se ni trompiĝos, ni ne havos stultan memamon por obstini ĉe falsaj ideoj ; sed ekzistas principoj, ĉe kiuj oni certe neniam trompiĝos : tio estas amo al bono, abnegacio, forpuŝado de ĉia sento de envio kaj ĵaluzo. Tiaj principoj estas la niaj ; ni vidas ilin kiel la ligilon, kiu devas kunigi ĉiujn bonintencajn homojn, kiu ajn estus la malkonsento inter iliaj opinioj ; nur egoismo kaj malbonintenco metas inter ilin nevenkeblajn barojn.

Sed kiu estos la konsekvenco de tia situacio ? Sen kontraŭdiro, la insidaj de falsaj fratoj povus momente alporti kelkajn partajn perturbojn.

Pro tio necesas fari, kiel nur eble, ĉiujn klopodojn por malsukcesigi ilin; sed ili nepre ne longe daŭros ; kaj ne malhelpos estontece : unue, ĉar ili estas opoziciaj manovroj, kiu falos per la fortoj mem de la situacio ; krome, kion ajn oni diros aŭ faros, oni ne povos forpreni de la doktrino ĝian distingon econ, ĝian racian, logikan filozofion, ĝian konsolan kaj regeneran moralon. Nuntempe, la bazoj de Spiritismo estas neskueble fiksitaj; la senmanke verkitaj libroj, atingeblaj por ĉiuj inteligentoj, estos ĉiam la klara kaj preciza esprimo de la instruado de la Spiritoj kaj ĝin transdonos senŝanĝe al tiuj, kiuj venos post ni.

Necesas nepre atenti, ke ni estas en momento de transiro, kaj ke nenia transiro okazas sen konflikto. Neniu do miru, ke certaj pasioj agitiĝas pro fiaskintaj ambicioj, vunditaj interesoj, pretendoj elreviĝintaj; sed iom post iom ĉio tio ĉesas, la febro kvietiĝas, homoj pasas kaj novaj ideoj restas. Spiritistoj, se vi volas esti nevenkeblaj, estu bonvolemaj kaj karitatemaj ; bono estas kiraso, kontraŭ kiu ĉiam rompiĝos la manovroj de malico !...

Ni do ne timu : la estonteco estas nia ; ni lasu, ke niaj kontraŭuloj baraktu sub la premado de vero, kiu ilin duonblindigas ; ĉia kontraŭado estas senpova kontraŭ evidentajo, kiu nepre triumfas per la forto mem de la cirkonstancoj. Universala disvastigo de Spiritismo estas afero de tempo, kaj en ĉi tiu jarcento la tempo iras per gigantaj paŝoj, impulsate de progreso.

Allan Kardec.

Noto. – Ni publikigas kiel komplementon de ĉi tiu artikolo instruon donitan de Allan Kardec pri la sama temo, post lia reveno en la mondon de la Spiritoj. Ŝajnis al ni, ke interesos niajn legantojn aldoni al la elokventaj, virecaj paĝoj, ĉi-supre, la nunan opinion de la elstara organizinto de nia filozofio.

* * *

Kiam mi estis korpe inter vi, mi diradis ofte, ke necesas verki historion pri Spiritismo, kiu nepre estus interesa ; ĝi estas ankoraŭ hodiaŭ mia konsilo, kaj la elementoj, kiujn mi kunigis tiucele, povos taŭgi iam por plenumi mian intencon. Efektive, mi ja lokiĝis pli bone ol ĉiu alia homo por observi la kuriozan spektaklon kaŭzitan de la disvastigo de granda veraĵo. Iam mi antaŭsentis, hodiaŭ mi scias tion, kia mirinda ordo, kia nekonceptebla harmonio regas tiun koncentraĵon de ĉiuj dokumentoj destinitaj naski la novan verkon. Bonvolemo, volonteco, absoluta sinde-diĉo de iuj homoj ; malbonintenco, hipokrito, fiaj manovroj de aliaj, ĉio

Unua parto

tio helpas garantii la stabilecon de la starigata konstruaĵo. En la manoj de superaj potencoj, kiuj direktas ĉiujn progresojn, senkonsciajn aŭ ŝajnigajn rezistojn, atakojn celantajn dissemi malkredemon kaj ridindecon, ĉio fariĝas iloj por elvolvigado.

Kion oni ne faris ! kiajn rimedojn oni ne entreprenis por sufoki la infanon en la lulilo !

Ĉarlataneco kaj superstiĉo volis iel ajn akapari niajn principojn por ekspluati ilin je sia profito ; ĉiuj fulmoj de la gazetoj direktiĝis kontraŭ ni ; oni mokis pri aferoj plej respektindaj ; oni atribuis al Spirito de malbono instruojn de Spiritoj plej indaj je universalaj admiro kaj respekto ; kaj tamen ĉiuj tiaj amasiĝintaj klopodoj, tia kuniĝo de ĉiaj vunditaj interesoj sukcesis nur montri la senpovecon de niaj kontraŭuloj.

Meze de tia senĉesa batalado kontraŭ starigitaj antaŭjuĝoj, kontraŭ establitaj eraroj, oni lernas ekkoni la homojn. Mi sciis, kiam mi min dediĉadis al mia preferata tasko, ke mi elmetiĝas al malamo, al envio kaj al ĵaluzo de aliaj homoj. La vojo estis prisemata per malfacilaĵoj senĉesaj. Nenion povante kontraŭ la doktrino, oni atakadis la homon ; sed tiuflanke mi estis forta, ĉar mi rezignis pri mia propra memo. Ne gravis al mi la klopodoj de kalumnio ; mia konscienco kaj la grandeco de la celo forgesigis min pri la malfacilaĵoj kaj pikiloj survoje. La esprimoj de simpatio kaj de estimo, kiun mi ricevis de tiuj, kiuj apreziis min, estis plej dolĉa rekompenco, kiun mi neniam ambiciis ; sed jen ! kiomfoje mi falus sub la premado de la tasko, se la estimo kaj la rekonado de la plej multaj homoj ne farus min forgesi sendankemon kaj maljuston de iuj aliaj ; ĉar se la atakoj direktitaj kontraŭ mi ĉiam trovis min nesentema, tamen mi devas diri, ke mi pene suferis ĉiam, kiam mi trovis falsajn amikojn inter tiuj, de kiuj mi esperis plej multe.

Se estas juste riproĉi tiujn, kiuj klopodis ekspluati Spiritismon aŭ miskarakterizi ĝin je ĝiaj verkoj, antaŭ ol fari akuratan studadon, tamen des pli kulpaj estas tiuj, kiuj, enkapiginte ĉiujn principojn, ne nur retiriĝas, sed turnas siajn klopodojn kontraŭ ĝin ! Por la forlasintoj de tiu kategorio ja necesas peti la dian mizerikordon, ĉar ili memvole malbruligis la flamon, kiu ilin lumigis, kaj pro kies helpo ili povis lumigi aliajn homojn. Ili baldaŭ perdas la protektadon de bonaj Spiritoj, kaj laŭ nia sperto oni vidas ilin tuj fali laŭgrade en situaciojn plej gravajn !

De mia reveno en la spiritan mondon, mi renkontis iujn el tiuj malfeliĉuloj ! Nun ili petas ; ili bedaŭras sian nenifaradon kaj sian malbonvolemon, sed ili ne povas ripari la perditan tempon !... Ili revenos surteren kun la firma decido aktive helpi la progreson kaj ankoraŭ batalos kontraŭ siaj antikvaj tendencoj, ĝis ili definitive triumfos super ili.

La Dizertintoj

Oni povus pensi, ke la hodiaŭaj spiritoj, prilumitaj per tiaj ekzemploj, evitos fali en la samajn erarojn. Ne estas tiel. Ankoraŭ longe ekzistos falsaj fratoj kaj misaj amikoj ; sed, ne pli ol la antaŭuloj, ili ne sukcesos forigi Spiritismon de ĝia vojo. Se ili kaŭzas iujn momentajn, pure lokajn perturbojn, tamen la doktrino ne endanĝeriĝos pro tio ; male, devojiĝintaj spiritoj retrovos sian eraron ; ili revenos al kunhelpado kun nova ardo al la flankenlasita verko, kaj agante en konsento kun la superaj Spiritoj, kiuj direktas la homajn transformiĝojn, ili avancoj per pli rapidaj paŝoj al la feliĉa tempo promesita al la regeneriĝinta homaro.

Allan Kardec
(Parizo, novembro 1869.)



Mallonga Respondo al la Kontraŭuloj de Spiritismo

Rajto je ekzamenado kaj kritikado estas rajto nepreskriptebla, kiun Spiritismo ne pretendas eviti, same kiel ĝi ne pretendas ĉiujn kontentigi. Ĉiu homo do estas libera por ĝin aprobi aŭ rifuzi ; sed por tio necesus ĝin pridiskuti, bone konante la aferon ; nu, la kritikado ofte pruvis sian nescion pri ĝiaj plej elementaj principoj, esprimante pri ĝi precize la malon de tio, kion ĝi diris, atribuante al ĝi tion, kion ĝi malrekomendas, ĝin konfuzante kun la imitoj krudaj kaj burleskaj de ĉarlatanismo, fine donante kiel regulon pri ĉio la ekstravagancojn de kelkaj individuoj. Tro ofte, krome, malbonintenco volis fari ĝin respondeca pri riproĉindaj aŭ ridindaj agoj, ĉe kiuj ĝia nomo troviĝis apenaŭ okaze, kaj faris el tio armilon kontraŭ ĝi.

Antaŭ ol imputi al doktrino instigadon al ajna riproĉinda ago, la prudento kaj senpartieco volas, ke oni ekzameni, ĉu tiu doktrino enhavas maksimumojn, kiuj pravigas tian agon.

Por koni la parton de respondeco, kiu koncernas spiritismon en certa cirkonstanco, ekzistas tre simpla rimedo, nome informiĝi *bonafide*, ne ĉe kontraŭuloj, sed ĉe la fonto mem, pri tio, kion ĝi aprobas kaj pri tio, kion ĝi malaprobas. La afero estas do des pli facila, ĉar ĝi enhavas nenion sekretan; ĝiaj instruoj estas malfermitaj, kaj ĉiu povas ilin kontroli.

Se do la libroj pri la spiritisma doktrino eksplicite kaj formale kondamnas juste malaprobindan agon; se, male, ili nur enhavas instruojn por konduki al bono, tiam la homo kulpas pri misago, se li ne prenis el tiuj libroj sian inspiron, eĉ se ilin ne posedas.

Spiritismo ne estas solidara kun tiuj, al kiuj plaĉas rigardi sin spiritistoj, same kiel medicino ne solidaras kun ĉarlatanoj, kiuj ĝin ekspluatas, nek sana religio kun la misuzoj aŭ eĉ krimoj faritaj en ties nomo. Ĝi rekonas kiel siajn adeptojn nur tiujn, kiuj praktikas ĝiajn instruojn, tio estas, kiuj laboras por sia propra morala pliboniĝo, klopodante venki siajn malbonajn inkliojn, esti malpli egoistaj kaj malpli fieraj, pli mildaj, pli humilaj, pli paciencaj, pli bonvolemaj, pli karitatemaj rilate la proksimulon, pli moderaj en ĉio, ĉar tia estas la karaktero de vera spiritisto.

La celo de ĉi tiu mallonga noto ne estas refuti ĉiujn falsajn argumentojn direktatajn kontraŭ Spiritismo, nek elvolvi, nek pruvi ĉiujn principojn, kaj, ankoraŭ malpli, provi konverti al tiuj principoj tiujn, kiuj konfesas kontraŭajn opiniojn, sed diri, per kelkaj vortoj, kio ĝi estas kaj kio ĝi ne estas, kion ĝi akceptas, kion ĝi malakceptas.

Ĝiaj kredoj, ĝiaj tendencoj kaj ĝia celo resumiĝas je la sekvantaj asertoj :

1^a *Spirita elemento kaj materia elemento* estas la du principoj, la du vivantaj fortoj en la naturo, kiuj kompletigas unu la alian kaj senĉese reagas unu sur la alian, ambaŭ nemalhaveblaj por la funkciado de la mekanismo de la universo.

De la reciproka agado de tiuj du principoj naskiĝas fenomenoj, kiujn ĉiu el ili, solaj, ne povas ekspliki.

La propre dirita Scienco havas kiel specialan mision studi la leĝojn de materio.

Spiritismo havas kiel objekton la studadon de la *spirita elemento* en ties rilatoj kun la materia elemento, kaj montras en la kuniĝo de tiuj du principoj la kaŭzon de amaso da faktoj ĝis nun ne eksplikitaj.

Spiritismo iras en konsento kun scienco sur la kampo de materio : ĝi akceptas ĉiujn veraĵojn, kiujn ĝi konstatas ; sed kie ĝi haltas je siaj esploroj, la alia plu sekvas je la siaj, sur la kampo de spiriteco.

2^a Ĉar la spirita elemento estas ia aktiva stato en la naturo, tial la fenomenoj ligitaj al ĝi submetiĝas la ties leĝoj, kaj tial estas mem tiel naturaj kiel tiuj, kiuj devenas de la neŭtrala materio.

Iuj fenomenoj estas rigardataj kiel *supernaturaj* nur pro nescio pri la leĝo, kiu ilin regas. Sekve de tiu principo, Spiritismo ne akceptas la miraklecan karakteron, kiun oni atribuas al iuj faktoj, kvankam ĝi konstatas ilian realecon aŭ eblecon. Laŭ ĝi, ne ekzistas *mirakloj*, en la senco de nuligo de la naturaj leĝoj ; el tio sekvas, ke spiritistoj ne faras miraklojn kaj ke neĝusta estas la alnomo miraklofarantoj, kiun oni donas al ili.

Kono pri la leĝoj, kiuj regas la spiritan principon ligiĝas rekte al la demando pri pasinteco kaj estonteco de la homo. Ĉu lia vivo limiĝas al la nuna ekzistado ? Enveninte en ĉi tiun mondon, ĉu li eliras el nenio, kaj ĉu tien li revenas, kiam ĉi mondon li forlasas? Ĉu li jam vivis, kaj ĉu li vivos, ankoraŭ ? *Kiel li vivos, kaj en kiaj kondiĉoj ?* Unuvorte, de kie li venas kaj kien li iras ? Kial li staras sur la tero, kaj kial li ĉi tie suferas ? Tiaj estas la demandoj, kiujn ĉiu metas al si, ĉar tiuj estas por la tuta mondo nepre gravaj, kaj pri kiuj neniu doktrino liveris ankoraŭ racian solvon. Tiu, kiun Spiritismo proponas, apoge sur faktoj, kontentigas la postulojn de logiko kaj de plej rigora justo, kaj estas unu el la precipaj kaŭzoj de la rapideco de ties disvastigado.

Spiritismo estas nek persona koncepto, nek rezulto el antaŭkonceptita sistemo. Ĝi estas rezulto el miloj da observoj faritaj sur ĉiuj punktoj de la terglobo, kaj kiuj konverĝis al la centro, kiu ilin kunligis kaj kunordigis. Ĉiuj ĝiaj konsistigaj principoj, senescepte, venas de eksperimentado. Eksperimentado ĉiam antaŭis teorion.

Ek de la komenco Spiritismo ĉie radikis; la historio ne montras alian ekzemplon de filozofia aŭ religia doktrino, kiu post dek jaroj kunvenigis tiom grandan kvanton da adeptoj ; kaj tamen ĝi ne utiligis por fariĝi konata iun ajn el la rimedoj ordinaraj uzataj ; ĝi disvastiĝis per si mem, per la simpatioj, kiujn ĝi renkontis.

Fakto ne malpli konstanta estas tiu, ke en neniu lando la doktrino naskiĝis ĉe malaltaj klasoj de la socio ; ĉie ĝi disvastiĝis de supre malsupren je la socia skalo ; ĉe kleraj klasoj ĝi ankoraŭ estas preskaŭ ekskluzive disvastiĝinta, kaj malkleraj homoj estas tie tre malmultenombraj.

Oni krome konfirmis, ke la disvastiĝado de Spiritismo, de sia origino, sekvis konstante supreniran marŝadon, malgraŭ ĉio, kion oni faris por ĝin embarasi kaj por misformi ĝian karakteron, cele al ĝia miskreditiĝo ĉe la publika opinio. Oni eĉ rimarkigu, ke ĉio farita por tiu celo favoris ĝian disvastiĝadon ; la bruado, kiun oni faris siatempe kondukis ĝin al la ekkono de homoj, kiuj ĝis tiam neniam aŭdis pri ĝi ; ju pli oni maku- lis aŭ ridindigis ĝin, ju pli fortaj estis la misdiraĵoj, des pli oni incitis la scivolemon ; kaj ĉar ĝi nenion perdas pro ekzamenado, tio rezultigis, ke kontraŭuloj fariĝis, malgraŭvole, ardaĵoj propagandistoj ; se la kritikaĉoj ne venigis al ĝi ian malgajnon, tio rezultas el la fakto, ke ĝin studante ĉe vera fonto, oni trovas ion tute alian ol menciite.

Unua parto

Dum la bataloj, kiujn ĝi bezonis tenadi, senpartiaj homoj ekrimarkis ĝian moderecon ; ĝi neniam faris kontraŭfrapojn al siaj kontraŭuloj, nek respondis ofendon per ofendo.

Spiritismo estas filozofia doktrino, kiu havas religiajn konsekvencojn, kiel ĉia spiritualisma filozofio ; pro tio, ĝi nepre tuŝas la fundamentajn bazojn de ĉiuj religioj : Dio, animo kaj la estonta vivo ; sed ĝi ne estas entute ia strukturita religio, se oni konsideras, ke ĝi havas nek kulton, nek riton, nek templon, kaj ke inter ĝiaj adeptoj, neniu prenis aŭ ricevis la titolon de pastro aŭ de grandsacerdoto. Tiaj diraĵoj estas pura invento de kritikistoj.

Oni estas spiritisto nur pro simpatio pri la principoj de la doktrino, kaj por al ĝi konformigi sian konduton. Tio estas opinio kiel ĉiu ajn alia, al kiu ĉiu homo rajtas aliĝi, same kiel oni rajtas esti judo, katoliko, protestanto, furieristo, sansimonisto, volteristo, karteziانو, diisto kaj eĉ materiisto.

Spiritismo proklamas liberecon de konscienco kiel naturan rajton ; ĝi postulas tion por siaj adeptoj, same kiel por ĉiuj homoj. Ĝi respektas ĉiajn sincerajn kredojn kaj petas por si la samon reciproke.

De la libereco de konscienco venas la rajto je *libera ekzamenado* koncerne fidon. Spiritismo kontraŭbatalas la principon de blinda fido, kiu devigas homon rezigni sian propran juĝadon; ĝi diras, ke ĉia devigita fido estas senfundamenta. Pro tio ĝi aldonas al siaj maksimumoj : *Ne ekzistas nerompebla fido krom tiu, kiu povas alfronti racion vizaĝo kontraŭ vizaĝo, en ĉiuj epokoj de la homaro.*

Konsekvence laŭ siaj principoj, Spiritismo trudiĝas al neniu ajn ; ĝi deziras esti akceptata libere kaj pro konvinkiĝo. Ĝi montras siajn doktrinojn kaj akceptas tiujn, kiuj libervole venas al ĝi.

Ĝi ne emas deturni iun ajn for de liaj religiaj kredoj ; ĝi ne celas tiujn, kiuj havas fidon kaj al kiuj tiu fido sufiĉas, sed ja tiujn, kiuj, ne kontentaj pri tio, kion oni donas al ili, petas ion pli bonan.

Dua Parto





Ekstraktoj, *in extenso*, el la libro de *Antaŭvidoj* *koncernantaj Spiritismon*

Manuskripto verkita kun speciala zorgemo de Allan Kardec el kiu neniun ĉapitron oni publikigis ĝis nun.

Mia unua iniciĝo en spiritismon

En 1854 mi unuafoje aŭdis pri turniĝantaj tabloj. Unu tagon, mi renkontis S-ron Fortier, la magnetizisto, kiun mi konis de longe ; li diris al mi : Ĉu vi scias pri tiu stranga propreco, kiun oni ĵus eltrovis en magnetismo ? Ŝajnas, ke oni magnetizas ne nur homojn, sed tablojn, kiujn oni laŭvole turnas kaj irigas. – «Tio estas efektive tre stranga, mi respondis ; sed en strikta senco tio ne ŝajnas al mi tute malebla. La magneta fluidaĵo, kiu estas iaspeca elektro, tute bone povas agi sur inertajn korpojn kaj movi ilin. » Raportoj publikigitaj de ĵurnaloj pri eksperimentoj faritaj en Nantes, en Marseille kaj en kelkaj aliaj urboj ne povus lasi dubon pri la realeco de la fenomeno.

Post iom da tempo, mi revidis S-ron Fortier, kaj li diris al mi : «Jen estas io multe pli eksterordinara ; ne nur oni turnas tablon per magnetizado, sed oni paroligas ĝin ; oni demandas kaj ĝi respondas.- Ĉi tio, mi respondis, estas alia afero ; mi kredos tion nur, kiam mi ĝin vidos, kaj kiam oni pruvos al mi, ke tablo havas cerbon por pensi, nervojn por senti kaj ke ĝi povas fariĝi somnambulo ; ĝis tiam, permesu, ke mi vidu en tio nur fabelon. »

Ĉi tiu rezonado estis logika ; mi konceptis la eblecon de movado fare de mekanika forto, sed nesciante la kaŭzon kaj la leĝon de la fenomeno, ŝajnis al mi absurde atribui inteligentecon al io pure materia. Mi staris en la pozicio de la nuntempaj nekredantoj, kiuj neas ion, ĉar ili vidas fakton, kiun ili ne komprenas. Antaŭ 50 jaroj, se oni nur dirus al iu ajn, ke oni povas transsendi telegrafan depeŝon 500 mejlojn for kaj ricevi la respondon post unu horo, oni ricevus ridegon returne, kaj ne mankus bonegaj sciencaj kaŭzoj por pruvi, ke tio estas materie neebla. Same okazas koncerne ĉiajn spiritajn fenomenojn ; al ĉiu homo, kiu ne konas la leĝon, kiu ilin regas, ili ŝajnas supernaturaj, mirindaj kaj sekve neeblaj kaj ridindaj ; kiam oni ekkonas la leĝon, la mirindaĵoj malaperas ; la afero jam havas nenion, kio kontraŭas la racion, ĉar oni komprenas ties eblecon.

Mi do staris antaŭ neklarigita fakto, ŝajne kontraŭa al la leĝoj de naturo, kaj kiun mia racio forpuŝis. Mi ankoraŭ ne vidis kaj ne observis ĝin ; la eksperimentoj, farataj en la ĉeesto de honorindaj, fidindaj homoj, konfirmis al mi la eblecon de ia rezulto pure materia, sed la ideo pri *parolanta* tablo tiam ankoraŭ ne eniris al mi en la cerbon.

La sekvintan jaron, nome komence de 1855, mi renkontis S-ron Carlotti, kun kiu mi amikis jam de 25 jaroj. Li babilis kun mi pri tiaj fenomenoj dum ĉirkaŭ unu horo, kun la entuziasmo, kiun li havis fronte al ĉiaj novaj ideoj. S-ro Carlotti estis ardkaraktura, energia korsikano ; mi ĉiam aprezis ĉe li la kvalitojn, kiuj distingas grandan, belan animon, sed mi malfidis pri lia ekzaltiĝo. Unue li parolis al mi pri la interveno de Spiritoj, kaj raportis al mi tiom da mirigaj aferoj, ke ili ne nur tute ne konvinkis min, sed eĉ pligrandigis miajn dubojn. Unu tagon vi estos unu el la niaj, li diris al mi. Mi ne diras, ke ne, mi respondis, ni tion vidos poste.

Post tempopaso, ĉirkaŭ la monato majo 1855, mi troviĝis ĉe la somnambulino S-ino Roger, kune kun S-ro Fortier, ŝia magnetizanto ; mi renkontis tie S-ron Pâtier kaj S-inon Plainemaison, kiuj parolis al mi pri tiuj fenomenoj samsence kiel S-ro Carlotti, sed per tute alia tono. S-ro Pâtier estis iom aĝa, tre klera, severkaraktura, malvarma kaj trankvila ŝtato-ficisto ; lia serioza parolmaniero, sen ia entuziasmo, faris al mi vivecan impreson, kaj kiam li proponis al mi ĉeesti eksperimentojn, kiuj okazas ĉe S-ino Plainemaison, Strato Grange-Batelière, n-ro 18, mi tuj akceptis. La rendezuo estis difinita por mardo,²⁰ sed je la 8-a vespere.

²⁰ La dato ne estis skribita en la manuskripto.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Tie, je la unua fojo, mi ĉeestis la fenomenon de la tabloj turniĝantaj, saltantaj kaj kurantaj, kaj en tiaj kondiĉoj, ke ne eblis dubo. Mi vidis tie ankaŭ iujn tre malperfektajn provojn pri mediuma skribo sur ardezo, kun la helpo de korbeto. Miaj ideoj tute ne estis senŝancelaj, sed tie troviĝis fakto, kiu devus havi kaŭzon. Mi duonvidis sub tiaj ŝajnaj frivolaĵoj kaj speco de ludo, kiun oni faris el tiaj fenomenoj, ion seriozan kaj elmontrantan ian novan leĝon, en kiun mi promesis al mi mem enprofundiĝi.

Tuj aperis la okazo observi pli atente, ol mi iam faris ĝis tiam. Ĉe unu el la vesperoj ĉe S-ino Plainemaison, mi ekkonis la familion Baudin, kiu loĝis ĉe strato Rochechouart. S-ro Boudin al mi proponis ĉeesti la semajnajn seancojn, kiuj okazis ĉe li, kaj al kiuj mi de tiam fariĝis tre asidua.

Tiuj kunsidoj estis tre multenombre frekventataj ; krom la kutimaj ĉeestantoj, oni senprobleme tien enlasis iun ajn, kiu tion petis. La du mediumoj estis F-inoj Baudin, kiuj skribis sur ardezon kun helpo de korbeto, nomata *turbo*, priskribita en la *Libro de Mediumoj*. Tia maniero, kiu postulas la partoprenon de du homoj, forigas ĉian eblecon, ke la ideoj de la mediumo intervenu. Tie mi vidis sinsekvajn komunikojn kaj respondojn faritajn al proponitaj demandoj, foje eĉ al mense faritaj demandoj, kio evidentigis intervenon de fremda inteligento.

La pritraktitaj temoj estis ĝenerale frivolaj ; oni okupiĝadis precipe pri ĉiaj aferoj, kiuj koncernis la materian vivon, la estontecon, unuvorte, pri nenio vere serioza ; scivolemo kaj amuziĝo estis la ĉefa motivo de la ĉeestantoj. La Spirito, kiu manifestiĝis kutime prenis la nomon *Zefiro*, nomo perfekte kongrua kun lia karaktero kaj kun tiu de la kunsido ; tamen, li estis tre bona kaj asertis, ke li estas protektanto de la familio ; kvankam li havis ĉiam parolon por ridado, li laŭbezzone scipovis doni saĝajn konsilojn kaj oportune konstrui pikantan, spritan epigramon. Ni baldaŭ interkonatiĝis, kaj li ofte donis al mi pruvojn de granda simpatio. Li ne estis tre progresinta Spirito, sed poste, apoge de superaj Spiritoj, li helpis min ĉe miaj unuaj laboroj. Poste li diris, ke li devas reenkarniĝi, kaj mi ne plu aŭdis pri li.

En tiuj kunvenoj mi faris miajn unuajn seriozajn studojn pri spiritismo, malpli ankoraŭ per revelacioj ol per observado. Mi aplikadis al tiu nova scienco, same kiel mi faris ĝis tiam, la eksperimentan metodon ; mi neniam baziĝis sur antaŭjuĝaj teorioj ; mi atente observadis, mi komparadis, mi deduktadis konsekvencojn ; de la rezultoj mi penadis atingi la kaŭzojn, per deduktado kaj logika ĉeno de la faktoj, ne akceptante eksplikon kiel validan, se ĝi ne povis solvi ĉiajn malfacilaĵojn de la afero.

Tiel mi ĉiam agis en miaj antaŭaj laboroj, ekde la aĝo 25-, 26-jara. Mi plene komprenis la gravecon de la esplorado, kiun mi tiam entreprenis ; mi duonvidis en tiaj fenomenoj la ŝlosilon de la tiel obskura, tiel polemika problemo de la pasinteco kaj estonteco de la homaro, la solvon de tio, kion mi serĉadis dum mia tuta vivo ; ĝi estis, unuvorte, tuta revolucio en la ideoj kaj en la kredoj ; necesis do agi serioze, ne supraĵe ; esti pozitiva, ne idealisma, por eviti la vojon al iluzioj.

Unu el la unuaj rezultoj de miaj observoj estis, ke la Spiritoj estas neniuaj aliaj ol la animoj de homoj, kaj do havas nek la superan saĝecon, nek la superan scion ; ke ilia scio estas limigita al la grado de ilia progreso kaj ke ilia opinio havas nur la valoron de persona opinio. Tiu veraĵo, ekkonita de la komenco, min defendis de la grava falilo kredi pri ilia neeraremo, kaj evitigis, ke mi formulu antaŭtempajn teoriojn surbaze de asertoj de unu sola aŭ de kelkaj.

La simpla fakto, ke oni komunikiĝas kun Spiritoj, kion ajn ili dirus, pruvis la ekziston de la nevidebla medio ; tio estis jam grava punkto, grandega kampo malfermita al niaj esploroj, ŝlosilo al amaso da neklarigitaj fenomenoj ; la dua punkto, ne malpli grava, estis la kono de la stato de tiu mondo, ĝiaj moroj, se tiel oni povas diri ; mi tuj vidis, ke ĉiu Spirito, pro sia persona pozicio kaj siaj konoj, senvualigis al mi unu aspekton, tute same, kiel oni ekkonas la staton de iu lando, pridemandante la loĝantojn de ĉiaj klasoj kaj de ĉiaj kondiĉoj, tiel ke ĉiu povas instrui al ni ion, dum ĉiu, individue, ne povus instrui ĉion ; koncernas la observanton formi la tutaĵon helpe de dokumentoj prenitaj de malsamaj flankoj, kolektitaj, kunordigitaj kaj kontrolitaj, unuj rilate la aliajn. Mi do agis kun la Spiritoj kiel mi agis antaŭe kun la homoj ; ili estis por mi, de la plej eta ĝis la plej granda, rimedoj por instruigo kaj ne *antaŭdestinitaj revelaciantoj*.

Tiaj estas la sintenoj, kun kiuj mi entreprenis kaj ĉiam aliris miajn spiritismajn studojn ; observi, kompari kaj juĝi, jen la konstanta regulo, kiun mi sekvis.

Ĝis tiam la seancoj ĉe S-ro Baudin ne havis ian difinitan celon; tie mi provis obteni la solvon de la problemoj kiuj min interesis, el la vidpunkto de la filozofio, de la psikologio kaj de la naturo de la nevidebla mondo; mi alvenis al ĉiu seanco kun serio da demandoj preparitaj kaj metode aranĝitaj, kiuj estis ĉiam responditaj kun precizeco, profundeco kaj per logika maniero. Ekde tiam la kunsidoj prenis tute alian karakteron ; inter la ĉeestantoj troviĝis seriozaj homoj, kiuj akiris vivan intereson pri la afero, kaj se okaze mi forestis ili fariĝis seniniciataj ; la banalaj demandoj

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

perdis sian allogon por la pli multaj. Komence mi nur celis mian propran instruigon ; poste, kiam mi vidis, ke tio formis tutajn kaj prenis proporciojn de ia doktrino, mi ekhavis la penson publikigi ilin por instruigo de la mondo. Tiuj estas la samaj demandoj, kiuj sinsekve elvolviĝintaj kaj kompletigitaj, fariĝis la bazo de la *Libro de la Spiritoj*.

La sekvan jaron, en 1856, mi samtempe frekventis la spiritismajn kunsidojn, kiuj okazis en strato Tiquetone, ĉe S-ro Roustan kaj F-ino Japhet, somnambulino. Tiuj kunsidoj estis seriozaj kaj tenataj en ordo. La komunikoj okazis per F-ino Japhet, mediumino, helpe de korbeto.

Mia laboro estis grandparte finita, kaj prenis la proporciojn de libro, sed mi nepre volis submeti ĝin al la kontrolado de aliaj Spiritoj, helpe de aliaj mediumoj. Mi ekhavis la penson fari ĝin objekto de studoj en la kunsidoj ĉe S-ro Roustan ; fine de kelkaj seancoj, la Spiritoj diris, ke ili preferas ĝin revizii en intima medio, kaj ili fiksas por tiu celo iujn tagojn por privata laboro kun F-ino Japhet, por fari ĝin pli trankvile, kaj ankaŭ por eviti maldiskretaĵojn kaj antaŭtempajn komentojn flanke de la publiko.

Mi ne kontentiĝis per tiu kontrolado ; la Spiritoj tion rekomendis al mi. La cirkonstancoj rilatigis min kun aliaj mediumoj, kaj ĉiufoje kiam prezentiĝis okazo, mi ĝin profitis por proponi kelkajn demandojn, kiuj ŝajnis al mi dornaj. Tiel, pli ol dek mediumoj proponis al mi sian helpon por tiu laboro. De komparado kaj kunligado de ĉiuj respondoj kunordigitaj, klasigitaj kaj multfoje rearanĝitaj en la silento de meditado, mi formis la unuan eldonon de la *Libro de la Spiritoj*, kiu aperis je la 18-a de aprilo 1857.

Ĉirkaŭ la fino de tiu sama jaro, ambaŭ fraŭlinoj Baudin edziniĝis ; la kunsidoj ĉesis kaj la familio disiĝis. Sed tiam miaj rilatoj komencis plivastiĝi, kaj la Spiritoj multobligis al mi la instrurimedojn, por miaj postaj laboroj.

La 11-an de decembro 1855
(Ĉe S-ro Baudin, Mediumo S-rino Baudin.)
Mia protektanta Spirito

Demando al Spirito Z. - En la mondo de la Spiritoj, ĉu ekzistas unu, kiu estas por mi ia bona genio ?

Respondo. Jes.

Demando. Ĉu tiu estas Spirito de parenco aŭ de amiko ?

Respondo. Nek unu, nek alia.

Demando. Kiu li estis sur la tero ?

Respondo. Justa, saĝa homo.

Demando. Kion mi devas fari por fariĝi akceptema al lia bonvolemo ?

Respondo. Laŭeble plej multe da bono.

Demando. Per kiaj signoj mi povus rekoni lian intervenon ?

Respondo. Per la kontentiĝo, kiun vi spertos.

Demando. Ĉu ekzistas maniero alvoki lin ? kiel ?

Respondo. – Havi ardantan fidon kaj lin insiste alvoki.

Demando. Post mia morto, ĉu mi rekonos lin en la mondo de la Spiritoj ?

Respondo. Sendube ; estas li, kiu venos saluti vin, se vi bone plenumis vian taskon.

Noto. – Oni vidas, laŭ tiuj demandoj, ke mi estis ankoraŭ tre sensperta pri aferoj de la spirita mondo.

Demando. – Ĉu la Spirito de mia patrino venas foje viziti min ?

Respondo. Jes, kaj ŝi protektas vin tiel, kiel eblas al ŝi.

Demando. Ofte mi vidas ŝin en sonĝo ; ĉu tio estas rememoro aŭ rezulto el mia imagemo ?

Respondo. Ne ; estas ja ŝi, kiu aperas al vi, kaj vi devas kompreni tion laŭ la emocio, kiun vi spertas.

Noto. – Ĉi tio estas perfekte preciza ; kiam mia patrino aperis al mi en sonĝo, mi spertis nepriskribeblan emocion, kion la mediumo ne povus scii.

Demando. – Kiam, antaŭ iom da tempo, ni alvokis S..., kaj demandis lin, ĉu li povus estis la protektanta genio de unu el ni, li respondis : « Unu el vi montriĝu inda, kaj mi estos ĉe li : Z. tion diros al vi. » ĉu vi pensas, ke mi meritas tian favoron ?

Respondo. Se vi tion volas.

Demando. – Kion necesas fari por tio ?

Respondo. Fari la tutan bonon, kiun vi povos kaj elteni la suferojn de la vivo kuraĝe.

Demando. Ĉu mi kapablas, laŭ la naturo de mia inteligenteco, penetri, tiom, kiom eblas al homo tion fari, la grandajn veraĵojn pri nia estonta destino ?

Respondo. Jes, vi havas la necesan kapablon, sed la rezulto dependos de via persistemo je la laboro.

Demando. Ĉu mi povas kontribui por la disvastigado de tiaj veraĵoj ?

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Respondo. Sendube.

Demando. Per kiaj rimedoj ?

Respondo. Tion vi scios poste ; dume, laboru.

La 25-an de marto 1856.
(*Ĉe S-ro Baudin, Mediumo F-ino Baudin.*)
Mia spirita gvidanto

Tiutempe mi loĝis ĉe strato des Martyrs, n-ro 8, ĉe la 2-a etaĝo, ĉe la malantaŭa parto de la korto. Unu vesperon, dum mia laboro en mia kabineto, etaj ripetaj frapoj aŭdiĝis kontraŭ la murtabulo, kiu staris inter mi kaj la apuda ĉambro. Mi komence neniel atentis pri ĝi ; sed ĉar la frapoj persistadis kun pli da forto, je malsamaj lokoj, mi faris detalan esploron ambaŭflanke de la korto, mi aŭskultis, ĉu ĝi devenas de alia etaĝo, kaj mi trovis nenion. Aparte interesa estis, ke ĉiufoje, kiam mi faris esplorojn, la bruo ĉesis, kaj rekomenciĝis tuj kiam mi rekomencis la laboron. Mia edzino eniris ĉirkaŭ la deka horo ; ŝi venis en mian kabineton kaj, aŭdinte tiujn frapojn, demandis, kio ĝi estas. Mi ne scias, mi diris, jam de unu horo ĝi daŭras. Ni serĉadis kune, ankoraŭ sensukcese, kaj la bruo plu daŭris ĝis la noktomezo, kiam mi enlitiĝis.

La sekvan tagon okazis seanco ĉe S-ro Baudin, mi raportis la fakton kaj petis klarigon.

Demando. - Vi sendube aŭdis la okazaĵon, kiun mi ĵus menciis ; ĉu vi povus diri la kaŭzon de tiuj frapoj, kiuj aŭdiĝis kun tia persisto ?

Respondo. Ĝi estis via familia Spirito.

Demando. Kiucele li venis frapi tiel ?

Respondo. Li volis komunikiĝi kun vi.

Demando. Ĉu vi povus diri, kiu li estas, kaj kion li deziras de mi ?

- *Respondo.* Vi povas lin mem demandi, ĉar li estas ĉi tie.

Noto. - Tiutempe oni ne distingis inter la diversaj kategorioj de simpatiaj Spiritoj ; oni ĉiujn inkluzivis per la ĝenerala nomo familiaj Spiritoj.

Demando. - Mia familia Spirito, kiu ajn vi estas, mi dankas, ke vi venis viziti min ; ĉu vi bonvolus diri al mi, kiu vi estas ?

Respondo. Por vi, mi nomiĝos *Vero* , kaj ĉiumonate, ĉi tie, dum horkvarono, mi estos je via dispono.

Demando. - Hieraŭ, kiam vi frapis, dum mia laboro, ĉu vi havis ion apartan por diri al mi ? - *Respondo.* Kion mi havis por diri al vi, tio

estis pri la laboro, kiun vi tiam plenumis, nome malplaĉis al mi tio, kion vi tiam skribis, kaj mi volis haltigi vin.

Noto. Mi skribis precize pri studoj, kiujn mi faris pri la Spiritoj kaj iliaj manifestiĝoj.

Demando. – Ĉu via malaprobo koncernis la ĉapitron, kiun mi tiam skribis, aŭ la tuton de la verko ?

Respondo. La hieraŭan ĉapitron ; mi ĝin submetas al vi; relegu ĝin ĉi-vespere, vi rekonos viajn mankojn kaj vi korektos ilin.

Demando. Mi mem ne estis tre kontenta pri tiu ĉapitro kaj mi ĝin refaris hodiaŭ ; ĉu ĝi estas pli bona ?

Respondo. Pli bona, sed ankoraŭ ne sufiĉe. Legu de la 3-a ĝis la 30-a linio, kaj vi trovos gravan eraron.

Demando. Mi forŝiris tion, kion mi faris hieraŭ.

Respondo. Ne gravas ! Tiu forŝiro ne evitas, ke la manko persistu ; relegu, kaj vi vidos.

Demando. Ĉu la nomo *Vero*, kiun vi prenas, estas aludo al la vero, kiun mi serĉas ?

Respondo. Povas esti ; aŭ almenaŭ ĝi estas gvidilo, kiu vin protektos kaj helpos.

Demando. Ĉu mi povas vin alvoki ĉe mi ?

Respondo. Jes, por helpi vin per la penso ; sed koncerne la respondojn skribitajn ĉe vi, nur post longa tempo vi povos ricevi ilin.

Noto. – Efektive, dum proksimume unu jaro, mi ne povis ricevi ĉe mi ian skribitan komunikon, kaj ĉiufoje, kiam tie troviĝis medio, de kiu mi esperis ricevi ion, tamen ia neatendita cirkonstanco kontraŭis ĝin. Mi ne obtenis komunikojn krom eksterhejme.

Demando. – Ĉu vi povus veni pli ofte ol unufoje monate ?

Respondo. Jes, sed mi ne promesas pli ol unufoje monate ĝis nova ordono.

Demando. Ĉu vi animis ian konatan figuron sur la tero ?

Respondo. Mi diris, ke *por vi* mi estas *Vero* ; ĉi tiu *por vi* signifas diskretecon : nenion pli vi prie scios.

Noto. – Vespere, reveninte hejmen, mi rapidis relegi tion, kion mi skribis antaŭe, kaj same en la kopio ĵetita en la keston, kiel en la nova, je la 30-a linio, mi rekonis gravan eraron, pri kiu mi miris, ke mi faris ĝin. Post tiu momento, neniu tiaspeca manifestiĝo okazis ; ĉar la rilatoj kun mia protektanta Spirito establiĝis, tiaj manifestiĝoj jam ne estis necesaj, pro tio ili ĉesis. La intertempo de unu monato, kiun li fiksis por siaj komunikoj, estis plenumata nur

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

malofte : poste, ili entute ne okazis, tio estis averto, ke mi devas labori per mi mem, kaj ne aliri lin ĉiumomente, fronte al plej eta malfacilaĵo.

La 9-an de aprilo 1856 **(Ĉe S-ro Baudin, Mediumo F-ino Baudin.)**

Demando – (al Vero.) Vi kritikis la laboron, kiun mi faris, antaŭ kelkaj tagoj ; kaj vi pravis. Mi ĝin relegis, kaj rekonis je la 30-a linio eraron kontraŭ kiu viaj frapoj estis protesto. Tio kondukis min al rekono pri aliaj mankoj kaj mi refaris mian laboron. Ĉu vi estas kontenta nun ?

Respondo. – Mi trovas ĝin pli bona, sed mi konsilas vin atendi unu monaton antaŭ ol montri ĝin.

Demando. Kion vi komprenas pri « montri ĝin » ? Mi certe ne intencis publikigi ĝin ankoraŭ, se entute mi faros tion iam.

Respondo. Mi celas : montri ĝin al fremduloj. Trovu pretekston por rifuzi al tiuj, kiuj ĝin petos de vi ; de nun vi plibonigos tiun laboron. Mi faras al vi tiun rekomendon por eviti kritikon ; vian memamon mi gardas.

Demando. Vi diris al mi, ke vi estos por mi gvidanto, kiu min helpas kaj protektos ; mi komprenas tian protekton kaj ĝian celon je certa ordo de aferoj, sed ĉu vi bonvolus diri al mi, ĉu tia protektado etendiĝas ankaŭ al materiaj aferoj de la vivo ?

Respondo. Ĉi tie la materia vivo valoras multon ; ne helpi vin por la vivo estus ne ami vin.

Noto. – La protektado de tiu Spirito, kies superecon mi tiam tute ne supozis, efektive neniam mankis al mi. Lia bonvolemo, kaj tiu de la bonaj Spiritoj sub liaj ordonoj, etendiĝis sur ĉiajn cirkonstancojn de mia vivo, jen por glatigi al mi la materiajn malfacilaĵojn, jen por faciligi al mi la plenumadon de miaj laboroj, kaj fine ankaŭ por protekti min kontraŭ la rezultoj de malico de miaj kontraŭuloj, ĉiam reduktitaj al senpoveco. Se ne eblis eviti la embarasojn nature ligitajn al la misio, kiun mi devis plenumi, ilin tamen oni mildigis kaj grandparte kompensis per tre dolĉaj moralaj kontentigoj.

La 30-an de aprilo 1856 **(Ĉe S-ro Roustan, Mediumo F-ino Japhet.)** **Unua revelacio pri mia Misio.**

Mi frekventis de iom da tempo la seancojn, kiuj okazis ĉe S-ro Roustan, kie mi komencis la reviziadon de mia laboro, kiu devos poste

formi la Libron de la Spiritoj. En intima seanco, kiun ĉeestis nur sep aŭ ok personoj, oni babilis pri diversaj aferoj, koncernantaj la eventojn, kiuj povus konduki al socia transformo, kiam la mediumo, preninte la korbeton, spontane skribis ĉi tion :

« Kiam sonos la sonorilo, vi forlasos ĝin ; nur vi mildigos la suferojn de via proksimulo ; individue vi magnetizos lin por lin kuraci. Do, ĉiu staru preta ĉe sia loko, ĉar ĉiu estos bezonata, ĉar ĉio estos detruita, almenaŭ por momento. Ne plu ekzistos religio, kaj necesos unu sola, sed vera, granda, bela kaj inda je la Kreanto... La unuaj fundamentoj jam estas almetitaj... Tie, Rivail, estas via misio. (Libera, la korbeto vivece turniĝis al mi, kiel farus homo, kiu montrus min per la fingro.) Al vi, M..., la glavo, kiu ne vundas, sed mortigas ; kontraŭ ĉio, kio estas, vi venos la unua. Li, Rivail, venos la dua ; li estas la laboristo, kiu rekonstruas tion, kion oni malkonstruis. «

Noto. – Ĉi tiu estis la unua pozitiva revelacio pri mia misio, kaj mi konfesas, ke tuj kiam mi vidis, ke la korbeto turniĝas subite al mi kaj min nome indikas, mi ne povis eviti la emocion.

S-ro M... , kiu ĉeestis tiun kunsidon, estis junulo kun plej radikalaj opinioj, implikita en politikajn aferojn, kaj devigita ne meti sin tre multe en evidentecon. kredante al proksima politika renverso, li pretiĝis por partopreni kaj preparis reformoplanejn ; cetere, li estis homo dolĉa kaj sendanĝera.

La 7-an de majo 1856 (Ĉe S-ro Roustan, Mediumo F-ino Japhet.) Mia Misio

Demando. (al Hahnemann). Antaŭ kelkaj tagoj, la Spiritoj diris al mi, ke mi havas gravan mision por plenumi kaj indikis al mi la objekton ; mi deziras scii, ĉu vi konfirmas ĝin.

Respondo. – Jes, kaj se vi konsultas viajn dezirojn, viajn tendencojn, kaj la preskaŭ konstantan objekton de viaj meditoj, tio devas ne mirigi vin. Vi devas plenumi tion, pri kio vi revis de longe ; necesas, ke vi laboru aktive por esti preta, ĉar la tago estas pli proksima ol vi pensas.

Demando. Por plenumi tian mision, kiel mi ĝin konceptas, necesas rimedoj, kiuj estas ankoraŭ for de mi.

Respondo. – Lasu, ke la Providenco faru sian verkon, kaj vi estos kontenta.

Eventoj

Demando. - La komunikado farita antaŭ kelkaj tagoj ŝajnas supozigi tre gravajn eventojn : ĉu vi povas doni iujn klarigojn pri tiu temo ?

Respondo. - Ni ne povas precizigi la faktojn ; ni nur povas diri, ke okazos multe da ruinaĵoj kaj suferoj, ĉar la antaŭdiritaj tempoj por renovigo de la homaro alvenis.

Demando. - Kio kaŭzos tiajn ruinaĵojn ? Ĉu ĝi estos kataklismo ?

Respondo. - Ne okazos materia kataklismo, kiel vi ĝin komprenas, sed ĉiaspecaj plagoj suferigos la naciojn ; milito detruos popolojn ; ondoj de sango englutos kadukajn instituciojn. Necesas, ke la malnova mondo difalu, por malfermi novan eraon al progreso.

Demando. - Ĉu la milito ne limiĝos do al unu lando ?

Respondo. - Ne ; ĝi involvos la teron.

Demando. - Tamen nenio, ĉi-momente, ŝajnas aŭguri proksiman tempeston.

Respondo. - La aferoj kvazaŭ pendas per duonrompiĝinta aranea fadeno.

Demando. - Ĉu oni povus, sen maldiskretemo, demandi, el kie ekflagros la unua fajrero ?

Respondo. - El Italio.

La 12-an de majo 1856 (*Persona seanco ĉe S-ro Baudin.*)

Eventoj

Demando (al Vero). - Kion vi pensas pri S-ro M... ? Ĉu li estas homo, kiu influos la eventojn ?

Respondo. - Multe da bruoj. Li havas bonajn ideojn ; li estas agema homo, sed ne talenta.

Demando. - Ĉu oni prenu laŭlitere tion, kion oni diris, ke al li apartenas la tasko detrui tion, kio ekzistas ?

Respondo. - Ne, oni emis personigi je li la partion, kies ideojn li reprezentas.

Demando. - Ĉu mi starigu kun li intimajn rilatojn ?

Respondo. - Ankoraŭ ne ; vi senutile endanĝeriĝus.

Demando. - S-ro M..., kiu disponas pri medio, diras, ke oni precizigu al li la iradon de la eventoj, se tiel diri kun fiksita dato ; ĉu tio estas vera ?

Respondo. – Jes, oni anoncis al li fiksjajn epokojn, sed tio estas frivolaj Spiritoj, kiuj ne scias pli ol li kaj ekspluatas lian ekzaltiĝon. Vi scias, ke ni devas ne precizigi estontajn aferojn. La antaŭviditaj faktoj certe okazos en proksima tempo, kiun tamen oni ne povas precizigi.

Demando. – La Spiritoj diris, ke la tempoj alvenis, kiam tiuj aferoj devas plenumiĝi ; kian sencon oni atribuu al tiuj vortoj ?

Respondo. – Koncerne aferojn de ia graveco, kion signifas kelkaj jaroj aŭ monatoj ? Ili neniam alvenas subite kaj kiel flagro de fulmo, sed estas longe preparitaj per partaj okazaĵoj, kiuj estas iaspecaj antaŭaĵoj kaj kiel surdaj bruoj, kiuj venas antaŭ vulkana erupcio. Oni do povas diri al vi, ke la tempoj alvenis, sen la signifo, ke ĉio okazos morgaŭ. Tio signifas, ke vi estas en periodo, kiam ili okazos.

Demando. – Ĉu vi konfirmas, kion oni diris, ke ne okazos kataklismo ?

Respondo. – Certe, vi devas timi nek diluvon, nek bruladon de via planedo, nek aliajn similajn aferojn, ĉar oni ne povas nomi kataklismo lokajn skuojn, kiuj produktiĝis en ĉiuj epokoj. Okazos nur morala kataklismo, kies iloj estos la homoj.

La 10-an de junio 1856 **(Ĉe S-ro Roustan, Mediumo F-ino Japhet.)** **La Libro de la Spiritoj**

Demando (al Hahnemann). – Mi pensis, ke kiam ni finos la unuan parton de la libro, por iri pli rapide, mi povus peti de B... ke li helpu min kiel mediumo ; kion vi pensas ?

Respondo. – Mi pensas, ke estus pli bone, ke ne tiu servu vin. – Kial ? – Ĉar veron oni ne interpretu per mensogo.

Demando. – Se la familia spirito de B... estas mensogulo, tio ne malhelpus, ke bona Spirito komuniĝu per la mediumo, se oni ne alvokos la alian Spiriton.

Respondo. – Jes, sed ĉi tie la mediumo helpas la Spiriton, kaj ĉar la Spirito estas fripono, tial li konsentas. Aristo, lia interpretanto, kaj B... trafis malbonon.

Noto. – B... estis junulo, tre lerta skribiva mediumo, sed helpata de fieraj, despota kaj aroganta Spirito, kiu prenis la nomon Aristo kaj flatadis lian naturan memamon. La antaŭvido de Hahnemann realiĝis. Tiu junulo kredis, ke li trovis en sia kapablo ian fonton de riĉiĝo, jen per medicinaj konsultoj, jen per fruktodonaj inventoj kaj eltrovaĵoj, kaj rikoltis nur elreviĝojn kaj mistifikojn. Post iom da tempo, oni ne plu aŭdis ion pri li.

La 12-an de junio 1856
(Ĉe S-ro C..., Mediumo F-ino Aline C...)
Mia misio

Demando (al Vero). – Bona Spirito, mi dezirus scii, kion vi pensas pri la misio, kiun kelkaj Spiritoj asignis al mi : volu diri al mi, mi petas, ĉu tio estas provo rilate mian memamon. Sendube mi havas, vi tion scias, plej grandan deziron kontribui por la disvastigo de vero, sed de la rolo de simpla laboristo ĝis tiu de ĉefmisiulo, la distanco estas granda, kaj mi ne komprenas, kio povus pravigi en mi tian favoron, antaŭ tiom da aliaj homoj, kiuj posedas talentojn kaj bonkvalitojn, kiujn mi ne havas.

Respondo. – Mi konfirmas tion, kion oni al vi diris, sed mi vin admonas al multe da diskretemo, se vi volas sukcesi. Vi poste ekscios aferojn, kiuj klarigos al vi tion, kio hodiaŭ mirigas vin. Ne forgesu, ke vi povas sukcesi, same kiel fiaski ; en ĉi tiu lasta okazo, alia homo vin anstataŭos, ĉar la decidoj de Dio ne sidas sur la kapo de unu homo. Neniam parolu pri via misio ; tio estus maniero ĝin fiaskigi. Nur eblas ĝin pravigi per la plenumita faro, kaj vi ankoraŭ faris nenion. Se vi plenumos ĝin, la homoj scios rekoni ĝin pli aŭ malpli frue per si mem, ĉar per la fruktoj oni rekonas la kvaliton de arbo.

Demando. – Mi certe havas nenian deziron fanfaroni pri misio, kiun mi apenaŭ kredas. Se mi estas destinita servi kiel ilo por la deziroj de la Providenco, ĝi disponu pri mi ; tiuokaze, mi petas vian helpon kaj tiun de la bonaj Spiritoj por helpi kaj subteni min ĉe mia tasko.

Respondo. – Nia helpo ne mankos al vi, sed ĝi estus senutila, se viaflanke vi ne farus tion, kio necesas. Vi havas vian memdecidan povon ; koncernas vin uzi ĝin laŭ via bontrovo ; neniu homo estas nepre devigata fari ion.

Demando. – Kiuj kaŭzoj povus fari, ke mi fiasku ? Ĉu la nesufiĉeco de miaj kapabloj ?

Respondo. – Ne ; sed la misio de reformantoj estas plena je rifoj kaj danĝeroj ; la via estas kruda, mi vin avertas, ĉar temas pri la skuado kaj transformado de la tuta mondo. Ne pensu, ke sufiĉas al vi publikigi unu libron, du librojn, dek librojn kaj poste resti trankvile en via hejmo ; ne, vi devos elmeti vin mem al risko : vi starigos kontraŭ vi mem terurajn malamojn ; ĝismedolaj malamikoj komplotos por via fiasko ; vi estos celo por malico, por kalumnio, eĉ por perfido de tiuj, kiuj ŝajnos al vi

plej sindediĉaj ; viaj plej bonaj instrukcioj estos ignorataj kaj misformataj ; pli ol unufoje vi falos sub la pezo de laceco ; unuvorte, vi devos teni preskaŭ konstantan bataladon, krom la ofero de via ripozo, de via trankvileco, de via sano, kaj eĉ de via vivo, ĉar sen tio vi vivus pli longe. Nu, bone ! ofte oni retroiras, kiam anstataŭ sur flora vojo oni trovas sub siaj paŝoj nur herbaĉojn, akrajn ŝtonojn kaj serpentojn. Por tiaj misioj, ne sufiĉas inteligenteco. Necesas krome, por plaĉi al Dio, humileco, modesteco kaj grandanimeco, ĉar ĝi frakasas fierulojn, arogantulojn kaj ambiciulojn. Por batali kontraŭ la homoj, necesas kuraĝo, persistemo kaj neskuebla firmeco ; necesas ankaŭ prudento kaj takto por konvene konduki la aferojn oportune kaj ne kompromiti la sukceson per agoj aŭ paroloj malĝustatempaj ; necesas fine sindediĉo, abnegacio kaj preteco por ĉiaj oferoj.

Vi vidas, ke via misio submetiĝas al kondiĉoj, kiuj dependas de vi.
Spirito Vero

Mi. – Spirito Vero, mi dankas vin por viaj saĝaj konsiloj. Mi akceptas ĉion senrezerve kaj sen kaŝpenso.

Sinjoro ! Se vi degnis turni viajn okulojn sur min por plenumado de viaj decidoj, estu farata via volo ! Mia vivo estas en viaj manoj, disponu pri via servanto. Antaŭ ja granda tasko, mi rekonas mian malfortikecon ; mia bonvolemo ne mankos, sed eble miaj fortoj perfidos min. Kompensu mian nesufiĉecon ; donu al mi korpajn kaj moralajn fortojn, kiuj estos al mi necesaj. Subtenu min ĉe malfacilaj momentoj, kaj kun via helpo kaj la helpo de viaj ĉielaj senditoj, mi klopodos respondi al viaj decidoj.

Noto. – Mi skribas ĉi tiun noton je la 1-a de januaro 1867, dek jarojn kaj duonon post kiam ĉi tiu komuniko estis al mi donita, kaj mi konstatas, ke ĝi plenumiĝis je ĉiuj punktoj, ĉar mi spertis ĉiajn suferojn, kiujn oni al mi sciigis. Mi staris sub la celo de malamo de ĝismedolaj malamikoj, de fiakuzoj, de kalumnioj, de envio kaj de ĵaluzo ; fiajn atakojn oni publikigis kontraŭ mi ; miajn plej bonajn instrukciojn oni falsadis ; min perfidis tiuj, kiujn mi plej konfidis, min pagis per maldanko tiuj, kiujn mi servis. La Pariza Societo fariĝis sidejo de konstantaj intrigoj plektitaj de tiuj, kiuj tamen asertis, ke ili staras miaflanke, kaj kiuj antaŭ mi ŝajnis favoremon kaj malantaŭe min fifamigis. Ili diris, ke tiuj, kiuj aliĝas al mia partio estis salajrataj de mi per la mono, kiun mi rikoltis de spiritismo. Mi ne plu ĝuis ripozon ; pli ol unufoje mi kurbigis sub troa laborado, mia sano difektiĝis kaj mia vivo kompromitiĝis.

Tamen, danke al prokjektado kaj helpado de la bonaj Spiritoj, kiuj senĉese al mi donis evidentajn pruvojn pri sia preteco, mi estas feliĉa rekoni, ke mi neniam spertis unu solan momenton de falo, nek de senkuraĝiĝo, kaj ke mi konstante postkuris mian taskon kun la sama fervoro, sen zorgo pri la malicaĵoj, kies objekto mi estis. Ekde la komuniko de la Spirito Vero, mi devis atendi ĉion tion, kaj ĉio ja okazis.

Sed ankaŭ, flanke de la ĉagrenoj, kian kontentecon mi spertis, kiam mi vidis, ke la laboro tiel mirinde kreskas! Per kiom da dolĉaj kompensoj pagiĝis miaj ĉagrenoj! Kiom da benoj, kiom da atestoj pri reala simpatio mi rikoltis de tiuj multenombraj afliktitoj, kiujn la doktrino konsolis! Pri tia rezulto ne antaŭsciigis min la Spirito Vero, kiu certe intence montris al mi nur la malfacilaĵojn sur la vojo. Kia maldanko miaflanke, se mi plendus! Se mi dirus, ke ekzistas ia kompenso inter bono kaj malbono, mi ne starus ĉe vero, ĉar la bono, nome la moralaj kontentiĝoj, multe superas la malbonon. Kiam venis al mi elreviĝo, ia ajn ĉagreno, mi per la penso leviĝis super la homaro; mi lokis min anticipe ĉe la regiono de Spiritoj, kaj de tiu supra punkto, de kie mi ekvidis mian alvenpunkton, la mizeroj de la vivo glitadis super mi, ne atingante min. Mi faris el tio kutimon, tiel ke la krioj de maliculoj neniam embarasis min.

La 17-an de junio 1856
(Ĉe S-ro Baudin, Mediumo F-ino Baudin.)
La Libro de la Spiritoj

Demando (al Vero). – Parto de la verko estas reviziita, ĉu vi bonvolus diri al mi tion, kion vi pensas pri ĝi?

Respondo. – Kio estas reviziita, tio estas bona; sed kiam vi finos, necesos, ke vi ankoraŭ revidu ĝin, por plivastigi ĝin je iuj punktoj, kaj ĝin mallongigi je aliaj.

Demando. – Ĉu vi pensas, ke oni devas ĝin publikigi antaŭ ol la anoncitaj okazaĵoj plenumiĝis?

Respondo. – Unu parton, jes; sed ne la tuton; ĉar mi asertas al vi, ke ni havos tre dornajn ĉapitrojn. Kiu ajn estas la graveco de ĉi tiu unua verko, ĝi estas tamen nur enkonduko; ĝi prenos proporciojn, kiajn vi tute ne suspektas hodiaŭ, kaj vi komprenos per vi mem, ke iuj partoj ne povos publikigi tuj, sed nur longe poste kaj grade, laŭ tio, ke la novaj ideoj elvolviĝos kaj enradikiĝos. Liveri ĉion per unu fojo estus malprudente; necesas lasi tempon, por ke formiĝu opinio. Vi renkontos malpacienulojn, kiuj

puŝos vin antaŭen : ne aŭskultu ilin ; vidu, observu, sondu la grundon, sciu atendi, kaj faru kiel prudenta generalo, kiu atakas nur, kiam favora momento alvenis.

Noto (verkita en januaro 1867). – Kiam tiu komuniko estis donita, mi nur celis la publikigon de *La Libro de la Spiritoj*, kaj tute ne konjektis, kiel diris la Spirito, pri la proporcioj de la tuta laboro. La okazaĵoj antaŭsciigitaj devis plenumiĝi nur post multe da jaroj, kaj la pruvo estas, ke ili ĝis nun ne okazis. La verkoj aperintaj ĝis hodiaŭ publikiĝis sinsekve, kaj mi estis kondukita ilin fari, *laŭgrade kiel la novaj ideoj elvolviĝis*. El tiuj, kiuj restas farotaj, la plej grava, tiu, kiun oni povas konsideri kiel la kronon de la konstruaĵo, kaj efektive enhavas *la plej dornajn* ĉapitrojn, ne povus publikiĝi tuj, sen perdo, antaŭ la periodo de katastrofoj. Tiam mi vidis nur unu libron, kaj mi ne komprenis, ke ĝi povus esti dividita, dum la Spirito aludis pri tiuj, kiuj venos, kaj ke estos neoportuna antaŭtempa publikigo.

« Sciu atendi, diris la Spirito : ne aŭskultu senpacienculojn, kiuj puŝos vin antaŭen. » Senpacienculoj ne mankis, kaj se mi aŭskultus ilin, mi certe kondukus la ŝipon sur rifojn. Strange, dum unuj kriis, ke mi iru pli rapide, aliaj akuzis, ke mi ne lante iras. Mi aŭskultis nek unujn, nek aliajn, mi ĉiam prenis kiel kompason la iradon de la ideoj.

Kiela fido al la estonteco min plenigadis, laŭgrade kiel mi vidis plenumiĝi la antaŭdiritaj aferoj, kaj mi rekonadis la profundecon kaj saĝecon de la instrukcioj de miaj nevideblaj protektantoj.

La 11-an de septembro
(*Ĉe S-ro Baudin, Mediumo F-ino Baudin.*)
La Libro de la Spiritoj

Post legado de kelkaj ĉapitroj de *La Libro de la Spiritoj*, koncernantaj la moralajn leĝojn, la mediumo spontane skribis :

« Vi bone komprenis la celon de via laboro ; la plano estas bone konceptita ; ni estas kontentaj pri vi. Daŭrigu ; sed ĉefe, kiam la verko estos finita, memoru, ke ni rekomendis al vi, ke vi devas presigi kaj disvastigi ĝin : ĝi estas por ĝenerala utileco. Ni estas kontentaj kaj neniam forlasos vin. KREDU Dion kaj antaŭeniru. »

Pluraj Spiritoj

La 6-an de majo 1857
(*Ĉe S-ino de Cardone.*)
La spirita tiaro

Mi havis la okazon vidi, en seancoj ĉe S-ro Roustan, S-inon de Cardone. Iu diris al mi, kredeble S-ro Carlotti, ke ŝi havas rimarkindan talenton por manlegado. Mi neniam kredis pri la signifo de linioj de mano, sed mi ĉiam pensis, ke tio povas esti, ĉe iuj homoj dotitaj per iaspeca duobla vidado, rimedo por estigi ian rilaton, kiu al ili permesus, kiel ĉe somnambuloj, kelkfoje diri veraĵojn. La signoj de la manoj ĉikaze estas nenio alia ol preteksto, ia rimedo fiksi la atenton, disvolvi klarvidecon, simile kiel kartoj, kafa rekremento, tiel nomataj magiaj speguloj, por homoj havantaj tian kapablon. Eksperimentoj pli ol unufoje konfirmis al mi la verecon de tiu opinio. Iel ajn, tiu sinjorino instigis min iri vidi ŝin, mi akceptis ŝian inviton, kaj jen resumo de tio, kion ŝi diris al mi :

« Vi naskiĝis kun granda abundo da rimedoj kaj intelektaj povoj... eksterordinara juĝkapablo... Via gusto formiĝis ; regata de la kapo, vi moderigas inspiron per juĝado ; vi submetis instinkton, pasion, intuicion al metodo, al teorio. Vi ĉiam havis inklinon al la moralaj sciencoj... Amon al absoluta vero... Amon al difinita arto.

« Via stilo havas harmonion, mezuron, kadencon ; sed kelkfoje vi iom devojiĝas de precizeco al poezio.

« Kiel idealisma filozofo, vi submetiĝis al aliulaj opinioj ; kiel kredanta filozofo, vi nun spertas la bezonon fari sekton.

« Prudenta bonvolemo ; nepra bezono mildigi suferon, helpi, konsoli ; bezono de sendependeco.

« Vi tre malrapide korektiĝas de la subita impeto de via humoro.

« Vi estis eksterordinare taŭga por la misio, kiu estis al vi konfidita, ĉar via esteco estas pli konvena por fariĝi la centro de grandegaj okazaĵoj, ol por izolaj laboroj... viaj okuloj esprimas la rigardon de la penso.

« Mi vidas ĉi tie la signon de la *spirita tiaro*... ĝi estas forte akcentita... rigardu. » (Mi rigardis kaj vidis nenion apartan.)

Kion vi komprenigas, mi demandis al ŝi, per *spirita tiaro* ? Ĉu vi volas diri, ke mi estos papo ? Se tiel devus esti, certe ĝi ne okazus en ĉi tiu ekzistado.

Respondo. – « Rimarku, ke mi diris *spirita tiaro*, kio signifas *moralan, religian aŭtoritatecon*, kaj ne efektivan reĝecon. »

Mi raportis pure kaj simple la vortojn de tiu sinjorino, kiujn ŝi transskribis mem al mi ; ne koncernas min juĝi, ĉu ili estas en ĉiuj punktoj

precizaj ; mi rekonas, ke iuj el ili estas veraj, ĉar ili kongruas kun mia karaktero kaj kun la sintenoj de mia spirito ; sed estas unu peco evidente erara, tio estas, kie ŝi diras pri mia stilo, ke mi kelkfoje iom devojiĝas de mia precizeco al poezio. Mi tute ne havas poezian inklinon ; kion mi super ĉio serĉadas, kio al mi plaĉas, kion mi estimas ĉe aliaj homoj, tio estas klareco, neteco, precizeco, kaj tute male ol oferi ĉi tion kontraŭ poezio, oni povus riproĉi min, ke mi ofertas la poezian senton kontraŭ la sekeco de pozitiva formo. Mi ĉiam preferis tion, kio parolas al inteligento, ol tion, kio parolas al imagemo.

Koncerne la *spiritan tiaron*, La Libro de la Spiritoj estis tiam ĵus aperinta : la doktrino estis ĉe sia debuto, kaj oni ne povis ankoraŭ antaŭvidi ĝiajn postajn rezultojn ; mi apenaŭ donis gravecon al tia revelacio, kaj mi limiĝis al noto, por registro.

Tiu sinjorino foriris el Parizo la sekvan jaron, kaj mi revidis ŝin nur ok jarojn poste, en 1866 ; la aferoj sekvis sian vojon, dume. Ŝi diris al mi : Ĉu vi memoras mian antaŭdiron pri la *spirita tiaro* ? Jen ĝi realiĝis. – Kiel, realigita ? Laŭ mia scio, mi ne sidas sur la trono de Sankta Petro. – Ne, ankaŭ ne tion mi al vi antaŭsciigis. Sed ĉu vi efektive ne estas la estro de la doktrino, rekonata de la spiritistoj en la tuta mondo ? Ĉu ne viaj skribaĵoj estas tiuj, kiuj fariĝis leĝo ? Ĉu viaj anoj ne kalkuliĝas per milionoj ? Ĉu ekzistas homo, kies nomo havas pli da aŭtoritateco ol via, koncerne Spiritismon ? Ĉu oni ne spontane donis al vi la titolojn granda sacerdoto, pontifiko, eĉ papo ? Precipe fare de viaj kontraŭuloj, kaj ironie, mi scias, sed tia estas nepre indiko pri la influo, kiun ili rekonas ĉe vi : ili antaŭsentas vian rolon kaj tiuj titoloj restos ĉe vi.

Resume, vi konkeris, ne serĉinte ĝin, moralan pozicion, kiun neniu povas de vi forpreni, ĉar malgraŭ iaj laboroj, kiujn oni povus fari post vi aŭ konkure al vi, vi ne malpli estus la rekonata fondinto de la doktrino. En ĉi tiu momento, do, efektive vi posedas la *spiritan tiaron*, nome la moralan regadon. Vi vidas, ke mi ja pravas.

Ĉu vi nun iom pli kredas la signojn de la mano ? – Malpli ol iam ajn, kaj mi estas konvinkita, ke se vi vidis ion, tio ne kuŝis sur la mano, sed en via propra spirito, kaj mi tion pruvos al vi.

Mi akceptas, ke estas en la mano, kiel en la piedo, en la brako kaj aliaj korpopartoj, iuj fiziognomikaj signoj ; sed ĉiu organo prezentas specialajn signojn laŭ la uzado por kiu ĝi taŭgas kaj ĝiaj rilatoj al la penso ; la signoj en la mano ne povus esti la samaj kiel en la piedo, brako, buŝo, okuloj, k.s.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Koncerne la internajn sulkojn en la mano, ilia pli aŭ malpli granda akcento rilatas al la naturo de la haŭto, kaj al pli aŭ malpli abunda ĉela histo, kaj ĉar tiaj ecoj havas nenian fiziologian rilaton kun la organoj de la intelektaj kaj moralaj kvalitoj, ili ne povus esti ties esprimaĵo. Eĉ se oni akceptus tian rilaton, ili povus liveri indikojn pri la nuna stato de la individuo, sed ne povus estis signoj de antaŭvidaĵoj, nek de pasintaj okazaĵoj, sendependaj de la volo. Ĉe la unua ebleco, mi komprenus, teorie, ke helpe de tiaj liniaĵoj oni povus diri, ke iu persono havas tian aŭ ĉi tian kapablecon, tian aŭ ĉi tian emon, sed la plej banala prudento rifuzas la ideon, ke oni povus vidi tie, se ŝi estas edziniĝinta aŭ ne, kiomfoje, kaj kiom da infanoj ŝi havis, ĉu ŝi estas vidvino aŭ ne, kaj aliajn similajn aferojn, kiel pretendas la plej multaj mandivenistoj.

Inter la sulkoj en la mano, estas unu, konata de ĉiuj, kiu klare formas la literon M; se ĝi estas forte akcentita, oni diras, tio estas antaŭdiro pri malfeliĉa vivo ; sed la vorto *malheur* (malfeliĉo) estas franca, kaj oni forgesas, ke la ekvivalenta vorto en aliaj lingvoj ne komenciĝas per la sama litero : de kio sekvas, ke tiu sulko devus preni malsaman formon laŭ la lingvo de la popoloj.

Koncerne la *spiritan tiaron*, ĝi evidente estas io speciala, escepta, iel individua, kaj mi estas konvinkita, ke vi ne trovis tiun vorton en ia vortaro el traktaĵo pri kiromancio. Kiel do ĝi venis al vi en la penson ? Per intuicio, per inspiro, per tiu speco de antaŭscio ligita al via duobla vidado, kiun multaj homoj posedas senkonscie. Via atento koncentriĝis sur la linioj de la mano, vi ligis la ideon al signo, ĉe kiu alia homo vidus ion alian, aŭ al kiu vi donus signifon malsaman ĉe alia individuo.

La 17-an de januaro 1857
(Ĉe S-ro Baudin, Mediumo F-ino Baudin.)
Unua sciigo pri nova enkarniĝo

La Spirito promesis al mi skribi leteron okaze de la novjaro : li diris, ke li havas ion privatan por diri al mi. Ĉar mi pridemandis lin ĉe unu el la ordinaraj kunsidoj, tial li diris, ke li donos ĝin en intimeco, al la mediumo, kiu al mi transdonos ĝin. Jen la letero :

Kara amiko, mi ne volis skribi al vi lastan mardon, antaŭ ĉiuj, ĉar estas iuj aferoj, kiuj nur private povas esti diritaj.

Mi volis unue paroli al vi pri via verko, nome tiu, kiun vi presigis. (*La Libro de la Spiritoj* estis tiam presata.) Ne tiom penadu tagnokte ; vi fartos pli bone kaj la verko ne perdos pro atendo.

Laŭ tio, kion mi vidas, vi estas tre kapabla sukcesigi vian entreprenon kaj estas vokita fari grandajn aferojn ; sed ne troigu : vidu kaj konsideru ĉion prudente kaj senpasje; sed ne lasu vin delogi de tro rapidemaj homoj; kalkulu ĉiujn viajn paŝojn kaj agojn por sekure atingi la celon. Ne kredu pri tio, kion vi ne kontrolas : ne forturnu la kapon de tio, kio ŝajnas al vi nekomprenebla ; vi prie scios pli ol iu ajn, ĉar oni metos antaŭ viajn okulojn la objektojn de studado.

Sed ho ! la veron ankoraŭ ne konos nek kredos ĉiuj homoj dum tre longa tempo ! Vi vidos en ĉi tiu ekzistado nur la aŭroron de la sukceso de via verko ; necesas, ke vi revenu, *reenkarniĝinta en alia korpo*, por kompletigi tion, kion vi komencis, kaj tiam vi havos la feliĉon vidi, ke plene fruktodonas la semo, kiun vi disjetis sur la teron.

Vi havos enviulojn kaj ĵaluzulojn, kiuj klopodos misfamigi kaj kontraŭstari vin ; ne senkuraĝiĝu; ne malkvietiĝu pro tio, kion oni diras aŭ faros kontraŭ vi; daŭrigu vian verkon; laboru ĉiam por la progreso de la homaro, kaj vin subtenos la bonaj Spiritoj, dum vi persiste iros la bonan vojon.

Ĉu vi memoras, ke antaŭ unu jaro mi promesis mian amikecon al tiuj, kiuj, dum la jaro, havos tute korektan konduton ? Nu, bone ! mi sciigas, ke vi estas unu el tiuj, kiujn mi elektis, inter ĉiuj.

Via amiko, kiu vin amas kaj protektas, Z.

Noto. - Mi diris, ke Z. ne estas supera Spirito, sed tre bona kaj tre bonvolema. Eble li estis pli progresinta ol povis supozigi la nomon, kiun li prenis al si; oni povas supozii tion, se juĝi laŭ la serioza karaktero kaj la saĝeco de liaj komunikoj, laŭ la cirkonstancoj. Dank' al tiu nomo, li povis permesi al si mem ian familieran lingvaĵon, propran al la medio, kie li sin manifestis, kaj diri, kiel li ofte faris, severajn veraĵojn sub la leĝera formo de epigramo. Kiel ajn ĝi estas, mi ĉiam konservis de li bonan rememoron kaj rekonon pro la bonaj admonoj, kiujn li donis al mi, kaj la korligiĝon, kiun li montris al mi. Li malaperis ĉe la disiĝo de la familio Baudin, kaj diris, ke li devas baldaŭ reenkarniĝi.

La 15-an de novembro 1857
(Ĉe S-ro Dufaux, Mediumo S-rino E. Dufaux.)
La Spiritisma Revuo

Demando. - Mi intencas publikigi spiritisman gazeton, ĉu vi pensas, ke mi sukcesos tion fari, kaj konsilas al mi tion ? La homo, al kiu mi turniĝis, S-ro Tiedeman, ŝajne ne inklinas doni sian monhelpon.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Respondo. – Jes, vi sukcesos per persistemo. La ideo estas bona, necesas ĝin plu maturigi.

Demando. – Mi timas, ke aliaj venos antaŭ mi.

Respondo. – Necesas rapidi.

Demando. – Mi deziras nenion alian, sed mankas tempo. Mi havas du profesiajn laborojn, kiuj estas al mi necesaj, vi scias ; mi volus povi rezigni pri ili por dediĉi min ekskluzive al la afero, sen fremda zorgo.

Respondo. – Necesas nenion forlasi, ankoraŭ ; oni ĉiam trovas tempon por ĉio ; klopodu, kaj vi sukcesos.

Demando. – Ĉu mi devas agadi sen la helpo de S-ro Tiedeman ?

Respondo. – Agu kun aŭ sen lia helpo ; ne malkvietiĝu pro li : vi povas fari sen li.

Demando. – Mi intencis fari unuan numeron kiel provon, por prezenti la gazeton kaj datigi ĝin, kun la intenco daŭrigi ĝin poste, se necese ; kion vi pensas pri tio ?

Respondo. – La ideo estas bona, sed unua numero ne sufiĉos ; tamen ĝi estas utila kaj eĉ necesa por malfermi la vojon al la ceteraj. Necesos tion fari tre atenteme, por meti la bazojn por longdaŭra sukceso ; se ĝi estos malbonkvalita, pli bone fari nenion, ĉar la unua impresado povas decidi ĝian estontecon. Komence, necesas koncentriĝi je kontentigo de scivolemo ; ĝi devas kunigi seriozon kaj plaĉon ; la seriozon, kiu allogos sciencemulojn, kaj la plaĉon, kiu amuzos vulgarulojn ; ĉi tiu parto estas esence grava, sed la alia estas la pli grava, ĉar sen ĝi la gazeto ne havus solidan fundamenton. Unuvorte, necesas eviti monotonecon per vario, kunigi solidan instruadon al intereso, kaj ĝi estos por viaj postaj laboroj ia potenca helpo.

Noto. – Mi rapidis redakti la unuan numeron, kaj aperigis ĝin en la 1^a de januaro 1858, nenion dirinte al iu ajn. Mi ne havis eĉ unu solan abonanton, kaj neniun liveranton de monrimedoj. Mi do ĝin faris tute je mia risko kaj pri tio mi neniom pentis, ĉar la sukceso superis mian esperon. De la 1-a de januaro, la numeroj sekvis unu la alian seninterrompe, kaj kiel antaŭvidis la Spirito, tiu gazeto fariĝis al mi potenca helpo. Poste mi rekonis, ke estis por mi bonŝance, ke mi ne havis liveranton de monrimedoj, ĉar mi estis pli libera, dum fremdulo povus trudi siajn ideojn kaj sian volon kaj embarasi mian iradon ; sola, mi devis prezenti nenian kalkulon al iu ajn, kiel kiel ajn peza estis mia tasko.

La 1-an de aprilo 1858 Fondo de la Pariza Spiritisma Societo

Kvankam estas ĉi tie nenia okazo de antaŭvido, mi ĝin mencias, por memorteni ĝin, nome la fondon de la Societo, pro la rolo, kiun ĝi ludis ĉe la irado de spiritismo kaj de la postaj komunikoj, kiujn ĝi okazigis.

De proksimume ses monatoj, mi havis hejme, ĉe strato des Martyrs, kunsidon de kelkaj adeptoj, ĉiumarde. La ĉefa medio estis F-ino E. Dufaux. Kvankam la ejo ne povis akcepti pli ol 15 aŭ 20 homojn, foje troviĝis tie ĝis 30. Tiuj kunsidoj prezentis grandan intereson pro sia karaktero serioza kaj la alta nivelo de la demandoj tie traktitaj: oni vidis tie ofte eksterlandajn princojn kaj aliajn distingigajn figurojn.

La loko, malkomforta laŭ sia dispozicio, fariĝis evidente tro malgranda. Kelkaj el la kutimaj frekventantoj proponis kotizadon por lui iun pli konvenan. Sed tiam fariĝis necesa la obteno de laŭleĝa permeso por evitigi al si esti ĝenata de aŭtoritatoj.²¹ S-ro Dufaux, kiu persone konis la Policestron, okupiĝis pri la afero. La permeso dependis ankaŭ de la Ministro de Internlandaj Aferoj, kiu estis tiam generalo X.,²² kiu, sen nia scio, simpatiis al niaj ideoj, kvankam li ne tute konis ilin, kaj pro lia influo la permeso, kiu laŭ la ordinaraj procedoj postulus tri monatojn, povis esti obtenita post dek kvin tagoj.

La Societo estis do regule konstituita kaj kunsidis ĉiumarde, ĉe la ejo, luita ĉe Palais-Royal, galerio de Valois. Ĝi restis tie dum unu jaro, de la 1-a de aprilo 1858 ĝis la 1-a de aprilo 1859. Ĉar ĝi ne povis tie plu resti, ĝi kunsidis ĉiuvendrede ĉe unu el la salonoj de la restoracio Donix, ĉe Palais-Royal, galerio Montpensier, de la 1-a de aprilo 1859 ĝis la 1-a de aprilo 1860, kiam ĝi instaligis en propra loko, ĉe strato kaj pasejo Sainte-Anne, 59.

Komence, la Societo konsistis el elementoj ne tre homogenaj kaj el bonvolemaj homoj, kiujn oni akceptis iom tro facile, kaj ĝi pasigis multajn suferojn, kiuj ne estis la malplej penigaj embarasoj de mia tasko.

²¹ Tiam Francujo troviĝis sub la regado de Napoleono III (1851 – 1870). Inter la restriktioj al libereco truditaj de la registaro estis la prohibo de kunvenoj kun pli ol dudek personoj en fermitaj lokoj, escepte en okazo de kontraŭa, formala rajtigo. – *Noto de Evandro Bezerra Noletto en sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

²² Temas pri la generalo Charles-Marie-Esprit Espinasse, Ministro pri Internlandaj Aferoj kaj Ĝenerala Sekureco de la imperia regado de Napoleono III. Vidu en la revuo Reformador [oficiala organo de la Brazila Spiritisma Federacio], eldono aprila de 2008, sur paĝoj 38 ĝis 41, la artikolon *Identeco rivelita post 150 jaroj.* – *Noto de Evandro Bezerra Noletto en sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

La 24-an de januaro 1860
(Ĉe S-ro Forbes, Mediumo S-ino Forbes.)
Daŭro de miaj laboroj

Laŭ mia takso, mi kalkulis, ke mi bezonas ankoraŭ dek jarojn por fini miajn laborojn, sed mi sciigis tiun penson al neniu. Mi do estis tre surprizita ricevi de unu el miaj korespondantoj en Limoges komunikon spontane ricevitan, per kiu la Spirito parolis pri miaj laboroj kaj diris, ke mi havos ankoraŭ dek jarojn, antaŭ ol ilin fini.

Demando (al Vero). – Kiel povas esti, ke Spirito, kiu komuniĝas en Limoges, kien mi neniam iris, diris ĝuste tion, kion mi pensis pri la daŭro de miaj laboroj ?

Respondo. – Ni scias tion, kio restas al vi farenda, kaj sekve la proksimuman tempon al vi necesan por ĝin elfini. Estas do tute nature, ke Spiritoj tion diris en Limoges kaj aliloke, por doni ideon pri la graveco de la afero pro la laboro, kiun ĝi postulas.

Tamen, la esprimo dek jaroj ne estas absoluta ; ĝi povas esti plilongigita je kelkaj jaroj pro neantaŭvideblaj cirkonstancoj sendependaj de via volo.

Noto. (skribita en decembro 1866) – Mi publikigis kvar volumojn pri bazaj temoj, krom akcesoraj aferoj. La Spiritoj instigas min publikigi la libron, La Genezo, en 1867, antaŭ la agitoj. Dum la periodo de granda perturbo, mi devos labori super la komplementaj libroj de la doktrino, kiuj ne povos aperi krom post la granda tempesto, kaj por kiuj necesas al mi ĉirkaŭ tri aŭ kvar jaroj. Tio kondukas nin, la plej frue, ĝis 1870, tio estas, je ĉirkaŭe dek jaroj.

La 28-an de januaro 1860
(Ĉe S-ro Solichon, Mediumo F-ino Solichon.)
Okazaĵoj. Papeco

Demando. – (al Spirito Ch.) Vi estis ambasadoro en Romo, kaj tiutempe vi antaŭvidis falon de la papa regado ; kion vi pensas nun pri tio ?

Respondo. – Mi pensas, ke alproksimiĝas la tempo, kiam mia profetaĵo plenumiĝos : sed tio ne okazos sen grandaj doloroj. Ĉio komplikiĝas ; pasioj varmiĝas kaj el afero, kiu povus okazi sen perturbo, oni faris en tia maniero, ke la tuta kristanaro ŝanceliĝos.

Demando. – Ĉu vi bonvolus diri al ni vian opinion pri la portempa povo de Papo ?

Respondo. – Mi pensas, ke portempa povo de Papo ne estas necesa por lia grandeco, nek por lia morala povo ; male, ju malpli da regatoj li havos, des pli respektata li estos. Kiu estas reprezentanto de Dio sur la Tero estas lokita sufiĉe alte por ne bezoni la elstarecon de surtera povo. Spirita gvidado de la tero, jen la misio de la patro de la kristanoj.

Demando. – Ĉu vi pensas, ke la Papo kaj la Sankta Kolegio, pli lumigitaj, ne farus la necesajn paŝojn por eviti skismon kaj internan militon, eĉ se nur moralan ?

Respondo. - Mi ne kredas tion ; ĉiuj tiuj homoj estas obstinaj, sensciaj, kutimiĝintaj al ĉiuj profanaj ĝuoj ; ili bezonas monon por ilin ĝui kaj timas, ke la nova ordo de aferoj ne lasos ilin gajni ĝin sufiĉe. Ili ankaŭ puŝas ĉion ĝis ekstrema grado, malmulte zorgante pri tio, kio rezultos, tro blindaj por kompreni la sekvojn de sia agmaniero.

Demando. – Ĉu ne timindas, ke en tiu konflikto la malfeliĉa Italio estos venkita kaj rekondukita sub la sceptron de Aŭstrujo ?

Respondo. – Ne, estas neeble ; Italujo venkos, kaj libereco aŭroros por tiu glora lando. Italujo savis nin de barbareco, estis nia majstro ĉe ĉio, kion inteligento havas plej nobla kaj alta. Ĝi tute ne refalos sub la jugon de tiuj, kiuj ĝin humiligis.

La 12-an de aprilo 1860
(Ĉe S-ro Dehau, Mediumo S-ro Crozet.)
(Spontana komuniko ricevita sen mia ĉeesto.)
Mia Misio

Per sia firmeco kaj persistemo, via Prezidanto malsukcesigis projektojn de tiuj, kiuj emis detruo lian fidindecon kaj ruinigi la societon, kun la espero mortige bati la doktrinon. Honoron al li ! ĉar li bone scias, ke ni staras apud li kaj ke la saĝaj Spiritoj estos feliĉaj povi lin helpi en lia misio. Kiom multaj volus plenumi la ombron de tia misio, pro tio, ke ili ricevus la ombron de la bonfaroj, kiuj el ĝi fontas !

Sed tiu misio estas danĝera, kaj por plenumi ĝin necesas fido kaj volo neskueblaj ; necesas ankaŭ abnegacio kaj kuraĝo por alfronti ofendojn, sarkasmojn, elreviĝojn, kaj ne ĉagreniĝi pro koto ĵetata de envio kaj de kalumnio. En tiu pozicio, oni minimume estas traktata kiel frenezulo aŭ ĉarlatano. Lasu, ke oni parolu, lasu, ke oni laŭvole pensu: ĉio mallonge daŭras, escepte de la eterna feliĉo. Ĉio estos kalkulata favore al vi, kaj bone konsideru tion, ke por esti feliĉa, necesas kontribui

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

por la feliĉo de la kompatindaj estuloj, per kiuj Dio loĝatigis vian teron. Via konscienco restu do trankvila kaj serena ; tio estas antaŭĝuo de ĉiela feliĉo.

La 15-an de aprilo 1860
(Marseille, Mediumo S-ro Georges Genouillat.)
(Komuniko transdonita de S-ro Brion Dorgeval.)
Estonteco de Spiritismo

Spiritismo estas vokata ludi grandegan rolon sur la tero ; ĝi reformos la leĝojn tiel ofte kontraŭajn al la diaj leĝoj ; ĝi korektos la erarojn de la historio ; ĝi restarigos la religion de Kristo transformita, per la manoj de pastroj, en komercon kaj finegocadon; ĝi starigos la veran religion, la naturan religion, tiun, kiu devenas de koro rekten al Dio, sen halto ĉe la randoj de sutano aŭ ĉe ŝtupoj de altaro. Ĝi forigos por ĉiam ateismon kaj materiismon, al kiuj iuj homoj puŝiĝis pro la senĉesaj misaĵoj, flanke de tiuj, kiuj sin prezentas kiel ministroj de Dio, predikas karitaton kun glavo en ĉiu mano kaj foroferas al sia ambicio kaj al la spirito de regado la plej sanktajn rajtojn de la homaro.

Spirito

La 10-an de junio 1860
(Ĉe mi, Mediumo S-ino Schmidt.)
Mia Reveno

Demando (al Vero). Mi ĵus ricevis leteron de Marseille, per kiu oni diras al mi, ke ĉe seminario en tiu urbo oni serioze okupiĝas pri studado de Spiritismo kaj de La Libro de la Spiritoj. Kion aŭguri el ĉi tio? Ĉu la klerikaro interesiĝas pri la afero ?

Respondo. – Vi ne dubu pri tio : ĝi ja forte interesiĝas pri la afero, ĉar ĝi antaŭvidas la sekvojn por si, kaj ĝiaj zorgoj estas grandaj. La klerikaro, precipe ĝia klera parto, studas Spiritismon pli ol vi supozas ; sed ne pensu, ke tio estas pro simpatio ; ĝi serĉadas per tio rimedojn por ĝin kontraŭbatali, kaj mi asertas al vi, ke ĝi faros krudan militon kontraŭ ĝi. Ne maltrankviliĝu ; plu agadu prudente kaj singarde ; gardu vin kontraŭ kaptiloj, kiujn oni metos kontraŭ vi ; zorge evitu en viaj paroloj kaj skriboj ĉion, kio povus liveri armilojn kontraŭ vi.

Sekvu vian vojon sentime, kaj se ĝi estas prisemita per dornoj, mi asertas al vi, ke vi havos grandajn ĝojojn antaŭ ol reveni « iom nelge » inter nin.

Demando. – Kion vi celas per tiuj vortoj « iom nelge »?

Respondo. – Vi ne restos longe inter ni ; ja necesas, ke vi revenu por fini vian mision, kion ne eblas atingi en ĉi tiu vivo. Se estus eble, vi entute ne venus, sed necesas submetiĝi al la natura leĝo. Vi forestos dum kelke da jaroj, kaj kiam vi revenos, tio estos en kondiĉoj, kiuj permesos al vi plej frue labori. Tamen, ekzistas aferoj, pri kiuj konvenas, ke vi finu ilin antaŭ ol vi foriros; pro tio ni lasos al vi la necesan tempon por ilin elfini.

Rimarkigo. – Proksimume kalkulante la daŭron de la laboroj, kiujn mi ankoraŭ devas fari, kaj konsiderante la tempon de mia foresto kaj la jarojn de infaneco kaj juneco, ĝis la aĝo, kiam homo povas ludi ian rolon en la mondo, mi nepre revenos en la fino de ĉi jarcento aŭ en la komenco de la alia.

La 21-an de septembro 1861

(*Ĉe mi, Mediumo S-ro d'A...*)

Aŭtodafeo de Barcelono. Konfisko de libroj

Pro peto de S-ro Lachâtre, nun loĝanta en Barcelono, mi ekspedis al li kvanton da ekzempleroj de *La Libro de la Spiritoj*, *La Libro de la Mediumoj*, kolektojn de *Spiritisma Revuo* kaj diversajn spiritismajn verkojn kaj broŝurojn, entute proksimume 300 volumojn. La ekspedon regule faris lia korespondanto en Parizo, en kesto, kiu enhavis aliajn varojn, kaj sen plej eta malobeo al la leĝo. Ĉe la alveno de la libroj, oni igis la ricevanton pagi la enirrajtojn, sed antaŭ ol liveri ilin, oni devis sin turni al la Episkopo, la Eklezia aŭtoritatulo havanta en tiu lando la polican librokontrolon. La Episkopo estis tiam en Madrido ; ĉe lia reveno, surbaze de raporto al li farita, li ordonis, ke la menciitaj verkoj estu konfiskitaj kaj publike bruligitaj fare de ekzekutisto. La ekzekuto de la kondamno estis difinita por la 9^a de oktobro 1861.

Se oni provus enporti tiujn verkojn kontrabande, tiam la hispana aŭtoritatulo rajtus disponi pri ili laŭ sia volo; sed ĉar estis nenia fraŭdo, nek surprizo, kion pruvis la spontane pagitaj rajtoj, estus plene juste ordoni reeksportadon, se ne konvenis ilin enlasi. Plendoj poste faritaj de la franca konsulo en Barcelono estis senrezultaj. S-ro Lachâtre demandis min, ĉu necesus submeti la aferon al supera aŭtoritatulo ; mi konsilis, ke oni lasu efektiviĝi tiun arbitran agon; tamen, mi pensis, ke mi devas konsulti mian spiritan gvidanton.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Demando (al Vero). – Vi certe scias tion, kio ĵus okazis en Barcelono, rilate spiritismajn verkojn ; ĉu vi bonvolas diri al mi, ĉu konvenas daŭrigi la klopodon por redono ?

Respondo. – Laŭrajte, vi povus reklamacie postuli tiujn verkojn kaj vi certe obtenus la redonon, se vi turnus vin al la Ministro de Eksterlandaj Aferoj de Francujo. Sed miaopinie rezultos el tiu aŭtodafeo multe pli granda bono, ol legado de kelkaj volumoj. La materia perdo estas nenio, kompare kun la reeĥo, kiun tia fakto donos al la doktrino. Vi komprenas, kiom persekuto tiel ridinda kaj tiel malprograsa povus progresigi Spiritismon en Hispanujo. La ideoj tie disvastiĝos multe pli rapide, kaj la verkojn oni serĉados multe pli avide ol kiel oni bruligis ilin. Ĉio iras bone.

Demando. – Ĉu konvenas fari pri tio artikolon por la proksima numero de la Revuo ?

Respondo. – Atendu la aŭtodafeon.

La 9-an de oktobro 1861 Aŭtodafeo de Barcelono

Tiu dato enskribiĝos en la analojn de Spiritismo pro la aŭtodafeo de la spiritismaj libroj en Barcelono. Jen ekstrakto el la protokolo de la ekzekuto :

« En ĉi tiu tago, la naŭa de oktobro mil okcent sesdek unu, je la deka horo kaj duono matene, en la esplanado de la urbo Barcelono, kie oni ekzekutas krimulojn kondamnitajn al mortpuno, kaj laŭ ordono de la Episkopo de ĉi urbo, estis bruligitaj tricent volumoj kaj broŝuroj pri Spiritismo, nome : *La Libro de la Spiritoj*, de Allan Kardec... k.t.p. »

La ĉefaj ĵurnaloj en Hispanujo detale raportis pri tiu fakto, kiun la organoj de la liberala gazetaro de tiu ĉi lando juste riproĉis. Estas rimarkinde, ke en Francujo la liberalaj ĵurnaloj limiĝis al mencioj sen komentoj. *Le Siècle* mem, kiu tiel arde publike denuncas povotroigojn kaj plej etajn mal-toleremajn agojn, skribis eĉ ne unu malaprobanta vorton pri tia ago inda je la Mezepoko. Iuj negravaj gazetoj eĉ trovis en la afero motivon por rikanado. Se oni flankenlasas kredon, ekzistis tiam afero de principo, de internacia rajto, kiu interesas ĉiujn, kiun oni ne preterpasus tiel facile, se temus pri aliaj verkoj. Ili ne laciĝas riproĉadi, kiam temas pri simpla rifuzo pri poŝtmarko por ekspedo de materiisma libro ; nu, kiam la Inkvizicio restarigas siajn brulŝtiparojn kun la malnova soleno, ĉe la pordo de Francujo, tio havas tute alian gravecon. Do kial tia indiferenteco ? Tial, ĉar temis pri doktrino, kies

progreson nekredemo rigardas kun timego ; postuli justecon je ĝia favoro estis konfirmi ĝian rajton al protekto de la aŭtoritato, kaj pligrandigi ĝian respektindecon. Kiel ajn tio estas, la aŭtodafeo de Barcelono ja estigis la atenditan efikon, pro la reeĥo en Hispanujo, kie ĝi potence helpis la disvastigadon de spiritismaj ideoj. (Vidu la *Spiritisman Revuon* de novembro 1861, p. 321)

Tiu okazaĵo rezultigis multenombrajn komunikojn flanke de la Spiritoj. La sekvanta estis spontane donita ĉe la Societo de Parizo, la 19-an de oktobro, okaze de mia reveno de Bordeaux.

« Necesis io, kio fortege batus certajn enkarniĝintajn Spiritojn, por ke ili decidiĝu sin okupi pri tiu granda doktrino, kiu devas regeneri la mondon. Nenio estas senutile farata tiucele sur via tero, kaj ni, kiuj inspiris la aŭtodafeon de Barcelono, bone sciis, ke tiel agante ni farus grandegan paŝon antaŭen. Tiu brutala ago, eksterordinara en la nuntempo, celis vekti la atenton de ĵurnalistoj, kiuj restis indiferentaj antaŭ la profunda agitado, kiu skuis la urbojn kaj la spiritismajn centrojn ; ili al ĉiuj lasadis paroli kaj agi; sed ili obstinis surdiĝi kaj mute reagi al la deziro pri disvastigo, flanke de la adeptoj de Spiritismo. Vole-nevole, ili nun devas paroli pri ĝi; unuj, konstatante la historian fakton en Barcelono, aliaj ĝin dementante, estigis polemikon, kiu ĉirkaŭiros la mondon kaj el kiu Spiritismo nepre profitos. Jen kial hodiaŭ, la ariergardo de la Inkvizicio faris sian lastan aŭtodafeon, ĝuste tiel, kiel ni deziris. »

Spirito

Noto. – Oni sendis al mi el Barcelono akvarelon, surloke faritan de eminenta artisto, prezentantan la scenon de la aŭtodafeo. Mi faris reduktitan fotografajon de ĝi. Mi ankaŭ posedas cindrojn prenitajn sur la brulaĵo, en kiuj troviĝas fragmentoj de ankoraŭ legeblaj bruligitaj folioj. Mi ilin konservis en kristala urno.^{23,24}

La 22-an de decembro 1861 (*Ĉe mi ; privata komuniko, Mediumo S-ro d'A...*) Mia sukcedulo

Ĉar konversacio kun la Spiritoj kondukis al parolado pri mia sukcedulo en la direktado de Spiritismo, tial mi formulis jenan demandon :

²³ La Spiritisma Librejo ankoraŭ ilin konservas.

²⁴ La menciita kristala urno estis detruita de la nazioj dum la Dua Mondmilito (1939 – 1945). – *Noto de Evandro Noleto Bezerra en sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazilia Spiritisma Federacio.*

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Demando. – Inter la adeptoj, multaj maltrankviliĝas pri tio, kio okazos al Spiritismo post mi, kaj ili sin demandas, kiu anstataŭos min post mia foriro, ĉar neniu oni vidas, kiu elstare montriĝus por preni ĝiajn kondukrimenojn.

Mi respondas, ke mi ne havas la pretendon esti nepre necesa; ke Dio estas treege saĝa por ne sidigi la estontecon de doktrino, kiu devas regeneri la mondon, sur la vivo de unu sola homo ; ke, cetere, oni ĉiam diris al mi, ke mia tasko estas konstitui la doktrinon kaj ke al mi estos donita sufiĉa tempo. La tasko de mia sukcedulo estos do pli facila, ĉar la vojo estos tute difinita, kaj sufiĉos al li sekvi ĝin. Tamen, se la Spiritoj trovas oportuna diri al mi ion pli pozitivan pri tio, mi estos al ili tre danka.

Respondo. – Ĉio tio estas tute vera ; jen kio al ni estas permesate krome diri al vi.

Vi pravus diri, ke vi ne estas nepre necesa: vi estas tia je la rigardo de la homoj, ĉar estis necese, ke la organiza laboro koncentriĝu en la manoj de unu sola, por ke ĝi estu unueca ; sed vi ne estas tia je la okuloj de Dio. Vi estas elektita, jen kial vi estas sola ; sed, kiel vi cetere scias, vi ne estas la sola kapabla plenumi tiun mision ; se ĝi estus interrompita pro ajna kaŭzo, al Dio ne mankus aliaj por vin anstataŭi. Do, kio ajn okazos, Spiritismo ne povas endanĝeriĝi.

Ĝis la atingo de la ellaboro, necesas, ke nur vi elstaru, ĉar necesis unu standardo, ĉirkaŭ kiu oni povus kungrupiĝi ; necesis, ke oni konsideru vin nepre bezonata, por ke la verko, kiu eliris el viaj manoj havu pli da aŭtoritateco nun kaj estontece ; eĉ necesis, ke oni timu la sekvojn de via foriro.

Se tiu, kiu devas vin anstataŭi estus anticipe indikita, la verko ankoraŭ ne elfinita povus sperti embarasojn; formiĝus kontraŭ li obstakloj pro ĵaluzo ; oni diskutadus pri li antaŭ ol li montrus siajn kapablojn; la malamikoj de la doktrino klopodus bari al li la vojon, kaj el tio rezultus skismoj kaj dividoj. Li do montriĝos kiam venos la difinita horo.

Sian taskon li faros pli facile, ĉar, kiel vi diris, la vojo estos tute difinita ; se li flankeniĝus, li perdiĝus mem, same kiel jam perdiĝis tiuj, kiuj volis embarasi ĝin ; sed ĝi estos alisence pli peniga, ĉar li devos tenadi pli krudajn batalojn. Al vi koncernas la ŝarĝo de la konceptado, al li la plenumado ; pro tio li devos esti homo energia kaj agema. Admiru do la saĝecon de Dio ĉe la elekto de siaj sendatoj : vi havas la kvalitojn necesajn por la laboro, kiun vi devas plenumi, sed vi ne havas tiujn necesajn al via sukcedulo; vi bezonas trankvilecon de verkisto, kiu kovas la ideojn en

la silento de meditado ; li bezonos la forton de kapitano, kiu komandas ŝipon laŭ la reguloj de scienco. Libera de la ŝarĝo de kreado de verko, sub kies pezo via korpo falos, li estos pli libera uzi ĉiujn siajn kapablojn por la elvolvado kaj solidigado de la konstruaĵo.

Demando – Ĉu vi povus al mi sciigi, ĉu la elekto de mia sukcedulo jam estas decidita?

Respondo – Ĝi estas kaj ne estas, se oni konsideras, ke la homo, havante sian liberan volon, povas lastmomente retroiri antaŭ la tasko, kiun li mem elektis. Ankaŭ necesas, ke li elmontru kapablecon, oferemon, neprofitemon kaj abnegacion. Se lin movus nur ambicio kaj la deziro elstari, li certe estus flanken metita.

Demando – Estas ofte dirite, ke pluraj superaj Spiritoj enkarniĝos por helpi la movadon.

Respondo – Sendube, multe da Spiritoj ricevos tiun mision, sed ĉiu agos, laŭ sia specialeco kaj laŭ sia pozicio, sur tia aŭ alia parto de la socio. Ĉiuj konatiĝos per siaj faroj, neniu per ajna pretendo al superregado.

Ségur, la 9an de Aŭgusto 1863 (Mediumo S-ro. d'A...) Imitado de l'Evangelio

Noto – Al neniu mi sciigis la temon de la libro, kiun mi tiam verkadis; ĝian titolon mi tenadis en tiela sekreto, ke la eldonisto, S-ro Didier, konis ĝin nur okaze de la presado. Tiu estis, en la komenco, la titolo de la unua eldono: *Imitado de l'Evangelio*. Poste, pro la ripetataj rimarkoj de S-ro Didier kaj de aliaj personoj, ĝi estis ŝanĝita al jena: *La Evangelio laŭ Spiritismo*. La pensoj eldiritaj en la sekvantaj komunikaĵoj ne povas do rezulti el antaŭjuĝaj ideoj de la mediumo.

Demando. – Kion vi pensas pri la nova verko, super kiu mi nun laboras ?

Respondo. – Tiu libro pri la doktrino havos konsiderindan influon ; vi traktas en ĝi pri gravaj aferoj, kaj ne nur la religia mondo trovos tie la maksimumojn al ĝi necesajn, sed la praktika vivo de la nacioj tie ĉerpos bonegajn instruojn. Vi bone agis, ke vi aliras demandojn de alta praktika moralo, laŭ vidpunkto de ĝeneralaj intereso, de sociaj intereso kaj de religiaj intereso. Dubon oni nepre detruu ; la tero kaj ĝiaj civilizitaj popoloj estas pretaj ; jam de longe viaj transtombaj amikoj estas ĝin plugintaj; ĵetu do la semon, kiun ni konfidis al vi, ĉar estas tempo, ke la tero gravitu en la radiantanta ordo de la sferoj, kaj fine foriru el ombro kaj el intelektaj nebuloj. Elfinu vian verkon, kaj kalkulu je la protektado de via gvidanto,

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

la gvidanto de ni ĉiuj, kaj je la helpo de viaj plej fidelaj Spiritoj, en kies nombro bonvolu ĉiam enkalkuli min.

Demando. – Kion diros la klerikaro ?

Respondo. – La klerikaro krios, ke temas pri herezo, ĉar ĝi vidos, ke vi peze atakas eternajn punojn kaj aliajn punktojn, sur kiuj ĝi apogas sian influon kaj sian kredindecon. Ĝi krios des pli forte, ĉar ĝi sentos sin pli vundata ol per la publikigo de *La Libro de la Spiritoj*, kies principojn cetere ĝi povus strikte akcepti ; sed nun vi ekiras novan vojon, kie ĝi ne povos sekvi vin. La sekreta anatemo fariĝos oficiala kaj la spiritistojn la Roma Eklezio repuŝos same kiel ĝi faris al judoj kaj paganoj. Kompense, la spiritistoj vidos, ke ilia kvanto pligrandiĝos pro tiaspeca persekutado, precipe kiam la pastroj akuzos kiel verkon absolute demonan ian doktrinon kies moralo splendoras, kiel sunradio, pro la publikigo mem de via nova libro, kaj de tiuj, kiuj sekvos.

Jen alproksimiĝas la horo, kiam vi devos malkaŝe deklari, kio estas Spiritismo, kaj montri al ĉiuj, kie troviĝas la vera doktrino instruita de Kristo ; alproksimiĝas la horo, kiam, sub la ĉielo kaj sur la tero, vi devos proklami Spiritismon kiel la solan tradicion vere kristanan, la solan institucion vere dian kaj homan. Elektante vin, la Spiritoj sciis la solidecon de viaj konvinkoj, kaj ke via fido, kiel bronza muro, rezistos al ĉiaj atakoj.

Tamen, amiko, se via kuraĝo ĝis nun ne fiaskis ĉe tiu tasko tiel peza, kiun vi akceptis, bone sciu, ke vi estis feliĉa ĝis nun, sed jen sonoris la horo de malfacilaĵoj. Jes, kara Majstro, la granda batalo prepariĝas ; fanatikismo kaj maltoleremo, incitite de la sukceso de via propagando, pafos sur vin kaj sur la viajn per venenaj armiloj. Preparu vin por la batalo. Sed mi fidas al vi, kiel vi al ni, kaj ĉar via fido estas el tiaj, kiuj movas montojn kaj irigas sur akvo. Estu do kuraĝa, kaj plenumiĝu via verko. Kalkulu pri ni kaj kalkulu precipe pri la amo de la Majstro de ni ĉiuj, kiu vin protektas en tute aparta maniero.

Parizo, la 14-an de septembro 1863.

Noto. – Mi antaŭe petis por mi komunikon pri iu ajn temo, kaj mi petis, ke oni ĝin sendu al mia ripozejo ĉe Sainte-Adresse.

« Mi volas paroli al vi el Parizo, kvankam nenia utileco ŝajnas al mi evidenta en tio, se oni konsideras, ke miaj intimaj voĉoj audiĝas ĉirkaŭ vi kaj via cerbo kaptas niajn inspirojn kun facileco, kiun vi mem ne

suspektas. Nia agado, precipe tiu de *Spirito Vero*, estas konstanta ĉirkaŭ vi, tiel ke vi ne povas rifuzi ĝin. Pro tio mi ne detaligos vian planon pri la verko, kiun vi vaste kaj komplete ŝanĝis, sekvante miajn kaŝajn konsilojn. Vi nun komprenas, kial ni bezonis havi vin je nia dispono, libera de ĉia alia zorgo, krom tiu pri la doktrino. Verko kiel tia, kiun ni ellaboris kune, nepre bezonas koncentriĝon kaj sanktan izoliĝon. Kun vigla intereso mi sekvas la progreson de via laboro, kiu estas konsiderinda paŝo antaŭen, fine malfermanta al Spiritismo la larĝan vojon de utilaj aplikoj por la bono de la socio. Per tia verko, la konstruaĵo liberiĝas de siaj skafaldoj kaj oni jam povas duonvidi ĝian kupolon, kiu konturiĝas ĉe la horizonto. Daŭrigu do pacience kaj senlace ; la monumenton oni finkonstruos je la ĝusta horo.

Ni jam traktis kun vi pri ĉimomentaj, incidentaj aferoj, nome pri religiaj aferoj. La Spirito Vero parolis al vi pri ribeloj, kiuj jam nun leviĝas; tiuj antaŭviditaj militaĵoj estas necesaj por atentigadi homojn, kiuj tiel facile deturnas sin de serioza temo. Al la soldatoj, kiuj batalas por la afero, aliĝos senĉese novaj batalantoj, kies paroloj kaj skribaĵoj faros sensacion kaj portos perturbon kaj konfuzon en la kontraŭajn vicojn.

Adiaŭ, kara kunulo de pasinta tempo, fidela disĉiplo de vero, kiu daŭrigas tra la vivo la verkon, pri kiu ni iam ĵuris, inter la manoj de la granda Spirito, kiu vin amas kaj kiun mi respektegas, dediĉi niajn fortojn kaj niajn vivojn ĝis ĝi estos elfinita. Saluton. »

Rimarkigo.- La plano de la verko, efektive, estis tute modifita, kion la mediumo certe ne povus scii, ĉar li estis en Parizo, kaj mi en Sainte-Adresse ; li ankaŭ ne povus scii, ke la Spirito Vero antaŭe parolis al mi pri la ribeloj de la Episkopo de Alĝerio kaj aliaj. Ĉiuj tiuj cirkonstancoj estis bone teksitaj, por al mi konfirmi la parton, kiun la Spiritoj plenumis en miaj laboroj.

La Eklezio Parizo, la 30-an de septembro 1863 (*Mediumo S-ro d' A...*)

Jen vi revenas, mia amiko, kaj vi ja ne perdis vian tempon ; al la laboro ankoraŭ, ĉar vi devas ne lasi ripozi vian amboson. Forĝu, forĝu bone harditajn armilojn ; ripozu de viaj laboroj per pli malfacilaj laboroj ; ĉiujn elementojn oni metos al vi inter la manojn laŭgrade kiel bezonate.

Alvenis la horo, kiam la Eklezio devos doni kalkulan raporton pri la deponaĵo al ĝi konfidita, pri la maniero kiel ĝi praktikis la instruojn de

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

la Kristo, pri la uzado de sia aŭtoritateco, fine pri la stato de nekredemo, kien ĝi kondukis la spiritojn ; alvenis la horo, kiam ĝi devas doni al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro kaj preni sur sin la respondecon pri ĉiuj siaj agoj. Dio juĝis ĝin, kaj rekonis ĝin nekapabla por la misio de progreso, kiu koncernas ĉiun spiritan aŭtoritatulon. Nur per ia absoluta transformiĝo ĝi povus vivi ; sed ĉu ĝi konsentos pri tia transformiĝo ? Ne, ĉar tiam ĝi jam ne estus la Eklezio ; por asimili la veraĵojn kaj malkovrojn de la scienco, ĝi devus rezigni la dogmojn, kiuj formas ĝiajn fundamentojn ; por reveni al la rigora praktikado de la instruoj de la Evangelio, ĝi bezonus rezigni povon kaj regadon, ŝanĝi lukson kaj purpuron per simpleco kaj humileco apostolaj. Ĝi staras inter du alternativoj ; se ĝi transformiĝas, ĝi sin mortigas ; se ĝi restas senŝanĝa, ĝi mortas sub la stringado de la progreso.

Cetere, Romo estas jam maltrankvila, kaj oni scias, en la Eterna Urbo, per nerefuteblaj revelacioj, ke la spiritisma doktrino estas vokata kaŭzi fortan doloron al papeco, ĉar Skismo rigore prepariĝas en Italujo. Oni do ne miru pro la furiozo, kun kiu la klerikaro batalas kontraŭ Spiritismo, ĉar ilin pelas la instinkto de konservado ; sed ili jam vidis siajn armilojn malfortiĝi kontraŭ tiu naskiĝanta potenco ; iliaj argumentoj ne povis rezisti la neflekseblan logikon ; nenio restas al ili krom la demono ; ĉi tiu estas ia malforta helpanto en la XIX-a jarcento.

Cetere, la batalo estas malfermita inter la Eklezio kaj la progreso, pli ol inter ĝi kaj Spiritismo ; ja la ĝenerala progreso de ideoj batas ĝin de ĉiuj flankoj, kaj sub tio ĝi falos, same kiel ĉio, kio ne samniveleĝos kun ĝi. La rapida irado de la afero nepre faros vin antaŭsenti, ke la elnodiĝo post nelonge okazos ; la Eklezio mem ŝajnas esti fatale pelata al ĝia akceliĝo. (Spirito d'E.)

Parizo, la 14-an de oktobro 1863

(Pri la estonteco de diversaj publikaĵoj ; medio S-ro d'A...)

« Vivo de Jesuo », de Renan

Demando. (al Erasto). Kian rezulton estigos la libro « Vivo de Jesuo », de S-ro Renan ?

Respondo. – Enorman rezulton; la bruado estos granda ĉe la klerikaro, ĉar tiu libro renversas la fundamentojn mem de la konstruaĵo, sub kiu ĝi sin ŝirmas de dek ok jarcentoj. Tiu libro ne estas senriproĉa, tute male, ĉar ĝi reflektas unu ekskluzivan opinion, kiu limigas sian rigardon en la mallarĝa cirklo de la materia vivo. S-ro Renan tamen ne estas materiisto;

li apartenas al tiu skolo, kiu ne neas la spiritan principon, sed ne atribuas al ĝi ian efektivan, rektan rolon en la kondukado de la aferoj en la mondo. Li estas unu el tiuj inteligentaj blinduloj, kiuj siamaniere klarigas tion, kion ili ne povas vidi ; kiuj, ne komprenante la meĥanisman de vidado je fora distanco, imagas, ke ili povas koni ion nur per tuŝado. Krome li reduktis la Kriston al proporcioj de plej vulgara homo, neante al li ĉiujn fakultojn, kiuj estas atributoj de spirito libera kaj sendependa de materio.

Tamen, flanke de gravaj eraroj, precipe koncerne spiritecon, tiu libro enhavas observojn tre ĝustajn, kiuj ĝis nun estis ne rimarkitaj de la komentistoj kaj kiuj donas al ĝi, laŭ certa vidpunkto, vastan atingpovon. Ĝia aŭtoro apartenas al legio de enkarniĝintaj spiritoj, kiujn oni povus nomi frakasantoj de la malnova mondo ; ili havas kiel mision platigi la grundon sur kiu oni konstruos ian novan, pli racian mondon. Dio volis, ke verkisto, ĝuanta bonan reputacion inter la homoj pro sia talento, venu lumigi certajn demandojn, obskurajn kaj makulitajn de centjaraj antaŭjuĝoj, por inklinigti certajn spiritojn al novaj kredoj. Sen tion suspekti, S-ro Renan platigis la vojon al Spiritismo.

La 30-an de januaro 1866
(Parizo. Grupo de S-ro Golovine. Mediumo S-ro L...)
Anoncantoj de la tempesto

Permesu, ke maljuna altrangulo el Taŭrido benu viajn du infanojn ; ili povu, sub la protekto de siaj du patrinoj, fariĝi plene inteligentaj kaj esti por vi fonto de realaj ĝojoj ! Al ili mi deziras, ke ili estu konvinkitaj spiritistoj, tio estas, ke ili estu tiele saturitaj de la ideoj pri aliaj vivoj, de la principoj de frateco, de karitato kaj de solidareco, ke la okazaĵoj, kiuj venos, kiam ili havos la aĝon de konscienco kaj racio, ne povu ilin konsterni nek malfortigi kaj ne malfortigu ilian fidon pri la dia justeco, meze de la elprovaĵoj, kiujn la homaro devos trapasi.

Kelkfoje vi miras pro la akreco, kun kiu viaj kontraŭuloj vin atakas ; laŭ ili vi estas frenezuloj, viziuloj ; vi prenas fikcion por veraĵo ; vi renaskas la diablon kaj ĉiajn erarojn de la Mezepoko.

Vi scias, ke respondi al ĉiuj tiuj atakoj estus komenci ian senfinan polemikon. Via silento pruvas vian forton, kaj se vi ne donas al ili okazon por rebato, ili fine silentos.

Plej timindaj estas neantaŭvidaĵoj. Se ia registara ŝanĝo okazus en la senco de plej netolerema ultramontaneco, vi certe estus persekutataj,

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

ofendataj, kondamnitaj, ekzilitaj. Sed la okazaĵoj, pli fortaj ol la surdaj manovroj, preparas ĉe la politika horizonto nigran ŝtormon, kaj kiam la tempesto eksplodos, klopodu esti bone ŝirmataj, tre fortaj, tre neprofitcelaj. Okazos ruinoj, invadoj, fiksado de landlimoj, kaj de tiu grandega ŝiprompiĝo, kiu venos el Eŭropo, el Azio, el Ameriko, postvivos, sciu, tiuj animoj bone harditaj, klarmensaj spiritoj, ĉio justa, fidela, honora, solidara.

Ĉu viaj socioj, tiaj, kiaj ili estas organizitaj, estas perfektaj ? Sed vi havas ĉe vi milionojn da parioj ; mizero senĉese plenigas viajn karcerojn, viajn bordelojn kaj nutras la eŝafodon. Germanujo vidas, kiel ĉiam, ke ĝiaj enloĝantoj elmigras je centmiloj, kio ne honoras registarojn ; la Papo, portempa princo, disvastigas eraron tra la mondo, anstataŭ *Spirito Vero*, kies artefarita simbolo li estas. Ĉie, envio ; mi vidas interesojn, kiuj interbatalas, kaj ne klopodojn por forigi nescion. La registaroj, subfositaj per egoismaj principoj, intencas sin apogi kontraŭ la ondo, kiu kreskas... kaj tiu ondo estas la homa konscienco, kiu fine ekribelas, post plurjarcenta atendado, kontraŭ la malplimulto ekspluatanta la vivajn fortojn de la naciecoj.

Naciecoj ! Ĉe tiu vorto, povu Rusujo ne trovi ian teruran rifon, ian Kabon de Tempestoj ! Amata lando, viaj ŝtatestroj ne forgesu, ke la grandeco de lando ne konsistas en posedo de vastaj landlimoj, multaj provincoj kaj malmultaj vilaĝoj, kelkaj grandaj urboj en oceano da nescio, grandegaj ebenaĵoj senhomaj, sterilaj, kruelaj kiel envio, kiel ĉio, kio estas falsa kaj false frapas. Tute ne gravas, ke la suno ne sin kaŝas sur viaj konkeroj, ne pro tio estos malpli da forlasitoj, da dentgrincadoj, tuta infero minacanta kaj faŭkanta kiel la vastegeco.

Do, la nacioj, kiel la registaroj, havas sian liberan elektopovon ; kiel simplaj individuoj, ili scipovas sin direkti per amo, unueco, konkordo ; ili liveros al la anoncita tempesto la elektrajn elementojn, proprajn por pli bone detruj kaj diserigi ilin.

Inocento

Dum sia vivo ĉefepiskopo en Taŭrido.

La 30-an de januaro 1866
(Lyon, Groupe Villon. Mediumo M.G.)
La nova generacio

La tero ektemas de ĝojo; la tago de la Sinjoro alproksimiĝas; ĉiuj, kiuj inter ni, staras en la fronto, konkure deziregas eniri en la batalon. Jam

la Spirito de kelkaj bravaj animoj enkarniĝintaj skuas siajn korpojn por ilin rompi ; la retenata karno ne scias, kion pensi, ia nekonata fajro ĝin konsumas ; ili estos liberigitaj, ĉar la tempoj alvenis : unu eterneco baldaŭ estingiĝos, glora eterneco tuj ekaperos, kaj Dio kalkulas siajn infanojn.

Regado de oro cedos sian lokon al ia pli pura regno ; pensado estos baldaŭ suverena kaj elitaj Spiritoj, kiuj venis el fora tempo lumigi la jarcentojn, en kiuj ili vivis, kaj servi kiel mejloŝtonoj al venontaj jarcentoj, enkarniĝos inter vi. Kion mi diras ? Multaj estas enkarniĝintaj. Ilia sava parolo alportos ian detruan flamon, kiu senrimede frakosas malnovajn maljustaĵojn. Kiom da malnovaj antaŭjuĝoj ruinfalos, kiam la Spirito, kiel duklinga hakilo, ilin forhakos ĝis iliaj fundamentoj.

Jes, la patroj de la progreso de la homa spirito forlasis, unuj la lumajn loĝejojn, aliaj grandajn laborojn, en kiuj feliĉo kuniĝas al la plezuro lerni, por repreni la bastonon de pilgrimanto, kiun ili apenaŭ demetis ĉe la sojlo de la templo de scio, kaj, post nelonge, de la kvar anguloj de la terglobo, baldaŭ la oficialaj savantoj aŭskultos kun timego, ke senbarbaj junuloj, per profunda lingvaĵo, rebatos iliajn argumentojn, kiujn ili rigardis nerefuteblaj. La moka rideto jam ne povos esti sekura ŝildo kaj sub minaco de defalo, necesos respondi. Tiel, tute malkovriĝos la erara rondo, en kiu enfermiĝas la majstroj de vana filozofio, ĉar novaj ĉampionoj portas kun si ne nur ian flamon, kiu estas la inteligenteco libera de densaj vualoj, sed krome inter ili multaj ĝuos tiun apartan staton, privilegion de grandaj animoj, kiel Jesuo, kiu donas la povon resanigi kaj fari mirindaĵojn, kiujn oni rigardas kiel miraklojn. Antaŭ materiaj faroj, ĉe kiuj la Spirito sin montras tiel supera al la materio, kiel nei ties ekziston ? Materialiston oni repuŝos kun liaj paroladoj, per parolo pli elokventa ol lia, kaj per fakto evidenta, pozitiva kaj de ĉiuj konstatata, ĉar grandaj kaj malgrandaj novaj Sanktaj Tomasoj povos tuŝi per la fingro.

Jes, la malnova, korodita mondo krakrompiĝas ; la malnova mondo finiĝas, kaj kun ĝi ĉiuj tiuj malnovaj dogmoj, kiuj ankoraŭ relumas nur pro la oraĵo, per kiu oni ĝin kovras. Bravaj Spiritoj, via estas la tasko forskrapi tiun falsan oron ; malantaŭen, vi, kiuj vane deziras apogi tiun idolon ; batite de ĉiuj flankoj, ĝi ruinfalos kaj vin kuntrenos en sia falo.

Malantaŭen, vi ĉiuj, neantoj de progreso ; malantaŭen, kun viaj kredoj pasintatempaj. Kial vi neas la progreson kaj volas ĝin haltigi ? Tiel estas, ĉar dezirante superregi, superregi ankoraŭ kaj ĉiam, vi kondensigis vian penson en kredartikolojn, dirante al la homaro : » Vi estos ĉiam infana, kaj ni, kiuj havas la lumon de la supro , ni estas destinitaj vin konduki. »

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Sed vi vidis, ke la infanaj paŝlerniloj restas en viaj manoj ; kaj la infano saltas antaŭ vi, kaj vi ankoraŭ neas, ke ĝi povas marŝi per si mem ! Ĉu frapante ĝin per la paŝlerniloj, kiuj devus ĝin subteni, vi pruvos la aŭtoritatecon de viaj argumentoj ? Ne ; kaj vi tion bone konscias; sed estas tiel dolĉe, kiam oni sin rigardas neerarema, kredi, ke aliaj homoj ankoraŭ fidas tiun neeraremon, kiun eĉ vi mem jam ne kredas.

Ho ! kiom da ĝemoj aŭdiĝas en la sanktejo ! Tie, se oni atentigas la orelojn, oni aŭdas dolorajn murmurojn. Kion do vi diras, kompatindaj obstinuloj ? Ke la mano de Dio pli peze falas sur vian Eklezion ? Ke ĉie la libera gazetaro vin atakas kaj vigle batadas viajn argumentojn ? Kie la nova Krizostomo, kies potenca parolo nuligos tian lavangon da raciuloj ? Vane vi lin atendas ; viaj plumoj plej fortaj kaj plej kredindaj jam povas nenion ; ili obstine alkroĉiĝas al la pasinteco, kiu forpasas, dum nova generacio, kun sia nerezistebla impulso, kiu ĝin antaŭenigas, krias : Ne, ne plu la pasinteco ; venu la estonteco ; ia nova aŭroro leviĝas, kaj tien iras niaj aspiroj !

Antaŭen ! ĝi diras ; plilarĝigu la vojon, niaj fratoj sekvas nin ; sekvu la ondon, kiu nin trenas ; ni bezonas movadon, kiu estas vivo, dum vi prezentas al ni la senmovecon, kiu estas morto.

Malfermu viajn tombojn, viajn katakombojn ; satigu vian vidaĉon per la malnovaj restaĵoj de ne plu ekzistanta pasinteco. Viaj sanktaj martiroj tute ne estas mortintaj, ke vi al ili senmovigu la estantecon. Ili duonvidis nian epokon kaj sin ĵetis en la morton kvazaŭ sur vojon, kiu devus ilin tien konduki. Al ĉiu epoko ĝia genieco ; ni volas nin ĵeti en la vivon, ĉar la estontaj jarcentoj, kiuj montriĝas al ni, abomenas la morton.

Jen estas, miaj amikoj, tio, kion komprenigos la bravaj Spiritoj, kiuj nuntempe enkarniĝas. Ĉi tiu jarcento ne finiĝos, sen tio, ke multaj restaĵoj diskovras la grundon. La mortiga, interfrata milito baldaŭ cedos al la diskutado ; spirito anstataŭos krudan forton. Kaj post ol ĉiuj tiuj noblaj animoj estos batalintaj, ili revenos en nian spiritan mondon por ricevi la kronon de venkintoj.

Jen estas la celo, miaj amikoj ; la ĉampionoj estas treege fortaj por akcepti, ke la sukceso estas duba. Dio elektis la eliton de siaj batalantoj, kaj la venko estas garantiita por la homaro.

Ĝoju do, vi ĉiuj, kiuj aspiras al feliĉo, kaj kiuj volas, ke viaj fratoj partoprenu en ĝi kiel vi mem, jen alvenis la tago ! La terglobo saltas de ĝojo, ĉar ĝi vidos, ke komenciĝas la regno de paco promesita de la Kristo, la dia mesio, regno, kies fundamenton li venis starigi.

Spirito.

La 23-an de aprilo 1866
(*Parizo. Privata komuniko. Mediumo S-ro D...*)
Instrukcio por la sano de S-ro Allan Kardec

Ĉar la sanstato de S-ro Allan Kardec malboniĝas kun ĉiu tago, pro troa laborado, kiun li ne povas elteni, tial mi sentas, ke mi devas rediri tion, kion mi jam diris plurfoje : vi devas ripozi ; homaj fortoj havas limojn, pri kiuj via deziro, ke la instruado progresu, vin kondukas al malobservo ; vi tiel misagas, ĉar tion farante vi ne rapidigas la iradon de la doktrino, sed ruinigas vian sanstaton kaj metas vin en konkretan neeblecon elfini la taskon, kiun vi venis plenumi ĉi tie. Via nuntempa malsano rezultas de senĉesa konsumado de vitalaj fortoj, kiu ne lasas al riparado la tempon por efektiviĝi, kaj de ia varmiĝo de la sango, kaŭzata de absoluta manko de ripozo. Ni vin sendube subtenas, sed kondiĉe, ke vi ne malfaru, kion ni faras. Kion utilas rapidi ? Ĉu ni ne diris al vi multfoje, ke ĉio venos siatempe kaj ke la Spiritoj respondecaj pri la movado de ideoj scios aperigi favorajn cirkonstancojn, kiam alvenos la momento por agado ?

Kiam montriĝas, ke ĉiu spiritisto kolektas siajn fortojn por la batalo, ĉu vi pensas, ke via devo estas elĉerpi la viajn ? Ne ; en ĉio vi devas doni ekzemplon, kaj via loko estos sur la batalkampo, en la danĝera momento. Kion vi farus, se via laciĝinta korpo ne permesus al via spirito preni la armilojn, kiujn sperto kaj revelacio metis en viajn manojn ? – Kredu min, prokrastu la grandajn verkojn destinitajn al kompletigo de la verko skizita en viaj unuaj publikaĵoj ; viaj nunaj verkoj kaj kelkaj etaj urĝaj broŝuroj tute okupos vian tempon kaj devos esti la solaj objektoj de viaj nunaj zorgoj.

Mi ne parolas al vi nur je mia propra nomo, mi estas ĉi tie la reprezentanto de ĉiuj tiuj Spiritoj, kiuj tiel potence kontribuis por la disvastigado de la instruoj per siaj saĝaj konsiloj. Ili diras al vi pere de mi, ke tiu prokrasto, kiun vi supozas malutila al la estonteco de la doktrino estas paŝo necesa laŭ pli ol unu vidpunkto, ĉu pro tio, ke certaj demandoj ne estas ankoraŭ tute klarigitaj, ĉu por prepari la Spiritojn por ilin pli bone asimili. Necesas, ke aliaj malobstrukcu la grundon, ke oni pruvu la malsufiĉecon de certaj teorioj kaj ke estiĝu ia granda malpleno. Unuvorte, ĉi tiu momento ne estas oportuna; ŝparu do viajn fortojn, ĉar venos tempo, kiam via tuta vicleco korpa kaj spirita estos al vi necesa. Spiritismo estis ĝis nun objekto de multaj disputoj, kaj estigis tempestojn. Ĉu vi pensas, ke tiu tuta movado kvietiĝis, ke ĉiaj malamoj trankviliĝis kaj senpotenciĝis ? Seniluziiĝu, la puriga fandvazo ankoraŭ ne forĵetis ĉiajn malpuraĵojn ; la

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

estonteco rezervas por vi aliajn elprovaĵojn kaj la lastaj krizoj ne estos la malplej penigaj kaj elteneblaj.

Mi scias, ke via aparta pozicio estigas al vi amason da duarangaj laboroj, kiuj okupas la plej bonan parton de via tempo. Ĉiaspecaj demandoj vin troŝarĝas, kaj vi devigas vin laŭeble kontentigi ilin. Mi faros ĉi tie ion, kion sendube vi mem ne kuraĝus kaj, direktante min al la plej multaj Spiritistoj, mi petos ilin, en la intereso mem de Spiritismo, ke ili ŝparu al vi ĉian troan laborŝarĝon, kiuj okupus tempon, kiun vi devas dediĉi preskaŭ ekskluzive al la plenumado de via verko. Se via korespondado iom suferos, tamen la instruado gajnos.

Kelkfoje necesas oferi privatajn kontentigojn favore al la ĝenerala intereso. Tio estas urĝa decido, kiun ĉiuj sinceraj adeptoj scios kompreni kaj aprobi.

La grandega korespondado, kiun vi ricevas estas por vi ia riĉa fonto de dokumentoj kaj informoj; ĝi klarigas al vi la veran marŝon kaj la realan progreson de la doktrino ; ĝi estas senpartia termometro ; vi krome el ĝi ĉerpas moralajn kontentigojn, kiuj plurfoje subtenis vian kuraĝon, per la konstato pri la aliĝo al viaj ideoj, en la tuta mondo ; laŭ tiu vidpunkto, la superabundeco estas bonaĵo kaj ne ĝeno, sed kondiĉe, ke ĝi helpu viajn laborojn kaj ilin ne embarasu per kromkvanto da okupoj.

D-ro Demeure.

Bona Sinjoro Demeure, mi dankas por viaj saĝaj konsiloj. Danke al mia decido akcepti helpanton, krom en esceptaj okazoj, la nuna korespondado malmulte suferas nuntempe, kaj nenion suferos estontece ; sed kion fari el tiuj pli ol kvincent leteroj akumuliĝintaj, kiujn, malgraŭ mia tuta bonvolemo, mi ne sukcesis ĝisdatigi ?

Respondo – Necesas, kiel oni komerce diras, ilin entute enskribi en la konton de profitoj kaj perdoj. Per anonco pri tia decido en la *Revuo*, viaj korespondantoj scios kiel sin teni, komprenos ties neceson kaj precipe rigardos ĝin pravigita per la ĉisupraj konsiloj. Mi ĝin ripetas, estus neeble, ke la aferoj plu daŭru tiel longe; ĉio suferus, kiel via sano, tiel ankaŭ la doktrino. Vi devas, se necese, fari la nemalhaveblajn oferojn. De nun trankvila pri tiu punkto, vi povos pli libere okupiĝi pri viaj devigaj laboroj. Jen kion konsilas al vi ĉi tiu, kiu estos ĉiam via sindediĉa amiko.

Demeure.

Akceptinte tiun saĝan konsilon, ni petis tiujn, el niaj korespondantoj, je kiuj ni delonge estis malakurataj, ke ili pardonu nin kaj ekskuzu, ke ni ne povis respondi detale kaj kiel ni dezirus, al iliaj bonvenaj leteroj, kaj ke ili volu akcepti kolektivian esprimon de niaj frataj sentoj.

La 25-an de aprilo 1866
(Parizo. Resumo de komunikoj donitaj per
S-rinoj M... kaj T..., en stato somnambula)
Regeneriĝo de la homaro²⁵

La okazaĵoj rapide akceliĝas ; tial ni ne plu diras al vi, kiel iam antaŭe : « La tempoj proksimiĝas » ; ni nun diras al vi : « La tempoj estas alvenintaj ».

Per tiuj vortoj, ne komprenu, ke temas pri ia nova diluvo, aŭ katastrofo, aŭ ĝenerala konfuzo. Partaj konvulsioj de la tergloba okazis en ĉiuj tempoj kaj ankoraŭ okazas, ĉar ili rezultas el ties konsisto, sed ne tiaj estas la signoj de la tempoj.

Kaj tamen, ĉio, kio estas antaŭdirita en la Evangelio, devas plenumiĝi kaj ĉimomente plenumiĝas, kiel vi ĝin poste rekonos, sed prenu la anoncitan signojn nur kiel figurojn, kiuj devos esti komprenataj laŭspirite, ne laŭlitere. La tuta *Sankta Skribo* entenas grandajn verojn, sub la vualo de alegorio, kaj pro tio, ke la komentantoj sin alkroĉis al la literoj, ili devojiĝis. Mankis al ili la ŝlosilo por kompreni la veran sencon. Tia ŝlosilo troviĝas en la malkovroj de scienco kaj en la leĝoj de la nevidebla mondo, kiun Spiritismo rivelas al ni. De nun, helpe de tiaj novaj scioj, kio estis malklara fariĝas klara kaj komprenebla.

Ĉio iras laŭ la natura nordo de la aferoj, kaj la senŝanĝaj leĝoj de Dio neniel renversiĝos. Vi vidos do nek miraklojn, nek mirindaĵojn, nek ion supernaturan, laŭ la vulgara senco ligita al tiuj vortoj.

Ne rigardu la ĉielon por serĉi tie aŭgurajn signojn, ĉar vi neniel vidos ilin tie, kaj tiuj, kiuj anoncos ilin al vi, vin trompas ; sed rigardu ĉirkaŭ vi, inter la homoj, jen tie vi ĝin trovos.

Ĉu vi ne sentas, ke ia vento blovas sur la tero kaj skuas ĉiujn Spiritojn ? La mondo estas en atendo, kiel se kaptita de svaga antaŭsento pri la alproksimiĝo de ŝtormo.

Ne kredu tamen pri la finiĝo de la materia mondo ; la tero progresis ekde sia transformiĝo ; ĝi ankoraŭ progresos, kaj nepre ne detruigiĝos. Sed

²⁵ Vidu la *Eksplikon Noton* en la fino de ĉi tiu volumo.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

la homaro alvenis al unu el siaj momentoj de transformiĝo, kaj la tero ascendas en la hierarkio de la mondoj.

Ne la finiĝo do de la mondo prepariĝas, sed ja la finiĝo de la morala mondo : tiu estas la malnova mondo, la mondo de antaŭjuĝoj, de egoismo, de fiero kaj de fanatikemo, kiu ruiniĝas ; ĉiu tago forportas kelkajn ruinaĵojn. Ĉio finiĝos por ĝi kun la foriranta generacio, kaj la nova generacio starigos novan konstruaĵon, kiun la postvenontaj generacioj solidigos kaj kompletigos.

El mondo de elaĉetoj, la tero estas vokata iam transformiĝi en mondon feliĉan, kaj enloĝado en ĝi estos rekompenco, anstataŭ puno. La regno de bono postvenos regnon de malbono.

Por ke la homoj estu feliĉaj sur la tero, necesas, ke loĝu en ĝi nur bonaj Spiritoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, kiuj deziru nur bonon. Ĉar alvenis tia tempo, granda elmigrado okazas nuntempe inter tiuj, kiuj vivas en ĝi ; kiuj faras malbonon pro malbono, kiuj *ne estas tuŝataj* de la sentoj pri bono, tiuj estos el ĝi forpelataj, ĉar ili tien denove alportus problemojn kaj konfuzon kaj estus baro al progreso. Ili elpagos sian krudecon en malsuperaj mondoj, kien ili alportos siajn akiritajn sciojn, kaj kie ili havos kiel mision antaŭenigi ilin. Ilin anstataŭos sur la tero pli bonaj Spiritoj, kiuj faros, ke regu inter si justeco, paco, frateco.

La tero, ni jam tion diris, certe ne transformiĝos kaŭze de kataklismo, kiu subite malaperigus unu tutan generacion. La nuna generacio grade malaperos, kaj la nova ĝin same postsekvos sen ŝanĝo en la natura ordo. Ĉio do ekstere okazos laŭkutime, kun tiu sola, kvankam tre grava, diferenco: ke unu parto de la Spiritoj, kiuj ĉi tie enkarniĝis, ne plu ĉi tie enkarniĝos. En infano naskiĝonta, anstataŭ Spirito malmulte progresinta kaj inklina al malbono, enkarniĝos Spirito pli progresinta kaj *inklina al bono*. Temas do tute ne pri ia nova korpa generacio sed ja pri nova generacio de Spiritoj. Elreviĝos do tiuj, kiuj esperis vidi transformiĝon kaŭzatan de supernaturaj efikoj.

La nuna epoko estas transira ; miksiĝas elementoj de la du generacioj. Starante je meza punkto, vi vidas la foriron de unu kaj la alvenon de la alia, kaj ĉiu el ili jam montriĝas en la mondo per karakteroj propraj.

La du generacioj, kiuj sekvas unu la alian, havas ideojn kaj vidpunktojn tute kontraŭajn. Laŭ la moralaj dispozicioj, sed precipe laŭ la dispozicioj *intuiciaj kaj denaskaj*, estas facile distingi al kiu el ili apartenas ĉiu aparta individuo.

Ĉar la nova generacio devas fondi epokon de morala progreso, ĝi distingiĝas per ĝenerale frutempaj inteligenteco kaj racio, kune kun ia *denaska* sento pri bono kaj spiritualismaj kredoj, kio estas senduba signo de ioma antaŭa progreso. Ĝi ne konsistis ekskluzive el Spiritoj eminente superaj, sed el Spiritoj, kiuj, jam progresinte, estas pretaj asimili ĉiajn progresigajn ideojn kaj kapablaj helpi la regeneran movadon.

Kio male distingas la postrestintajn Spiritojn, tio estas unue ribelo kontraŭ Dio pro neado de la Providenco kaj de ĉia potenco supera al la homaro ; poste, la *instinkta* emo al malnobligaj pasioj, al kontraŭfrataj sentoj de fiero, de malamo, de ĵaluzo, de ambicio, fine la superregado de alkroĉiĝo al ĉio, kio estas materia.

El tiaj malvirtoj la tero devas esti elpurigita, per la forigo de tiuj, kiuj rifuzas pliboniĝi, ĉar ili estas nekongruaj kun la regno de frateco kaj ĉar bonaj homoj ĉiam suferos pro kontakto kun ili. Tiel la tero liberiĝos, kaj la homoj irados sen baroj al ia pli bona estonteco, kiu estas antaŭdestinita por ili ĉi tie, kiel premio pro iliaj klopodoj kaj pro ilia persistado, dum ili atendas, ke ia ankoraŭ pli kompleta elpuriĝo malfermos al ili la envenon en superajn mondojn.

Koncerne tian elmigradon de Spiritoj oni ne komprenu, ke ĉiuj postrestintaj Spiritoj estos forpelitaj de la tero kaj relegaciitaj en malsuperaj mondoj. Multaj cedis al la delogado de cirkonstancoj kaj de ekzemplo ; la ŝelo sur ili estas pli malbona ol la kerno. Unu fojon forprenitaj el la influo de la materio kaj de antaŭjuĝoj de l' enkorpora mondo, la plej multaj vidos la aferojn per maniero tute malsame ol kiel dumvive, kaj pri tio vi havas jam multenombrajn ekzemplojn. Je tio, ilin helpos bonvolemaj Spiritoj, kiuj interesiĝas pri ili, kaj kiuj penos ilin prilumi kaj montri la falsan vojon, kiun ili iris. Per preĝoj kaj admonoj, vi mem povas kontribui por ilia pliboniĝo, ĉar ekzistas ĉiama solidareco inter mortintoj kaj vivantoj.

Tiuj povos do reveni, kaj ili estos feliĉaj, ĉar tio estos rekompenco. Kiel gravas tio, kio ili estis kaj kion ili faris, se ilin animis plej bonaj sentoj ! Tute ne kontraŭaj al la socio kaj al la progreso, ili estos utilaj helpantoj, ĉar ili apartenos al la nova generacio.

Ne estos do definitiva ekskludo, krom por Spiritoj esence ribelemaj, tiuj, kiujn fiero kaj egoismo, pli ol nescio, faris surdaj al la voĉo de bono kaj de racio. Sed eĉ ĉi tiuj ne estas kondamnitaj al porĉiama malsupereco, kaj iam estonte ili malaprobos sian pasintecon kaj malfermos la okulojn al lumo.

Preĝu do por tiuj hardiĝintoj, por ke ili pliboniĝu dum ankoraŭ estas tempo, ĉar la tago de elaĉeto alproksimiĝas.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Bedaŭrinde, la plej multaj, ignorante la voĉon de Dio, persistos en sia blindeco, kaj ilia rezisto markos la finon de ilia regado per teruraj bataloj. En sia devojiĝo, ili mem rapidos al sia forperdiĝo ; ili kaŭzos detruadon, kiu kondukos al amaso da plagoj kaj katastrofoj, tiel ke malgraŭvole ili plirapidigos la alvenon de epoko de renovigo.

Kaj kiel se la detruado ne okazus sufiĉe rapide, oni vidos plimultiĝon de memmortigoj laŭ kvanto neniam okazinta, eĉ inter infanoj. Frenezeco estos neniam atinginta tiom grandan kvanton da homoj, kiuj estos forstrekitaĵoj el inter la vivantoj eĉ antaŭ la morto. Ĉi tiuj ja estas la veraj signoj de l' tempoj. Kaj ĉio tio plenumiĝos per sinsekvo de cirkonstancoj, kiel ni diris, sen ia malobeo al naturaj leĝoj.

Tamen, tra la ombra nebulo, kiu vin envolvas kaj en kies sino muĝas tempesto, vidu jam la unuajn radiojn de la nova erao ! Frateco metas siajn fundamentojn sur ĉiujn punktojn de la terglobo kaj popoloj etendas la manojn, unuj al aliaj; barbareco mildiĝas pro kontakto kun la civilizacio ; antaŭjuĝoj pri rasoj kaj sektoj, kiuj verŝis ondojn da sango, estingiĝas; fanatikeco, netoleremo perdas terenon, dum libereco de konscienco eniras en la morojn kaj fariĝas rajto. Ĉie fermentiĝas la ideoj ; oni vidas la malsanon kaj oni provas kuracilojn, sed multaj iras sen kompasoj kaj perdiĝas en utopioj. La mondo estas en grandega naskolaboro, kiu daŭros unu jarcenton ; dum tiu ankoraŭ konfuza laboro, oni tamen vidas, ke regas tendenco al difinita celo : tiu de unueco kaj de unuformeco, kiuj inklinitas al interfratiĝo.

Ankoraŭ tie vidiĝas la signoj de l' tempoj; sed dum la aliaj estas de agonio de pasinteco, ĉi tiuj lastaj estas la unuaj plorkrioj de naskiĝanta infano, la antaŭuloj de aŭroro, kiun la proksima jarcento vidos eklumi, ĉar tiam la nova generacio staros kun sia tuta forto. Kiel la mieno de la XIX^a jarcento malsame aspektas ol tiu de la XVIII^a, laŭ iuj vidpunktoj, same tiu de la XX^a jarcento estos alia ol tiu de la XIX^a, laŭ aliaj vidpunktoj.

Unu el la distingaj karakteroj de la nova generacio estos la *denaska* fido ; ne tiu fido ekskluzivema kaj blinda, kiu disigas homojn, sed fido rezona, kiu klarigas kaj plifortigas, kiu ilin unuigas kaj intermiksas en komunan senton de amo al Dio kaj al la proksimulo. Kun la estingiĝanta generacio malaperos la lastaj vestiĝoj de nekredemo kaj de fanatikemo, ankaŭ kontraŭaj al morala kaj socia progreso.

Spiritismo estas la vojo, kiu kondukas al renovigado, ĉar ĝi ruinigas la du plej grandajn barojn, kiuj al ĝi kontraŭstaras: nekredemo kaj fanatikeco. Ĝi havigas solidan, klarvidan fidon ; ĝi elvolvas ĉiujn sentojn kaj ideojn, kiuj respondas al la vidmanieroj de la nova generacio, kaj pro tio ĝi

troviĝos kvazaŭ denaska kaj intuicia en la koro de ties reprezentantoj. La nova erao do vidos ĝin grandiĝi kaj prosperi pro la forto mem de la aferoj. Ĝi fariĝos la fundamento de ĉiuj kredoj, la apogpunkto de ĉiuj institucioj.

Sed de nun ĝis tiam, kiom da bataloj ĝi ankoraŭ devos elteni kontraŭ tiuj du malamikoj : nekredemo kaj fanatikeco, kiuj - stranga afero ! - donas al si la manojn reciproke por ĝin faligi ! Ili antaŭsentas sian estontecon kaj sian ruiniĝon : pro tio ili ektimas, ĉar ili vidas, ke jam plantiĝis, sur la ruinoj de la malnova egoisma mondo la standardo, kiu certe kunigos ĉiujn popolojn. En la dia maksimumo : *Ekster karitato neniam savo*, ili legas sian propran kondamnon, ĉar ĝi estas simbolo de nova frata alianco proklamita de la Kristo. Ĝi sin montras al ili kiel la fatalaj vortoj en la festeno de Baltazaro. Kaj tamen, ili devus beni tian maksimumon, ĉar ĝi ŝirmas ilin kontraŭ ĉiaj rebatoj flanke de tiuj, kiuj ilin persekutas. Sed ne, blinda forto faras, ke ili reĵetu tion, kio sola povus ilin savi !

Kion ili povos, kontraŭ la kresko de la opinio, kiu ilin forpuŝas ? Spiritismo triumfe eliros el la batalo, ne dubu pri tio, ĉar ĝi sidas en la leĝoj de la naturo, kaj ĝuste pro tio estas nedetruenda. Vidu, per kia multego da rimedoj la ideo disvastiĝas kaj ĉien penetras ; firme kreu, ke tiuj rimedoj ne estas hazardaj, sed providencaj ; kio unuavide ŝajne devus ĝin malutili, estas ĝuste tio, kio helpas ĝian disvastiĝon.

Ĝi baldaŭ vidos ekaperi ĉampionojn altgrade agnoskitajn kaj plej fidindajn, kiuj ĝin apogos per la aŭtoritateco de sia nomo kaj de sia ekzemplo, kaj trudos silenton al ĝiaj misfamigantoj, ĉar oni ne aŭdacos trakti ilin kiel frenezajn. Tiaj homoj ĝin studas silente, kaj sin montros, kiam alvenos oportuna momento. Ĝis tiam, konvenas, ke ili sin tenu aparte.

Ankaŭ baldaŭ vi vidos la artojn en ĝi ĉerpi, kiel ĉe fekunda minejo, kaj traduki la pensojn kaj la horizontojn, kiujn ĝi malkovras, per pentrado, muziko, poezio kaj literaturo. Oni diris al vi, ke iam estos arto spiritisma, kiel iam estis arto pagana kaj arto kristana, kaj tio estas granda vero, ĉar la plej grandaj geniuloj el ĝi inspiriĝos. Baldaŭ vi vidos la unuajn skizojn de tiu arto, kiu poste okupos la rangon, kiun ĝi meritas.

Spiritistoj, la estonteco estas via kaj de ĉiuj homoj kun koro kaj sindediĉaj. Ne timigu vin la baroj, ĉar neniu povas haltigi la decidojn de la Providenco. Laboradu senĉese, kaj danku Dion, ke Li lokis vin en la avangardo de la nova falango. Ĝi estas honora posteno, kiun vi mem petis, kaj pri kiu necesas, ke vi fariĝu indaj pro via kuraĝo, via obstino kaj via sindediĉo. Feliĉaj estos tiuj, kiuj falos en tiu batalo kontraŭ perforto ; sed honte estos, en la mondo de la Spiritoj, al tiuj, kiuj falos pro malforteco aŭ malvigleco. Bataloj cetere estas necesaj por plifortigi la animon ; kontakto

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

kun malbono faras, ke oni pli bone taksu la avantaĝojn de bono. Sen bataloj, kiuj stimulas la kapablojn, Spirito sin fordonus al senzorgeco malutila al lia progreso. Bataloj kontraŭ la elementoj disvolvas psikajn fortojn kaj inteligentecon ; bataloj kontraŭ malbono disvolvas moralajn fortojn.

La 27-an de aprilo 1866
(Parizo, ĉe S-ro Leymarie, Mediumo S-ro L...)
Laŭgrada antaŭenirado de Spiritismo. Skismoj kaj baroj

Karaj kundisĉiploj, kio estas vera, tio devas stariĝi ; nenio povas kontraŭi la lumon de vero ; kelkfoje, oni povas ĝin vuali, torturi, kaj fari kun ĝi, kion faras teredoj²⁶ sur la nederlandaj digoj ; sed veraĵo ne staras sur fostoj : ĝi trairas la spacon, ĝi estas en la aero, kaj se oni povis blin-digi unu generacion, tamen estos novaj enkarniĝoj, alvokitoj el la spirita mondo, kiuj venas alporti fekundajn ĝermojn, aliajn elementojn, kaj kiuj scipovas alporti al ili ĉiajn grandajn nekonataĵojn.

Ne tro hastu, amikoj ; multaj inter vi dezirus iri vaporŝipe, kaj en tempo de elektro, rapidi kiel ĝi. Forgesinte naturajn leĝojn, vi volus pli rapidi ol la tempo. Pripensu do kiom saĝa Dio estas, en ĉio. La elementoj, kiuj konsistigas vian planedon, suferis longan, penigan akuŝon; antaŭ ol vi ekzistis, necesis, ke ĉio fariĝu laŭ la kapablo de viaj organoj. Materio, mineraloj, fanditaj kaj refanditaj, gasoj, vegetaĵoj, iom post iom harmoniiĝis kaj kondensiĝis, por permesi vian aperon sur la tero. Ĝi estas la eterna leĝo de laboro, kiu ne ĉesis regadi tiel la neorganajn kiel ankaŭ la inteligentajn estulojn.

Spiritismo ne povas eviti tiun leĝon, la leĝon de naskiĝo. Plantita en sendanka grundo, necesas, ke ĝin ĉirkaŭu fiherboj kaj ĝiaj fifruktoj. Sed ankaŭ en ĉiu tago oni preparas la grundon, elŝiras kaj fortranĉas la malbonajn branĉojn ; la grundo nepercepteble riĉiĝas, kaj kiam la vojaĝanto, laca de vivbataloj, vidos la abundon kaj pacon en la ombro de malvarmeta oazo, tiam li tuj venos por sensoifigi sin, sekigi sian ŝvitadon, en regno malrapide, saĝe preparita ; tie la reĝo estas Dio, tiu grandanima donanto, tiu justa juĝanto, kiu bone scias, ke la irenda vojo estas dolora, sed fekunda ; peniga, sed necesa ; Spirito formita en lernejo de laboro eliras pli forta kaj pli kapabla por grandaj aferoj. Al senfortiĝantoj Li diras : kuraĝon ; kaj kiel plej superan esperon, Li lasas, eĉ al plej sendankaj, ke ili duonvidu alvenpunkton, savan punkton, vojon markitan per reenkarniĝoj.

²⁶ Mara molusco, kiu boras galeriojn en subakva ligno, el kiu ĝi sin nutras, kaŭzante damaĝon al lignaj akvoveturiloj, digoj kaj al enŝipejoj kaj kajoj el tiu materialo. – *Noto de Evandro Noletto Bezerra en sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

Priridu vanajn deklamadojn: lasu paroli la disidentojn, bruadi tiujn, kiuj ne povas konsoliĝi, ke ili ne estas la unualokaj ; tiu tuta eta bruo ne malhelpas, ke Spiritismo nepre iru sian vojon ; ĝi estas veraĵo, kaj kiel rivero, ĉia veraĵo devas iri sian vojon.

La 16-an de aŭgusto 1867
(Pariza Societo. Mediumo, S-ro M...en stato somnambula)
Spiritismaj publikaĵoj

Noto. – S-ro L... estis tiam anoncinta, ke li sin proponas por produkti spiritismajn verkojn, kiujn li vendos je eksterordinare malaltaj prezoj. Pri tio S-ro Morin diris la jenon dum somnambula stato.

La spiritistoj estas nuntempe multenombraj, sed multaj ankoraŭ ne komprenas la celon eminente moraligan kaj emancipan de Spiritismo. La nukleo, kiu ĉiam sekvis la bonan vojon, plu marŝas, malrapide sed sekure ; ĝi malproksimiĝas de ĉiaj antaŭjuĝaj partioj, okupiĝante pri tiuj, kiujn ĝi lasas survoje.

Bedaŭrinde, eĉ inter la membroj, kiuj formas tiun fidelan nukleon, estas tiuj, kiuj rigardas ĉion bona, tiel ĉe aliaj kiel ĉe si mem, kaj facile, bonvoleme, lasas sin preni de la ŝajnoj kaj stulte alkroĉi al la gluo de siaj malamikoj, de iu persono, kiu asertas senposediĝi, doni sian sangon, sian havaĵon, sian inteligentecon por triumfo de la ideo. Nu ! relegu la komunikaĵon (komunikaĵon, kiun li ĵus verkis), kaj vi vidos, ke ĉe certaj individuoj tiaj oferoj ne povas fariĝi sen kaŝita penso.

Necesas malfidi ŝajnajn oferemojn kaj malavarecojn, same kiel veremon de homoj, kiuj diras, ke ili neniam mensogas.

Pretendi liveri varon je neeblaj prezoj sen perdo, estas negoca ruzaĵo ; fari ankoraŭ pli: doni senpage, laŭdire pro troa zorgemo, kvazaŭ premie, ĉiajn elementojn de subluma doktrino, tio estas la kulmino de hipokriteco. Spiritistoj, gardu vin !

La 16-an de aŭgusto 1867
(Pariza Societo, Mediumo S-ro D...)
Eventoj

13. – La socio ĝenerale, aŭ, pli bone dirite, la kolekto de estuloj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, kiuj konsistigas la fluktuan loĝantaron de iu mondo, unuvorte la homaro, estas nenio alia ol granda kolektiva

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

infano, kiu, same kiel ĉiu estulo vivanta, trapasas ĉiujn fazojn, kiuj sinsekvas ekde la naskiĝo, ĝis plej alta aĝo ; kaj same kiel la disvolviĝon de la individuo akompanas certaj psikaj kaj intelektaj perturboj aparte propraj al certaj vivperiodoj, ankaŭ la homaro trapasas siajn kresko-krizojn, siajn malordojn moralajn kaj intelektajn. Al vi estas donite trapasi unu el tiuj grandaj epokoj, kiuj finas unu periodon kaj komencas alian, kiun vi havos la okazon vidi. Ĉar vi partoprenas aferojn de la pasinteco kaj aferojn de la estonteco, sistemojn, kiuj ruiniĝas kaj veraĵojn, kiuj ekstariĝas, atentu, miaj amikoj, ke vi vin tenu ĉe la firma flanko, de progreso kaj de logiko, se vi ne volas esti fortrenataj sendirekte ; kaj forlasu luksajn palacojn laŭ ekstera aspekto, sed fundamente malfirmajn, kaj kiuj baldaŭ entombigos sub siaj ruinoj la malfeliĉulojn, kiuj malsaĝe ne volos el ili foriri, malgraŭ ĉiaspecaj avertoj al ili donitaj.

Ĉiuj fruntoj ombriĝas, kaj la ŝajna trankvileco, kiun vi ĝuas, taŭgas nur por akumuli pli grandan nombron da detruaj elementoj.

Kelkfoje, antaŭ la tempesto, kiu detruas la fruktojn de ŝvitado dum unu jaro, aperas antaŭavertoj, kiuj permesas necesajn singardojn, por laŭeble eviti plenan detruon. Ĉi-foje ne estos tiel. La ombra ĉielo ŝajnos heliĝi ; nuboj forŝvebos ; poste ĉiuj furioj, longe kunpremitaj, subite elĉeniĝos kun senekzempla violento.

Ve al tiuj, kiuj ne preparis al si ŝirmejon ! Ve al la fanfaronuloj, kiuj alfrontos la danĝeron kun brakoj senarmaj kaj nekovrita brusto ! Ve al tiuj, kiuj alfrontos la danĝeron kun kaliko en la mano ! Kia terura elreviĝo ilin atendas ! Antaŭ ol la kaliko en ilia mano tuŝos iliajn lipojn, ili estos frapitaj !

Al la laboro do, Spiritistoj, kaj ne forgesu, ke vi devas esti plej prudentaj kaj plej antaŭvidemaj. Vi havas ŝildon, sciu uzi ĝin ; savan ankron, ne flanklasu ĝin.

La 9-an de septembro 1867
(*Ségur, intima Seanco. Mediumo S-ro D...*)
Mia nova verko pri la Genezo.
(*Spontana komuniko.*)

Unue du vortoj pri la verko, kiu estas preparata. Kiel ni diris plurfoje, urĝas plenumi ĝin senprokraste kaj laŭeble rapidigi ĝian publikigon. Necesas, ke la unua impresado estu jam trafinta la spiritojn, kiam eksplodos la eŭropa konflikto ; se ĝi malfruiĝus, brutalaj okazaĵoj povus deturni la

atenton for de verkoj pure filozofiaj ; kaj ĉar tiu verko estas destinita ludi sian rolon en la preparata ellaboraĵo, nepre necesas, ke ĝi estu prezentata en oportuna tempo. Tamen por tio oni devus ne limigi ties elvolviĝojn. Donu al ĝi la tutan dezirindan amplekson ; ĉiu eta parto havas sian pezon sur la pesilo de agado; en tempo tiel decida kiel la nuna, necesas nenion neglekti, tiel en la materia, kiel ankaŭ en la morala ordo.

Mi estas persone kontenta pri la laboro, sed mia opinio estas mal-multe valora kompare kun la kontenteco de tiuj, kiujn ĝi estas destinita transformi. Plej feliĉigas min la konsekvencoj ĉe homamasoj, same en la spaco kiel sur la tero.

Demando – Se nenio malhelpos, la verko povos aperi en decembro. Ĉu vi antaŭvidas obstaklojn ?

Respondo – Mi antaŭvidas nenian nesupereblan malfacilaĵon ; via sanstato estus la ĉefa, jen kial ni senĉese konsilas al vi ne malzorgi ĝin. Koncerne eksterajn obstaklojn, neniun seriozan mi antaŭsentas.

D-ro D.

La 22-an de februaro 1868
(Privata komunikado. Mediumo S-ro D...)
La Genezo

Sekve de komunikado de D-ro Demeure, per kiu li donis al mi tre saĝajn konsilojn pri ŝanĝoj en la libro pri la Genezo, okaze de ties represo, pri kiu li instigis min okupiĝi senprokraste, mi diris al li :

La vendado, ĝis nun tiel rapida, sendube malintensiĝos ; tio estas efiko de la unua momento. Mi do pensas, ke la 4^a kaj 5^a eldonoj elĉerpiĝos post pli longa tempo. Tamen, ĉar necesas certa tempo por la revizio kaj represo, konvenas sin antaŭgardi de surprizo.

Ĉu vi povus diri al mi proksimume kiom da tempo mi disponas por konsekvence agadi ?

Respondo – Tiu revizio estas serioza laboro kaj mi konsilas al vi ne tro longe atendi por entrepreni ĝin : estos pli bone se vi anticipu pretigos ĝin, ol se oni devus vin atendi. Precipe ne tro rapidu. Malgraŭ la ŝajna kontraŭdiro de miaj vortoj, vi sendube min komprenas. Ek al la laboro senprokraste sed al ĝi ne vin fordonu senripoze kaj tro longe. Ne hastu; la ideoj estos pli netaj, kaj la korpo havos gajnon, ke ĝi ne tro laciĝos.

Ekstraktoj, in extenso, el la libro de Antaŭvidoj koncernantaj Spiritismon

Necesas tamen, ke vi kalkulu kun rapida vendado. Kiam ni diris ke tiu libro estos sukceso inter viaj sukcesoj, ni aludis al sukceso samtempe filozofia kaj materia. Kiel vi vidas, niaj antaŭvidoj estis ĝustaj. Estu preta ĉiumomente; ĉio okazos pli rapide ol vi supozas .

Noto – Per komuniko de la 18-a de decembro, estis dirite : *Ĝi certe estos sukceso inter viaj sukcesoj*. Estas rimarkinde, ke post du monatoj unu alia Spirito ripetis precize la samajn vortojn, dirante : *Kiam NI diris*, k.t.p.. Tiu NI pruvas, ke la Spiritoj agadas enkorde, kaj ke ofte unu sola parolas nome de pluraj.

Parizo, la 23-an de februaro 1868
(Intima komuniko donita al S-ro C..., mediumo.)
Okazaĵoj

Okupiĝu ekde nun pri la laboro, kiun vi skizis pri la manieroj esti iam utila al viaj kredfratoj kaj servi al la afero de la doktrino, ĉar eble la okazaĵoj, kiuj malvolviĝos, ne lasos al vi sufiĉe da libera tempo por al ĝi fordoniĝi.

Tiuj okazaĵoj mem estigos fazojn, dum kiuj la homa penso povos produktiĝi kun absoluta libereco. Dum tiuj momentoj delirantaj cerboj, sen ĝusta direkto, naskos tiajn absurdaĵojn, ke sciigo pri la proksima apero de la apokalipsa besto neniun timigus kaj nerimarkite pasus. La gazetaro vomos ĉiajn homajn frenezaĵojn ĝis elĉerpiĝo de la pasioj, kiujn ĝi kreos.

Tiu tempo estos favora al spiritistoj. Ili organiziĝos, preparos sian materialojn kaj siajn armilojn. Neniu pensos ilin malkvietigi, ĉar ili neniun ĝenos. Ili solaj estos disĉiploj de la Spirito, kaj la aliaj estos disĉiploj de la materio.

Parizo, la 4-an de julio 1868
(Mediumo S-ro D...)
Miaj personaj laboroj. Diversaj konsiloj

Viaj personaj laboroj estas sur bona vojo ; daŭrigu la represadon de via lasta verko; faru vian ĝeneralan tabelon por la jarfino, ĝi estas utila afero, kaj lasu la ceteron por ni.

La impulso kaŭzita de La Genezo apenaŭ komenciĝis kaj jen elementoj skuitaj de ĝia apero viciĝos baldaŭ sub via standardo ; aliaj

seriozaj verkoj aperos ankoraŭ por finklarigi la homan penson pri la nova doktrino.

Mi ankaŭ aplaudas la publikigon de la leteroj de Lavater ; ĝi estas malgrandaĵo destinita produkti grandajn efikojn. Resume, la jaro estos fruktodona por ĉiuj amikoj de racia, liberala progreso.

Mi ankaŭ tute konsentas pri la publikigo de la resumo, kiun vi proponis fari en formo de katekizilo aŭ manlibro, sed mi ankaŭ opinias, ke vi devas ĝin zorge kontroli. Antaŭ ol publikigi ĝin, ne forgesu konsulti min pri la titolo, eble mi havos bonan ideon por doni al vi, kies vortigo dependos de la jam efektivigintaj okazaĵoj.

Kiam ni konsilis al vi lastatempe, ke vi ne tro longe atendu por okupiĝi pri la rearanĝo de La Genezo, ni diris al vi, ke necesas meti aldonadojn al diversaj lokoj, plenigi iujn mankojn kaj kondensi la enhavon, por ne pligrandigi la volumon.

Niaj observoj ne estis vanaj, kaj ni estos feliĉaj kunlabori por la rearanĝo de tiu verko, same kiel nin gojigis esti kontribuintaj por ties farado.

Mi admonas vin hodiaŭ atente revidi precipe la unuajn ĉapitrojn, kies ĉiuj ideoj estas bonegaj, enhavas nenion kontraŭan al la vero, sed kies certaj esprimoj povus konduki al erara interpreto. Krom tiuj reĝustigoj, kiujn mi konsilas al vi nepre ne preteratenti, ĉar oni celas vortojn, kiam oni ne povas ataki ideojn, nenion alian mi rekomendas al vi pri la afero. Mi konsilas, ekzemple, ke vi ne perdu tempon ; preferindas, ke la volumoj atendu la publikon, ol ke ili manku. Nenio pli malvalorigas verkon ol nedisponibleco por vendado. Senpacienca eldonisto, kiu ne povas plenumi la mendojn, kiujn oni al li faras, kaj al kiu mankas okazo vendi, malentuziasmiĝas pri la verkoj de neantaŭzorgema aŭtoro ; la publiko laciĝas atendadi kaj la kaŭzita impresio malfacile forviŝiĝas.

Aliflanke, ne estas malbone, ke vi havu iom da spiritlibereco por eviti eventualaĵojn, kiuj povas aperi ĉirkaŭ vi kaj atenti pri apartaj studoj, kiuj, laŭ la okazaĵoj, povas esti nun levitaj aŭ lasitaj por pli oportuna tempo.

Tenu vin do preta por ĉio ; malembarasiĝu de ĉia obstaklo, ĉu por vin dediĉi al ia speciala laboro, se ĝenerala trankvileco tion permesas, ĉu por esti preparita por ĉiaspeca okazaĵo, se neantaŭvideblaj komplikaĵoj postulos de via flanko subitan decidon. Baldaŭ alvenos la proksima jaro ; necesas do, je la fino de ĉi tiu jaro, fari lastan tuŝon sur la unuan parton de la spiritisma verkaro, por havi liberan kampon por fini la taskon, kiu koncernas la estontecon.



Ekster Karitato, nenia savo

Tiuj principoj, por mi, ne estas nur teoriaj, mi ilin praktikas ; mi bonfaras laŭ tio, kiel permesas mia pozicio ; mi faras servojn, kiam mi povas ; ĉu iam malriĉuloj estis forpuŝataj for de mia domo, aŭ de mi krude traktataj ? ĉu ili ne estis de mi ĉiam akceptataj kun sama bonvolemo ? ĉu mi iam bedaŭris miajn paŝojn kaj klopodojn por servi ? ĉu familestroj ne eliris el arestejo pro miaj klopodoj ? Certe ne koncernas min inventari la bonon, kiun mi povis fari ; sed en momento, kiam oni ŝajne ĉion forgesas, al mi estas permesate, mi pensas, rememorigi, ke mia konscienco diras al mi, ke mi fiagis kontraŭ neniun, ke mi faris ĉian bonon laŭ mia povo, kaj mi tiel agis, mi ripetas, sen priokupiĝi de ajna opinio; ĉirilate mia konscienco estas trankvila, kaj iuj sendankaj agoj, kiujn mi plurfoje ricevis, ne estus motivo por ĉesigi la praktikadon de bono; sendankemo estas unu el la difektoj de la homaro, kaj ĉar neniun el ni estas neriproĉebla, necesas senkulpigi aliajn por ke oni senkulpigu nin mem, por ke oni povu diri, kiel Jesuo Kristo : « Kiu estas senpeka, tiu ĵetu unuan ŝtonon ». Mi do plu bonfaros laŭ miaj eblecoj, eĉ al miaj malamikoj, ĉar malamo ne blindigas min ; kaj mi ĉiam etendos al ili mian manon por forpreni ilin el profundeĝaĵoj, se prezentiĝos okazo.

Jen kiel mi komprenas la kristanan karitaton ; mi komprenas religion, kiu ordonas redoni bonon kontraŭ malbono, kaj des pli prave, redoni bonon kontraŭ bono. Sed mi tute ne komprenus tian, kiu rekomendus redoni malbonon kontraŭ malbono. (Intimaj pensoj de Allan Kardec, dokumento trovita inter liaj paperoj.)



Projekto – 1868

Unu el la plej grandaj baroj, kiuj povus embarasi la disvastigadon de la doktrino estus manko de unueco ; la sola maniero tion eviti, se ne nuntempe, almenaŭ estontece, estas ĝin formuli en ĉiuj ĝiaj partoj, eĉ en ĝiaj plej etaj detaloj, kun tia precizeco kaj klareco, ke ĉia diverĝa interpreto estu neebla.

Se la doktrino de la Kristo estigis tiom da malkonsentoj, se ĝi estas ankoraŭ hodiaŭ tiel miskomprenata kaj tiel diverse praktikata, tion kaŭzis la fakto, ke la Kristo limiĝis al parola instruado, kaj ke liaj apostoloj mem transdonis nur ĝeneralajn principojn, kiujn ĉiu interpretis laŭ siaj ideoj aŭ interesoj. Se li formulus la organizon de Kristana Eklezio kun precizeco de leĝo aŭ de regularo, senkonteste tio preventus plej multajn religiajn skismojn kaj kverelojn, krom ankaŭ ekspluatadon faritan de religio profite al personaj ambicioj. Rezultis el tio, ke se Kristanismo estis por kelkaj klarmensaj homoj motivon por serioza morala reformo, ĝi tamen, por multaj, estis, kaj ankoraŭ estas, nenio alia ol objekto de blinda, fanatika kredo, rezulto, kiu, ĉe granda nombro da homoj, naskis dubon kaj absolutan nekredemon.

Nur Spiritismo, bone komprenata kaj bone praktikata, povas reĝustigi tian situacion kaj fariĝi, kiel diris la Spiritoj, granda levilo por transformiĝo de la homaro. Sperto devas nin klarigi pri la irenda vojo ; montrante al ni la maloportunaĵojn de la pasinteco, ĝi klare diras al ni, ke la sola rimedo por eviti tion estontece estas fundamenti Spiritismon sur solidajn bazojn de pozitiva doktrino, kiu lasu nenion al arbitraj interpretoj. Skismoj, kiuj eble stariĝos, per si mem kunfandiĝos en la ĉefa unueco, kiu establiĝos sur plej raciaj bazoj, se tiaj bazoj estas klare difinitaj, kaj ne lasitaj en

malprecizeco. Rezultas ankoraŭ el tiaj konsideroj, ke tiu irado, prudente kondukata, estas la plej potenca rimedo por batali kontraŭ antagonistoj de la spiritisma doktrino. Ĉiaj sofismoj disrompiĝos kontraŭ principoj, ĉe kiuj la sana racio nenion trovus malaprobinda.

Du elementoj certe kontribuos por la progreso de Spiritismo, nome : teoria starigo de la doktrino kaj rimedoj por ĝin popularigi. La disvolviĝo, kiun ĝi ĉiutage montras, multobligas niajn rilatojn, kiuj nepre kreskos per la elano, kiun donos la nova eldono de *La Libro de la Spiritoj* kaj la propagandado, kiun oni faros tiucele. Por uzi tiajn rilatojn per profitodona maniero, se post konsistigo de la teorio, mi devus helpi ĝian enkondukon, tiam necesus, ke krom la publikigo de miaj verkoj, mi ricevus rimedojn por pli rekta agado ; aŭ, mi pensas, ke estus utile, ke tiu, kiu fondis la teorion povus samtempe doni impulson, ĉar tiel estiĝus pli da unueco. Koncerne tion, la societo nepre plenumos grandan influon, kiel la Spiritoj mem diris, sed ĝia agado ne estos efektiva, se ĝi ne funkcios kiel centro kaj kuniga punkto, el kiu eliru instruado forte influa sur la publikan opinion. Por tio, necesos pli forta organizo kaj elementoj, kiujn ĝi ja ne posedas. En nia jarcento, kaj se oni konsideras niajn morojn, financaj rimedoj estas la grandaj motoroj de ĉio, kiam ili estas prudente utiligitaj. Je la hipotezo, ke tiaj rimedoj, iel aŭ aliel, venus al mi, jen estas la plano, kiun mi proponus, kaj kies plenumado estus proporcia al la amplekso de la rimedoj kaj subordigita konsiloj de la Spiritoj.

Centra sidejo

Plej urĝa fazo estus disponi pri loko en konvena situo kaj aranĝita por kunsidoj kaj akceptoj. Sen aldono de senutila lukso, ja neakceptebla, kiu estus misloka, necesus tamen, ke nenio tie elmontru mizeron sed ja sin prezentu sufiĉe digne por ke altrangaj homoj povu tien veni, sen sento de malaltiĝo. Krom mia privata loĝejo, ĝi devus enhavi :

1° Unu grandan salonon por seancoj de la societo kaj grandaj kunsidoj ;

2° Akceptejon ;

3° Ĉambron por intimaj elvokoj, iaspecan sanktejon, kiun nenia fremda okupo devus profani ;

4° Oficejon por la Revuo, por arkivoj kaj aferoj de la societo ;

Ĉio aranĝita kaj organizita en komforta, konvena maniero por ĝia celo.

Oni kreus bibliotekon kun ĉiaj verkoj kaj periodaĵoj francaj kaj fremdlandaj, antikvaj kaj modernaj, rilataj al Spiritismo.

La akceptejo malfermiĝus ĉiutage, je fiksjaj horoj, por la membroj de la societo, kiuj povus tien veni por libere konversacii, legi ĵurnalojn kaj konsulti la arkivojn kaj la bibliotekon. Fremdlandaj adeptoj, pasloĝante en Parizo kaj prezentite de iu membro, tie estus akceptataj.

Regulan korespondadon oni starigus kun la diversaj centroj en Francujo kaj eksterlande.

Ofican sekretariojn kaj helpanton oni dungus por la sidejo.

Spiritisma Instruado

Regulan kurson pri Spiritismo oni disponigus, kun la celo disvolvi la principojn de la scienco kaj disvastigi la inklinton al seriozaj studoj. Tia kurso havus la avantaĝon starigi unuecon de principoj, fari klarmensajn adeptojn, kapablajn disvastigi la spiritismajn ideojn kaj disvolvi grandan nombron da mediumoj. Mi rigardas tian kurson kiel ion, kio povas plenumi plej gravan influon sur la estontecon de Spiritismo kaj sur ties konsekvencojn.

Propagando

Oni pli multe disvolvus la Revuon, ĉu ĝin pligrandigante, ĉu oftigante ĝian publikigon. per pli akurata periodeco. Salajrata redaktanto estus dungita.

Largaskala propagando, per plej konataj ĵurnaloj, portus en la tutan mondon kaj ĝis plej izolitaj lokoj scion pri la spiritismaj ideoj, naskus la deziron enprofundiĝi en ilin, kaj per multobligado de adeptoj silentigus la kontraŭulojn, kiuj tuj devus cedi antaŭ la kreskado de la ĝenerala opinio.

Vojaĝoj

Du aŭ tri monatojn en ĉiu jaro oni dediĉus al vojaĝoj por viziti diversajn centrojn kaj doni al ili bonan direkton.

Se la rimedoj tion permesus, fonduson oni starigus por salajri certan nombron da misiaj vojaĝantoj, kleraj kaj talentaj, ŝarĝitaj per la tasko disvastigi la doktrinon.

Kompleta organizo kaj asistado de pagataj helpantoj, kun kiuj mi povus kalkuli, kun ŝparo de amaso da materialaj okupoj kaj zorgoj, lasus

al mi la necesan, liberan tempon por aktivigi laborojn, kiujn mi ankoraŭ devas fari, kaj kiujn la nuna stato de la aferoj ne permesas al mi plenumi tiel akurate kiel necesus, ĉar mankas al mi materia tempo kaj la korpaj fortoj jam ne sufiĉas.

Se iam estus al mi donite realigi tiun projekton, por kies plenumo necesus uzi la saman prudenton, kiun mi uzis pasintatempe, tiam sendube kelkaj jaroj sufiĉus por antaŭenigi la doktrinon je kelkaj jarcentoj.

La Konstitucion de Spiritismo Allan Kardec enmetis en la *Revuon* en decembro 1868, sed sen la komentoj, kiujn li aldoni antaŭ sia morto, kaj kiujn ni laŭtekste reproduktas ; la morto de la korpo alvenis kiam li preparis sin por skizi la *Fundamentajn principojn de la spiritisma doktrino rekonatajn kiel akiritaj veraĵoj*, kion niaj legantoj bedaŭros, kiel ni, ĉar tiuj principoj kompletigus lian konstitucion per logikaj kaj saĝaj rimarkoj; tiu estas la lasta manuskripto de la Majstro, kaj ni legis ĝin respektoplene.



Konstitucio de Spiritismo

Elmonro de motivoj I - Enkondukaj konsideroj

Spiritismo havis, kiel ĉio, sian periodon de ellaboriĝo, kaj dum ĉiuj demandoj al ĝi ligitaj, ĉefaj aŭ akcesoraj, ne estas solvitaj, ĝi nur povas doni nekompletajn rezultatojn ; oni duonvidis la celon, antaŭsentis la konsekvencojn, sed nur en svaga maniero. El la necerteco pri ankoraŭ ne determinitaj punktoj nepre devus naskiĝi diverĝoj pri la maniero ilin konsideri ; la unueco nur povus esti verko de l' tempo; ĝi iom post iom fariĝis, laŭgrade kiel pliklariĝis la principoj. Nur kiam la doktrino en-korpigos ĉiujn partojn, kiujn ĝi devas enteni, tiam ĝi formos harmonian tutajon, kaj nur tiam oni povos juĝi tion, kio ververe estas Spiritismo.

Dum Spiritismo estis nenio alia ol filozofia opinio, ĝi nur povis havi inter la adeptoj la naturan simpation kaŭzitan de la komuneco de ideoj, sed nenia serioza ligo povus ekzisti, pro manko de klare difinita programo. Tiu certe estas la ĉefa kaŭzo de manko de unueco kaj de stabileco inter la grupoj kaj formitaj societoj. Tial ni konstante, per ĉiuj niaj fortoj, deturnis la Spiritistojn de antaŭtempa fondo de speciala institucio, surbaze de la doktrino, antaŭ ol ĝi ekstaris sur solidaj fundamentoj ; tio estus sin elmeti al neeviteblaj fiaskoj, kies rezulto estus katastrofa pro la impreso, kiun ĝi kaŭzus sur la publiko kaj pro la senkuraĝeco, en kiun ĝi trenus la adeptojn. Tiaj fiaskoj eble malfruigus je unu jarcento la definitivan progreson de la doktrino, al kiu oni atribuis malsukceson, fakte rezultantan de neantaŭvidemo. Pro nescio atendi por ĝustatempe alveni, la hastemuloj kaj senpacienuloj ĉiam kompromitis plej bonajn aferojn.²⁷

²⁷ Por pli vasta disvolvo de la demando pri la spiritismaj institucioj, vidu la *Spiritisman Revuon*, Julia

Oni devas peti de io nur, kion ĝi povas doni, laŭgrade kiel ĝi sin metas en produktivan staton; oni ne povas postuli de infano, kion oni povas esperi de plenkreskulo nek de juna, ĵus plantita arbo, kion ĝi produktos, kiam ĝi havos sian tutan forton. Spiritismo, sur la vojo de ellaboriĝo, nur povus doni individuajn rezultojn ; kolektivaj, ĝeneralaj rezultoj estos fruktoj de kompleta Spiritismo, kiu kontinue disvolviĝos.

Kvankam Spiritismo ankoraŭ ne diris lastan vorton pri ĉiuj punktoj, tamen ĝi alproksimiĝas al sia komplemento, kaj venis la momento doni al ĝi fortan, longedaŭran fundamenton, tamen kapablan akcepti ĉiajn elvolviĝojn, kiujn postaj cirkonstancoj enkondukos, kaj doni kompletan sekurecon al tiuj, kiuj demandas, kiu prenos la bridon post tiu homo, kiu kondukis ties unuajn paŝojn.

La doktrino estas sendube nedetruenda, ĉar ĝi staras sur leĝoj de naturo, kaj, pli bone ol iu alia, ĝi respondas al la pravaj aspiroj de homoj ; tamen, ĝia disvastigo kaj ĝia definitiva firmiĝo povas antaŭeniri aŭ postresti pro cirkonstancoj, el kiuj unuj estas submetataj al la ĝenerala irado de la afero, dum aliaj estas esence propraj al la doktrino mem, al ties konsisto kaj al ties organizo.

Kvankam la demando pri esenco estas entute unuaranga kaj fine ĉiam regas, tamen la demando pri formo havas ĉi tie plej decidan gravecon ; ĝi eĉ povus pormomente superregi kaj alporti barojn kaj prokrastojn, laŭ la maniero kiel ĝi estos solvita.

Ni do farus ion nekompletan kaj lasus grandajn embarasojn por la estonteco, se ni ne antaŭvidus la malfacilaĵojn, kiu eble aperos. Celante tion eviti, ni ellaboris organizan planon, por kiu ni profitis la pasintajn spertojn, por eviti la rifojn, kontraŭ kiuj frapiĝis plej multaj doktrinoj, kiuj aperis en la mondo.

La planon ĉi-suban ni delonge konceptis, ĉar ni estas ĉiam okupitaj pri la estonteco de Spiritismo ; ni antaŭsentigis ĝin en diversaj okazoj - malprecize, estas vero - sed sufiĉe por montri, ke ĝi ne estas hodiaŭ ia nova koncepto, kaj ke plene dediĉante nin al la teoria parto de la verko, ni tute ne neglektis ĝian praktikan flankon.

II - Pri skismoj

Demando, kiu tuj prezentiĝas al la penso estas tiu pri skismoj, kiuj eble naskiĝos en la sino de la doktrino ; ĉu Spiritismo estas antaŭŝirmita kontraŭ tio ?

Ne, certe, ĉar ĉefe en la komenco, ĝi devos batali kontraŭ personaj ideoj, ĉiam absolutaj, obstinaj, malrapide kuniĝemaj al aliulaj ideoj, kaj kontraŭ la ambicio de tiuj, kiuj volas ligi sian nomon al iu ajn ennovaĵo ; kiuj kreas novaĵojn sole nur por povi diri, ke ili nek pensas nek agas kiel aliaj; aŭ ĉar ilia memamo suferas, ke ili okupas nur duarangan pozicion.

Se Spiritismo ne povas eviti homajn malfortecojn, pri kiuj necesas ĉiam kalkuli, tamen ĝi povas haltigi ties konsekvencojn, kio ja estas esenca.

Estas rimarkinde, ke la multenombraj diverĝantaj sistemoj, kiuj aperis en la komenco de Spiritismo, pri la maniero klarigi la faktojn, malaperis, laŭgrade kiel la doktrino kompletiĝis per observado kaj per racia teorio ; nuntempe, tiaj unuaj sistemoj apenaŭ trovas ankoraŭ iujn maloftajn anojn. Tio estas evidenta fakto, pri kiu oni povas konkludi, ke la lastaj diverĝoj malaperos ĉe la kompleta klarigo de ĉiuj partoj de la doktrino ; sed ĉiam ekzistos tiuj partiaj skismanoj inklinaj, pro unu aŭ alia motivo, sin apartigi; kontraŭ ilia pretendo ja necesas sin antaŭgardi.

Por garantii unuecon en estonteco, unu kondiĉo estas nepre necesa, nome ke ĉiuj partoj de la tuta doktrino estu precize, klare determinitaj, sen io ajn nebula ; por tio, ni faris, ke niaj verkoj povu doni nenian lokon al kontraŭdira interpreto, kaj ni klopodos, ke tiel estu, ĉiam. Kiam oni rekte, senhezite diros, ke du plus du faras kvar, tiam neniu povos pretendi, ke du plus du faras kvin. Eble do formiĝos *flanke* de la doktrino sektoj, kiuj ne akceptos ties principojn, aŭ ne ĉiujn principojn, sed ili formiĝos ne en la doktrino, pro interpreto de la teksto, kiel multenombre formiĝis sektoj pri la senco de la vortoj mem de la Evangelio. Jen do la unua gravega punkto.

La dua punkto estas, ke oni ne eliru el la kampo de praktikaj ideoj. Se estas vere, ke nuntempa utopio ofte estas morgaŭa veraĵo, tamen ni lasu por la morgaŭo la taskon realigi la nunan utopion, sed ni ne embarasu la doktrinon per principoj, kiujn pozitivaj homoj konsiderus kiel ĥimerojn kaj pro tio ĝin repuŝus.

Fine, la tria punkto estas konsekvenco de la esence progresema karaktero de la doktrino. El tio, ke ĝi ne sin lulas en nerealigneblaj revoj, ne sekvas, ke ĝi rigidiĝas en la nuno. Ekskluzive apogita sur naturaj leĝoj, ĝi ne povas varii ekster tiaj leĝoj, sed se nova leĝo estas eltrovita, tiam ĝi

devas alkonformiĝi ; ĝi devas ne fermi la pordon al ia ajn progreso, male ĝi memmortigos : ensorbinte ĉiajn ideojn rekonitajn kiel ĝustaj ideoj, kiaj ajn ili estu, ĉu fizikaj, ĉu metafizikaj, ĝi neniam estos flankenmetata, kaj tio estas unu el la ĉefaj garantioj por ĝia kontinueco.

Se do sekto formiĝas ĝiaflanke, surbaze aŭ ne de la principoj de Spiritismo, tiam el du aferoj unu okazos : aŭ tiu sekto estos en vero, aŭ ne ; se ĝi ne estos, ĝi falos per si mem sub la aŭtoritato de la prudento kaj de la komuna saĝo, kiel jam falis tiom da aliaj tra la jarcentoj; se ĝiaj ideoj estos ĝustaj, eĉ se nur pri unu punkto, la doktrino, kiu serĉas bonon kaj veron ĉie, kie ili troviĝas, ilin asimilos, tiel ke anstataŭ esti ensorbata, ĝi mem ensorbos.

Se iuj el ĝiaj adeptoj ĝin forlasos, tio signifas, ke ili rigardos sin kapablaj fari ion pli bona ; se ili efektive faros ion pli bonan, ĝi imitos ilin ; se ili faros pli da bono, ĝi klopodos fari tiom same, se tio estas ebla; se ili faros ion malbonan, ĝi lasos, ke ili tion faru, kun la certeco, ke pli aŭ malpli frue bono superas malbonon, kaj vero falson. Jen estas la sola batalo, en kiun ĝi sin engaĝos.

Ni aldonu, ke toleremo, sekvo de karitato, kiu estas la bazo de la spiritisma moralo, devigas respekti ĉiajn kredojn. Volante esti libere akceptata, pro konvinkiteco kaj ne perforte, proklamante liberecon de konscienco kiel naturan, nenuligeblan rajton, ĝi diras : *Se mi pravas, la aliaj fine pensos kiel mi ; se mi eraras, mi fine pensos kiel la aliaj.* Pro tiaj principoj, sur neniun ĵetante ŝtonon, ĝi donos neniun pretekston por kontraŭagoj, kaj lasos al disidentoj la tutan respondecon pri iliaj paroloj kaj agoj.

La programo de la doktrino ne estos do senvaria, krom ĉe principoj, kiuj atingis staton de konstatitaj veraĵoj ; koncerne la aliajn, ĝi konsideros ilin, kiel oni ĉiam faris, kiel hipotezojn, ĝis konfirmiĝo. Se montriĝos, ke ĝi estas malĝusta ĉe unu punkto, tiam ĝi ŝanĝiĝos ĉe tiu punkto.

Absoluta vero estas eterna, kaj, ĝuste pro tio, senvaria ; sed kiu rajtas fieri, ke li ĝin posedas tutan ? En la neperfekta stato de niaj konoj, kio ŝajnas al ni malvera hodiaŭ eble montriĝos vera morgaŭ, sekve de malkovro de novaj leĝoj, kaj tiel ĉe morala kiel ĉe fizika ordo. Kontraŭ tia ebleco la doktrino devas esti ĉiam preparata. La principo de progreso, kiun ĝi enskribis en sian kodon, estos garantio de ĝia daŭrado, kaj ĝia unueco konserviĝos ĝuste pro tio, ke ĝi ne sidas sur la principo de senmoveco.

Senmoveco, anstataŭ forto, fariĝas kaŭzo de malforteco kaj de ruiniĝo al tiu ne sekvanta la ĝeneralan movadon; ĝi rompas la unuecon,

ĉar tiuj volantaj antaŭeniri disiĝas de tiuj, kiuj obstinas postresti. Tamen, por sekvi la progresan movadon, necesas ĝin fari prudente kaj sin gardi kontraŭ submetiĝo al revoj, utopioj kaj sistemoj ; necesas ĝin fari ĝustatempe, nek tro frue, nek tro malfrue, kun plena scio pri la afero.

Oni komprenas, ke doktrino, kiu baziĝas sur tiaj fundamentoj, certe estas efektive forta ; ĝi defias ĉian konkuradon kaj nuligas la pretendojn de siaj konkurantoj.

Sperto, cetere, jam pravigis tian antaŭvidon. Irante tian vojon ekde sia origino, la doktrino daŭre antaŭeniradis, sed sen urĝo, ĉiam rigardante ĉu la grundo, kiun ĝi surpaŝas, estas firma, kaj mezurante siajn paŝojn laŭ la ĝenerala opinio. Ĝi faras kiel marveturanto, kiu ne iras sen sondilo enmane kaj sen konsultado al la ventoj.

III - La estro de Spiritismo

Sed kiu estos ŝarĝita per tenado de Spiritismo sur tiu vojo ? Kiu havos la libertempon kaj persistemon por sin fordoni al la senĉesa laboro, kiun postulas tia tasko ? Se Spiritismo estos lasita al si mem, sen gvidado, ĉu ne timindas, ke ĝi deflankiĝos de sia vojo ? ke malico, kiu ĝin ankoraŭ longe celos, ne klopodos al ĝi misformi la spiriton ? Jen estas efektive esence grava demando, kies solvo tre interesas la estontecon de la doktrino

La bezono de supera, centra direktado, vigla gardanto de la progresema unueco kaj de ĝeneralaj interesoj de la doktrino estas tiel evidenta, ke oni jam malkvietiĝas, ne vidante ĉe la horizonto ĝian kondukanton. Oni komprenas, ke sen ia morala aŭtoritatulo, kapabla centriĝi la laborojn, la studojn kaj la observojn, impulsi, stimuli zorgadon, defendi malfortulojn, subteni malfirmajn kuraĝojn, liveri konsilojn de sperto, fiksi opinion pri necertaj punktoj, Spiritismo riskus vagadi sendirekte. Necesas ne nur tia direktado, sed ankaŭ ke ĝi havu kondiĉojn de forto kaj stabileco sufiĉajn por alfronti la tempestojn.

Kiuj ne volas ajnan aŭtoritaton, ne komprenas la verajn interesojn de la doktrino ; se kelkaj pensas, ke ili povas malhavi ĉian direktadon, la plimultaj, kiuj ne kredas sin neeraremaj kaj ne fidas absolute siajn proprajn lumojn, tiuj sentas la bezonon de ia apogpunkto, de ia gvidanto, eĉ se nur por helpi ilin iradi pli firme kaj sekure. (Vidu la *Revuon* de aprilo 1866, p. 111 : *Sendependa Spiritismo*.)

Post rekono, ke necesas ia direktado, de kiu la estro ricevos siajn povojn ? Ĉu li estos akklamata de la tuta adeptaro ? Jen neefektivigebla

afero. Se li imponas per sia privata aŭtoritateco, unuj lin akceptos, aliaj lin repuŝos, kaj povas aperi dudek pretendantoj, kiuj levus standardon kontraŭ standardo; tio estus samtempe despotismo kaj anarkio. Tiel agus ambiciulo, kaj nenio estus malpli oportuna ol ambiciulo, do mem fierulo, por estri doktrinon bazitan sur abnegacio, sindediĉo, memforĝeso kaj humilemo ; lokita flanke de la fundamenta principo de la doktrino, li povus nur deturni ĝian spiriton. Jen kio nepre okazus, se oni ne agus efike, por haltigi tian malbonaĵon.

Ni tamen akceptu, ke iu homo havas ĉiajn kvalitojn necesajn por plenumi sian mandaton kaj ke li atingas la superan direktadon per ajna vojo : homoj sin sekvas kaj ne similas unu alian; post bona povas veni malbona ; kun la individuo povas ŝanĝiĝi la spirito de la direktado ; sen malbonaj intencoj, li povas havi pli aŭ malpli justajn vidpunktojn ; se li volas trudi siajn personajn ideojn, li povas devojigi la doktrinon, estigi malkonkordon, kaj la samaj malfacilaĵoj renoviĝos ĉe ĉiu ŝanĝo. Necesas ne forgesi, ke Spiritismo ankoraŭ ne posedas sian plenan forton ; laŭ la vidpunkto de organizado, ĝi estas ia infano, kiu apenaŭ ekmarŝas ; gravas do, precipe en la komenco, ĝin antaŭgardi kontraŭ la survojaj malfacilaĵoj.

Sed, oni diros, ĉu ne estos ĉe la kapo de Spiritismo unu el la Spiritoj anoncitantaj kiel partoprenontoj en la regenerado ? Tio estas probable : sed ĉar ili ne havos surfrunte ian signon por fariĝi rekonataj, ĉar ili imponos *nur per siaj agoj* kaj por la plimulto estos rekonataj kiel tiaj nur post sia morto, laŭ tio, kion ili faris dumvive ; ĉar cetere tio ne okazos eterne, tial necesas antaŭkalkuli ĉiujn eventualaĵojn. Oni scias, ke ilia misio estos multflanka, ke ili apartenos al ĉiuj gradoj de la skalo, troviĝos en diversaj branĉoj de la sociala ekonomio, kie ĉiu uzos sian influon, profite al la novaj ideoj, laŭ sia fako ; ĉiuj do laborados por la starigado de la doktrino, ĉi tie kaj tie; unuj kiel Ŝtatestroj, aliaj kiel leĝodonantoj, aliaj kiel juĝistoj, scienculoj, literaturistoj, oratoroj, industriistoj, k.t.p. ; ĉiu montros siajn kapablojn en sia kampo de agado, de la proleto ĝis la suvereno, sen io ajn, kio povus *distingi ilin de la ordinaraj homoj*. Se unu el ili devas partopreni en la direktado, li probable estos providence lokita en pozicio taŭga por tion atingi per leĝaj rimedoj ; ŝajne hazardaj cirkonstancoj lin tien kondukos, sen antaŭpensita decido liaflanke, eĉ sen lia konscio pri lia misio. (*Spiritisma Revuo : La mesioj de Spiritismo*, februaro-marto 1868, paĝoj 45 kaj 65.)

Ĉi-okaze la plej malbona estro estus tiu, kiu sin rigardus elektita de Dio. Ĉar ne estas racie akcepti, ke Dio konfidas tiajn misiojn al ambiciuloj

aŭ al fieruloj, karakterizaj virtoj de vera misiulo devas esti antaŭ ĉio ajn simpleco, humileco, modesteco, unuvorte plej kompleta neprofitemo, materiala kaj morala ; nu, la nura pretendo esti ia mesio konstituus la neadon de tiuj esencaj kvalitoj ; ĝi pruvus, ĉe tiu, kiu profitus de tia titolo, aŭ malsaĝan pretendemon, se li estas bonintenca, aŭ klaran ĉarlatanecon. Ne mankos intrigantoj, pseŭdospiritistoj, kiuj volos elstariĝi pro fiero, ambicio, monavido ; kaj aliaj, kiuj apogas sin al pretendaj revelacioj, per kiuj ili klopodas elstariĝi kaj fascini la fantaziemon de trokredemaj homoj. Necesas ankaŭ antaŭvidi, ke sub falsaj ŝajnoj, individuoj povus klopodi ekpreni la rudron, kun la kaŝita intenco dronigi la ŝipo per ĝia devojigo. Ĝi ne dronos, sed povus suferi damaĝajn malfruojn, kiujn oni devas eviti. Jen estas, senkonteste, la plej grandaj rifoj, kontraŭ kiuj Spiritismo devas sin gardi : ju pli firma ĝi fariĝos, des pli da kaptiloj ĝiaj malamikoj starigos kontraŭ ĝi.

Estas do devo de ĉiuj sinceraj Spiritistoj malsukcesigi ĉiajn manovrojn por intrigo, kiuj povus teksiĝi tiel en plej malgrandaj centroj, kiel ankaŭ en plej grandaj. Ili unue devos plej absolute forpuŝi tiun, kiu sin mem prezentus kiel mesio, ĉu kiel estro de Spiritismo, ĉu kiel simpla apostolo de la doktrino. Oni konas arbon laŭ ĝia frukto ; atendu do, ke la arbo donu sian frukton antaŭ ol juĝi, ĉu ĝi estas bona, kaj rigardu ankoraŭ, ĉu la fruktoj estas putraj. (La Evangelio laŭ Spiritismo, ĉap. n^o 9, *Karaktero de la vera profeto.*)

Oni proponis, ke la kandidatoj estu elektitaj de la Spiritoj mem, en ĉiu grupo aŭ societo spiritisma. Krom la fakto, ke ĉi rimedo ne antaŭforigus ĉiujn maloportunaĵojn, ĝi prezentus aliajn, proprajn al ĉi procedo, kiujn sperto jam elmontris kaj pri kiuj estus superflue ĉi tie rememorigi. Oni devas ne perdi el la vido, ke la misio de la Spiritoj estas nin instrui, nin plibonigi, sed ne substitui sin al la iniciativo de nia libervolo ; ili sugestas al ni pensojn, helpas nin per siaj konsiloj, ĉefe en tio koncernanta moralajn aferojn, sed ili lasas al nia juĝo la plenumadon de materialaj aferoj, tasko, kiun ili ne povas evitigi al ni. La homoj kontentiĝu ricevi la zorgadon kaj protektadon de bonaj Spiritoj, sed ili ne transŝarĝu sur ilin la respondecon, kiu koncernas al enkarniĝinto.

Tia rimedo cetere estigus pli da embarasoj ol oni supozas, pro la malfacileco partoprenigi ĉiujn grupojn en tia elekto ; ĝi estus komplikaĵo en la radoaroj, kaj radoaroj des malpli trafeflas por malaranĝo, ju pli simplaj ili estas.

La problemo do estas konstitui ian centran direktadon, en kondiĉoj de fortikeco kaj stabileco, kiuj lasu ĝin ŝirmata kontraŭ fluktado, kiuj respondu al ĉiaj bezonoj de la afero kaj kontraŭmetu absolutan baron al la fimanovroj de intrigo kaj ambicio. Tia estas la celo de la plano, kiun ni nun prezentos per rapida skizo.

IV - Centra Komitato

Dum la periodo de ellaborado, la direktado de Spiritismo devis esti individua ; estis necese, ke ĉiuj konsistigaj elementoj de la doktrino, venintaj en stato de embrioj el amaso da fokusoj, konverĝu al unu komuna centro por tie esti kontrolataj kaj komparataj, kaj ke unu sola penso gvidu ĝian kunordigadon por starigi unuecon en la tuto kaj harmonion en ĉiuj partoj. Alie, la doktrino similus mekanismon, en kiu la radoj ne precize endentiĝus, unuj al aliaj.

Ni jam tion diris, ĉar temas pri nekontestebla veraĵo, nuntempe klare demonstrita : la doktrino ne povus naskiĝi tutpreta el unu sola centro, same kiel la astronomia scienco el unu sola observejo ; kaj ĉiu centro, kiu klopodus konstitui ĝin per siaj solaj observoj, farus ion nekompletan kaj troviĝus, rilate al grandega nombro da punktoj, en kontraŭdiro kun la aliaj. Eĉ se mil centroj volus fari sian propran doktrinon, ne ekzistus du egalaj inter si pri ĉiuj punktoj. Se ili akordiĝus pri la bazo, ili neeviteble diferencus laŭ la formo ; nu, ĉar estas multaj homoj, kiuj vidas la formon antaŭ ol la bazon, tiam ekzistus tiom da sektoj kiom da malsamaj formoj. Unueco nur povus eliri el la tutaĵo kaj komparado de ĉiaj partaj rezultoj ; jen kial necesis koncentro de laboroj. (*La Genezo*, ĉap. I, *Karakteroj de la spiritisma revelacio*, n° 51 kaj sekvantaj.)

Sed kio portempe estis avantaĝo, tio poste fariĝus maloportunaĵo. Nuntempe, kiam la ellaborado finiĝis, koncerne fundamentajn demandojn ; kiam la ĝeneralaj principoj de la scienco establiĝis, la direktado, kiu komence devis esti individueca, devas fariĝi kolektiva ; unue, ĉar venos momento, kiam ĝia pezo superos la forton de unu homo, kaj due, ĉar estas pli garantiata stabileco ĉe grupo da homoj, kie ĉiu havas sian voĉon kaj kie unu povus nenion sen la konsento de la aliaj, ol ĉe unu sola, kiu povus trouzi sian aŭtoritatecon kaj voli la superregadon de siaj personaj ideoj.

Anstataŭ unu sola estro, la direktadon ekprenos unu konstanta *centra komitato*, kies organizon kaj atribuojn oni difinos tiamaniere, ke oni lasos nenion al arbitro. Tiu komitato konsistos el dek du aŭ pli da

Konstitucio de Spiritismo

titolaj membroj, kiuj devos tiucele plenumi certajn kondiĉojn, kaj el sama nombro da konsilantoj. Ĝi kompletiĝos per si mem, laŭ reguloj egale determinitaj, laŭ la vakoj pro forpaso aŭ aliaj kaŭzoj. Speciala dispozicio fiksos la manieron alnomi la dek du unuajn.

La komitato nomumas sian prezidanton por unu jaro.

La aŭtoritateco de la prezidanto estas nur administra ; li direktas la decidojn de la komitato, kontrolas la plenumadon de la laboroj kaj la ekspedadon de la aferoj ; sed ekster la oficpovoj al li donitaj de la konstituitaj statutoj, li ne povas preni iun ajn decidon sen la partopreno de la komitato. Sekve, ne eblas misaĵoj, nek stimulado al ambicio, nek pretekstoj por intrigo kaj ĵaluzo, nek ŝoka superregado.

La centra komitato estos do la kapo, la vera estro de Spiritismo, kolektiva estro, kiu nenion povas sen la konsento de la plimulto. Sufiĉe grandnombra por instruiĝi per diskutado, tamen ne tiel nombra, ke ĝi kaŭzus konfuzon.

La aŭtoritateco de la centra komitato estos modera kaj ĝiaj agoj kontrolataj de la kongresoj aŭ ĝeneralaj asembleoj, pri kiuj oni traktos ĉi-sube.

Por la komunumo de la adeptoj, aprobadon aŭ malaprobadon, konsento aŭ malkonsento, unuvorte la decidoj de ia konstituita instanco, kiu reprezentas kolektivajn opinion, nepre havas aŭtoritaton, kiun ili neniam havas se ĝi emanus el unu sola individuo, kiu reprezentas nur unu personan opinion. Ofte oni rifuzas la opinion de unu sola homo, sentante humiliĝon pro tia submetiĝo, sed oni ĝin facile akceptas se ĝi venas de pluraj homoj.

Oni bone komprenu, ke temas ĉi tie pri morala aŭtoritateco, koncerne la interpretadon kaj aplikadon de la principoj de la doktrino, kaj ne pri ajna disciplina povo. Tia aŭtoritateco estos, koncerne Spiritismon, sama kiel tiu de akademio, koncerne sciencon.

Por la fremda publiko, ia konstituita korporacio havas pli da aŭtoritato kaj hegemonio super la kontraŭuloj ; ĝi ĉefe havas ian rezistan forton kaj rimedojn de agado, kiujn individuo ne povus disponi ; ĝi batalas kun senfine grandaj avantaĝoj. Se oni batalas kontraŭ individuo, oni lin renversas, sed ne estas same kontraŭ kolektivo.

Ankaŭ ekzistas, ĉe kolektivo, ia garantio pri stabileco, kiu ne ekzistas, kiam ĉio sidas sur unu sola kapo ; se individuon baras ia ajn kaŭzo, ĉio sekve estas barita. Kolektivo, male, senĉese daŭras : se ĝi perdas unu aŭ plurajn el siaj membroj, nenio endanĝeriĝas.

Estas esence grave, ke ili estu akordaj pri la fundamentaj principoj ; nu, tio estos absoluta kondiĉo por ilia akcepto, same kiel por ĉiuj, kiuj partoprenos en la direktado. Pri demandoj, pro detalo ne solvitaj, apenaŭ gravas ilia malakordo, ĉar la opinio de la plimulto superregos. Se iu opinio estos ĝusta, ne mankos bonaj motivoj por ĝin pravigi. Se unu el ili, ĉagrenite de tio, ke li ne povis akceptigi siajn ideojn, retiriĝas, tamen la aferoj ne malpli sekvas sian vojon, kaj ne estos okazo por tion bedaŭri, ĉar li montris sian fieran sentemon, apenaŭ spiritistan, kiu povus esti kaŭzo de problemo.

Plej ordinara kaŭzo de dividiĝo inter kuninteresatoj estas la konflikto de interesoj kaj la ebleco, por unu, superi alian por sia profito. Tia kaŭzo ne eblas, tial ke la malgajno de unu ne povas profitigi aliajn, ke ili estas solidaraj kaj povas nur malgajni, anstataŭ gajni, pro malkonsento. Tio estas afero de detalo, antaŭvidebla ĉe la organizo.

Ni supozu, ke inter tiuj troviĝas falsa frato, perfidulo, gajnita de la malamiko de la afero ; kion li povos fari, havante nur sian voĉon ĉe la decidoj ? Ni supozu, kvankam tio neblas, ke la tuta komitato eniros malbonan vojon : jen la kongresoj staros por tien meti ordon.

La kontrolado de administraj agoj okazos dum la kongresoj, kiuj povos dekreti riproĉon aŭ akuzon kontraŭ la centra komitato, pro rompo de ties mandato, pro deflankiĝo de agnoskitaj principoj, aŭ pro decidoj damaĝaj al la doktrino. Pro tio oni submetos la aferon al la kongreso, ĉe la cirkonstancoj, en kiuj oni juĝos, ĉu ĝia respondeco povas esti grave kompromitata.

Se do la kongresoj estas bremsilo por la komitato, ĉi tiu ricevas novan forton el ties aprobo. Tiel, tiu kolektiva estro, definitive, dependas de ĝenerala opinio, kaj ne povas, sen danĝero por si mem, forturniĝi de la rekta vojo.

La ĉefaj taskoj de la centra komitato estos :

1^a Zorgi pri la interesoj de la doktrino kaj ĝia disvastigado ; teni ĝian utilecon per konservado de la tuteco de ĝiaj rekonataj principoj ; elvolvi ĝiajn konsekvencojn ;

2^a Studi novajn principojn, kiujn eblas konsideri por eniro en la korpon de la doktrino ;

3^a Kunigi ĉiajn dokumentojn kaj informojn, kiuj povas interesi Spiritismon ;

4^a Korespondado ;

Konstitucio de Spiritismo

5^a Tenadi, solidigi kaj plivastigi la fratecajn ligojn inter la anoj kaj privataj societoj en la diversaj landoj ;

6^a Direkti la *Revuon*, kiu estos la oficiala gazeto de Spiritismo, kaj al kiu oni povos aldoni alian periodaĵon ;

7^a Ekzamini kaj taksu verkojn, gazetartikolojn kaj ĉiajn skribaĵojn, kiuj interesas la doktrinon. Refuti atakojn, se oportune ;

8^a Publikigi la fundamentajn verkojn pri la doktrino, en plej oportunaj kondiĉoj por ilia disvastigo. Produkti kaj publikigi ilin, laŭ plano de ni donota, kiun ni ne havis tempon plenumi dum la vivo. Stimuli publikaĵojn, kiuj povos utili al la afero ;

9^a Fondi kaj konservi bibliotekon, arkivon kaj muzeon ;

10^a Administri kason por asekuro, dispensarion kaj azilon ;

11^a Administri materialajn aferojn ;

12^a Gvidi la seancojn de la societo ;

13^a Provizi parolan instruadon ;

14^a Viziti kaj instrukcii privatajn kunsidojn kaj societojn, kiuj submetiĝos al ĝia patroneco ;

15^a Kunvoki kongresojn kaj ĝeneralajn asembleojn.

Tiajn taskojn distribuos inter si la diversaj membroj de la komitato, laŭ la specialeco de ĉiu, kaj tiujn, laŭbezzone, helpos sufiĉa nombro da helpmembroj aŭ simplaj dungitoj.

V - Institucioj akcesoraj kaj komplementaj de la centra komitato

Pluraj institucioj komplementaj de la centra komitato al ĝi aneksiĝos, kiel lokaloj, laŭgrade kiel la cirkonstancoj tion permesos, nome :

1^a *Biblioteko*, kie kolektiĝos ĉiuj verkoj, kiuj interesas Spiritismon, kaj kiuj povos esti konsultataj surloke aŭ liverataj por legado ;

2^a *Muzeo*, kie kolektiĝos la unuaj verkoj de la spiritisma arto, mediumaj produktaĵoj plej rimarkindaj, portretoj de anoj, al kiuj la afero multon ŝuldas pro ilia sindonemo, portretoj de homoj, kiujn Spiritismo honoras, kvankam ili estas fremdaj al la doktrino, kiel bonfarantojn de la homaro, grandaj genioj misiistoj de la progreso, k.s.

3^a *Dispensario* por *senpaga*j kuracistaj konsultoj kaj kuracado de certaj malsanoj, sub direktado de laŭleĝa medicinisto ;

4^a Kaso por asekuro kaj sociservo, laŭ praktikaj kondiĉoj ;

5^a Maljunulejo ;

6^a Societo el anoj, kun regulaj seancoj.

Sen antaŭtempa ekzamenado pri tiu afero, utilas diri kelkajn vortojn pri du artikoloj, kiujn oni povus miskompreni.

Starigo de ĝenerala kaso por asekuro estas io neefektivebla, kiu estigus seriozajn maloportunaĵojn, kiel ni jam montris per speciala artikolo. (*Revue* de julio 1866, paĝo 193.) La komitato ne povus do eniĝi en vojon, kiun ĝi baldaŭ devus forlasi, nek entrepreni ion, pri kio ĝi ne estas certa, ke ĝi povos efektiviĝi. Ĝi devas esti pozitiva, kaj ne lasi sin luli en ĥimeraj iluzioj; jen estas la maniero longe kaj sekure marŝadi; por tio, ĝi devas entute resti en la limoj de eblo.

Tiu kaso por asekuro ne povas nek devas esti io alia ol loka institucio, kun limigita agadkampo, kies prudenta organizo povos servi kiel modelo por tiuj samtipaj, kiujn povus krei privataj societoj. Estas ĝuste pro sia multeco, ke ili faros efikajn servojn kaj ne per la centralizo de siaj agrimedoj.

Ĝin provizos: 1^o parto destinita al rentumo por la ĝenerala kaso de Spiritismo; 2^o specialaj farotaj donacoj. Ĝi kapitalumos la ricevitajn sumojn por konsistigi renton; per tiu rentumo ĝi havigos portempan aŭ dumvivan helpon kaj plenumos la devojn de sia mandato, kiuj estos difinitaj en ĝia konstitua regularo.

La projekton de maljunulejo, laŭ kompleta signifo de tiu vorto, ne eblas tuj en la komenco pro la kapitalo, kiun postulus tia fondaĵo, kaj, krome, ĉar necesas lasi al la administrado tempon por stabiligo kaj regula marŝado, antaŭ ol kompliki ties taskojn per entreprenoj, ĉe kiuj ĝi povus fiaski. Preni tro da aferoj antaŭ la garantio pri plenumrimedoj estus malprudente. Oni facile komprenos tion, se oni pripensos ĉiujn detalojn esence proprajn al tiaspecaj entreprenoj. Certe dezirindas havi bonajn intencojn, sed antaŭ ĉio ajn necesas povo por ilin efektiviĝi.

VI - Agadkampo de la centra komitato

Centro por ellaborado de spiritismaj ideoj formiĝis per si mem de la komenco, sen antaŭpensita plano, per la forto mem de la aferoj, sed sen ia oficiala karaktero. Tio estis necesa, ĉar se ĝi ne ekzistus, kiu estus la punkto de kunveno de la spiritistoj disaj en diversaj landoj? Se ili ne povus komuniki siajn ideojn, siajn impresojn, siajn observojn al ĉiuj aliaj apartaj centroj, disaj mem kaj ofte sen solideco ili restus izolitaj, malutile al la disvastigado de la doktrino. Necesis do unu punkto kien ĉio venus,

kaj el kie ĉio povus elradii. La evolviĝo de la spiritismaj ideoj, anstataŭ fari tian centron senutila, faros, ke oni pli forte sentu ĝian neceson, ĉar la bezono alproksimiĝi kaj formi faskon estos des pli granda, ju pli konsiderinda estos la nombro da anoj. La konstitucio de Spiritismo, reguligante la staton de la aferoj, havos kiel efikon estigi pli grandajn avantaĝojn kaj plenigi ekzistantajn mankojn. La centro kreota de la Konstitucio tute ne estos individueca, sed fokuso de kolektiva aktiveco por la ĝenerala intereso, kaj kie forviŝiĝos ĉia persona aŭtoritateco.

Sed kia estos la vasteco de la agadkampo de tiu centro ? Ĉu ĝi destiniĝas al regado monda kaj fariĝi universala arbitracianto de vero ? Se ĝi havus tian pretendon, tio montrus miskomprenon pri la karaktero de Spiritismo, kiu ĝuste pro tio, ke ĝi proklamas la principojn de libera ekzamenado kaj libereco de konscienco, konsekvence forpuŝas la personon stariĝi kiel aŭtokratio ; se tiel okazus, ĝi ekde la komenco enirus fatalan vojon.

Spiritismo havas principojn, kiuj, sidante sur naturaj leĝoj kaj ne sur metafizikaj abstraktaĵoj, tendencas fariĝi, kaj certe ili iam estos, universale homaj ; ĉiuj akceptos ilin, ĉar ili estos palpeblaj, demonstritaj veraĵoj, same kiel oni akceptis la teorion pri la movado de la tero ; sed pretendi, ke spiritismo ĉie estos same organizita; ke la spiritistoj en la tuta mondo submetiĝos al unuforma reĝimo, al unu sola agadmaniero ; ke ili devos atendi lumon el unu fiksa punkto, al kiu ili devos fiksi siajn rigardojn, tio certe estus ia utopio tiel absurda kiel pretendi, ke ĉiuj popoloj sur la tero formos iam unu solan nacion, sub la regado de unu sola estro, obeantan la saman leĝaron kaj submetatan al samaj moroj. Se ekzistas ĝeneralaj leĝoj, kiuj povas esti komunaj al ĉiuj popoloj, tiaj leĝoj ĉiam estos, ĉe detaloj de aplikado kaj de formo, adaptataj al moroj, karakteroj kaj klimatoj de ĉiu.

Tio sama okazos al la organizita Spiritismo. Spiritistoj en la tuta mondo havos komunajn principojn, kiuj ilin kunligos al la granda familio per la sankta ligilo de frateco, sed kies aplikado povos varii laŭ la landoj, sen rompiĝo de la fundamenta unueco, sen formado de disaj sektoj sin reciproke ĵetantaj ŝtonojn kaj anatemon, kio ja estus tute kontraŭspiritisma. Eblas do formiĝi, kaj neeviteble formiĝos, ĝeneralaj centroj en diversaj landoj, sen alia interligo krom komuna kredo kaj morala solidareco, sen submetiĝo de unu al alia, sen tio, ke, ekzemple, la centro en Francujo nutrus pretendon sin trudi al Spiritistoj amerikaj kaj reciproke.

Komparado inter la observejoj, kiujn ni jam menciis supre, estas perfekte ĝusta. Ekzistas observejoj en diversaj punktoj de la terglobo ;

sendepende de tio, al kiu ajn nacio ili apartenas, ĉiuj baziĝas sur la samaj ĝeneralaj principoj de astronomio, kio tamen ne devigas, ke ili estu dependaj, unuj de aliaj ; ĉiu reguligas sian laboron laŭ sia bon-trovo ; ili komunikas siajn observojn reciproke, kaj ĉiu profitigas al la scienco la malkovrojn de siaj kunfratoj. Same okazos ĉe la ĝeneralaj centroj de Spiritismo ; ili estos la observejoj pri la nevidebla mondo , kiuj reciproke interŝanĝos tion, kion ili obtenos bona kaj aplikebla al la moroj de la landoj, kie ili funkcios : ilia celo estos la bono por la homaro kaj ne kontentigo de personaj ambicioj. Spiritismo estas substanca afero ; alrokociĝi al la formo estus infanaĵo neinda je la grandeco de la afero ; jen kial la diversaj centroj, kiuj penetriĝos de la vera karaktero de Spiritismo, devos fratece etendi la manojn, unuj al aliaj, kaj unuiĝi por kontraŭbatali siajn komunajn malamikojn : nekredemon kaj fanatikecon.

VII - Konstituaj statutoj

Redakto de konstituaj statutoj devus antaŭi ĉian plenumadon ; se ĝi estus konfidita al asembleo, nepre necesus anticipi determini la kondiĉojn plenumotajn de tiuj ŝarĝitaj per la laboro. Manko de antaŭa bazo, malkonsento pri vidpunktoj, eble ankaŭ individuaj pretendoj, se ne paroli pri malamikaj intrigoj, povintus naski disigojn. Tian grandampleksan laboron oni ne povus improvizi ; ĝi postulus longan ellaboradon, konon pri la veraj bezonoj de la doktrino, akiritan per sperto kaj seriozaj pripensoj, cele al unueco de vidpunktoj, harmonio kaj kunordigo de ĉiuj partoj de la tuto ; ĝi nur povus rezulti el individua iniciato, eĉ se nur poste ĝi ricevus la sankcion de la interesatoj. Sed dekomence, necesus havi regulon, desegnititan vojon, determinitan celon ; post starigo de la regulo, oni marŝas sekure, sen provpalpado, sen hezito.

Tamen, ĉar al neniu homo estas donite posedi la universalan lumon nek fari ion ajn perfekta; ĉar homo povas iluziiĝi pri siaj propraj ideoj dum aliaj homoj povas vidi tion, kion li ne vidas ; ĉar ekscesa estus la pretendo ajnamotive sin altrudi, tial la konstituajn statutojn oni submetos al revizio de pli proksima kongreso, kiu povos en ĝi fari la reĝustigojn, kiujn oni rigardos utilaj.

Sed regularo, kiel ajn bona ĝi estas, ne povos esti porĉiama ; kio estas taŭga dum certa tempo eble fariĝos poste nesufiĉa ; la bezonoj ŝanĝiĝas

laŭ la epokoj kaj la elvolviĝado de ideoj. Se oni ne volas, ke ĝi, kun la tempopaso, kadukiĝu aŭ iam estu perforte renversita de progresemaj ideoj, estas necese, ke ĝi marŝu kune kun tiuj ideoj. Okazas al filozofiaj doktrinoj kaj privataj societoj tio same kiel en politiko aŭ religio ; sekvi aŭ ne sekvi impulsan movadon estas afero de vivo aŭ de morto. Ĉe la temo ĉi tie konsiderata, estus grava damaĝo kateni la estontecon per regulo, kiun oni konsiderus nefleksebla.

Estus ne malpli grava damaĝo enkonduki en la regularon tro oftajn ŝanĝojn, kiuj malhelpus ĝian stabilecon ; necesas agadi kun matureco kaj singardemo ; nur iom daŭra sperto povus fari vere utilaj la ŝanĝojn. Nu, kiu povus juĝi en tiaj okazoj ? Tion ne povus unu sola homo, kiu ĝenerale rigardas nur el sia vidpunkto : same ne la aŭtoro de origina verko, kiu povus trofavore aprezi sian verkon; juĝistoj estos do la interesatoj mem, ĉar ili rekte kaj daŭre spertas la efikojn de la institucio kaj povas senti en kio ĝi pekas.

Revizio de la konstituaj statutoj fariĝos en la *ordinaraj kongresoj*, kiuj por tio transformiĝos al *organaj kongresoj*, en antaŭfiksita tempo, kaj tio senlime daŭros, por seninterrompe teni ilin je la nivelo de bezonoj kaj de progresado de ideoj, eĉ se post mil jaroj.

Ĉar la tempoj de revizio estos periodaj kaj antaŭe sciataj, ne necesos fari apelaciojn nek specialajn alvokojn . Reviziado estos ne nur rajto, sed devo por la kongreso, en la koncerna tempo ; ĝi anticipu enskribiĝos en la tagordon ; tiel ke ĝi ne submetiĝos al bonvolemo de iu ajn homo ; neniu povos arogi al si la rajton decidi surbaze de sia privata aŭtoritateco, ĉu la revizio estas oportuna aŭ ne. Se post la legado de la statutoj la kongreso juĝos, ke neniu ŝanĝo necesas, tiam ĝi deklaras ilin entute validaj.

Ĉar la nombro da anoj en kongreso estas nepre limigita, pro la materia neebleco kunveni ĉiujn interesatojn, por ne malhavi la ideojn de forestantoj, ĉiu povos, kie ajn en la mondo li troviĝas, kaj en la intertempo inter du organaj kongresoj, transdoni al la centra komitato siajn observojn, kiujn oni enmetos en la tagordon okaze de la proksima kongreso.

En periodo de kvarono de jarcento apenaŭ povus desegniĝi konsiderinda moviĝo de ideoj. Tial do la organa konstitucio de Spiritismo submetiĝos al revizio ĉiun dudekkvinon da jaroj. Tiu tempo ne estas tro longa kaj sufiĉas por permesi konsideradon pri la novaj bezonoj kaj ne enkonduki perturbojn pro tro oftaj ŝanĝoj.

Tamen, ĉar dum la unuaj jaroj okazos la plej granda ellaborado, ĉar la socia movado tiumomente povas aperigi neantaŭviditajn bezonojn, ĝis

la societo firmiĝos, kaj ĉar gravas profiti sen tro da prokrasto la lecionojn de sperto, tial la momentoj de reviziado estos pli alproksimigataj, sed ĉiam antaŭe anoncataj, ĝis la fino de ĉi tiu jarcento. Post tiuj unuaj tridek jaroj, la konsistigo estos sufiĉe komplete kaj alĝustigita por havi relativan stabilecon ; tiam eblos, sen problemoj, komenciĝi la periodoj de dudek kvin jaroj.

Tiel, la komence individua verko, kiu malfermis la vojon, efektive fariĝos kolektiva verko por ĉies interesoj, kun la avantaĝoj de tiuj du manieroj, sen la malhelpoj, kaj ĝi ŝanĝiĝos sub la ordonoj de progresigaj ideoj kaj de sperto, sed sen skuoj, sen troa urĝo, ĉar la principo enkondukiĝis en la regularon mem.

VIII - Pri la programo de la kredoj

Absoluta kondiĉo por vivipovo ĉe ĉiu kunsido aŭ asocio, kiu ajn estas ĝia celo, estas homogeneco, nome unueco de vidpunktoj, de principoj kaj de sentoj, tendenco al unu sama, determinita celo, unuvorte komuneco de pensoj. Ĉiam, kiam homoj kuniĝas nome de svaga ideo, ili ne atingas interkomprenon, ĉar ĉiu havas malsaman komprenon pri la ideo. Ĉia kunsido formita per heterogenaj elementoj portas en si ĝermojn de sia propra dissolviĝo, ĉar ĝi konsistas el interesoj disaj, materiaj, aŭ memamaj, tendencaj al malsama celo, kiuj reciproke interbatalas, kaj kiuj malofte emas fari koncedojn je komuna intereso, aŭ eĉ al racio ; ili submetiĝas al la opinio de la plimulto se ili ne povas alie agi, sed ili neniam kuniĝas sincere.

Tiel okazis ĝis la alveno de Spiritismo ; formata laŭgrade, per sinsekvaj observoj, kiel ĉiaj sciencoj, ĝia akcepto iom post iom disvastiĝis. La kvalifiko kiel Spiritisto, sinsekve aplikata al ĉiuj gradoj de kredo, ampleksas senfinan nombron da nuancoj, de la simpla kredo al la manifestiĝoj, ĝis plej altaj moralaj kaj filozofiaj deduktoj ; de tiu, kiu restas ĉe la surfaco kaj vidas en ĝi nuran kuriozan distraĵon por scivolemo, ĝis tiu, kiu serĉas konformecon de ĝiaj principoj al la universalaj leĝoj, kaj ties aplikadon al la ĝeneralaj interesoj de la homaro ; fine, de tiu, kiu vidas en ĝi nenion alian ol rimedon por ekspluatado je sia profito, ĝis tiu, kiu ĉerpas en la manifestiĝoj elementojn por sia propra morala pliboniĝo.

Sin prezenti do kiel konvinkita Spiritisto neniel indikas la mezuron de ies kredo ; tiu vorto multon diras pri unuj, kaj tre malmulton pri

aliaj. Asembleo, al kiu oni kunvokus ĉiujn, kiuj sin deklaras Spiritistoj, prezentus miksaĵon da diverĝaj opinioj, kiuj ne povus interesimiliĝi, kaj ne kondukus al io serioza ; se ne paroli pri homoj interesataj tie dissemi disputojn, al kiuj ĝi malfermus sian pordon.

Tiu manko de precizeco, neevitebla ĉe la komenco kaj dum la periodo de ellaborado, ofte kaŭzis bedaŭrindajn miskomprenojn, atribuante al la doktrino ion, kio estis nenio alia ol troaĵo. Pro la ĉiutaga, falsa aplikado de la kvalifiko kiel spiritisto, la kritikistoj, kiuj apenaŭ interesiĝas pri la fundo de la afero, kaj eĉ malpli pri la serioza flanko de Spiritismo, tie trovis motivon por mokado. Se iu sin prezentas kiel spiritisto aŭ pretendas fari el Spiritismo tion saman, kion iluziistoj pretendas fari el Fiziko, eĉ se li estas nura ĵonglisto, oni lin rigardas kiel reprezentanton de la doktrino.

Estas vere, ke oni faras distingon inter bonaj kaj malbonaj, inter veraj kaj falsaj Spiritistoj, inter pli aŭ malpli kleraj, pli aŭ malpli konvinkitaj, inter elkoraj Spiritistoj, k.t.p. ; sed tiaj alnomoj, ĉiam svagaj, tute ne estas pravaj, nenio ilin karakterizas, kiam oni ne konas la homojn kaj kiam oni ne havis okazon ilin juĝi laŭ iliaj agoj.

Eblas do trompiĝi pro ŝajnoj. El tio rezultas, ke la kvalifiko kiel spiritisto apenaŭ permesas nekompletan aplikon kaj ne estas absoluta rekomendo ; tiu necerteco ĵetas en la animojn iaspecan defion, kiu malhelpas starigi inter la anoj seriozan ligilon de kunfrateco.

Nuntempe, kiam oni starigis ĉiujn fundamentajn punktojn de la doktrino kaj la devojn, kiuj koncernas ĉiun seriozan adepton, la kvalifiko kiel spiritisto povas havi difinitan karakteron, kian ĝi ne havis antaŭe. Oni povas fari formularon por kredkonfeso, kaj skriba aliĝo al tiu programo estos aŭtentika atesto pri la maniero konsideri Spiritismon. Per konstatao de la unueco de principoj, tiu aniĝo estos, krom tio, ligilo, kiu unuigos la adeptojn en unu grandan familion, sen distingo de nacieco, sub regado de unu sama kredo, de komuneco de pensoj, de vidpunktoj kaj de aspiroj. La kredo pri Spiritismo ne plu estos simpla konsento, ofte parta, pri ia svaga, sed ja motivita aliĝo, farita laŭ bona scio pri la afero kaj konstatita per oficiala titolo liverita al la aliĝinto. Por eviti maloportunaĵojn pro manko de precizeco rilate la kvalifikon kiel spiritistoj, la subskribintoj de la kredkonfeso prenos la titolon *Ĵuraliĝintaj Spiritistoj*.

Sidante sur preciza, difinita bazo, tiu kvalifiko estigas nenian dubasencecon, permesas al la adeptoj praktiki la samajn principojn, iradi sur sama vojo, sin reciproke rekoni sen alia formalizaĵo krom la deklaro pri sia

kvalifiko kaj, se necese, la prezento de sia titolo. Kunsido de ĵuraliĝintaj spiritistoj estos sekve tiel homogena kiel eblas al la homaro.

Formularo por kredkonfeso, detala kaj klare difinita, estos la vojo : la titolo *ĵuraliĝinta spiritisto* estos la kunliga vorto.

Sed, oni diros, ĉu tia titolo estas garantio sufiĉa kontraŭ homoj de dubinda sincereco ?

Absoluta garantio kontraŭ malbonintenco estas neebla, ĉar ekzistas homoj, kiuj ludas per plej solenaj aferoj ; sed oni konsentu, ke tia garantio estas pli bona, ol nenia. Tiu, cetere, kiu senskrupule sin prezentas kiel tio, kio li ne estas, kiam temas nur pri flugantaj vortoj, ofte retroiras antaŭ skriba aserto, kiu lasas strekojn kaj kiu povas kontraŭstari lin mem, se li deturniĝos de la ĝusta vojo. Se tamen estus homoj, kiujn ne retenus tia konsidero, ilia nombro estus minimuma kaj ne influa. Cetere, la statuto antaŭvidas tian okazon kaj provizas specialan dispozicion.

Tia decido neeviteble forigos el seriozaj kunsidoj tiujn personojn, kiuj tie ne estus ĝuste lokitaj. Se ĝi forigus iujn sincerajn spiritistojn, tiel okazus, ĉar ĉi tiujn estus ne sufiĉe memfidaj por sin deklari kiel tiaj, aŭ malkuraĝuloj timantaj elmontriĝi, aŭ tiaj homoj, kiuj, en ĉiaj cirkonstancoj, neniam elpaŝas la unuajn, antaŭ ol vidi, kiun direkton la afero prenas. Kun la tempopaso, unuj pli komplete kleriĝos, aliaj ne povos kalkuliĝi inter la solidaj defendantoj de la kaŭzo. Koncerne tiujn, kiujn oni povus vere bedaŭri, malgranda estos ilia nombro, kiu ĉiutage malkreskos.

Ĉar nenio estas perfekta en ĉi tiu mondo, ankaŭ la plej bonaj aferoj havas siajn nekonvenaĵojn ; se oni volus forĵeti ĉion, kio ne estas senmakula, tiam nenion oni povus akcepti. Pri ĉio necesas pesi la sumon de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj; nu, ĉi tie klare evidentas, ke la unuaj superas la duajn.

Ne ĉiuj, kiuj portas la nomon spiritisto, submetiĝos al la konstitucio, tio estas certa ; krome, ĝi celas nur tiujn, kiuj ĝin akceptas libere kaj volonte, ĉar ĝi ne pretendas sin trudi al iu ajn.

Ĉar Spiritismon ne same komprenas ĉiuj homoj, la konstitucio alvokas tiujn, kiuj komprenas ĝin laŭ sia vidpunkto kun la celo doni al ili ian apogon, kiam ili troviĝos izolitaj, krom ankaŭ solidigi la ligilojn de granda familio per unueco de kredoj. Sed fidela al la principo de libereco de konscienco, kiun la doktrino proklamas kiel naturan rajton, ĝi respektas ĉiajn sincerajn pensojn, kaj ne anatemas tiujn, kiuj havas malsamajn ideojn ; ĝi certe profitos el la lumoj, kiujn ili eble disverŝos ĉirkaŭ ĝia sino.

Konstitucio de Spiritismo

Esence grave estas do koni tiujn, kiuj sekvas la saman vojon ; sed kiel scii tion precize ? Estas materie neeble atingi tion per individuaj demandoj, kaj cetere neniu povas arogi al si la rajton sondi la konsciencojn. La sola rimedo, la plej simpla, la plej laŭleĝa, estus starigi formularon de principoj, resumantaj la staton de la nunaj konoj, kiuj rezultas el observado, sankciitaj de la ĝenerala instruado de la Spiritoj, al kiu ĉiu homo estas libera aliĝi. Skriba aliĝo estas ia kredkonfeso, kiu faras nenecesa ĉian alian esploradon kaj lasas al ĉiu homo sian tutan liberecon.

La konstitucio de Spiritismo havas do kiel necesan komplementon programon de difinitaj principoj, koncerne la kredon, sen kiu ĝi estus negrava verko sen estonteco. Tiu programo, frukto de akirita sperto, estos la indikilo de la vojo. Por ke ĝi sekure iradu, flanke de la organa statuto, necesas la konstitucio pri fido, ia *credo* , se oni tiel volas, kiu estu la gvidopunkto por ĉiuj anoj.

Sed tiu programo kaj la organa konstitucio ne povas nek devas kateni la estontecon, pro risko fali, frue aŭ malfrue, sub la premo de la progreso. Bazita sur la nuntempa stato de la scioj, ĝi devas sanĝiĝi kaj kompletigi, laŭgrade kiel novaj observoj montros ĝiajn nesufiĉecon aŭ misaĵojn. Tamen, tiajn ŝanĝojn oni devas fari nek facilanime, nek tro rapide. Ili estos verko de la organaj kongresoj, kiuj al la perioda reviziado de la konstituaj statutoj, aldonos la reviziadon de la formularo de principoj.

Konstitucio kaj *credo*, konstante irante en harmonio kun la progreso, transvivos sin mem laŭ la sinsekvo de l' tempoj.

IX - Vojoj kaj rimedoj

Estas sendube ĝene, ke oni devas okupiĝi pri materiaj konsideroj por atingi celon tute spiritan ; sed necesas rimarkigi, ke la spiriteco mem de la agado ligiĝas al la interesoj de la surtera homaro kaj de ties bonfarto ; ke jam ne temas nur pri produktado de iuj filozofaj ideoj, sed pri fondado de io pozitiva kaj daŭra por la disvastigo kaj firmigo de la doktrino, por kiu necesos faciligi, ke ĝi produktu fruktojn laŭ sia povo. Imagi, ke ni vivas ankoraŭ en tempo, kiam kelkaj apostoloj povus survojiĝi kun sia bastono enmane, sen zorgo pri loĝado kaj pri la ĉiutaga pano, estus ja iluzio, kiun amara elreviĝo tuj detruus. Por fari ion seriozan, necesas submeti sin al bezonoj, kiujn trudas la moroj de la epoko, en kiu oni vivas ; tiaj bezonoj estas tute aliaj ol tiuj, de la tempo de patriarka vivo ; la intereso mem de

Spiritismo postulas do, ke oni kalkulu siajn agmanierojn por ne halti survoje. Ni do kalkulu, ĉar ni staras en jarcento, en kiu necesas kalkuli.

La taskoj de la centra komitato estas ja multenombraj, kiel oni vidas, tiel ke ili postulas veran administradon. Ĉiu membro havas aktivajn kaj konstantajn funkciojn, kaj se oni prenas nur bonvolemajn homojn, la laboroj povus lami, ĉar neniu rajtus riproĉi neglektemulojn. Por la reguleco de la laboroj kaj la antaŭenigado de la aferoj, necesas havi homojn, kies akuratecon oni povus fidi, kaj kies funkcioj ne estus simplaj komplezaj agoj. Ju pli sendependaj laŭ siaj personaj havaĵoj, des malpli ili sin tenus al akurataj okupoj ; aliflanke, se ili ne estus tiaj, ili ne povus fordoni sian tempon. Necesas do, ke ili ricevu pagon, same kiel la administra personaro ; la doktrino tiel gajnos forton, stabilecon, akuratecon, kaj samtempe tio estos maniero liveri vivrimedojn al homoj, kiuj povus tion bezoni.

Kerna punkto en la ekonomio de ĉia antaŭvidema administrado estas, ke ĝia ekzistado ne staru sur eventualaj produktoj, kiuj povus manki, sed sur fiksj, regulaj fontoj, tiel ke ĝian iradon, kien ajn ĝi venos, ne eblus bari. Necesas do, ke la homoj, kiujn oni alvokos por kontribuado, havu nenan zorgon pri ĝia estonteco. Nu, la sperto montras, ke oni devas konsideri kiel esence okazajn la rimedojn, kiuj sidas nur sur la produkto de kotizoj, ĉiam laŭvolaj, kiaj ajn estas la kompromisoj prenitaj, kaj malfacile riceveblaj. Lasi konstantajn kaj regulajn elspezojn al eventualaj fontoj estus manko de antaŭvidemo, kiun iam estonte oni povus penti. Konsekvencoj estas malpli gravaj, sendube, kiam temas pri portempaj fondaĵoj, kiuj daŭras tiom, kiom eblas ; sed ĉi tie, la afero estas por la estonteco. La sorto de administrado, kia estas ĉi tiu, ne povas submetiĝi al la hazardoj de ia komerca afero ; ĝi devas esti, de sia komenco, se ne same vigla, almenaŭ same stabila post unu jarcento. Ju pli solida estos ĝia fundamento, des malpli atingebla por frapoj de intrigo.

En tia okazo, plej banala prudento volas, ke oni necedeble kapitaligu la rimedojn, laŭgrade kiel ili alvenas, por konsistigi ian daŭran rezervon, ŝirmitan kontraŭ ĉiaj eventualaĵoj. Se la administrado reguligas siajn elspezojn laŭ sia rezervo, tiam ĝia ekzisto neniel povas endanĝeriĝi, ĉar ĝi ĉiam havos rimedojn por plua funkciado. Komence, ĝi povas organiziĝi laŭ modesta skalo ; la membroj de la komitato povos provizore limiĝi al kvin aŭ ses, la personaro kaj la administraj elspezoj reduktiĝi al plej simpla grado, sed ebligante disvolviĝi la kreskadon de rimedoj kaj bezonoj de la afero.

Konstitucio de Spiritismo

Por prepari la vojojn por tia instalado ni dediĉis ĝis nun la produkton de niaj laboroj, kiel ni jam diris antaŭe. Se niaj personaj rimedoj ne permesas al ni fari plie, tamen ni almenaŭ havos la kontenton, ke ni metis la unuan ŝtonon.

Ni do supozu, ke per ajna maniero la centra komitato estos, post difinita tempo, en bonaj kondiĉoj por funkcii, kio supozigas rentumon de 25 ĝis 30 mil frankoj, se oni limiĝas komence al ĉiaj ĝiaj disponeblaj rimedoj, laŭ kapitalo kaj eventualaj produktoj, kio konsistigos Ĝeneralan Kason de Spiritismo, kiu submetiĝos al severa librotenada kontrolo. Se oni reguligos la devigajn elspezojn, la kroma parto de la rezervo aldoniĝos al la komuna kapitalo ; proporcie al la rimedoj de tiu kapitalo la komitato provizos la diversajn elspezojn utilajn al la elvolviĝo de la doktrino, sen ajna persona profito, nek farante el ĝi fonto de spekulacio por iu ajn el siaj membroj. La uzo de la kapitalo kaj la librotenado cetere submetiĝos al kontrolo de specialaj komisaroj tiucele nomumitaj de la kongresoj aŭ de ĝeneralaj asembleoj.

Unu el la unuaj zorgoj de la komitato, se tio al ĝi eblis, estos okupiĝi pri publikaĵoj, sen atendi la eblecon tion fari helpe de la monrentumoj ; la monrimedoj por tia celo estos fakte nur anticipa prunto, ĉar ili reeniros per la vendado de la verkoj, kies produkto revenos al la komuna kapitalo. Tio estas afero de administrado.

X - Allan Kardec kaj la nova konstitucio de Spiritismo

La konsideroj en la ĉi-suba ekstrato el la raporto de Allan Kardec al la Pariza Societo pri la Kaso de Spiritismo, en la 5-a de majo 1865, estas iaspeca preludo al la nova konstitucio de Spiritismo, kiun li tiam ellaboradis, krom ankaŭ prezento de tio, kiel li rigardas sian personan pozicion ; konsideroj, kiuj do estas nepre oportunaj en ĉi tiu enkonduko.

« Oni multe parolis pri la gajno, kiun mi ricevis pro miaj verkoj ; neniun serioza homo kredas pri miaj milionoj, malgraŭ la aserto de tiuj, kiuj diris, laŭ fidinda fonto, ke mi havas princan trajnon, kvarĉevalajn kaleŝojn, kaj ke ĉe mi oni ĉiam paŝas sur tapiŝoj el Aubusson. (*Revuo* de junio 1862, paĝo 179.) Aliflanke, kion ajn diris la aŭtoro de broŝuro de vi konata, kiu pravas per fantazie altaj kalkuloj, ke mia enspez-buĝeto superas tiun de la plej potenca reĝo en Eŭropo, ĉar nur en Francujo dudek milionoj da spiritistoj estas miaj tributuloj (*Revuo* de junio 1863, paĝo 175), ekzistas unu fakto pli aŭtentika ol tiaj kalkuloj, nome ke mi neniam petis

ion ajn de ajna homo, ke neniu homo iam ajn donis ion al mi persone ; unuvorte, ke *mi ne vivas koste de iu ajn*, ĉar, koncerne la monsumojn, kiujn oni al mi volonte konfidis, en la intereso de Spiritismo, neniu parto estis deprenita miaprofite.²⁸

« Miaj grandegaj riĉaĵoj do venus de miaj spiritismaj verkoj. Kvankam tiuj verkoj atingis neatenditan sukceson, sufiĉus esti iomete sperta pri libronegocoj por scii, ke ne per libroj pri filozofio oni amasigas milionojn post kvin aŭ ses jaroj, kiam oni rajtas kiel aŭtoro nur pri kelkaj centonoj de la vendo je ĉiu ekzemplero. Sed ĉu granda, ĉu minimuma, tiu gajno estas frukto de mia laboro, kaj do neniu rajtas entrudiĝi en la uzon, kiun mi faras el ĝi.

« Laŭ komerca vidpunkto, mi staras en pozicio de ĉiu homo, kiu rikoltas la frukton de sia laboro ; mi riskas kiel ĉiu verkisto, kiu tiel povas sukcesi, kiel ankaŭ fiaski.

« Kvankam ĉirilate mi devas nenion pravigi, mi tamen kredas utila al la afero, doni kelkajn klarigojn.

« Kiu ajn iam vidis la internon de mia loĝejo kaj ĝin revidas nun, povas atesti, ke nenio ŝanĝiĝis je nia vivmaniero, de kiam mi okupiĝas pri Spiritismo ; ĝi estas nun same simpla kiel antaŭe. Evidentas do, ke miaj gajnoj, kiomaj ajn ili estas, ne donas al mi ĝuojn de lukso. Kio do sekvas de ĝi ?

« Tirinte min el nekonateco, Spiritismo min ĵetis sur novan vojon ; post nelonge, mi vidis min trenita en movadon, kiun mi tute ne antaŭvidis . Kiam mi ekhavis la ideon pri la *Libro de la Spiritoj*, mia intenco estis ne elstarigi min mem kaj resti nekonata ; sed la limoj estis transpasitaj kaj tio estis al mi neebila ; mi devis rezigni pri mia retiriĝemo, pro la risko forlasi la entreprenon, kiu ĉiutage kreskadis ; estis al mi necese cedi al la impulso kaj preni la bridrimenojn. Laŭgrade kiel ĝi elvolviĝis, pli vasta horizonto malfermiĝis antaŭ mi kaj la limoj plivastiĝis ; mi tiam ekkomprenis la grandecon de mia tasko kaj la gravecon de la laboro, kiu restis al mi por kompletigo ; malfacilaĵoj kaj baroj, tute ne timigis min, sed multobligis mian energion ; mi vidis la celon kaj mi decidis atingi ĝin kun la helpo de bonaj Spiritoj. Mi sentis, ke mi ne povas perdi tempon kaj mi ne malŝparis ĝin per senutilaj vizitoj, nek per vanaj ceremonioj ; ĝi estis la laboro de mia vivo ; mi donis al ĝi mian tutan tempon, mi oferis

²⁸ Tiutempe tiuj sumoj atingis la totalon de 14.100 frankoj, kies uzado, ekskluzive destinita por la Doktrino, estas pruvita per la kontoj.

por ĝi mian ripozon, mian sanon, ĉar la estonteco skribiĝis antaŭ mi per nerefuteblaj literoj.

« Sen forigi min de mia vivmaniero, tiu escepta pozicio tamen kreis novajn bezonojn, kiujn miaj nuraj personaj rimedoj, tre limigitaj, ne ebligis kontentigi. Malfacile oni povus prezenti al si la multenombrajn elspezojn, kiujn naskas tiu pozicio kaj kiujn, sen ĝi, mi estus evitinta.

« Nu, Sinjoroj, kio al mi havigis provizojn al miaj rimedoj, tio estis la enspezo de miaj verkoj. Mi tion diras kun kontento, ke per mia propra laboro, per la frukto de miaj maldormoj, mi kontentigis, almenaŭ pliparte, la materialajn bezonojn por starigo de la doktrino. Mi do portis grandan monhelpon en la kason de Spiritismo ; kiuj helpas la disvastigadon de la verkoj ne povos diri, ke ili laboras por riĉigi min, ĉar la gajno el ĉiu aĉetita libro, el ĉiu abono de la *Revuo*, profitigas la doktrinon, ne la homon.

« Sed la tuto ne limiĝis al prizorgo de la nuntempo ; necesis ankaŭ pensi pri la estonteco, kaj prepari fondaĵon, kiu, post mi, povos helpi tiun, kiu min anstataŭos ĉe la granda tasko de li plenumota ; tia fondaĵo, pri kiu mi ankoraŭ devas silenti, ligiĝas al la proprietaĵo, kiun mi posedas, kaj ĝuste tiucele mi aplikas parton de miaj gajnoj por ĝin plibonigi. Ĉar mi estas for de la milionoj, kiujn oni al mi donacis, mi forte dubas, malgraŭ mia ŝparado, ĉu miaj mongaĵoj iam permesos, ke mi donu al tia fondaĵo la komplementon, kiun mi volus vidi dum mia vivo ; sed ĉar ĝia efektivigo staras en la planoj de miaj spiritaj gvidantoj, se mi ne faros ĝin mem, probable iam estonte ĝi plenumiĝos. Dum mi atendas, mi ellaboras la planojn.

« Mi tute ne intencas, Sinjoroj, eĉ plej malmulte vantiĝi pri tio, kion mi ĵus klarigis ; estis necesa la persistado de iuj insultaj kritikoj, por ke mi, kvankam kun bedaŭro, decidiĝu rompi la silenton pri kelkaj faktoj, kiuj min koncernas. Poste, ĉiuj kiujn al malico plaĉis korupti, estos metitaj en lumon pere de aŭtentaj dokumentoj, sed la tempo por tiaj eksplikoj ankoraŭ ne venis ; la sola afero, kiu al mi tiam gravis, estis, ke al vi restu klara la destino de la rimedoj, kiujn la Providenco pasigas tra miaj manoj, kia ajn estas ilia origino. Mi konsideras min nura gardanto, kaj de tiuj, kiujn mi mem gajnas, kaj des pli prave de tiuj, kiujn oni konfidas al mi.

« Iu iam demandis min, ja sen scivolemo, kaj pro pura intereso pri la afero, kion mi farus, se mi havus unu milionon. Mi respondis al li, ke hodiaŭ mi uzus ĝin tute malsame, ol kiel mi faris en la komenco. En pasinta tempo mi farus propagandon per vasta reklamado ; nun mi rekonas, ke tio estus senutila, ĉar niaj kontraŭuloj tion plenumis proprakoste. Ne

disponiginte tiam grandajn rimedojn al mi por tia celo, la Spiritoj deziris pruvi, ke Spiritismo ŝuldas sian sukceson al sia propra forto.

« Nuntempe, kiam la horizonto estas pli larĝa, ĉefe kiam la estonteco elvolviĝis, tute alispecaj bezonoj montriĝas. Ia kapitalo, kiel tiel de vi supozita, estu pli utile uzata. Sen pritrakti detalojn, kiuj estus antaŭtempaj, mi nur diros, ke unu parto servus por transformi mian domon en specialan spiritan ripozejon, kie la enloĝantoj ricevus la bonfarojn de nia morala doktrino; la alia konsistigus *netransdoneblan* renton destinitan al : 1^e prizorgado de la entrepreno ; 2^e certigo de ekzistado sendependa al tiu, kiu venos post mi, kaj al tiuj, kiuj helpos lin en lia misio ; 3^e provizado de la ĉiutagaj bezonoj de Spiritismo, sen la risko de eventualaj helpoj, kiel mi devis fari, ĉar la plej granda parto de la rimedoj sidas sur mia laboro, kiu iam havos finon.

« Jen do kion mi farus ; sed, se tia ĝojo ne estis al mi donita, mi scias, ke iel aŭ aliel, la Spiritoj, kiuj gvidas la movadon, ĝustatempe provizos ĉiujn bezonojn; jen kial mi tute ne maltrankviliĝas kaj okupiĝas nur pri io, kio por mi estas la esenca afero, nome la plenumado de la laboroj, kiuj al mi restas por fini. Tion farinte, mi forpasos, kiam plaĉos al Dio voki min. »

Al tio, kion li iam diris, Allan Kardec aldonas hodiaŭ :

Kiam oni organizos la komitaton, ni partoprenos en ĝi, kiel simpla membro, proponante nian kunlaboron, postulante por ni nek superregadon, nek postenon, nek titolon, nek ian ajn privilegion.

Kvankam aktiva membro de la komitato, ni tamen neniel ŝarĝos ties buĝeton, nek por honorarioj, nek por pagoj, nek por vojaĝaj elspezoj, nek por io ajn ; se ni neniam petis de iu ajn por ni mem, ni des malpli tion farus en tia cirkonstanco ; nia tempo, nia vivo, ĉiuj niaj fortoj, korpaj kaj intelektaj, apartenas al la doktrino. Ni do formale deklaras, ke nenia parto el la rimedoj, kiujn la komitato disponos, destiniĝos al nia persona profito.

Male, ni al ĝi donos nian kontribuon :

1^e Per rezigno pri la gajnoj el niaj verkoj faritaj kaj farotaj ;

2^e Per transdono al ĝi de moveblaj kaj nemoveblaj valoraĵoj.

Kiam la doktrino estos organizita per konstituo de la centra komitato, niaj verkoj fariĝos proprietaĵo de Spiritismo, je la nomo de tiu sama komitato, kiu ilin administros kaj prizorgos ĉion necesan por ilia publikigo per la plej oportunaj rimedoj por ilin popularigi. Ĝi devos ankaŭ same okupiĝi pri ilia traduko en la ĉefajn fremdajn lingvojn.

La *Revuo* estas ĝis nun, kaj ne eblus alie, persona verko, kaj parto de niaj doktrinaj verkoj, tute je la servado de la analoj de Spiritismo. Tie,

Konstitucio de Spiritismo

ĉiuj novaj principoj estas ellaborataj kaj enkondukataj al studado. Estis do necese, ke ĝi konservu sian individuecan karakteron por starigo de unueco.

Multfoje oni petis, ke ni ĝin aperigu pli ofte ; tamen, kiel ajn flata estis al ni tiu deziro, ni ne povis konsenti ; unue, ĉar la materiala tempo ne permesis tian aldonon de laboro, kaj due, ĉar ĝi devis ne perdi sian esencan karakteron, kiu ne estas propre tia de ĵurnalo.

Nun, kiam nia persona verko proksimiĝas al la fino, la bezonoj ne estas la samaj ; la *Revuo* fariĝos, kiel niaj aliaj verkoj, faritaj kaj farotaj, kolektiva proprietaĵo de la komitato, kiu prenos ties direktadon por pli granda utileco al Spiritismo, sen tio, ke, por ĉi celo, ni rezignus doni al ĝi nian kunlaboron.

Por kompletigi la doktrinan laboron, mankas al ni publikigi plurajn verkojn, kiuj ne estas la plej facila parto, nek la malplej peniga. Malgraŭ ke ni posedas ĉiujn elementojn por tio kaj ke la programo estas starigita ĝis la lasta ĉapitro, ni povus dediĉi al ĝi pli konstantan sindonon kaj ĝin aktivigi, se la konsistigo de centra komitato liberigus nin de detaloj, kiuj forrabas grandan parton de nia tempo.

* * *

La unua periodo de Spiritismo estis dediĉita al studado de la principoj kaj leĝoj, kies tuto devis konstitui la doktrinon, unuvorte por prepari la materialojn, samtempe kiel la disvastigon de la ideo ; tio estis ĵetita semo, sed kiu, simile al la parabolo en la Evangelio, ne devis ĉie fruktodoni egale. La infano kreskis ; ĝi estas nun plenkreska, kaj alvenis la momento, kiam, subtene de sinceraj, sindediĉaj adeptoj, ĝi devas marŝi al la celo al ĝi destinita, sen malhelpo fare de postrestintoj.

Sed kiel fari tian elekton ? kiu aŭdacus preni la respondecon juĝi individuajn konsciencojn ? Plej oportune estus, ke tia elekto fariĝu per si mem, kaj por tio la rimedo estas tre simpla ; sufiĉus starigi standardon kaj diri : sekvu ĝin tiuj, kiuj ĝin akceptas !

Preninte la iniciaton por la konstituo de Spiritismo, ni uzis komunan rajton, nome, tiun, kiun havas ĉiu homo, kompletigi laŭ sia bontrovo tion, kion li komencis, kaj taksu la oportunan okazon ; ĉar ĉiu homo estas libera aliĝi aŭ ne, neniuj rajtas plendi pri arbitra premo. Ni kreis la vorton *Spiritismo* por la bezonoj de la afero, ni do plenrajtas determini ĝiajn aplikojn kaj difini la kvalitojn kaj la kredojn de vera spiritisto. (*Spiritisma Revuo*, aprila n^o 1866, paĝo III).

Post ĉio supre dirita, oni facile komprenas, ke estus neeble kaj tro frue starigi tian konstitucion tuj en la komenco. Se la spiritisma doktrino estus entute formita kiel ĉia persona konceptado, ĝi estus kompleta jam de la unua tago, kaj tiam nenio estus pli simpla ol ĝin konstitui; sed ĉar ĝi formiĝis nur laŭgrade, per sinsekvaj aldonoj, la konstitucio certe alvenigus al si ĉiujn amantojn de novaĵoj, sed ĝi baldaŭ estus forlasita de tiuj, kiuj ne akceptus ĉiujn konsekvencojn.

Sed eble oni diros : ĉu vi tiel ne estigas skismon inter la adeptoj ? ĉu la divido en du kampojn ne malfortigas la falangon ?

Ne ĉiuj, kiuj sin konsideras Spiritistoj, pensas same pri ĉiuj punktoj, la divido efektive ekzistas, kaj ĝi estas tre malutila, ĉar povas okazi, ke antaŭ spiritisto oni ne scias, ĉu temas pri kunulo aŭ kontraŭulo. Kio estigas forton, tio estas universaleco ; nu, sincera unueco ne povus ekzisti inter homoj morale aŭ materiale interesataj ne sekvi la saman vojon, nek trafi la saman celon. Dek homoj sincere unuigitaj per komuna penso estas pli fortaj ol cent, kiuj ne interkonsentas. En tia okazo, miksaĵo de malsamaj vidpunktoj malfortigas la unuecon inter tiuj, kiuj deziras kune marŝi, tute same kiel likvaĵo, kiu ensorbiĝas en korpon kaj malhelpas kunligiĝon inter la molekuloj.

Se la konstitucio rezultigas pormomentan malgrandigon de la ŝajna nombro da spiritistoj, ĝi tamen havos kiel neeviteblan konsekvencon plifortigon de tiuj, kiu marŝados komunapense por la plenumado de la granda homama celo, kiun Spiritismo devas trafi. Ili konos unu la alian kaj sin reciproke donos la manojn, de unu ekstremo al la alia en la mondo.

Aliflanke, ĝi starigos baron al ambicioj, kiuj sin trudus kaj klopodus turni la aferon siaprofite, kaj devojigus ĝin. Ĉio estas kalkulita cele al tiu rezultato per la forigo de ĉia aŭtokrateco aŭ persona superregado.



Spiritisma Kredo

Antaŭparolo

La malbonoj de la homaro devenas de la malperfekteco de l' homoj : per siaj malvirtoj ili damaĝas unuj la aliajn. Dum ili estos malvirtaj, ili estos ankaŭ malfeliĉaj, ĉar la batalado pro intereso senĉese naskos mizerojn.

Bonaj leĝoj sendube kontribuas por plibonigo de la socia stato, sed ili estas senpovaj por garantii feliĉon al la homaro, ĉar ili faras nenion alian ol reteni malbonajn pasiojn, sen ilin forigi; due, ĉar ili estas pli subpremaj ol moraligaj kaj nur retenas plej elstarajn malbonagojn sen detruiti ties kaŭzon. Cetere, boneco de leĝoj estas en rilato al boneco de homoj ; dum ĉi tiuj estos regataj de fiero kaj egoismo, ili faros leĝojn profitajn al siaj personaj ambicioj. Civila leĝo ŝanĝas nur la supraĵon ; nur morala leĝo povas eniri la intiman konsciencon kaj ĝin reformi.

Ĉar estas do akceptite, ke ĝuste la kunpuŝiĝo, kaŭzata de interkontaktado de malvirtoj, faras la homojn malfeliĉaj, tial la sola rimedo kontraŭ iliaj malbonoj sidas en ilia morala pliboniĝo. Ĉar neperfektaĵoj estas la fonto de malbonoj, feliĉo pligrandiĝos, laŭgrade kiel malpliigo de neperfektaĵoj.

Kiel ajn bona estas sociala institucio, se tamen homoj estas malbonaj, ili ĝin falsos kaj misnaturigos por ĝin ekspluati siaprofite. Kiam la homoj estos bonaj, ili faros bonajn instituciojn, kaj ĉi tiuj estos longedaŭraj, ĉar ĉiuj havos la intereson ilin konservadi.

La socia demando do ne havas kiel deirpunkton la formon de tiu aŭ tiu alia institucio ; ĝi tuta sidas sur la morala pliboniĝo de individuoj

kaj homamasoj. Tie troviĝas la principo, la vera ŝlosilo de la feliĉo de l' homaro, ĉar tiam homoj ne plu intencos damaĝi unuj la aliajn. Ne sufiĉas vernisi korupton, necesas ja elradikigi korupton.

La principo de pliboniĝo estas en la naturo de kredoj, ĉar kredoj estas instigilo de agoj kaj ŝanĝilo de sentoj; ĝi ankaŭ estas en la ideoj enplantitaj ekde la infanaĝo kaj identiĝintaj kun la spirito, krom ankaŭ en la ideoj, kiujn la posta elvolviĝo de inteligento kaj de racio povas plifortigi kaj ne detruu. Per edukado, eĉ pli ol per instruado, oni transformos la homaron.

Homo, kiu serioze laboras por sia propra pliboniĝo certigas al si feliĉon jam en ĉi vivo; krom la kontenteco, kiun li havigas al sia konscienco, li evitigas al si materialajn kaj moralajn mizerojn, kiuj estas neeviteblaj sekvoj de liaj neperfektaĵoj. Li estos trankvila, ĉar la suferoj apenaŭ tuŝos lin; li havos sanon, ĉar li ne difektos sian korpon per eksceso; li estos riĉa, ĉar oni ĉiam estas riĉa, kiam oni scias kontentiĝi nur per tio necesa; li ĝuos spiritan pacon, ĉar li ne havos fikciajn bezonojn, lin ne turmentos avido pri honoroj kaj superfluaĵoj, febro pro ambicio, envio kaj ĵaluzo; indulgema por aliulaj neperfektaĵoj, kiuj lin malpli suferigos, ili inspiros al li kompaton, ne koleron; per evitado de ĉio, kio povas damaĝi la proksimulon, per paroloj kaj per agoj, per serĉado, male, de ĉio, kio povas utili kaj plaĉi al aliuloj, neniu suferos kontaktante kun li.

Li certigas al si feliĉon en la estonta vivo, ĉar ju pli li puriĝos, des pli li altiĝos en la hierarkio de la inteligentaj estuloj, kaj des pli frue li forlasos ĉi tiun teron de provoj direkte al superaj mondoj; ĉar la malbonon, kiun li estis riparinta en ĉi vivo, li ne devos ripari en aliaj ekzistadoj; ĉar en stato de libera spirito li renkontos nur amikajn, simpatiajn estulojn, kaj lin ne turmentos konstanta vidado de tiuj, kiuj povus plendi kontraŭ li.

Se kune vivos homoj animataj de tiaj sentoj, ili certe estos tiel feliĉaj, kiel eblas sur nia tero; kaj se tiaj sentoj iom post iom konkeros tutan popolon, tutan genton, la tutan homaron, certe nia terglobo okupos rangon inter la feliĉaj mondoj.

Ĉu tio estas ia ĥimero, ia utopio? Jes, por tiu, kiu ne kredas pri la progresado de la animo; ne, por tiu, kiu kredas pri sia senlima perfektebleco.

Ĝenerala progreso rezultas el ĉiuj individuaj progresoj; sed individua progreso ne konsistas nur en la elvolviĝo de inteligento, en la akirado de kelkaj scioj; tio estas nur parto de progreso, kiu ne nepre kondukas al bono, ĉar oni vidas homojn, kiuj tre malbone uzas sian scion; progreso konsistas precipe en morala pliboniĝo, en elpuriĝo de la Spirito, en elsarko

de malbonaj ĝermoj, kiuj ekzistas en ni ; tio estas la vera progreso, la sola, kiu povas garantii feliĉon por la homaro, ĉar ĝi estas la malo mem de malbono. Plej progresinta homo, koncerne inteligenton, povas fari multe da malbono ; kiu morale progresis, tiu faros nur bonon. Estas do en la intereso de ĉiuj, ke la homaro morale progresu.

Sed kiom gravas pliboniĝo kaj feliĉo de estontaj generacio por tiu, kiu kredas, ke ĉio finiĝas post la vivo ? Kian intereson li havas por perfektigi, por sindevigo, por retenado de malbonaj pasioj, por sufero de mankoj favore al aliuloj ? Nenian ; logiko mem diras al li, ke lia intereso estas ĝui la vivon, senprokraste kaj per ĉiaj eblaj rimedoj, ĉar morgaŭ li eble estos nenio.

La doktrino de neado estas paralizo de la homa progreso, ĉar ĝi limigas la vidadon de la homo al la neperceptebla punkto de la nuna vivo ; ĉar ĝi malplivastigas la ideojn kaj ilin devige koncentras sur la materian vivon ; laŭ tia doktrino, ĉar la homo estas nenio antaŭe kaj nenio poste, kaj ĉar ĉiaj sociaj rilatoj ĉesas kun la vivo, tial solidareco estas vana vorto, frateco estas senradika teorio, sindediĉo al aliulo estas trompo, egoismo, kun sia maksimumo « ĉiu por si » estas natura rajto ; venĝemo, racia ago ; feliĉo, privilegio de plej fortaj kaj plej ruzaj ; memmortigo, logika fino de tiu, kiu, sen rimedoj kaj laboroj, jam nenion esperas kaj jam ne povas eliri el la marĉo. Socio fondita sur neado portus en si ĝermon de baldaŭa malfondiĝo.

Tute aliaj estas la sentoj de tiu, kiu fidus la estontecon ; kiu scias, ke nenio, kion li akiris pri scio kaj moraleco, perdiĝos por li ; ke la hodiaŭa laboro fruktodonos morgaŭ ; ke li mem partoprenos en tiuj estontaj generacioj, pli evoluintaj kaj pli feliĉaj. Li scias, ke laborante por aliaj, li laboras por si mem. Lia vidado ne limiĝas al la tero ; ĝi ampleksas la senliman nombron de la mondoj, kiuj estos iam lia loĝejo ; li duonvidas la gloran lokon, kiu al li apartenos, same kiel al ĉiuj estuloj, kiuj atingis perfektecon.

Kun fido pri la estonta vivo, la rondo de la ideoj disvastiĝas ; la estonteco apartenas al li ; la persona progreso havas celon, *efektivan* utilecon. El la kontinueco de la rilatoj inter la homoj naskiĝas solidareco ; frateco baziĝas sur natura leĝo kaj sur ĉies intereso.

Kredo pri estonta vivo estas do elemento de progreso, ĉar ĝi stimulas la Spiriton ; nur ĝi povas doni kuraĝon en elprovado, ĉar la racio montras ilian pravon de ekzisto ; ĝi estigas persistecon en la lukto kontraŭ malbono, ĉar ties celon ĝi montras. Necesas do firmigi tian kredon ĉe la spirito de homamasoj.

Tamen, tiu kredo estas denaska en la homo; ĉiuj religioj tion proklamas ; kial do, ĝis nun, ĝi ne donis la rezultatojn, kiujn oni devus esperi ? Tiel okazas, ĉar oni ĝenerale ĝin prezentas en kondiĉoj neakcepteblaj por la racio. Kia oni ĝin montras, ĝi rompas ĉiajn rilatojn kun la nuntempo ; forlasinte la teron, oni fariĝas fremdulo por la homaro : nenia solidareco ekzistas inter la mortintoj kaj la vivantoj ; progreso estas tute individua; laborante por la estonteco, oni laboras nur por si mem, oni pensas nur pri si mem, kaj krome por ia malpreciza celo, tute nedifnita, nek pozitiva, tiel ke sur ĝi la penso povus ripozi sekure; fine ĝi estas prefere espero, ol materia certaĵo. El tio rezultas ĉe unuj indiferenteco, ĉe aliaj ia mistika ekzaltiĝo, kiu, izolante la homon for de la tero, estas esence malhelpa al reala progreso de la homaro, ĉar ĝi neglektas la zorgojn pri materia progreso, al kiu la naturo lin instigas, kiel devo.

Tamen, eĉ se la rezultoj estas nekompletaj, ili ne estas malpli realaj. Kiom da homoj kuraĝiĝis kaj subteniĝis sur la vojo de bono pro tia malpreciza espero ! Kiom da ili haltis ĉe inklino al malbono pro la kredo, ke ili kompromitas la estontecon ! Kiom da noblaj virtoj tia kredo elvolvis ! Ni ne disdegnu la kredojn de pasinta tempo, kiel ajn neperfektaj ili estas, se ili kondukas al bono ; ili estis konformaj al la grado de progreso de la homaro. Sed, progresante, la homaro volas kredojn en harmonio kun novaj ideoj. Se la elementoj de fido restas senŝanĝaj kaj distanciĝas for de la spirito, tiam ili perdas ĉian influon, kaj la bonon, kiun ili faris en certa tempo, ne povas plu daŭri atingi, ĉar ili jam ne estas konformaj al la cirkonstancoj.

Por ke la doktrino pri la estonta vivo alportu de nun la esperatajn fruktojn, necesas antaŭ ĉio, ke ĝi plene kontentigu la racion ; ke ĝi respondu al la ideo, kiun oni faras pri la saĝeco, pri la justeco kaj pri la bonkoreco de Dio ; ke ĝin trafu nenia demento de la scienco ; necesas, ke la estonta vivo lasu en la spirito nenan dubon, nenan necertecon ; ke ĝi estu tiel pozitiva kiel la nuna vivo, kies kontinuaĵo ĝi estas, kiel morgaŭo estas kontinuaĵo de hieraŭo ; necesas, ke oni vidu ĝin, ke oni komprenu ĝin, ke oni tuŝu ĝin kvazaŭ per la fingro ; necesas fine, ke la solidareco inter pasinteco, nuntempo kaj estonteco, tra la diversaj vivoj, estu evidenta.

Tia estas la ideo, kiun Spiritismo prezentas pri la estonta vivo ; konsistigas ĝian forton tio, ke ĝi tute ne estas ia homa koncepto, kiu havus nur la meriton esti pli racia, sen tamen havigi pli da certeco ol la aliaj. Ĝi rezultas el studoj faritaj pri la ekzemploj, kiujn liveris malsamaj kategorioj de manifestiĝintaj Spiritoj, kio permesis esplori la eksterkorpan

vivon en ĉiuj ĝiaj fazoj, de la plej alta ĝis la plej malalta grado en la skalo de la estuloj. La peripatioj de la estonta vivo do jam ne estas ia teorio, ia hipotezo pli aŭ malpli probabla, sed rezulto el observoj; temas pri la loĝantoj de la nevidebla mondo, kiuj venas mem priskribi sian staton, kaj tiela estas la situacio, ke la plej fekunda imagpovo ne povus ĝin koncepti, se ili ne prezentigŭs antaŭ la okuloj de la observanto.

Donante materialan pruvon pri la ekzisto kaj senmorteco de la animo, inicante nin en la misterojn de la naskiĝo, de la morto, de la estonta vivo, de la universala vivo, farante al ni palpeblaj la neeviteblajn konsekvencojn de bono kaj de malbono, la spiritisma doktrino, pli bone ol ia ajn alia, reliefigas la bezonon de individua pliboniĝo. Per ĝi, la homo ekscias de kie li venas, kien li iras, kial li estas sur la tero ; bonfarado havas celon, praktikan utilecon ; la doktrino ne formas la homon nur por la estonteco, ĝi lin formas ankaŭ por la nuntempo, por la socio ; per sia morala pliboniĝo, la homoj preparos sur la tero regnon de paco kaj de frateco.

La spiritisma doktrino estas do la plej potenca moraliga elemento, tial ke ĝi celas samtempe la koron, la inteligenton kaj la personan intereseon, bone komprenatajn.

Pro sia esenco mem, Spiritismo tuŝas ĉiujn branĉojn de fizikaj, metafizikaj kaj moralaj konoj ; la demandoj, kiujn ĝi ampleksas, estas sennombraj ; tamen, ili povus resumiĝi per la sekvantaj punktoj, kiuj, konsiderataj kiel establitaj veraĵoj, konsistigas la programon de spiritismaj kredoj.

Fundamentaj principoj de la spiritisma doktrino rekonataj kiel sendubaj veraĵoj

La korpa morto de Allan Kardec interrompis la Verkaron de tiu eminenta Spirito ; ĉi tiu volumo finiĝas demandosigne, kaj multaj legantoj dezirus vidi ĝin logike solvita, kiel scipovis la klera profesoro pri Spiritismo ; sendube tiel devus esti.

Okaze de la spiritisma kaj spiritualisma Kongreso en 1890, la delegitoj deklaris, ke ekde 1869 sinsekvaj studoj montris novajn aferojn, kaj ke, laŭ la instruo proponita de Allan Kardec, kelkaj principoj de Spiritismo, sur kiuj la majstro bazu sian instruon, devas esti reviziataj kaj metataj en akordo kun la ĝenerala progreso de la Scienco dum la lastaj dudek jaroj.²⁹

²⁹ Hodiaŭ, pli ol 150 jarojn post la publikigo de *La Libro de la Spiritoj*, la doktrinaj fundamentoj de Spiritismo, revelaciitaj de la superaj Spiritoj kaj kunordigitaj de Allan Kardec, restas nerefuteblaj kaj aktualaj,

Dua Parto

Tiu fluo de ideoj, komuna ĉe la kongresaj delegitoj venintaj el ĉiuj partoj de la mondo, pruvis, ke nova volumo devas esti produktita, por parigi la instruon de Allan Kardec al tiu, kiun konstante liveras al ni la serĉado de vero.

Ĝi estos la verko de la *Komitato pri propagando* ; ni multe kalkulas pri la bonaj konsiloj de niaj kunfratoj, kiuj pruvis ĉe la Kongreso sian kompetentecon koncerne plej altajn filozofiajn demandojn, por helpi la komitaton en la konstruo de kolektiva, senĉese progresema laboro ; tiu volumo siavice devos esti reviziata, kiam nova Kongreso tion decidus. « La Scienco, diris Allan Kardec, estas vokata konsistigi la veran genezon, lau la leĝoj de la naturo.»

« Malkovroj de la Scienco gloras Dion, tute ne Lin malaltigas ; ili detruas nur tion, kion la homoj konstruis surbaze de la falsaj ideoj, kiujn ili faris pri Dio. »

« Irante kun la progreso, Spiritismo neniam estos preterpasita, ĉar se novaj eltrovoj montros, ke ĝi eraras ĉe unu punkto, tiam ĝi ŝanĝiĝos ĉe tiu punkto ; se nova veraĵo riviĝas, ĉi veraĵon ĝi akceptas. » (*La Genezo*, ĉap. I, n° 55.)

Pierre-Gaëtan LEYMARIE

FINO

malgraŭ ĉiuj progresoj kaj konkeroj de la Scienco okazintaj laŭlonge de l'tempo. – *Noto de Evandro Noletto Bezerra en sia portugallingva traduko, publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

EKSPLIKA NOTO³⁰

Hodiaŭ ili kredas kaj ilia fido estas neskebla, ĉar ĝi sidas sur evidenteco kaj demonstro kaj ĉar ĝi kontentigas la racion. [...] Tia estas la fido de la spiritistoj, kaj la pruvo de ĝia potenco kuŝas en tio, ke ili klopodas por pliboniĝi, subigi siajn malbonajn inkliojn kaj meti en praktikon la maksimumojn de la Kristo, rigardante ĉiujn homojn kiel fratojn, sen prefero pri rasoj, kasto kaj sektoj, pardonante siajn malamikojn, pagante malbonon per bono, laŭ la ekzemplo de la dia modelo. (KARDEC, Allan. Spiritisma Revuo 1868. 1. eld. Rio de Janeiro: FEB, 2005. P. 28, Januaro 1868.)

La esplorado rigore racia kaj scienca, farita de Allan Kardec, de faktoj pruvintaj la komunikiĝon inter homoj kaj Spiritoj rezultigis la strukturadon de la Spiritisma Doktrino, sistemigita laŭ vidpunktoj scienca, filozofia kaj religia.

Ek de 1854 ĝis lia forpaso en 1869, lia laboro konsistis el kvin bazaj verkoj: *La Libro de la Spiritoj* (1857), *La Libro de la Mediumoj* (1861), *La Evangelio laŭ Spiritismo* (1864), *La Ĉielo kaj la Infero* (1865), *La Genezo* (1868), krom la verko *Kio estas Spiritismo?* (1859), serio da verketoj kaj 136 eldonoj de la *Spiritisma Revuo* (de Januaro 1858 ĝis Aprilo 1869). Post lia morto estis eldonita la libro *Postmortaj Verkoj* (1890).

La detala kaj senpartia studado de tiuj verkoj permesas al ni eltiri bazajn konkludojn: a) ĉiuj homoj estas nemortemaj Spiritoj kreitaj de Dio en egalaj kondiĉoj, submetataj al samaj naturaj leĝoj de progreso, kiuj grade kondukas ĉiujn al perfekteco; b) la progreso fariĝas tra sinsekvaj spertoj,

³⁰ Noto aldonita de la eldonejo de Brazilia Spiritisma Federacio al la portugallingva traduko de Evandro Noleto Bezerra. Jen ĝia teksto:

Ĉi "Eksplika Noto", publikigita laŭ akordo kun la Federacia Publika Ministerio, celas elpruvi la neekziston de ajna diskriminacio aŭ antaŭjuĝo en kelkaj lokoj de la verkoj de Allan Kardec, kiuj entute karakteriziĝas per subteno de la principoj de kristanaj frateco kaj solidareco, enhavataj en la Spiritisma Doktrino.

dum sennombraj reenkarnejoj, per necesa travivado en ĉiuj sociaj segmentoj, kio estas por la Spirito la sola maniero akumuli la lernadon necesan al sia disvolvo; c) dum la tempo inter la reenkarnejoj la Spirito restas en la Spiritita Mondo, povante komunikiĝi kun la homoj; d) la progreso obeas al la moralaj leĝoj instruitaj kaj plenumitaj de Jesuo, nia gvidanto kaj modelo por ĉiuj homoj dezirantaj konscie kaj volonte disvolviĝi.

En diversaj punktoj de sia verkaro, la Kodiginto aludas al Spiritoj enkarneigitaj en krudaj kaj sovaĝaj triboj tiam ekzistantaj en iuj regionoj de la planedo, kiuj triboj, en kontakto kun aliaj polusoj de civilizado, estis spertantaj sennombrajn transformiĝojn, el kiuj multaj evidente bonfaris iliajn membrojn kaj rezultis el la ĝenerala progreso, al kiu estas submetataj ĉiuj etnoj, sendepende de ilia haŭtkoloro.

En la tempo de Allan Kardec, la ideoj frenologiaj de Gall kaj fiziognomikaj de Lavater estis akceptataj de eminentaj scienculoj, dum forte agitis la tiamajn komunikilojn, la intelektularon kaj la popolon ĝenerale, la publikigo, en 1859 — du jarojn post la lanĉo de *La Libro de la Spiritoj* — de la libro pri la *Evoluo de la Specioj*, de Charles Darwin, kun la naturaj malĝustaĵoj kaj miskomprenaĵoj de ĉia nova scienco. Cetere, la kredo, ke la fizionomiaj trajtoj vidigas la homan karakteron, estas tre malnova kaj pretendas la ekziston de ŝajnaj rilatoj inter la fizika kaj la morala aspektoj.

La Kodiginto ne konsentis pri diversaj punktoj de tiuj tiel nomataj sciencoj. Li do provis taksu la konkludojn de tiuj eminentaj esplorantoj en la lumo de la revelacioj de la Spiritoj, metante en la diskutadon la spiritan elementon kiel decidan faktoron por la solvado de la problemoj pri la homaj diverseco kaj malegaleco.

Allan Kardec trovis, en la principoj de la Spiritisma Doktrino, klarigojn montrantajn al saĝaj, superaj leĝoj, pro kio li asertis, ke Spiritismo ebligas “solvi milojn da problemoj historiaj, arkeologiaj, antropologiaj, teologiaj, psikologiaj, moralaj, sociaj, ktp.” (*Spiritisma Revuo*, 1862, p. 401). Efektive, la universalaj leĝoj de amo, karitato, senmorteco de la animo, reenkarnejo, evoluo konstituas novajn parametrojn por kompreno pri la disvolviĝo de la homaj grupoj en la diversaj regionoj de la mondo.

Tiu kompreno pri la Diaj Leĝoj permesas al Allan Kardec aserti, ke:

Korpo devenas de korpo, sed Spirito ne devenas de Spirito. Ĉe la samrasoj estas sole sangsameco. (La Libro de la Spiritoj, demando n^o 207.)

[...] Spiritismo, redonante al la Spirito ĝian veran rolon en la Kreaĵaro, konstatante la superecon de inteligento antaŭ materio, nature malaperigas

ĉiujn diferencojn starigitajn inter la homoj laŭ korpaj kaj mondumaj avantaĝoj, sur kiuj la sola fiero fondis la kastojn kaj la stultajn antaŭjuĝojn pri haŭtkoloro. (Spiritisma Revuo, 1861.)

La rasaj privilegioj originas en tio, ke homoj ĝenerale flankklaras la spiritan principon por nur konsideri la eksteran, materian estaĵon. El kompleksia forteco aŭ febleco ĉe unuj, el haŭtkolora diferenco ĉe aliaj, el naskiĝo en riĉegeco aŭ mizero, el samsanga deveno nobela aŭ pleba ili konklude konsentis pri ia natura supereco aŭ malsupereco; sur tiu ĉi donitaĵo ili starigis siajn sociaj leĝojn kaj la rasajn privilegiojn. El tiu limigita vidpunkto, ili estas konsekvencaj kun si mem, ĉar, se nur konsideri la materian vivon, certaj klasoj ŝajnas aparteni, kaj ili efektive apartenas, al malsamaj rasoj. Sed se oni konsideras el la vidpunkto de la spirita estaĵo, de la estaĵo esenca kaj progresiva, unuvorte de la Spirito, kiu ĉion antaŭekzistas kaj postvivas, kies korpo estas nenio alia ol portempa envolaĵo, variante, kiel vestaĵo, laŭ formo kaj koloro; se krome el la studado pri la spiritaj estaĵoj elsekvas la pruvo, ke tiuj estaĵoj havas identajn naturon kaj originon, ke sama estas ilia destino, ke ĉiuj deiras de sama punkto kaj direktiĝas al sama celo; ke la enkorpora vivo estas nenio alia ol interokazaĵo, unu el la fazoj de la vivo de la Spirito, necesa al lia intelekta kaj morala progreso; ke pro tiu antaŭeniĝo la Spirito povas sinsekve surmeti diversajn envolaĵojn, naskiĝi en malsamaj pozicioj; oni do alvenas al la gravega konsekvenco pri la egaleco de naturo kaj, de tie, al la egaleco de sociaj rajtoj de ĉiuj homoj kaj al la nuligo de la rasaj privilegioj. Jen kion Spiritismo instruas. Vi, kiuj neas la ekziston de la Spirito por nur konsideri la korpan homon, kiuj neas la eternecon de la inteligenta estaĵo por nur konsideri la nunan vivon, vi forpuŝas la solan principon, sur kiu prave sidu la egaleco de rajtoj, kiun vi postulas por vi mem kaj por viaj similuloj. (Spiritisma Revuo, 1867)

Ĉe la reenkarneco, formalaperas la antaŭjuĝoj pri rasoj kaj kastoj, ĉar la sama Spirito povas renaskiĝi riĉa aŭ malriĉa, grandsinjoro aŭ proleto, mastro aŭ subulo, liberulo aŭ sklavo, viro aŭ virino. El ĉiuj argumentoj, prezentitaj kontraŭ la maljusteco de servuteco kaj sklaveco, kontraŭ la subigo de la virino al la leĝo de l' pli forta, neniu superas, per logikeco, la materian fakton de la reenkarneco. Se do la reenkarneco sidigas sur iu natura leĝo la principon de la universala frateco, sur la sama leĝo ĝi sidigas tiun pri la egaleco de la sociaj rajtoj kaj sekve tiun de la libereco. (*La Genezo*, ĉap. I, n-ro 36. Vidu ankaŭ en la Spiritisma Revuo, 1867.)

En tiu tempo, Allan Kardec sciis nur, kion pluraj aŭtoroj rakontis pri la afrikaj sovaĝuloj, ĉiam reduktitaj al preskaŭ tuta bruteco aŭ al malhumana sklaveco.

Surbaze de la tiamaj “sciencaj” informoj la Kodiginto ripetas per aliaj vortoj, kion eŭropaj esploristoj priskribis, reveninte el siaj vojaĝoj al la negra Afriko. Li tamen kategorie pritraktas la demandon pri la rasa antaŭjuĝo:

Ni laboras por havigi fidon al tiuj, kiuj nenion kredas; por disvastigi kredon, kiu faras la homojn pli bonaj unuj kontraŭ aliaj, kiu al ili instruas pardoni siajn malamikojn, sin reciproke rigardi kiel fratojn sen distingo pri rasoj, kastoj, sektoj, haŭtkoloro, opinio politika aŭ religia; unuvorte kredon, kiu naskas la veran senton de karitato, frateco kaj sociaj devoj. (KARDEC, Allan. *Spiritisma Revuo* 1863 – 1. eld. Rio de Janeiro: FEB, 2005. – januaro 1863.)

La virta homo estas bonkora, humana kaj bonvolema por ĉiuj, sen escepto de rasoj kaj kredoj, ĉar li vidas fratojn en ĉiuj homoj. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. XVII, n-ro 3.

Gravas ankaŭ kompreni, ke la tekstoj publikigitaj de Allan Kardec en la *Spiritisma Revuo* celis submeti al la ĝenerala taksado la komunikaĵojn de la Spiritoj, krom ankaŭ kontroli la konformecon de iliaj instruoj al teorioj kaj sistemoj de la penso tiam akceptataj. En Noto al la ĉapitro XI, n-ro 43, en la verko *La Genezo*, la Kodiginto eksplikas tiun metodologion:

Kiam, en la *Spiritisma Revuo* de januaro 1862, ni publikigis artikolon pri la interpretado de la doktrino pri la defalintaj anĝeloj, ni prezentis ĉi teorion kiel nuran hipotezon, havantan ne alian aŭtoritaton krom tiu de kontestebla, persona opinio, ĉar tiam mankis al ni elementoj sufiĉe kompletaj por kategoria aserto. Ni ĝin proponis kiel provon, celante instigi al ĝia ekzameno, sed preta, se necese, ĝin forlasi aŭ modifi. Hodiaŭ, trapasinte la provon de la universala kontrolo, ĉi teorio estas ne nur bone akceptita de la granda plimulto de la spiritistoj, kiel la plej racia kaj plej konforma al la suverena justeco de Dio, sed ankaŭ konfirmata de la plejmulto el la instruoj donitaj de la Spiritoj pri tiu temo. Tio sama okazis koncerne la originon de la adama raso. (*La Genezo*, ĉap. XI, piednoto al la n-ro 43.)

Fine, urĝas rekoni, ke la ĉefa celo de la Spiritisma Doktrino konsistas en la morala plibonigo de la homo, pro kio la sciencaj demandoj kaj esploroj, kvankam gravaj, okupas duarangan pozicion, se konsideri ilian provizoran karakteron, kiu rezultas el la progreso kaj el la ĝenerala plibonigo. Ĉi-rilate, estas prava la averto de la Kodiginto:

Estas vero, ke ĉi tiu demando kaj aliaj al ĝi ligitaj malproksimiĝas de la morala vidpunkto, kiu estas la ĉefa celo de Spiritismo. Jen kial oni

Eksplika Noto

malpravus, farante el ĝi objekton de konstantaj absorbaj zorgoj. Cetere, ni scias, ke, koncerne al la principo de la ekzistaĵoj, la Spiritoj, kiuj ne ĉion konas, povas diri nur, kion ili scias aŭ kredas scii. Sed ĉar estas personoj, kiuj povus tiri el la diverĝeco inter tiuj sistemoj ian indukton kontraŭ la unueco de Spiritismo, ĝuste tial, ke ili estas formulitaj de la Spiritoj, utilas kompari la motivojn por aŭ kontraŭ, en la intereso mem de la doktrino, kaj apogi sur la konsento de la plimulto la juĝon, kiun oni povas fari pri la valoro de iuj komunikaĵoj. (*Spiritisma Revuo*, 1862.)

Post tiuj konsideroj, ni rajtas konkludi, ke en la Spiritisma Doktrino regas plej absoluta respekto al la homa diverseco kaj ke, konsekvence, al ĉiu spiritisto koncernas la devo kunagi por la progreso de la Homaro, praktikante la karitaton laŭ ties plej ampleksa senco (“bonvolo por ĉiuj, indulgemo kontraŭ aliulaj neperfektaĵoj, pardono de la ofendoj), kiel ĝin komprenis Jesuo, nia Gvidanto kaj Modelo, sen ia ajn antaŭjuĝo pri haŭtkoloro, etno, sekso, kredo aŭ kondiĉo ekonomia, socia aŭ morala.

APENDICO

(Al la 15^a eldono portugallingva de POSTMORTAJ VERKOJ (OBRAS PÓSTUMAS), de la Brazila Spiritisma Federacio, en 1975.)

Inter la “Transskribaĵoj, **in extenso**, el la Libro de Antaŭvidaĵoj Koncerne Spiritismon — manuskripto plej zorge verkita de Allan Kardec, el kiu ankoraŭ neniuj ĉapitroj estis publikigita”, entenata en “Postmortaj Verkoj” — kolekto da tekstoj de la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, aranĝita kaj eldonita en Parizo, en la jaro 1890, de P.-G. Leymarie — ne troviĝas la dokumento de la 20^a de oktobro 1863, aperinta en “Reformador” de 1975, sur paĝoj 219 kaj 220.

Se la majstro Allan Kardec estus decidinta enmeti ĉi dokumenton en tiun “Libro de Antaŭvidaĵoj Koncerne Spiritismon”, li certe estus ĝin lokinta tuj post la RIMARKIGO al tiea NOTO de 14-9-1863, sekvinta la demandojn kaj respondojn rilatajn al la titolo **Imitado de l’ Evangelio** (vidu paĝojn ___ ĝis ___). Ni kredas, ke Pierre-Gaétan Leymarie siavice, en la duobla karaktero de organizinto kaj eldoninto de la menciita kolekto, nepre aldonus la dokumenton al la postmortaj verkoj, pro ties rekta ligo kun la dirita temo, en la okazo se li sciintus pri ĝi antaŭ la jaro 1890, okazo ja tre neprobabla.

La formo adekvata por aligi, post tiel longa tempo, ĉi dokumenton al “POSTMORTAJ VERKOJ”, estas tiu, kiun ni nun adoptas, nome kiel apendico al la libro, kun propre lokita **referenca noto**.

Kazo de duobla vidado Nepublikigita paĝo de Allan Kardec

Noto de la redakcio — Dum esplorado de malnovaj dokumentoj, kiuj apartenis al la Spiritisma Societo fondita de Allan Kardec, ni trovis ĉi paĝon, kiun la majstro propramane skribis, de komenco ĝis fino, kaj kiun ni senprokraste reproduktas.

Imitado de L' Evangelio Fenomeno de klarvideco

Parizo, la 20^{an} de oktobro 1863

Fraŭlino V..., naskita en Liono, estas dotita per rimarkinda klarvideco, kiu al ŝi ebligas ne nur vidi Spiritojn en sia normala, nesomnambula stato, sed ankaŭ plej precize rigardi faktojn malproksime okazantajn.

Iam, en Parizo, kien ŝi venis por pasigi kelkajn tagojn, ŝi decidis viziti min en mia domo sur la Strato Sainte-Anne, kaj renkontis mian edzinon, ĉar — depost mia reveno el Sainte-Adresse — mi retiriĝis al Ségur, por pli trankvile labori super mia verko pri la Evangelio. Ne eblis nia renkontiĝo, ĉar Fraŭlino V... revene vojaĝis ankoraŭ vespere. Sed dum konversacio, mia edzino diras al ŝi:

— “Ĉar vi ne povos intervidiĝi kun mia edzo, kion li multe bedaŭros, ĉu al vi ne eblus spirite transportiĝi kaj vidi lin kie li troviĝas?”

Post momenta koncentriĝo la Fraŭlino diris:

— “Jes, mi vidas lin; li troviĝas teretaĝe en hele lumigita ĉambro kun tri fenestroj... Ho!... kiel gaja ĉio montriĝas! Ĝardenoj ĉirkaŭas la domon... ĉie troviĝas arboj kaj floroj... Ĉio spiras kvieton kaj trankvilon... Li sidas, laborante, proksime al fenestro... Lin ĉirkaŭas amaso da Spiritoj, zorgante pri lia sano... el ili iuj, ŝajne tre progresintaj, inspiras lin; unu ŝajnas speciale supera al la ceteraj, de kiuj li ricevas elmontrojn de respekto.

Demando — Ĉu vi perceptas la naturon de la laboro, pri kiu mia edzo okupiĝas?

Respondo — Atendu momenton... Mi vidas, ke Spirito tenas libron de grandaj dimensioj... li ĝin malfermas kaj montras al mi ion skribitan... mi ĝin legas: *Evangelio*.

RIMARKO — Mi efektive laboradis super mia libro pri la Evangelioj, kies titolo ankoraŭ estas sekreto por ĉiuj. Fraŭlino V... ne povus koni ĝin. Koncerne mian edzinon, ŝi ne sciis, ĉu mi tiam okupiĝas pri tio aŭ pri iu alia temo. Nenio do povis influu la penson de la klarvidantino. Krom tio, preciza estas la priskribo de la lokoj kaj ja rimarkindas, ke ŝi neniam antaŭe vidis tiujn lokojn. La ĉambro, kiun mi okupis, havas ĝuste tri fenestrojn, kio ne estas io ordinara, kaj ĝi ĉiuflanke limas kun la ĝardenoj. Mia edzino ne sciis, ke mi troviĝas en tiu ĉambro, kiu estas la salono. Ŝi povus, kun plej granda probableco, supozi, ke mi troviĝas en la skriboĉambro. Ĉiuj

Apendico

cirkonstancoj konverĝas al la pruvo, ke Fraŭlino V... efektive ĉion alestis kaj ne fariĝis ludilo de sia propra imagemo. Tiu fakto miaopinie konstituas pruvon pri la interesiĝo de la Spiritoj koncerne tiun laboron krom ankaŭ pri la asistado, kiun ili havigis al mi kaj al miaj laboroj.

Allan Kardec.”



Eldona Konsilio:

Jorge Godinho Barreto Nery – Prezidanto
Geraldo Campetti Sobrinho – Eldona Kunordigado
Cirne Ferreira de Araújo
Evandro Noleto Bezerra
Maria de Lourdes Pereira de Oliveira
Marta Antunes de Oliveira de Moura
Miriam Lúcia Herrera Masotti Dusi

Eldona Produktado:

Rosiane Dias Rodrigues

Traduko:

Affonso Borges Gallego Soares
Paulo Sérgio Viana

Revizio:

Affonso Borges Gallego Soares

Kovrilo:

Evelyn Yuri Furuta

Grafika Projekto kaj Diagramado:

Rones José Silvano de Lima – www.bookebooks.com.br

Teknika Normigo:

Biblioteca de Obras Raras e Documentos Patrimoniais do Livro

Tiu ĉi libro estis presita de Lis Gráfica e Editora Ltda., Bonsucesso, SP, je preskvanto de 1 milo da ekzempleroj, ĉiuj en fermita formato de 150x230 mm kaj kompostareo de 120x190 mm. La uzitaj paperspecoj estis Offset 75g/m² por la librokerno kaj Kartono 250g/m² por la kovrilo. La ĉefa teksto estis kompostita en tipo Adobe Garamond 12/15 kaj la titoloj en Adobe Garamond 16/19,2. Presita en Brazilo.

POSTMORTAJ VERKOJ

ALLAN KARDEC

Ĉi libro, publikigita post la elkarniĝo de Allan Kardec, prezentas bonstile verkitan biografion de la Kodiginto, kiun sekvas parolado eldirita de Camille Flammarion okaze de lia entombigo. Temas pri kolekto da gravaj tekstoj postlasitaj de Allan Kardec, kaj ĝi estas dividita en du partoj. En la unua estas pritraktitaj interalie tiaj temoj kiel: spiritisma kredkonfeso rezonata; karaktero kaj religiaj sekvoj de la manifestiĝoj de la Spiritoj; studo pri la naturo de la Kristo; pereiga influado de la materiismaj ideoj; kolektivaj kulpelpagoj; egoismo kaj fiero; libereco, egaleco, frateco. La dua enhavas registrojn pri la spiritisma iniciĝo de Allan Kardec; lia misio sur la Tero; mesaĝoj de la Spirito de Vero kaj aliaj respektindaj Spiritoj; la aŭtodafeo de Barcelono; la misiista vojiro de la Kodiginto, krom ankaŭ ia “elmontro de motivoj”, prezentita en la “Konstitucio de Spiritismo” kiel postlasaĵo de la liona majstro al la estontaj spiritismaj societoj.

Libroj de la Spiritisma Kodigo:

La libro de la spiritoj, 1857 | *La libro de la medianoj*, 1861 |

La evangelio laŭ spiritismo, 1864 |

La ĉielo kaj la infero, 1865 | *La genezo*, 1868

ISBN 978-65-5570-084-8

